

Elektitaj artikoloj el la Bultenoj de la Albana Esperanto Instituto

ĝŝjĥĉŭ

Numeroj 81-108 (aŭgusto 2013)

Omaĝo al la fondaĵo Evidente

(ESPERANTISTOJ ESPERIGAS ESPERANTOJN)

Agado E3 naskighis en 1966. Ghin iniciatis s-ano Jacques TUINDER rezulte de informado flanke de nederlanda Fondajho Prof. D-ro H. J. M. WEVE, kies tiutempa celo estis adoptigi operacieblajn blindulojn en Orienta Afriko. En novembro 1966 li alvokis la esperantistaron kunlabori por „esperigi esperantojn”. Kaj post tio la simbolo E3 farighis vaste komprenata kaj konata. E... estas esperantisto, uzanto de la lingvo de D-ro ZAMENHOF E... estas esperigi E... estas blinda au okulmalsana kunfrat (in) o, homo ne vidanta sed esperanta (re) akiri vidpovon. Agado E3 celas montri efektivan solidarecon kun homoj blindaj kaj malforte vidantaj lau la spirito kaj ekzemplo de D-ro L. L. ZAMENHOF. Agado E3 forte batalas kontrau fenomeno absurda: milionoj da homoj vivas inter ni, kiuj estas senbezone, nenecese, eviteble vidhandikapitaj. Ni povus al ili (re) doni vidkapablon, se ni vidus ilin kaj ilian sorton.

Aktie ZIENDEROGEN (internacilingve Agado EVIDENTE)

Aktivinte dum preskau tridek unu jaroj kiel privata persono, kiu chion faris proprakoste en sia libera tempo, finfine - la 30-an de septembro 1996 - Aktie ZIENDEROGEN (internacilingve Agado EVIDENTE) farighis oficiala kaj notarie registrita fondajho. Feliche ankaŭ la nova nomo instigu esperantistojn kunagadi, char ghi entenas denove la 3 literojn E: E-vid-E-nt-E! (Nau el dek helpantoj de Jacques TUINDER parolas au almenau komprenas lian gepatran lingvon. Tio finfine estis la kauzo, ke la eksa E3-agado baptighis per pli komprenebla nederlandlingva nomo ZIENDEROGEN (=EVIDENTE) . E3 ja evidente estas enigma volapukajho por chiu nederlandano neesperantista!)

VERA KAJ JACQUES TUINDER

Ili ambau emeritighis kaj nun gevolontulas, kvankam sur malsamaj terenoj.

VERA

Shi estas aktiva jogo-instruistino, servas al plijaraghuloj kaj gravedulinoj, kaj estas aktiva en porvirina pacomovado kaj la ekumena bazogrupu, al kiu apartenas la edzoparo.

JACQUES

Dum du tagojn semajne li libervole dejhoras en benediktana monahhejo, kie li aktivas kandelfariste, pordiste, kunkuirante, gastigante, ktp. Ankaŭ aliloke li servas volontule, nome en ekologia bonfara revendejo kune kun la organiazajho „Sovagaj Anseroj”, la plej granda sponsoro de ‘Evidente’, kiun li 1966 iniciatis kaj la lastajn jarojn prezidis.

1990 lau decido de UEA li ricevis la premion Onisaburo Deguchi kiel fondinto kaj motoro de la Agado E3.

1998 per la kavalira ordeno „Ridder in de Orde van Oranje Nassau ” li estis honorigita. AMBAU geavas trifoje.

NUNAJ PROJEKTOJ: en Albanio (instituto por blindaj infanoj) ; en Bulgario (rekapabla centro por vidhandikapuloj kaj laborejo por mebloriparado; Srilanko (helpo al du blindulejoj kaj al optikejo) . Por Tajlando ekzistas planoj por maljunulejo por vidhandikapuloj kaj profesiiga (mezgrada) lernejo por geknaboj blindaj kaj malforte vidantaj.

AKTUALE: vizito kun du optikistoj al la ekonomie plej malriĉa lando de Europo, Moldavio (17-28 septembro 2002) . Ni helpas al centoj da infanoj kaj maljunuloj per okulvitroj kaj sponsoros operacion de 110 pacientoj, kies nomoj troviĝas sur listo ricevita de la Asocio de blinduloj en la ĉefurbo. Unu operacio kostos ch. 200 euroj. En preskau ĉiuj evolulandoj ekzistas enorma problemo: blindeco. Temas pri 40 milionoj da blindaj homoj, el tio 80% en la tria mondo. La blindeco de tri el kvar blinduloj estas evitebla, t. e. preventebla (ekz. per havigo de A-vitamino) au kuracebla (ekz. enplantado de artefarita lenso che kataraktulo) . Ni Esperanto-amikoj ofte plendas pri blindeco flanke de la mondo rilate al nia celo, ke la homaro apliku komunan duan lingvon por egalrajte partopreni la mondvastan komunikadon kaj kulturon. Chu ni povas permesi al ni blindecon de la koro, se temas pri evitebla blindeco de la okuloj? Cetere la farita praktika helpo estas bona propagando por Esperanto!

Stichtung

Tel. kaj

faksilo:+31

(0)

Henegouwenlaan

NL-1966

RH

retposto:

vera.

jacques@casema.

Postbanka

konto:10.

20.

UEA-konto:jajt-s.

Zienderogen

251231941

35

Heemskerck

nl

100

(ĉerpita el interreto)

Islamo kaj bankismo

Praaj islamanoj ne estis fakaj bankistoj, tamen lau islama koncepto pri ekonomio, oni lau mi estus kapabla ech malhelpi la nunan internacian krizon, kiu nur superflue estas financa tamen lau fakuloj (ekz-e de BBC-world service) esence estas ekonomia.

Islamo malpermesas (a) vetadon per havajhoj (kiam oni gajnas au perdas ion por nenio) , uzurpan interezon; (b) 'gubn' achet-au-vendan negocon, kiam oni achetas au vendas varon por sub au super ties ekonomia valuro; (c) komercan negocon ekstere de tauga merkato (ekze-e la Profeto malpermesis vendon de nutrajh-karavano antau ol ghi alvenas en la bazon); (d) kash-amasigadon de varoj; (e) spekulacian (borsan) negocado, ankau vendi varon antau ol ghi estas kompleta por funkcii laucele (au de frukto, ktp antau maturigho) ; (f) privatan posedon de akvo-fonto (au nune naft-puto) , au iu ajn enterpreno de amasa publika intereso (ekz-e nune edukado, poshto, transporto) , ktp.

Pri la temo ghus aperas artiloko en brita ĉefa (maldekstr-dekstra) gazeto, Newstatesman (15 dec. 08) , sub titolo BETTER BANKS (pli bonaj bankoj) , la fronta resumo angle tekstighas: "Sharia banking is growoing fast and the mainstream banks are starting to offer Islamic accounts. Its system of shared risks and profits could offer a model for the financial services of the future. "

Esperante: "Sharia-a bankismo rapide kreskas, kaj la ĉefaj publikaj bankoj komencas oferti islamajn kontojn. Ghia sistemo de partoprenataj risiko kaj gajno povus proponi modelon por la financiaj servoj de la estonto. "

Islama bankismo funkcias laŭ (g) la bazo estas: ne gajnu monon pro mono, sed partnereco kun klientoj: oni (proporcie) gajnas kaj perdas kunkune; (h) oni malkuraghigas ludonon, kaj oni evitas negocon kun organizajhoj, kies komerca bilanco estas pli ol trione en ŝuldo (fakte tiel estas ĉiuj bankoj) ; (i) ĝi ludonas monon el propraj havaĵoj (ne spekulacie luprenas cent kaj ludonas ducent same kiel vetspirite faras ĉefaj bankoj de aventura kapitalismo, kio fakte malkorvis - oni ne diru - kausis la nunan ekonomian krizon; (j) Ekz-e oni ne ludonas monon al kliento por aĉeti domon (komparu tradician hipotekon) , sed ludonas la domon si mem al tiu, ĝis ĉi tiu pagos la tutan valoron de la domo, kiam tiu tuj farighos posedanto de ĝi. Kompreneble la kliento tielmaniere restas ankaŭ partnero pri la gajno de dom-ludona negocio. (k) Laŭ tiu artikolo, la realo estas ke la islama bankismo kreskas pri rapide al aliaj mondaj ĉefaj bankoj, kun jara meznombra kreskado de inter 15 kaj 20 procento.

La IMF (internacia monda funduzo) diras, ke la islama bankismo komencis per unu instituo en unu lando en 1975 ĝis pli ol 300 en 75 landoj nuntempe. Shaira-a bankismo farighas publika por islamanoj kaj ne islamanoj ĉirkau la mondo. Ankaŭ ne-islamaj fakuloj kaj akademianoj laudis la sukceson de Shita-a bankismo, kaj Gordon Brown, kiam li estis la brita ministro de financo ripete konsilis al la Urbo de Londono esti "Pordego de islama financo".

Sharia-a bankismo nun staras aparte de ĉiuj aliaj bankoj kiuj nuntempe prenas subtenon de ties ŝtatoj, ĉar havaĵoj de tiu estas abunda (\$639b nuntempe) . Multaj aliaj informoj haveblighas en tiu ampleksa artikolo, kiun verkis bankisto Mahdi Hasan.

Viaj eblaj komentoj estus bovenuntaj.

Husejn

Humoraĵoj

Albanaj

- La kandidato por deputito aldiras al sia elektantaro: mi petas vin kompili liston kun aferoj bezonataj de vi je rekompenco de via voĉo por mi!

Ekvidinte la liston la kandidato konstatas ke ĉiuj bezonas hejmon, escepte de unu kiu bezonis hararon ĉar li estas kalvulo. Tiam la kandidato ordonis al sia sekretario ke ankaŭ la tiu kalvulo noti hejmon.

La kalvulo protestis: mi volas hararon, ne hejmon!

La kandidato respondis: ne protestu envane ĉar ĉiuj vi ja lanaĵon ricevos!

- Iu reĝo havis filinon malsaĝan je aĝo por edziniĝo. Sed li ne volis ankoraŭ edzinigi ŝin. Pro tio li petis sian filinon rifuzi ĉiuj geedziĝproponojn dirante ĉiamfoje nur "Ne" al la demandoj: ĉu vi volas edziniĝi?

Sed iufoje venis iu saĝa junulo kiu demandis ŝin: Ĉu estas vere ke via patro ne volas edzinigi vin?-Ne-respondis la junulino.

Ĉu la patro kontraŭus nian geedziĝon?- Ne -respondis denove la reĝa filino!

- La edzo revenas hejmen tre laca kaj petas sian edzinon: diru al mi ion kio samtempe ĝojigus kaj malĝojigus min!

-Nu bone, respondas la edzino: La peniso de nia najbaro estis tre malgranda!

- Du malsaĝaj trafikpolicistoj veturantaj per Fiat Uno haltigis aŭtilon je tipo Audi A4 kie veturis kvin personoj. -Kial vi haltigis nin, petis la veturantoj?!-Ĉar vi estas ja kvin personoj dum la aŭtilo notas A4!- Aha, tiam kial vi veturas per Fiat Uno dum vi estas du personoj?!..
- Dumnokte je apudeco de la tombejo stariĝas la skeleto de iu mortinto kiu volas timigi la hazardajn preterpasantojn. Ekvidinte viron, li postsekvas lin petante cigaredon. La viro tute indiferece respondis: Mi admonus vin rezignu de la fumado, ĉar vi aspektas tre malgrasa!
- La edzo laboris fore de sia hejmo, pro tio li venis tien nur unufoje semajne. Lia edzino plendis ĉiam ke io difektiĝis kaj la edzo ne riparos ĝin. Ekzemple iufoje difektiĝis la akvokrano sed la edzo respondis: mi ne estas hidraŭliko, tial mi ne povas ripari ĝin! Aliffoje difektiĝis la ŝrankoseruro, sed denove la edzo sin pravigis per: mi en estas seruristo!

Post iom da tempo, la edzo konstatis ke la akvokrano kaj la ŝrankoseruro estis jam bone riparitaj. Li demandis la edzinon: kiu riparos ilin?- Tion faris nia najbaro. -Bone, kion postulis li je rekompenco?- Fakte li demandis min kuiru kekon aŭ enlitiĝi lun li. -Certe vi kuiris kekon, ĉu ne?- Kial do, mi ne estas dolĉaĵisto!

- Du patrinoj fanfaronis unu al la alia pri siaj filinoj. Mia filino, diris la unua, trovis bonan laboron en Italio. Per siaj enspezoj ŝi sukcesis eĉ aĉeti domon, aŭtilon kaj sendis monon ankaŭ al ni. Kaj via filino?- Ankaŭ la mia estas prostituino-respondis la dua..
- Babilis tri viroj, unu greko, unu italo kaj unu albano. La greko diris: ĉe ni en Grekio estis turo 1435 m alta, je proksimeco plus minus unu metron. - Oh, diris la italo, ĉe ni estas ponto je longeco 3245 m je proksimeco plus minus unu metron. - Dum ĉe ni la virinoj naskas siajn bebojn el la buŝo!—Neeble-kontestis la du aliaj. - Mi volus diri je proksimeco plu minus unu metron-klarigis la albano.
- Konkuris arabo, nigrulo kaj albano. La arabo diris: ĉe ni estas tiom varmege ke ni bakas la panon sursable. - Dum ĉe ni oni fritas eĉ la ovojn sursable-aldonis la nigrulo. - La albano konkludis: ni manĝigas la kokinojn per glaciaĵo por ke ili ne ellasu boligitajn ovojn..

Aliaj

- Iu hebrea maljuno estis mortante. Li petis: kie estas mia kara edzino?-Ĉi tie mi estas, kara-respondis la edzino. -Kaj mia kara filino?- Ankaŭ mi ĉeestas, kara patro- Kaj mia kara filo?- Ĉi tie, mia kara patro. - Nu, kiu deĵoras nun ĉe la butikoj?...
- Iu drinkemulo havigis al si vodkon sed mankis al li drinkmanĝo. Tial li eliris al la marbordo por kapti fiŝon. Sed la fiŝo kaptita estis tre aparta, tute ora kaj ĝi petis la viron ke li lasu ĝin libera ĉar ĝi plenumus al li almenaŭ tri dezirojn. -Nu, bone -respondis la drinkemulo. La unua deziro mia estas ke la tuta maro transformiĝu al vodko. -Bone, farite, diris la ora fiŝo kaj la maro envere envodkiĝis. -La dua deziro mia estas ke ĉiuj riveroj transformiĝu en vodkon. - Bone, farite kaj la rivero envodkiĝis.. La tria deziro, la lasta estas ke vi alportu min du glasetojn da vodko!...

Ne ŝi

Kiam mi maldormis sole,
vi estis apud mi.

Kiam sonis sonoriloj,
vi estis apud mi.

Kiam mi vekigis sole,
vi estis apud mi.

Kiam venis la realo,
ne vi.

Metodiko de Esperanto

Pri la Zamenhofaj formoj as, is, os, ktp

La formoj “amatas”, “amitas” k. t. p. , anstataŭ “estas amata”, “estas amita”, per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia *propra* iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se *as, is* k. t. p. signifus “estas”, “estis” sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo “esti”, tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas.

Zamenhof. Respondo 15, *La Revuo*, 1907, Aprilo

*

Forde Aprilo 1907 jam pasis 100 jaroj. Nun finfine “as, is, k. t. p. ” signifas: “ estas, estis k. t. p. ”, kaj la nuna uzo de la formoj: “mi rajtas ami kaj amati”, “li konatas en la tuta urbo”, aŭ, “se mi sciintus, mi estus riĉa” estas nur unu el la pruvoj.

La formo “as” kun signifo “estas” unuafoje uzatis far Antoni Grabowski en la traduko el la pola de “Sinjoro Tadeo” komencita en 1916 kaj finita en la jaro 1918.

En la antaŭparolo de la una esperantlingva eldono legeblas interalie la jena esprimo de Antoni Grabowski: “La majstro, kiun mi konsultadis pri kelkaj novaj vortoj, formoj kaj esprimmanieroj, legis antaŭ sia morto preskaŭ la unuajn kvar librojn...”

(Jam en la unua libro (verseto152) uzatas: "... mastro 'as fore, ... ". Pri tio do Zamenhof estis konsultata, kaj se tiu kaj aliaj "as" restis en la fama verko "Sinjoro Tadeo" ; por mi signifas ke "as, is, ktp, laŭas la Zamenhofan, projekton do mi uzas ilin honoral Zamenhof.

Attilio Liotto

Akraĵ okuloj

Geraldo Mattos

Unuafoje en la sama tago de 2009. 02. 01 je la 6-a horo kaj 15 minutoj mi komencas ĉi tiun artikoleon por la Bulteno de la Albana Esperanto-Instituto, ĉar dufoje ĉinokte mi trovis du participajn erarojn, kiuj estas fantomoj kaj fulmoj, kiuj avidas miajn akrajn okulojn.

La unua trovis min sur la p. 282 de PIV 2005 sub la kapvorto *elemento*, kiu legigas al mi la miselectitan particon /supozita/: *4* Substanco supozita simpla k konsistanta el samsubstancaj eroj [...]. La ĝusta esprimo estus: supozata...

La dua senĝene atakis miajn okulojn sur la p. 68 ĉe artikolo de Attilio Liotto en la supre citata Bulteno de AEI per la miselectita participo uzata en la verboformo /sciintus/, kiu havas kelkajn misamikojn en la verboj /devinti/ kaj /povinti/ : Forde Aprilo 1907 jam pasis 100 jaroj. Nun finfine "as, is, k. t. p." signifas: "estas, estis k. t. p. ", kaj la nuna uzo de la formoj: "mi rajtas ami kaj amati", "li konatas en la tuta urbo", aŭ, "se mi sciintus, mi estus riĉa". La ĝusta esprimo estus: estintus scianta... estas nur unu el la pruvoj.

En la du okazoj aperas estintaj participoj, kies eraroj dependas de la falsa identigo de participo kun adjektiva frazo: -inta = kiu -is / -ita = kiun [io/iu] -is. Sekve de tio, por la du respondeculoj pri tiuj formoj, ili estas respektive: supozita = kiun [io/iu] supozis / sciinta = kiu sciis. Tio tamen estas ilia lamentinda trompiĝo... Ĉar Esperanto estas lingvo kohera kaj senescepta, kiu obeas al la regulo, ke kio validas por unu, tio validas por ĉiu, mi do simple citas du parojn por pruvi la veran sencon de la du citataj participoj:

farinta = post la faro, koncerne la agulon de la faro / farita = post la faro, koncerne la faron de tiu agulo.

Por vidi, ke mi pravas per tiuj du supraj formuloj, mia bonkora geleganto bonvolu iri al la paragrafo 22 de la Ekzercaro de la Fundamento de Esperanto por konfirmi, ke ĉiu el la tieaj naŭ estintaj participoj de la dek ses frazoj povas esti redonataj per la esprimo "post la fakto -i"...

Se nun mi prenas tiun egaligon kaj ĝin aplikas al la du supraj participoj, ni havas la sekvantajn rezultojn:

supozita = post la supozo / sciinta = post la scio. Kaj estas duoble logike konstati, ke post supozo ne plu estas supozo kaj post la scio ne plu estas scio, ĉar ŝajnas al mi evidente, ke nur estas supozo dum la supozo kaj nur estas scio dum la scio... neniam post ili!... Kaj mi do firme esperas, ke ĉiu, kiu min legas, akceptos la sekvantajn konkludojn:

Dum iu supozas / supozis / zupozos / supozus / supozu / supozu, estas supozo: supozanta / supozata... / Dum iu scias / sciis / scios / sciis / sciu /scii, estas scio: scianta / sciata...

Post ol iu supozas / supozis / zupozos / supozus / supozu / supozu, ne plu estas supozo: supozinta / supozita... / Post ol iu scias / sciis / scios / sciis / sciu /scii, ne plu estas scio: sciinta / sciita

Konsekvence de ĉio supra, ni akceptu, ke devinti egalas al esti ne plu devanta / povinti egalas al esti ne plu povanta / supozita estas ne plu supozata / sciinti egalas al esti ne plu scianta...

Albanio sur esperantaj revuoj

Moderna vivo **Albanio-Serbio**

Filmistoj rompas tabuon

Antaŭ nelonge, komenciĝis la produktado de la komuna albana-serba filmo. Ĝi nomiĝas “La miela monato” kaj la subjekto koncentriĝas en la historio kaj adventuroj de du geparoj, unu albana kaj la alia serba, kuniĝintaj danke al elmigrado. Ĝi mesaĝas pacan kaj bonan kunvivadon kaj najbarecon, kaj modelas kiel komunikponto inter ambaŭ nacioj spertintaj almenaŭ dum la lasta jarcento tiom da malamikeco.

La scenaristo estas Genc Permeti el Albanio dum la reĝisoro Goran Pakaleviĉ el Serbio. La scenoj estas jen en Albanio, jen en Serbio, jen ie en Okcidento. Ne estis facile por ambaŭ aŭtoroj trovi la vojon de kunlaboro sed nun ili estas kontentaj kaj certaj je sukceso de sia filmo.

Bardhyl Selimi

Ukrainio

Sendu al ni instruistojn

Post la disfalo de la armeo, gvidita de Skanderbeg, kontraŭ la otomanaj hordeoj, en la fino de XV jc. , kelkmiloj da albanoj el la distrikto de Korĉa, (orienta Albanio) fuĝis al Bulgario kaj de tie al Ukrainio. Aktuale, almenaŭ 5000 ties posteuloj troviĝas en la distrikto de Odeso, mirinde konservinte la lingvojn, morojn, kostumojn kaj aliajn tradiciaĵojn de ilia prapatroj. Kutime, tieaj albanoj geedziĝas nur ene de sia etna komunumo. Ili estas kristanoj je ortodoksa konfesio. La plej granda festotago ilia estas la Tago de Sankta Georgo, honore al Gjergj Kastrioti Skanderbeg, nacia heroo de albanoj. Inter 1945-1961 kiam floris la amikeco kun Sovetunio kaj post 1990 kiam establiĝis la plurisma politika sistemo ambaŭlande, la moviĝeblecoj reciprokaj plifaciliĝis. Tamen la tieaj albanoj plurestis en Ukrainio. Probable ĉiu alia malgranda komunumo estingitus inter 48 milionoj da ukrainianoj! Sed ili bezonas kaj postulas hodiaŭ lernolibrojn kaj instruistojn kiujn plejverŝajne venus el Albanio. La devenlando, kvankam mem ankoraŭ malforta ekonomie, planas fari tion interkonsentote kun la koncernaj edukorganoj ukrainiaj.

Bardhyl Selimi

Politiko

Albanio

Niaj Mandeloj

La 16an de oktobro la nostalguloj de komunismo celebris la 100 datrevenon de la naskiĝtago de la eble plej sovaĝa diktatoro komunisma en la Orienta Eŭropo. Temas pri Enver Hoxha (Hodĵa) naskiĝinta en la urbo de Gjirokaster (Ĝirokaster) en la jaro 1908 kaj mortinta en Tirana en la jaro 1985. La komunistaj fanatikuloj estis planinta elspezi eĉ sufiĉe multe da mono por la solenaĵoj. Ili estis invitintaj ankaŭ rusajn komunistojn, inter alie Jiganovov-on.

Tio nature vekis spontanegan proteston kaj indignon aparte ĉe la ekpersekvitoj de la tiama reĝimo totalisma, kiuj ĉi kaze rememorigis la krimaron, genocidon, subpremon, ekspluatigon ekzercita de la stxtato-partio laŭ direktivoj kaj ordonoj ankaŭ de diktatoro mem.

Lando je loĝantaro apenaŭ pli ol unu miliono en la jaro 1944, estis trafita de amasaj ekzekutoj (ĝis 6000) , politikaj enprizonuloj (ekde la jaro 1945: 10000) , koncentrejoj kaj devigaj laborejoj dislokitaj tra la tuta lando, deportejoj kaj internigejoj kie suferis centmiloj da albanoj ĝis la jaro 1991. Lernejoj kaj preĝejoj, kazernoj, fabrikoj, stadionoj kaj privataj domoj transformiĝis en prizonojn ĉar la jam ekzistintaj ne sufiĉis.

La kondiĉoj en la devigaj labortendaroj estis tiom malbonaj kaj malhumanecaj kiom s-ino Kristine von Kohl, membro de la Komitato de Helsinki estis deklarinta ke “la tendaroj de Mat-hauzen kaj Dakau estis sufiĉe pli bonaj”. La politikaj prizonuloj (kiuj tuttempe nombris almenaŭ 20000, malsekigis la marĉojn, malfermis tunelojn, konstruyis aeroportojn, domblokojn, elektrostacipovojn, fondis amasajn fruktoblokojn sur la marborda montaro, ĉerpis mineralojn en la intermontaj regionoj ktp en terure

malbonaj kondiçoj, kies rezulto estis la perdo de centoj da vivoj. La ribeliçoj de enprizonuloj estis severe punitaj per ekzekutoj kaj multfojoj rekondamnadoj.

Aparte okulfrapaj estas la tiel nomataj Mandeloj de Albanio kiu nombras pli ol 100 pasigintaj en la prizono çis 45 jaroj! Ekzemple:

Sami Dendellia, mortis en la prizono post 43 jaroj; Petrit Velaj pasigis 40 jarojn en la prizono, same kiel Rudolf Hess, la dekstra brako de Adolf Hitler; **Haxhi Mekolli** suferis 40 jarojn en la prizono kaj mortis poste dum la internigado; Musine Kokalari (virino) verkistino, pasigis 40 jarojn en la prizono kaj mortis soleca en iu perdita vilaça kabano; **Ilia Treska** arestita ekde 16 jariço pasigis 35 jarojn en la prizono; **Pjeter Arbnori** (la parlamentestro dum la jaroj 1992-1997) pasigis 28 jarojn en la prizono; **Kudret Kokoshi** kiu estis internigita de nazioj en Mat Hauzen 2 jarojn, pasigis en sia lando pliajn 20 jarojn; **Lazer Rudi**, verkisto pasigis 45 jarojn en la prizono; **Patro Meshkalla**, katolika pastro pasigis 30 jarojn; **Ali Maliqi** pasigis 25 jarojn en la prizono kaj 5 jarojn en la koncentrejoj; **Xhemal Bali** eniris la politikan prizanon 20 jara kaj eliris de tie 52 jara; **Nikolle Zefi** pasigis 26 jarojn; **Osman Kazazi** pasigis 40 jarojn; **Bardhyl Belishova**- 26; **Dhori Grinjoti** 28; **Bedri Spahiu**, eksa alta partigvidanto kaj çenerala prokuratoro pasigis 17 jarojn en la prizono kaj 17 jarojn en la internigejoj; **Dom Simon Jubani**, katolika pastro restis en prizono 28 jarojn.

Fakte, la tuta popolo suferis politike, ekonomie, morale, tiomgrade ke oni konsideris la landon grandan prizanon.

Pro çio tio, oni abomenas la nostalgiecon pri la “glora” gvidanto Enver Hoxha kaj ties kunlaborantoj.

Bardhyl Selimi

Piramida vallë në Bosnje?

Smajl Grbo

Ata që udhëtojnë nëpër Visoko, një qytet rreth 30 km në veri të Sarajevës (Bosnje-Hercegovinë) , që nga autobuzi dhe treni shohin një mal të quajtur Visočica (visoka- do të thotë i lartë) që duket qartazi si piramidë. Por vetëm kur një djalosh me kapele, zotëria magjistër Semir Osmanagiç- Sam, boshnjak nga SHBA, hulumtues, udhëtar, botues, humanist, pronar i një firme në Hjuston, iu ngjit para katër vitesh malit Visočica dhe pa aty dy male të tjerë të ngjashëm me piramidat (që i kujtoi atij një situatë në vendin meksikan Pueblo) ai thirri i eksituar: “Kjo është piramidë! Kjo është një luginë me piramida! Piramida të vetme, unikalë në Evropë!” Dhe nisi ai të gërmojë, të organizojë fotografime nga sateliti, të sjellë aty ekspertë të ndryshëm... dhe hipoteza u bë pothuaj një realitet.

U muarën leje zyrtare dhe ca mbështetje, u organizua një ekip me specialistë kompetentë të ndryshëm, u krijua fondi “Parku arkeologjik ‘Piramida Boshnjake e Diellit, Sarajeve’ ” dhe pas mbështetjesh (edhe mosmbështetjesh, dyshimesh e mohimesh nga ana e disa zyrtarëve bosnio-hercegovinas) pas rezultateve të para kurajuese u organizua para pak kohe një Konferencë e parë shkencore ndërkombëtare “Lugina e piramidave të Bosnjes”.

Në konferencë morën pjesë shkencëtarë të degëve të ndryshme dhe ekspertë piramidash nga Egjipti, Rusia, Britania, Kina, Kroacia, Bosnia, Hungaria, Polonia, Bullgaria... U bënë dy herë ekskursionet të piramidat e Diellit dhe të Hënës, nëpër tunelet disa dhjetra kilometrash nëntokësorë poshtë Luginës së Piramidave, në tempullin nëntokësor të Vratnicës dhe një vizitë ditore në parkun arkeologjik “Sferat e Gurta të Bosnjes” në Zavidoviç. Më pas u lexuan ligjëratat, u dhanë projeksione, diskutime, përfundime..

Dhe ja çfarë thanë të tjerët.

Qytetarët e Visokos, që i kanë përdorur dikur gurët e gatshëm për të ndërtuar shtëpitë e veta ose avllitë, tash thonë: “Një qind për qind ekzistojnë piramidat” (Ata shpresojnë dhe po provojnë të përfitojnë nga turizmi, po bëjnë suvenire, po tregojnë shakara, po këndojnë këngë popullore për piramidat e veta- të Diellit, të Hënës, të Dashurisë, Piramidën e Dragoit të Bosnjes, Tempulli i Tokës) .

Sarajevasit besojnë kryesisht në ekzistencën e piramidave. Disa thonë: “Ekziston diçka e rëndësishme arkeologjike me siguri, Hercegovina ka Madonën (në Mezhdugorje) , Bosnja ka piramidat (në Visoko) .

Të tjerë dyshojnë: Mbase ekzistojnë, mbase jo”.

Po ekspertët?

Dr Nabil Mohamed Sualim, arkeolog dhe egiptolog, tri herë doktor i shkencave, kryetari i kësaj Konference: “Këtu kemi piramida që me siguri janë vepër e duarve të njeriut. Në Visoko është piramida më e madhe në botë, më e lartë se ajo e Keopsit, që ka një domethënie të madhe për njerëzimin.”

Kolegu i tij, dr Soliman Hamed, profesor i arkeologjisë në universitetin e Kajros: “Në të ardhmen Bosnjen dhe Hercegovinën do ta quajmë Vendi i Piramidave.

Optimistë janë edhe dr. A. A. Barakat (Egjipt) , dr. Ivan Shimatoviç (Kroaci) dhe shumë të tjerë. Prof. Dr. Vlatko Določek në recenzën e tij për librin e nëntë të Semir Osmanagiçit “Lugina e piramidave të Bosnjes” (Sarajevë 2006) , duke perifrastuar thënien e Neil Armstrongut në Hënë më 1969 thotë “se zoti Semir Osmanagiç, po të konfirmohet hipoteza e tij, për ekzistencën e Luginës se Piramidave në Visoko, mund të thotë: “Ky është një hap i vogël në praktikën time hulumtuese, por i madh për historinë” Unë do të shtoj: për historinë e Bosnjes, të Evropës, të botës.”

Dhe Semir vetë thotë: Doli që Bosnja dhe Hercegovina ka qenë një nga vendlindjet e qytetërimit njerëzor. Dhe në tunelin për te Piramidat e Diellit, të gjatë 2. 5 km, gjendet mbase edhe shkrimi evropian i parë. (një nga librat e tij titullohet “Qytetërimi para Fillimit të Historisë Zyrtare”) . “Paraalfabeti i Visokos” në gurët në tunelet e thella 20 metra është shumë më i vjetër se shkrimet në Glozel (Francë) thonë ekspertët.

Në të vërtetë duken tashmë shumë “fakte artificiale” dhe prova për të cilat gjerësia e temës nuk na lejon t’i paraqesim këtu. Të përmëdim që në Visoko ka qenë selia e mbretërve mesjetarë boshnjakë nga të cilët më i njohuri është Kulin-ban. Ka një mendim për të krijuar një fond të qendrës mbarëbotërore për studimin e piramidave me seli në Sarajevë.

Konferenca e dytë do të mbahet pas dy vjetësh, kur shpresohet të sillen prova të reja. Mund të bëhet përpara duke e mbështetur më shumë këtë punë.

Disa kanë parë Madonën. Dhe turizmi fetar lulëzoi. Zoti Semir Osmanagiç dhe shumë të tjerë, shohin dhe tregojnë piramidat. Dhe turizmi arkeologjik do lulëzojë. Kanë ardhur tashmë njerëz nga 80 vende të botës.

Për hollësi mund të shihni faqen në internet www.piramidasunca.ba ose të kontaktoni autorin e këtij shkrimi:

Smajl Grbo, Vrbovska 60 BA-71000 Sarajevo Bosnio kaj Hercegovino smailo@bih.net.ba

Përktheu nga Esperanto (nga revista Zagreba Esperantisto nr. 1/2009)

Bardhyl Selimi

Prelegoj

(Resumo de la Prelego antaŭ Internacia Scienca Konferenco en Karlovo, je 12an de junio 2009)

**“Amuza momento dum la lecionhoro de matematiko “
(sperto pli ol 40 jara)**

Pro sia abstrakteco kaj ĝeneraleco matematiko pozicias inter filozofio kaj la naturaj sciencoj. Kiel baza homa sciigo ĝi ludis gravan rolon ekde pli ol 2500 jaroj pro ties utilaj teorioj kaj praktikaj aplikoj vastskale en plej diversaj kampoj.

Kompreneble, ĝi estas relative malfacile instruebla kaj lernebla de gestudentoj, kion pravas la longa praktiko ĝisnuna ie ajn en la mondo.

Pro tio, Blaise Pascal, elstara franca matematikisto, atentigis pri la utileco de amuza momento dum ties instruado, por ke oni allogu la studentojn kaj faciligu la lernadon.

Tion jam komprenis multaj miaj kolegoj kaj aŭtoroj de la lernolibroj en ĉiu lando kiuj klopodis trovi kaj montri antaŭ la studentoj problemojn aperantaj amuzigaj kaj bezonantaj ne tro da formuloj kaj rigoraj matematikaj teorioj. Kutime, tiaj problemoj estis solveblaj per scioj jam lernitaj en la elementa lernejo kaj pruvitaj milfoje kiel forte ligitaj kun la ĉiutaga praktiko.

Ekzemple, ni priksideru tiajn egalaĵojn vaste uzataj kiel:

$$\text{Kvadrata binomo } (a + b)^2 = a^2 + 2ab + b^2$$

$$\text{Aŭ la diferenco de kvadratoj } a^2 - b^2 = (a + b)(a - b)$$



La aŭtoro kun siaj gestudentoj dum la intervaloj inter la lecionhoroj

Multaj lernantoj malfacile parkerigas ilin. Sed kiam la instruisto proponas al ili amuzan problemon bezonanta la aplikon de tiuj egalaĵoj, oni povas firme ellerni ankaŭ parkere ilin. Jen unu:

Oni rakontas ke la rusa oficiro Lermontov, samtempe poeto kaj amanto de algebro, estis iam dislokigita kune la taĉmento ie profunde en Siberio. Dum iu malvarma vintra vespero, en la izbo (kabano) de la oficiroj li proponis al la kolegoj la jenan problemo-ludon:



Mikhail Lermontov en la jaro 1837

“Pripensu nombron kaj tenu ĝin kaŝe de mi, multipliku ĝin kun si mem, substrahu al la produkto la kvaroblon de la pripensita nombro kaj poste aldonu kvar. Nun diru al mi la finan rezultaton. Mi povas diveni kiun nombron vi estas pripensinta dekomence. !”

Ĉi kaze Lermontov aplikis la konatan egalaĵon

$$(x+2)^2 = x^2 + 4x + 4.$$

La rezultato estas plena kvadrato. Se tiu kvadrato estus 25, ni trovas la duan radikon kiu estas 5 kaj substrahas de ĝi 2, do $5 - 2 = 3$. Kompreneble la serĉata nombro estas certe 3.

La ceteraj oficiroj ege miris pro ĉi tiu “lerteco” ĝis “is magiaĵo” de la juna Lermontov.

La amuzaj problemoj estas je diversaj naturoj:

Unuavice, temas pri historiaj matematikaj problemoj kiuj estas parto de la homara kulturo, samtiel, kiel ja estas la proverboj, anekdotoj ktp. Ĉar pasinttempe matematiko estis vaste ekzercita kaj uzebla por solvi diversspecajn aferojn ekonomiajn, komercajn, heredaĵajn ks.

Ekzemplo:

• La Testamento

“Iu viro en la pratempa Romo estis mortante, dum sia edzino estis graveda. Antaŭ ol morti, la viro testamentis sian riĉaĵon kiel jene: se la edzino naskus filon, la riĉaĵo dividiĝu je proporcio 2:1 favore al filo; se ŝi naskus filinon, tio dividiĝu je proporcio 1: 2 favore al la edzino. Sed fakte naskiĝis du ĝemeloj, nome filo kaj filino. Kiamaniere oni dividu la riĉaĵon?”

. Tion sugestis la ekvacion

$x+2x+\frac{x}{2} = 1$ de kiu $x = 2/7$ x reprezentas la virinan parton, $2x$ aŭ $4/7$ tiun de la filo kaj

$x/2$ aŭ $1/7$ la filinan parton



Tian solvon proponis tiama juristo Julian Solvi (II jc)

Ĉu la solvo estas justa? Kelkaj juristoj asertas ke tio ja tro diskriminacias la filinon. Se la patrino ricevas minimume $1/3$, tiam la ceteron, $2/3$ dividos inter ili la filo kaj filino laŭ proporcio 4:1. Se unue naskiĝas la filo, liricevas $2/3$ dum $1/3$ dividiĝas inter patrino kaj filino je raporto 2:1. Se naskiĝas unue la filino, ŝi ricevoas $1/3$ dum la $2/3$ dividiĝas je raporto 2:1 je favoro al la filo. Kaj se la edzino naskus 3, 4, 5 gefilojn?

Duavice, temas pri praktikaj problemoj lanĉitaj kaj pridiskutitaj amase sur publikaj placoj kaj bazaroj okaze de konkursoj diversloke ĉu en Eŭropo ĉu ekster ĝi.

Ekzemplo:

• Problemo de Baŝe

“Je nia dispono estas 8 vinomasoj kaj tri ujetoj je kapacito respektive: 8 litroj, 5 litroj kaj 3 litroj. Disdividu la vinomason en du masojn, 4 litroj kaj 4 litroj..”



Solvo

Ni prezentu ĉi sube la sinsekvajn agojn kiel jene:

8	0	0
3	5	0
3	2	3
6	2	0
6	0	2
1	5	2
1	4	3
4	4	0

Aŭ la jena **ekzemplo**:

Divido de la pano

Dividu sep panojn por ok personoj egalmaniere kaj per ninimume da tranĉoj, t. e. maksimuma ŝparado.



Solvo:

Tiaj problemoj estis tre popularaj en antikveco. Kompreneble, gravas ke dum la tranĉado ni produktu kiom eble malpli paneroj. Por solvi ĉi praktikan taskon nin helpas la operacioj kun frakcioj. Tiel ni povas skribi $\frac{1}{2} + \frac{1}{4} + \frac{1}{8} = \frac{7}{8}$. Ĉi egalaĵo sugestas nin ke kvar panojn ni dividu po duone, du panoj po kvarone kaj unu panon po okone. Kompreneble egalmaniere. Tiel formiĝas samgrandaj porcioj por ok personoj helpe de entute nur $4 + 3 + 7 = 14$ tranĉoj. Ĉiu alia maniero postulus pli da tranĉoj. Provu se vi volas!


Triavice, temas pri matematikaj ludoj kiuj agrabligis kaj interesigis ne nur adoleskantojn sed ankaŭ plenkreskulojn dum ilia libera tempo aŭ okaze de festotagoj. Ĉikadre eniras ankaŭ la hazardaj ludoj disvastiĝintaj antaŭ kelkaj jarcentoj. Same la matematikaj krucenigmoj, magiaj kvadratoj kaj simile.

Ekzemplo:

- **La soldatoj de la defendoturo**

Defendoturo je formo regula sesangula estas gardata de certa nombro de soldatoj, entute 48 kiujn ilia komandanto estas lokiginta po 16 en ĉiu flanko. Pli ĝuste li lokigis ilin kiel jene: po kvar en ĉiu kulmino kaj po ok en ĉiu interkulmina spaco, do entute

$4 \cdot 4 + 4 \cdot 8 = 48$). Sed dum la batalo mortiĝas kvar soldatoj. La komandanto ne volis evidentigi tion al la malamiko, tial li decidis reenvicigi siajn soldatojn tiamaniere ke en ĉiu flanko la malamiko vidu denove po 16 soldatoj. Ĉu vi povas diveni lian enviciĝon novan?



Solvo

La antaŭa pozicio (po 4 en ĉiu kulmino aŭ angulo kaj po 8 inter la anguloj) donis

$$4*4 + 4*8 = 48$$

Nun estas kvar soldatoj malpli, t. e. 44 entute. Ili povas enviciĝi po 5 en ĉiu angulo kaj po 6 inter la anguloj, ĉar

$$4*5 + 4*6 = 44$$

Kaj se mortiĝus pliaj kvar soldatoj, kiamaniere vi envicigus la restintaj 40 soldatojn por ke la malamiko denove vidu en ĉiu flanko po 16 soldatoj?

Respondo: po 6 soldatoj en la anguloj kaj po 4 inter la anguloj

Kvare, ĉi tie enestas la logikaj problemoj, precipe tiel nomataj paradoksoj kiuj, ekde la pratempo, skuis la matematikan mondon, kaj ankoraŭ allogas la homojn.

Ĉikadre inkluziviĝas ankaŭ la sofismoj diversspecaj kiuj preterlasas certajn matematikajn regulojn aŭ leĝojn.

Ekzemplo:

• Bankoŝtelisto

Oni forŝtelis bankon en Sitidaun strit. Tuj ekenketis la fama dedektivo Sherlock Holms¹. Li notis ĉiujn kvar respondojn de la akuzitoj, bankaj oficistoj.

Timido: *Mi scias nenion, ĉar mi eliris la unua el la banko*

Anfee: *El ni kvar mi ne eliris la lasta.*

Koksford: *Kiam mi ekrevenis hejmen mi estis nek unua, nek la lasta.*

Smith: *Mi forlasis la bankon lasta.*

Poste Sherlock Holms esploradis la lokon kaj ĉiujn padojn kondukantaj al la bankejo, same li pretigis kelkajn skizojn pri ties internaj partoj. Li rezonadis:

La gangsteroj certe havis informanton ene de la banko. La informanto eliris la unua el la banko.

¹ Sherlock Holmes estas fiktiva personaĝo de la romano de Arthur Doyle, fizikisto, aperinta en la jaro 1887



Sherlock Holmes (portreto de la jaro 1891)

- Ĉu tiu estas Timido?
- Ne hastu, demandu la pordiston laŭ kiu vico eliris ĉiuj kvar oficistoj el la banko. La pordisto rakontis pri la ĝusta vico, kiu fakte malmulte diferencis de la asertoj de oficistoj mem. El ĉiu kvar nur unu estis mensoginta.
- Do la informanto estas Anfee?
- Kiamaniere Sherlock Holmes konkludis tiel, eĉ sen aŭdinte la vortojn de la pordisto ĝisfine?

Solvo:

- El ĉiuj kvar asertoj unu estas malĝusta, dum la aliaj ĝustaj. Kiu do estas malĝusta? Tio ne povas esti la aserto de Smith, ĉar alie rezultiĝus ĝustaj tri aliaj, tiam nur Smith elirus la lasta el la banko (sed li mensogas)
- Se mensogas Koksford, tiam li estis aŭ la unua aŭ la lasta, sed Timido diras ke li estis la unua, dum Smith diris ke li estis la lasta.
- Se Timido kaj Smith ambaŭ diras la veron, tio signifas ke Koksfordo ne povus esti la unua, nek la lasta, do lia aserto rezultiĝas ĝusta.
- Ne mensogis ankaŭ Anfee, se Smith diris la veron, do li estis la lasta kaj Anfee diris la veron asertante ke li ne estis la lasta. Do restas ke Timido mensogis, kio koincidas kun la vereco de la aliaj tri asertoj. Kiel sciite, Timido diris ke li eliris la unua. Tio ne koincidas al la ceteraj tri asertoj, nur enkaze se el tiuj sekvus ke neniu oficisto povus esti la unua. (tiam ĝuste Timido estus la unua) . Se estus tiel, la unua ne povus esti Smith, nek Koksford (laŭ sia aserto mem) . Anfee diris ke li ne estis la lasta. Tiam al la vereco de lia aserto koincidas nur tio ke li estis la unua.
- Do Timido estas mensoginta, restas nur unu ebleco: la unua eliris Anfee. Sed Timido iel timiĝis, pro tio li mensogis. Ne necesas demandi lin, ĉar li scias nenion, li estas elirinta, eble ne troviĝis eĉ tie.

Aŭ la jena **ekzemplo:**

Mensoguloj

Ĵan kaj Pjer mensogas tutan tempon. Ĵan diras al Pjer: Kiam mi ne mensogas, ankaŭ ci ne mensogas. Pjer respondas: Kiam mensogas mi ankaŭ ci mensogas.



Ĉu eblas ke dum ĉi tiu konversacio unu mensogas dum la alia ne?

Solvo: Ni notu per J la aserton “Ĵan mensogas” kaj P la aserton “Pjer mensogas”. Ĵan diris al Pjer “se J ne estas vera tiam ankaŭ P ne estas vera”, Pjer respondis “Se plenumiĝas P, tiam plenumiĝas ankaŭ J”. Do ĉi asertoj notas ke apenaŭ eblas plenumiĝi samtempe P kaj J. Tio estas, ilia senco identas. Tial ambaŭ Ĵan kaj Pjer estas dirintaj la veron aŭ ambaŭ estas mensogintaj, alia ebleco ne ekzistas. (ĉi tiu estas tre trafa ekzemplo pri la pruvigo per metodo de la kontraŭo)

Kvine, problemoj por klarigi certajn temojn. Instrua ekzemplo sekvanta klarigas al la gelernantoj pli bone la specifikon de la senfinaj aroj kaj operacioj kun ili:

Ekzemplo:

La sorĉisto kaj la feino



La paradokso de la riĉa sorĉisto kaj la akva feino kondukas same al la koncepto pri senfino (infinito) . Tio povas konsiderata kiel ekzemplo de $\infty - \infty$ kio estas nedifinita operacio. Do, ni povas akiri de ĝi diversajn rezultatojn.

Historio: riĉa sorĉisto havis akvan feinon en la baseno de lia ĝardeno. Li emis ludi kun ŝi per oraj moneroj. Ĉiun minuton li ĵetis en akvon du monerojn dum ŝi siaflanke redonis al li unu moneron post duonminuto.

Se la ludo daŭras senfine, kiel oni devas disdoni la kvanton de la moneroj?

(La monerojn oni povas noti per la numeroj 1, 2, 3, 4, ktp.)

Solvo I

La sorĉisto donas al la feino monerojn je numeroj 1 kaj 2, dum ŝi redonas la moneron je numero 1. Li donas al ŝi moneroj je numero 3 kaj 4 kaj ŝi redonas la moneron je numero 2, li donas la monerojn je numero 5 kaj 6 kaj ŝi redonas la monerojn je numero 3. Kaj tiel plu.

Konkludo: ĉe la sorĉisto eventuale revenas ĉiu monero, do li ekhavas tuton dum la feino nenion.

Solvo II

La sorĉisto donas al la feino la monerojn je numeroj 1 kaj 2, dum ŝi redonas la moneron je numero 2, retenante la moneron je numero 1; li donas al ŝi la monerojn je numeroj 2 kaj 3 dum ŝi redonas la moneron je numero 3, retenante la moneron je numero 2; Li donas al ŝi la monerojn je numeroj 3 kaj 4 kaj ŝi redonas la moneron je numero 4 retenante la moneron je numero 3. Kaj tiel plu.

Konkludo: Fine la feino ricevos ĉiujn monerojn dum la sorĉisto ricevos nenion.

Solvo III

La sorĉisto donas al la feino la monerojn je numeroj 1 kaj 2, ŝi redonas al li la moneron je numero 2 retenante la moneron je numero 1. Poste li donas al ŝi la monerojn je numeroj 3 kaj 4 kaj ŝi redonas la moneron je numero 4 retenante la moneron je numero 3. Kaj tiel plu.

Konkludo: Finfine ĉiujn monerojn je nepara numero retenas la feino dum tiujn je para numero ricevos la sorĉisto, do ambaŭ posedos egalan kvanton da ili.

Sese, menciendas la anekdotoj pri famaj matematikistoj, pri certaj matematikaj situacioj, fragmentoj el historio de la matematikaj konceptoj ktp.

- **Profesoro**


Iu profesoro de matematiko diris al siaj du studentoj tre promesantaj kaj talentulaj, Paŭlo kaj Stefano::

"Nun mi pensas du naturajn nombrojn x kaj y , kies sumo estas maksimume 100, dum $1 < x < y$

Al vi, Paul mi sciigas kaŝe la produkton de x kun y .

Dum al vi Stefano mi sciigas same kaŝe ties sumon.

Nun klopodu, ĉiu el vi, konkludi pri x kaj y . Kompreneble, ne diru unu al la alia tion kiun mi sufleris al vi, aparte. "



Kaj, dum longa tempo de intensa meditado, ambaŭ studentoj ne interŝanĝis informaĵojn pri la produkto kaj sumo de nekonataj nombroj. Poste, ekis mistera dialogo:

Paŭlo: Ne, mi ne povas trovi x kaj y .

Stefano: Ho, tion mi jam sciis.

Paŭlo (surprizita kaj post iom da meditado) : Tamen mi jam trovis x kaj y .

Stefano (same) : Ankaŭ mi jam trovis x kaj y.

Kaj ili pravis. Kiun paron (x ; y) ili jam trovis?

Noto: Nur unu paro (x ;y) koincidas al ilia dialogo!

Solvo

Estas du naturaj nombroj, diversaj unu de la alia kaj ĉiu pli granda ol 1, tiaj ke ilia sumo ne transas 100. Certe, pli da informacio disponas Paŭlo kiu jam konas la produkton de x kaj y. Ĉar li devas trovi ĉiuj divizorojn de la produkto kaj esplori ilin por ke kontrolu se multiplikinte po duope ili rezultigu la donitan produkton. Ĉi kaze se ekzistas nur unu duopo tia, ĝuste tio estus la solvo. Certe tio okazus se la duopo konsistus el primoj.

Devas okazinta tiel ke Paŭlo diris ke li jam divenis la solvon. Tiu diraĵo igis Stefanon trovi la paron, ĉar li jam pretigis ĉiujn parojn kies sumon li jam sciis. Sed dum ĉi paroj donas diversajn produktojn, li devus fari tion por ĉiu produkto, kiel faris Paŭlo.

Ni prikonsideru la nombrojn 11 kaj 17. Ilia produkto estas 187, kaj Paŭlo post kiam faktorizis trovis nur du faktorojn, 11 kaj 17. kaj diras ke li trovis la solvon. Dum Stefano konas ilian sumon, sed nur unu paro konsistas el primoj. Kiam Paŭlo diris ke li trovis la solvon, tiam ankaŭ Stefano haltis ĉe la paro (11, 17)

Ĉio tio estas spegulita kaj detale ilustrita en libro samtitole el 400 paĝoj jam pretpreta, kies albana eldono baldaŭ aperos kaj la Esperanta versio same pretpreta, atendas taŭgan eldoniston.. Danke al Esperanto, tiun version espereble oni aperigos ankaŭ en iu ajn alia nacilingvo, depende de disponebleco de niaj samideanoj loĝantaj en diversaj landoj.

La jam prezentita temo ilustras plue la utilecon de Esperanto kiel pontlingvo, ĉar parto de materialoj en la menciita libro estas ĉerpita de tekstoj en Esperanto verkitaj de niaj samideanoj kaj publikitaj en la libroj aŭ en reto.

El nia historio

Ivo Lapenna kaj albanoj



Foto: Torben Kehlet

La Internacia Kortumo en Hago, marto 1948. Prof. D-ro Ivo Lapenna (tute dekstre) kiel konsilisto-advokato de Albanio antaŭ la Internacia Kortumo en Hago en la unua proceso inter Britio kaj Albanio pro la incidentoj en la Markolo de Korfu.

Prof. D-ro Ivo Lapenna (1909-1987)

Mondfama sciencisto. Profesoro de Internacia Juro ĉe la Universitato de Zagreb, Jugoslavio. Eksperto ĉe la Packonferenco en Parizo, 1946. **En 1947/48 advokato-konsilisto, Albanio kontraŭ Britio, antaŭ la Internacia Kortumo en Hago.** Membro de pluraj gravaj jursciencaj institutoj de la mondo. "Profesoro de Kompara Sovetia kaj Orienteŭropa Juro" ĉe la mondofama kaj prestiĝa The London School of Economics and Political Science, Universitato de Londono. Invitita kiel gastprofesoro en multnombraj universitatoj kaj jursciencaj institutoj en ĉiuj mondopartoj, i. a. Harvard kaj Yale. Granda verkisto en pluraj lingvoj. Eminentia violonĉelisto. Unu el la plej grandaj humanistoj de la mondo. Konata kiel "la arkitekto kaj la konstruisto de la moderna Esperanto-Movado". "Dum preskaŭ 60 jaroj la plej grava kaj meritplena akcelanto de la Internacia Lingvo kaj ties kulturo deposed D-ro L. L. Zamenhof". 1952-1975: La iniciatinto kaj kunfondinto de "Centro de Esploro kaj Dokumentado" (CED), ĝia Honorofica Direktoro. 1952-1954: Grandaj kampanjoj lige kun la Peticio al UN/Unesko, kronitaj per la gravaj konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko kaj per la fama Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954 en Montevideo. Lige al tiu unika sensacio ĉe Unesko - la plej granda mejloŝtono de la Esperanto-Movado - miloj da artikoloj estis publikigitaj en la monda gazetaro. Post Montevideo ĉiuj gravaj atingoj de la Esperanto-Movado estas sekvo de tiu mejloŝtono. La Esperanto-Movado povas danki al la elstara personeco kaj la multflankaj talentoj de Ivo Lapenna, ke ĝi tiel mirinde sukcesis. I. a. li estis - kaj daŭre estas - la plej elokventa kaj karisma oratoro de la Esperanto-Movado. Ankaŭ en pluraj aliaj lingvoj li estis unu el la plej grandaj oratoroj. 1955-1974: Dum 9 jaroj Ivo Lapenna estis ĝenerala sekretario de UEA kaj dum 10 jaroj ĝia prezidanto. Ĝis sia lasta spiro Ivo Lapenna daŭrigis sian laboron por la Internacia Lingvo, Esperanto, same dinamisme kaj same energie kiel ĉiam en la spirito de D-ro L. L. Zamenhof.

Noto: Prof. Lapenna volis sincere helpi al la albana registaro, sed ties ĉefo, la eksa diktatoro Enver Hoxha (Hodĵa), al la demandoj de profesoro pri detaloj de la incidento survorte, respondis: ni pravas, tio sufiĉas! Kompreneble, sen argumentoj, nenia jurafero povas traktiĝi. Kaj Lapenna retiriĝis. Lastajn jarojn, estas klarigite ke en la incidento de Korfu kie droniĝis du britaj militŝipoj kaj mortis pluraj soldatoj, komplicis ambaŭ registaroj de Albanio kaj Jugoslavio. (Ĉi lasta strebis malbonigi la interrilatojn de Albanio kun Okcidento, por ke pluteni ĝin ligita al la Orienta bloko kaj al si mem, cetere Albanio ne disponis tiutempe rimedojn, nek fakulojn, por dronigi fremdajn militŝipojn). Tiu incidento estis uzita por blokigi duonjarcenton la oron kiun germanoj forrabis en Albanio dum milito, kiu finfine nur parte estis redonita al Albanio, post la pago de la damaĝoj kaŭzitaj tiutempe).

Nehat Sokoli

El la sciencaj konferencoj

Scienca etoso en Karlovo

(11-15 junio 2009)

Jam tradicias esperantistaj renkontiĝoj en Karlovo, Bulgario kie aktivas interalie ankaŭ profesoro de AIS San Marino, s-ro Boĵidar Leonov.

Karlovo situas en la koro de la lando ĉe la piedoj de la montaro "Balkan" kaj apud la famaj rozkampoj kaj ties fabrikejoj, abunda je tilioj, ĉerizoj, marusoj, kaŝtanoj, kun karakterizaj domoj kaj stratoj ŝtonpavimitaj, je relative milda mikroklimato kaj gastama popolo.



Esperantistoj alvenis en Karlovo

La lasta evento celis "La aplikon de Esperanto en diversaj fakoj" kie estis invititaj dekoj da profesoroj, instruistoj kaj aliaj fakuloj el almenaŭ deko da landoj. La scienca sesio okazis en la ĉefa auditorio de la

universitato - bulgara filio de AIS, kies rektoro estas mem Leonov. Prelegis pri la strukturo kaj funkcioj de AIS s-ro Dieter Hans Quednau,



direktoro de la klerigoficejo; profesorino Krumova el Akademio de la Sciencoj en Sofio pri “Benoj kaj Malbenoj en la bulgara folkloro;



Harald Schicke el Germanio pri “La kuracaj efikoj de la Gin-seng herbaĵo” enkadre de la naturista kuracado;



Marcel Delforge el Belgio pri “La aspektoj de klerigado en Afriko” surbaze de sia propra longjara sperto tie;



Bardhyl Selimi el Albanio pri “La amuza momento en la leciono de matematiko”



Krister Kiselman pri “Moderna koncepto de optimumo en matematiko”;



Nikolla Uzunov el Bulgario pri “La esperantistaj familioj” surbaze de sia propra vivo;



Jolanda Jozsi el Rumanio pri “Kelkaj aspektoj de la turismado hodiaŭ”;



doktoro Enn Ernits el Estonio pri “La pratempaj artaĵoj en finnungraj regionoj”;



s-ino Alicja Lewanderska Quednau,



s-ro Neĉev, s-ro Hrvstov, profesorino Eva Polakova, mem profesoro Leonov, dum s-ro Sean V. Rian sendis sian prelegon rete.



La sesio daŭris du tagojn kaj vekis grandan intereson ne nur ĉe aŭditorio plenplena sed ankaŭ en la urbo kaj regiono mem. La regiona televizio de Plovdiv prezentis eĉ intervjuon kun prof. Leonov kaj kelkaj aliaj partoprenantoj. Same la urbestro de Karlovo salutis la ĉestantojn kaj kunaranĝis bankedon por ili en la centra hotelo de la urbo.



Ĉeestis en la inaŭgura kunveno ankaŭ la prezidanto de la Bulgara Esperanto Asocio ing. Petar Todorov, kiu enmanigis al s-ino Alicja, okaze de ŝia naskiĝtago, specialan dankpaperon kaj medalionon.



Ankoraŭfoje, la esperantistoj montris antaŭ la cetera publiko sian konstantan entuziasmon, sindediĉon kaj komunikiĝemon, danke al la forta interna ideo de nia bona lingvo.



Estas substrekinde ke ĉiuj partoprenintoj vojaĝis centojn da kilometroj je propraj elspezoj por kuniĝi ankaŭ en ĉi tiu interesa konferenco tiel akurate aranĝita de la lokaj gastigantoj ĉefe de s-ro Boĵidar Leonov, kiu ĝuas profundan respekton ne nur ĉe ili sed ankaŭ en la tuta esperantistaro.

Bardhyl Selimi

Fatos Kongoli, Nobelisto de Balkanio pri beletro
La Perditulo, ĉapitro 5
Romano, Tirana 1992
Tradukis: Bardhyl Selimi

Fatos Kongoli, Nobelisto de Balkanio pri beletro
La Perditulo
Romano, Tirana 1992
La Eldonejo Dituria, Tirana

Ĉapitro 5

Mi ne hezitus vagadi kun Sonja tra la stratoj kaj kefejoj de Tirana. La orgojlo de masklo ne estus karesata pli bone. Sed tio estis malebla. Kiel por Sonja, tiel por mi. Sonja posedis multajn kialojn por ke sin gardu. Mi havis nur unu kialon: mi kaŝis min kontraŭ Ladi. Al Ladi kaŝis ankaŭ Sonja. Silente, neniam parolante pri tio inter ni, mi sentis ke ŝi neniam pardonus min se mi postlasus al Ladi eĉ la plej etan dubon. Tamen, mia pozicio ŝajnis pli peza. Sonja estis obligata al Ladi pri nenio. Mi estis obligata al li pro amikeco. Kiam ni kunestis, mi apenaŭ povus eskapi de la sentemo de trompanta hipokritulo. Tia duiĝo ege penis min kaj iutage mi kvazaŭ konfesus al Sonja pri la plej granda stultaĵo: mi volus edziniĝi ŝin. Nun kiam la okazintaĵoj returniĝis tiel, kiel ili ja returniĝis, mi konfesas ke, verŝajne, se mi ekfarus tiun stultaĵon, tio estas, se mi farus la deklaraĵon pri geedziĝo, kiu scias, la okazintaĵoj povus turniĝi aliel. Sonja, probable, akceptus kaj mi edziĝus al ŝi sen plej eta hezitaĵo. Sed tempopasinte, mi transformiĝis en fataliston tiom neripareblan, kiom tia estis ankaŭ Sonja. Mi kredas ke neniam forpuŝus la okazintaĵojn sur alian fluon. Sonja ne akceptus edziniĝi al mi. Mi estis ja ŝia ŝafido. Kaj ŝi traktis min kiel ŝafidon. Nenio pli.

Nia frenezeco daŭris neperturbita kelkaj monatojn. Sonja kvazaŭ volis sperti kun mi ĝis kiagrade povus iri la limoj de la homaj eblecoj en la amorado. Ĝus adiaŭinte, la tempo plurestis surloke, la ĉirkauaĵo perdis la sencon kaj ni atendis ĝis la tago kaj la horo de la sekvanta renkontiĝo. Gapante, mi surgrimpis ĝis ŝia apartamento, en la tria etaĝo de la domo, iom margine de la urbocentro, kie la pardon mi trovis ĉiam malfermite. Nia frenezeco daŭris longajn horojn. Ne malofte, Sonja aranĝis la aferon ke ŝia kvinjara etulo tranoktu ĉe la geava hejmo. Tiam mi pasigis la nokton kun ŝi. Estis ili noktoj je teda, lacega feliĉeco, post kiuj, por rekapabligi min, mi bezonis dormi dudek kvar horojn senĉese. La stato de tiu freneza ekstazo legiĝis sur niaj okuloj. Aparte ĉe Sonja. Ŝi kvazaŭ hastis, kvazaŭ antaŭsentis iun fatalon. Ŝi estis formanĝante min viva. Alvenis tempo, kiam ŝi postulis de mi viziti ŝin ĉiutage. Kaj mi frekventis ŝin ĉiutage. Mi forlasis la lekciojn, pri la ekzamenoj apenaŭ oni povus pripensi. En unu el tiuj tagoj, okazis tio, kion ni plejmulte volus eskapi. Laŭ la maniero malplej antaŭvidita. Almenaŭ ne en tiu formo, de kiu mi tiom kontinue timis, tio estas per kaptado nin dum la akto, kiel tio estis laŭmode. Kiu gardis nin por kapti nin dum la akto? Tamen kelkiu ja gardis nin.

Se en mia vivo mi havas iun teruran pentiĝon, tio estas ke mi ne sukcesis elbategi la tiun ulon envorte. Lia korpo, malplialta ol la mia, ne ebligis al li antaŭecon rilate min. Nek la aĝo, li estis tridekjarulo, kontraŭ dudekjarulon, kia mi. Sed li estis filo de ministro kaj tio certe signifus ne neglegteblan antaŭecon. Kiam mi sciigis tion al Sonja, ŝi klarigis min ke tiun idiotulon ŝi delonge estis multiplikinta per nulo. La multiplikitulo per nulo estis ja la viktimo dum la naskiĝtago de Ladi. Sonja rakontis al mi kio estis okazinta tiun vesperon, kien ŝi alvenis nur por frenezigi lin. Tiu azeno, diris ŝi, estis postsekvinta min obstinece kiel monstro ekde la tempo kiam ni estis studentoj. Li incitis min eĉ unu semajnon post la morto de mia edzo. Kaj ne ĉesis incitante ĝis la naskiĝtago de Ladi. Mi alvenis por demonstri al li ke mi akceptus kundormi kun iu ajn alia, krom lin. Li estas ja ia monstro..

En ĉi tiu punkto de nia konversacio, ŝajne, mia vizaĝo blankiĝis, ĉar Sonja eksilentis. Ĝi devus blankiĝi kiel la vizaĝo de iu kolerema infano. Poste Sonja diris al mi ke ŝi amis min kaj tion ŝi

ripetadus ĝis la tago kiam ni disiĝus por neniam revidi plu unu la alian. Mi ne pardonas min pri la malgrandanimeco de tiu momento. Estas multaj manieroj malkovrantaj la debolecon de la homa animo, sed tio, kion Sonja legis tiumomente sur mia detruita vizaĝo, mi ankoraŭ ne scias kio ja estis envere. Mi ne volas paroli plu pri tio. Antaŭ miaj okuloj aperas la multiplikitulo per nulo.

La romano „La Hunda Haŭto”

Tradukis Tomasz Schmielik

(Estas jam eltradukita delonge la tuta romano, atendanta la eldonon en Pollando)

Ĉapitro 6

Tiutempe ni loĝis sur la unua etaĝo en la domo ĉe la strato Myslym Shyri. Ni alvenis tien el la malnova loĝejo antaŭ la Oficira Klubo, unu jaron antaŭ la morto de mia patro. La fenestroj rigardis al la strato, sube troviĝis laktovendejo, apude estis bakejo, post kiu sekvis viandovendejo, kaj en la fino - vendejo kun fruktoj kaj legomoj. Transe de la strato estis kinejo.

Mi malamis ĉi tiun loĝejon, unu post la alia mortis tie la patro kaj Brunilda. Poste, jam plenkreska, mi malamis ĝin, ĉar oni povis frezeziĝi pro bruoj. Tie estis laŭte dum tago kaj nokto. Sur Myslym Shyri ne estis granda trafiko, malofte ruliĝis nur personaj aŭtoj kaj veturiloj de liverantoj, ĉefe zukoj produktataj en Polujo. Estis malmulte da personaj aŭtoj kaj ili ne bruadis. Oni ankaŭ eltenis bruojn de la veturiloj de liverantoj. Neeltenebla por mi estis tumulto en la vicoj antaŭ la vendejoj.

Je la dua nokte vekis min obtuza susurego, kvazaŭ el subtere. Estis homoj, kiuj staris vice antaŭ la laktovendejo. Ili babilis, disputis, kverelis, precipe kiam aperis la vendistino, poste venis kamioneto kaj ciganoj elprenis kestojn kun tintantaj boteloj. En tiu momento la kvereloj atingis sian pinton, ĉar en la vicon oni ne enlasis tiujn, kiuj ne staris. Aŭdiĝis voĉoj de amaro, kriegoj. La zuko (kamioneto) malproksimiĝis kun krakoj el la gasotubo. Poste silentiĝis. La entruduloj jam sciis, kie estas ilia loko, la amaso densiĝis, ĉiu rajtis aĉeti du litrojn kaj se li tenis la botelojn en la manoj, li foriris kontenta, por reveni sekvatage.

Mi aliĝis al la epika batalo pri du litroj da lakto, kiam naskiĝis Tom. Komence la principoj en la vico estis liberalaj. Sufiĉis meti ŝtonon aŭ distingvan objekton kaj tio signifis, ke la loko estas okupita. Sed iun tagon nek ŝtonoj, nek distingaj objektoj estis sufiĉaj. Ekplodis la konflikto ŝvelanta delonge, kiam viro ekvidis je la dua nokte neniun en la vico por viroj kaj en la vico por virinoj, sed pli ol sesdek ŝtonojn unuflanke kaj same multe ĉe la alia flanko. Estas trompo, li ekpensis, fiaĝo. Kaj tuj li forĵetis la ŝtonojn, detruante ĉiujn signojn. Poste oni decidis, ke loko en la vico estos okupita, se iu metos korbon aŭ sakon kun boteloj. Sed tio ne sufiĉis, ĉar ankaŭ tiam okazis trompoj, do oni enkondukis pli severan principon: oni rekonas lokon okupita, se iu staras ĉe la korbo aŭ sako kun boteloj. Kompreneble li devus vidi iun antaŭe, por ke ne enpuŝu sin ruzuloj, kiuj ne staris en la vico.

Unuafoje mi kokris Margan ĝuste tiam, kiam lakton oni mezuris per gutigilo, kaj la vico etendiĝis kilometre. Marga estis graveda kun Irma, kaj Tom havis ses jarojn.

Je la dua nokte vekis min sonorado de la ĉina horloĝo, kiu staris sur la komodo ĉe la litokapo. Por iom lavi mian vizaĝon, vestiĝi kaj iri malsupren, mi bezonis dek kvin minutojn. Tial mi ĉiam stariĝis en la unua deko da viroj. Se aldoni la unuan dekon da virinoj, oni povus diri ke mi estis inter la unuaj dudek aĉetantoj, kaj mi ne nur akiris lakton, ĉar se la vendado komenciĝis duonon post la tria, do post la reveno hejmen mi povis ankoraŭ dormeti ĉirkaŭ du horojn, antaŭ ol mi iris al laboro.

De tiam suferigas min terure la sonorado de vekhorloĝoj. Mekanikaj, kaj eĉ elektraj. Ŝajnas al mi, ke io boras mian kranion, bruligas nervojn per ardanta drato. Por saviĝi antaŭ doloro, mi volas krii. Kaj mi vidas min nokte en nebulo. Ombron malaperantan en nebulo. Vane mi klopodas alproksimiĝi. Tiu ombro perdiĝas en malumo, postlasante groteskan amason da viroj kaj virinoj.

Mi ne povas diri precize, kiam unuafoje mi ekvidis Doloran. Tio devis okazi en malvarma, nebula vintro-nokto. Poste, kiam mi metis en la vico la sakon kun boteloj, mi kaŝiĝis en la angulo kontraŭ la vendejo, kie ne blovis vento, kaj mi atendis la zukon. Delonge mi konis ĉiujn vizaĝojn de la viroj kaj virinoj el la vico. Mi konis

ankaŭ iliajn sakojn kaj korbojn. Do, mi ne preterlasis Doloran, kiu aperis por la unua fojo inter la malnovuloj starantaj kvazaŭ en vizaĝ-parado. Mi memoras, ke tio okazis dum malvarma, nebula vintro-nokto, ŝajne tial, ke ĉiam mi imagas Doloran en longa, bruna palto, kies felan kolumon ŝi levis tiel, ke ĝi kovru la kolon kaj vizaĝon. Mi havis la impreson, ke sub la pelto estas nur nokta ĉemizo, ĉar rapidante por okupi bonan lokon en la vico, ŝi ne vestis sin, nek frizis siajn harojn, nek faris tualeton.

El mia strategia angulo mi vidis ŝin malproksime, inter la virinoj amasiĝintaj kun kapo ĉe kapo. Ĉiam ŝi staradis, kaj ne sidadis kiel aliaj sur la ligna tabureto kunportita el la hejmo, kaj probable tio spronis ĉe mi atenton. Ŝia belega vizaĝo estis videbla, kiam de tempo al tempo ŝi klinis la kapon malantaŭen, ordigis per la mano nigrajn, pezajn harojn, falantajn sur la ŝultrojn aŭ skuis ilin. Mi observis ŝin de malproksime kaj diradis al mi en la animo, vere, la edzo de ĉi tiu virino devas esti azeno. Aŭ impotentulo. Aŭ oni ne scias, kio. En mala okazo li ne dormus kviete kaj ne permesus al ŝi ellitiĝi noktomeze, ĵeti sur la dorson la brunan palton kun fela kolumo kaj ĝis la nazopinto ĉirkaŭvolvi sin per ĝi kontraŭ malvarmo. Kaj se kontraŭ malvarmo ŝi povis ŝirmi la korpon, ŝi ne povis eviti voluptajn rigardojn de viraj okuloj. La plimulton da viroj en la vico formis pensiuloj, apenaŭ teniĝantaj sur la piedoj en atendado por la zuko kun lakto, kaj iu bela virino, malofte aperanta inter la malfreŝaj vizaĝoj en la vico por virinoj, estis tio, kio malpleje vekis intereson ĉe ili. Sed ne ĉiuj estis pensiuloj. El mia strategia angulo, kie mi atendadis kun sento de la supereco antaŭ la aliaj, mi vidis, kiel diversaj viroj, sendube ankoraŭ ne perdintaj seksardon, iradis ĉirkaŭ la amaso da virinoj, kun ŝajnigita indiferento. Ilia celo estis klara: ili klopodis ekligi rigardan kontakton kun tiu belega virino.

Komence ilia ludo amuzis min. Tiuj kokaj paradoj ĉirkaŭ la amaso da virinoj ĝuste pli agrabligis al mi la atendadon en mallumo. Poste la kontento malaperis, kaj ĝian lokon okupis scivolemo. Tio okazis, kiam la bela virino divenis, kiel ŝajnas al mi, la celon de la paradoj ĉirkaŭ ŝi kaj fariĝis kolera. Laŭ miaj observoj la plej grandan ŝancon havis ulo en sporta vestaĵo. Li portadis sur ĝi dikan, oficiran jakon en verda koloro. Sed iun nokton mia scivolemo cedis al timo, kiam li sukcesis interŝanĝi kelkajn vortojn kun la virino, kaj tio - kompreneble - estis sukceso por li. Mi esperis, ke li triumfos, kiam mi vidis lian obstinon. Sed mi ne esperis, ke la gorĝon premos al mi la sento, kiu nomiĝas ĵaluzo.

Vere estis ridinde. Mi tute ne konis la virinon. Sed mi aliĝis al la ludo. Certagrade estis la komenco de mia kokro. Kiam sur la komodo sonoris la vekhorloĝo, mi leviĝis malrapide de la lito, por ne veki Margan. Mi iris en la banejon, mi havis tempon, por razi min, ŝprucigi per kolonja akvo, kion mi ne faris antaŭe. Poste mi kaptis retsakon kun du laktoboteloj, sur la piedfingroj mi iris en la koridoro, sur la ŝtuparo malsupren, mi metis la retsakon en la vico kaj tra mallumo okupis la strategian pozicion. Kelkajn minutojn poste, sed malantaŭ mi, en la vico stariĝis la ulo kun oficira jako. Tio estis mia supereco. La virino en longa, bruna palto, akurata kiel horloĝo, ne malfriiĝis kaj ĉiam staris en la unua deko da virinoj. Mia cerbo komencis labori. Mi gapis al ŝia vizaĝo, klopodante trovi ian signon, kiu montrus al mi, ĉu ŝi dormis kun sia edzo, antaŭ ol stariĝi en la vico. Tamen mi estis sufiĉe malproksime. Tra mallumo kaj de tiom malproksime ne estus facile rimarki ion ajn sur ŝia vizaĝo. La problemo solviĝis baldaŭ, kiam venis la zuko. Mi eliris el la malluma angulo, stariĝis en la vico kiel ĉiuj, ankaŭ la belega virino. La ulo kun oficira jako finis siajn manovrojn por alproksimiĝi. Li perdiĝis malantaŭe, kaj mi povis kviete rigardi en la vizaĝon de la virino, sen akompano de lia ombro. Ŝajnis al mi, ke vere mi konas ŝian vizaĝon. Laŭŝajne ankaŭ ŝi konis min kaj sufiĉos nur ke ŝi levu siajn okulojn por rekoni min. Tamen ŝi ne rigardis. Se ŝi ne estus atentema, ĉiufoje ŝi falus en kaptilon de viraj rigardoj. Eble tial ŝi ĉirkaŭvolvis sin ĝis la nazopinto per la fela kolumo de la palto, por eviti borantajn rigardojn.. Tamen mi senvestigis ŝin per miaj okuloj senhonte. Mi deziris ekvidi laŭ imagitaj signoj, kiel mordospuroj, ĉu antaŭ ol ŝi venis noktomeze al la vico atendanta lakton, ŝia edzo kontentigis ŝin volupte.

Pri mi okazis strange. Kaj mi ne povis liberigi min de la penso, ke ĉi tiu virino estas nekonata, ke ŝi havas nenion komunan kun mi. Tute male, pli kaj pli turmentis min ia certeco, ke inter ni etendiĝas nevidebla fadeno, kaj iam nokte mi atingis la pinton de absurdo. Kiel kutime mi staris en la malluma angulo, kiam mi ekvidis, ke la ulo en oficira jako alproksimiĝis. Ŝi turnis al li la dorson, sed li restis antaŭ la virinoj. Mi ekkoleregis. Se en tiu momento ne estus veninta la zuko, mi ne scias, kion stultan mi povus fari. Feliĉe la zuko aperis ĝustatempe kaj restis al mi nenio krom eliri kaj okupi mian lokon en la vico. Senĉese mi estis kolerega, kiam mia rigardo kruciĝis

kun la rigardo de la virino. Tio ŝajnis al mi natura, ke mi diru la salutvortojn. Kun rideto, kvazaŭ mi konus ŝin delonge.

Poste Dolora diris al mi, ke ŝi ne memoras tion. La ulo en militista jako vagadis ĉirkaŭe, do ne estis speciala okazo, por fiksi ion en la memoro. Ĉiuj virinoj konis lin kaj sciis, kion li intencas. Ŝi ankaŭ ne memoris, ke mi diris la salutvortojn. Tamen ŝi ne forgesis alion: miajn rigardojn. Vi kaŝiĝis en via angulo, pensante ke vi estas nevidebla, ŝi diris. Mi sentis viajn rigardojn. Kvankam vi estis preskaŭ nevidebla en mallumo, kvankam dum nebuloplenaj noktoj vi tute malaperadis, mi sciis, ke vi staras tie. Kaj mi timis. Estis danĝere, ke mi pensu pri vi. Mi povis enstrudiĝi en nenion. Kiam de tri jaroj mia edzo sidis en malliberejo, kaj pro tia nedecaĵo mi imagis, ke mi estas putino. Okazis, ke samtempe ni staris ĉe la vendotablo, tiam nur kun peno mi povis malcedi al la dezirego, por alpremi min al vi. Kaj mi pensis: Mi estas putino... putino...

Kompreneble mi sciis nenion. Kaj nur tio, kion mi vidis klare, estas la absurda situacio, en kiu mi trovis min. Ekregis min la kulposento precipe tiam, kiam mi revenis hejmen kun du boteloj da lakto, eniris la dormoĉambron, malvestis min sen bruo kaj enlitiĝis ĉe la peza korpo de Marga, kaj antaŭ la okuloj mi havis senĉese la vizaĝon de tiu nekonata virino. Mi atendis, ĝis kiam mi iom varmigis min, mi etendis la manon kaj tuŝetis la ventron de Marga, esperante ke kiam mi sentos movojn de la kuntiriĝinta estaĵeto, kiu tie kuŝas, mi liberiĝos de ĉia potenco de la nekonatino. Sed probable en tiu noktohoru la estaĵeto - kuntiriĝinta en la ventro de Marga - ankaŭ dormis. Kaj mi ne estis kapabla liberigi min de la turmento, kiam mi kuŝis apud Marga, kaj miaj pensoj senĉese flugis al la alia loko. Tiam en la historio aperis mia filo, Tom.

De tempo al tempo la hazardo ludas mirigan rolon. En tiu dimanĉo Tom deziris, ke mi kunprenu lin al la pupteatro. Tra mia kapo eĉ ne flugus penso, ke pro tiu deziro iri kun li al la pupteatro, li kondukos min al la renkontiĝo kun Dolora.

Mi revenis hejmen ĉirkaŭ la kvara matene. La zuko malfruiĝis kaj malgraŭ la insista klopodo ekdormi ankoraŭfoje, la dormemo forlasis min. Kiam mi ellitiĝis, doloris min la kapo, kaj antaŭ la okuloj mi havis senĉese la vizaĝon de la nekonatino. Du, tri horojn pli frue tra nebuloplena mallumo, kiam ŝi foriris perdiĝante kiel ombro en nebulo, ekregis min la tento marŝi post ŝi. Tremegante pro volupto, mi povis elteni kun neniuj, nek kun Marga, nek kun mia patrino, nek kun Tom. Kolerigis min bruo, matena tumulto hejme, kaj kiam la patrino diris al mi, ke mia filo deziras hodiaŭ iri kun mi al la pupteatro, mi furioziĝis. Li ne turnu al mi la kapon, mi volis krei. Sed tiel mi ne kuraĝis alparoli mian patrinon.

Doloran mi tuj ekvidis en la saloneto, kelkajn minutojn antaŭ ol komenciĝis la prezentado. Ŝi tenis la manon de malgranda knabino, pli juna ol Tom, eble kvarjara, kaj jam dekomence estis malfacile ekligi kontakton pro la malamikeco, kian montris la infanoj: ŝia filineto al mi, kaj al ŝi - Tom. Kiam mi demandis la malgrandan knabinon por komenci interparolon, kiel ŝi nomiĝas, ŝi ne volis respondi. Kaj kiam Dolora - por malstreĉi la etoson - faris al Tom la demandon, kiu li estas, ankaŭ li diris nenion. Mi devigis min al rideto, al unu el tiuj kompatindaj ridetoj, kiam venas penso pri fuĝo. Mi volis diri al ŝi, ke ni konas unu la alian, ke ĉiunokte ni renkontiĝas en la vico, atendante lakton. Plej verŝajne ŝi ne rimarkis min, ĉar ŝi ne apartenas al tiuj virinoj, kiujn oni pretervidas facile. Mi detenis min. Ne pro la timo, ke ŝi povus akcepti tion kiel vanan parolon. Detenis min io nekredebla: la rigardo de tiu malgranda infano. Ŝi levis la kapon, rigardis min atente kaj ŝajnis al mi - pardonu ĉi komparon - ke tio estis rigardo de sovaĝa besteto, preta tuj salti al mia gorĝo. Antaŭ tiu malgranda, furioza katino mi devos gardi min, ankaŭ ŝi. Tiel mi pensis, kiam ni staris vidalvide, kaj mi povis fari nenion krom silente rigardi Doloran. Mi ne zorgis pri la sovaĝa besteto, nek pri Tom, kiu - oni ne scias, kial - ektiris min ĉe la maniko. Mi kroĉis miajn okulojn al ŝia vizaĝo kiel piloto, kiu el granda alteco klopodas rekoni fremdan terenon, senĉese mi havis la impreson, ke la tereno estas konata por mi. Ĝiaj formoj sidis en mia memoro. Mi povus komenci la interparolon per tiu ĉi impresu, sed ankaŭ nun mi diris nenion, ŝi povus trovi min ordinara amindumanto kun flataj vortoj.

Poste Dolora diris, ke ŝi ekvidis en miaj okuloj la deziron klini la buŝon al ŝiaj lipoj. Tio estis ja evidenta, ŝi diris, kaj en tiu momento mi devus sobriĝi kaj eliri. Ne estis por mi iu granda zorgo por eliri, mia filino ne protestus. De kiam ŝi scias, ke la patro sidas en malliberejo, ĉiuj viroj, kiuj nun interesiĝas pri ŝi, estas ŝiaj

malamikoj. Sed mi restis. Ĉiufoje, kiam ni disiĝis en mallumo, turmentis min nur unu penso: kiel mi kondutos, se mi renkontiĝus kun vi ie, eĉ en la pupteatro, kvankam mi ne pensis pri tia okazo, ĉar ĝi estis tro malreala.

En tiu momento la vorto „malreala” estis komplika por mia cerbo, kaj la streĉon pro la obstino de la infanoj Dolora evitis simple. Kiam la lumoj estingiĝis iom post iom, ŝi kaptis la manon de la filino kaj posttiris ŝin al la pordo inter la promenejo kaj la salonego. Mi faris la samon, mi kaptis la manon de Tom kaj posttiris lin impete. En la salonego mi rimarkis, ke ŝi okupis lokon en la lasta vico, lasante apude malplenan seĝon, kaj la filinon ŝi sidigis ĉe la alia flanko. Ĝi estis unusola malplena seĝo, kiu restis en ĉi tiu vico. Mi povis okupi seĝon, kiam Tom konsentis rigardi la prezentadon, sidante sur miaj genuoj. Sed li jam ne havis elekteblon. Malumo estis pli kaj pli nigra, la kurteno leviĝis, kun muziksonoj aperis du marionetoj kaj silentiĝis voĉoj de infanoj. Tiam mi trovis Doloran tiel proksime, ke mi aŭdis ŝin spiri.

Laŭ ŝia esprimo, en tiu momento la situacio vere estis malreala. Mi eĉ ne konis la nomon de la virino apude, sed en mia kapo muĝis. Komence mi ŝajnis, ke tio, kio min interesas, estas nur la prezentado. Mi sidis rigida, timante fari movon, la seĝoj estis tiel kunpremitaj, ke mia plej malgranda movo povus ĝeni la najbarinon. Ŝi ankaŭ sidis rigida, tute absorbita per ludo de la marionetoj, kvazaŭ interesus ŝin nenio alia. Ŝi ŝajnis tiel, kiel mi. La instinkto netrompeble avertis min, ke ankaŭ ŝi pensas pri mi. Sed mi eĉ ne konis ŝian nomon. Estas sufiĉe, ke mi sobriĝu kaj rezistu al la fortega tento por ektaŭsi ŝian korpon.

Tamen pasis longa momento, antaŭ ol ni komprenis, ke la ŝajnigado estas nur sufero, kiun ni ja ne bezonas. Sufiĉos moveto, mia aŭ ŝia, por liberiĝi de tio. Per la kubuto mi tuŝis ion fremdan apude, sur la apogilo de la seĝo. Probable ŝian kubuton. Ĉiuokaze parton de ŝia korpo. Mi ne devis turni la kapon en mallumo, por vidi, kio okazas. Niaj du estaĵoj kuntuŝiĝis en unu punkto. Kaj tiu punkto lasis, ke inter ambaŭ korpoj estu reciproke transdonata ekscito. Ŝian eksciton mi sentis tuj. Mi ekstremis kaj pensis, ke ankaŭ ŝi tremas. Mi estis perdita, mi saltis en la abismon kaj ekpendis en malpleno, kvazaŭ senpeze. Pro la freneziga tremo de tie, kie kuntuŝiĝis niaj korpoj. Ĝi estis klara: ŝia korpo sopiras je mia korpo. Subite mi perdiĝis malsobre. Ĝuste mi falis en mallumon, kiam ŝia gambo tuŝetis mian gambon. Mi provis kiel la unua, sed tuj ŝi retiris la gambon. Mi eksentis min tiel, kvazaŭ mi estus vangofrapita, sed mi timis senkaŭze. Ŝi ne rezistis al la agresema voko de la korpo, kaj ŝia gambo premiĝis forte al mia gambo. Ŝi kvazaŭ fordonis sin al mi ĉi tie, en la salonego de la pupteatro. Malofte mi sentis tian ekscitegon, kiu estus komparebla kun niaj tuŝoj en mallumo.

Tiu malreala ludo ripetiĝis dum kelkaj dimanĉoj. Kiam la prezentado finiĝis kaj denove brilis lumoj, ni sidis ankaŭ momenton sen movo. Konfuzitaj kaj malsobraj. Ne havante kuraĝon por rigardi unu la alian. Se tio povus okazi, ni atendus tiom longe, ĝis kiam ĉiuj eliros, kaj en la malplena salono ni liberiĝos de la torturo de tiu volupta streĉo. Sed ni devis eliri kaj disiĝi kiel fremduloj, sen adiaŭa vorto, kvazaŭ nenio estus okazinta. Ni jam ne povis serĉi alibion por tiu blinda frenezo inter la kunpremitaj seĝoj. Ia malprudento estus danĝera. Do, ni disiĝis kiel fremduloj, ĉiu sen riproĉoj de la konscienco, ĉio restis en la salono de la malgranda pupteatro, kiu antaŭ longe estis - onidire - la sidejo de la reĝa parlamento. Je la dua nokte komenciĝis mia longa semajno en la vico. Mi okupis lokon, ŝi venis tuj poste. Kaj la ulo en militista jako komencis paŝadi ĉirkaŭe.

Nian ludon interrompis Tom. Iun dimanĉon, kiam mi diris, ke ni iros al la pupteatro, li respondis, ke li ne volas. Ĝis hodiaŭ mi pensas, ke li antaŭsentis ion malĉastan en mia rilato al tiu nekonata virino. Se vere okazis tiel, do estas malagrabla por mi. Neniam mi vidis ion malĉastan en tiuj rilatoj inter ni. Simple mi enamiĝis.

Mi ne esperis, mi ne havis kaŭzon por esperi, ke en la sekva dimanĉo mi revidos tiun virinon, kies nomon mi eĉ ne konas. Sed mi eraris. Tuj poste, kiam mi eniris kun Tom la vestiblon, tenante lin je la mano, mi ekvidis Doloran staranta en la sama loko, kvazaŭ ŝi ne forlasus ĝin de la pasinta semajno. Mi memoras, ke estis varma vintro-tago, kaj ŝia korpo odoris je parfumo. Ŝi vestis sin per hela kostumo, kaj sube havos bluan, elastan pulovron kun rulkolumo. Mi memoras ŝiajn ruĝajn vangojn, kiam ŝi ekvidis min, kaj por mi estis klare, ke ankaŭ ŝi atendas min. Mi memoras, ke tiam mi ekkonis ŝian nomon, sed la nomon de ŝia filino mi ne eksciis tiun ĉi tagon, nek poste. Kaj ne tiun ĉi tagon, ĉar ŝi kondutis same malamike kontraŭ mi, kiel sovaĝa besteto. Sed nur poste, ĉar eventoj okazis rapide kaj neniam plu mi revidis ŝin. Anstataŭ la nomo mi memoras detalon: ŝi havis blujajn

okulojn. Ĉio okazis same kiel dum la unua renkontiĝo, kun unu ŝanĝo. Ĉifoje ni jam ne klopodis ŝajniĝi. Ni sciis, ke la prezentado daŭros longe, tempo pasas rapide, kaj ni tute ne povas estingi la volupton, kiu ardas en ni. Kompreneble tio, kion ni faras, estis freneza. La adoleska ludo, kiu rememorigis miajn gimnaziajn jarojn, kiam mi premiĝis en la mallarĝa benko al iu kamaradino kaj finis ĉion hejme per masturbado. Ni disiĝis tiel, kiel ni renkontiĝis, kun streĉo, senvorte. Alies vivo estis barita zono, senĉese pruvis tion akompano de la infanoj. Ĝis kiam ni komprenis, ke pli longe ne povas okazi tiel.

Kio okazis en tiu dimanĉo, post kiu Tom ne volis iri kun mi al la pupteatro? Ĉifoje ŝi ne atendis en la vestiblo, sed en la salono. Kiam mi eniris, mi tuj komprenis, pro kio. La teatro estis ŝtopita. El la lasta vico ŝi svingis la manon, kaj mi okupis kun Tom la unusolan malplenan seĝon, kiun pene ŝi tenis por mi - kiel ŝi flustris al mi, kiam mi sidiĝis apude. Vi malfruas, mi timis, ke vi ne alvenos. En tiu momento estingiĝis lumoj. Mi alvenus, kompreneble, ankaŭ mi flustris, klinante la kapon al ŝia orelo. Kiel vi povis ekpensi, ke mi ne alvenos? Ne, ŝi respondis, mi sciis, ke vi alvenos. Estis densa mallumo, la kurteno leviĝis, kaj sur la scenejo aperis marionetoj. Unuafoje ni interŝanĝis kelkajn vortojn, kaj mi havis la impreson, ke ni estas surprizitaj per tio: ni rompis la baron de silento. Ni interparolis. Kun miriga intimeco. Kaj tute nature ŝajnis al mi, ke mi serĉu en malumo ŝian manon. Mi trovis ĝin. Ie proksime al la genuo, kvazaŭ ĝi atendus mian manon. Mi tuŝis ĝin. Kaj ĝi reciprokis la tuŝon. Niaj fingroj kunplektiĝis. Kaj tiam malaperis ĉiuj baroj inter ni.

Absorbata per tio, mi forgesis la plej gravan. Ŝia filino, sidanta unu seĝon pli malproksime, probable nenion aŭdis, nek vidis. Sed Tom, sur miaj genuoj, estis proksime. Mi ne povas imagi, kion sentas infano, kiam ĝi vidas sian patron, kiu senĉese tenas la manon de fremda virino kaj kondukas strange. En lia aĝo kaj en la sama situacio probable mi krius. Mi farus ĉion, por interrompi la prezentadon, ke denove brilu lumoj, kaj mia patro ellasu la manon de tiu fremda virino kaj ĉesu konduti strange. Tom ne kriis, sed en la sekva dimanĉo li ne volis iri al la pupteatro. Eble estis nur malbona humoro, kiu havas nenion komunan kun mia konduto. Sed povus esti ankaŭ esprimo de la protesto. Ĉiuokaze Tom elfalas nun el la ludo. Kaj li kaŝos en si la sekreton, kiu ĉiam malbridos la kulposenton. Ĉe tio, kio okazis poste, estis neniu krom mi kaj Dolora.

En la tago, kiam mi venis sola al la pupteatro, mi vidis ĉion klare: nia konduto estas skandala. , pli frue aŭ pli malfrue vidos ĝin aliaj. Mi komprenis ankaŭ la plej gravan: mi ne povos elteni sen Dolora. Do, mi tuj volis rompi ĉi baron: mi proponis al ŝi, ke ni renkontiĝu ie. Ni staris en la vestiblo, atendante la komencon de la prezentado, kaj ŝi tenis la filinon je la mano. Mia voĉo estis mallaŭta, kaj ŝia ruĝiĝinta vizaĝo konfuzis min. Vere mi sentis bedaŭron, kiel poste diris al mi Dolora. Mi ne scias, kial mi ne konsentis. Sence mi elturniĝis. Mi volis dormi kun vi..

Dumtage mi ne povis liberigi min de la sento de humiligo. Mi ne akceptis la penson, ke Dolora apartenas al la alia viro. Niaj tuŝoj en mallumo estis kvazaŭ ludo. Ia ŝajno, kiel marionetoj en la teatro. Nokte, je la dua, mi iris sur la ŝtuparo malsupren, sentante ke mi estas marioneto. Estis malvarmega nokto, blovis frosta vento. Mi starigis en la vico la retsakon kun malplenaj boteloj kaj okupis la lokon en mia angulo. De tie mi observis venantajn homojn. Virinojn kaj virojn. En diversaj vestoj. Kiel dormemaj timigiloj por noktobirdoj. Marionetoj de ambaŭ seksoj. Gapante al iliaj palaj vizaĝoj, mi komencis la kutiman ludon, mi klopodis diveni, kiujn virinojn fikis iliaj edzoj, antaŭ ol ili eliris nokte. Mi pensis pri tio, kiam mi ekvidis ŝin vestita per sia uniformo el la vico, kiu atendas lakton: per tiu longa, bruna palto kun levita fela kolumo. Kiomfoje hodiaŭ ŝi fikis kun la edzo, mi murmuris, kiu estas stultulo dormanta kviete, kiam vi leviĝas de la lito? Mi spiris kun peno. Mia cinikeco estis ŝajniĝita. Mi ne povis trankviliĝi. Trankvila estas iu alia, ĉar mi staras kiel birdotimigilo. Kiel nokta birdotimigilo, kiu sopiras bestece al ŝi.

Ĉi-nokte nur unu vendeja lampo brilis tiel malforte, ke la homaj vizaĝoj estis flavaj kiel ĉe kadavroj. Senĉese mi gapis al la luma cirklo antaŭ la montrofenestro, kie amasiĝis virinoj. Ŝi staris dorsoturnite al mi, mi vidis nur ŝiajn harojn, kiuj falis sur la ŝultrojn. Se mi ekpensus, mi tuj komprenus, kial ŝi staras dorsoturnite. Kiel kutime la ulo en militista jako iradis ĉirkaŭe kaj tial ŝi turnis la dorson al li. Sed konfuzita mi pensis malĝuste, ke ŝi faris tion pro mi. Kiam ŝi eliĝis el la cirklo de la flava brilo kaj dum momento haltis sur la limo inter lumo kaj mallumo, mi ne supozis, ke ŝi iras rekte al mi, por korekti la malĝustajn pensojn pri la okazanta. Verdire, mi

ekpensis pri ŝi kiel pri kosmano. Kun haroj distaŭzataj per frosta vento, sur la limo inter la flavo kaj la nigro, ŝi estis kiel fragmento de nebulozo, io malreala, kio tuj perdiĝos. La vero estis pli simpla. Dolora alproksimiĝis kaj petis min, ke mi estu je la sesa vespere antaŭ la kvartala kinejo, ŝi diris la nomon, kaj poste ŝi revenis en la flavan cirklon kaj stariĝis dorsoturnite al mi, sur la malnova loko.

En mia cerbo engravuriĝis la sesa horo kaj la nomo de la kinejo. Ankaŭ tiam, kiam venis la zuko kun lakto, kaj ciganoj elprenis la kestojn kun boteloj. Kaj ankoraŭ tiam, kiam mi forprenis du botelojn kiel ĉiutage, revenis hejmen kaj kuŝiĝis en la liton apud la korpo de Marga, miaj pensoj turniĝis nur pri la sesa horo kaj pri la nomo de la kinejo. Dum kelka tempo mi devis klarigi al mi la ligon inter la faktoj. Do, je la sesa mi staru antaŭ la kvartala kinejo. Tio signifas, ke je tioma horo kaj en tiu loko estos ankaŭ Dolora. Sed kial je la sesa kaj kial ĝuste tie?

En tiu kinejo ĉe la urborando oni prezentas kutime nur malnovajn filmojn. Malofte ĝi estis ŝtopita, vizitadis ĝin junaj paroj, kiuj pro la manko de aliaj eblecoj pasigis tie du horojn. Ili disiĝis en la salonego, malproksime unu de la alia, kaj la filmo sur la ekrano estis io, kio tute ne spronis la atenton ĉe ili. Tia vespero ne ravis min precipe. Sen aludi, ke la ideo pri la renkontiĝo ĉi tie estis riskoplena. Kaj ankaŭ mi sentis min kiel fiulo, kiam mi rigardis la grandan ventron de Marga. Dume mi devis tamen elpensi iun kredindan mensogon pri mia ekskurso kun zorgeme elektita masko.

Mi ne scias, kiun mensogon mi elpensis. Mi memoras, ke dum la razado mi distranĉis haŭton kaj apenaŭ ŝtopis la vundeton, kaj tiu malgranda okazaĵo sufiĉis, ke mia streĉo atingu la pinton. Mi eliris el la hejmo unu horon antaŭ la renkontiĝo, kvankam mi bezonas nur dek minutojn por veni al la kinejo. Mi sidiĝis en la kafejo proksime. Ĝis la fiksita horo mi atendis plej malĝuste: ĉe la duobla konjako. Tre rapide mi deziris novan glaseton. Kvin minutojn antaŭ la sesa mi stariĝis ĉe la enirejo al la kinejo, apogita sur la muro, apud la prilumita afiŝo, kun la manoj en la poŝoj de mia pluvmantelo. La filmojn oni prezentadis je la neparaj horoj. Krom mi kaj iu hazarda pasanto estis neniuj. La pordo de la kinejo kaj la fenestro de la kaso estis fermitaj.

Ŝi venis akurate je la sesa. Mi ekvidis ŝin de malproksime, en febla lumo de neonlampoj, mi staris apogita sur la muro, kun la manoj en la poŝoj de mia pluvmantelo. Ŝi iris malrapide, ŝi ankaŭ tenis ambaŭ manojn en la poŝoj de la pluvmantelo. Ŝi haltis apude kiel hazarda pasanto, rigardis la afiŝon distrite kaj sen turni la kapon ŝi flustris, ke mi iru post ŝi. Mi faris tion, kion ŝi diris, mi iris surprizita kelkajn paŝojn post ŝi: ni do ne pasigos ĉi vesperon en la malagrable kinejo. Kolerigis min la maniero, per kiu ankoraŭfoje ŝi starigis min samtage antaŭ la fakto. Tamen fajrero de la ribelemo estingiĝis rapide. Mia vira fierego cedis kiel malbona hundo, kiu ne plu bojas tuj poste, kiam oni ĵetis manĝopecon kun ŝatata odoro. Mi estis plenplena je ŝia odoro. Nun mi timis, ke mi ne perdu ŝin for de miaj okuloj. Tio povus okazi, ĉar ŝi forlasis la ĉefan vojon kaj eniris unu strateton, poste la alian, ĝis kiam mi haltis en la blinda strato, kaj ŝi malaperis. Sed ŝi staris apude, en la mallarĝa pasejo inter la unuetaĝaj domoj, al kiu mi venis, kiam ŝi vokis mallaŭte: La ŝtuparejo meze, sur la unua etaĝo, dekstre, ŝi diris haste. Ŝi petis, ke mi atendu dek minutojn, kaj ŝi foriris.

La ŝtuparejo meze, sur la unua etaĝo, dekstre... Fojfoje mi ripetadis ĉi vortojn, kiam mi atendis en la mallarĝa pasejo, kaj ili ankoraŭ muĝis en mia kapo, kiam mi eliris de tie sur la placon, kiun prilumis nur lumo el la fenestroj de la domo kun tri nigraj ŝtuparejoj kiel faŭkoj de kaverno. Mi ekpaŝis antaŭen. La ŝtuparejo meze, sur la unua etaĝo, dekstre... Tra densa mallumo, atentante por ne rompi la nukon sur la ŝtuparo, mi venis tien.

Ŝi ŝlisis la pordon interne kaj en la malluma koridoro ŝi irigis min en la ĉambron. Ni haltis vidalvide. Ŝia vizaĝo ruĝiĝis pro vespera mallumo aŭ pro varmo en la ĉambro. Mi ekstrepegis. Mi altiris ŝin, kaj ŝi fermis la okulojn. Mi klinis la kapon al ŝia buŝo, kaj ŝi ekĝemis dolore. Ŝi alpremis la korpon al mi kaj ni komencis haste demeti la vestojn, kvazaŭ estus malmulte da tempo, kaj ni volus fini la renkontiĝon tiel, kiel en la salono de la pupteatro, kie ni estis ĉiufoje disigitaj, eltenante senĉesajn turmentojn dum la tuta semajno. Eĉ kiam ni senvestiĝis, ŝi restis en subjupo, kaj ni staris inter la disĵetitaj vestopecoj. Mi timis, ke mi finos, antaŭ ol mi kuniĝos kun ŝi, sed mi ekvidis kanapon, sur la kanapo tukegon kun kuseno kaj mi posttiris ŝin. Ŝi ĉirkaŭbrakis mian kolon. Tiam en la kaveto inter ŝiaj mamoj mi ekvidis maldikan oran ĉeneton kun medaliono. Pro ekscitiĝo mi ne demandis pri ĝi,

estis nenia kaŭzo, ke interesu min la medaliono, kiun ŝi demetis kaj enŝovis sub la kusenon. Se mi sciis, kion ĝi kaŝas, mi ekpensis, ke Dolora klopodas forigi ĉion, kio estos ĉe nia kokro, eĉ se estus la portreto de mortinto.

Antaŭsentante, ke tio ne finiĝos bone, mi decidis ne renkontiĝi kun ŝi. Ĉi tiu penso flugis tra mia kapo tuj poste, kiam ni kuŝis elĉerpitaj sur la kanapo, ne kredante, kio okazis, kaj ŝi esploris. Mi ne kuraĝis diri ion. Malmulte ni interparolis ĝis nun. Aŭdiĝis nur la plej necesaj vortoj, kiuj venigis nin ĉi tien. Kion ajn mi dirus nun, tio ne havus sencon. Ni preskaŭ ne konis unu la alian. Rigardante ŝian korpon sur la kanapo, mi ekpensis, ke mi devos ion fari. Kaj plej bone mi foriru.

Miaj vestaĵoj kuŝis sur la tapiŝo kovranta la plankon, disjetitaj kaj miksitaj kun ŝiaj vestaĵoj. Dum mi vestiĝis, mi vidis malgrandan hejtigilon je ligno, du fotelojn, kaj ĉe la kontraŭa muro bretaron kun libroj. Vidante en la angulo dismeteblan tablon, mi komprenis, ke la ĉambro servas kiel salono kaj manĝejo. Ŝi levis la kapon, kiam starante kun pluvmantelo en la mano, mi klopodis trovi ĝentilajn vortojn por la adiaŭo. Kiam mi surmetis miajn vestaĵojn, mi havis la impreson, ke ŝi sentas, kion mi volas fari. Ŝajne ŝi deziris la samon, ke mi foriru. Tamen en la lasta momento ŝi ŝanĝis la opinion. Mi petas vin, ŝi diris, ankoraŭ ne foriru!

Mi staris meze de ŝiaj vestaĵoj. Mi ne scias, kion esprimis mia vizaĝo, kaj poste kiam ŝi petis, ke mi restu, ŝi diris, ke ni estas en ŝia loĝejo. Verŝajne ŝi ekpensis, ke mi timas, sed ŝi eraris. En tiu momento mi sentis nenan timon antaŭ la kapto ĉe la faro, kio estis distinga por tiuj ĉi jaroj. Sed mi metis la mantelon sur la apogilon de la seĝo kaj sidiĝis sur la fotelon apud la hejtigilo. Dolora kuŝis nuda sur la kanapo. Mi deturnis la kapon kaj aŭdis, ke ŝi leviĝis kaj en silento kolektas siajn vestaĵojn, en pezega silento kiel mallaŭta plorego, kaj poste ŝi eliris la ĉambron. Mi restis sola, dek minutojn aŭ dek jarcentojn. Kiam ŝi revenis, ŝi ankoraŭ havis larmospurojn sur la vangoj. Ŝi prenis el la bufedo poteton kaj paketon kun kafo, ŝi demandis, kia ĝi estu, mi respondis, ke mezoforta kaj dolĉa.

Ŝi alportis kafon, glason da konjako, kaj mi ekpensis, ke okazas io stranga. Kiam ŝi alŝovis la fotelon, por sidiĝi vidalvide, ankaŭ kun glaso da konjako en la mano, mi vidis, ke ŝi certe ne estas malĉasta virino. La konfuzo en mia kapo ankoraŭ plifortiĝis, kiam ŝi fortrinkis konjakon unuglute kaj petis, ke mi faru la samon. Mi petas vian pardonon, ŝi diris, reverŝante konjakon en la glasojn. Mia ploro ne estis deca, sed havis nenan ligan kun vi. Kaj rigardante sian glason, ŝi diris: mia edzo sidas en malliberejo... jam tri jarojn. De tiam mi dormis kun neniu... Vi estas la unua, sinjoro, kun kiu mi iris en la liton.

Ŝia konfeso kaj tio, ke ŝi alparolis min per „sinjoro”, konfuzis min. Senpense mi fortrinkis konjakon unuglute. Ŝi faris same. Mi volis diri al ŝi, ke oni ne trinkas konjakon tiel kaj tiom multe, sed mi rezignis. Estus abomene, ke mi donu konsilojn al ŝi. Mi plu trinkis, ankaŭ Dolora, ĝis kiam ŝi atingis randon de la ebriego, kiam ĉio estas facila kaj povas okazi. Kaj mi sidis kvazaŭ sur ardantaj karberoj, intencante - se eble plej rapide - foriri de ĉi tie kaj kompatante ŝin.

Ŝi divenis, kiuj pensoj turmentas min. Vi povas foriri, sinjoro, ŝi diris bruligante cigaredon. Ne... parolu nenion, estus nur mensogoj. Ankaŭ mi volus mensogi al vi, sinjoro, se tio helpus min. Sed ne estas tia mensogo, kiu povus min helpi; do, se okazis tio, kio devis okazi, pli bone ni adiaŭu reciproke. Ni povus renkontiĝi ankoraŭfoje, se vi ne timas, sinjoro, ni renkontiĝos denove. Ĉar renkontiĝi kun mi estas danĝere, mi avertas vin. Mia edzo, arĥitekto, estis kondamnita al okjara malliberigo pro agitado kaj propagando. Mi aŭdis, ĉar oni flustras nun, ke unu el la denuncantoj estis lia malnova amiko kaj kolego, tiu ulo, kiu de kelka tempo vagadas ĉirkaŭ mi. Eble vi rimarkis lin en la vico, atendante lakton, ĉiuj vidas lin. Sed ĝi estas banala historio, mi ne volas tedi vin. Mi deziras nur kredi al vi tion, ke tri jarojn mi estis fidela al mia edzo kaj mi estus fidela ankoraŭ dum la sekvaj kvin jaroj, ĝis kiam li forlasos la inferon, kiu nomiĝas Spaĉ*, kie li restadas. Sed li sidos pli longe ol kvin jarojn. Antaŭ monato li estis denove kondamnita, en la malliberejo li ricevis ankoraŭ dek jarojn. Kaj se Dio permesos al li vivi, li devos pasigi dek kvin jarojn tie.

Ŝi estingis preme en la cindrujo la cigaredon, kiun ŝi ĵus bruligis. Mi sidis rigida, dezirante fari ian kompatan geston. Sed mia cerbo ne kapablis elpensi ion saĝan. Mi rekonis, ke estos prudente kapti la botelon kaj verŝi konjakon en la glasojn por ŝi kaj por mi. Dolora dankis. Vi povas imagi, ŝi flustris, ke en la vivo restis al mi nenio bona. La familion de tiel danĝera persono kiel mia edzo oni forpelas el la urbo. Ĉiutage mi atendas la

*) Spaĉ - terura malliberejo por opoziciaj agantoj en la montaro.

forpelon. Antaŭ tri jaroj, kiam mia edzo estis kondamnita unuafoje, mi laboris en kvartala biblioteko. Oni forpelis min de tie kaj kun peno mi trovis laboron en la entrepreno de urba purigado. Antaŭ monato, kiam li ricevis la novan verdikton, mi perdis ankaŭ ĉi okupon. Nun mi ne havas laboron. Do, vi komprenas, en kia situacio mi estas. La filinon kun la bopatrino mi sendis al la urbo M. , al la frato de mia edzo. Nun mi atendas, kio okazos.

Kiam ŝi diris la nomon de la urbo M. , vekigis en mi rememoro de antaŭ longe. Malrapide ĝi venis kaj enpremiĝis en la cerbon. Io, kio restis el la tempo kaj spaco, kio estis ligita kun la urbo M. Same malrapide tiu rememoro perdiĝis. En tiu momento nenio povus kapti ŝian atenton. Ŝi deziris nur ke mi ne foriru. Ŝi diris, ke kiam ŝi restas sola, ŝi tuj sentas timegon, kaj nokte ŝin turmentas koŝmaraj songoj, do ŝi petis, ke ankoraŭ momenton mi sidu kun ŝi.

Tio daŭris semajnon. La tagojn mi pasigis en apatio, malkapabla fari eĉ ion simplan. Dum tiu semajno ŝi ne aperis en la vico por lakto, ŝi ne bezonis stari, la filino ne estis hejme. Do, post niaj renkontiĝoj, kiam ni trinkis multe da brando, ŝi povis dormi kaj ripozi. Kaj mi ne estis pacienca, kiam mi nur malfermis la okulojn, kiam sonoris la vekhorloĝo sur la komodo, kvankam ni disiĝis antaŭnelonge. Mi okupis la lokon en la angulo kaj sence gapis al la virinoj, starantaj kunpremite. La denunciinto en militista jako aperadis vane. Dolora kuŝis en la lito, ankoraŭ ebria, terurigante pro la koŝmaro de forpelo. La virino, kiu devas atendi dek kvin jarojn, ĝis kiam ŝia edzo estos libera. Mi ne sciis, kio allogas min al ŝi, ĉu kompatemo aŭ volupto, kiun mi ne povis bridi.

Mi turmentiĝis precipe en vesperoj, kiam mi devis forlasi la hejmon kaj ĉiufoje elpensi novan mensogon por Marga. Mi konvinkis min, ke kiam mi iros pli frue, Marga suspektos nenion. Unu horon, unu kaj duonan horojn antaŭ la renkonto mi elturniĝis per io, ke mi devas eliri, kaj mi vizitadis la knajpon antaŭ la kinejo. Por pasigi la atendotempon, mi trinkis konjakon. Kiam estis dek minutoj antaŭ la sesa mi fortrinkis du, kaj kelkfoje eĉ tri duoblajn konjakojn. Antaŭ ol eliri, mi aĉetadis duonlitran botelon da konjako, mi metis ĝin en la poŝon de la jako sub la mantelo kaj akurate je la sesa mi eniris tra mallumo sur la ŝtuparon en la domo, atentante ke mi ne rompu al mi la nukon. Mi puŝis malforte la pordon de ŝia loĝejo, same malforte mi fermis ĝin, turnis la ŝlosilon kaj iris en la ĉambron.

Kiam mi eniris la ĉambron, mi vidis, ke ankaŭ ŝi iom drinkis, ĝis kiam mi venos. Tio malstreĉis nin tiel, ke ni kondukis nature. Sed vere turmentis min ankoraŭ unu dubo. Ŝajnis al mi, ke kiam ni fikas, ĉiam sur la kanapo kaj neniam en la dormoĉambro, ŝi volas plori. En la momento de la plena ĝuo ŝi krietas kaj mi ne scias, ĉu estis ĝemoj de la orgasmo aŭ doloro pro alia kaŭzo. Poste ŝi rapide eliris kaj enfermiĝis en la banejo, mi ne vidis, kion ŝi faras tie, eble ŝi ploris, ĉiufoje ŝi havis ruĝiĝintajn kaj malklarajn okulojn, povus ŝajni ke pro larmoj, sed ankaŭ pro brando. Kaj la medalionon mi vidis ankoraŭfoje dum nia lasta renkontiĝo, kiam ŝi diris, ke sekvatage ŝi forveturos al la urbo M.

Ŝi antaŭsentis, ke ĉi-vespere ni renkontiĝos por la lasta fojo. Kaj mi silentis pri la sekreto, kiu ankoraŭ tre longe min turmentis post kiam ŝi malaperis. Ĉi-vespere ŝi ne ebriiĝis kiel kutime. Mi ekpensis, ke certe ŝi ne havas monon por konjako. Ŝi staris meze de la ĉambro, kaj min absorbis nur unu penso: se eble plej rapide disbutoni ŝiajn vestaĵojn. Ŝi premiĝis al mi. Miaj fingroj tuŝis ambaŭ mamojn kaj kaptis la ĉeneton de la medaliono, kiun ŝi portas sur la kolo, tamen ŝi dekroĉiĝis de mi kaj diris, ke ŝi forveturos. Morgaŭ mi forveturos al M. , ŝi diris, mi pasigos tie semajnon. Denove ŝi aŭdigis la nomon de la urbo M. Kaj mi volis respondi, ke mi konas ĉi urbon. Troviĝas tie mizerega hoteleto kaj kelkaj ankoraŭ pli mizeregaj drinkejoj. Sed por mi estis la provinca urbo. Mi diris nenion. Estus sence paroli ion en tiu momento.

Kiel ĉiam mi fikis Doloran sur la kanapo. Kiel ĉiam ŝi iris poste en la banejon, el la banejo en la ĉambron, longe ŝi restis tie, pli longe ol ĉiufoje ĝis nun. Mi malplenigis la botelon duone, antaŭ ol ŝi stariĝis en la pordo. Kun ruĝiĝintaj okuloj. Kaj belega. Mi ne scias, kio min tentis. Vi ploris, mi diris, kiam ŝi okupis la fotelon vidalvide. Vi ne povas mensogi, ke vi ne ploris. Ĉiufoje, kiam ni disiĝas post la fiko, vi enfermiĝas en via ĉambro, ploras, kaj mi sentas min kiel batita hundo.

La vizaĝo de Dolora, kiu ĉiam estis pala, ankoraŭ pli paliĝis. Kaj ŝi sidis en silento. Mi tuj komprenis, ke mi diris ion stultan. Mi volis peti ŝian pardonon, sed estis tro malfrue. Mi donis al vi ĉion, ŝi diris kaj kovris la

vizaĝon per ambaŭ manoj. Tiam mi diris nur tiujn vortojn, kiujn mi trovis, por esprimi, kion mi sentas. Malagrabla, mi diris, sed mi timas, ke mi enamiĝis al vi.

Pro la silento, kiam ŝi aŭskultis miajn vortojn, mi sentis, ke ĉi tiu konfeso ne estas surpriza. Kviete ŝi prenis la botelon kaj verŝis konjakon en la ĝlason. Ŝi estis vestita per pulovro kun rulkolumo, kaj sur ŝia brusto pendis la medaliono. Vi postulas de mi ion, kio ne okazos, ŝi respondis. Blindigis min io. Estis lumo, kiu rebrilis sur la glata medaliono, mi ekpensis, rigardante kiel ŝi fortrinkas konjakon el la ĝlaso. Teruris min ŝia drinkemo. Mi ne intencas ofendi vin, ŝi daŭrigis, sed mia ploro havas nenion komunan kun vi... Estas aliaj kaŭzoj, kaj vi ne insistu, ne ĉion vi devas ekscii. Kaj ŝi diris: mi naskiĝis en la ekzilejo. Mi timas, ke mi mortos tie - ekzilita kiel miaj gepatroj. Certe vi aŭdis la nomon de mia patro, eĉ se vi estis plej malkapabla en la lernejo aŭ kiel studento. Ĝi estas skribita en ĉiuj lernolibroj de historio. Mi estas la filino de la malamiko de l' popolo, mi naskiĝis en la ekzilejo. Pri alio mi ne volas paroli, mi petas vin.

Mi sobriĝis tuj. Eĉ ne iomete da konjako mi englutis, kaj la reston fortrinkis ŝi. Mi komprenis, kial ŝia vizaĝo rememorigas al mi iun konatan. Ŝi rigardis min per la okuloj de Liza. Poste, kiam ŝi malplenigis la botelon, ŝi demetis la medalionon de la kolo, malfermis ĝin kaj montris al mi, kion ĝi kaŝas, mi ekstrepegis. Ĉe unu flanko estis la foto de Profesoro. Kaj aliflanke la foto de Liza. Via patrino estis belega, mi diris. Vi tre similas al ŝi.

Ĝis hodiaŭ mi pensas ofte, kial ĉi-vespere mi ne rakontis al Dolora pri la komplikaj rilatoj inter mi kaj ŝiaj gepatroj, kiam mi estis infano. Probable en tiuj cirkonstancoj miaj vortoj povus aŭdiĝi malvere. Aŭ mi prokrastis tion, ĝis kiam Dolora revenos de la urbo M.

Mi atendadis vane. Neniam ŝi revenis de la urbo M.

Scienco

Amuza matematiko

(Ĉi sube estas fragmento el la libro jam enesperantigita "Amuziĝu per matematiko", dua parto. La interesatoj en diversaj landoj povas peti ĝin cele al traduko nacilingve. La aŭtoro Bardhyl Selimi)

Problemoj de Diofanto²

Sendube la problemoj, tiel nomataj de Diofanto, (kie la nombro de nekonataj kvantoj estas pli ol la nombro de ekvacioj spegulantaj ties rilaciojn) ĉiam vekis kaj vekas ankoraŭ sufiĉe multe da scivolemo ne nur ĉe la gelernantoj.

Ni komencu per kelkaj simplaj ekzemploj.

- **La buso**

² Diophantes, filo de Asclepiodorus de Sinop, estis fama generalo pro subigo de Scythoj, sur lokoj ĉirkaŭ la Nigra Maro. Vivis ĉirkaŭ la jaroj 200-284.



Kolektivo da laboristoj kun iliaj gefiloj mendis ekskursbuson kies biletoj kostus entute 22400 L. (Leko-albana monunuo) . La bileto por la adoleskanto kostis 560 L dum por la infano 320L. Trovu kiom da adoleskantoj kaj kiom da infanoj estis entute?

Solvo:

Se ni notus me x kaj y la nombrojn de adoleskantoj kaj infanoj respektive tiam ni akirus la jenan ekvacion:

$$560x + 320y = 22400$$

Kiu plureduktite havus la formon

$$7x + 4y = 280$$

Ni prezentu $x = (280 - 4y) / 7$ de kie $x = 40 - 4y/7$.

x estas ja entjero, tial tia devas esti ankaŭ $4y / 7$. Kontrolinte diversajn valorojn de y kontentigantaj ĉi kondiĉon rezultiĝos $y = 7$ dhe $x = 36$

Respondo: 36; 7

- **Oraj taleroj³**



80 personoj (viroj, virinoj, infanoj) gajnis 200 orajn talerojn. Ĉiu viro gajnis 6 talerojn, ĉiu virino 3, ĉiu infano 1. Kiom da viroj, virinoj, infanoj estis respektive?

Solvo de Weber (jaro 1737) :

³ Monunuo dum Mezepoko

Ni notu per x la nombron de viroj, per y tiun de virinoj. Tiam la nombro de infanoj estas $80 - (x+y)$
Laŭ la kondiĉo

$$6x + 3y + 1(80 - x - y) = 200$$

Tio kondukas al
 $5x + 2y = 120$.

Nun ni serĉu naturajn valorojn por x kaj y , ĉar ties nombroj estas ja entjeroj, ne negativaj.
Estas multaj solvoj, jen kelkaj:

infanoj	virinoj viroj	
50	10	20
53	5	22
47	15	18
44	20	16
41	25	14
38	30	12
35	35	10
36	40	8
29	45	6
26	50	4
23	55	2

- **Simila problemo⁴:**

Per 100 Lekoj aĉetu 100 fruktojn: pomoj je 5L ĉiu, piroj je 3 L ĉiu kaj prunoj je 10 prunoj po 1 Leko.



Solvo:

Pli libera rezonado estus la jena:

Certe, pli da fruktoj estus la prunoj. Sed ties nombro devas esti multoblo de 10, kontraŭe, ni ne povas kunakordigi la ciferojn por x kaj y . Se ni supozu

$$z = 80, \text{ rezultiĝas ke } x + y = 20.$$

⁴ Ĉi tiu problemo prezentiĝis per diversaj tekstoj kaj vekis multe da intereso ankaŭ ĉe miaj gelernantoj (Aŭtoro: B.S.)

Se ni prenu $y=4$ kaj $x=16$

tiam la unua kondiĉo $80+16+4=100$ plenumiĝas.

Ankaŭ la dua kondiĉo $80*01+16*5+4*3=8+80+12=100$ plenumiĝas.

Oni povas trovi ankaŭ aliajn solvojn kiel ĉi tio.

Sed ĝenerale oni rezonas tiel:

$$x+y+z=100 \text{ de kie}$$

$$z=100-(x+y).$$

Aliflanke

$$5x+3y+01z=100 \text{ aŭ}$$

$$5x+3y+0.1(100-x-y)=100$$

De kie

$$5x+3y+10-0.1x-0.1y=100$$

$$4.9x+2.9y+10=100 \text{ de kie}$$

$$49x+29y=900$$

$$49x=900-29y$$

$$x=(900-29y)/49$$

Por ke x estu entjero devas ke $(900-29y)$ estu multoblo de 49.

Ni kontrolu kiuj valoroj de y kontentigas ĉi kondiĉon kaj ni trovos:

Provante laŭvice $y=1$; $y=2$; $y=3$; ni trovos ke $y=4$

Ni ekhavas:

$$900-29*4=900-116=784$$

$$784:49=16$$

Do, unu solvo estas la triopo (16, 4, 80) . Sed tio ne estas unika. Trovu aliajn solvojn!


- **Provu mem, ke per:**

20 moneroj de tri specoj 50L, 20L kaj 5 L, formu sumon el

a) 500 L

b) 300 L

c) 200 L



- *Aŭ per 15 moneroj 0. 5 L, 10 L, kaj 5 L formu sumon el 100 Lekoj*

- **Donu**

Donu al mi 20 monerojn tri specaj: 50 L, 20 L kaj 10 L por ke ilia entuta valoro estu 500 L (aŭ 300 L, aŭ 200 L).



Moneroj el la tempo de imperiestro Teodoso I

Solvo

Ni formu la ekvaciojn:

$$50x+20y+10z = 500$$

$$x+y+z= 20$$

$20 \geq x, y, z \geq 0$ same estas entjeroj.

Dividinte per 10 la unuan ekvacion kaj anstataŭiginte $z = 20 - (x+y)$ ni ekhavis

$$5x + 2y + 20 - x - y = 50$$

$$\text{Aŭ } 4x + y = 30$$

$$\text{Aŭ } y = 30 - 4x$$

Prikonsiderinte la kondiĉon ke y estas ja natura nombro, ni provu diversajn valorojn de x :

Por $x=1$ rezultigjës $y=26$, ne akceptebla.
 Por $x=2$ rezultigjës $y=22$, ne akceptebla.
 Por $x=3$ rezultigjës $y=18$ ne akceptebla çar $3+18$ plias 20
 Por $x=4$ rezultigjës $y=14$ akceptite çar rezultigjës $z=2$.
 Pruvo : $4*50 + 14*20 + 2*10 = 200+280 +20 = 500$
 Por $x=5$ rezultigjës $y=10$ kaj $z=5$, akceptebla
 Por $x=6$ rezultigjës $y=6$ kaj $z=8$, akceptebla
 Por $x=7$ rezultigjës $y=2$ kaj $z=11$ akceptebla
 Por $x=8$ rezultigjës $y=-2$ ne akcepteblaj.

(Artikolo publikigjita sur la ĵurnalo “La Nacia reago”, nr 10/2009, paĝoj 10-11)

Albane:

Teza për bisedë: Vlera dhe e ardhmja e Esperantos

- Së pari, duhet thënë që Esperanto është një projekt i madh, i suksesshëm, në fushën e komunikimit gjuhësor ndërkombëtar. Ai i ka mbijetuar kohës më shumë se 122 vjet (lindi më 1887 nga Ludvig Zamenhov) dhe ka gjetë përhapje dhe zhvillim të mëtutjeshëm.
- Kur flitet për një gjuhë, nuk mund të pritët që ajo të bëhet universale brenda një periudhe të tillë, edhe për shumë arsye jashtë gjuhësore. Por edhe projekte të tjera të mëdha, si fjala vjen, ai i francezit Gilbert Mouton, më 1647, për futjen e sistemit metrik, pas 120 vjetësh, më 1767, ende nuk u përqaftua nga asnjë shtet i atëhershëm! Madje, edhe sot, ka shtete që nuk e kanë në përdorim të vetëm atë! Megjithatë, projekti i Moutonit është shumë përparimtar dhe i dobishëm! I tillë është edhe projekti i Esperantos.
- Kur u krijua ajo si gjuhë, sigurisht, ishte shumë më modeste se sa tani. Autori hoqi dorë nga shpikja e tij gjeniale, pasi këmbënguli që të ruhet themeli i gjuhës në fjalë (një minimum fjalori dhe rregullat gramatikore bashkë me sistemin e parashtesave, prapashtesave për formimin e fjalëve), duke ia lënë zhvillimin e mëtutjeshëm të gjuhës linguistëve dhe Akademisë së tyre. Që atëherë Esperanto është pasuruar së tepërmi duke përfutur një fjalor, jo më të vogël se sa ai i gjuhëve të tjera kombëtare dhe duke shërbyer fare mirë në të gjitha fushat e dijës dhe artit.
- Shumëkush shtron herë pas herë pyetje të tilla si:

Si mund të zhvillohet një gjuhë artificiale, jo natyrore, jo kombëtare, pra pa tradita popullore në shekuj?

Përgjigjia është e thjeshtë: Esperanto mund të zhvillohet si gjuhët natyrore, sepse asnjë fjalë e saj nuk është e sajuar, por është e marrë nga ato gjuhë natyrore dhe etnike ekzistuese, kryesisht evropiane; po ashtu, rregullat gramatikore kanë lidhje me traditën e tyre.

Koha ka treguar, që në Esperanto janë përkthyer me sukses kryevepra të letërsisë botërore, të shkencës moderne, të fesë, filozofisë, etj. Po ashtu, në këtë gjuhë janë shkruar vepra origjinale shkencore, artistike, filozofike etj, me shumë sukses.

- Duke qenë një strukturë më e thjeshtë, si gjuhë, Esperanto përvetësohet më shpejt, më lehtë e më qëndrueshëm edhe nga njerëz që nuk para i kanë qejf gjuhët e huaja ose kanë pak kohë me u marrë me to. Nga ana tjetër, përvetësimi i Esperantos, i ndihmon ata të përvetësojnë, mandej, më shpejt e më qëndrueshëm gjuhë të tjera kombëtare. Vërtet, për të mësuar të vraposh, duhet më parë të mësosh të ecësh; për të rrëshqitur në ski në Alpet, më parë mëso të rrëshqasësh në pjerrësira të bura; për të studiuar trupin e ndërlikuar të njeriut, më parë studio skeletin e tij. Kështu, edhe në nxënien e gjuhëve, duke studiuar më parë Esperanton, mund të mësosh më lehtë anglishten, gjermanishten e gjuhë të tjera. Këtë e kanë mbështetur eksperimentet shumëvjeçare të zhvilluar nga Instituti i kibernetikës në Paderborn (Gjermani), këtë po e praktikojnë shumë shkolla në kuadrin e projektit “Trampolina gjuhësore”, i nisur në Britani të Madhe nga Angela Teller (në Britani qeveria nuk i detyron më nxënësit të mësojnë gjuhë të huaja! Kuptohet, sepse anglishtfolësit janë të privilegjuar, sot për sot).

Nobelisti për matematikë, esperantisti gjerman, Reihard Selten, propozoi që Esperanto të futet si gjuhë e huaj e parë në disa vende të BE, si gjuhë ndihmëse për mësimin e gjuhëve të tjera kombëtare.

Madje, në Irlandë, ku janë gjallëruar përpjekjet për mësimin e gjuhës autoktone të lashtë, duke përdorur Esperanton si gjuhë urë (irlandishtja ka qenë shkruar, që në vitin 597 para Krishtit. Më 2005, ajo u njoh si gjuhë zyrtare nga BE) .

- Esperanto nuk ka mbështetje politike dhe ekonomike nga ndonjë shtet apo popull. Por, duke qenë neutrale, ajo pikërisht do gëzojë, në të ardhmen, mbështetje të gjerë mbarë botërore. Sepse ajo nuk i dëmton, përkundrazi i mbron gjuhët kombëtare nga ndikimi shkatërrues i gjuhëve të huaja të imponuara, siç po kqyret aktualisht, si dukuri negative, ndikimi i anglishtes, jo vetëm në vendet e vogla.
- Nga ana tjetër, historia ka dëshmuar, se edhe kur një gjuhë e caktuar (greqishtja e vjetër në shek I, latinishtja në shek XI, frëngjishtja në shek XVIII, anglishtja në shek XX) ka shërbyer si mjet komunikimi ndërkombëtar, ajo nuk është zotëruar dot nga populli, por vetëm nga shtresat e arsimuara të tij. Sipas kësaj logjike historike, pas disa dhjetëra vjeçarësh, fuqinë mbizotëruese ekonomike e, bashkë me të, edhe politike, do ta kenë Kina, Hindia dhe Brazili, d. m. th. , ka gjasa që kinezishtja të përdoret, në vend të anglishtes, për komunikimin ndërkombëtar. Pse, atëhere të mos përdoret Esperanto, një mjet i gatshëm, neutral, i lehtë në përvetësim, pa rrezik për t'u copëzuar në dialekte (si po ndodh me anglishten) ?
- Përdorimi i Esperantos, gjithashtu, do shkurtonte ndjeshëm shpenzimet për përkthime dhe interpretime, që bëhen aktualisht, shpenzimet për mësimdhënie të gjuhëve të huaja në shkolla, ndonëse studimi i gjuhëve të tjera kombëtare do mbetet, sërish, i nevojshëm për të njohur reciprokisht kulturat e popujve, por kjo vetëm nga grupe të kufizuara dhe të interesuara për këtë qëllim, pasi në Esperanto mund të përkthehen informacionet bazë të nevojshme.
- Veçanërisht e ndjeshme është nevoja e adaptimit të një gjuhë të përbashkët për Bashkimin Evropian ku aktualisht operohet me 23 gjuhë të ndryshme!

Kaq i mprehtë dhe i ndjeshëm është problemi i gjuhës brenda këtij Bashkimi, sa Komisioni Evropian ka tani një ministër, rumunin Leonard Urban, vetëm për politikën gjuhësore. Në vitin 2005, doli raporti Grin ku tregohet se, për shkak të diskriminimit gjuhësor, Britania e Madhe merr çdo vit nga shtetet e tjera anëtare 17 miliardë euro plus.

Në vitin 2006, europarlamentari gjerman Michael Gahler kërkoi që të pakësohet numri i punonjësve që e kishin anglishten gjuhë amtare, pasi kishte një shpërpjesëtim të padrejtë në punësim brenda institucioneve të BE, që u jepte përparësi anglishtfolësve amtarë.

Më 2007, kryeministri sllovak, Dushan Çaploviç dhe europarlamentarja italiane Emma Bonino tërhoqën vëmëndjen për këtë përdasim gjuhësor.

- Në Shqipëri Esperanto njihet, të paktën, që nga viti 1907. Atë e futën studentët që vinin nga universitetet evropiane të kohës. Përmëndim esperantistët shkodranë Lazër Shantoja, Mark Kakaeiqi, Cuk Simoni, Vilhelm dhe Mikel Koliqi. Ata kishin, në atë kohë, korespondencë me dhjetëra esperantistë nga vende të tjera, si dhe me organizatat dhe shoqatat e ndryshme ndërkombëtare. Cuk Simoni shkroi, në origjinal, një libër për historinë e Skëndërbeut, që gjendet sot, në kopje të ralla, dhe shquhet edhe për vlerat artistike që përmban.

Esperantistë të tjerë kanë qenë edhe Janko Pali nga Bregu, dr. Hamdi Sulçebe, nga Tirana, ing. Çefo Fico nga Gjirokastra dhe, pas luftës së dytë botërore, mësues Zef Mjeda nga Shkodra dhe ing. Vasil Pistoli nga Struga. (ky i fundit jeton ende në Nju Jork) . Ndonëse në moshë të thyer, ata hapën kurset e para në universitet dhe në shkolla dhe shkruan librat e parë mësimorë për këtë gjuhë. Njëkohësisht, ndërmorën një punë përkthimi të gjerë, përpilimin e fjalorit shqip- esperanto, propagandimin në mjetet e shtypit dhe medias.

Natyrisht, në kushtet e regjimit totalitar, edhe përhapja e esperantos nuk ishte e lehtë, pasi gjuhët e huaja shiheshin si mjete për komunikimin me botën e jashtëme, pra, një shteg për “ndikime të huaja” borgjeze. Edhe korespondenca mbikqyrej rreptësisht. Kujtojmë një fakt: një botim për Skëndërbeun në Esperanto, përgatitur nga doc. Vasil Pistoli, u dërgua për karton me urdhër të autoriteteve partiake të kohës!

Kështu, vetëm pas vitit 1990, lëvizja esperantiste në Shqipëri mori vrull dhe organizim, pak a shumë. Të rinjtë ishin ata që e përqaftuan atë me shpejt. Më 1991 u krijua Lidhja esperantiste shqiptare (kryetar i parë ka qenë ing. Gafur Muço, tani është mësues Agim Peraj) dhe, dy vjet më

vonë, Instituti Shqiptar i Esperantos (kryetar i parë ka qenë ing. Vasil Pistoli) , që kish për detyrë organizimin e kurseve të rregullta, botime të literaturës didaktike mesimore, përkthime dhe propagandimin e Esperantos. Tash disa qindra shqiptarë kanë kaluar nëpër këto kurse. Disa dhjetëra syresh, kanë vazhduar edhe shkolla të larta jashtë vendit, ku Esperanto përdoret si gjuhë pune e mësimi.

Ndër aktivistët e sotëm, përmëndim zotërinjtë Gjergji Gusho (Pogradec) , Luan Jaupi (Durrës) , Bardhyl Selimi e Rita Permeti (Tiranë) , Nehat Sokoli (Kukës) , Shaban Hasani (Tiranë) , Agim Peraj, Bahri Peraj, (Lezhë, Shkodër) , Saimir Beqiraj (Tiranë) , Tonin Çobani (Tiranë) . Ka plot të tjerë në Durrës, Shijak, Lezhë e gjetkë, që, dikur, kanë qenë shumë aktivë, por punët e ditës i kanë larguar nga shoqata. Dhjetëra të tjerë, që kanë kryer studimet në Poloni tash punojnë në sektorë të ndryshëm brenda vendit dhe anëkend botës, nga Amerika në Australi (si Ereid Dhimitri, Ariel Myrazi, Dritan Xhindole, Herjon Llanaj, Saimir Begollari, Egli Brati, Fioralba Ceno, Jon Gumeni, Arta Kume, Faela Mezini, Matilda Sokoli, Elton Zaimi, etj) .

Megjithatë, ende lëvizja nuk ka ritmin e duhur dhe organizimin e fuqishëm. Ende nuk është mbajtur një konferencë mbarëkombëtare, ndonëse jemi anëtarësuar në shumë shoqata botërore dhe marrim pjesë në veprimtari të ndryshme.

Lypset një mbështetje nga organet arsimore, drejtoritë arsimore, së pari për të na dhënë mundësi të zhvillojmë më lirisht biseda nëpër shkolla për sensibilizimin e opinionit, mandej për të përgatitur një grup mësuesish të Esperantos, më qëllimin për ta futur këtë gjuhë që në ciklin e ulët të nëntëvjeçes, si mjet ndihmës për përvetësimin e gjuhëve të tjera të huaja. (që më 1922, në Ligën e Kombeve në Gjenevë, përfaqësuesi shqiptar kryesoi një nismë të disa vendeve anëtare për ta futur Esperanton në shkollat fillore. Mirëpo, mjerisht, delegati francez, që mendonte ende se gjuha e vendit të tij do mbetej si gjuhë komunikimi e diplomacisë dhe e tregtisë botërore, e refuzoi këtë propozim) .

Edhe bashkitë mund të ndihmojnë duke siguruar një mjedis ku të funksionojnë klubet esperantiste, që grumbullojnë simpatizantë dhe zhvillojnë veprimtari të ndryshme, sikurse kjo ndodh normalisht në vendet e tjera.

Sepse, esperantistët janë pionierë të një lëvizje shumë përparimtare, neutrale ndaj politikës, fesë dhe çdo ideologjie tjetër, por që ndihmojnë për mbrojtjen e gjuhës kombëtare, për ngritjen e nivelit gjuhësor të shtetasve, për forcimin e lidhjeve miqësore dhe njohjen e vendit tonë në botën e jashtëme.

**Përgatiti Bardhyl Selimi, sekretar i Institutit Shqiptar të Esperantos
Botuar në gazetën “Reagimi Kombëtar” nr 10/2009, faqe 10-11**

Kion bezonas la civitanoj de Tirana

Matilda Sokoli: Rezultatoj de enketado (fragmento el diplomlaboraĵo)

Pere de tiuj enketado mi estas klopodinte evidentigi tion, kion bezonas la civitanoj de Tirana, dezirojn, preferojn por ripozi. Estas vidite ke la naturo, pejzaĝo estas ege preferataj. Sube estos ankaŭ analizo por ĉiu punkto.



Matilda dum Ekzamen sesio de Esperanto kun s-ro Shaban Hasani

Post la enketado de ĉirkaŭ 85 personoj de diversaj aĝoj kaj seksoj, estas atingitaj la jenaj rezultatoj:

Komencante de la punkto 4, kie stariĝas la demando : kie la civitanoj ekvolus pasigi la tempon, laciĝinte? 21 personoj respondis : en la arbaro kaj 20 personoj respondis: en la monto. Nun ni starigas la demandon: Kial? La enketitoj estas loĝantoj de la urbo. La urbo estas granda, brua, la aero estas poluita pro la movi'go de diversaj transportaj aŭtiloj kaj transportiloj. Post unu semajno, tiom bruega, intense, la homoj deziresprimiĝas por estu kiom eble plej fore, en lokoj kie ne trapasas aŭtiloj, kie la aero estas pura, ne poluita kaj kie oni povas ripozi rigardante la naturon kaj kie mankas la aktiveco de la urbo.

En la punkto 5, stariĝas la demando: kiam vi sentas vin libera en la pejzaĝo? 90% respondis : kiam antaŭ ni estas malfermita horizonto. Tio povas estiĝi sur la pinto de la monto, aŭ ĉe borde de la maro, kiam antaŭ vi etendiĝas la maro ŝajniĝanta senfina kaj donanta la senton de libero.

En la punkto 6, stariĝas la demando : en kia pejzaĝo vi sentas plezuron kaj feliĉon? 24 personoj estas respondintaj : en la maro. 18 personoj estas respondintaj : en arbaro. Por multaj homoj el diversaj lokoj, la ĉeesto apud la maro donas plezurecon kaj feliĉecon. Dum la someraj monatoj, la loĝantoj de Tirana la plejparton de ferioj pasigas ĉe la maro, kiu envere ne estas tre fore. (nur 40 km)

En la punkto 7, stariĝas la demando: kia pejzaĝo kaŭzas al vi a) enuon b) konfuzon c) timon?



Lernejestrino Reihan Shkreta liveras atestilon de Esperanto ekzameno

En la punkto a) kelkaj alternativoj restis sen respondo kaj 2 personoj sin esprimis ke kiam pluvas ili sentas enuon. Dum pluva tago la ĉielo estas malhela, ties koloro estas malplaĉa por la okuloj, la koloro de la ĉirkaŭanta medio perdas sian brilon kaj helecon. La stratoj estas malplenaj. La homoj restas fermitaj enhejme, ŝajnas ke la deziro por ĝojiĝi estas paligita. Kaj pensante pri ĉio ĉi, la homo sentas enuon.

En punkto b) plejparto estas respondinta ke konfuzon kaŭzas la aŭtiloj. Tio eble estas eksplicata per la fakto ke la rapideco de la aŭtiloj preterpasantaj senĉese, ne lasas al vi tempon por pensi, tial kreiĝas konfuza stato.

En la punkto c) stariĝas la demando : kiaj aspektoj kaŭzas al vi timon?

13 personoj estas respondintaj : la mallumo. Kaj 11 personoj : milito. La respondo rilate la mallumon estas fenomeno por multe da homoj, dum rilate la militon, krom la fakto ke la ĵurnaloj,

revuoj radio kaj TV skribas kaj rakontas sufiĉe multe pri ties sekvaĵoj, albanoj mem estas spertintaj tian staton en la jaro 1997, post civila milito kaj Albanio troviĝas en kontinua militregiono.

En la punkto 8 stariĝas la postulo por priskribi aspekton, kiu donus al vi plezuron. La plejparto de la enketitoj estas priskribinta la maron, la sunmalleviĝon, florkampojn kaj herbkampojn. Evidentas, ke la maro havas efikon ĉe la loĝantoj de Tirana, la suna malleviĝo esprimas melankolian kaj romantikan spiriton, dum la florkampoj kaj herboj esprimas la deziron por spekti multkolorajn, ripozigajn aspektojn.

En la punkto 9, la demando : kiaj sonoj alportas plezurecon? En tri alternativoj starigitaj, la plej plaĉiga estas la birda pepado. Kial?

En la punkto 10, stariĝas la demando: kiaj sonoj vekas al vi bedaŭron? La plejparto estas respondinta, ke estas la funebra muziko. Tio estas memkomprenebla, tia muziko esprimas la tutan doloron, bedaŭron sentata pri iu, kiun vi ne plu vidos en la vivo aŭ rememorigas al vi ĉiujn viajn seniluziigojn en via vivo.

En la punkto 11, stariĝas la demando pri koloroj. Pleje oni preferas la bluan, la blankon kaj la ruĝon. La blua korespondas al la koloro de la maro, de la ĉielo, kiuj estas menciitaj ofte en la respondoj de la enketitoj..

En la punkto 12, stariĝas alia demando, al kiu ankoraŭfoje la respondoj esprimas la deziron por esti kiom eble pli proksime al la maro.

Konklude, de analizo de la enketado mi opinias ke la loĝantoj de Tirana preferas lokojn akvigatajn de maro, lokojn plenaerumitajn, purajn kaj ripozigaspektajn, kiel arbaroj, montoj, parkoj, kampoj.

Beletraĵoj

Ismail Kadare⁵

La sendependeco de la beletro, malfacila

(Parolado okaze de la ricevo de la premio “ la Princo de Asturia 2009”)

Via Alteco,

Estas ja aparta plezuro por mi ĉeesti en ĉi tiu halo kaj paroladi. La plezuro estas duobla, pro fakto ke tio okazas, pro la beletro, la universo al kiu mi apartenas.

Ekzistis kaj ekzistas du opinioj, tute kontraŭaj, pri la beletro. Unu, pli malnova, iom naiva, kredanta ke la beletro, samkiel ĉiuj artoj, povas fari miraklojn por la mondo; la alia opinio, moderna, sekve tute ne naiva, ke la beletro kaj arto servas al neniuj ajn, krom la si mem. En ambaŭ ĉi opinioj, la vero kaj la malvero estas ja miksitaj. Tamen, kiel artikulo, mi emas kredi al la mirakloj.

Estas modelo por ĉi tiu paradigmo: la mito de Orfeo. Oni, prave, nomis ĝin miton plej mistikan de la homaro. Ĝia esenco koncernas al nekredeblaj kozo kaj, kvankam ĝi apenaŭ sukcesis transpasi la muron de la morto, tamen pli apude, ol kiu ajn, ĝi alproksimiĝis al la maleblo.

⁵ Je 23an de oktobro 2009, en la teatro Campoamor de Ovidea (Hispanio), la princo Felipe de Borbon, enmanigis solene, al la 73 jara albana verkisto Ismail Kadare, la premion por beletro, de la reĝa fondacio “La princo de Asturia 2009”. En sia invito, Lia Escelenco, la honora prezidanto de la fondacio samnoma, skribis: “La jurio aprecis la belecon kaj profundan engaĝiĝon de via beletra verkaro, kiu igas vin klasikulon je universala nivelo de nia erao, samkiel la idealon de libereco, kiun vi ja defendas kontraŭ la totalitarismojn”.

Laŭ la jurio, “Kadare rakontas per ĉiutaga lingvaĵo, sed plene de lirikismo, la tragedion de sia tero, kontinua batalejo. Vivigante la malnovajn mitojn per novaj vortoj, li esprimas la tutan doloron kaj la dramecan ŝarĝon de la konscio. Lia engaĝiĝo radikiĝas sur la granda beletra tradicio de la helena mondo, kiun li ja projekcias sur la nuntempa sceno, kiel denunciaĵon de kia ajn speco de totalitarismo, defende al la racio”

Ismail Kadare venkis kontraŭ ceteraj 31 kandidatoj tre potencaj, kiel ĉeĥo Milan Kundera, italo Antonio Gabuĉi, nederlandano Cees Nooteboom. Li estas jam tradukita en 40 fremdlingvoj. Nun estas entute 15 albanaj verkistoj, kies verkoj estas tradukitaj en la aliaj lingvoj.

Mi jam menciis la faman miton por ke alvenu al miraklo multfoje pli ordinara, je aspekto, sed je la sama naturo.

Dudek jarojn antaŭe, en mia lando komunista, se kelkiu eldirus al kelkiu, ke, verŝajne, iutage, albana verkisto ricevos premion en Hispanio, des pli, ke tion enmanigos mem la tronheredanta princo, ĉi tiu, kelkiu, tuj estus deklarita frenezulo, estus enkatenigita kaj kondukita al la frenezulejo. Kaj, ĉi tio estus la malplej granda malbono. Laŭ dua versio, ĉi tiu, kelkiu, finiĝintus en la policenketejo kaj poste turmentitus kiel danĝera komplotisto. Probable, al vi ŝajnus iom dramatigita ĉi tiu antaŭvido, sed mi povas tion ekspliki al vi.

Albanio, mia lando, kaj Hispanio via, krom mallonga amikeco dum la XV jarcento, neniam plu havis normalajn interrilatojn. La kompleta interupto okazis en la pasinta jarcento, kiam mia komunista lando, distingita pro interrilataj ĉesigoj, (ĉi tio estis, ni diru, ĝia specialaĵo), ĉesigis ĉiun rilaton kun Hispanio.

Sed, kiel kio ajn en la mondo, tiel ankaŭ la beletra miraklo havas tradicion. Dum la frostigita tempo, pri kiu mi parolis supre, do, tiam kiam inter mia lando kaj Hispanio neniu alvenis aŭ aliris, soleca ĉevaliro, defiante kaj neglegante la leĝojn de la mondo, transpasadis, kiam ajn li volis, la ne transpasigeblan landlimon. Mi kredas, ke vi povas diveni pri kiu mi temas: pri Don Kihoto.

Li estis la sola, kiun la komunisma reĝimo, tiu, kiu plej facilmaniere povus haltigi iun ajn, apenaŭ sukcesis haltigi lin propre. Don Kihoto, ĉu kiel libron, ĉu kiel personaĝon de la tago, estis jam tiom konata en Albanio, kvazaŭ ĝi mem naskis lin.

Kelkiu povus trovi iun eksplikon por ĉi tiu paradokso: Don Kihoto estis freneza, sed ne malpli freneza estis ja la albana ŝtato, tial estis logike ke ambaŭ frenezuloj interkonsentiĝu.

Pardonpetante, por la komparo de la nobla freneziĝo de Kihoto kun la fia freneziĝo de mia ŝtato, permesu min eldiri ke, fakte, ne estis tiel kaj la komparo rilatas al alia afero.

Mi faris ĉi tiun longan enkondukon por ke alvenu al la ĉeftemo de mia mallonga parolado. Don Kihoto transpasis la albanan landlimon, ĉar li estis, kromalie, sendependa. Kiam albana verkisto, pro la verkaĵo skribita, ĉefe, sur grundo kaj tempo komunisma, alvenas ricevi premion de okcidenta reĝlando, tio ja okazas, ĉar la beletra mem, laŭ sia naturo, estas sendependa.

La temo estas, ja, malnova. Tio estis kaj plurestas, verŝajne, la maltrankvilo numero unu de ĉi tiu arto. Alie, ol la sendependeco de la ŝtatoj, la sendependeco de la beletra estas globala. Tial, ankaŭ ties protektado, estas same tia, globala. Tio ne igas ĝin pli facile. Kontraŭe.

La sendependeco de la beletra kaj artoj estas evoluiĝanta proceso. Nia menso malfacile povus kapti ties verajn dimensiojn. Alkutimiĝinte al sendependeco, rilatanta ĉefe al la ŝtatoj, nacioj kaj ĝis la homaj individuoj, ne estas facile por ni, iri pli foren. Iri pli foren signifus ekkompreni, ke la sendependeco de arto ne estas afero je lukso, deziro por performado de arto. Tio estas objektiva kondiĉigo, do, deviga. Alie, ĉi tiu paralela universo apenaŭ starus surpiede. Delonge ĝi ekfalus.

La profito, kiel mi diris, estas pratempa. Delonge, estas konate la esprimaĵo “respubliko de paperoj”. La tento por ekrigardi la beletron kiel spiritan mondon, nature, sed ankaŭ je materiaj atributoj: spaco, tempo, movo, estas konate, sed ne sufiĉas. Ni akceptas tion, kiel paralelan referencialan mondon, sed, kiam oni temas pri ties kompleta vizio, nia malvasta menso, konformema, malfacile akceptas la paralelismen, do la veran sendependecon.

Ni diras sendependa kaj, imediate, nia malnova instinkto kondukas nin al la kontraŭo. Ni apenaŭ eskapas de la penso, ke la arto, kvankam povas ne dependi de la ŝtatoj, doktrinoj, modo, tamen ĝi dependas de io. Kaj la menso iras al la nia reala mondo, alie dirite, al nia vivo mem. La penso, ke la beletra dependas de la vivo estas kvazaŭ oficialigita nun, je planeta dimensio.

Mi ekfarus la demandon kiun en si mem ŝajnas hereza: ĉu tio estas vera? La respondo, nun por nun, povas esti nur duigita: oni ne ekskludas ke la arto povus rilatiĝi al la vivo, sed nur parte.

Permesu min, en la konkluda parto de mia parolado, ekspliki nur koncize ĉi tiun duonherezaĵon.

Se ni akceptas la beletran kaj artan mondojn kiel paralela, referenciala mondo, ni tiel estas akceptintaj ke ĝi estas rivala mondo. Sekve de tio, ĉar la rivaleco kondukas, kutime, al konflikto, vole ne vole ni akceptos ke inter ĉi tiuj du mondoj, la vivo kaj la arto, okazos konflikto.

Kaj konflikto okazas. Foje deklarite, foje ne deklarite. En ĉi tiu kunfrontiĝo, la reala mondo havas siajn armilojn kontraŭ la arto: cenzuron, doktrinojn, prizonojn. La arto same havas siajn rimedojn: fortresojn, ilaron, fine, siajn armilojn, plejmulte kaŝitaj.

La reala mondo trafas esti malkompatema, kruela. La arto, same, ne estas angelo kaj povas esti malkompatema, kruela.

Granda germana romantika poeto, imagis la tercinojn (versojn) de Dante Aligheri, foje, kiel minacantaj lancoj kaj, foje, kiel turmentanta ilaro por la ŝarĝigitaj konscioj, pro krimo.

Sed, la milito inter ambaŭ mondoj estas pli komplika, ol ĝi aspektas. La sama germana poeto, insistis ke kelkiuj lin tedis, pro ties malamikeco kaj aliuloj, pro ties ameco. Kiom paradoksece tio ŝajnu, estas multaj tiuj uloj kiuj, senvole, luktas kontraŭ la arto, ĝuste tiam, kiam ili pensas ke ili amas ĝin.

Kiel vidite, la sendependeco de la beletro kaj arto fariĝas ĉiam pli malfacila. Tamen, ni verkistoj, estas konvinkitaj, ke la arto neniam starigos la kapitulacian flagon. Ĉar mi menciis jam ĉi tiun tristan vorton, mi kredas ke mi devas denove elturniĝu al la vizio pri du mondoj, kunfrontigantaj unu al la alia, ekspektante la venkon: reala mondo kaj tiu de la arto.

Estas multaj distingo inter ili, sed estas kolosala distingo staranta super ĉiuj aliaj. Ĉi tiu estas: dum en sia konflikto kun la arto, la reala mondo trafas akriĝi tiom forte, kiom ĝi eksaltas por eldetru la arton, en neniuj okazo, mi ripetas, en neniuj okazo, la beletro kaj la arto ne atakas la realan mondon, por ĝin domaĝi, kontraŭe, ili batalas por igi ĝin pli bela, pli vivinda. Ĉi tiu estas ja la absoluta distingo inter ili. Kaj, ĉikaze, tia distingo estas, ne alie, ol ia konfirmaĵo pli subluma de la vereco de la arto.

Enesperantigis Bardhyl Selimi

La incidento



Vangjush Ziko

El la romano “Blankneĝulino grizhara”

Viktoria aliris la medicinan centron de sia kvartalo pro la kutima vizito ĉe la familia doktoro. Ŝin akompanis la novedzino. Ambaŭ eksidis sur du liberaj sidlokoj, post kiam plenigis la formalaĵojn ĉe la receptejo. Tie estis multe da homoj. Kiel kutime plimultis la ĉinoj.

Eniris virino je granda korpo. Ŝi aliris alla receptejo. Parolis fluan anglan kun la flegistino, enmaniginte la verdan libreton. Poste atendis starante ĝis ŝi redoni ĝin. Dume ŝercis kaj ridis laŭvoĉe kun ŝi. Poste ĉirkaŭrigardis al la akceptejo. Ŝiaj okuloj haltis ĉe Viktoria. Ridetis al ŝi kaj aliris kaj eksidis ĉe ŝin. Viktoria kapskuis. Ŝi ne konis ŝin, sed ŝajne sentis sin bone pro ŝia ĉesto, des pli ke temis pri samrasulo.

La grandkorpa virino, akomodiginte, surmetis sian mansakon sur genuoj, krucigis la manojn kaj sin duonturnis al Viktoria. Ĉi tiu jam komprenis ke oni petis de kie ŝi venis. Ekbalbutis poiome anglalingve.

- From Albania- respondis Viktoria.

- Albania?!- demandis la virinaĉo mirigite kaj scivoleme, svingis sian kapon kun flava hararo, pajlkolora, kvazaŭ ekvolis diri ke ŝi jam konis tiun lokon.

Post kiam denove kapskuis je malŝatmieno, aldiris Viktorian:

- Vi estas estinta la plej malbona lando de komunismo.

Viktoria kapturnis al la novelzino, kiu tradukis. Viktoria turniĝis al flavharulino kaj rigardis ŝin rekte al la okuloj. Ŝi havis blujn okulojn iel forlavitajn.

- Kaj vi sinjorino, de vie venas?- Kaj petis la junan virinon traduki tion.

- Mi devenas el Germanio. El vilaĝo ĉe la landlimo kun Pollando.

Viktoria rigardis ŝin same rekte al la okuloj, iom kolere. Ŝi ja bone sciis kia infero estis sia lando. Sed ŝi ne sentis sin bone, kiam oni rememorigis tion tiutempe. Ŝi volis forgesi tion.

- Klarigu al ĉi tiu- diris ŝi al la novelzino- ke ankaŭ ĉi tiuj travivis ja komunismon- La novelzino tradukis.

La pola germanino ridis laŭtvoĉe kaj diris (la novelzino tradukis) , ke ankaŭ ili vivis sub komunismo, sed en sia lando oni enprizonigis, dum en Albanio oni senkapigis.

La germanino mangestis kvazaŭ enigis tranĉilon en ŝian gorĝon.

-Diru al ĉi tiu- turniĝante al la novelzino- ke la komunismo estis komunismo ĉie ajn. Ĉu oni senkapigas, ĉu enprizonigas, ne estas granda diferenco. - La novelzino tradukis.

La flavharulina virinaĉi ridegis denove. Ripetigis sian mangeston per la dekstra manplato, kaj poste, la saman manon, faldigis de malsupre. Per tio ŝi ekvolis diri, ke se oni senkapigus, vi neniĝus. -Kaput. - Ne estis plu la espero.

Viktoria ekkoleriĝis

- La germanoj senkapigis kaj vivbruligis hebreojn. Ankaŭ ĉe ni bruligis vilaĝojn kaj mortigis homojn. Vi etis ankaŭ nazioj. Ankaŭ komunistoj!

Certe la novelzino ne tradukis ĉi parolojn. Sed ŝi sufleris iom aliajn vortojn, ridetante. Ŝi ne volis pligravigi la babiladon.

Viktoria ekknaris tion.

-Diru! Diru!-insistis ŝi- tiuj tempoj kaŭzis la ruiniĝon kaj ĉi migradon.

Dume, ĉe la kapo de la salono eliris la doktoro. Li ricevis la laŭvicajn kartelojn surbude kaj vokis la nomon de Viktoria.

Viktoria ekstariĝis iel konsternita, ĉar ŝi ne scipovis la anglan, ne gravas ke la flavharulina virinaĉo ekĝuus tion maldolĉe. Kiu scias, kiom alta estis la sangopremo ĉe ŝi nun? Sed, mirinde, la sangopremo ne ŝanĝiĝis ĉe ŝi. La medikamentoj preskribitaj de la kanada doktoro rezultigis bonefikaj, ŝi pensis. Li estis ŝanĝinta la kuracproceduron kiun ŝi sekvis en sia lando. La kolero kontraŭ la germaninon jam pasis.. Estas bone ke la novelzino ne tradukis ŝiajn vortojn ĝisfine, kvankam ŝi meritis ilin. Sed kiu scias, kio okazus al la flavharulina virinaĉo. Ankaŭ ŝi ne migris pro plezuro, ŝi plue plitrankvilĝis. Ambaŭ alvenis ĉe la sama doktoro.

Ŝi decidis, ke kiam eliros en la salonon de pacientoj, ŝi ridetos iome. Ankaŭ ŝi ja malsana estis. Ĵus elirinte en la salonon, ŝi mansvingis al germanino. Kvazaŭ bye! La germanino ekstariĝis kaj etendis sian grandan manplaton, salutis dignece manpremanante. Kaj denove ridis laŭtvoĉe. -Kaput!

Ankaŭ Viktoria manpremis al ŝi kaj ridetis. - Kaput komunismo kaj nazismo!

Finfine, ambaŭ, ja migrulinoj estis! Ili ne kulpis pro la militoj kaj prizonoj. Aŭ pro migradoj!

Enesperantigis Bardhyl Selimi

Albanaj proverboj

Honora morto estas ja ora kovrilo (Shkodër)
Ne estas surdulo pli surda ol la homo kiu ne volas aŭdi. (Sudo)
Lin oni ne permesas eniri la vilaĝon, li pretendas svati la pastran filinon. (Sudo)
Oni volas vendi poreon al la poreovendisto. (Elbasan)
Oni kondukas vin al kvardek akvofontoj kaj ne lasas vin trinki. (Kosovo)
Enverŝi salon en alies manĝaĵon (Gjirokastër)
Kara je branoj, malkara je faruno. (Gjirokastër)
Preterlasi la ĉambron kun sterko kaj balai la korton (Sudo)
Ne vendas ja la anguleto kiom vendas la kalvulo.
Ne edukita homo similas al ne ellaborita ligno (Sudo)
La okuloj estas por vidi, la menso por dividi (Sudo)
La maron ŝveligas la ondo, la viron levigas la parolo (Nordo)
La parolo estas oraĵo kiam oni pesas ĝin bone kaj parolas ĝuste. (Shkodër)
La vira parolo, fusilo ĉe la muro. (Shkodër)
Maldigna parolo, pli peza ol la kuglo (Dibër)
La lango estas glavo je du klingoj (Shkodër)
La salon enverŝu limigite, la parolon mezuru per pesilo (Lushnjë)
Kiu silenti ne kapablas, tiu eĉ paroli ne scipovas. (Sudo)
La infanon vartu, sed la maljunulon ne forlasu (Arbreŝoj)
La fadeno devas simili al la ŝtofo (Dibër)
La bonan parolvorton kie ajn vi trovas ĝin ricevu (Shkodër)
La malĝojon de la vespero postlasu por morgaŭ (Shkodër)
Karbardaĵtenilon de alies ne fariĝu (Sudo)
Ne fariĝu malavarulo per la alies monujo (Lushnjë)
Ne ŝajnigu vin al iu gravulo, ne ŝajnigu vin al iu havulo (Sudo)
La vojon forlasu, de amikoj ne disiĝu. (Lushnjë)
Vinarbon ekmaturinganta kaj figon ĵus elĉerpiĝanta neniam manĝu (Sudo)
Vendu la ĉevalon kaj lernigu la filon (Kosovo)
La kulpo estas orfulo, neniu ties mastro aperis jam (Elbasan)
Eĉ peltaĵon la kulpo fariĝu, neniu vestas ĝin (Elbasan)
La justa parolo estas maldolĉa (Shkodër)
Prijuĝu min, poste mortigu min (Sudo)
La riĉulo donas el sia restaĵo, la malriĉulo donas el sia koro (Elbasan)
Pli bone havi amikon ol bienon (Kosovë)
Bona amiko estas pordo de paradizo (Sudo)
La azeno ne lamas pro la oreloj (Elbasan)
Ne pravigas la ŝarĝo la vojaĝkoston (Sudo)
Pli bone esti unu tago falkon ol cent jaroj buteon (Nordo)
La hundoj boju sed la karavano antaŭenmarŝu. (Sudo)
La aglo flugas alten sed sian neston ĝi starigas surtere (Labërio)

La birdo en la kaĝo kantas pro malĝojo (Shkodër)
La albano aŭ tostas kun vi aŭ militas kontraŭ vin (Sudo)

La albano promesinte la parolon, pretas eĉ sian filon buĉi. (Sudo)
Hejmo de albano estas ja hejmo de amiko kaj de migranto (Nordo)
La albano pretas sin senkapigi sed la donitan parolon ne rompigu (Nordod)
La albano ne lasas sin malvenĝi kaj la ŝuldon senkvitigi. (Nordo)
Frumatene la pardon malfermu ĉar la hejmo pleniĝas je sorto (Shkoder)
Oni ne laŭdas la floron sed la abelon por la mielo (Laberia)
Senlaboreco estas ja la patrino de fieco (Sudo)
Se la farmisto timus pro la vermoj en la agrokampo li neniam semus (Sarande)
La herbon per falĉilo kaj la kverkon per hakilo (Lushnjë)
La maron oni ne povas transpasi surpiede (Shkodër)
Ĝus kiam la hakilo trovis sian tenilon, la arbaro ekteruriĝis (Sudo)
Oni ne survojiĝas sen bastono kaj lanjako (Sudo)
Iom post iom la bovido fariĝas virbovo (Elbasan)
Herberon post herbero, fariĝas pajlostako (Tiranë)
Ŝtonon post ŝtono fariĝas muro (Elbasan)
La viro ne naskiĝas je lipharoj (Sudo)

Oni diras al li jen la lupu, li demandas kie estas la spuro (Sudo)
Malsaĝulo ĵetas ŝtonon en la akvon kaj saĝuloj ne povas ĝin elakvigi. (Shkodër)
Grandaj scioj estas en mallongaj vortoj (Shkodër)
Pli bone posedi pli da menso ol ŝafoj (Shkodër)
Prijuĝas la menso, ne la aĝo (Sudo)
Kiam eraras la saĝulo, ekmiras la stultulo (Kosovo)
Kiu estas mezurinta sin, estas ja mezurinta la tutan mondon (Sudo)
La somera pluvo estas kiel la novedzina plorado (Shkodër)

Tion kion manĝas la buŝo, montras la vizaĝo (Labërio)
La pordo de prizono malfermiĝas dum la pordo de la tombo ne (Shkodër)
Manĝu laŭvole sed vestu vin kiel la aliaj. (Sudo)
Kiam vi perdas la esperon, vi perdas la vivon (Sudo)
Pli bone resti en domo malgranda kie oni ridas, ol en granda domo kie oni ploras (Elbasan)
Pli bone esti sanulo ol reĝo (Shkodër)
Ne demandu kiel li mortis, sed kiel li vivis (Sudo)
Riĉa estas tiu hejmo kies dommastrino estas saĝa (Sudo)
La infano havas grandan spiriton kaj malgrandan korpon (Shkodër)
Ne rigardu ĉe la virino la nazon sed la laboron (Kosovo)
Vi havas patrinon, do vi havas la mondon (Tiranë)
Kiu geedziĝis kaj ne ĝojiĝis (Sudo)
Kiu forgesis gepatrajn bonojn neniam riĉiĝis (Sudo)
Pli bona estas la manfrapo de patrino ol la mankareso de kvazaŭpatrino (Shkodër)
Kreski infanon kaj starigi ĝin estas tutegale kiel elfosi puton per kudrilo (Shkodër)
Por aĉeti varon hastu, dum por edziĝu pripensu (Sudo)
Kreskinte gefilon, konstruante kastelon. (Elbasan)
La lastan deziron (testamenton) eĉ la tero ne solvas (Shkodër)
La donita parolo de la viro estas tiom peza kiom la ŝtono (Nordo)
La donita parolo de la homo estas la ŝlosilo de la honoro (Nordo)
La virbovon oni ligas ĉe kornoj, la homon oni ligas per paroloj (Sudo)
La muro moviĝas, sed la viro ne (Sudo)
La oron oni ekprovas en la fajro, la amiko elproviĝas dum danĝera situacio (Shkodër)
Malamiko en la hejmo estas samkiel serpento en la brusto (Kosovo)

Kiu iras nevokite, revenas ne kondukite (Shkodër)
 Kiu iras seninvitite, trovas la tablön ne surtabligite. (Arbreŝoj)
 Pli bone estas saĝa malamiko ol stultula amiko (Shkodër)
 Bona amiko honorigas vian hejmon (Sudo)
 Malnovan amikon oni ne devas forlasi (Sudo)
 Amiko estas kiel mielo, dum la najbaro kiel la salo (Shkodër)
 La amiko estas frato sen parto en la divido de heredaĵo (Elbasan)
 La veran amikon oni ne povas aĉeti per mono (Sudo)
 Al la amiko vi plendu, dum al la malamiko vi laŭdu vin (Shkodër)
 La malnovajn amikon ne forgesu, ĉar la novajn vi trovos kie ajn (Lushnjë)
 Dum seka vetero oni konas la bonan akvofonton, dum la amikon oni konas en malfacila situacio
 (Shkodër)
 Kiu elfosas la alies tombon, falas men en ĝin (Kosovo)
 Rigardu min per unu okulo kaj mi rigardos vin per miaj ambaŭ okuloj (Nordo)
 Kiom da homojn razas la barbiro, sed neniu diras ke li estas lia bofamiliano. (Lushnjë)

Kiu vagabondas kun lamuloj ankaŭ li lamos. (Sudo)
 Kiu postsekvas la cimon en la sterkon alvenos (Sudo)
 Kia estas via mastro tia estos via metio (Elbasan)
 Estas facile fortranĉi la hvoston de la mortigita lupo (Shkodër)
 Pli multe scias la suferinto ol la lerninto (Sudo)
 Du kukurbojn oni ne povas teni subbrake (Sudo)
 La vilaĝo aperinta ne bezonas vojgvidiston (Kosovo)
 Nova vilaĝo, novaj moroj (Sudo)
 Monto al monto ne renkontiĝas, sed la homoj jes (Sudo)
 En la grandan vitejon iru kun malgranda korbo (Nordo)
 Ne estas oro ĉio brilanta (Nordo)
 Ellarmiginte la okuloj vidas pli klare (Sudo)
 La lupo povas ŝanĝi sian hararon sed ne la malvirton (Shkodër)
 Estu envia sed diru la pravon (Elbasan)
 Parolinte la veron, vi estigas kvardek malamikojn (Elbasan)
 Pli valvasta vivojo estas la verovojo. (Sudo)
 Oni ne povas kaŝi la sunon per kribrilo (Sudo)
 Staru malrekte sed parolu prave (Sudo)
 Pro kudrilo kaj fadeno, eluziĝis tuta mantelo (Sudo)
 Etendu la kruojn tiom kiom longa estas la vatkovrilo (Kosovo)
 La bravulon mortigu sed ne mallaŭdu (Kosovo)
 La braveco post la milito kaj la saĝeco post la kunveno ne plu valoras (Shkodër)
 La fortulo estas tia ec antaŭ la Dio (Kosovo)
 Kiu kaptis la lupon ĉirkaŭ ties gorgo li ne povas timi pro hundoj (Sudo)

Ivo Andrić

LETERO DE LA JARO 1924

Monato marto de la jaro 1920. Fervoja stacio en Slavonski Brod. Meznokto pasis. De iu nedefinita flanko blovas vinda, kiu al tiel nesatdormitaj kiuj de la vojaĝo lacigitaj homoj ŝajnis pli malvarma kaj pli forta ol ĝi estas. En la alto steloj rapide pasas inter turbulentaj nuboj. En la malproksimeco sur la nevideblaj fervojoj moviĝas, pli aŭ malpli lante, flavaj kaj ruĝaj lumoj komune kun la penetrema tono de la konduktoraj fajfiloj aŭ kun la tremanta fajfo de lokomotivo, kien ni vojaĝantojn enports la melankolion de nia laceco kaj la enuon de la longdaŭra, malbonhumora atentado.

Antaŭ la stacidomo, apud la unua relvojo, ni sidis sur valizoj kaj atendas la trajnon kies tempon de alveno nek tempon de ekveturo ni eĉ ne scias, unike ni scias ke ĝi estos pleneĝa, superŝarĝita de vojaĝantoj kaj valizoj.

La viro sidanta apud mi estas mia malnovtempa konatulo kaj amiko, kiun mi dum la lastaj kvin-ses jaroj pĉerdis el vido. Li nomiĝas Maks Levenfeld, estas sanigisto kaj sanigista filo. Li naskiĝis kaj plenkreskis en Sarajevo. Lia patro kiel juna kuracisto forlasis Vienon kaj ekloĝiĝis kie li akiris ampleksan praktikon. Ili estas judevenoj, sed de antaŭlonge konvertitaj. La patrino, naskiĝinta en Triesto, estas filino de itala baronino kaj aŭstria marista oficero, postulo de francaj elmigrintoj. Sian staturon, iron kaj sinjorecan vestadmanieron rememoras du generacioj de sarajevanoj. Estis ŝi unu el tiuj belulinoj kies belecon eĉ la plej impertinantoj kaj la plej maldelikataj homoj, rigardas kun respekto kaj konsidero kun ili alie ne havas.

Ni kune vizitadas la sarajevan gimnazion, sed li estis tri klasoj antaŭ mi, kiu en tiu aĝo signifas multon.

Mi malklare rememoras ke mi rimarkis lin tuj kiam mi venis en la gimnazion. Li tiam ekiris en la kvaran klason, sed ankoraŭ vestiĝis kiel infano. Estis li forta knabo "germaneto" en malhelblukolora marista vestaĵo kun broditaj ankroj sur la anguloj de la larĝa maristkolumo. Li ankoraŭ portis mallongan pantalonon. Surpiede li havis perfektaformajn platajn nigrajn ŝuojn. Inter kurtaj blankaj ŝtrumpoj kaj la pantalonon videblas nudaj fortaj suraj, jam kovritaj per malhelaj krinoj.

Tiam inter ni ne estis kaj ne povis esti kontakto. Ĉio disigadis nin – la jaroj, aspekto kaj kutimoj la havaĵa stato kaj socia pozicio de niaj gepatroj.

Sed mi multe pli bone rememoras lin el la posta tempo, kiam mi jam estis en la kvina, kaj li en la oka klaso. Tiam li jam estis svelta junulo kun klaraj okuloj, kiuj esprimadis eksterordinaran sentemon kaj grandan

viglecon de spirito, bone sed neglekte vestita, kun densa blonda hararo kiu konstante per fortaj, malkvietaj tufoj faladis jen de unu, jen de alia flanko de la vizaĝo. Ni renkontiĝis kaj alproksimiĝis dum iu diskuto kiun organizis grupo de niaj kamaradoj el la superaj klasoj sur benko en la parko.

En tiuj niaj lernantaj disputoj estis nek limo nek konsidero, forlokigitaj estis ĉiuj principoj kaj per eksplodemaj vortoj el fundamentoj estis minitaj kompletaj spiritaj mondoj. Ĉio restis, kompreneble, eĉ post tio sur sia loko, sed tiuj pasiaj vortoj estis gravaj por ni kaj por la sorto kiu nin atendas, kiel iu antaŭvertado de grandaj bravaĵoj en luktoplenaj tempoj kaj malfacilaj vagadoj, kiuj estas alvenontaj.

Kiam mi post iu vigla diskuto tremanta pro emocio kaj konvinkiĝita pri mia triumfo (samkiel estu ankaŭ mia kontraŭo en la diskuto) mi ekiris hejmen, Maks aliĝis min. Estis la unua fojo ke ni du restis solaj. Tio flatis min, levadis mian venkan entuziasmon, kaj altan opinion pri mi mem. Li pridemandis kion mi legas kaj observadis min atente, kvazaŭ li vidas la unuan fojon en la vivo. Mi respondadis ekscitite. Subite li haltis, ekrigardis min rekte en okulojn kaj diris miraklekvieta mode:

– Vi scias, mi volis diri al vi ke vi ne citis ekzakte Hekelon. * (Ernst Hekel, rim de l' tradukinto)

Mi sentis ke mi ruĝiĝis kaj ke la tero lante ekmoviĝis sub miaj piedoj kaj denove kaj denove reiris sialoken. Mi kompreneble erare citis; mia citado estis el iu malmultekosta broŝuro, malcerte memorita kaj, probable, malbone tradukita. Tuta mia ĝistiam triumfo transformiĝis al konscienciproĉo kaj kontosento. La bluaj klaraj okuloj rigardis min sen kompato, sed ankaŭ sen la plej eta ŝpuro de malica ĝojo aŭ supereco. Kaj Maks ripetis mian malfeliĉan citadon en korektita formo. Kaj kiam mi alvenis antaŭ lia bela domo sur la bordo de Miljacka, li forte prenis mian manon kaj vokis min veni morgaŭ posttagmeze ĉe li por trarigardi liajn librojn.

Tiu posttagmezo estis por mi ĝuste travivaĵo. Mi vidis la unuan fojon en la vivo veran bibliotekon, kaj estis konscia ke mi vidas mian destinon. Maks havis multe da germanaj kaj iom da italaj kaj francaj libroj, kiuj apartenis al lia patrino. Li ĉion tion montradis al mi kun kvieto en kiu mi envivis lin ankoraŭ pli ol la libroj. Tio fakte ne estis envio, sed sento de senlima kontento kaj fortika deziro ke ankaŭ mi iun tagon tiel libere moviĝu el tiu mondo de libroj en kiuj, ŝajnas al mi, radiadas lumo kaj varmo. Li mem parolis kvazaŭ estis leginta el libro, libere, kaj moviĝis sen fanfarado en tiu mondo de famaj nomoj kaj grandaj ideoj, dum mi tremadis pro emocio, pro vanto, hontema pro la granduuloj inter kiuj mi eniras kaj timante la mondon kiun mi lasis fore kaj en kiun mi estas reironta.

Tiuj posttagmezaj vizitoj ĉe la pli aĝa kamarado komencis ripetigi kaj fariĝis pli oftaj. Mi abrupte perfektigis je la germana lingvo, komencis legi itale. Mi portis eĉ hejmen, en mian malriĉulan loĝejon, tiujn bele binditajn eksterlandajn librojn. Mi malprogresis je lernado de gimnaziaj studobjektoj. Ĉi kion mi legis ŝajnis al mi sankta vero kaj sublima devo por mi persone, de kiu mi ne povas fortiriĝi se mi ne volas perdi la reputacion en miaj propraj okuloj kaj ĉiun memfidon. Mi sciis nur unu, ke oni devas legi ĉion tion, kaj ke oni devas verki tiajn aŭ similajn aĵojn. Mi pensis al nenio alia en la vivo.

Unu tagon mi speciale rememoras. Estis monato majo. Maks preparis sian maturekzamenon, sed sen ekscito kaj videbla peno. Li kondukis min antaŭ iu malgranda izolita ŝranko sur kiu estis per oraj literoj skribite: Helios Klassiker Ausgabe. Mi rememoras ankaŭ ke li diris al mi ke la ŝranko estis aĉetita kun la libroj. Al mi ŝajnis eĉ la ŝranko sanktaĵo kaj lia ligno trapenetrita de lumo. Maks elprenis iun volumon de Gete kaj komencis min legi *Prometeon*.

Li eklegis per iu nova al mi ĝis tiam nekonata tono, kaj tuj estis videble ke li ĝis nun nenombrebla foje finlegis ĉi tiun poemon:

Kovru ĉielon vian, Zeŭso, per nuboj multegaj kaj provu kiel malsaĝa ido kiu kordon senkapigas, vian forton sur kverkoj kaj montoj! Sed landon mian ne rajtas vi tuŝi kaj kabanon, kiun ne edifis vi, kaj fajrejon mian, kies fajron vi envias!

Fine li frapadas per pugno, modere sed forte, la apogilon de la fotelo kie li sidis; la hararo pendante sur ambaŭ flankojn de lia vizaĝo inundita de ruĝeco.

Jen mi tre sidas, kreadas homojn laŭ mia aspekto genron egalan al mi, por suferi, ploru por ĝui kaj por ĝoji, kaj por ne okupiĝi pri vi, samkiel mi!

Tio estis la unuan fojon kiom mi lin vidis tiam. Aŭskultis mi kun admiro kaj leĝera timo. Poste ni eliris foren kaj en la varma krepusko ni

daŭrigis la konversacion pri la poemo. Maks akompanis min ĝis mia abrupta strato, kaj poste mi lin denove ĝis la bordo, kaj li min, poste mi lin. Eknoktiĝis kaj la homamaso komencis maldensiĝi, sed mi tamen iris ĉi tion kaj reen laŭ tiu vojo, diskutante pri la senco de la vivo kaj pri la deveno de dioj kaj homoj. Unu momenton mi bone rememoras. Kiam ni la unuan fojon alvenis ĝis nia malbonaspekta strato kaj haltis ĉe iu kliniĝita griza bretbarito, Maks strangmaniere etendis la maldekstran manon antaŭ si kaj diris al mi iel varme, konfidence:

– Vi scias, mi estas ateisto.

Super la renversita barilo floris je densa interplekto sambuko disvastigante fortan, pezan odoron kiun mi sentis kiel la odoron de la vivo mem. La vespero estis solena, ĉio ĉirkaŭ ni kvieta kaj la ĉielkupolo super ni, astroplena, ŝajnis esti nova. Pro ekscito nenion mi povis diri. Mi nur sentis ke io grava okazis inter ni kaj ĉi tiu pli aĝa kamarado, kaj ke mi nun ne povas simple disiĝi kaj reiri ĉiuj el sia domo. Kaj tiel ni restis, promenante ĝis noktaj horoj.

La maturekzameno de Maks apartigis min. Li foriru al Vieno studi medicinon. Mallongan tempon ni korespondadis, sed la interŝanĝo de leteroj ĉesis. Ni foje renkontadis dum ferioj, sed sen la iama familiareco. Poste venis la milito kiu nin komplete apartigis.

Kaj nun, post kelkaj jaroj, ni renkontiĝis, jen denove en tiu malbela kaj enua stacidomo. Ni vojaĝas de Sarajevo ĝis tien per la sama trajno, ne sciante tion, kaj ni nur tie intervidis nin, nun ne estas atendantaj la malcertan alveturon de la beograda trajno.

Per kelkaj vortoj ni rakontis unu al la alia kiel ni pasigis la militon. Li jam dum la unua jaro de la milito finis sian studadon, kaj poste estis kuracisto sur ĉiuj aŭstraj frontoj, servante ĉiam en bosniaj regimentoj. Dum la milito lia patro mortis, pro ekzantema tifo, la patrino forlasis Sarajevo kaj translokiĝis al Triesto ĉe siaj parncoj. Maks pasigis kelkajn lastajn monatojn en Sarajevo kiom estis necese al li por ordigi siajn aferojn. Interkonsente kun la patrino li vendis la domon de sia patro sur la bordo de Miljacka kaj la plimulton de la aĵoj. Nun li estios vojaĝanta al Triesto, ĉe la patrino kaj de tie li intencas pluen, al Argentino, eble eĉ al Bolivio. Li ne eldiras klare sian opinion, sed fine li forlasis Eŭropon por ĉiam.

Maks plifortiĝis sekve de la vivo sur la fronto maldelikatiĝis vestita simile al iu entreprenisto, kiel mi povas vidi. En la mallumo mi distingas lian fortan kapon kun densa, klara hararo kaj aŭskultis lian voĉon, kiu dum la jaroj fariĝis pli profunda, pli vireca, kaj lian sarajevan elparolon en kiu la konsonantoj estas moligitaj kaj la vokaloj malklaraj kaj trenataj. En lia lingvo estis ĝenerale sentebla iu malcerteco.

Li eĉ nun parolis kvazaŭ li estus leganta, uzis multajn nekutimajn laŭlibrajn sciencajn esperimojn. Sed tio estis la uniko kiu restis de la iama Maks. Alie, tute ne temis pri poezio, pri libroj. (Neniu plu rememoras *Prometeon*.) Unue li parolis ion pri la milito ĝenerale, ja kun granda amareco, pli en la tono ol en vortoj, kun amareco kiu eĉ ne atendas esti perceptita. (Por li en ĉi tiu granda milito, por tiel diri, ne estis plu kontraŭaj frontoj, ili intermiksiĝis, transverŝadis unu la alian, kaj tute kunfandiĝis. La universala suferado vualis lian vidon kaj forprenis la komprenon por ĉio alia.) Mi rememoras mian konsterniĝon kiam li diris ke li gratulas al la venkintoj kaj – ke li ilin profunde bedaŭras, ĉar la venkintoj vidas sian situacion kaj kion ili devas fari, sed la venkintoj eĉ ne konjektas kio ilin atendas. Li parolis per incitiĝema kaj senespera tono de homo kiu perdis multon kaj nun povas diri kion li volas, sciante bone ke pro tio neniu povas fari ion al li, kaj ke tio tute ne helpas al li. Post tiu granda milito oni renkontis inter la intelektualoj sufiĉe da tiaj *koleraj* homoj, koleraj laŭ iu speciala modo al io nedefinita en la mondo. Tiuj homoj trovis en si mem nek kapablon por pasiĝi kaj adaptiĝi, nek fortojn por grandaj decidoj en la kontraŭan direkton. Li ŝajnis al mi tiumomente, estis unu el ili.

Sed nia konversacio interrompis, ĉar nek li nek mi deziris disputi dum ĉi tiu nokto, sur tiu nekutima loko de renkontiĝo, post tiom da jaroj. Pro tio mi parolis pri aliaj aferoj. Fakte, parolis li. Parolis li eĉ nun por tiuj siaj elektitaj vortoj kaj kunmetitaj frazoj kiu homo kiu vivas plie kun libroj ol kun homoj, fride kaj reale, sen ĉirkaŭfrazado kaj pribeligo tiel kiel malfermante la medicinan lernolibron ni trovis en ĝi la simptomojn de nia malsamo.

Mi ofertas al li cigaredon, sed li diras ke li ne fumas, kaj elparolas tion subite, preskaŭ kun timo kaj abomeno. Kaj dum mi ekbruligas unu cigaredon sur la alia, li parolas iel artifice, senzorge, kvazaŭ li per tio estis forpelinta aliajn, pli gravajn pensojn:

– Jen, ni du alpaŝas larĝan relvojon, kaj tio signifas: ni manprenis la anson de la pordo kiu kondukas al la granda mondo. Ni forlasas Bosnion. Mi eĉ neniam revenis tien, sed vi faros tion.

– Kiu scias? – interrompis mi lin mditeme, pelita de tiu speciala vanto laŭ kiu junaj homoj ŝatas vidi sian sorton en foraj landoj kaj sur nekutimaj vojoj.

– Ne, ne, vi ĉiukaze revenos – diris mia kunvojaĝanto certe kvazaŭ li metus diagnozon – kaj ankaŭ mi la tutan vivon kunportos rememoron al Bosnia kiel iun bosnian malsanon kiun kaŭzis, mi mem ne scias certe. eble tio kie mi naskiĝis tio kaj plenkreskis en Bosnio, aŭ ke mi neniam revenos tien. Ne gravas.

Sur nekutima loko, en nekutima tempo ankaŭ la konversacio fariĝis nekutima, iomete kiel en sonĝo. Mi rigardas transverse la grandan, kuntiritan silueton de mia iama kamarado apud mi kaj pensadas: mi opinias ke li malmulte similas al tiu junulo kiu frapadas per pugno kaj recitadis "Kovru ĉielon vian, Zeŭso!..." – mi pensas pri tio kio ni devenos se la vivo tiel rapide kaj tiel profunde ŝanĝos nin, mi opinias ke nur la ŝanĝoj kiujn mi rimarkas sur mi mem estas bonaj kaj regulaj. Kaj dum mi pri ĉio tio pensadas mi subite rimarkas ke la kamarado apud mi denove parolas. Rekonsciiginte el miaj pensoj, mi aŭskultas lin atente. Tiel atente ke ŝajnas al mi ke ĉiuj tiuj stacidomaj bruoj ĉirkaŭ mi eksilentis kaj ke nur lia voĉo aŭdiĝas en la venta nokto.

– Jes longtempe mi vere opiniis ke mi samkiel mia patro pasigos la vivon sanigante la sarajevajn infanojn, kaj ke mi, samkiel li, lasos min enfosi en la tombejo de Koŝevo. Jam tio kion mi vidis kaj travivis en la bosniaj regimentoj dum la milito ŝanceligis min koncerne tion, sed kiam mi ĉisomere estis malmobilizita kaj pasigis entute tri monatojn en Sarajevo, fariĝis klara al mi ke mi tie ne povos resti kaj vivi. Kaj la nura pripenso ke mi vivu en Vieno, Triesto, aŭ en iu ajn alia aŭstra urbo provokis en mi abomenon, abomenon ĝis vomado. Kaj pro tio mi komencis pensadi pri Sud-Ameriko.

– Bone, ĉu oni povas scii kio estas tio pro kio vi fuĝas el Bosnio? – demandis mi maldiskretece kiel personoj de mia aĝo tial starigis demandojn.

– Do, "oni povas scii", sed tio ne estas facile tiel dum trauro sur la stacio, resume diri. Sed se mi tamen estus devinta diri kio min forpelas el Bosnio mi dirus: malamo.

Maks subite leviĝis, kvazaŭ li parolante neatendite estus frapita kontraŭ iu nevidebla barilo. Ankaŭ mi elmergiĝis sur la realecon de la malvarma nokto en la stacio de Slavonski Brod. La vento fariĝis ĉiam pli forta kaj pli frida, lumoj flagretadis kaj malaperadis en distanco, malgrandaj lokomotivoj fajfadis. Super ni malaperis eĉ tiu etparto de ĉielo kun sporadaj steloj, nur nebulo kaj fumo kreas indan kovrilon por ĉi tiu ebena sur kiu oni ŝajnas al mi ĝisokule dronas en la nigran grasan plugkampon.

En mi anonciĝis kaj subite grandiĝis furioza kaj agresema deziro kontesti lian asertadon, kvankam ĝi ne estis al mi sufiĉe klara kaj komprenebla. Ni ambaŭ konfuzite silentis. Peze ĉeestis tiu silento inter ni en la nokto, kaj ne estis antaŭvideble kiu el ni ekparolos la unua.

Tiumomente ekaŭdiĝis el malproksimobruo de la rapidvagonaro kaj tuj poste ĝia peza fajfo, obtuza, kvazaŭ ĝi venus de sub betona volbo. La tuta stacidomo subite vigliĝis. Centoj da ĝistiam nevideblaj

figuroj leviĝis en la mallumo kaj komencis kuri direkten de la trajno. Eksaltis ankaŭ ni du kaj levis la valizojn, sed la tumulto en kiun ni enfalis, ĉiam pli disigadis nin. Mi sukcesis ankoraŭ nur alkrii lin mian beogradan adreson.

Post deko da tagoj mi ricevis en Beogrado konsiderinde grandan leteron. Laŭ la grandlitera manskribo mi ne povis diveni de kiu ĝi estas. Tio estis germanlingva litero de Maks el Triesto.

"Kara malnova amiko,

Kiam ni hazarde renkontiĝis en Slavonski Brod nia konversacio estis intermitada kaj peniga. Eĉ se ni estus havinta pli bonan okazon kaj pli da tempo, mi ne kredas ke ni estus povinta interkonsenti kaj meti klaran ĉion. La neatendita renkontiĝo kaj la subita disiĝo tute malebligis tion. Mi estas prepariĝinta forlasi Trieston kie vivas mia patrino. Mi ekveturas al Parizo kie mi havas laŭpatrinajn parencojn. Se estos tie permesita al mi eksterlandano kuracista praktiko, mi restos en Parizo, se ne, mi vere iros al Sud Ameriko.

Mi ne kredas ke tiuj malmultaj nekunligitaj alineoj kiujn mi haste skribas povas en viaj okuloj tute klarigi la aferon mian "fuĝon" el Bosnio. Tamen mi ilin sendas, ĉar sentas ke mi ŝuldas al vi respondon, kaj ĉar rememoriginte niajn lernantarojn, mi deziras ke vi min ne perceptu erare kaj ne rigardu en mi simplan germanaĉon kaj "migremulon" kiu facilanime forlasis la landon kie li naskiĝis en la momento kiam ĝi komencas vivi libere kaj kiam ĝi necesas ĉiun forton.

Ke mi tuj transiru al la temo. Bosnio estas belega lando, neniel ordinara lando, nek laŭ sia naturo, nek lau siaj homoj. Kaj kiel sub la tero en Bosnio troviĝas minajaj trezoroj, samtiel la bosnia homo sendube kaŝas en si multan moralan valoron kun ĉe liaj samnacionoj en aliaj sudslavaj landoj malpli ofte troviĝas. Sed vidu, ekzistas io kion la homoj el Bosnio, almenaŭ la viaspecaj personoj, devus rekoni, por neniam perdi el vido: Bosnio estas lando de malamo kaj timo. Sed ni neglektu la timon kiu estas nur korelativo de tiu malamo, ĝia provizora eĥo, kaj parolu ni pri malamo. Jes, pri malamo. Ankaŭ vi instinkte ektremas kaj protestas kiam vi aŭdis tiun vortojn (mi vidis tiom dum la nokto sur la stacio) samkiel ĉiu el vi kontraŭ staras aŭdi, percepti kaj rekoni tion. Se temas ĝuste pri tio ke oni devus tion ekvidi, konstati, analizi. Kaj malfeliĉo estas en tio ke neniu volas kaj povas fari ĝin. Ĉar la fatala karakterizo de tiu malamo estas ĝuste en tio ke la bosnia homo ne konscias pri la malamo kiu vivas en li, ke li malinklinas al ties analizado kaj – antipatias ĉiun kiu provas fari tion. Sed tamen estas fakto: ke en Bosnio kaj Hercegovino estas pli da homoj kiuj pretas en kuratakoj de senkonscia malamo, pro variaj motivoj kaj kun diversaj pretekstoj, mortigi

aŭ esti mortigitaj, ol en aliaj laŭ loĝantaro kaj amplekso multe pli grandaj slavaj aŭ neslavaj landoj.

Mi scia ke la malamo, samkiel kolero, havas sian funkcion en la socio, ĉar malamo donas forton, kaj kolero provokas movon. Ekzistas nalnovajojn kaj profunde enradikiĝintaj maljustecoj kaj misuzoj kiuj nur per torentoj de malamo eblas elradikiĝi kaj malundiĝi. Kaj kiam tiuj torentoj malŝveliĝas kaj malaperas, postrestas loko por libereco, por kreado de pli bona vivo. La samtempuloj multe pli bone vidas la malamon kaj koleron, ĉar ili suferas en tio, sed la posteularo vidus nur la fruktojn de forto kaj movo. Bone mi tion scias. Sed tio kiun mi rigardis en Bosnio, tio estas io alia. Tio estas malamo, sed ne iu tia momento daŭre la socia evoluado kaj nepra parto de iu historia procezo, sed malamo kiu aperadas kiel memstara forto, kiu en si mem trovas sian sencon. Malamo kiu levadas homon kontraŭ homo kaj poste egalmaniere ĵetadas en mizeron kaj malfeliĉon aŭ peladas subteren ambaŭ kontraŭulojn; malamo kiu simile al kancero en organismo konsumadas kaj formanĝe-gas ĉion ĉirkaŭ si, por ke finfine ĝi mem mortaĉu, ĉar tia malamo, kiel flamo, havas nek konstantan aspekton, nek propran vivon; ĝi simple estas ilo de impulso celanta nenigi kaj neniĝi, ekzistas nur kiel tia, kaj nur ĝis tiu tempo kiam ĝi plenumos sian taskon de kompleta nenigo.

Jes, Bosnio estas lando de malamo. Tio estas Bosnio. Kaj laŭ iu stranga kontrasto, kiu fakte ne estas tiel stranga, kaj eble oni povus ĝin per pli atentema analizo facile klarigi, oni povas ankaŭ diri ke estas malmulte da landoj en kiuj enas tiom da firma kredo, sublimes fortipeco de karaktero, tiom da delikateco kaj amfervoro, tioma profundeco de sentoj, sindoneco kaj neŝancelebla fideleco, tioma da soifo al justeco. Sed sub ĉio tio kaŝiĝas en netraverseblaj profundoj tempestoj de malamo, tutaj uraganoj de implikitaj, kunpremitaj malamoj kiuj maturiĝas kaj atendas sian momenton. Inter viaj amoj kaj viaj malamoj la rilato estas sama kiel inter viaj altaj montoj kaj milfoje pli grandaj kaj pli pezaj nevideblaj geologiaj tavoloj, sur kiu ili kuŝas. Kaj tiel vi estas kondamnitaj vivi, sur profundaj sedimentoj de eksplodilo kiu de tempo al tempo ekbruliĝas ĝuste per fajreroj de tiuj viaj amoj kaj via arda, malbenita sentemo. Eble via plej granda malfeliĉo estas ĝuste en tio ke vi eĉ ne konjektas kiom da malamo enas en viaj amoj kaj emociegoj, tradicioj kaj pecoj. Kaj samkiel la tero sur kio ni vivas trairas, sub influo de la atmosfera malsekeco kaj varmo, en niajn korpojn, sonante al ili koloron kaj aspekton, difinante la karakteron kaj direkton al nia vivmaniero, kaj al niaj agmanieroj – samtiel la potenca subtera kaj nevidebla malamo sur kiu vivas la bosnia homo eniras nerimarkinte kaj ĉirkaŭire en ĉiujn liajn agojn. Malvirtoj naskas ĉie en la mondo malamon ĉar ili konsumadas kaj ne kreas, detruadas ne konstruadas, sed en landoj kia estas Bosnio – eĉ virtoj parolas kaj agas ofte per malamo. Ĉe vi la asketoj ne eltiras amon el sia asketeco, sed la

amon kontraŭ la voluptemaj; la abstinenculoj malamas tiuj kiuj driskas kaj ĉe la drinkemuloj aperiĝas mortiga malamo kontraŭ la tuta mondo. Tiuj kiuj kredas kaj amas, morte malamas tiuj kiuj ne kredas aŭ tiujn kiuj alimaniere kredas kaj amas ion alian. Kaj, ofre, bedaŭrinde, la plej granda parto de ilia kredo kaj ilia amo konsumiĝas en tiu malamo. (Pli multe da malbonaj kaj sombraj vizaĝoj ĉirkaŭ preĝejoj, monaĥejoj kaj moskeoj.) Tiuj kiuj subpremas kaj ekspluatas la ekonomike pli malfortajn, enmetas en tion, ankaŭ malamon, kiu tiun ekspluatadon faras centfoje pli malfacilan kaj malbelan, kaj tiuj kiuj suportas tiujn maljustecojn, sopiras al justeco kaj revenĝo, sed kiel al iu fenĝema eksplodo kiu se ĝi realiĝus laŭ ilia koncepto devus esti tia kaj tiom granda, ke ĝi krevigus eĉ la subpremiton kun la abomeno subpremanto. La plimulto de vi estas alcutimiĝinta meti la tutan forton de la malamo sur tio kio estas proksime al vi. Viaj amataj sanktaĵoj estas regule malantaŭ tricent riveroj kaj montoj, sed la objektoj de via abomeno kaj malamo estas ĉi tie apud vi, en la sama urbo, ofte sur la alia flanko de via kortomuro. Tiel via amo ne postulas multe da ago. sed via malamo tre facile trairas al ago. Kaj vian propran landon vi amas, arde amas, sed laŭ tri-kvar diversaj manieroj kiuj ekskludas mortige malamas unu la alian kaj ofte kolizias.

Iu rakonto de Mopasan enhavas Dionizian priskribon de printempo kiu finiĝis per la vortoj ke dum tiaj tagoj oni devus sur ĉiuj anguloj surglui afiŝojn: "Civitano franca, estas printempo, gardu vin de amo!" Oni eble devus ankaŭ en Bosnio admoni la homojn, ke ili sur ĉiu paŝo, en ĉiu penso, kaj en ĉiu, eĉ la plej sublima, sento gardu sin de malamo, de kunnaskita, senkonscia, endemia malamo. Ĉar en tiu necivilizita kaj povra lando, en kiu vivas densigute kvar diversaj religioj, estus necese, kvar foje pli da amo, reciproka kompreno kaj toleremo ol aliaj landoj. Sed en Bosnio male estas malkompreno, kiu de tempo al tempo transformiĝas al nekovrita malamo, preskaŭ la ĝenerala karaktero de la loĝantoj. Inter la diversaj religioj la ravinoj estas tiel profundaj, ke nur malamo sukcesas foje trairi ilin. Mi scias ke oni povas al tio respondi min, eĉ sufiĉe pravante, ke tiurilate rimarkeblas certa progreso ke la ideoj de la 19-a jarcento ankaŭ tie havis efekton, kaj ke nun, post la liberiĝo kaj unuiĝo ĉio iros pli bone kaj pli rapide. Mi timas ke ne estas tute tiel. (Ŝajnas al mi ke mi dum tiuj kelkaj monatoj bone vidis la reciprokajn rilatojn inter diversreligiaj kaj diversnaciaj homoj en Sarajevo!) Oni presigos kaj parolos ĉie kaj en ĉiuj okazoj: "Frato karas, kiun ajn religion li havas", aŭ "Oni ne demandas kiel iu religio krucisignas sed kies sango hejtas lian bruston", "Fremdan respektu pri via fieru", La integra popola unueco konas nek religiajn nek tribajn diferencojn". Sed en la bosniaj burĝaj rondoj de ĉiam estis malsincera burĝa ĝentileco, saĝa trompado sin mem kaj aliulojn per sonoraj vortoj kaj vana ceremoniaro. Tio vualadas kiel-tiel la malamon, sed ne forigas ĝin kaj ne

malhelpas ĝian kreskadon. Mi timas ke eĉ sub la kovrilo de ĉiuj nuntempaj maksimumoj povas en tiuj rondoĵ dormeti la praaj kainaj planoj, kaj ke ili vivos ĝis kiam, ne estos komplete

ŝanĝitaj la fundamentoj de l

a materia kaj spirita vivo en Bosnio. Kaj kiam alvenos tiu tempo kaj kiu havos forton efektigi tion? Lun tagon ĝi venos, mi kredas tion, sed tio kion mi vidis en Bosnio ne indikas ke oni sekvas tiun vojon jam nun. Kontraŭe.

Mi pripensis tion, precipe la lastajn monatojn, kiam mi ankoraŭ luktis kontraŭ la ideo forlasi Bosnion por ĉiam. Estas kompreneble ke ne dormas bone la homo kiun premezas tiaj pensoj. Kaj mi kuŝantis apud la malfermita fenestro, en la ĉambro kie mi naskiĝis, fore muĝis la Miljacka alterne kun la fruaŭtuna vindo en la ankoraŭ abunda foliaro.

Kiu en Sarajevo pasigas la nokton maldorma en lito, tiu povas aŭdi strangajn sonojn de la sarajeva nokto. Peze kaj sekure batas la horloĝo sur la katolika katedralo – du post meznokto. Pasas pli ol unu minuto (ekzakte sepdek kaj kvin sekundoj, mi nombris) kaj nur tiam anonciĝas per iomete malpli forta sed penetrema sono la horloĝo de sur la ortodoksa preĝejo, ankaŭ ĝi batas sian duan horon post meznokto. Malmulte post ĝi ekbatas raŭkavoĉe, foravoĉe la horloĝturo ĉe la Beja moskeo, kaj ĝi batas la dekunan horon, fantomajn dekunu turkajn horojn, laŭ la stranga kalkulado de foraj, fremdaj regionoj de la mondo! Judoj ne havas batantan horloĝon, sed l' unika Dio scias kioma horo estas ĉe ili, kioma laŭ la sefarda kaj kioma laŭ la eŝkenara kalkulado. Tiel eĉ nokte, dum oni dormas, en la nombrado de nuraj horoj dum muta tempo maldormas la diferenco kiu dividas tiujn dormemajn homojn kiuj maldormaj ĝojas kaj malĝojas, regaliĝas kaj fastas laŭ kvar diversaj, inter si malpaciĝintaj kalendaroj kaj ĉiujn siajn dezirojn kaj preĝojn ili sendas al unu ĉielo en kvar diversaj ekleziaj lingvoj. Kaj tiu diferenco estas, foje videble kaj malfermite, foje nevideble kaj kaŝmalice, ĉiam simila al malamo, ofte tute identa kin ĝi.

Tiu specia, bosnia malamo devus esti pristudita kaj repuŝita kiel malbonega kaj profunde enradikiĝinta malsano. Kaj mi kredas ke fremdaj scienculoj estus venintaj en Bosnio por pristudi malamon, samkiel ili pristudadas la lepron, nur se la malamo estus rekonita, apartigita kaj klasifikita studobjekto, kiel la lepro.

Venis al mi ideo ke ankaŭ mi mem min ĵetu sur la pristudadon de tiu malamo, kaj ke analizante kaj konatigante ĝin mi kontribuu al la neniigo de tio, Eble tio eĉ estis mia devo, ĉar mi kvankam fremdevena, en tiu lando, kiel oni diras, ekvidis "la lumon de la tago", Sed post la unuaj provoj kaj pli longa pripensado mi rekonis ke mi havas nek kapablon nek forton por tio. Oni postulus de mi, samkiel de ĉiuj aliaj, ke mi determiniĝu, ke mi estu malamata kaj ke mi malamu. Sed mi tion ne

volis kaj ne scipovis. Eble mi, se tiel devas esti, eĉ estus konsentita deveni viktimo de malamo, sed vivi en malamo, partopreni en ĝi, tion mi ne povas. Kaj en la lando kiel estas la nuna Bosnio, tiu kiu ne povas, aŭ kiu estas ankotraŭ pli malbone kaj pli grave, kiu konscie ne volas malami, ĉiam estas iomete fremdulo kaj renegato, kaj ofte ankaŭ martiro. Tio validas ankaŭ por vi, denaskaj bosnianoj, kaj des pli por iu almigrinto. – Kaj tiel mi dum unu el tiaj aŭtunaj noktoj, aŭskultante la strangajn alvokadojn de tiuj variaj kaj diverssonaj sarajevaj turoj, konkludis ke mi ne povas resti en mia la dua patrolando Bosnio, ke mi ne devas resti en ĝi. Mi ne estas tiom naiva por ke mi serĉu en la mondo urbon en kiu ne estas malamo. Ne, mi bezonas nur lokon en kiu mi povos vivi kaj labori. Ĉi tie mi ne povus tion.

Vi kun mokrido, eble eĉ kun malestimo ripetos vian vorton pri mia fuĝo el Bosnio. Ĉi tiu mia letero ne havas forton por klarigi kaj pravigi al vi mian agmanieron, sed ŝajnas ke en la vivo ekzistas okazoj kiom validas la antikva latina regulo: Non est salus nisi in fuĝa (Savo estas nur en fuĝo) . Kaj mi petas vin kredi nur tiom: ke mi fuĝas de mia humana tasko, sed pro tio ke mi ne povus ĝin plenumi komplete kaj senĝene.

Al Vi kaj al nia Bosnio mi deziras en la nova popola kaj ŝtata vivo ĉian feliĉon!

Via M. L.

Pasis deko da jaroj. Mi malofte rememoris mian amikon el infanaĝo, kaj mi lin estis tute forgesinta, se la fundamenta penso de lia letero de tempo al tempo ne estus rememorinta lin. Proksimume ĉirkaŭ la jaro 1930 mi eksciis tute hazarde ke doktor Maks Levenfeld restis en Parizo, ke li antaŭ urbo Neji havas disvastigitan praktikon, kaj ke en nia kolonio kaj inter la jugoslavaj laboristoj li estis konata kiel "nia doktoro" kiu senpage ekzamenadas la laboristojn kaj studentojn, kaj, se necesas, li mem havigas al ili medikamentojn.

Pasis denove sep-ok jaroj. Lun tagon, denove hazarde mi eksciis la pluan sorton de tiu mia kamarado. Kiam en Hispanio komencis la civila milito, li forlasis ĉion kaj foriris kiel libervolulo en la republikan armeon. Li organizis ambulancojn kaj hospitalojn, famiĝis laŭ sia fervoro kaj scio. Komence de la jaro 1938 li troviĝis en iu malgranda aragonia urbo kies nomon neniu el niaj homoj povis korekte elparoli. Sur lian hospitalon estis farita aeratako dum hela tago kaj li pereis ope kun preskaŭ ĉiuj liaj vunditoj.

Tiel finis sian vivon la homo kiu forfuĝis antaŭ la malamo.

Tradukis Agnesa Eremija
(ĉerpita el Beograda Stelo)

ALBANA ESPERANTO LIGO EN ĜIA DEKDUJARIĜO Prelego en la Konferenco “Esperanto en Balkano”, majo 2003

Pardonpetante ĉiujn samideanojn ĉeestantaj tiun ĉi Konferencon pro neebleco partopreni ankaŭ albana reprezentanto, mi proponus ĉi suban raporton pri E-movado en nia lando. Antaŭdankon pro via atento!

lom da historio

La unuaj spuroj de Esperanto en Albanio verŝajne datiĝas ekde jaro 1907. Estis ja albanaj studentoj eksterlande kiuj konatiĝis unufoje kun Esperanto en universitatoj aŭ mezlernejoj tie. Ekzemple konata kuracisto forpasinta Hamdi Sulĉebe estis gimnaziano en Vieno. Iutage vizitis lin esperantisto loka kaj propagandis al li la internacian lingvon. Ekde tiu tago Hamdi eklernis pasie E. kaj disvastigis ĝin reveninte en Albanion. La samon faris inĝ. Ĉefo Fico, same forpasinta. Li partoprenis konkurson pri E. en universitato en Torino, Italio kaj gajnis premion: ekskurso senpaga tra la tuta Italio. Tio ege kuraĝigis lin pliperfektigu siajn konojn de la bona lingvo kaj reveninte hejmen disgastigi ĝin en la junularon albanan. Tiel konatiĝis kun Esperanto pluraj aliaj albanaj studentoj kiel Lazër Shantoja, Mark Kakariqi, Cuk Simoni kaj fratoj Wilhelm kaj Simon Koliqi el la norda antikva urbo Shkoder. Wilhelm havis vastan korespondon tutglobe, dum lia frato Simon estis kardinalo. Cuk verkis en Esperanto originalan libron pri la vivo kaj faroj de Skanderbeg, albana nacia heroo. Lazer kaj Mark estis pastroj ege suferintaj, eĉ mortigitaj de komunisma reĝimo, post la jaro 1944.

Dum s-ro Janko Pali, same forpasinta, ekkonis Esperanton tute hazarde trafolumante duonbruligitan libron apud butikon en sia vilaĝo ĉe borde en sudo, dum la sanguma unua mondmilito..

Kompreneble, Esperanto konis notindan disvastecon post la Dua Mondmilito, kiam ankaŭ la klereco de la loĝantaro iam malalfabeta plejmulte, plialtiĝis kaj edukistemo ampleksigis la tutan landon. Tiel esperantistiĝis doc Vasil Pistoli, aktuala direktoro de la Albana Esperanto-Instituto, ĉirkaŭ 80 jara kaj pluraj aliaj intelektuloj.

Zef Mjeda, honora membro de UEA, forpasinta jam, esperantistiĝis en la jaro 1958, denove hazarde. Li estis vizitanta ekspozicion de vjetnamaj pentristoj en Shkoder. En la ekspoziciejo estis ankaŭ la ima ambasadoro de Vjetnamio, eminentulo de la porpaca movado kaj same esperantisto. Ili renkontiĝis kaj komuniĝis en la franca. Interalie vjetnamo propagandis al Zef la bonan lingvon, donacante eĉ lernolibron de.

Ekde tiam Zef ekinteresiĝis serioze pri la lingvo kaj ellernis ĝin profunde. Li eĉ kompilis grandan vortaron Albana-Itala –Esperanta kaj tradukis en Esperanton tutan serion de albanaj legendoj kaj kanzonoj pri bravuloj, same fabelojn popolajn.

Fondiĝo de la Albana Esperanto-Ligo

Marte 1991 estas fondita AEL (Albana Esperanto- Ligo) tuj post demokratiĝo de la politika vivo de la lando. Komence estis kelkaj esperantistoj kiuj aktivis antaŭe individue, ĉu en Tirane, en Durres kaj aliloke. Ili ne estis multnombraj kaj plejmulto el ili ne posedis sufiĉe bone la lingvon, eĉ pro fakto ke ili ne havis antaŭe la eblecon praktiki ĝin. Mi, Gafur Muço ka eklernis Esperanton en la lernokurso gvidita de s-ro Ĉefo Fico en la kulturdomo de Tirana, vintre –printempe 1961-1962, kaj praktikis ĝin per korespondo kaj per legado de revuoj alvenintaj ĉefe el Ĉinio, Vjetnamio, Laoso kaj nur rare el UEA, kiu estis membriginta nin senpage sendante ankaŭ la Jarlibron! Ni povis tamen fari nur malmulton ĉar la libera movado (nekontrolata de la ŝtato komunisma) estis strikte malpermesata, kiel sciite. Ni sukcesis esperantigi la tekston de unu dokumenta filmo pri la urbo-muzeo- Gjirokaster, en la jaro 1967, eldonis libreton pri Skanderbeg, tradukaĵo el originalo de prof. Kristo Frasheri. Bedaŭrinde, tiu libreto kiu plejparte enkarmoniĝis de la ŝtato ĉar estis skribita en “stranga lingvo”.

Tamen, iniciate de Gafur Muço, Doc. Vasil Pistoli, Luan Jaupi, Rita Permeti ka oni fondis AEL jure agnoskita de Ministerio pri Kulturo. La unua prezidanto estis elektita Gafur Muço.

Tiutempe mi instruis matematikon al kamparanaj gefiloj apud Tirana kie dum 15 jaroj mi estis kondamnita labori pro politikaj kialoj. Ankaŭ mi aliĝis al AEL kaj helpis al la estraro per tenado de korespondado kaj varbado de novaj anoj. Tamen mi sukcesis allogi miajn etulajn lernantojn de Mushqeta kaj miajn gekolegojn al Esperanto. Allogilojn estis dekomence la korespondo kun fremduloj. Tiel mia kolegino Mejte Rama el Berzhite korespondis kun geedza paro el Anglio, alia kolegino juna korespondis kun kanadiano.

Baldaŭ (septembre 1991) mi revenis instrui matematikon en la urbon, en mezlernejon. Tie nature mi varbis plurajn miajn gestudentojn al Esperanto per lernokurso senpaga kaj korespondo. Mi eĉ aranĝis ekskurson de 18 gejunuloj al Vraca te Bulgario aŭguste 1992. Interalie la grupo estis akceptita kaj akompanita tie ankaŭ de s-ro Ljubomir Trifonĉovski, loĝanto de Vraca. Tio efikis notinde. La grupo en la lernejo starigis junulan klubeton kiu tuj agnoskiĝis de TEJO kiel branĉo por Tirana de Albana Esperanto Junularo.

Ni kune faris ĉion eblan por plivastigi la interrilatojn de nia AEL kun eksterlando, aparte kiam mi elektiĝis ties estrarano por la eksteraj rilatoj. Kune kun la nova prezidanto, s-ro Vasil Pistoli en la jaro 1993 ni starigis lernokursojn en Universitato, en aliaj mezlernejoj, en Pedagogia Mezlernejo, en Fremdlingva Mezlernejo, en eĉ elementaj lernejoj. La samon ni postulis al niaj samideanoj de Durres, Lezhe, Kukes, Pogradec, Peshkopi, ka.

Ni sukcesis eldoni revueton kaj poste Bultenon dumonatan, enalbanigis filozofian verkon de s-ro Bruno Vogelmann "La Nova Realismo", kaj pli poste la ĉefverkon de Ĵelju Ĵelev “ La Faŝismo”, verkis plurajn artikolojn por la ĉiutagaj kaj periodikaj ĵurnaloj kaj revuoj, partoprenis intervjuojn en la tutlanda Radio kaj TV - stacioj.

Ĝis nun estas kompilitaj kvar lernolibroj de Esperanto por albanoj (kun aŭtoroj s-roj Vasil Pistoli, Zef Mjeda, Bardhyl Selimi, kaj Gjergji Gusho) . Estas kompilita ankaŭ vortaro duvoja por la unuaj bezonoj kaj estas kompilita granda vortaro (ĝis nun oni atingis ĝis la dek unuaj literoj) .

Niaj gestudentoj esperantistaj

Sendube plej granda atingo de nia enlanda movado de E. estas la pretigo de kvalifikitaj esperantistoj danke al la STUDUMO ĉe Monda Turismo, same klerigejo de Akademio Internacia de la Sciencoj AIS. Ekde la kajo 1997 partoprenis tiun studumon kelkdekoj da gestudentoj el Tirana, Elbasan, Pogradec, Vlora, Kukes, Skrapar ka. Parto el ili jam bakalaŭriĝintis kaj daŭrigas siajn studojn por magistriĝi ĉe AIS. Kelkaj el ili akiris postenojn en la turismaj institucioj de la lando. Certe ili estas bona fundamento por E-instruistaro en Albanio.

Malpli da studentoj sekvis la E-kursojn ĉe la Karlskoga universitato gvidataj de s-ro Lars Forsman, kaj laste intencas sekvi kursojn en karlovo de Bulgario gvidataj de s-ro Boĵidar Leonov.

Statistikoj

Rezulte de la agado de AEL kaj ties organizaĵoj (ILEI-sekcio, Albana Esperanto-Instituto, AEJKs) la nombro de esperantistoj en Albanio kreskis notinde.

Revizianta lastatempe la nomlistojn de ekskursanoj ĝis printempe 2001, kaj de la lokaj Esperanto-societoj, mi sukcesis fari el tiuj plenan nomliston kun personaj donitaĵoj de esperantistoj vivaj en la jaro 2001.

Jen kelkaj tabuloj:

Tab. 1 La nombro de esperantistoj laŭ distriktoj:

Distrikto	Nombro	%
Bulqize	2	0.4
Burrel	2	0.4
Çorovode	3	0.6
Durrës	68	14.2
Elbasan	5	1.04
Fier	4	0.8
Gjirokaŝter	1	0.2
Gramsh	2	0.4
Kruje	1	0.2
Korçë	3	0.6
Kukes	2	0.4
Kurbin	3	0.6
Lezhe	4	0.8
Librazhd	4	0.8
Lushnje	4	0.8
Mallakaster	2	0.4
Permet	2	0.4
Peshkopi	7	1.45
Pogradec	14	2.9
Puke	2	0.4
Sarande	2	0.4
Shengjin	2	0.4
Shijak	28	5.8

Shkoder	4	0.8
Skrapar	2	0.4
Tepelene	3	0.6
Tirane -urbo	262	54.6
Tirane -vilaĝo	10	2.1
Tropoje	2	0.4
Vlore	9	1.9
Loĝloko ne konata	7	1.45
Entute	480	100

El tiuj :

Inoj	292	60.8 %
Maskloj	188	39.2 %

Averaĝa aĝo

Prikonsiderante la donitaĵojn de nur 298 esperantistoj ni povas doni la jenajn aĝgrupojn:

Aĝo Nombro Procento

75	1	0.3
68	1	0.3
57	1	0.3
56	2	0.6
53	1	0.3
50	1	0.3
49	1	0.3
44	2	0.6
45	1	0.3
43	1	0.3
42	1	0.3
39	2	0.6
37	3	0.1
36	3	0.1
33	1	0.3
32	6	1.9
31	3	0.1
30	10	3.3
29	11	3.6
28	7	2.3
27	15	4.9
26	23	7.5
25	28	9.1
24	54	17.6
23	17	5.5
22	43	14
21	22	7.2
20	17	5.5
19	9	2.9
17	2	0.6
16	9	2.9

Tial la averaĝa aĝo rezultiĝas 25.5 jara.

Pretigis : Bardhyl Selimi

Albana

Fabelo

La forto de la amo

Mortinte la reĝo de iu lando, surtroniĝis lia filo, kiu petis sian patrinon doni al li la ŝlosilojn de ĉiuj ĉambroj de la reĝa palaco.

La reĝino diris:

- Kial vi bezonas tiujn ŝlosilojn?
- Mi volas do scii, kiel reĝo, kio estas en la palaco, -firme respondis li.

La reĝino enmanigis al la filo nur 99 ŝlosilojn el entute 100. La filo malfermis per ili ĉiujn 99 ĉambrojn, sed ne la centan, kiu plurestis fermita. Tiam li insistis ĉe la patrino ke ŝi donu al li ankaŭ tiun lastan ŝlosilon.

Malferminte la centan ĉambron, la juna reĝo ekvidis sur muro grandan foton de belega junulino, je aparta fascineco.

Tio ege ŝokigis lin, eĉ svenigis lin.

La reĝino, enirinte en la centan ĉambron post iom da tempo, trovis sian filon etendiĝinta surplanke tute svenita. Ŝi tuj superŝutis lin per malvarma akvo ĝis kiam la filo rekonsciiĝis kaj ekdiris:

- Mi petas vin, patrino, diri al mi kie troviĝas la junulino kies foto aperas surmure!
- Por tiu junulino, nomata Zili, via patro estas luktinta longajn jarojn, sed li ne sukcesis ekposedi ŝin- respondis la reĝino.

Poste ŝi montris al la filo la lokon kie troviĝis la knabino. Ricevinte la koordinatojn, la junreĝo diris:

- Kara patrino, helpu min pretiĝi por la vojaĝo. Plenigu du sakojn da oro ĉar mi intencas tuj ekiri.

Ĉar ŝi ne povis konvinki sian filon rezigni de tiu danĝera vojaĝo, finfine pretigis ĉion demandita de la filo.

La junreĝo surcevaliĝis kaj ekgalopis al la fora lando kie vivis Zili. Apud de la palaco kie estis fermita la belulino, troviĝis kabano de maljunulino. La junreĝo elĉevaliĝis en la korto de la kabano, eniris kaj salutis la maljunulinon dirante:

-Ĉu eblas ke mi tranoktu ĉi tie?

- Mi estas malriĉa kaj ne estas lito ĉe mi kie povus dormi ĉevalisto tiom riĉa kiom vi.
- Ne gravas, mi dormos sur la litkovraĵoj samaj kiel la viaj- respondis la nekonata ĉevalisto.

Post iom da kunbabilado, li eksciis ke ŝi ne havis gefilojn.

- Bona maljunulino, ĉar vi ne havas gefilojn, akceptu min ĉe vi kvazaŭ vian filon dum certe da tempo- petegis li.
- Mi volas plenumi vian deziron, sed mi ne posedas dignan hejmon. Mia kabano ja estas tiom malnova, kiom estas danĝere ke ĝin povus faliĝi iu stormo.
- Se vi trovos kelkaj masonistoj, mi komencos ekde morgaŭon ekkonstrui novan domon por vi- promesis la reĝo.

Tiel, la morgaŭon, la maljunulino venigis hejmen dekojn da masonistoj kiuj konstruis palacon tiom grandan kaj tiom belan kiel tiu kie vivis la bela junulino. Cetere ŝi konfesis ke fakte ŝi estis unu el la raraj homoj vizitanta la hejmon de la belulino.

Iutage la junulo diris al la maljunulino.

-Certe vi mirus se vi sciis la kialon de mia alveno ĉe vin. Kaj li tuj rakontis ke lia koro brulis pro Zili ege dezirante renkonti ŝin, kiun li ardamis freneze.

Tiel la maljunulino decidis viziti la najbarinon, sed restis ĉe ŝi nur mallontempe. La knabino malĝojiĝis pro tia hasto de ŝia najbarino.

-Mi devas reveni hejmen ĉar ĉe mi estas gastino, mia nepino, kiu povas enuiĝi restante sola!- pravigis sin la maljunulino.

- Bonege! Mi petas vin venigi vian nepinon ĉe min morgaŭ, ĉar mi deziras babili kun samaĝulino-petis ŝin Zili.

Revenante el la palaco de Zili, maljunulino aĉetis en la bazaro novajn robojn kaj juvelaĵojn per la oro donita de ŝia gasto. Per tiuj ŝi vestis la junulon kiel knabinon kaj donis al li konsilojn kiel li konduki sekvantan tagon. Stariĝonte por reveni hejmen, Zili povus deziresprimi ke ili vespermanĝu kune kun la nepino. Ĉi lasta kondukus kvazaŭ ŝi volis foriri, dum la maljunulino petus ŝin resti

La maljunulino kaj la junreĝo vestite kiel knabino iris al la palaco de Zili, al kiu ege plaĉis la aspekto kaj babilado kun ŝia samaĝulino. Stariĝante por foriri, Zili diris al la maljunulino: Via nepino ege plaĉas al mi. Mi petas, lasu ŝin ĉi nokton resti kun mi!

La junreĝo vestite kiel knabino, kondukis kvazaŭ li volis foriri, sed la maljunulino ordonis al li resti. Zili surtavoligis buntan kaj frandindan vespermaĝon. Kiam venis la tempo por surlitiĝi, Zili invitis ŝian gastinon en sia dormoĉambro kaj petis ŝin kundormi kur ŝi. Tiam, la reĝo vestite kiel knabino, rifuzis senvestiĝi antaŭ ŝi.

-Kial vi ne akceptas senvestiĝi?- insistis Zili.

- Mi diros tion, nur se vi ĵuros pro la animo de la forpasinta via patrino, ke vi ne faros malbonon al mi! Kiam Zili ĵuris pro la animo de sia patrino, la gastino demetis sian robon kaj la juvelaĵojn kaj montris sin kiel knabo.

-Ekde mi jam vidis vian foton, mi enmaĝis al vi- deklaris la reĝo. -Mi estas alveninta ĉi tie ĝuste por edziĝi al vi, alie mi mortos ĉi tie!

- Ci tion neniu antaŭe faris, tial mi iĝos via novedzino- respondis Zili. - Sed mi estas fianĉita al Aguŝo, tre potenca monstro fluganta en aero. Ĵus ni elirus el la palaca pordego, li alvenus fluge kaj mortigus vin kaj malbontraktus ankaŭ min..

- Mi mendos la forĝistojn fari por ni feran ĉaron, ni eniros ĝin kaj foriros sekuraj!..

Zili akceptis la ideon de la knabo ŝin amanta freneze.



La plaĝo de Saranda (suda Albanio)

Post du tagoj, la reĝo venigis en la korton la feran ĉaron, kie eniris ambaŭ geamantoj kiuj eliris poste el la palaco. Tiumomente, Aguŝo venis fluge sturmante, frapis per piedbato la ĉaron dispecigante ĝin. Poste li forkaptis per ungegoj Zili kaj alportis Ŝin en alian lokon kie troviĝis kastelo kun altaj muregoj. La junulo forigis pene la feran pordon de la ĉaro lin kovrinta, kaj ekiris por serĉi denove la knabinon forrabita de la monstro. Trovinte la altan kastelon li alvokis Zili de la montopinto. La knabino elirigis sian kapon el la fenestro malvasta.

-Mi alvenis!- diris la junulo.

-Mi vidas tion, sed mi apenaŭ povas renkontiĝi kun vi!- respondis Zili- La kastela pordego estas ŝlosita per sep ŝtalaj boltoj.

-Mi petas vin, kiam alvenos Aguŝo en la kastelon, demandu lin de kie venas lia forto- petis Ŝin la reĝo.

Zili ĵuris ke ŝi plenumos tion. Alveninte Aguŝo en la katelo, la knabino aliris lin per ĉi vortoj:

- Oni diras ke vi estas la plej potenca estaĵo enmonde. Mi petegas vin, de kie venas ĉi forto?
- Kial vi demansas min pri tio?
- Simple pro scivolemo.
- Mia forto estas ĉe la balailo!

Morgaŭon, Zili ornamis la balailon per floroj kaj metis ĝin en la plej vidata loko en la salono de akceptoj. Vespere, reveninte kastelon kaj vidinte la balailon tiel ornamate kaj metite sur tiu loko, Aguŝo diris:

-Kiom stulta vi estas!

-Kial do mi estas stulta?!

- Nu, vidu kie vi metis la balailon!

-Sed ĝi ne estas ordinara balailo, en ĝi estas ja via forto!

-Mia forto ne estas ĉe la balailo, sed ĉe la falĉilo!

Sekvantan tagon la knabino denove ornamis la falĉilon kiel tiel faris kun la balailo kaj surmetis ĝin en bone vidata loko en la salono por gastoj. Ekvidinte la falĉilon, Aguŝo tuj ridegis.

-Kial vi ridegas?- demandis lin Zili. - Ĉu vi denove mensogis, trompante min, ĉar vi ne fidis ja al mi?!

Se vi ne eldiros la veron al mi, mi tuj min ĵetos eksteren el la fenestro kaj dispeciĝos.. !

Pensante ke envere Zili agus tiel, la monstro decidis trakti Ŝin bone kaj konfesu la veron.

-Mia forto estas ĉe giganto vivanta en la dupinta monto. La giganto enhavas en sian ventron kuniklon, kiu siavice enhavas en la ventron du kolombojn. Ĉi kolomboj enhavas en siaj ventroj du ovoj. Se kelkiu rompigus la ovojn troviĝantaj en la ventro de la kolomboj, mi tuj ekmortus.

Morgaŭon, Zili rakontis al sia amanto ĉion dirite de monstro Aguŝo por lia fortofonto. La junulo vojaĝis senĉese, ĝis li trovis la dupintan monton. Ĉe la piedoj de tiu monto loĝis riĉulo kiu havis filinon kaj gregon da mil ŝafoj.

La reĝo diris al la riĉulo ke li volis servi kiel paŝtisto ĉe li. La riĉulo akceptis kaj dungis lin kiel paŝtiston sed ordonis al li ke neniam li venigu la gregon en la montodeklivojn de la dupinta monto kie vagadis la terura giganto.

La unuan tagon, la paŝtisto venigis la gregon ĝuste en la malpemesitajn paŝtejojn.

-La giganto, ekvidinte lin, ordonis:- forigi la ŝafojn disde miaj paŝtejoj!

Sed la paŝtisto ne prikonsideris lian ordonon minacantan. La giganto alproksimiĝis kaj tentis forpeli lin perforte. La giganto kaj la reĝo ekluktadis unu kun la alia tutan tagon. Kiam ili decidis iom ripozi, la giganto diris:

-Se Zili alportus nun panpecon kun fromaĝo kaj glason da vino, mi certe subigus vin facile!

-Se la riĉula filino alportus min panpecon kun fromaĝo kaj glason da vino, ankaŭ mi surterigus vin je ambaŭ viaj brakoj- respondis la junulo!

La samo okazis la sekvantan tagon.

Ĉar la ŝafaro revenis hejmen kun plenigitaj ventroj ŝvelantaj kiel ŝelsako, la riĉulo postsekvis la paŝtiston por ke divenu al kiu paŝtejo li venigis sian gregon. Kaj li ekgapis terure vidante lian paŝtiston luktante kun la giganto kaj aŭdis la vortojn eligitaj de ili unu al la alia, kiam ekripozis iomete. Vidante ĉi tiujn agojn, la riĉulo iompost iom trankviliĝis kaj sentimiĝis, pensante pri la profito akirota se li ekposedus mem la dupintan monton.

La kvaran tagon, la riĉulo petis sian filinon alporti al la junulo grandan panpecon kun fromaĝo kaj botelon da vino postsekvante lin. Ili aliris al la dupinta monto ĝuste en la tempo kiam la kontraŭuloj interrompis la luktadon kaj ekfanfaronis ke ĉiu subigus la aliulon se kelkiu alportus tiumomente panpecon kun fromaĝo kaj glason da vino.

Kiam la paŝtisto parolis tiel, la riĉulo ordonis sian filinon tuj alportu tion pretigite en la hejmo. Manĝinte la panpecon kun fromaĝo kaj trinkinte la vinon, la paŝtisto alten levigis la korpon de la giganto, poste kunfrapigis ĝin al la rokego apude ĝis li murdis lin. Tiam li tranĉis la ventron de la giganto, eligis el ties interno kuniklon, el kies ventro same la kolombojn. En la ventro de ĉi lastaj li trovis du ovojn.

Kiel rekompenco por la mortigo de la giganto la riĉulo deziresprimis al la junulo doni sian filinon por novedzino, sed la paŝtisto klarigis ke li estas jam fianĉita la alia junulino. Li foriris de la riĉulo kaj revenis en la altan kastelon, kie enfermiĝintis sia amantino. Ekde tiu momento, kiam li murdis la giganton, Aguŝo restis etendita surplanke kaj baraktis kiel fiŝo en la reto.

Zili aŭdis la voĉon de sia amanto alvokinta ŝin el la korto. Ŝi diris al Aguŝo:

- En la korto alvenis viro vestite per blankaĵoj. Mi esperas ke li estas kuracisto. Donu al mi la ŝlosilojn por ke mi venigu lin enen.
- Jen la ŝlosiloj, sed mi timas ke mia vivo jam forpasas- diris Aguŝo per malforta voĉo.
- Eltenu ankoraŭ!- kuraĝigis lin Zili, sin ŝajnigante kvazaŭ ŝi bedaŭris lin.
- La knabino hastis malsuprenirante por malfermi la pordegon.
- - Aguŝo estas mortonte- diris la reĝo- montrante ambaŭ ovojn en liaj manoj.
- Tiumomente li kufrapigis ambaŭ ovojn al la muro kaj la monstro ne plu povis enspiri kaj mortis. La reĝo kaj Zili ekbrakumiĝis kaj arde interkisiĝis.

Enesperantigis Bardhyl Selimi, majo 2010

Kio nova en Karlovo



Ankaŭ ĉi junie prof. Bozhdar Leonov, prezidanto de la AIS-Bulgario sukcesis arigi en sia belega urbo ĉe la piedoj de Balkanoj dekojn da profesorojn, docentojn kaj universitatajn instruistojn por prelegi pri “la apliko de Esperanto en fakaj sciencoj”. Okazis ankaŭ BUS- sesio.



La invititoj alvenis el pli ol dek diversaj landoj, ekde Litovio ĝis Kolumbio! Oni prelegis pri la lingvaj problemoj, pri ekologio, alternativaj energifontoj kaj danĝeroj de atomcentraloj, pri menaĝado de agrikultura ekonomiko, pri kulturaj heredaĵoj, matematikaj novaĵoj, organizado de internaciaj kongresoj, skizofrenio kaj metaglosoterapio, religiaĵoj, alternativa banksistemo, ks.



Partoprenis la kvin sesiojn ankaŭ lokaj intelektuloj, salutparolis urbestro.

Tre interesa estis ekskurso al la najbara urbo turisma kaj historia, Sopot, la naskiĝloko de fama verkisto Ivan Vazov, same vizito de pluraj monaĥejoj kaj mirinda aerosporta tendaro je la deklivo de monto.



La prezidanto de la Bulgara Esperanto Asocio, sinjoro Petar Todorov, ĉi kaze dekorigis du eminentulojn de nia E-movado, sinjoron Gian Carlo Fighiera, jam 82 jara kaj sinjoron Hans Ditrih Quednau baldaŭ 70 jara, pro iliaj plurdekaj kontribuajfoj al esperantismo.



Ĉiuj tagoj pasigis en amika samideana etoso, danke al ĉiumomenta prizorgado de gastiganto, prof. Bozhidar Leonov.

Ĉu ne estas jam tempo ke UEA kaj ceteraj niaj instancoj esperantistaj internaciaj iel helpu por rekonstruiĝo de la domo de klerigejo esperantista en Karlovo, kiun prof. Leonov apenaŭ povas teni bonstate per siaj magraj financoj de pensiulo? Oni ekspektas baldaŭan licensigon de mem la klerigejo fare de ŝtato, kio signifas ke ĝin povas frekventi tutjaron pluraj eksterlandaj studentoj, simile kiel tio okazas en Bydgoszcz ĉe ISTK.

Bardhyl Selimi

Prelegoj

INFLUO DE LA SLAVAJ LINGVOJ EN ESPERANTO

Kiam oni parolas pri la fontoj de Esperanto, ordinare oni diras, ke la kontribuo de la slavaj lingvoj en Esperanto ne estas granda. Estas eĉ aŭtoroj, kiel ekzemple *F. Mordijan*, kiuj rekte asertas, ke Esperanto konsistas kaj baziĝas plejparte sur latinaj elementoj. Estas tamen necese emfazi, ke la fontoj de Esperanto ne estas apartaj lingvoj, sed la tutaĵo de la eŭropaj lingvoj kaj konsistas el elementoj *latinidaj* (franca, itala, ka) , el *ĝermanaj* (germana, angla, dana) lingvoj, kaj el la *slavaj* lingvoj (unualoke el ili la rusa) . Oni devas nepre mencii ankaŭ la *latinan* kaj la *grekan* lingvojn. Tiuj estas ĉefe la lingvoj, kiujn konis Zamenhof mem. En Esperanto estas sporade renkontataj ankaŭ elementoj de iuj aliaj lingvoj, ekzemple de la *hebrea*. Tial oni povus plejrajte diri, ke Esperanto estas reflektado de la lingva bildo, kiu ekzistis en la konscio de Zamenhof.

Ĉiuj scias, ke d-ro Zamenhof nakiĝis kaj vivis dum sia tuta vivo en la tiam *Rusa Imperio*, kaj pli ĝuste en ĝia *pola parto*. Li mem skribis, ke la lingvo de lia gepatra domo estis la *rusa*. Li parolis, lernis kaj edukiĝis per tiu lingvo. Li skribis, ke li studis ĝin kun granda plezuro. Li eĉ revis fariĝi iam granda rusa poeto. Zamenhof konfesis, ke li parolas libere nur tri lingvojn: *rusa, pola kaj germana*.

Dum li kreis la fundamenton de sia lingvo, Zamenhof ĉiam rigardis, ĉu konscie aŭ subkonscie, al ĉio per la prismo de la rusa lingvo. Li rigardis al la rusa ne nur kiel al familia lingvo, sed li konsciis, ke la rusa kaj la aliaj slavaj lingvoj havas neordinarajn kvalitojn, kiujn li povus uzi.

En la studoj pri la deveno de Esperanto oni klare povus vidi, ke eĉ tiuj malmultaj okcidentaj esperantologoj, kiuj aparte agnoskis la kontribuon de la slavaj lingvoj en Esperanton, rimarkis nur unuopajn detalojn. Ili ne plene konsciis, ke la tuta sistemo de Esperanto estas submetita al la influo de la slavaj lingvoj, kaj plejparte al la rusa lingvo.

La esperantologo *M. Goninaz* faris jenan rimarkindan aserton: “*La influo de la slavaj lingvoj riveliĝas en la profundo, dum la influo de la latinidaj kaj la ĝermanaj lingvoj estas videbla sur la surfaco*”.

Alia esperanta lingvisto *V. Dall’ Aqua* dividis: “*La influo de la rusa lingvo, rekta kaj nereakta, estas pli profunda ol se tion oni povus konkludi per iu supraĵa studado*”.

Dum la unuaj jaroj Esperanto disvastiĝis preskaŭ ekskluzive en Rusio, kaj tiu periodo de la E-Movado estas nomata la *rusa*. La unuaj E-verkistoj kaj tradukistoj same estis plejparte el Ruslando. Iuj el ili, kiel *Grabovski*, *Kabe* kaj aliaj havis kiel gepatran la polan lingvon, sed ankaŭ ili posedis libere la rusan lingvon, uzis ĝin ĉiutage kaj tradukadis de ĝi en Esperanton literaturajn verkojn. Tiuj aŭtoroj kune kun Zamenhof formis la modelon de la vortfarado, frazeologio, sintakso kaj stilistiko de Esperanto.

Edmond Privat konfesis: “*Rezulte de la influo de la slavaj lingvoj sur Esperanton pere de multnombraj rusaj kaj polaj verkistoj dum la unua periodo, la lingvo akiris grandan liberon en la stilo kaj agrablan flekseblecon en la frazo, kiun ne posedas tiaj fiksitaj lingvoj, kiaj estas la franca kaj la angla*”.

Kiam la centro de la E-Movado pro la malfavoraj kondiĉoj en la cara Ruslando translokiĝis en *Okcidentan Eŭropon*, la bazaj normoj de la lingvo jam estis ellaboritaj kaj daŭre influis ĝian uzadon. La okcidentaj esperantistoj, ne konante la rusan lingvon, uzis la modelojn venintajn de la rusa. Logike estas supozi, ke se la komenca periodo de la E-Movado okazus en Okcidenta Eŭropo, nun Esperanto aspektus alimaniere.

Fonetiko.

La esperanta fonetiko estas tre proksima al la rusa kaj la bulgara fonetiko. La vokaloj plejparte kongruas kun tiuj en la rusa, la pola kaj la bulgara lingvoj: *a, e, i (u), o, u (y)*. Oni povas konstati plenan koincidon de la artikulaciaj karakterizaĵoj de la levado de la lango kaj aliaj apartaĵoj. Tial la internaciaj vortoj eniras Esperanton plej ofte per la samaj vokalaj fonemoj, kiuj estas uzataj en la slavaj lingvoj.

Sekve de iuj specifaĵoj de sia morfologio en Esperanto abundas diftongoj el la speco: **-aj, -oj**:

grandaj domoj;
interesaj libroj ka.

Tiaspecaj diftongoj estas karakterizaj ankaŭ en la rusa, pola, bulgara k. a. slavaj lingvoj, malgraŭ ke en ili la kaŭzo estas tute aliaj morfologiaj specifaĵoj: antaŭ ĉio ili estas finaĵoj de adjektivoj, iuj posedaj pronomoj kaj finaĵoj de substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj en iuj kazoj:

свой, мой, твой, большой, страной, водой;
знай, играй, мечтай, край.

Evidente la granda ofteco de uzado de tiuj diftongoj **-aj, -oj** en la finaĵoj de la slavaj vortoj donis al Zamenhof modelon formi la finaĵon de pluralo de la substantivoj kaj la adjektivoj en Esperanto. Ĝuste tiuj ĉi formoj estas el la bazaj celatakoj kontraŭ Esperanto.

Malgraŭ ke la fonemoj *ĉ, ĉ, ĥ, ĵ* kaj *ŝ* ekzistas ankaŭ en la latinidaj kaj la ĝermanaj lingvoj, sed eĉ ne en unu el tiuj lingvoj ili estas prezentitaj ĉiuj. Tio atestas, ke ili eniris Esperanton pere de la slavaj lingvoj. D. Gregor referencante al O. Jespersen asertas, ke al Zamenhof plaĉis la sibilantaj sonoj kaj diftongoj, ĉar ili estas karakterizaj por la slavaj lingvoj. La fonemo *ĥ* ekzistas en iuj latinidaj-

ĝermanaj lingvoj, tamen ĝi aperis esperante en vortoj pruntitaj el la slavaj lingvoj. Poste ĝi estis vaste aplikata en vortoj pruntitaj el la greka, kaj lastatempe ĝi estas ĉiam pli anstataŭata de fonemo **k**:

ĥemio – *kemio*;
teĥniko – *tekniko*;
ĥinino – *kinino* ktp.

Esperanto uzas la latinan alfabeton, kiu estas kompletigita per du supersignoj: (˘) kaj (ˆ) . La alfabeto estas fonetika, tial oni uzas la literojn ankaŭ por signi la fonemojn. La konformeco “*unu litero – unu sono*” kaj “*unu sono – unu litero*” estas rezulto de apliko de la principo pri reguleco kaj estis enkondukita verŝajne sub influo de la slavaj lingvoj, en kiuj mankas fonografiaj signoj kaj la pozicio de la literoj nur escepte kondukas al legado diversa. En la bulgara, rusa, pola, ĉeĥa kaj en la aliaj slavaj lingvoj ne estas ekvivalentoj de la latinaj literoj **q, w, x, y**, same kiel ankaŭ en Esperanto tiuj literoj mankas.

Por esprimi iujn sonojn Zamenhof uzis literojn kun diakritaj signoj (supersignoj) . Por signi la sensilaban **u** estis uzita la supersigno (˘) , kiu laŭ la opinio de ĉiuj esperantologoj, estis prenita de la cirila litero **ѹ**. Tiu diakrita signo ekzistis jam en la unua projekto de la lingvo, dum la alia diakrita signo, kiu estis en la sama projekto (ˆ) , poste estis anstataŭita per (˘) . Tiu lasta supersigno estas uzata en Esperanto por konsonantoj kaj aperis en ĝi evidente laŭ la modelo de la ĉeĥaj literoj **č** kaj **š**. Zamenhof aldonis tiun signon ankaŭ sur la literojn **h** kaj **j**. Oni povus kontraŭdiri, ke tiu signo estas uzata ankaŭ en la franca alfabeto, sed tie ĝi signas nur vokalojn. Do tiel aperis la esperantaj literoj **ĉ, ĥ, ĵ, ŝ** kaj **ŭ**.

Tiu kuraĝa apliko fare de Zamenhof de la principo pri reguleco tuj forĵetis multajn problemojn ligitajn kun la ortografio kaj same permesis kreon de meza formo de iuj, kiuj havas tre varian formon en la *latinidaj* kaj la *ĝermanaj lingvoj*. Sed tiuj ĉi supersignoj jam en la komenco ankaŭ fariĝis celatako, kiu ne finiĝas eĉ ĝis nun inter esperantistoj, inkluzive lige de la uzado de Esperanto en komputiloj kaj en Interreto. Ne nur en la projektoj de artefaritaj lingvoj post Esperanto, sed ankaŭ por kontentigi la postulojn de komputila uzado de Esperanto en la nuna tempo, oni daŭre serĉas eĉ nun manierojn forigi la supersignojn.

Malgraŭ ke Esperanto uzas la latinan alfabeton kaj la plimulto de la vortoj ne havas slavan devenon, la grafika formo de multaj internaciaj vortoj rememorigas ne nur pri iliaj prototipoj, sed ankaŭ pri la praktika transskribo de la koncernaj vortoj en la rusa, bulgara kaj aliaj slavaj lingvoj:

akvarelo	trotuaro	ŝoforo
kvartalo	kupeo	ŝnuro
bulĵono	marŝalo	rozo
duŝo	ŝoseo	

Lige kun tio estus interese mencii la rimarkigon de V. Akulenko: “*La rusa ortografio estas tre fonetika kaj permesas ĝis 90 % de la vortoj ligi la skribitan kun la prononcita. Poste sekvas la ortografioj de la germana, franca kaj fine la angla*”.

Tial la slava formo de la internaciaj vortoj plej ofte estis uzita de Zamenhof kiel bazo de la koncernaj esperantaj vortoj, t. e. fakte okazas ripeta transskribo, ĉi-foje per latinaj literoj.

Afikso sistemo.

La afiksoj en Esperanto ludas gravan rolon, ĉar ili permesas konstruadon de derivataj vortoj el bazaj morfemoj tiel facile, kiel oni konstruas simplajn sintaksajn vortkunmetojn el vortoj. La grado de la internacieco de la afiksoj estas konsiderinde malpli alta ol la internacieco de radikoj kaj de bazvortoj.

Sendepende de sia origino la E-afiksoj estas memstaraj. Ili posedas aktivan produktelecon kaj formas amason da vortoj, kiuj ne havas analogojn kun la sama afikso en la lingvo-fonto de la afikso.

Unue ni prezentu afiksojn, kies sola aŭ baza fonto estas la slavaj lingvoj:

Prefikso pra-:

En ĉiuj slavaj lingvoj tiu ĉi prefikso estas vaste uzata por formi supreniran aŭ malsupreniran gradon de parenceco, aŭ grandan primitivecon, longan antaŭtempecon:

<i>Esperanto:</i>	<i>bulgara:</i>	<i>rusa:</i>
<i>praavo</i>	<i>прадядо</i>	<i>прадед</i>
<i>pranepo</i>	<i>правнук</i>	<i>правнук</i>
<i>pralingvo</i>	<i>праезик</i>	<i>прязык</i>
<i>prapatrujo</i>	<i>прародина</i>	<i>праотечество</i>
<i>prahoto</i> <i>прачовек</i>		<i>прачеловек</i>
<i>prahistorio</i>	<i>праистория</i>	<i>праистория</i>

Sufikso -ej-:

Kiel ni jam menciis, ĝi estas kreita laŭ la modelo de rusa sufikso -ская, kaj eble ankaŭ surbaze de la germana sufikso -ei (Bäckerei – panbakejo) .

Sufikso -il-:

Ĝi estas pruntita de la slava sufikso -ил- en la vortoj:

<i>кадило</i>	<i>incensilo</i>
<i>мерило</i>	<i>mezurilo</i>
<i>светило</i>	<i>lumilo</i>
<i>лепило</i>	<i>gluilo</i>
<i>удило</i>	<i>fiŝkaptilo</i> k. a.

Sufiksoj -ĉi- kaj -ni-:

En la slavaj lingvoj la karesaj nomoj estas formataj laŭ la sama maniero kiel en Esperanto:

Иванчо, Стоянчо, Генчо k. a.

Соня, Таня, Аня k. a.

Tiuj du sufiksoj estas la ununuraj, kiuj rompas la aglutinecon de Esperanto, ĉar ilin oni metas kutime post neplena sufikso. Sed kurioze estas rimarki, ke por la slavaj lingvoj, kaj ĝenerale por ĉiuj hind-eŭropaj lingvoj, estas karakteriza la sama senreguleco en formado de la karesnomoj, kia estas en Esperanto.

Ankaŭ ĉe la tiel nomataj internaciaj afiksoj estas multaj analogoj en la slavaj lingvoj. Ni montros nur kelkajn ekzemplojn en la bulgara kaj la rusa:

<i>Esperanto:</i>	<i>bulgara:</i>	<i>rusa:</i>
-------------------	-----------------	--------------

Prefikso eks-:

<i>eksĉampiono</i>	<i>екшампион</i>	<i>эксчемпион</i>
<i>eksministro</i>	<i>ексминистър</i>	<i>эксминистр</i>
<i>eksdeputito</i>	<i>ексдепутат</i>	<i>эксдепутат</i>

Prefikso re-:

<i>reorganizi</i>	<i>реорганизирам</i>	<i>реорганизовать</i>
<i>reagi</i>	<i>реагирам</i>	<i>реагировать</i>
<i>rekonstrui</i>	<i>реконструирам</i>	<i>реконструировать</i>

Sufikso -an-:

<i>urbano</i>	<i>гражданин</i>	<i>горожанин</i>
<i>kristano</i>	<i>християнин</i>	<i>християнин</i>
<i>amerikano</i>	<i>американец</i>	<i>американец</i>

Sufikso **-ar-**:

<i>vortaro</i>	<i>речник</i>	<i>словарь</i>
<i>arbustaro</i>	<i>храсталак</i>	<i>кустарник</i>

Sufikso **-in-**:

<i>diino</i>	<i>богиня</i>	<i>богиня</i>
<i>princino</i>	<i>княгиня</i>	<i>княгиня</i>
<i>grekino</i>	<i>гъркиня</i>	<i>гречанка</i>
<i>turkino</i>	<i>туркиня</i>	<i>турчанка</i>

Estas kelkaj sufiksoj, kiuj havas limigitan gradon de internacieco, sed ankaŭ ili havas analogojn en la slavaj lingvoj:

Sufikso **-ad-**:

<i>blokado</i>	<i>блокада</i>	<i>блокада</i>
<i>sieĝado</i>	<i>обсада</i>	<i>осада</i>
<i>embuskado</i>	<i>засада</i>	<i>засада</i>

Tiu sufikso estas analogo de la slavaj sufiksoj **-ание**, **-ение**, **-ане**, **-ене**:

<i>atendado</i>	<i>очакване</i>	<i>ожидание</i>
<i>movado</i>	<i>движение</i>	<i>движение</i>
<i>kantado</i>	<i>пение</i>	<i>пение</i>

Tie ĉi neslava elemento estas subtenata de la sistemo en la slavaj lingvoj. La slavlingvaj esperantistoj, en tiu nombro ankaŭ Zamenhof mem kaj la unuaj verkistoj en Esperanto (rusoj, poloj ka), en kies konscio la verbo devas havi aspekton, kiel estas en ĉiuj slavaj lingvoj, misuzadis sufikson **-ad-** penante nepre doni al la esperanta verbo formalan signon de imperfekto. Statistiko montras, ke laŭ ofteco de uzado tiu ĉi sufikso ĉe Zamenhof staris unualoke. Ĉe neslavaj esperantistoj la sufikso **-ad-** okupas jam kvinan lokon, cedante la unuajn kvar lokojn al la sufiksoj **pra-**, **-ej-**, **-il-** kaj **-uj-**.

Sufikso **-aĵ-**:

<i>fiksaĵo</i>	<i>фиксаж</i>
<i>tuntaĵo</i>	<i>монтаж</i>
<i>kaptaĵo</i>	<i>каптаж</i>
<i>drenaĵo</i>	<i>дренаж</i>

Sufikso **-et-**:

<i>statueto</i>	<i>статуетка</i>
<i>simfonieto</i>	<i>симфониета</i>
<i>libreto</i>	<i>либрето</i>

Sufikso **-ul-**:

(Ĝi estas uzata en iuj formoj en la rusa) :

<i>kapriculo</i>	<i>капризуля</i>
<i>malpurulo</i>	<i>грязнуля</i>

La lastaj du sufiksoj, kiuj sendube havas italan devenon, eniris en Esperanton verŝajne ne sen la influo de la rusa.

Sufikso **-aĉ-**:

Verŝajne ĝi estas same tiel pruntita de iuj slavaj lingvoj, kiuj havas finaĵon kun malŝata signifo:

<u>De la rusa lingvo:</u>	ловкач	lertulaĉo
	рифмач	rimulaĉo
	кляча	ĉevalaĉo
<u>De la bulgara lingvo:</u>	мърляч	malpurulaĉo
	сваляч	amorulaĉo
	мъркач	grumblulaĉo

Sufikso -ec-:

Tiu ĉi sufikso estas verŝajne pruntita de la slavaj sufiksoj -ест, -есть, aŭ -ост, -ость kun la sama signifo:

<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>	<u>Esperanto:</u>
свежест	свежесть	freŝeco
проходимост	проходимость	trairebleco
хубост	прелесть	beleco
човечност	человечность	homeco

En Esperanto estas ankaŭ kelkaj aprioraj afiksoj, kies formo tamen rilatas kun iuj slavaj sufiksoj:

Sufikso -eg-:

Verŝajne ĝi estas kreita analogie de la sufikso -et-. Estas tamen supozo, ke ĝi sin apogas al la rusa sufikso -яг- en la vortoj:

хитряга	ruzulego
штормяга	ŝtormego
бедняга	malriĉulego

Sufikso -er-:

Ĝi estas formita analogie de la sufikso -ar-, kiu semantike respondas al la slava sufikso -инк-:

<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>	<u>Esperanto:</u>
песъчинка	песчинка	sablero
снежинка	снежинка	neĝero
прашинка	пылинка	polvero

Ni diru kelkajn vortojn ankaŭ pri la *sufiksoj participaj*. Diference de la latinidaj kaj la ĝermanaj lingvoj, la slavaj lingvoj (*speciale la bulgara kaj la rusa*) posedas sufiksojn por formado de la kvar specoj de *participoj prezencaj* kaj *preteritaj* en ambaŭ voĉoj. Por *prezenco* Esperanto uzas sufiksojn de latina deveno -ant- por *aktivo* kaj -at- por *pasivo*, kiuj en pluraj okazoj estas plene konformaj (kaj forme, kaj semantike) al la slavaj vortoj:

fabrikanto	фабрикант	fabrikato	фабрикам
adresanto	адресант	adresato	адресам

La itala sugikso -it- formas la *pasivajn participojn en preterito*, kiuj povas esti uzataj ankaŭ kun signifo de *prezenco*. La slava sufikso -т- formas *pasivajn participojn* nur kun signifo de *preterito*. Kiam oni metas ĝin al la radiko de iuj verboj el *dua konjugacio*, ĝi formas kombinaĵojn -ит- aŭ -йт-, kiu kongruas laŭforme kun la latina/itala sufikso -it-. Sed havante antaŭvide la slavajn lingvojn, Zamenhof donis al tiu sufikso signifon nur de *preterita pasiva participo*:

<i>bulgara:</i>	<i>rusa:</i>	<i>Esperanto:</i>
<i>закрум</i>	<i>закрытый</i>	<i>fermita</i>
<i>бум</i>	<i>бумый</i>	<i>batita</i>
<i>num</i>	<i>пумый</i>	<i>trinkita</i>

Havante la paron **-at-** kaj **-it-**, al Zamenhof restis nur plenigi la malplenan ĉelon, kaj analogie de **-ant-** li kreis la sufikson **-int-**:

<i>bulgara:</i>	<i>rusa:</i>	<i>Esperanto:</i>
<i>затворил</i>	<i>закрывший</i>	<i>ferminta</i>
<i>учил</i>	<i>учивший</i>	<i>lerninta</i>
<i>платил</i>	<i>плативший</i>	<i>paginta</i>

Post tio analogie estis plenigitaj ankaŭ la sekvaj ĉeloj de la *participa tabelo* kaj formitaj la *participoj de futuro* per sufiksoj **-ont-** kaj **-ot-**, kiuj havas analogojn en neniu aliaj hind-eŭropaj lingvoj:

<i>fermonta</i>	<i>fermota</i>
<i>lernonta</i>	<i>lernota</i>
<i>pagonta</i>	<i>pagota</i>

Tiumaniere la pli granda kvanto de la esperantaj afiksoj genetike kaj tipologie estas senpere ligitaj kun la bazaj aŭ internaciaj afiksoj en la slavaj lingvoj. Tio klare riveliĝas tiel en la formo, kiel ankaŭ en la semantiko.

La ĉefa konkludo estas, ke la disbranĉiĝo de la esperanta afikso-sistemo estas tre proksima al la afikso-sistemo de la slavaj lingvoj. Dank' al tio ofte estas ebla pomorfema tradukado de bulgaraj, rusaj, polaj kaj aliaj slavaj derivitaj vortoj en Esperanton.

Vortfarado.

En la esperanta vortfarado oni povas apartigi du grupojn da vortoj:

a) Formado de vortoj derivitaj per metado de prepozicio en rolo de prefikso (la tiel nomata *duonprefikso*) al la radiko;

b) Formado de derivitaj vortoj en Esperanto per afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj) .

Oni devas rimarki, ke la *duonprefikso* ofte ŝanĝas la semantikan signifon de la esperanta prepozicio sub la influo de flankaj signifoj de la prefiksoj kaj duonprefiksoj en la slavaj lingvoj. Rezulte de tio la semantiko de la esperantaj derivaĵoj ne plu estas sumo de la signifoj de ĝiaj elementoj kaj ricevas idioman signifon, ĝuste kopiante la idiomecon de la koncernaj vortoj en la slavaj lingvoj. Iuj modeloj eĉ transformas *verbojn de imperfekto* en *verbojn de perfekto*, influas al la *transitiveco* de la verboj kaj plurfoje postulas eĉ *ripetadon* de la duonprefikso kiel prepozicio post la verbo:

<i>bulgara:</i>	<i>rusa:</i>	<i>Esperanto:</i>
<i>да дойда до</i>	<i>дойти до</i>	<i>ĝisiri ĝis</i>
<i>сътруднича с</i>	<i>сотрудничать с</i>	<i>kunlabori kun</i>
<i>влизам в</i>	<i>войти в</i>	<i>eniri en</i>

Ni trarigardu nur iujn modelojn kun duonprefiksoj, kies traduko montras ilian slavan muldilon:

*Duonprefikso **al-**:*

<i>alveturi</i>	<i>пристигам</i>	<i>приехать</i>	<i>alligi</i>
	<i>привързвам</i>	<i>привязать</i>	
<i>alpremi</i>	<i>притискам</i>	<i>прижать</i>	
<i>alterigi</i>	<i>приземявам</i>	<i>приземлить</i>	

(Estas idiomeco en la verboj) :

<i>alpagi</i>	<i>доплацам</i>	<i>доплатить</i>
<i>alskribi</i>	<i>дописвам</i>	<i>дописать</i>
<i>alvoki</i>	<i>призовавам</i>	<i>призвать</i>

Duonprefikso antaŭ-:

<i>antaŭparolo</i>	<i>предговор</i>	<i>предисловие</i>
<i>antaŭfesta</i>	<i>предпразничен</i>	<i>предпразничный</i>
<i>antaŭlasta</i>	<i>предпоследен</i>	<i>предпоследний</i>

Duonprefikso ĉirkaŭ-:

<i>ĉirkaŭrigardi</i>	<i>оглеждам</i>	<i>осмотреть</i>
<i>ĉirkaŭpreni</i>	<i>обхвацам</i>	<i>обхватить</i>

Duonprefikso de-:

<i>detranĉi</i>	<i>отрязвам</i>	<i>отрезать</i>
<i>depuŝi</i>	<i>отблъсквам</i>	<i>отталкать</i>
<i>deŝiri</i>	<i>откъсвам</i>	<i>отрывать</i>

Duonprefikso el-:

1) baza signifo:

<i>eltiri</i>	<i>изваждам</i>	<i>вытащить</i>
<i>elporti</i>	<i>изнасям</i>	<i>вынести</i>
<i>elfali</i>	<i>изпадам</i>	<i>выпасть</i>
<i>elpeli</i>	<i>изгонвам</i>	<i>выгнать</i>

2) metafora signifo:

<i>elpensi</i>	<i>измислям</i>	<i>выдумать</i>
<i>ellabori</i>	<i>изработвам</i>	<i>выработать</i>
<i>elrigardi</i> ¹	<i>изглеждам</i>	<i>выглядеть</i>

¹ (Arkaikiĝinta Zamenhofa idiomaĵo, forpuŝita de la verbo **aspekti**).

<i>elpaŝi</i> ²	<i>излизам</i>	<i>выступить</i>
----------------------------	----------------	------------------

² (Tiu rusa modelo, kiun Zamenhof enkondukis en Esperanton, multaj esperantistoj strebas sen ia sukceso anstataŭi per aliaj verboj kun proksima signifo).

<i>eldoni</i> ³	<i>издавам</i>	<i>издать</i>
----------------------------	----------------	---------------

³ (Ankaŭ radikiginta idiomaĵo, kiun ne sukcesis ĝis nun forpuŝi la neologismo **editori**).

<i>elparoli</i> ⁴	<i>изговарям</i>	<i>выговорить</i>
------------------------------	------------------	-------------------

⁴ (Ĝi estas ofte elpuŝata lastatempe de la verbo **prononci**).

3) agofino:

<i>elaŭskulti</i>	<i>изслушвам</i>	<i>выслушать</i>
<i>ellerni</i>	<i>изучавам</i>	<i>выучить</i>
<i>elhaki</i>	<i>изсичам</i>	<i>вырубить</i>
<i>elĉerpi</i> ⁵	<i>изчерпам</i>	<i>вычерпать</i>

⁵ (Tiu verbo estas uzata en Esperanto same kiel en la slavaj lingvoj plejparte kun sia metafora signifo).

Multaj esperantistoj donas al tiu duonprefikso **el-** signifon de finita ago, sed pro ĝia granda produktiveco kun la baza signifo **el interno de**, ĝia uzado kun signifo de *finita ago* estas limigita nur en ne tre granda kvanto de vortoj, plejparte de tiuj, kiuj estas modelitaj laŭ slavaj vortoj kun la sama signifo.

Duonprefikso en-:

<i>eniri</i>	<i>влизам</i>	<i>входить</i>
--------------	---------------	----------------

<i>enamigi</i>	влюбвам се	влюбиться
<i>enmeti</i>	влагам	вложить

Duonprefikso ĝis-:

<i>ĝisnaĝi</i>	доплувам	доплыть
<i>ĝisvivi</i>	доживявам	дожить
<i>ĝisatingi</i>	достигам	достичь

Duonprefikso kun-:

<i>kunaŭtoro</i>	съавтор	соавтор
<i>kunlabori</i>	сътруднича	сотрудничать
<i>kunsenti</i>	съчувствам	сочувствовать

Duonprefikso po- (uzata nur kun kvantaj vortoj) :

<i>pomonata</i>	помесечен	помесячный
<i>pojara</i>	погодишен	погодовой
<i>posemajna</i>	поседмичен	еженедельный

Duonprefikso pri-:

<i>pripensi</i>	обмислям	обдумать
<i>prilabori</i>	обработвам	обработать
<i>priridi</i>	осмивам	осмеять

Duonprefikso sen-:

<i>senhejma</i>	бездомен	бездомный
<i>senfina</i>	безкраен	безконечный
<i>senmorta</i>	безсмъртен	бессмертный

Malgraŭ ke la derivitaj vortoj en Esperanto, formitaj per prepozicio kiel duonprefikso ekstere similas al la latinidaj vortoj, la analizo montras, ke la plimulto el ili estas modelita laŭ la analogiaj slavaj vortoj.

La slavaj multradikaj vortoj formitaj laŭ la reguloj, tre facile estas modeleblaj en esperantaj kaj servis kiel modeloj por la esperanta vortfarado. La jenaj ekzemploj de bulgaraj kaj rusaj multradikaj kaj plursufiksaj vortoj klarigas tion:

<i>bulgara:</i>	<i>rusa:</i>	<i>Esperanto:</i>
зеленчукохранилище	овощехранилище	legomkonservejo
работоспособност	работоспособность	laborkapableco
металорежещ	металлорежущий	metaltranĉa
водопровод	водопровод	akvokondukilo
главоломен	головоломный	kaprompa
жизнеспособен	жизнеспособный	vivkarabla
равноправие	равноправие	egalrajteco

Esperanto sukcese uzas iujn modelojn de bulgaraj kaj rusaj esprimoj, formitaj pere de ripetado:

<i>Esperanto:</i>	<i>bulgara:</i>	<i>rusa:</i>
<i>plenplene</i>	препълнено	полным-полно
<i>finfine</i>	в края на краищата	в конце концов
<i>vole-nevole</i>	волю-неволю	волей-неволей
<i>iom-post-iom</i>	малко по малко	мало-помалу

Resume oni povus diri, ke la esperanta vortfarado sin bazas grandskale sur modeloj liveritaj de la slavaj lingvoj, malgraŭ ke estas analogoj ankaŭ en aliaj lingvoj, elzemple en la germana.

Morfologio.

Zamenhof komencis okupiĝi pri la lingvo jam kiel lernanto en la gimnazio. La simpleco de la angla morfologio lin kondukis al la penso ne inkluzivi en sia projekto idiomaĵajn elementojn en la gramatiko. Rezulte de tio la gramatiko de la kreita de li lingvo multe simpliĝis. Sed la problemo pri simpligo de la leksiko dum longa tempo ne estis solvita. Kiel rakontis li mem, iun tagon la juna Zamenhof ekstaris pripensite antaŭ du peklamŝildojn:

<u>Кондитерская</u>	(dolĉaĵejo)
<u>Швейцарская</u>	(pordistejo)

La egala finaĵo de tiuj vortoj kun malsama signifo, sed kun proksima semantiko, lin direktis al la penso pri la grandegaj eblecoj de la afikso-sistemo konsiderinde redukti grandan kvanton de radikoj en la lingvo. Komparante la slavajn derivitajn vortojn li difinis la semantikon de multaj afiksoj, ĉar la afikso-sistemo en ĉiuj slavaj lingvoj estas multe pli disvolvita kaj la morfemoj estas pli facile artikigitaj ol en la latinidaj-ĝermanaj lingvoj.

Aplikante la principon de reguleco al la ideo, kiun montris al li la riĉa derivad-ebleco en la slavaj lingvoj, Zamenhof venis al la konkludo vaste apliki la derivadon kaj doni al ĉiu afikso nur unu formon kaj nur unu signifon. Poste analogie tiu ĉi principo estis aplikita ankaŭ ĉe aliaj morfemoj. Nur tiel oni povus klarigi la devenon de la aglutineco de Esperanto ne per la influo de la finna-ugraj aŭ de tjurkaj lingvoj, sed per genetika-tipologia komuneco de la slavaj lingvoj.

Por tion pruvi ni demonstros ĉi-sube la facilecon de la pomorfema tradukado en Esperanton de vico da slavaj (bulgaraj kaj rusaj) vortoj:

<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>	<u>Esperanto:</u>	<u>измислица</u>	<u>выдумка</u>
	<i>el</i> penŝaĵo			
<i>неописуем</i>	<i>неописуемый</i>	<i>nepri</i> skribebla		
<i>безсмислица</i>	<i>бессмыслица</i>	<i>sen</i> sencaĵo		
<i>преиздаден</i>	<i>переизданный</i>	<i>re</i> eldinita		
<i>самовъзпламеняване</i>	<i>самовозпламенение</i>	<i>mem</i> flamiĝo		
<i>ускорявам</i>	<i>ускорять</i>	<i>plir</i> apidigi		
<i>раздвоявам се</i>	<i>расдвоиться</i>	<i>dis</i> duiĝi		
<i>врѣчвам</i>	<i>вручить</i>	<i>en</i> manigi		
<i>пренаселеност</i>	<i>перенаселенность</i>	<i>tro</i> loĝateco		
<i>разхвърляност</i>	<i>разбросанность</i>	<i>dis</i> ĵetiteco		
<i>съавторство</i>	<i>соавторство</i>	<i>kun</i> aŭto ^{re} co	<i>полу</i> zabraven	<i>полу</i> zabutyĵ
		<i>duon</i> forgesita		
<i>самообучение</i>	<i>самообучение</i>	<i>mem</i> instruado		
<i>съотечественик</i>	<i>соотечественик</i>		<i>sam</i> patrujano	

Oni povus daŭrigi ĉi tiun liston, sed eĉ de tio estas klare videble, ke la strukturo de la vortoj en Esperanto kaj en la slavaj lingvoj estas simila. Oni devas mencii, ke preskaŭ ĉiam la komencantaj esperantistoj – rusoj, bulgaroj, poloj, ĉeĥoj ktp, perceptante la vortproduktan analogion inter la slavaj kaj la esperantaj vortoj, strebas muldi laŭ morfemoj ĉiujn vortojn en Esperanto. Tio ofte kondukas al sennormaj, kuriozaj kaj eĉ al ridindaj kaj sensencaj vortoj, plejparte ĉe nekorekta vortprodukta analizo.

La substantivoj en Esperanto finiĝas per **-o**, kio estas analogia al la finaĵo por substantivoj de neŭtra genro en la slavaj lingvoj:

<i>село</i>	<i>масло</i>
<i>вино</i>	<i>пиво</i>

kaj de iuj italaj substantivoj.

La adjektivoj kaj **la posedaj pronomoj**, kiel ankaŭ **la vicaj numeraloj** kaj **la participoj** havas finaĵon **-a**, karakteriza por adjektivoj de femineneco en la slavaj lingvoj, ekzemple en bulgara lingvo:

млада нова червена
красива добра голяма

Modelo por formi *pluralon de substantivoj* kaj *adjektivoj* fariĝis la finaĵo en la slavaj lingvoj **-u**. Ĉar la finaĵo apudas al la finaĵoj **-a** aŭ **-o**, la plurala finaĵo ricevis la sensilaban formon **-i**, kiu montriĝis oportuna, ĉar al ĝi oni facile povas meti la finaĵon de la akuzativo **-n**.

La verboj havas finaĵon de la infinitivo **-i**, kiu estas finaĵo ankaŭ de rusaj, malnovbulgaraj, kroataj, serbaj kaj aliaj infinitivoj:

<i>rusa:</i>	<i>malnovbulgara:</i>	<i>kroata:</i>	<i>serba:</i>
идти́ давати		писа́ти	не́вати
нести́ взяти		мо̀рати	слу́шати
плести́	пла̀кати	htéti	чи́тати

Analogo de *la akuzativo* en Esperanto estas la *rusa* kaj *pola* lingvoj kun apogoj al la *germana* kaj la *latina* lingvoj. Same kiel en la rusa, la esperanta akuzativo havas signifojn de *objekto*, *rezulto*, *tempo*, *kvanto* kaj kio estas aparte grava, ĝi signas *direkton*, kio plene koincidas en ambaŭ lingvoj. Tio ofte kaŭzas ĉe okcidenteŭropaj esperatistoj malfacilaĵojn, plejparte ĉe la komencantoj. La ekzisto de akuzativo en Esperanto daŭre estas objekto de konstanta kritiko flanke de okcidenteŭropaj esperantistoj.

Laŭ la modelo de la slavaj lingvoj la esperanta verbo havas tre precizan sistemon de *transitiveco* kaj *netransitiveco*. Ekzemple sub la influo de siaj gepatraj lingvoj, eĉ tre spertaj esperantistoj angla- aŭ francaparolantaj, faras erarojn ĉe transitivaj verboj, ekzemple:

komenci - komenciĝi
fini - finiĝi

dum en la rusa lingvo estas apartaj verboj:

нача́ть - нача́ться
конча́ть - конча́ться.

En sia plimulto la *transitiveco* de la esperantaj verboj kongruas kun la koncernaj verboj en la slavaj lingvoj.

La slavaj lingvoj influis al la larĝa uzado en Esperanto de verboj en *medialo*. Tie ĉi kiel analogo de formado estas la sufikso **-iĝ-**, kiu respondas al la rusa **-ся** kaj al la bulgara refleksivo **се**.

Inter **la pronomoj** la kontribuo de la slavaj lingvoj estas en la formoj:

<i>Esperanto:</i>	<i>bulgara:</i>	<i>rusa:</i>	
Mi	аз	я	– (sed komparu la bulgaran
Vi	ти ты		dativan formon ми);
Ni	ние мы		
Si	се, си себя, себе		

Menciindas ankaŭ la finaĵo **-i** ĉe *la pronomoj*, kiu koincidas kun:

la bulgara **-и**: **ти, ний, вий**;
kaj la rusa **-ы**: **ты, мы, вы**.

Preskaŭ ĉiuj **bazaj adverboj** en Esperanto estas pruntitaj el apartaj lingvoj, ĉar ili ne posedas internaciecon. El la slavaj lingvoj estas pruntita la mallongigita adverbo:

nepre - ***непремѐнно*** (*rusa kaj bulgara*).

Same kiel en la bulgara kaj la rusa, sed morfologie pli klare, Esperanto distingas ***adverbojn de loko*** kaj ***adverbojn de direkto***:

	<u>Esperanto:</u>	<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>
<u>loko:</u>	<i>Supre</i>	<i>гòре</i>	<i>наверху́</i>
<u>direkto:</u>	<i>supren</i>	<i>нагòре</i>	<i>вверх</i>
<u>loko:</u>	<i>dekstre</i>	<i>дясно</i>	<i>пра̀во</i>
<u>direkto:</u>	<i>dekstren</i>	<i>на̀дясно</i>	<i>на̀пра̀во</i>
<u>loko:</u>	<i>malproksime</i>	<i>далѐче</i>	<i>далекò</i>
<u>direkto:</u>	<i>malproksimen</i>	<i>на̀далѐч</i>	<i>вдаль</i>
<u>loko:</u>	<i>antaŭe</i>	<i>отпрèд</i>	<i>впередì</i>
<u>direkto:</u>	<i>antaŭen</i>	<i>на̀прèд</i>	<i>вперèд</i>

Laŭ la rusa modelo ***домòŭ*** en Esperanto radikigi la adverbo ***hejmen***. Ĝi preskaŭ entute anstataŭis la uzadon de la prepozician kunmetaĵon ***en la hejmon***. Sed estas interese emfazi, ke analogiaj adverboj (*teatren*, *urben*, *ĉambren*) oni uzas escepte, kvankam ilia formado estas laŭregula, ĉar en la rusa mankas simila adverbena formo. Tial ordinaro oni diras:

<i>en la teatron</i>	anstataŭ	<i>teatren</i>
<i>en la urbon;</i>	anstataŭ	<i>urben</i>
<i>en la ĉambron</i>	anstataŭ	<i>ĉambren</i>

La korelativoj estas genie konstruita de Zamenhof perfekta sistemo en la esperanta gramatiko, en kiu videblas ankaŭ la modelo de la slavaj lingvoj. Estas vero, ke ĝi posedas signojn de iuj okcidenteŭropaj lingvoj, sed la plenumo de la malplenaj ĉeloj laŭ la principo de reguleco kondukis ĝin ĝis plena perfekteco:

Demandaj/rilataj korelativoj:

<u>Esperanto:</u>	<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>
<i>kiu</i>	<i>кой</i>	<i>кто</i>
<i>kio</i>	<i>какво</i>	<i>что</i>
<i>kia</i>	<i>какъв</i>	<i>какой</i>
<i>kiam</i>	<i>кога</i>	<i>когда</i>
<i>kiel</i>	<i>как</i>	<i>как</i>
<i>kiom</i>	<i>колко</i>	<i>сколько</i>

Montraj korelativoj:

<u>Esperanto:</u>	<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>
<i>tiu</i>	<i>този</i>	<i>тот</i>
<i>tio</i>	<i>това</i>	<i>то</i>
<i>tia</i>	<i>такъв</i>	<i>такой</i>
<i>tie</i>	<i>там</i>	<i>там</i>
<i>tiam</i>	<i>тогава</i>	<i>тогда</i>
<i>tiel</i>	<i>така</i>	<i>так</i>

Negativaj korelativoj:

<u>Esperanto:</u>	<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>
<i>neniu</i>	<i>никой</i>	<i>никто</i>
<i>nenio</i>	<i>нищо</i>	<i>ничто</i>
<i>nenia</i>	<i>никакъв</i>	<i>никакой</i>
<i>nenie</i>	<i>никъде</i>	<i>нигде</i>
<i>neniam</i>	<i>никога</i>	<i>никогда</i>
<i>neniel</i>	<i>никак</i>	<i>никак</i>

La numeraloj en Esperanto havas altan gradon de internacieco en la latinidaj/ĝermanaj lingvoj, dank' al ilia komuna deveno kaj ekzisto de derivaĵoj, ekzemple: *унификация, квартал, декада*. Tial la kontribuo de la slavaj lingvoj estas sentebla en la formo de preskaŭ ĉiuj simplaj numeraloj. Nur per la modelo de la slavaj lingvoj oni povas klarigi la fakton, ke en Esperanto la dekoj kaj la centoj estas esprimitaj per unu vorto, sed la miloj, la milionoj kaj la miliardoj – per du vortoj:

	<u>Esperanto:</u>	<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>
	<i>kvindek</i>	<i>педесет</i>	<i>пятьдесят</i>
	<i>kvincent</i>	<i>петстотин</i>	<i>пятьсот</i>
<i>sed:</i>	<i>kvin_mil</i>	<i>пет_хиляди</i>	<i>пять_тысяч</i>
	<i>kvin_milionoj</i>	<i>пет_милиона</i>	<i>пять_миллионов</i>
	<i>kvin_miliardoj</i>	<i>пет_милиарда</i>	<i>пять_миллиардов</i>

La prepozicioj kaj **la konjunktioj** havas malaltan gradon de internacieco, kaj en Esperanto ili estas pruntitaj el diversaj lingvoj. El la rusa devenas:

Krom *кромe*

Po *по*

Pri *про* (*sur apogo al la greka peri*)

Je *ей* (*de la esprimo: ей, Богу! – je Dio!*)

Tiu lasta prepozicio **je** montriĝis tiel sukcesa kaj konvena, ke ĝi estis pruntita de Esperanto en iuj postesperantaj planlingvoj: ***Okcidental-Interlingve*** de *Vaal* kaj ***Novial*** de *Jespersen*.

La analizo montras, ke inter **la konjunktioj** en Esperanto ne estas formo simila al la formo de iu slava konjunktio. Tamen laŭ la modeloj en la slavaj lingvoj Esperanto formas la malsimplajn prepoziciojn:

<u>Esperanto:</u>	<u>bulgara:</u>	<u>rusa:</u>
<i>Elsub</i>	<i>изпод</i>	<i>изпод</i>
<i>El post</i>	<i>из-зад</i>	<i>из-за</i>

kaj la derivitajn prepoziciojn:

<i>Kaŭze de</i>	<i>по причина на</i>	<i>по причине</i>
<i>Lige kun</i>	<i>във връзка с</i>	<i>в связи с</i>
<i>Rilate al</i>	<i>по отношение на</i>	<i>по отношению к</i>
<i>Simile al</i>	<i>подобно на</i>	<i>наподобие</i>
<i>Flanke de</i>	<i>от страна на</i>	<i>со стороны</i>
<i>Escepte de</i>	<i>с изключение на</i>	<i>за исключением</i>
<i>Direkte al</i>	<i>по посока на</i>	<i>по направлению к</i>
<i>Dank' al</i>	<i>благодарение на</i>	<i>благодаря ктp.</i>

Leksiko.

Pluraj okcidenteŭropaj esperantologoj opinias, ke la pruntitaj de la slavaj lingvoj vortoj prezentas tre malmultan kvanton en Esperanto. La jam citita *M. Duc Goninaz* konstatas, ke el 2612 radikvortoj en la Universala Vortaro de 1893, nur 30 ŝajnas esti pruntitaj de la rusa kaj pola lingvoj (*profesoroj Zenon Klemensiewicz kaj Mieczyslaw Sygnarski atestas, ke estas pli*). Inter ili estas 13 rusdevenaj:

<i>banto</i>	<i>бант</i>	<i>kruta</i>	<i>крутой</i>
<i>barakti</i>	<i>барахтаться</i>	<i>perre</i>	<i>непрерменно</i>
<i>-eg-</i>	<i>-яга</i> (<i>штормяга</i>)	<i>prava</i>	<i>правый</i>
<i>gladi</i>	<i>гладить</i>		<i>vosto</i> <i>хвост</i>
<i>kartavi</i>	<i>картавить</i>	<i>-ĉj-</i>	<i>-ша</i> (<i>Гриша, Саша</i>)
<i>kreno</i>	<i>хрен</i>)	<i>-nj-</i>	<i>-ня</i> (<i>Соня, Таня, Аня</i>).
<i>krom</i>	<i>кроме</i>		

kaj 5 poldevenaj:

<i>ĉu</i>	<i>czy</i>	<i>ŝelko</i>	<i>piłko</i>	<i>piłka</i>
<i>krado</i>	<i>krata</i>		<i>szelki</i>	
<i>moŝto</i>	<i>jegomość</i>			

Ankoraŭ 12 radikoj estas en ambaŭ slavaj lingvoj:

<i>Esperanto:</i>	<i>pola:</i>	<i>rusa:</i>
<i>bulko</i>	<i>bułka</i>	<i>булка</i>
<i>ĉapo</i>	<i>czapka</i>	<i>шапка</i>
<i>ĉerpi</i>	<i>czepać</i>	<i>черпать</i>
<i>deĵori</i>	<i>dyżurować</i>	<i>дежурить</i>
<i>kaĉo</i>	<i>kasza</i>	<i>каша</i>
<i>klopodi</i>	<i>kłopotać</i>	<i>хлопотать</i>
<i>kolbaso</i>	<i>kielbasa</i>	<i>колбаса</i>
<i>kran</i>	<i>kran</i>	<i>кран</i>
<i>pra-</i>	<i>pra-</i>	<i>пра-</i>
<i>po</i>	<i>po</i>	<i>по</i>
<i>pri</i>	<i>przy</i>	<i>про</i>
<i>svati</i>	<i>swatać</i>	<i>сватать</i>

Al tiuj 30 vortoj *D. B. Gregor* aldonas ankoraŭ du:

<i>celi</i>	<i>celić</i>	<i>целить</i>
<i>ci</i>	<i>ci</i> (<i>de la pola dativo de la pronomo ty</i>)	

Sed la ĝenerala konkludo de *Duc Goninaz* estas, ke la kontribuo de la slavaj lingvoj en Esperanto ne superas la nombron de 1 % el la radikoj en Esperanto. Tamen li kaj aliaj aŭtoroj ne vidas multajn aliajn vortojn, kiuj eniris Esperanton kaj estas komunaj por la plimulto de la hind-eŭropaj lingvoj – la tiel nomataj internaciaj vortoj. En Esperanto eniris ankaŭ vortoj, kiuj fariĝis komunaj por multaj lingvoj en la lastaj jardekoj dank’ al la specifa socialisma evoluado en Rusio:

soveto
sputniko
kolĥozo
perestrojko
glasnosto k. a.

La influo de la slavaj lingvoj en la leksikon de Esperanto estas multe pli granda, ol se tion opinias multaj okcidenteŭropaj esperantologoj, malgraŭ ke oni ne povus diri iun konkretan nombron. Sed komparado de la slavaj lingvoj kun Esperanto montras, ke konsiderinda parto de la vortprovizo en Esperanto kaj en la slavaj lingvoj estas egala aŭ proksima.

Por ilustrati tion, ni prezentas nur malgrandan parton de detala esplorado de la bulgara esperatologo *Marin Bâcev*. Li esploris ekzemple, ke 2222 vortoj en Esperanto havas plenan laŭliteran konformecon kun tiuj en la bulgara lingvo kaj oni povas skribi, prononci kaj kompreni ilin sen ajna traduko:

<i>dinamo</i>	<i>konto</i>	<i>lumbago</i>
<i>fiasko</i>	<i>inkognito</i>	<i>vino</i> kaj aliaj.

Alian grandan grupon da vortoj prezentas bulgaraj substantivoj, al kiuj estas metitaj nur la esperanta finaĵo **-o**:

<i>atomo</i>	<i>dialogo</i>	<i>katodo</i>
<i>betono</i>	<i>fronto</i>	<i>parado</i> kaj aliaj.

En tiun ĉi liston, kiun donas s-ro *M. Bâcev*, ne eniris vortoj, kiuj havas ian devion en la skribado, ekzemple:

<i>arkitekto</i>	<i>barelo</i>	<i>enketo</i>	<i>assembleo</i>
<i>aŭtoro</i>	<i>ĉokolado</i>	<i>faŝismo</i>	<i>teatro</i> kaj similaj.

Sintakso.

En neniu alia sfero de la esperanta gramatiko la kontribuo de la slavaj lingvoj manifestiĝas tiel vaste, kiel en la *sintakso*, ĉar la principo de reguleco bazita sur la logikeco, estas karakteriza al la sintakso en la slavaj lingvoj multe pli ol al la sintakso de la latinidaj kaj la ĝermanaj lingvoj. Tion asertas eĉ Zamenhof mem:

“Iuj esperantistoj opinias, ke mi uzas en miaj verkoj stilon slavan. Tiu opinio estas tute erara. Fakte la slavoj ofte posedas en Esperanto pli bonan stilon ol parolantoj de iuj latinidaj aŭ ĝermanaj lingvoj; sed tio okazas ne ĉar la stilo de Esperanto estas slava, sed nur pro tio, ke la vortordo de la slavaj lingvoj estas pli simpla kaj sekve pli proksima al la vortordo de Esperanto. La vera Esperanto-stilo estas nek slava, nek germana, nek latina, sed nur stilo simpla kaj logika, almenaŭ tian ĝi devas esti”.

Per la terminoj de la moderna lingvistiko, tiuj vortoj de Zamenhof signifas, ke la sintakso de la slavaj lingvoj kaj Esperanto posedas genetikan-tipologian komunecon.

Zamenhof kaj la plimulto de la unuaj aŭtoroj, parolantaj la rusan kaj la polan, kiam verkis en la novan lingvon, ili nature subkonscie transformis la Esperanto-sintakson en similan kopion de la rusa aŭ la pola lingvoj. Tiel estis establitaj la sintaksaj normoj, la “stilo” laŭ la esprimo de Zamenhof, kiuj normoj firmiĝis en la plua uzado de Esperanto.

Fine ni ĵetu koncizan rigardon al la bazaj specifoj de la esperanta sintakso, kiuj parencigas ĝin kun la slavaj lingvoj kaj samtempe ĝin diferencigas de la latinidaj kaj la ĝermanaj lingvoj:

I. Esperanto havas plenan akordon de la *adjektivo* kun la *substantivo* en la frazo laŭ *nombro* kaj *kazo* same kiel en ĉiuj slavaj lingvoj:

Ni renkontis niajn novajn amikojn. (Akordo de akuzativo kaj pluralo).

2. En Esperanto estas libera vortordo de la frazpartoj dank' al la akuzativo, inkluzive de la epiteto kun la klarigata vorto:

a/ *Forta leono kaptis senhelpan antilopon*
b/ *Leono forta antilopon senhelpan kaptis* (la signifo ne
c/ *Antilopon senhelpan kaptis forta leono* ŝanĝiĝas).
ĉ/ *Kaptis antilopon senhelpan leono forta...*

En la donita ekzemplo oni povus fari multajn variantojn de la sama frazo, ŝanĝante la ordon de la vortoj, sen ŝanĝi ĝian signifon. Pro la kazoj en la rusa, pola kaj aliaj slavaj lingvoj, oni same havas relativan liberon en la vortordo, proksima al la esperanta. Tamen en Esperanto per la akuzativo *Zamenhof* atingis perfektan vortordon, kiun ne posedas la okcident-eŭropaj lingvoj.

3. En Esperanto kaj en la slavaj lingvoj estas koincido de la rimedoj por formado de la elementoj de la frazo, kiu difinas la siaspecon de la esperanta sintakso, diference de tiu de la okcident-eŭropaj lingvoj. Dank' al tio praktike oni povas traduki ĉiun korektan slavlingvan frazon en Esperanton, obeante la saman ordon de la frazelementoj. Por ilustriti tion, ni prezentas la jenan mallongan tekston, kiun donas la jam citita konata bulgara esperantologo *M. Băcev*. Ĝi montras la proksiman *simplan kaj logikan stilon*, pri kiu parolas *L. Zamenhof*:

Esperanto estas simpla, klara, belsona kaj facila lingvo. Ĝi estas
Есперанто е прост, ясен, звучен и лесен език. Той е

praktike elprovita, havas internaciajn organizojn kaj posedas
практически изпитан, има международни организации и притежава

riĉan literaturon. En la tuta mondo ekzistas kluboj por
богата литература. В целия свят съществуват клубове за

divstigo de la lingvo kaj la nombro de la esperantistoj kreskas
разпространение на езика и числото на есперантистите расте

de tago al tago.
от ден на ден.

Kiel oni konstatas, la frazojn oni povas traduki laŭvorte de Esperanto en la bulgaran aŭ male sen ŝanĝi la sencon kaj oni konstatas, ke en ambaŭ lingvoj la teksto sonas egale bone.

4. En Esperanto kaj en la slavaj lingvoj forestas inversio en la demandaj frazoj:

a/ *Kiun libron vi tralegis somere? Коя книга прочете през лятото?*
b/ *Kiam okazis la jarkunveno de Когда се проведе годишното*
la Societo? събрание на дружеството?
c/ *Ĉu via aŭto estas nova? Дали вашата кола е нова?*

En la lasta frazo per la demanda vorteto ĉu? oni povas formi demandajn frazojn laŭ la sama maniero kiel en la slavaj lingvoj, ĉar ĝi estas pruntita de la pola demanda vorteto czy?

5. En Esperanto same kiel en la slavaj lingvoj mankas akordo de la tempoj en la subpropozicio de la malsimpla frazo. La verbo en la subpropozicio estas en la sama tempo, en kiu ĝi estus, se tiun subpropozicion oni transformus en memstaran propozicion:

Mi iros tien, de kie vi venis.

Mi vidis, ke li skribas.
Li rakontas al siaj amikoj kion li faros.

6. En Esperanto, same kiel en la slavaj lingvoj, estas ebleco forlasi la montran pronomon **tio**, se estas rilata pronomo **kio** en la subpropozicio:

Mi volas ricevi (**tion**), **kion** ve ne povas doni al mi.
Prenu (**tion**), **kio** estas sur la tabo.

7. En Esperanto kaj en la slavaj lingvoj forestas absolutaj konstruoj el la tipo de absoluta ablativo, kiuj ekzistas en la latina kaj aliaj neslavaj lingvoj.

8. En Esperanto kaj en la slavaj lingvoj oni uzas kazon por signi objektan predikativon:

Mi nomis **lin amiko**. Я назвал **его другом**.
Mi trovas **ŝian decidon bona**. Я нахожу **ее решение добрым**.

9. En Esperanto kaj en la slavaj lingvoj estas uzado de sensubjektaj predikativaj esprimoj en formo de adverboj:

Esperanto:	bulgara:	rusa:
estas necese	необходимо е	необходимо
estas agrable	приятно е	приятно
estas konate	знае се	знайно

Ekz.: **Estas grave**, ke vi memoru **tion**. **Важно е** да помните това. **Важно**, чтобы вы помнили об этом.

La samaj esprimoj estas uzataj kiam la infinitivo estas subjekto:

Fumi estas malutile. **Да се пуши** е вредно. **Курить** вредно.

10. En Esperanto same kiel ekzemple en la rusa estas prefero de konstruo per la negativa vorteto **ne** kun adverba participo, anstataŭ konstruo per la prepozicio **sen**:

Li sidis **ne rigardante** min. Он сидел **не глядя** на меня.

11. Vario de uzado aŭ de indikativo, aŭ de kondicionalo en la subpropozicioj kun konjunkcio **kvazaŭ**, depende de la signifo de tiu vorto:

a/ Oni diras, **kvazaŭ tion faris** li. Говорят, **будто** это сделал он.
b/ Li kondukas tiel, **kvazaŭ tion farus** li. Он ведет себя так, как **будто бы** это сделал он.

12. Vario de uzado de nominativo aŭ akuzativo post la prepozicio **po /no** kun numeralo:

Manĝi **po du pomoj (n)**. Съестъ **по два яблока**.
Manĝi **po kvin pomoj (n)**. Съестъ **по пять яблоков**.

Post ĉio dirita ni povus citi la vortojn de D. Gregor:

“Laŭ sia sintakso Esperanto staras tre proksime al la slavaj lingvoj kaj ĝi povus stari eĉ pli proksime sen malprofiti de sia esenco”.

La farita konciza analizo montras la konsiderindan influon kaj kontribuon de la slavaj lingvoj en ĉiuj partoj de la strukturo de Esperanto: fonetiko, morfologio, vortfarado, leksiko kaj sintakso.

Tiu ĉi analizo tute ne havas celon elĉerpi ĉiujn flankojn de la influo kaj la kontribuo de la slavaj lingvoj en Esperanto.

Nia celo estis konstati, ke la strukturoj de Esperanto kaj de la slavaj lingvoj estas tipologie tre proksimaj.

Fine ni povus plenrajte mirekrii per la vortoj de *D. Gregor*, kiu sincere konfesis: “*Malantaŭ la latina fasado sin kaŝas slava mekanismo*”.

Junio, 2010

Nikola UZUNOV

(Prelego en Karlovo junio 2010)

Prelego

Filozofio dum la instruado de matematiko

Bardhyl Selimi, instruisto de matematiko



Enkonduko

Kiom ajn abstraktaj ja estas filozofio kaj matematiko, estas jam bone sciite ilia granda graveco por la vivo de la homoj kaj socio. La kono de filozofio estas tre necesa por la studentoj, same por instruistoj, ĉar danke al tio ili orientiĝas kaj profundiĝas pli bone en la lernado kaj instruado.

Por la studentoj estas grave scii ĉu la objektoj kaj konceptoj de matematiko ekzistas reale, objektive, aŭ ili estas puraj kreaĵoj kaj inventaĵoj de nia menso; (Leopold Kroneker estas dirinta: Dio kreis la naturajn nombrojn, ĉio cetera estas verkaĵo de la homoj!) ; ĉu ili speguligas akurate la ecojn de tiuj objektoj; kiamaniere ni povas konvinkiĝi pri la praveco kaj vereco de niaj scioj pri ili; kian rolon ludas niaj scioj en nia praktiko de la monda transformiĝo, ktp.



Leopold Kroneker

Ekzemple, ĉu la trianguloj estas veraj, aŭ realaj?

Certe, ni povas vidi objektojn similaj al trianguloj kaj povas akiri sciojn pri iliaj ecoj, surbaze de la matematika logiko. Do, ni perceptas objektojn pri kiuj ni kredas ke estas trianguloj, pro tio ni konkludas pri ilia reala ekzisto. Tamen, kion ni povus diri pri imagita triangulo, kies sumo de anguloj estas ne plu egala al du rektaj anguloj? Tiajn triangulojn ni ne povas vidi kaj trovi dum nia ĉiutaga praktiko, sed, aplikante saman matematikan logikon, ni povas imagi kia estus la mondo se tiaj trianguloj ekzistus. Tial, tiaj trianguloj kvankam ne estas realaj, ili estas veraj kaj la matematika sistemo, bazite sur ili, estas ja bona. Tiaj trianguloj ne ekzistas en la geometrio de Euklido, sed ili ekzistas jam en la geometrio de Riemann.



Janoŝ Bojai

Tion Korzybski⁶ komprenis, kiam li diris ke unu objekto povas esti samtempe ekzistanta kaj neekzistanta, kontraŭstarante la formalan logikon de Aristoklo. Ĉar sammaniere ni povus diri ke la triangulo ekzistas kaj ne ekzistas samtempe.

Kial filozofio gravas por matematiko?

La filozofio gravas por matematiko ĉar ĝi forte influas ankaŭ en ties disvolviĝo. Ni klarigu tion per du ekzemploj:

1. Demokrito⁷ estis la unua sciencisto, utiliginta la ideon pri la malkomponado de la korpoj en maldikajn platetojn, por ke elkalkuli ties volumon. La esenco de la metodo de Demokrito malvaste ligitis kun la ideo (laŭ spuroj de Levkipo⁸) pri la atoma konstruo de la naturaj korpoj.

⁶ Alfred Korzybski, filozofo pola-usona 1879-1950

⁷ Demokrito, 460-370 antaŭ Kristo


⁸ Leucippus, greka filozofo, vivis en kvina jc antaŭ Kristo, iniciatinto de la ideo pri atomo



Demokrito

Li rezonis proksimume tiel:

Ni pruvu unue ke la volumeno de la piramido estas la triono de produkto de sia bazo al la alteco. Poste estas necese pruvi ke du piramidoj je ekvivalentaj surfacaj bazoj kaj altecoj, havas egalajn volumenojn. Tiucele ni tranĉu ambaŭ piramidojn per paralelaj planoj al iliaj bazoj je alteco de unu atomo. La platetoj akiritaj reprezentas proksimume rektajn prizmojn, kaj lokitaj sur ekvivalentaj bazoj, havas egalajn volumenojn. Sed la nombro de tiuj platetoj estas la sama (ĉiam prikonsiderante atomojn), do la sama estos ankaŭ la entuta nombro de atomoj en ambaŭ piramidoj, sekve ankaŭ la sama la volumenoj.



Verŝajne, per simila metodo Demokrito klopodis pruvi la pravecon de la regulo (antaŭe difinita laŭsperte) por la elkalkulo ne nur de la volumeno de piramido, sed ankaŭ de cilindro, konuso kaj sfero, same li klopodis transpasi malfacilaĵojn kiujn ne sukcesis fari Pitagorianoj.

La ideoj de Demokrito instigis la ellaboradon de la proceso de akiro de formulo por la cirkonferenco de la cirklo, pere de enskribado de regulaj pluranguloj je eĝonombro $2n, 2^2n, 2^3n, \dots$. Tiel, Demokrito faris la unuan paŝon en la ellaborado de la Integrala Kalkulo kaj Teorio pri Limesoj, per kies helpo ni povas nun ĉerpi la deziratajn rezultatojn.

La granda matematikisto, Arkimedo⁹, aprezis ege la aktivan flankon de la metodo de Demokrito, li disvolvigis ĝin pluen kaj utiligis en la solvado de vico de problemoj de statiko kaj geometrio.

⁹ Archimedes, 287-212 antaŭ Kristo



Arkimedo

Alie, kondukis al la metodo de Demokrito, Platono, kiu forte kontraŭis la atoman ideon de la monda konstruo. Li eĉ tentis bruligi la verkojn de Demokrito.

2. Ni prikonsideru la faman matematikiston O. L. Koŝi¹⁰. Dum la unua duono de XIX jc, komenciĝis formiĝi la ĝenerala Teorio pri la Limeso, tre esenca por la bazigo de la Matematika Analizo kaj la ellaborado de la metodoj por ties plua disvolviĝo. Surbaze de tiu teorio estis la ideo pri la potenciala infinito, aperanta en du formoj: infinite malgranda granda kaj infinite granda granda.



Koŝi

En la unua kazo, oni prikonsideris la variablon, alproksimiĝanta infinite la nulon. En la dua kazo, oni parolis pri variablo, kiu havas certan valoron je certa momento, sed kun la paso de la tempo, fariĝas ĉiam pli granda je absoluta valoro, pli granda ol kiu ajn pozitiva granda donita antaŭe, kiom ajn granda ĝi estu.

La matematiko renkontiĝas kun la infinito, unue dum la studado de la naturaj nombroj. Ekirpunkto estas la unuo. Aldonante al ĝi unu, ni akiras la nombron du. Farante ankoraŭ plian paŝon, ni akiras la nombron tri kaj tiel plu. Ni supozu ke post kiam ni atingis ĝis certa natura nombro n , aldonos al ĝi plian unu, akirante $n+1$. Tiel, ni ja estigis la abstrakcion de potenciala infinito. Ni prikonsideras ke tiu konstruo, ĉiupaŝe, havas la sekvantan paŝon.

¹⁰ Augustin Louis Cauchy, franca matematikisto, 1789-1857

Aliflanke, B. Bolzano¹¹ estis ideinte ke por klarigi la naturon de kelkaj konceptoj de la Matematika Analizo kaj por la pruvado de kelkaj fundamentaj teroremoj, estas konvene, ke ni baziĝu sur la ideo de aktuala infinito, kies modelon reprezentas senfina aro, “donita”, kun ĉiuj ties elementoj.



Bernhard Bolzano


En multaj problemoj, la aro de la naturaj nombroj $N = \{1, 2, 3, 4, \dots, n, \dots\}$ esploriĝas kiel unu nura tuto, tio signifas oni prikonsideras ke la konstruiĝo de la tuta aro estas jam estigita. Tiel, ni akiras la ideon de la aktuala infinito. La abstraktaĵo de la aktuala infinito estas ja la supozo pri la ebleco de estiĝado de la senfina proceso.

Nun ni montru ke kiam ni konstruas la reelojn, ni esence utiligas la abstraktaĵon de la aktuala infinito. Ni esplori ekz. kiel konstruiĝas la nombro $\sqrt{2}$.

Ni prikonsideru segmenton AB, reprezentanta la diagonalon de kvadrato je eĝo 1. poste ni mezuru la segmenton AB. Tiucele, ni surmetas la segmenton unuo sur ĝin, konstatante ke plurestas parteto ne kovrata de ĝi. Dividinte la segmenton unuo en dek egalajn segmentetojn, ni prenu unu tia segmenteto kaj surmetu ĝin sur la restinta jam parteto de AB. Denove ni konstatos ke plurestas alia malpli granda parteto. Ni dividu la dekonon de la unuo kaj surmetu centonon de la unuo sur la lasta restinta parteto. Denove konstatos ke plurestos io, kompreneble malpli granda. Daŭrigante tiun proceson senfine, ni ricevos la valoron 1. 414213...

Aplikante la operacion de la potenciala infinito, ni prikonsideras ke la konstruado montrita ĉiupaŝe, havas ja sekvantan paŝon, tio estas la proceso povas daŭri senfine. Sed ni ne limiĝas per tio kaj prikonsideras ke, krome, la proceso de mezurado povas estiĝi komplete. Sekve, ni akiros senfinan decimalan frakcion. Tio nomiĝas la nombro $\sqrt{2}$. Ĝi konsideriĝas kiel objekto, kun ĉiuj siaj decimalaj simboloj, entenataj. Pristudinte ĉi nombron, ni pristudas mem la proceson de performiĝo de mezurado de la segmento AB, kio estas la diagonalo de kvadrato je eĝo 1.

¹¹ Bernhard Bolzano, ĉeĥa matematikisto kaj filozofo, 1781-1848



Studante la reelajn, ni prikonsideras jam performite ĉiujn procesojn de la mezurado de tiuj segmentoj. Sed, la matematika analizo kaj la analitika geometrio, baziĝas sur reelaj. Do, surbaze de la klasika matematiko, staras la koncepto de aktuala infinito.

Favore al tiu ideo, estis ja la studoj surkampe de teorio de trigonometriaĵoj kaj ĝeneraliĝo de la koncepto de integralo.

Preter Gauso¹², Koŝi estis granda matematikisto de tiu tempo (la unua duono de XIX jarcento) . Tiel oni ekspektis ke ĝuste li stariĝu ĉekape de tiuj, kiuj ellaborus pluen ĉu la Teorion pri Limesoj, ĉu la ideon pri la aktuala infinito. Envere, ne okazis tiel. Koŝi, kontraŭe, stariĝis kontraŭ la ideo de la aktuala infinito. Kaj tion li faris el filozofia pozicioj!



Karl Gauss

Komence, prave li montris, ke se la aro de la naturaj korpoj estas senfina, aŭ ĉiu el ili povus dividiĝi senfine, tiam la kvanta karakterizaĵo de la aro de ĉiuj objektoj, same tiu de la aro de la partetoj de ĉiu objekto mem, ne povas esprimiĝi per natura nombro. Tiucele, povus servi nur senfina nombro (kiel nun oni diras, kardinala, transfinita) . Sed Koŝi diris ke “estas neeble supozi senfinan nombron de kreitaĵoj aŭ objektoj, ekzistantaj samtempe, ne falante en evidentaj kontraŭdiraĵoj”.

Kie ja vidis Koŝi tiun kontraŭecon de la koncepto de la senfina aro? Ĝuste en tion ke “se ni envicigus la objektojn de la senfina aro kaj nombrus ilin, realigante interkorespondon kun la naturaj nombroj: 1, 2, 3, 4... , ni devus supozi ankaŭ ke tiu ĉi lasta vico estas senfina, kio estas malracia”. Ĉar se la vico de la naturaj nombroj estas senfina, samtiel estas ankaŭ la vico de ties kvadratoj: al kiu ajn n korespondas n^2 kaj inverse. Sed, kiom pli da naturaj nombroj, tiom relative malpli da kvadratoj ekzistas en la segmento $[1, n]$, (ekz. en la segmento $[1, 100]$ jenas la sekvaj kvadratoj 1, 4, 9, 16, 25, 36, 49, 64, 81,

¹² Karl Friedrich Gauss, germana matematikisto, 1777-1855

100, do, entute 10 kaj la kvociento estas 1/10; en la segmento [101, 200] estas 121, 144, 169, 196, do entute 4 kvadratoj kaj la kvociento estas 4/100 aŭ malpli la duono, kaj tiel plu...) .

Do, oni konkludas ke, kiam la vico de la naturaj nombroj etendiĝas senfine, la vico de la kvadratoj konsistigus “neglegtindan malplimulton”. Tial, ĉar ni alvenas en tiu kontraŭdiraĵo, ni devas forlasi la unuan supozon pri la senfino de la naturaj nombroj!”

Koŝi, pro tio, neniam sin okupis per la senfinaj aroj.


La rezonado de Koŝi baziĝas sur malprava identigado de la senfinaj kaj finiaj aroj. Tio dirite de Koŝi ne sufiĉas por pruvi la kontraŭdirecon de la koncepto de la senfina aro, sed nur montras ke tiuj ambaŭ specoj de aroj, posedas ja diversajn ecojn. Ekz. la diraĵo ke “la tuto estas pli granda ol ties parto”, veras por la finiaj aroj, sed tute ne por tiuj senfinaj.

Tiel, se ni imagas senfina nian universon, tiam ni devas imagi tia ankaŭ la aron de la naturaj nombroj, kiu povas interkorespondiĝi inverse al tiu de la steloj.

Estis religiemaj matematikistoj kiuj klopodis fari ĝuste tion: ke la aro de la naturaj nombroj estas finia!? Estis ankaŭ aliaj, klopodintaj pruvi la finiecon kaj limigitecon de la universo per mem la formuloj de Diferenciala kaj Integrala Kalkulo!? (jen unu ideo: kiam ni foriras de ekirpunkto je direkto de la rando de la Universo, niaj paŝoj malgrandiĝas senfine, tiel la senfina sumo de iliaj longoj rezultiĝas finia nombro kiel en kazo de integralo $\int_1^{\infty} \frac{1}{x^2} dx =$ (kie la rapideco estas $v = 1/x^2$ kaj la tempo estas notata per x)

Dum la argumentado de la koncepto de derivaĵo, stariĝis akre, ankaŭ la problemo pri la esenco de “infinite malgranda grado”. Tiel, kiam oni elkalkulis la derivaĵon de la funkcio $y = x^2$, al la variablo x aldonis infinite malgrandan valoron h . Poste, la aldona valoro de la funkcio $(x+h)^2 - x^2$ dividiĝis per la aldona valoro de variablo h kaj la faktoro h reduktiĝis.

$$\frac{(x+h)^2}{x^2} = \frac{2xh + h^2}{h} = 2x + h$$



Microsoft Illustration

Neglektante la grandon h , oni ricevis definitivan rezultaton- la derivaĵon de la funkcio $y = x^2$, kiu ja estas $2x$.

Tiel, la praveco de la neglegto de “infinite malgranda grado” plurestis malklara. Se $h=0$, tiam ne ekzistas mem la proceso de transpaso de x al la najbara punkto, nek ni rajtas reduktiĝi per h . Se $h \neq 0$, tiam h ne povas neglegtiĝi!

Tial, tiu periodo de la evoluo de la kalkulo pri infinite malgrandaj grandoj, konsideriĝis de Markso¹³ kiel ia “mistikaĵo”. La Kalkulo realiĝis kaj donis gravajn rezultatojn, sed ĝiaj logikaj bazoj estis malklaraj.

Dum la XVIII, la malklareco pri la bazoj ekbremis la evoluiĝon de Analizo. En la matematiko, akumuliĝis granda nombro da kontraŭdiraĵoj, paradoksoj, naskiĝintaj, unuavice, en la terorio pri serioj, servantaj kiel potenca armilo por la Analizo. Tiel, dum la studado de serio de la geometria progresio

$$1 - x + x^2 - x^3 + x^4 - \dots = \frac{1}{1+x}$$

se ni metas $x = 1$, rezultiĝos

$$1 - 1 + 1 - 1 + 1 - \dots = \frac{1}{2}$$

Se ni adicios la elementojn de la serio $1 - 1 + 1 - 1 + 1 - \dots$ po duope, ricevos sumon nul $(1-1) + (1-1) + (1-1) + \dots = 0$

Do, sekvas absurdaĵo $\frac{1}{2} = 0$

La akumuliĝintaj kontraŭdiraĵoj klare montris ke la senfinaj serioj ne devas prikonsideriĝi kiel finiaj sumoj. La aferoj pri la infinito demandis pli severan logikan pravigon.

- Dum la XX jarcento, teorio pri aroj, ellaborita de Kantoro¹⁴, je komenco, vekis malfidon kaj malamikecon flanke de pluraj matematikistoj, sed fine de XIX jarcento, ĝin oni ekaplikis vaste en gravaj branĉoj de la matematiko. Tamen, ĝuste tiumomente, kiam la rezultatoj de Kantoro estis definitive agnoskate, oni ekrimarkis paradoksojn ene de ĝi. Pli konkrete:



Georg Cantor

Kiel sciite, la aro konsistas el elementoj. Ĉi elementoj povas esti mem aroj. Ekz. la aro de la studentaj grupoj en kelkiu kurso, havas kiel sian elementon mem la studentan grupon, kiu estas aro de studentoj..

La aro de ĉiuj nombrelaj aroj (tiuj kiuj povas interkorespondiĝi kun la aro de la naturaj nombroj) havas kies sian elementon, la aron de la neparaj nombroj, la aron de raciaj nombroj, la aron de la naturaj nombroj, ktp.

Ĉar la aro kiel elemento, povas enteni diversajn arojn, ni povas starigi demandon: ĉu mem la aro eblas enteni sin kiel elemento?

¹³ Karl Marx, materiista filozofo, 1818-1883

¹⁴ Georg Cantor, germana matematikisto, 1845-1918

La aro de la naturaj nombroj ne estas natura nombro, do ĝi ne entenas sin kiel elemento. La aro de la libroj konsistas el apartaj libroj. Sed mem ĝi ne estas libro, t. e. ĝi ne entenas sin kiel elemento.

La arojn kiuj ne entenas sin kiel elemento, ni nomu **ordinaraj**. Dum tiujn, kiuj entenas sin kiel elemento ni nomu **eksterordinaraj**. El ĉi duaj, kiel ekzemplo povas servi:

1. La aro de ĉiuj aroj. Ni notu ĝin per U . Kompreneble, U entenas sin kiel elemento, ĉar ĝi entenas ĉiujn arojn kaj mem estas ja aro.
2. Ni esploru ĉiujn arojn, kiuj povus formiĝi per aroj de naturaj nombroj $A = \{\{1, 2\}, \{3\}, \{5\}\}$; $B = \{\{1, 2, 5\}, \{9, 15\}\}$; $C = \{\{1, 2\}, \{1, 3, 5\}, \{12, 19, 20\}\}$.

Supozu ke M estas la aro de ĉiuj tiel formiĝantaj aroj. Kompreneble A, B, C estas elementoj de M , t. e. $A \in M, B \in M, C \in M$. Mem la aro M , konforme al la difino, estas aro konsistanta el aroj de la naturaj nombroj. Do, M entenas sin kiel elemento.

3. La aro de la abstraktaj konceptoj estas mem abstrakta koncepto, t. e. ĝi entenas sin kiel elemento.

Ni esploru nun la aron de ĉiuj ordinaraj aroj. Ni notu ĝin per S . La aro S devas esti, ĉu ordinara, ĉu eksterordinara. Ni esploru ambaŭ oportunaĵojn:

a) Ni supozu ke ĝi estas ordinara. Sed, laŭ la difino, S entenas ĉiujn ordinarajn arojn. Tio estas, S entenas sin kiel elemento, do estas eksterordinara! Tio kontraŭas nian supozon!

b) Ni supozu nun ke S estas eksterordinara. Laŭ la difino de tia aro, S entenas sin kiel elemento. Sed elementoj de S estas la ordinaraj aroj. Do, S devas estis ordinara, kio denove kontraŭas la supozon!

Do, S ne povas esti, nek ordinara, nek eksterordinara!

Tio nomiĝas la paradokso de Raselo¹⁵. Tio estas ne nur atributo de la Teorio de la Aroj sed forte ligita ankaŭ al la Logiko.



Bertrand Russell

Antaŭ ol en matematiko oni malkovru antinomiojn, paradoksojn, la matematiko ĝuis grandan fidon kaj prestiĝon. Ĝis tiam, neniu povus kredi ke, respektante la leĝojn de la logiko, povus naskiĝi kontraŭaj propozicioj, asertoj ene de la matematika teorio..

Hilberto¹⁶ klopodis prui nekontraŭdirecon de la apartaj kampoj de la matematiko. Sed tion li ne sukcesis fari, ekz. en la Teorio de la Aroj.

¹⁵ Bertrand Russell, brita filozofa, 1872-1970

¹⁶ David Hilbert, germana matematikisto, 1862-1943

Dialektiko en matematiko¹⁷

Dialektiko subkomprenas la arton de rezonado logika, ĉerpanta la konkludojn ekspluatante la kontraŭdiraĵojn, la aron de la logikaj disputoj, ktp.

La antikva Heraklito diris ke “oni apenaŭ povas eniri dufoje en la sama akvo de la rivero, ĉar ĉi lasta senĉese moviĝas”.



Heraklito

Platono aldonis ke “ĉio fluas senĉese, sendepende de tio perceptita per niaj sensoj”. Dialektiko estis forte evoluita de Sokrato kiu malkovris la verojn per la demandoj plene de kontraŭdirecoj alfrontitaj al siaj kunbabilantoj.

Hodiaŭ la dialektiko kompreniĝas kiel tuto de principooj de la penso kaj rezonado resumiĝintaj en kelkaj leĝoj:

- La leĝo de kontraŭireca karaktero de ĉio enmonde.
- La leĝo de moviĝo kaj ŝanĝiĝo senĉese de ĉio enmonde.
- La leĝo de neado de neado.
- La leĝo de transpaso de kvanto al kvalito.
- La leĝo de progresiva evoluo je formo de helico.

Sendube, la dialektiko estas potenca ĝeneraliĝo de la ordinara formala logiko posedata de homoj kaj uzata de ili dum ĉiutagaj rezonadoj, kie okulfrapas la leĝo pri la ekskludita trio: el du kontraŭaj asertoj pri la sama objekto, en la sama momento, nur unu estas vera, dum la alia estas malvera. Ekz. “Mi estas hejme” kaj “Mi ne estas hejme” estas kontraŭaj asertoj. Nur unu el ili veras.



Manuskripto el 13a jc reprezentanta la kompason kiel simbolo de la Dia forto

¹⁷ Artikolo mia publikigita en la revuo IPR

Sed la formala logiko estas malforta por solvi eksterordinarajn situaciojn kie povus troviĝi la homo. Tial, iu filozofa¹⁸ estas skribinta ke “la formala logiko similas al tiu ĉastema sinjorino ene de la hejmaj muroj, kiu trans tiuj muroj spertas plej mirindajn kaj surprizindajn aventurojn”.

Dialektiko speguliĝas tre bone ankaŭ en la matematiko.

En ĉi lasta, jam en la elementa matematiko, ni renkontas konceptojn kaj operaciojn kontraŭajn, kiel pluso kaj minuso, multipliko kaj divido, potencigo kaj elradikigo, eksponencigo kaj logaritmigo, diferencigo kaj intergrigo, ks.

Se ni perfermas kontraŭajn operaciojn, ni estigas, do, du sinsekvajn neadojn, rezulte ni akiros la inican esprimajon.

Ekz. $\sqrt{a^2} = a$ se $a > 0$, do la dua radiko de la kvadrato donas mem a ;

Inverse $(\sqrt{a})^2 = a$, do la dua potenco de la radiko donas mem a .

La multipliko de du negativaj nombroj donas pozitivan nombron $(-)*(-) = +$.

La inverso de la inverso donas mem la nombron, ekz. $1/(1/a) = a$.

Logaritmo je bazo a de la potenco x de a donas mem x : $\log_a a^x = x$

La potenco de a je eksponento logaritmon je bazo a de x donas mem x : $a^{\log_a x} = x$

Diferencialo de la integralo de la funkcio $f(x)$ donas $f(x)$: $d \int f(x) dx = f(x)$.

Integralo de la diferencialo de $f(x)$ donas denove $f(x)$: $\int d(fx) = f(x)$.

Ĉi supraj ekzemploj atestas pri la ekzercado de la leĝo de neado de la neado.

En sia verko “Dialektiko de la Naturo”¹⁹, Engelso skribas:

“Ŝajnas ke nenio staras sur tiu firma bazo kiom ja la diferenco inter la kvar aritmetikaj operacioj, kiuj estas elementoj de la tuta matematiko. Tamen, ekde inico, la multipliko aperas kiel kurtigita adicio, divido kiel kurtigita substraho de certa kvanto da nombroj- se la divizoro estas frakcio- la divido performiĝas multiplikante per la inversa frakcio.

Dum en algebro, oni iras pluen. Ĉiu substraho $(a - b)$ povas reprezentiĝi kiel adicio $(-b + a)$; ĉiu divido a/b , kiel multipliko $a*(1/b)$.

En la operacioj kun la potencoj, oni faras pluan paŝon. Ĉiuj diferencoj inter la operacioj malaperas, ĉio povas reprezentiĝi je kontraŭa formo. La potenco kiel radiko $(x^2 = \sqrt{x^4})$; la radiko kiel potenco $(\sqrt{x} = x^{1/2})$; unuo, dividite per potenco aŭ per la radiko, povas reprezentiĝi kiel potenco de la denominatoro $(1/\sqrt{x} = x^{-1/2}; 1/x^3 = x^{-3})$.

La multipliko, aŭ la divido de la potencoj de iu grandeco, transformiĝas en adicon aŭ substrahon de iliaj eksponentoj.

Ĉiu nombro povas konsideriĝi kaj reprezentiĝi kiel potenco de alia nombro (logaritmoj, $y = a^x$). Kaj tiu transformiĝo, de iu formo al alia, kontraŭa, estas ne simple banala ludo de la matematiko, sed tre forta levilo de ĝi, sen kiu oni apenaŭ povas estigi kalkulojn, eĉ malpli komplikajn. Provu kelkiu rezigni de matematiko, eĉ de la negativaj kaj frakciaj ties potencoj kaj ekvidos ke li apenaŭ povus iri tre foren. Turnopunkto en la matematiko estis ja la variablo de Dekarto²⁰. Per tio, en la matematiko eniris la moviĝo, do ankaŭ la dialektiko kaj, danke al tio fariĝis necesa la Diferenciala kaj Integrala Kalkulo”

¹⁸ Friedrich Engels

¹⁹ Friedrich Engels, “Dialektika e Naryrës” botim shqip, Tiranë 1973, faqe 306-307

²⁰ Renee Descartes, franca filozofa kaj matematikisto, 1596-1650



Dekarto en la albanaj poŝtmarkoj

Se la matematiko tiel nomata elementa, de la konstantaj grandoj, spegulis pli malpli pale la moviĝon kaj la ŝanĝiĝon, la matematiko de la tri lastaj jarcentoj, la Kalkulo formiĝinta de Njuto²¹ kaj Lajbnico²² spegulis ja ĝin komplete dhe precizze. La ideo de la variabla dependa kaj sendependa, eniris vaste en la matematikon kaj trovis poste sennombrajn aplikojn en la aliaj naturaj kaj sociaj sciencoj kaj en la tekniko.

La koncepto de derivaĵo kiel rapideco de la variaco de la funkcio depende de argumento spegulas ĝuste tiun dialektikon de la kozoj. Samtiel, la konceptoj pri infinite malgrandaj kaj infinite grandaj, limeso ktp.



Gotfrid Lajbnic



Isaak Njuton

Ankaŭ en la matematiko la konceptoj havas sian historian de la naskiĝo, evoluiĝo kaj perfektigiĝo, ĝeneraliĝo. Ni prenu ekz. La koncepton pri la nombro. Inice, ĝi esprimis komunan karakterizaĵon de la diversaj grupoj de objektoj kiuj povus enviciĝi en korespondo unu al unua. Se ni prikonsideras grupojn je tiom da elementoj, kiom la homaj manfingroj, tiam la komuna karakterizaĵo estas la nombro 5 (kvin) . Tiuj je tiom da elementoj kiom la piedoj de la katoj karakteriziĝas per la nombro 4 (kvar) , dum tiuj kiom la piedoj de kokoj de nombro 2 (du) ktp. Ĉi tiuj estis la unuaj nombroj aŭ tiel nomataj naturaj nombroj. Interese, etaj infanoj apenaŭ povas nombri 1, 2, 3, 4, ... sed kutime ili nombras 1, 2, 4,.. ĉar ili malfacile renkontas grupojn el tri objektoj!

La divido de la objektoj en partetojn helpis al la naskiĝo de la ideo pri la frakcioj. Pli poste oni komprenis ke ekzistas ja ankaŭ aliaj nombroj, malpli konkretaj sed pli imageblaj, kiel estis ja la negativaj nombroj. Tio servis por montri, ni diru, la ŝuldon kontraŭ havaĵo, perdojn kontraŭ la profitojn ktp. Intere de ambaŭ ĉi nombroaroj staris la neutrala nulo kiu kune kun la pozitivaj kaj negativaj frakcioj formis la novan etendiĝintan aron de la raciaj nombroj Q.

Kiam matematikistoj renkontiĝis al la raporto de diagonalo de kvadrato al ties eĝo, ili ekkomprenis ke ne temis plu pri frakcia nombro, nek pri segmentoj kunmezureblaj, tio estas, la eĝo de la kvadrato ne eniris fraccian integran kaj decimalan nombron da fojoj al la diagonalo, ni supozu $3 + 2/10 + 3/100 + 5/1000 + \dots$ ĝis kiam rezultiĝu kiel oni diras periodika decimala nombro, ekz. $3.2351777777\dots$ aŭ $3.2351787878\dots$ La nova raporto esprimis nombron je nova speco nomata iracia reprezentanta aron pli

²¹ Issac Newton, angla matematikisto kaj fizikisto, 1642-1727

²² Gottfried Leibniz, germana filozofo kaj matematikisto, 1646-1716

grandan ol tiu racia. Tiel la aro de la nombro denove plivastiĝis nomiĝante aro de “reeloj”. Tiu aro kovris komplete la nombroakson.

Dedekindo²³-i estas doninta trafan eksplikon pri la iraciaj nombroj pere de sia metodo de “tranĉo”.



Riĉard Dedekind

Ni prikonsideru la aron de la raciaj nombroj notata Q

Ni dividu ĝin en du subarojn:

A, kie eniras ĉiuj raciaj nombroj $a \leq 1$ kaj A', kie eniras la nombroj $a > 1$

En A, ekzistas la plej granda nombro kaj tio estas 1, dum en A' ne ekzistas la plej malgranda nombro. (Kial?)

Kaj nun ni dividu la aron Q en du aliajn subarojn:

B, kie eniras ĉiuj raciaj nombroj $a < 1$ kaj B', kie eniras ĉiuj nombroj $a \geq 1$.

Kompreneble ke en B ne ekzistas la plej granda nombro dum en B' ekzistas la plej malgranda nombro, nome 1.

Fine, ni dividu Q en du pliajn subarojn:

C, kie eniras ĉiuj $a^2 < 2$ kaj Ĉ, kie eniras ĉiuj $a^2 > 2$

Ni povas konstati ke ne en C, nek en Ĉ ekzistas, respektive la plej granda kaj plej malgranda racia nombro... (Kial?)

(Envere, en C por ĉiu $a \in C$ ankaŭ $(a + 1/n) \in C$, ĉar $(a + 1/n)^2 < 2$.

Tiucele, sufiĉas ke $a^2 + 2a/n + 1/n^2 < 2$ aŭ $2a/n + 1/n^2 < 2 - a^2$

Aŭ $2a/n + 1/n^2 < 2a/n + 1/n < 2 - a^2$

Aŭ $(2a+1)/n < 2 - a^2$

Aŭ $n > (2a+1)/(2 - a^2) > 0$

Do, ni povas diri ke ne ekzistas tia tranĉo C / Ĉ ke en C ekzistu la plej granda racia elemento kaj en Ĉ ekzistu la plej malgranda racia elemento.

Envere, ni supozu ke ekzistas en C la plej granda elemento, a_0 kaj en Ĉ la plej malgranda elemento, a'_0 , ambaŭ raciaj nombroj.

Danke al la eco de la raciaj nombroj por esti intense ĉie en la nombroakso, ankaŭ inter ambaŭ nombroj menciitaj ekzistos almenaŭ alia nombro c tia ke $a_0 < c < a'_0$.

Ni demandu: kie eniras la nombro c?

Ĝi ne povas eniri en C ĉar tiukaze c estus pli granda ol la plej granda nombro en ĝi, a_0 , sed ĝi ne povas esti ankaŭ en Ĉ, ĉar tiukaze ĝi estus malpli granda ol la plej malpligranda nombro en ĝi, a'_0 .

Laŭ Dedekindo, tiu ĉi tranĉo C / Ĉ difinas neracian nombron nomiĝanta iracia kaj notata per $\sqrt{2}$.

Plue, kiel sciite, la aro de ordigitaj reeloj formas la aron de kompleksaj nombroj, kio estas plia etendiĝo de reelaj nombroj. Tiu proceso daŭras kaj samtempe esprimas ideon de la evoluo je formo de helico sur pli alta ties cirklo.

²³ Richard Dedekind, germana matematikisto, 1831-1916

Nature, oni ekspektis ke la novaj aroj, konservante la ecojn de la inicaj aroj de kie ili ja startis, ekhavu ankaŭ novajn ecojn, tio estas ke la kvantaj ŝanĝoj alportu kvalitajn ŝanĝojn. Tiel estas, por la naturaj nombroj ĉiam havas sencon la operacio de adicio, sed ne tiu de substraho, ĉar ekz. $7 - 10$ donas negativan nombron, ne naturan, kio ne okazas al la aro de la entjeroj Z kaj en la aroj super ĉi lasta. Por la aro Z ne ĉiam havas sencon la operacio de divido, ĉar ne ĉiam ĝi rezultigas entjeron, ekz. $7 : 10$, ks, sed tiu operacio estas sencoplana kiamfoje en la aro de frakciaj nombroj Q . La elradikiĝo ne havas sencon ĉiamfoje en la aro Q kaj R , sed tio ne estas problemo por la aro de la kompleksaj nombroj, ekz. $\sqrt{-3}$ rezultigas ne reelan sed kompleksan nombron.

Samtiel okazas se ni prikonsideras la inican koncepton pri aro mem. La finiaj aroj akceptas la leĝojn de aritmetiko, ekz. la leĝon de interŝanĝo de pozicioj $A + B = B + A$ (komuteco) kaj $A + B > A$ aŭ $A + B < A$, dum la senfinaj aroj subiĝas al aliaj leĝoj. Ĉe ili povas esti ke $A+B = A$. Ekz. ni prikonsieru la aron N de la naturaj nombroj kaj tiun de paraj nombroj. Ambaŭ aroj konsistas el senfina nombro de elementoj, tamen ni ne povas skribi por ili ke $N > P$ se per P ni notas la aron de paraj nombroj, kontraŭe validas la egalaĵo ŝajne absurda $A+B = A$ ĉar ĉiu para nombro estas mem natura nombro.

Similajn konkludojn povas oni akiri komparante la finiaj seriojn kun tiuj senfinaj. Por la senfinaj serioj ne ĉiam aplikeblas la leĝoj validaj por la finiaj serioj kaj konverĝaj senfinaj serioj. Ĉar oni ne ĉiam povas derivi ekz. ilin “unu po unu” aŭ integri “unu po unu”, ktp. Aŭ ilin oni ne povas adicii, enkaze

ekz de dy diverĝaj senfinaj serioj ĉar la rezultato povas esti konverĝa serio $\sum_1^{\infty} 1/n - \sum_1^{\infty} 1/n = 0$; aŭ

diverĝa kiel ĉe $\sum_1^{\infty} 1/n + \sum_1^{00} 1/2n$

Jen kiel eksplikas supre diriton mem Engels en sia verko²⁴

“ La nombro estas la kvanta difinaĵo plej elfiltrita, konata de ni. Sed ĝi estas plene de kvalitaj variaĵoj. (primoj kaj neprimoj, ordinaraj radikoj kaj potencoj) .

La nombro 16, ekz. estas ne nur la sumiĝo de 16 unuoj, sed ankaŭ la kvadrato de 4 kaj dukvadrato de 2. Plue, la primoj donas al la nombroj akiritaj per ili, multiplikite per aliaj nombroj, novajn ecojn, plene difinitaj. : nur la paraj nombroj plendividiĝas per 2; simile okazas ankaŭ por 4 kaj 8.

Por la plendividiĝon per 3 oni uzas la regulon de sumiĝo de ŝifroj. La samo povas diri por 9 kaj por 6, sed kombinite ankaŭ kun la eon de la paroj.

Por la nombro 7 ekzistas memstara leĝo. Sur tiuj ecoj baziĝas la enigmoj kun nombroj, kiuj aspektas al la homoj nekomprenablaj, se ili ne konas deinterne la naturon de la kozoj.


Parolante pri infinite grandan kaj infinite malgrandan grandon, matematiko enigis tian kvalitan ŝanĝon, kiu havas la karakteron de netranspasebla kvalita kontraŭdireco: ni havas ĉi tie kvantojn kiuj diferencas tiom kolosale unu disde la alia, tiom kiom, inter ili ĉesas ĉiu racia interrilato, ĉiu komparo, kaj ili fariĝas nekunmezureblaj je vidpunkto kvanta.

La oridnara nekunmezureblo, ekz. tiu de la cirklo kaj la rekta linio, estas same dialektika kvalita ŝanĝo, sed ĉi tie (en la matematiko de finioj) ĝuste la kvalita distingo de la grandoj de sama speco igas pli substrekinda la kvalitan diferencon ĝis al nekunmezurebleco”.

“Por la homa ordinarula, menso, ŝajnas absurda malmunti, dismeti, certan grandon, ekz. binomom al senfina serio, tio estas al io nedifinita. Sed kion ni farus sen la senfinaj serioj kaj la binoman teoremon?”

²⁴ Samtie

“Geometrio komenciĝas per la malkovro ke la rekta linio kaj kurbo estas absolutaj kontraŭaĵoj, ke rekta linio ne povas esprimiĝi komplete en kurbon kaj kurbo en rektan linion, ke ili estas nekunmezureblaj. Tamen, eĉ la elkalkulado de cirklo apenaŭ povas estiĝi se oni ne esprimas ties perimetron (cirkonferencon) je formo de rektaj linisegmentoj. Sed, en la kazo de kurboj kun asimptotoj, la rekta linio komplete solviĝas al la kurbo kaj kurbo al rekta linio - samtiel kiel solviĝas la ideo pri paralelismo: la liniojn ne paralelas, ili alproksimiĝas senfine unu al la alia, tamen neniam renkontiĝas. La kurba branĉo fariĝas ĉiam pli rekta, ne estiĝante iam ajn komplete rekta, samtiel kiel en la analitika geometrio la rekta linio konsideriĝas kiel kurbo de unua grado je kurbaturo senfine malgranda. Kiom granda estiĝu $(-x)$ -o de la eksponenciala kurbo, y neniam estiĝos = 0.



En la Diferenciala Kalkulo, je fina instanco, ili egaliĝas unu al la alia. En la diferenciala triangulo, kies hipotenuzo estas diferencialo de arko (se oni uzas la metodon de tangentoj) , ĉi hipotenuzo povas akceptiĝi kiel rekta linio, kiu samtempe estas elemento de arko kaj elemento de tangento..”

La apliko de dialektiko dum la instruado

Multaj instruistoj aplikas sukcese dialektikon ankaŭ dum la instruado. Tiel ili ne nur speguligas la dialektikan karakteron de la studobjekto, envorte, sed akiras pli da rezultatoj dum la proceso de lernado, flanke de gelernantoj, de konceptoj kaj metodoj de matematiko. Ni ilustru poioime ĉi tion:

1. La rolo de inversaj interrilatoj dum instruado

Kiam ni demandas la gelernanton kiom estas $2+3$ li skribas la rezultaton 5. Aliflanke, se la gelernanto apartigas 5 al $2+3$ li fakte realigas inversan interrilaton. Samtiel, li transpasas de adicio al substraho ĉe $6+4= 10$ kaj $10-4=6$; de multipliko al divido ĉe $2*6=12$ kaj $12:6 =2$; de rekta teoremo al tiu inversa, kc.

Alia ekzemplo

Trovu $2^5 = ?$

La gelernanto respondas 32. Do $2^5=32$, tio estas unu rilato inter 2, 5, 32.

Sed la instruisto proponas ke li starigu novajn rilatojn inter 2, 5, 32.

Ĉi rilatoj estas ja $\sqrt[5]{32} = 2$ kaj $\log_2 32=5$.

Kompreneble, ĉi rilatoj aspektas pli malfacilaj por li, sed tiel la scioj profundiĝas kaj plifirmiĝas.

Oni estas konstatinta ke preskaŭ duono de la gelernantoj apenaŭ povas difini la valoron de la funkcio kiam estas donite ties grafo, dum kiam estas donite la punktoj ili senprobleme konstruas la grafon. Do, la instruisto devas ekspliki kaj demandi de gelernantoj ambaŭ operaciojn samtempe.

2. Kunfrontiga metodo

La gelernantoj ofte konfandas la kontraŭajn konceptojn kaj operaciojn. Anstataŭ pliiĝo (multipliko) ili malpliiĝas (dividas) . Forminte la ekvacion, surbaze de la kondiĉoj de la problemo, anstataŭ la signo plus ili metas signon minus.

Sed se oni priesploros samtempe la multiplikon kaj dividon, enhave kaj en la kalkuloj kiel ĉe $6 \cdot 3 = 18$ dhe $18 : 6 = 3$; $6 \cdot 4 = 24$ kaj $24 : 6 = 4$ ks. , la gelernantoj, kiam lernus ke $6 \cdot 5 = 30$ tuj poste trovus facile ke $30 : 6 = 5$.

Tio cetere ege ekonomigas la tempon de instruado.

Aŭ ni prikonsideru tiel nomataj **duopajn difinojn**:

a) Nombroj reciproke primaj nomiĝas tiuj nombroj kiuj havas nenian alian divizoron ol nombro 1, ekz (5; 12; 15)

b) Nombroj reciproke ne primaj estas tiuj nombroj kiuj havas komunan divizoron krom 1, ekz (3; 12; 15)

Aŭ, se ni multiplikos (dividos) du potencojn je samaj bazoj, sufiĉas ke ni notu la saman bazon je eksponento sumon (diferencon) de la eksponentoj donitaj.

La proceso de kunfrontiĝo transpasas en kelkaj fazoj:

Unua fazo

La ŝanĝo de formo konservante la numerecajn donitaĵoj de la komponantoj $\frac{3}{5} + \frac{1}{5} = \frac{3+1}{5} = \frac{4}{5}$

kaj $\frac{4}{5} - \frac{1}{5} = \frac{4-1}{5} = \frac{3}{5}$

Aŭ $\frac{3}{7} \cdot 2 = \frac{3 \cdot 2}{7} = \frac{6}{7}$ kaj $\frac{6}{7} : 2 = \frac{3}{7}$

Aŭ $2ab^2 \cdot 8a^3 = 16a^4b^2$
dhe $16a^4b^2 : 1ab^2 = 8a^3$ kaj

Dua fazo

Oni proponas al la gelernantoj performi komence la duan operacion $(24x^3y) : (3xy)$ kaj poste pruvi la rezulton per la unua operacio $(8x^2)(3xy) = 24x^3y$

Tria fazo

La gelernantoj solvas ekzercojn, kie la rektaj kaj inversaj operacioj sekvas, sen certa ordo.

Ĉi metodo de kunfrontiĝo kreas rilatojn ambaŭdirekte, ĉu vertikale (surbaze de ĝeneraliĝo) , ĉu horizontale (surbaze de turniĝo) .

Ekz. studante aparte la multiplikon kaj la dividon de la monomoj, ni havas:

$a^2 a^3 \rightarrow (3a^2) (2a^4) \rightarrow \dots \rightarrow b^6 : b^2 \rightarrow (8b^3c^3) : (2bc) \rightarrow \dots$

dum, per la metodo de kunfrontiĝo, ni havas:

$a^2 a^3 \rightarrow (4a^3) (2ab) \rightarrow \dots$ (ĝeneraliĝo)

$a^5 : a^3 \rightarrow (8a^4) : (4a^3) \rightarrow \dots$ (ĝeneraliĝo, kiam oni donas ilin samtempe, kunfrontiĝo)

Do, enigante la duan operacion samtempe kun la unua, ekz. tuj post kiam oni solvas la ekzercon $(a^2)^3 = a^{2 \cdot 3} = a^6$, la instruisto eksplikas la inversan operacion $\sqrt[3]{a^6} = a^{6:3} = a^2$

Ĉi tie la pruvado anstataŭiĝas per la provo kaj la vereco de la dua operacio rezultiĝas tuj kiel sekvaĵo de juĝado pri la unua operacio.

Oni povas studi samtempe:

En algebro

Adicion kaj substrahon
 Multiplikon kaj dividon
 Potencigon kaj elradikigon
 Fermon en krampoj kaj demeton de krampoj
 Logaritmigon kaj mallogaritmigon (eksponencigon) , ka

En aritmetiko
 Faktorizon kaj ties kontraŭon
 Divenon de la parto de la nombro kiam sciite mem la nombro kaj inverse.
 Problemoj kun reduktiĝo aŭ pliigo de la nombro kelkfoje aŭ je kelkaj unuoj.

En geometrio
 La aro de la punktoj (geometria loko) aŭ la koncepto “karakterizaĵo de figuroj” asimiliĝas pli bone kiam oni studas samtempe la rektajn kaj inversajn teoremojn.

Aparte, en la ĉapitro de la algebraj transformiĝoj, se oni studas ilin memstare, la gelernantoj asimilas ilin pli bone dum pli mallonga tempo (alemaŭ 15% malpli) .

Ĝis nun, oni agas disige: operacioj kun monomoj kaj polinomoj, faktorigo, operacioj kun algebraj frakcioj ks.

Jen la vojo sekvenda ĉi kaze:

$$1. \quad (2a^5)(3a^2) = 6a^7 \text{ dhe } (6a^7) : (3a^2) = 2a^5$$

$$\frac{4a^3}{3a^2} \cdot \frac{10b}{5a^2}; \frac{4a^3}{5b^2}; \frac{a^2}{10b}; \frac{2a}{3b} + \frac{5b}{a^2}; \frac{a^2}{6b} - \frac{3}{4ab}$$

$$2. \quad (a-2b)c = ac - 2bc; ac - 2bc = c(a-2b)$$

$$\frac{ac - 2bc}{c} = \frac{c(a - 2b)}{c} = a - 2b$$

kaj

$$\text{dhe } \frac{ac - 2bc}{a - 2b} = \frac{c(a - 2b)}{a - 2b} = c$$

Samtiel, ĉiuj operacioj kun algebraj frakcioj.

3. La multipliko de la polinomo al polinomo. La faktorigo de polinomo pogrube; ĉiuj operacioj kun algebraj frakcioj kun la koncernaj teoremoj.

4. Formulo de reduktita multipliko de la faktorigo. Ĉiuj operacioj kun la algebraj frakcioj kun la koncernaj teoremoj.

$$(x-2y)(x+2y) = x^2 - 4y^2$$

$$x^2 - 4y^2 = (x-2y)(x+2y)$$

$$\frac{x^2 - 4y^2}{x + 2y} = x - 2y \text{ ka.}$$

Estas do grave kompari la kontraŭajn konceptojn, traktante ilin samtempe:

Rekta kaj inversa teoremo

Rekta kaj kontraŭa teoremo

Rekta funkcio kaj inversa funkcio

(aparte, logaritmia kaj eksponenciala funkcioj, trigonometria funkcio kun inversaj trigonometriaj funkcioj, monotonaj funkcioj kreskaj kaj malkreskaj, nekontraŭdiraj kaj kontraŭdiraj ekvacioj, same komparacioj, inekvacioj) .

La rektaj kaj inversaj problemoj (ekz en trigonometrio: diveno de la angulo laŭ la valoro de ties inversa funkcio) ; en aritmetiko la problemoj je rekta kaj malrekta dependeco, ks.

Oni povas kunfrontigi genrajn aŭ analogajn konceptojn, ekz. ekvaciojn kaj komparaciojn, aritmetikajn kaj geometriajn progresiojn, la samnomajn leĝojn kaj la ecoj de unua kaj dua gradoj (en aritmetiko, ka)

Same oni povas kunfrontigi la fazojn de skribaj laboroj kun la ekzerco, metodojn de solvado, solvaĵon kaj ties provon, solvaĵon kaj konstruaĵon, kompiladon de la ekzerco, grafikan kaj analitikan solvojn, analitikajn kaj sintetikajn metodojn de pruvado de teoremoj, analitikajn kaj sintetikajn metodojn de kompilado de ekvacioj kaj komparacioj, ka.

Ekz. la ekvacio $x = 3$ povas konsideriĝi kiel punkto sur la nombra akso (geometrio de la rekta linio)

Sed ankaŭ kiel vertikala rekto al la nombra akso (geometrio de plano)

Ankaŭ kiel plano vertikale al la akso ox (geometrio de la spaco)

Jen nun paro de problemoj ilustranta la temojn: “La elemento konsistigas la aron” kaj “La elemento ne konsistigas la aron”

Trovu redukteblan frakcion per 3:

Respondo: $3/9$; $9/12$; $15/18$

Trovu neredukteblajn frakciojn per 3

Respondo: $5/10$; $12/16$; $7/21$

Trovu neredukteblajn frakciojn: $1/3$; $7/22$; $5/6$

Aŭ pri la konceptoj “Intersekto de aroj” kaj “Unuiĝo de aroj”

Romboj, kvadratoj, rektanguloj, paralelogramoj.

$K = P \cap R$

$C = R \cup P$ (C ĉiuj romboj kaj paralelogramoj)

La operacio de neado per kunfrontiĝo rezultigas la unuan aserton

A La inica aserto

\bar{A} La nea aserto

$\overline{\bar{A}}$ La nea aserto de \bar{A} rezultigas mem A

La pruvado per jesado kunfrontiĝas al la pruvado per neado

Ekz: estas donite la vera aserto $a=b$

Kiu relacio falsas rilate a kaj b?

Respondo: $a \neq b$

Donite la falsa aserto $x < y$.

Kiu relacio veras rilate x kaj y?

Respondo: $x \geq y$ aŭ $x=y$ kaj $x > y$

La rekta teoremo

La produkto de du paraj nombroj estas para nombro

Pruvo (per jesado)

Estu (2a) la unua para nombro kaj (2b) la dua para nombro. Tiam $(2a)(2b) = 2(2ab)$ do rezultigas denove para nombro. Do, la teoremo estas vera.

La inversa teoremo

Se donite para nombro, tiam ĝi estas produkto de du paraj nombroj.

Pruvo (per neado)

Ni prenu paran nombron ekz 4 kaj ne paran nombron ekz 7. Tiam la produkto $4 \cdot 7 = 28$ rezultiĝas para nombro. Do la teoremo estas falsa.

Se oni donas la ekzercon je formo

$$(\square - 2b)(\square + 2b) = 9a^2 - \square$$

La gelernanto havas vastan kampon por sia kreativa pensado, pli ol kiam li lernas, laŭgrade, je formo $(3a-2b)(3a+2b)$, ktp.

Ekzemploj de la laŭgrada komplikado:

$$2^3 = ; (4/3)^3 = ; (2/3 a^2)^3 = ; (0.5xy^3)^2 =$$

Nun, kio se ni proponus al la gelernantoj tiajn ekzercojn:

$$x^2 = a^4$$

$$x^2 = 9^2$$

$$x^2 = 81$$

$$x^2 = 9^2 a^8$$

$$x^4 = 81a^{12}$$

$$(5a^2)^x = 125a^6$$

Ktp.

Ni esploru la ekvaciojn kiuj reduktiĝas al kvadrataj ekvacioj:

- Ambaŭ radikoj kontentigas la inican ekvacion $\sqrt{4x-3} + \sqrt{6-2x} = 3$ Solvoj estas $x_1=1$ kaj $x_2=3$, ambaŭ estas ja radikoj (pruvu)
- Nur unu el la radikoj kontentigas la inican ekvacion $\sqrt{23-7x} - \sqrt{3x-2} = 1$ Solvoj ĉi tie estas 2 kaj 1, sed nur 2 kontentigas la ekvacion (pruvu)
- Ambaŭ radikoj ne kontentigas la inican ekvacion $\sqrt{6-2x} - \sqrt{4x-3} = 3$

Solvoj ĉi tie estas 1 kaj 3, sed neniu el ili kontentigas la ekvacion (pruvu)

Estas substrekinde ke la gelernantoj devas nepre konatiĝi ankaŭ kun la tria kazo!

Kiam oni studas la valorojn de la dua radiko ni renkontos la jenajn kazojn:

- Al kiu egalas la valoro de la esprimaĵo $\sqrt{a^2 - 6a + 9}$ por $a < 3$?

Respondo: $-(a-3) = 3-a$

- Je kiuj valoroj de la parametro m la egalaĵo estas ĝusta?

$$\sqrt{m^2 - 4m + 4} = m - 2 \quad \text{kaj}$$

$$\text{dhe } \sqrt{m^2 - 4m + 4} = 2 - m$$

Respondo: $m \geq 2$ dhe $m \leq 2$

- Difinu x por $c > 1$ en $\sqrt{x} = 1 - c$

Respondo: Ne ekzistas solvo (Kial?)

Rilate la logaritmojn, ni prezentu pliajn tri kazojn:

- a) Komparu $\log_{0,6}6$ al $\log_{0,6}5$, kiu estas pli granda?
- b) Donite: $\log_{0,6}a$ me $\log_{0,6}b$, kiu estas pli granda: a aŭ b?
- c) Donite: $\log_a5 > \log_a6$, komparu a al 1.

La metodo de la inversaj problemoj

Ekzemploj

- 1) Skribu la vicon de la nombroj tiamaniere: sur la unua pozicio metu kiu ajn nombron; sur la dua pozicio metu nombron akirita de la unua, duobligante ĝin; sur la tria pozicio metu la duan nombron pliigante ĝin per du unuoj, ktp.

Do $a_{2p} = a_{2p-1} * 2$

$a_{2p+1} = a_{2p} + 2$, do ni havos 1; 2; 4; 8; 10; 20; 22; 44;

- 2) Donite 6 elementoj de la vico 4; 7; 21; 24; 72; 75;.... skribu ankoraŭ 2 pliajn ties elementoj.

Problemo

La unuan tagon oni rikoltis 30 ha da semaĵoj.

La duan tagon oni rikoltis dufoje pli.

La trian tagon oni rikoltis 15 ha malpli ol la duan tagon.

Kiom da ha oni rikoltis la trian tagon?

Solvo

- 1) $30 * 2 = 60$
- 2) $60 - 15 = 45$

La inversa problemo

La unuan tagon oni rikoltis certan nombron da ha.

La duan tagon oni rikoltis double pli.

La trian tagon oni rikoltis 15 ha malpli ol la duan tagon aŭ 45 ha.

Kiom da ha oni rikoltis la unuan tagon?

Solvo

- 1) $45 + 15 = 60$
- 2) $60 : 2 = 30$ ha

Skize, ĉi supro povas notati tiel:

$30 \rightarrow 2 \rightarrow 60 \rightarrow 15 \rightarrow 45$

$45 \rightarrow 15 \rightarrow 60 \rightarrow 2 \rightarrow 30$

Aliaj ekzemploj

- 1) Donite la ekvacio de unua grado $5x - 2a = ax - 3$. Difinu la difinan kampon de la parametro a se la ekvacio havas solvon en la intervalo $2 < x < 8$

Respondo: $3, 25 < a < 4, 3$

- 2) En la ekvacio $5x - 2a = ax - 3$ la parametro a varias en la intervalo $3, 25 < a < 4, 3$ Difinu la respektivan kampon de la varieco de la valoro de la radiko.

Respondo: $2 < x < 8$

3) En kiu intervalo devas variu la nombro m por ke ambaŭ la radikoj de la ekvacio $x^2-2mx+m^2-1=0$ troviĝu inter (-2) kaj 4

Respondo: $-3 < m < 5$

4) . Donite la ekvacio $x^2-2mx+m^2-1=0$. En kiuj limoj devas variu la radikoj de la ekvacio se la parametro m varias en la limoj $-3 < m < 5$

Rimarko: en la ekzercoj 1 kaj 2 la Necesa Kondiĉo (NK) kaj la Sufiĉa Kondiĉo (SK) koincidas, dum en la ekzercoj 3 kaj 4 ne (vidu)

5) . Se a^2 ; b^2 ; c^2 formas geometrian progression, tiam la nombroj $1/(b+c)$; $1/(c+a)$; $1/(a+b)$ formas aritmetikan progresion (a, b, c estas pozitivaj)

6) . Se $1/(b+c)$; $1/(c+a)$; $1/(a+b)$ formas aritmetikan progression, tiam a^2 ; b^2 ; c^2 formas geometrian progression.

Teoremo

Cirkla angulo egalas al la duono de la arko kie ĝi kuŝas.

La cirkla arko havas mezuron de la duoblo de la cirkla angulo kie ĝi kuŝas.

Atentu, la unua propozicio estas studata en la lernejo, dum la dua ne. Kial do?

Nedifinitaj problemoj

$$(\square + \square)(\square - 2xy + \square) = \square + \square$$

$$-2xy = (-2)xy \text{ aŭ } (-2x)y \text{ aŭ } (-x)2y \text{ ktp.}$$

$$(2+xy)(4-2xy+x^2y^2) = 8+x^3y^3$$

$$(2x+y)(4x^2-2xy+y^2) = 8x^3+y^3$$

$$(x+2y)(x^2-2xy+4y^2) = x^3+8y^3 \text{ ktp.}$$

Tiaj ekzercoj, notinde helpas al la evoluigo de la kritika pensado. Per ili oni lernas kiel performi la interajn operaciojn, kiel distingi la ĝustan disde la malĝusta, kiel supozu pri la nekonato kaj provu tion surbaze de la kondiĉoj.

La matematika kreativeco

Ni supozu ke ni donu al la gelernanto jenan problemon: aldonu du ŝifrojn al la nombro $35\square\square6$ por ke la nova nombro dividiĝu per 9.

Kiel agas la gelernanto? Li trovas la sumon de la ŝifroj ekzistantaj kio estas $3+5+6=14$. La dividebla nombro per 9 plej proksima al la nombro 14, estas 18, tuj poste 27.

Do $18-14=4$, sed 4 formiĝas el $3+1$; el $2+2$; el $1+3$; el $4+0$. Tiam ni akiros jenajn diversajn solvojn: 35406 ; 35046 ; 35316 ; 35136 ; 35226 . Aldoneblas aliaj solvoj se ni prikonsideros $27-14=13$ kaj tiel plu. Antaŭ la gelernanto malfermiĝas tiameniere vera kreativa laborkampo.

La formiĝo de la problemoj kaj ekzercoj

En la lernejo oni dediĉas ne sufiĉe multe da atento al tiaj ekzercoj:

- 1) Trovu la entjerojn x, y, z tiel kiel ilia plej granda komuna divizoro (PKD) estu 1. Kiom da solvoj ekzistas?

- 2) La plej malgranda komuna multoblo (PKM) de du nombroj estas 12. Montru tiajn nombroparojn. Kiom da ili ekzistas?
- 3) Formu kaj solvu sistemon el du ekvacioj je dua grado je certaj donitaj radikoj.
- 4) Formu problemon solvebla per kvadrata ekvacio, tia ke ĝi havu du donitajn solvojn.
- 5) Solvite logaritmece ekvacio, formu analogan ekvacion je radikoj (-2) kaj (+1).
- 6) Formu komparacion je dua grado je solvoj en la intervalo $3 < x < 5$
- 7) Formu geometrian progresion tian ke la sumo de ties elementoj estu 20, ktp.

Konkludo

La interrilato de matematiko kaj filozofio estas grava ankaŭ por pli sukcesa kaj fruktodona instruado. Tio helpas ne nur en la formiĝo de la scienca mondkoncepto de studentoj sed unuavice en pli firma kaj utila asimilado de mem la konceptoj kaj metodoj matematikaj. Ĉi rilate plej gravas la dialektika metodo.

(prelego en Karlovo junio 2010)

Beletraĵoj

Albana romano “La hunda haŭto”

Fatos Kongoli

Tradukis en Esperanto Tomas Smielik

Ĉapitro 16

16

La vero, kiun Lori malkaŝis al mi, estis banala. Ŝi intencas edziniĝi. Ŝi diris, ke ŝi ne havas alian solvon: ŝi estos la edzino de Sergej aŭ mortigos lin. Dum la tuta vivo li akompanas ŝin kiel ombro, do ŝi povas saviĝi antaŭ li nur tiam, kiam ŝi mortigos lin. Ĉar ŝi ne estas kapabla por tio, nek por alio, ŝi edziniĝos kun li. Lori klarigis, ke la nupto okazos en Sankt-Peterburgo. Tiel deziras la avinjo de Sergej. Kaj ŝi ne estas la vera avino, sed nur kuzino de la patrino, ĉe kiu liaj gepatroj estis loĝantaj dum kelkaj jaroj, maljuna damo el aristokrata familio. Tio gravas por Lori, ŝi estas aristokratino, mi vidis ŝian foton, ankaŭ ŝi konas min laŭ foto. Sergej diris, ke mi tre ekplaĉis al ŝi, kaj la avinjo deziras, ke ni geedziĝu en Rusujo, en preĝejo en Sankt-Peterburgo, kie ŝi havas konatan popon.

Ni sidis ekstere ĉe la tableto. Lori trinkis oranĝsukon. Kaj mi prenis kafon. Ŝi estis belega. En miaj tempioj pulsus sango. Kaj mi sentis la turmenton pro ĵaluzo. Kun granda streĉo mi trankviligis min kaj premiĝis al la apogilo de la seĝo, por kaŝi doloron. Lori komencis paroli pri la detaloj de la nupto, kaj mi ekpensis, ke tio estas puno, al kiu la destino subigis min pro voluptemo.

Ankoraŭ ne estis la fino. Tiu apero de Lori en mia vivo devus esti la plej kruela suferego elektita por mi, se la puno en la infero supozeble ne ekzistas, kaj pro ĉiuj pekoj oni pentas dum la vivo. Konfuzite mi rigardis la Vilaon de Hadeso ĉe la transa stratoflanko, kiam Lori diris ion pri nia realo. Ŝi konfesis, ke mi estas unusola fidinda homo en la mondo. Miaj proksimumoj grandparte forpasis, restis nur kelke da grajnetoj disĵetitaj ĉi tie kaj en aliaj lokoj. Kaj neniam mi ekligis kontakton kun ili. Kaj tiu, kiu povas stariĝi kun mi antaŭ la altaro, estas vi. Bonvolu konsenti pri tio, ĉu vi kredas Dion aŭ ne. Anstataŭ miaj gepatroj veturu kun mi al Sankt-Peterburgo. Ili estos dankemaj tie, kie ili restadas nun.

Mi kroĉis la okulojn al ŝiaj mamoj. Ŝi parolis pri la gepatroj kaj estis kompreneble, ke mia rigardo serĉis la medalionon, kiu kaŝiĝis sub la somera robo, en la kaveto inter la mamoj. Dum momento mi rigardis ĝian ĉeneton kaj la dekolton. Malgraŭ tiu sovaĝa ekscito la bestio ne tremegis, sed dormetis senĉese en iu angulo. La seĝon apud Lori okupis unu virino. Poste la alia. Mi atendis ilin. Liza kaj Dolora venis el la medaliono, por konvinki min, ke mi konsentu pri tio, kion petas ilia filino kaj nepino, kvankam en sonĝoj mi fikas kun ŝi kaj tial nun sentas min kiel hunda merdo. Mi gratulas, knabino, mi respondis ŝajnigante ĝojon, kun mia aktora talento. Kiam Irma ekscios, ke mi veturis kun vi al Sankt-Peterburgo, ŝi tre ĝojos.

Lori etendis la brakojn super la tablo, ŝi kaptis mian manon per fingroj de ambaŭ manoj, kunpremis ĝin kaj diris la ekscitajn vortojn: „Vi estas mia trezoro”.

Nu, kaj okazis. Mi entrudiĝis en strangan aventuron, sed mi ludis ankoraŭ pli strangan rolon. Antaŭe mi ne havis la okazon forveturi eksterlanden. Do, ne estis necese, ke mi akiru la pasporton. Mi ankaŭ ne sciis, kion mi faru, tial mi ekmiris, ke ĉio estis aranĝita tiel rapide. Mi devis havigi nur foton. Ĝi estis kolora, kaj mi prezentiĝis kiel debilo. Poste mi devis porti konfirmilon el la oficejo pri civila stato kaj ankoraŭ iujn dokumentojn, sed mi forgesis, kiujn. Lori donis ĉion al Sergej kaj semajnon poste mia pasporto estis preta, ankaŭ la vizo el la rusa ambasado: ordinara folio - kun la blazono de la soveta imperio - sur kiu estis algluita mia debila foto. Ĝi estis valida por la unufoja enveturo kun dektaga restado. Laŭ klarigo de Lori, mi ne restados dek tagojn. Ni forflugos en la lasta vendredo de la julio per aviadilo de *SWISSAIR*, ni pasigos nokton en Zuriko, kaj la sekvan tagon matene ni daŭrigos la flugon al Sankt-Peterburgo, dimanĉe okazos la nupto, kaj lunde mi revenos en Albanion per aviadilo de la sama kompanio, sed kun tiu diferenco, ke mi ne devos tranokti en Zuriko, kaj ili restos ankoraŭ du semajnojn. Ili aĉetis al mi la bileton por ambaŭ direktoj. Mi ne scias, kiom ĝi kostis, ili pagis ĉion, sed mi supozas, ke per mono el la poŝo de Sergej. Lori ŝajne ne estis tiel riĉa, por kovri la kostojn de mia flugo, kaj ankaŭ pagi unu nokton en zurika hotelo, poste du noktojn en Sankt-Peterburgo kaj ŝanĝi monon - po kvindek dolarojn je ĉiu tago. Ŝi nur montris la absolutan regadon super tiu fortika junulo kaj rusa-albana negocisto.

En la flughaveno Rinas dum la dogankontrolo mi rimarkis ion - mi havas nur la rusan vizon, kaj en mia pasporto estis nenio. Ni dormos unu nokton en Zuriko, do mi devus havi la svisan vizon, por ke mi povu eliri la urbon. Mi ne ĉagreniĝis, sed ankaŭ ne streĉis miajn pensojn, ĉar la juna paro zorgas pri ĉio. Kaj plej grave, mi ankoraŭ ne kutimiĝis al mia rolo.

Kiel gravas la manko de la svisa vizo, mi komprenis en Zuriko. Lori diris, ke kiam mi ricevis la rusan vizon, ili ne havis tempon, por farigi al mi la vizon svisan. Almenaŭ du semajnojn mi estus atendanta, kaj la tempo urĝis, tial mi devos resti en la flughaveno ĝis morgaŭ, kiam tagmeze ni havos aviadilon al Sankt-Peterburgo. Ankaŭ Sergej diris, ke mi ne maltrankviliĝu, ili trovos por mi ĉambron en la hotelo ĉe la flughaveno. Tiam mi komprenis, ke ili volas forlasi min, sed tio ne plaĉis al mi. Ili povus sciigi tion antaŭ la forveturo. Mi ne protestus, ĉar mi ne kondutis tiel antaŭ Lori. Tamen mi volis diri, ke ili starigis min antaŭ la fakto, kaj mi havas nenian solvon. Mi rigardis tra la vitro de la kontraŭa montrofenestro. En ĵinzo, orangkolora ĉemizo kaj blankaj sportŝuoj, kun vojaĝsako sur la ŝultro kaj en basbala ĉapo kun la emblemo de *New York Yankees* sur la kapo, mi similis al birdotimigilo. Sed mi respondis nenion kaj englutis la tutan koleregon. Poste mi diris aliajn vortojn, kiujn mi ne volis aŭdigi. Mi klopodis ŝajnigi eĉ kontenton, ke lasante min sola, ili faras al mi komplezon: mi estas laca, mi bezonos ripozon, kaj ne promenojn...

Sergej kondukis nin tra diversnacia amasego da homoj. Por montri, ke li bone konas la flughavenon, li klarigis la manieron de irado laŭ saĝetoj kaj montriloj, kiuj troviĝis ĉie. Dek minutojn poste, ili antaŭ mi, konsternitaj per brilantaj lumoj kaj montrofenestroj kun luksaj varoj, ni eniris longan halon. Sur la rulŝtuparo ni venis al ĝia fino kaj stariĝis ĉe la tabulo kun la vorto *Dayroom*. Antaŭ la komputoro sidis tie virino en uniforma vesto. Sergej interparolis kun ŝi angle. Li petis ĉambron por mi. Mi vojaĝas tranzite al Sankt-Peterburgo, kaj li petas loĝigi min dum unu nokto. La virino kontrolis miajn dokumentojn, ŝi diris, ke ĉambrojn oni rezervas post la oka vespere, sed tuj poste ŝi skribis mian nomon. Kaj ŝi ne forgesis la prezon - kvardek dolarojn je nokto, se mi pagos en dolaroj. Kiam ni foriris de la giĉeto, Sergej elpoŝigis kvardek dolarojn, kiujn li donis al mi, parolante ke ili jam devas malaperi, kaj morgaŭ ili alvenos ĉi tien, kie ili min lasas. Lori silentiĝis, sed por la adiaŭo ŝi kroĉis al mi kompatan rigardon. Krist, ŝi diris, ne estu kolera. Niaj pakaĵoj flugos rekte al Sankt-Peterburgo.

Mi ne komprenis, kial Lori diris al mi tiajn banalajn vortojn, sed denove mi ŝajnis kontenton. Se perdiĝos niaj pakaĵoj, vi aĉetos por mi novan kostumon en Sankt-Peterburgo. Ili ridetis kaj foriris, kaj mi restis staranta ĉe la vico da foteloj. Mi forlasis ĉi lokon, kiam ili malaperis. Ankoraŭ en la aviadilo mi volis pisi kaj serĉis necesejon. Finfine mi ekvidis la signon *WC*. Mi eniris la necesejon kaj pisis. Kiam mi lavis al mi la manojn, mi rigardis min en la spegulo: sur la kapo mi havis la basbalan ĉapon kun la blazono de *New York Yankee*. Vi estas dupo, mi diris al mia spegulfoto. Dupo kun la novjorka basbala ĉapo, kiu venis pisi en la urbo, kie internaciaj fluglinioj kruciĝas.

Mi forlasis la necesejon. Mi devos pasigi ankoraŭ du horojn ĝis la oka. Mi ekpensis pri Lori. Mi devos trovi ian okupon, por forgesi ŝin. Kun raviĝo de provinculo mi vagadis preter la montrofenestroj kaj vitrinoj. La piedoj kondukis min al la vendejo kun brandoj. Mi tuj eniris same rapide, kiel iom pli frue mi eliris la necesejon. Mi aĉetis botelon da viskio *Ballantine's*. De tie mi venis al la bufedejo, kiu estis ĉirkaŭbarita per dika ornamoŝnuro. Mi aĉetis sandviĉon. Kun la sandviĉo en la mano kaj kun la vojaĝsako sur la ŝultro, en kiun mi ĵetis la botelon da viskio, mi reiris al *Dayroom*. Preter mi ruliĝis amaso de japanaj turistoj. Gvidantino parolis ion laŭte en ilia lingvo. Kaj kiam la japanaj turistoj foriris, en miaj oreloj denove tondris funebraj sonoj de trumpeto. Kun la sandviĉo en la mano kaj kun la vojaĝsako sur la ŝultro mi iris sur la marmora ŝtuparo malsupren en la longan halon. De tie, kie mi staras, mi ne vidis la tabulon kun la vorto *Dayroom*, sed mi estis certa, ke ĝi troviĝas en la fino. Sur la rulŝtuparo mi venos tien post kvin minutoj, do restos ankoraŭ sesdek minutoj kun tiuj funebraj sonoj en miaj oreloj. Du junaj nigruloj donis al mi la ideon, kiel mi liberiĝu de trumpetado. Ili dormis sur la foteloj ĉe la muro. Mi iris kelkajn paŝojn al fotelo. Mi jam formanĝis duonon de la sandviĉo. La alian duonon mi ĵetis en la rubujon apude. Mi sidiĝis kaj elprenis la botelon el la vojaĝsako. Mi trinkis kelkajn glutojn da viskio. La funebraj sonoj de trumpeto ne plu aŭdiĝis. Sed antaŭ la okuloj mi havis la vizaĝon de Lori. Ĝis la oka mi fortrinkis trionon de la viskio. Kun la restaĵo mi iris al la ĉambro en la hotelo.

Ĝi estis mallarĝa, preskaŭ malplena. Sen fenestro. Kun unu lito. Unu seĝo. Lavabo kaj spegulo pendanta super ĝi. Kaj kopio de iu kubista bildo. En la ĉambro estis malmulte da aero, kaj tra mia kapo flugis pensoj pri suicido. Tiam atakis min ankaŭ la funebraj sonoj de trumpeto kaj la vidaĵo de la nudaj korpoj de Lori kaj Sergej, kunplektitaj en ĉirkaŭpreno. Mi aŭdis ĝemojn de Lori, sed ankaŭ spiregon de Sergej. Mi volis draŝi la muron per la kapo. Mi verŝis fojfoje viskion en la gorĝon.

Ili venis tien, kie mi restis staranta - ĉe la foteloj proksime al *Dayroom*. Mi devis forlasi la hotelĉambron je la oka matene. Kiam mi vekigis, mi vidis, ke mi kuŝas vestita en la lito, kaj la viskio-botelo ruliĝas sur la planko. Dumnokte krom la turmentaj sonĝoj pri la fikanta juna paro, en mia kapo bolis pensoj pri doktoro N. T. Mi pensis, ke li sidas apud mia lito, kiel dum nokta gardado ĉe mortinto. Mi ne povis ekscii, kial mi mortis, ĉar ne eblis ajna kontakto. Mi eĉ ne demandis, pro kio li venis ĉi tien, al la perfekte fermita loko por kruciĝantaj internaciaj fluglinioj, ĉar mi venis - kiel jam dirite - por iom pisi. Kaj ĉefe por feki. En tiuj puraj, bonodoraj necesejoj agrabla estis ne nur la pisado, sed ankaŭ la fekado. Dume li kaŝigis malantaŭ la barikado de la provoka silento, se li povus diri almenaŭ unu vorton, mi komprenus, kiu li estas, kaj la tuta ludo finiĝus, sed li intencas ĉesigi nenion, li volas taŭzi miajn nervojn.

Rigardante iliajn vizaĝojn mi vidis, ke ili dormis malbone. Aŭ ili pasigis la nokton sen dormo. Pro fikado. Montris tion la falantaj palpebroj de Lori. Poste mi ekpensis, ke antaŭ la fino de la vojaĝo mi frenezigis, se mi ne bridos la ĵaluzon. Ĝis la flugofino mi klopodis endormiĝi. Kaj mi estis dormanta. Mi vekigis poste, kiam la aviadilo surteriĝis en Sankt-Peterburgo, kaj Lori frapetis mian brakon. Mi ekstaris kaj marŝis post ili kiel ĝentila japana turistino, kun la vojaĝsako sur la ŝultro kaj en la basbala ĉapo kun la blazono de *New York Yankee* sur la kapo. Kaj tiam komenciĝis por mi du semajnoj de la rusa aventuro.

En la flughaveno atendis nin amiko de Sergej. Mi memoras eĉ la nomon: Valerij Zajcev. Fortika junulo kun mallonge pritonditaj haroj, kiel ĉe hodiaŭaj gardistoj. Li estis la unua ruso, kun kiu mi renkontiĝis kaj pene interŝanĝis kelkajn vortojn en mia lerneja rusa lingvo, ne uzata de multaj jaroj.

Antaŭ ol ni atingis la hotelon, Valerij promene veturigis nin tra la urbo, kaj Sergej, kiu sidis post mi, tradukis liajn vortojn. Lori ne konas la rusan, kaj mi komprenis almenaŭ kelkajn vortojn. Mi havis pli kaj pli bonan humoron, ĉar mi komprenis iomete en la rusa lingvo. Mi imagis, ke mi estas unusola homo, proksima al Lori. Sed mia bona humoro baldaŭ perdiĝis.

De tempo al tempo mi pensas, ke mi perdis bonan humoron, kiun mi retrovis en la komenco de mia rusa vojaĝo, ĉar aperis iu monumento. Tio okazis, kiam ni veturis tra vasta placo, kiel ĉiuj placoj en tiu lando. La ĉielo estis kovrita per nuboj kaj pluvetis. La aŭto haltis ĉe ample, tuj poste ĝi veturis antaŭen, kaj mi ekvidis grandegan statuon. De malproksime, tra pluveto, ŝajnis al mi, ke estas la monumento, kiu troviĝis iam en Tirana, sur la placo de Skanderberg, apud la Historia Muzeo. Mi miris, kial ĝi staras ĉi tie. Mi ekpensis, ke poste, kiam oni faligis ĝin kaj postiris sur la stratoj, ĝi forkuris kiel multaj statuoj, alvenis ĉi tien kaj haltis en ĉi tiu loko. Mia suspekto

montriĝis falsa. Antaŭ la okuloj leviĝis alia monumento kun statuo de Vladimir Iljiĉ Lenin. Mi volis demandi al Valerij, kiel okazis, ĉu la statuo estis iam faligita, kaj poste oni remetis ĝin sur la soklon aŭ homoj neniam volis faligi ĝin. Mi rezignis. Ĉi tiu demando estus senseca. Kaj provoka.

Sed mi pensas ofte, ke mi ne perdis bonan humoron pro la monumento. Kaj ĝia apero estis nek surpriza, nek atendata. Mian humoron aĉigis io pli banala, kio okazis poste, kiam ni venis al la hotelo. Denove ili starigis min antaŭ la malagrable fakto, kiel en Zuriko, ĉar ili ne prenos ĉambrojn tie kaj lasos nur min. Estis kompreneble, ke ili ne loĝos en la hotelo, sed por mi devus esti granda honoro, mi dormos oportune en kvieta ĉambro. Sed mi denove perdis bonan humoron.

Ili venos al mi sekvatage. Ili petis, ke mi atendu ĉirkaŭ la dekdua en la halo kaj de tie ni iros al la nupto en la preĝejo. Sergej diris, ke en libera tempo mi iom promenu sur Nevskij Prospekt. Se mi perdiĝos, mi demandu iun pasanton nur per la vortoj „Nevskij Prospekt”, kaj li certe helpos min. Kaj revenante, eĉ se mi forgesos la nomon de la hotelo, sufiĉos memori, ke ĝi troviĝas ĉe la transa flanko de la placo, antaŭ la stacidomo. Sergej klarigis ankoraŭ ion, sed mi lasis ĉi vortojn preter miaj oreloj. Kiam ili foriris, mi restis en la marmora halo, kun mia valizo ĉe la piedoj kaj kun la vojaĝsako sur la ŝultro. Kaj kun rigardo de la okuloj de Lori en mia koro. Ekregis min nekomprenbla timo, ŝajnis al mi, ke mi revidos ŝin neniam.

Sensence mi komplikis ĉion, kaj vere estos simple. Morgaŭ Lori edziniĝos, kaj mi veturos per lifto al la sepa etaĝo, al la ĉambro kun kvar ciferoj skribitaj sur folio en la akceptejo. Baldaŭ oni revenigis min al la realo, kiam la lifto haltis sur la unua etaĝo. Eniris knabino. Ŝi premis la butonon „sep”, la pordo fermiĝis, kaj ni veturis supren. La knabino apogis sin al la kontraŭa muro. Ŝi estis alta blondulino, havis diskombitajn harojn, bluajn okulojn kaj dikajn lipojn kun malhelruĝa ŝminko. Mi rigardis ŝin malkviete. Kaj mia rigardo estis tuj kaptita per ŝiaj okuloj, la knabino ridetis. Sed mi ne reagis. Almenaŭ pro afableco mi reciproku la rideton. Pensoj konfuziĝis en mia kapo, kaj mi ne povis reagi. Ŝi mallevis la okulojn senĉese ridetante, kvazaŭ mi estus invitita, por atente rigardi ŝin. Ĝis kiam la lifto venos al la sepa etaĝo. Tie la pordo malfermiĝis, la knabino rigardis min denove, kun la sama rideto, sed nun ŝi kvazaŭ volus demandi min, ĉu ŝi plaĉas al mi.

Mi iris post ŝi. Putino, mi ekpensis. Kaj estis al mi malagrable, ke tiel belega knabino estas putino. Konfuzite mi haltis meze de la salonego, kie finiĝis kelkaj koridoroj. Aperis virino en uniforma kostumo, nigra jupo kaj blanka somerbluzo kun mallongaj manikoj. Mi montris la folion el la akceptejo. Ŝi kondukis min al la tablo, ĉe kiu sidis du virinoj antaŭ la komputoroj. Ankaŭ ĉi tie mi montris la folion, kaj ili montris la vojon: en longa, kurbiĝanta koridoro, kun palruĝa tapiŝo sur la planko. Ambaŭflanke etendiĝis vico da pordoj kun kvar ciferoj. Post kurbiĝo de la koridoro denove estis tablo, ĉe kiu sidis aliaj du virinoj. Unu estis juna, ankoraŭ juna, pli-malpli tridekjara. Ŝi nomiĝis Raisa. La nomon de ŝia koleginino, iom pli aĝa, mi ne memoras.

La folion mi donis al Raisa. Ŝia vizaĝo estis fidinda: la kvieta, homa vizaĝo. Tuj poste mi vidis en ŝi heroinon de la klasika rusa literaturo. Ŝajne mi rigardis tro fikse, ĉar ŝi demandis, ĉu mi fartas bone. Mi komprenis, kion ŝi diris. Mi ruĝiĝis. Kaj mi volis diri, ke ŝia vizaĝo estas konata, ke ŝi rememorigas heroinon de la klasika rusa literaturo. Unuafoje mi venis al Rusujo kaj estas al mi tre malagrable, se mia rigardo ĝenis ŝin, kaj se okazis tiel, mi petas ŝian pardonon. Sed ĉio estis pli komplika. Mi ne povis esprimi miajn pensojn en la rusa lingvo, do restis al mi nur silento. Tamen ŝi rigardis min per la nigraj, saĝaj okuloj. Mi vidis, ke ŝi ankaŭ ruĝiĝas. Laŭ mia nomo skribita sur la folio ŝi divenis, ke mi estas fremdulo. Poste ŝi metis ĝin en la faketon, el kiu ŝi elprenis kaj donis la ŝlosilon kroĉitan al la peza, latuna disko kun ĉambro-numero. Ŝi klarigis al mi ion, kion mi ne komprenis. Mi respondis en la fuŝa rusa lingvo: „Bonvolu paroli, sinjorino, pli malrapide”. Ŝi ekparolis pli malrapide, ke mia ĉambro troviĝas en la fino de la koridoro. Matenmanĝon mi ricevos ĝin la naŭa en la teretaĝo. Se mi bezonos ion, mi povas elekti la telefonan numeron 09. Fine ŝi deziris al mi agrablan restadon.

Mi respondis *Bolŝoje spasibo* kaj iris al la fino de la koridoro, kie troviĝas mia ĉambro. Ĝi havis tre altan plafonon, ankaŭ la fenestro estis alta. Kvankam ĝi estis larĝe malfermita, interne estis sufoka varmego. Senĉese turmentis min la penso: kiun heroinon de la klasika rusa literaturo rememorigis al mi la vizaĝo de la juna virino kaj kial mi serĉas analogion? Mi malfermis la valizon. Poste mi elprenis la kostumon, per kiu mi estos vestita dum la nupto de Irma, kaj mi pendigis ĝin sur arko. La samon mi faris pri du ĉemizoj kaj du jakoj. Mi elprenis el la vojaĝsako miajn ilojn por razado kaj portis en la banejon. Mi devus rekoni, ke Raisa similas aktorinon el malnovaj

rusaj filmoj, mi diris, kiam mi banis min. Tamen ŝi estis simila al neniuj aktorino. Ŝi rememorigis literaturan figuron.

Duonhoron poste mi eliris la banejon. Mi enlitiĝis kaj ŝaltis televidilon. En la sola programo mi vidis pornofilmon, sed malklare. Mi ekpensis pri la blondulino el la lifto kaj mi ne scias, ĉu mi eliris la ĉambron, por trovi la knabinon el la lifto, ĉar ardigis min tiu pornofilmo aŭ por iom promeni sur Nevskij Prospekt.

La unua vizaĝo, kiun mi ekvidis tuj poste, kiam mi forlasis la ĉambron, estis la vizaĝo de Raisa. Ŝi sidis ĉe la tablo kun la komputoro. Mi donis al ŝi la ŝlosilon. Ĉifoje ŝi ne demandis, ĉu mi fartas bone. Ŝi ridetis. Kaj mi aŭdigis vortojn, kiujn mi rememoris kun peno, kiam mi estis en la ĉambro, elpakis miajn vestaĵojn kaj banis min. Mi diris, ke ŝi estas simila al iu, kiun mi konas. Ŝi komprenis kaj skuis la kapon. Mi foriris en la longa koridoro kun multaj kurbiĝoj kaj kun la palruĝa tapiŝo sur la planko. La blondulinon mi ne vidis en la koridoro, nek en la lifto, nek en la halo. Mi ŝanĝis kvardek dolarojn al rubloj, mi forlasis la hotelon kaj ekiris malrapide, ĝis kiam mi venis al Nevskij Prospekt. Neniam mi estis ĉi tie kaj samtempe al mi ŝajnis, ke mi konas la lokon. El la pramalnova tempo, kiam en la kinejoj de Tirana estis prezentata la filmo *Blankaj noktoj* laŭ la romano de Fjodor Dostojevskij. Tiam mi admiris Olegon Strijenovon, stelulon de la sovetia kino. Li ludis en la filmo la rolon de Revanto. Kaj la filmo estis kolora - unu el la plej fruaj kolorfilmoj, kiujn mi vidis en la vivo, kaj ĝi finiĝis per la sceno en nebulo, sur ponto ĉe Nevskij Prospekt.

Mi iris rapide sur la malseka trotuaro. Antaŭ mi devus troviĝi la ponto el tiu filmo, kie la ĉefrolulo atendis renkonton kun sia amatino. Mi ne memoras la intrigon, ĉar mi ne tralegis ĉi tiun romanon. Ĝi ne estis tradukita al la albana lingvo, same kiel preskaŭ ĉiuj verkoj de Dostojevskij, ĉar oni malpermesis tradukadon. De fore mi vidis la ponton kaj dubis pri la propra memoro. La ponto, kiu leviĝis, estis granda. Mi apogis la manojn sur la metala balustrado kaj rigardis en la akvon de la rivero Nevo. Kiam mi estis observanta ŝipon kun turistoj, mi tremis pro vespera malvarmo, mi rigardis iom antaŭen, al la fino de la ponto. Tie, sur la alta soklo, troviĝis aro da bronzaĵaj skulptaĵoj - altaj kiel plenkreska homo: viro kun la aspekto de Apolono tenis bridon de baŭmanta ĉevalo. Probable estis Apolono mem aŭ alia mitologia figuro. Mi demandis, kiu li estas, sed li ne respondis. Anstataŭ la respondo mi orekaptis flustron kaj en tiu flustro mi aŭdis la nomon Netoĉka. Netoĉka Nezvanova. Eŭreko, mi vokis en penso. La vizaĝo de la juna akceptistino rememorigas al mi Netoĉkan Nezvanovan. Kompreneble mi vidis ŝin neniam, ĉar ŝi estis heroino de la samtitola rakonto de Dostojevskij. Mi tralegis ĝin, kiam mi estis kun Delina, kaj ŝi pruntadis al mi franclingvajn librojn. Jen la unusola verketo de Dostojevskij, kiun mi tralegis en tiu ĉi tempo, nur poste mi ekkonis aliajn verkojn - kiel oni diras: pli bonas malfrue ol neniam.

Mi ne scias, kial mi ekpensis pri tiu simileco. Kial el amaso da rusaj verkoj mi elektis ĝuste tiun ĉi? La majstro estis laboranta pri la rakonto, kiam li estis arestita, kaj poste kondamnita al morto, oni starigis lin antaŭ la ekzekuta plotono kaj nur en la lasta momento venis la ordono de la caro, kiu nuligis la mortopunon. Dostojevskij neniam reskribis la rakonton, kion mi treege bedaŭris kaj estis malĝoja. La saman malĝojon mi sentis nun, kiam mi rigardis la bronzan figuron, similan al Apolono, kiu tenas bridon de la grandega, baŭmanta ĉevalo. Netoĉka Nezvanova restis en miaj pensoj kiel violona koncerto. En la tempo kun Delina, kiam mi estis leganta ĉi rakonton, senĉese mi aŭdis sonojn de violono - la doloriga kaj magia violono el la rakonto. Ĝi similis la violonon de mia patro.

Mi foriris de tie, ĉar mi sentis, ke mi volas esplori. Morgaŭ mi kondukos Lorion al la altaro kaj mi dubas nun. Pri tio, kion mi serĉas sur la ponto, pri la simileco inter la juna akceptistino el la hotelo kaj la fama heroino el la verko de Dostojevskij. Sed tiu imagita simileco estas nur ludo de mia cerbo. Ambaŭ virinoj havas nenion komunan. Sed kiam mi revenis al la hotelo kaj stariĝis antaŭ ŝi, prenonte la ŝlosilon de mia ĉambro, mi faris strangan demandon. Mi demandis, ĉu ŝi nomiĝas Netoĉka.

Rapide mi vespermanĝis en la memserva bufedejo. Mi fortrinkis du glasetojn da vodko. Mi kunprenis botelon kun tri kvaronlitroj da vodko *Smirnoff*, kiun mi aĉetis en vendejo proksime al la hotelo. Kiam per lifto mi veturis al la sepa etaĝo, ripetigis la sama okazaĵo, kiel posttagmeze. Alia knabino, ankaŭ kun blondaj haroj, same bela kaj alloga, veturis supren, kun la sama provoka rideto. Mi reciprokis la rideton, ne sciante, ĉu por ŝi estos afabla gesto aŭ signo, ke mi akceptas ŝian inviton. Kiam ni eliris la lifton, ŝi haltis kvazaŭ atende. Unuafoje mi renkontiĝis kun putino kaj faris nenion. Se mi estus invitinta ŝin, kaj ŝi volus min viziti, mi devus paradi antaŭ la

skribotablo, ĉe kiu sidas Netoĉka. Estus malnoblaĵo, perfido antaŭ ŝi. Hezitante mi kuraĝigis la knabinon el la lifto, kaj ŝi rapide diris ion, kion mi ne komprenis. Mi forsaltis en paniko, kvazaŭ ŝi ne estus juna kaj bela knabino, sed tigrino, kiu volas disŝiri min en pecojn. Mi paŝis haste en la longa koridoro kun multaj kurbiĝoj, kaj mi venis al la skribotablo, ĉe kiu sidis la akceptistinoj de la sepa etaĝo. Kaj mi tuj prezentis strangan demandon al la juna virino, ĉu ŝi nomiĝas Netoĉka. Ŝi ekmiris, skuante la ŝultrojn. Kaj ŝia kolegino, fortika blondulino, ekridis. Ne, sinjoro, respondis Netoĉka, donante al mi la ŝlosilon, mi nomiĝas Raisa.

Kun la sono de ĉi tiu nomo en miaj oreloj, mi iris al la fino de la koridoro. Ie mi aŭdis ĝin. Kiam mi turnis la ŝlosilon en la seruro, mi rememoris. Tiel nomiĝis la edzino de Gorbaĉov. Sed tuj poste mi rememoris, ke ŝi mortis je kancero. Kaj mi ekpensis pri Marga. Mi volis plori. Kun lumo mi ŝaltis la televidilon. Same kiel antaŭ kelkaj horoj, mi vidis pornofilmojn en la sola programo. La fenestro estis malfermita, sed la ĉambro eniris peza aero. Mi trinkis gluton da vodko el la botelo kaj proksimiĝis al la fenestro, sed mi ne povis fermi ĝin. Mi verŝis vodkon en glason sur la tablo, mi enlitiĝis kaj komencis trinki. Kaj rigardi iun pornofilmon. Poste mi ekpensis, ke mi jam ne trinku pli multe da vodko, dum la nupto de Lori mi devos plej bone ludi tiun rolon, kiun mi akceptis. Do, nun mi remetis la glason, elŝaltu la televidilon kaj endormiĝu. Mi faris nenion. Venis la momento, kiam mi ne povis elteni la streĉon. Aŭ mi melkos la kacon, aŭ mi trovos alian solvon. La masturbo estus praktika. Rapide mi ŝprucigos ĉuron kaj povos ekdormi. Sed komenciĝis zorgoj. Mi ne estis certa, ke mi endormiĝos poste. Ĉar la masturbo vekis miajn pensojn pri suicido.

Tiam mi levis aŭskultilon kaj diskis la numeron 09. Mi petos, ke ili sendu al mi iun knabinon el la lifto. La hotelo estas plena de tiaj knabinoj, kaj la numero 09 devus helpi. Ĉe la alia flanko mi aŭdis la voĉon, kiun mi tuj rekonis. Iom senpacience mi ripetis la vorton „halo”. Timante, ke ŝi remetos la aŭskultilon, mi provis elpensi ion rapide. Sufiĉos, ke mi ekparolu, kaj ŝi tenos la aŭskultilon ĉe la orelo. Mi diris la kvarcifera numeron de mia ĉambro kaj klarigis, ke mi havas la difektitan fenestron. Ĉe la alia flanko oni remetis la aŭskultilon. Ŝi devus rekoni min pro la fuŝa prononco en la rusa lingvo. Spiregante mi eksidis ĉe la telefono. Ĉirkaŭ dek minutojn poste mi orekaptis frapadon. Ŝi haltis sursojle en nigra-blanka uniformo. Mi petas vian pardonon, sinjorino, mi diris, sed mi ne povas fermi la ĉambro-fenestron. Kaj mi deŝoviĝis, por ke ŝi iru preter mi en la mallarĝan koridoreton.

Ŝia rigardo tuj kroĉiĝis al la televidilo. Mi forgesis elŝalti ĝin aŭ ŝanĝi la programon, kaj ŝi vidis sur la ekrano porno-scenojn. Rapide mi elŝaltis la televidilon, kaj ŝi ekridis. Ŝia rido ne estis miriga, kaj mi ankaŭ ne ekmiris, ke ŝi rigardis la botelon da *Smirnoff* sur la tablo. Via vodko estas tre luksa, ŝi diris, kaj ŝiaj vortoj tute surprizis min. Mi aĉetis ĝin en la vendejo, proksime al la hotelo, mi respondis. Mi volis ankoraŭ diri, ke mi proponas glaseton da vodko, se ŝi ne ofendiĝos. Sed estis tro malfacile esprimi la inviton, kaj tial mi diris simple, ke mi regalos ŝin per vodko. Ŝi akceptis la regalon. Mi plenigis ŝian glaseton kun la sama rapideco, kiel mi elŝaltis la televidilon. Mi verŝis ankaŭ por mi. Kaj mi diris *na zdorovje*, poste ni kuntintigis la glasetojn.

Ŝi trinkis gluton kaj iris al la fenestro, por vidi la difekton. Pli-malpli mi komprenis tion, kion ŝi diris. Oni ne povas fermi la fenestron, estas al ŝi malagrabla, ŝi lasos notaĵon, por ke ĝi estu morgaŭ riparita. Sed tio ne plu interesis min, estis nur la preteksto, kiun ŝi malkovris per la virina intuicio. Se vi havas aliajn dezirojn, sinjoro, bonvolu diri, kaj mi estas preta helpi al vi.

Denove mi enprofundiĝis en komplikajn pensojn pri la simileco de la knabino al Netoĉka Nezvanova. Pri la simileco, kiun mi serĉegis freneze nur tial, ke mi estas en Rusujo. Kaj eble mia vizio pri Rusujo estis imago pri la beleco de la rusaj virinoj. Ĝuste unu staras nun antaŭ mi kaj ŝajnas belega. Mi volis diri al Netoĉka kun la nomo Raisa, ke ne gravas, ĉu ŝi estas Netoĉka de Dostojevskij aŭ Raisa el la akceptejo sur la etaĝo. Ŝi estas rusino, kaj mi sentas pasion. Se mi konus vortojn, mi povus diri tion, sed denove malhelpis la lingva baro. Rigardante en ŝiajn brilantajn okulojn, mi diris nur ion banalan, fremdan al ĉio, kion mi sentis. Mi diris, ke mi bezonas knabinon ĉi-nokte.

Ŝi rigardis la duone malfermitan pardonon. Se vi bezonas, sinjoro, knabinon, tio estas aranĝebla. Sufiĉos, ke vi priskribu, kion vi deziras, kaj ni povos sendi al vi knabinon laŭ via deziro... Ŝi parolis mallaŭte. Kaj mi sekvis la vortojn de la virino kiel hundo, kiu rapidege kaptas ĵetitan oston. Elektante ĝustajn vortojn, mi komprenigis tion, kion mi pensas: unu el ĉi tiaj knabinoj, pri kiuj ŝi parolas, mi ne bezonas. Hodiaŭ mi tre malĝojas kaj estus por mi

granda plezuro, se ŝi povus akompani min. Ŝi estas belega kaj mi sentus min feliĉa, se ni povus kune pasigi ĉi vesperon.

Mi esprimis miajn pensojn per la fuŝaj, ridindaj vortoj en mia rusa lingvo, sed Netoĉka ne ekridis. Ŝi demandis tre serioze, ĉu mi vere opinias, ke ŝi estas bela. Kiam mi ripetis, ŝi dankis. Kaj poste ŝi konfesis, ke mi ankaŭ plaĉas al ŝi. Kaj ŝi estas preta resti kun mi du horojn, sed... La vorteton „sed” mi orelkaptis kvazaŭ tra nebulo. Ĝi estis malgrava. Gravas nur ke ŝi estas preta resti kun mi du horojn vespere. Kaj tio ŝajnis al mi prudenta, ke ŝi trovu koleginon por la deĵoro, se ŝi intencas veni por du horoj en mia ĉambro. Tiu devos gardi ŝin je ĉia okazo. Kaj estos necese pagi kvindek dolarojn. Tuj mi elpoŝigis la dolarojn. Mi donis al ŝi ankaŭ rublojn kaj petis, ke ŝi aĉetu bieron kaj ankoraŭ ion por trinki. Ŝi kunprenis la monon per fingroj kaj eliris.

Post duonhoro ŝi revenis. Mi scias precize, ĉar kiam ŝi eliris el la ĉambro, mi rigardis pojnhorloĝon. Kiam mi aŭdis frapadon, mi jam perdis la esperon, ke ŝi revenos. Kaj dum la timoplena atendado mi ĉagreniĝis pro la penso, ke ŝi estas sama kiel tiuj knabinoj el la lifto. Eĉ pli malbona, ĉar ŝi trompas kun fridaj sentoj. Tamen ŝi reaparis. Kvazaŭ risorte mi saltis sur la piedojn kaj kiam ŝi haltis en la pordo, mi ekpensis, ke mi vere enamiĝis al ŝi. Kaj ŝi estis pli sperta, forŝovis min kaj eniris kun plastsako en la mano.

Ŝi estis ankoraŭ vestita per tiu nigra jupo kaj blanka somerbluzo kun mallongaj manikoj. La plastsakon kun boteloj da biero ŝi metis sur la tablon. Tra mia kapo flugis penso, ke mi kunŝovu dikajn kurtenojn en la fenestro, kvankam la plej proksima konstruaĵo - stacidomo - estis pli malalta kaj troviĝis ĉe la transa flanko de la vastega placo. Per ambaŭ manoj mi kaptis la vizaĝon de la knabino kaj rigardis en ŝiajn okulojn. Ankaŭ ŝi rigardis min. Mi ne estis certa, kiel mi komprenu ŝian rigardon, mi trovis en ĝi nenion. Mi tenis la vizaĝon per la manoj, kun bolantaj pensoj en mia kapo kaj kun dezirego je sovaĝa volupto. Delonge mi ne fikis virinon kaj mi ekscitiĝis tre forte. Sed la rigardo de ŝiaj okuloj kiel du nigraj olivoj - ĉiam mi imagis, ke la rusinoj havas blujajn okulojn - estis nepenetrebla. Mi kliniĝis. Ne al ŝia buŝo, sed al la orelo. Kaj mi flustris: Netoĉka, se vi ne volas, vi povas foriri, ne estos al mi malagrabla. Denove, malgraŭ la fuŝaj vortoj en mia rusa lingvo, ŝi komprenis min. Mi ne nomiĝas Netoĉka, ŝi respondis, mia nomo estas Raisa. Kaj mi ĝojas esti ĉi tie.

Ŝi stariĝis sur la piedfingrojn kaj kisis min. Poste ŝi disbutonis ĉemizon kaj karesis mian bruston per fingroj. Kun raviĝo ŝi diris, ke mi estas riĉa. Kaj pasis longa momento, antaŭ ol mi komprenis, ke ŝi pensas pri la harkovrita brusto. Ŝi plu esploris mian korpon. Ŝi disbutonis ĵinzan pantalonon kaj deŝovis zipon, poste ŝi kaptis la kacon. Kaj malrapide, ke mi komprenu ŝiajn vortojn, ŝi murmuris per la sufokita voĉo: respektinda viro havas arĝenton sur la kapo, oron en la monujo kaj ŝtalon inter la kruroj. Vi havas ĉion, ne timu.

Ŝi eraris almenaŭ pri oro en la monujo, sed mi vere ne timis. Mi deŝovis la ĵinzan pantalonon. Baldaŭ mi estis nuda. Raisa ŝanceliĝis kvazaŭ ebria, kiam mi demetis vestopecojn de ŝia korpo. Tuj poste ŝi ĉirkaŭprenis mian kolon. Mi eksentis sur la brusto premon de la karnodikaj, rondaj mamoj. Kiam mi posttiris ŝin al la lito, ŝi elglitis el miaj brakoj. Kaj ŝi serĉegis ion en la vesto, poste ŝi alproksimiĝis, ridetis, enlitiĝis kaj posttiris min. Mi kuŝiĝis sur ŝi. Mi eksentis tuŝon de ŝiaj fingroj sur la korpo, malsupre, ĉe mia kaco, kaj mi komprenis, kial ŝi forlasis min antaŭ momento: ŝi prenis kondomon. Ŝiaj fingroj lertege surtiris ĝin sur la kacon. Estis por mi io nova. Mi dronigis la vizaĝon en ŝiajn harojn, kaj tuj ĉirkaŭblovis min kvazaŭ vaporo el varmega saŭno, tra kiu mi vidis nenion, mi aŭdis nur muĝon. Estis spiroj de la knabino, ŝia voĉo, kiu eĥiĝis tra mia orelo. Ŝi alprenis min forte per la brakoj, kaj cedante al la ritmaj movoj de mia kaco, ŝi flustris: *ja ĥoĉu tebjja, ja ĥoĉu tebjja, ja ĥoĉu tebjja...* Mi ne povis longe elteni ŝiajn flustroj. Mia kaco eksplodis, kaj ĉuro disverŝiĝis kaj ĉirkaŭblovis min tiu varmega saŭno-vaporo.

Ŝi malfermis la okulojn. Sengene ŝi etendis la manon kaj deŝovis la kondomon de mia kaco, kiu ankoraŭ ne imagis, ke ĝia forto elĉerpiĝis. La penso, ke mi renkontiĝu kun ŝi morgaŭ en kafejo ĉe Nevskij Prospekt, flugis tra mia kapo, kiam ŝi leviĝis de la lito kaj mi vidis, ke ŝi iras al la banejo, tenante la kondomon per fingroj. Poste ni trinkis samtempe vodkon kaj bieron. Kiam ni fortrinkis la bieron, ni ankoraŭfoje enlitiĝis. Por ke mia kaco estu rigida, kaj ŝiaj fingroj povu lerte surtiri kondomon, Raisa trovis la saman manieron, kiun antaŭ jaroj mi praktikis kun Faika. Poste ŝi prenis duŝon. Estis la noktomezo. Antaŭ ol foriri, ŝi alŝovis al mi vangon por kiso. Tiam mi proponis, ke ni renkontiĝu. Ŝi akceptis la proponon. Ŝi diris, ke ŝi estas kortuŝita, kaj ni fiksis la rendevuon por

mateno, je la deka, meze de la ponto super la rivero Nevo. Mi eĉ ne supozis, ke la sekvan tagon tiu bona humoro, kiun al mi havigis Raisa, estos rompita per la plej absurda evento en mia vivo.

Mi vekigis preskaŭ feliĉa, kiam sonoris la telefono. Parolis al mi la belega rusino, kun kiu mi fikis. Ni ankoraŭfoje fiksas la rendezuon meze de la ponto super la rivero Nevo, kaj poste ni trinkos kafon ie ĉe Nevskij Prospekt, kaj ne estis io ajn, sed grava kaŭzo, por ke dimanĉe matene mi havu bonan humoron. Tre atente mi razis min, prenis duŝon kaj surmetis jakon kaj kravaton. Mi volis iri dece vestita al la nupto de Lori.

Raisa ne venis al la renkontiĝo. Neniom mi eksciis la kaŭzon - ĉu tial, ke ŝi ŝanĝis la decidon, aŭ pro tio, kio estis al mi okazinta. Mi dubis, ĉu ŝi aperos, kiam la montriloj de mia pojnohorloĝo haltis duonon antaŭ la deka. La tago estis malserena, en ĉiu momento devus komenciĝi pluvo, sed mi atendis observante ŝipojn sur la rivero. Kiam mi staris apogita al la balustrado de la ponto, mi eksentis tuŝon sur mia ŝultro. Ne estis Raisa, sed du civiluloj. Junaj. Unu haste svingis antaŭ mia nazo iun dokumenton, kiun mi nek vidis, nek komprenis, kio ĝi estas. Mi divenis nur ke tiu, kiu montris sian legitimilon, postulas, ke mi iru kun ili, kaj mi ne rezistis. Ili ŝajnis afablaj, mi faris tion, kion ili ordonis. Proksime al la ponto, ĉe Apolono sur la ĉevalo, atendis ilia aŭto. Mi maltrankviliĝis, kiam ili petis, ke mi eksidu kun ili. Sed denove mi obeis. Mi okupis la sidlokon malantaŭe, apude etendiĝis la alia viro, kaj tiu, kiu montris sian legitimilon, eksidis antaŭe, ĉe la stirorado. Mi pensis, ke certe estas iu miskompreno. Mi venis al Sankt-Peterburgo unuafoje, neniun mi konas ĉi tie. Kaj je la dekdua mi devos atendi en la halo de mia hotelo. Mi volis diri al la sekretpolicistoj, ke ili almenaŭ klarigu, kion ili volas de mi. Sed tial ke mi ne trovis la ĝustajn vortojn aŭ pro tio, ke la aŭto ekveturis, mi diris nenion.

Ni veturis dek kvin minutojn sur malseka asfalto, en largaj stratoj. Mi memoras, ke la aŭtomobilo ruliĝis tra la placo, sur kiu troviĝis la monumento kun Lenin kaj io tentis min, ke mi prezentu al la junaj funkciuloj la saman demandon, kiun mi volis fari al Valerij unu tagon pli frue - sed facile mi ekregis ĉi tenton. La situacio estis malagraba, mi ne scias, kiu estas ambaŭ civiluloj, kien ili veturigas min kaj kion ili volas de mi. Mi eksciis nenion ankaŭ tiam, kiam ni haltis ĉe iu konstruaĵo, mi forlasis kun ili la aŭton kaj eniris tien, kaj por la fino ili enfermis min en ĉambro sur la teretaĝo, ili restigis min sen vorto de klarigo, kaj tiam mi vere ektimis, mi komencis iradi de muro al muro.

Mia pacienco elĉerpiĝis, kiam la montriloj de mia pojnohorloĝo montris duonon post la dekunua, kaj neniun interesiĝis pri mi. Se okazos tiel, certe mi ne atendos tagmeze en la halo de mia hotelo. Mi devos ion fari, ĉar mi ne estos ĉe la nupto de Lori. Mi proksimiĝis al la pordo kaj pugnofrapis ĝin. Ĉar min doloris la mano, mi piedbatis ĝin. De transe venis neniun respondo. Ankoraŭfoje mi pugnofrapis kaj piedbatis la pordon - kaj denove silento. Tomba silento. Mi sidis en la ĉambro kun alta plafono - sama kiel en la hotelo, sed ĉi tie estis fenestreto, tra kiu enfalis lumo, sed tra kiu mi ne povus rigardi, eĉ se mi stariĝus sur la seĝo. Estis neniun seĝo, kaj nur tri malnovaj, malpuraj foteloj ĉe la tablo meze. Mi sidiĝis sur fotelon kaj ĉirkaŭprenis la kapon per miaj brakoj, provante kompreni, kio okazas.

Ĉirkaŭ la unua posttagmeze mi aŭdis paŝojn kaj voĉojn. Sed estis al mi indiferente, kiu venos kaj kion li diros. Mi sidis sur la fotelo, kiam la pordo malfermiĝis kaj eniris du viroj kun novaj vizaĝoj. Unu okupis la fotelon apude. Li klarigis, ke li devos prezenti al mi nur kelkajn demandojn. Tia estis la senco de liaj vortoj, post kiuj mi furioziĝis. Kaj mi ne plu bridis min, kiam li diris „Sinjoro Dupek!”, tordante mian nomon, kiel iam oficiro dum tiuj devigaj ekzercoj en la militista tendaro. Mi respondos neniun demandon, eĉ se mi estus falonta kadavre en Sankt-Peterburgo. Mi volis kriegi al ili en la vizaĝon, ke la tuta maskerado estas aresto sen kaŭzo. Mi estas fremdulo, albana civitano, kaj mi respondos nur tiam, kiam ili sciigos mian ambasadoron pri la okazinta. Krome mi ne nomiĝas Dupek. Mia nomo estas Tupek, Tuupek!!! Mi ne aŭdigis la patosan deklaraĵon kaj subiĝis. Mi tute ne estis certa, ĉu la ambasadoro zorgos pri mia sorto. Kaj ankaŭ ne gravas, kiel ili prononcu mian nomon. Mi diris nur ke mi ne komprenas ruse. Kiel dresita papago mi ripetis kelkfoje la frazon: „Mi ne komprenas ruse”.

Ili rigardis unu la alian. Tiu staranta ripetis ĉion angle. Mi supozas, ke estis la samaj vortoj, ĉar mi vere ne komprenis, kion li parolas al mi. Denove mi respondis papage, ke mi ne konas la anglan. Kiam ili demandis, en kiu lingvo ni povus interparoli, mi diris: nur albane. Poste mi aldonis: kaj france.

Ili foriris. La ulo, kiu tordis mian nomon, revenis duonhoron poste en akompano de nova viro. Same kiel antaŭ duonhoro, li okupis la fotelon apude. La novulo tradukis. Mi vidis nur tiun junulon kun blujaj okuloj, kaj li

parolis flue la francan. Ĉifoje la demandanto ripetis, ke estas nur formalaĵo, nenio pli. Li komencis per la demando pri la celo de mia vizito al Sankt-Peterburgo. Mi respondis, ke oni arestis min kaj tial mi ne povas digne plenumi la taskon, pro kiu mi alvenis - kiel atestanto ĉe nupto. Tordante mian nomon ĉiufoje, kiam li demandis, li volis ekscii multajn detalojn: kiam mi forveturis el Albanio, per aviadilo de kiu flugkompanio mi vojaĝis, kiam mi intencas reveni, kiu estas mia profesio, pri kio mi okupiĝas en mia lando, kaj li venis al du lastaj demandoj. Antaŭ ol demandi li elpoŝigis pasporton. Surprizite mi ekvidis, ke ĝi estas mia pasporto. Antaŭ unu tago mi lasis ĝin en la akceptejo de la hotelo. Kun mia pasporto en la mano, li faris la demandon: de kiom longe mi konas Sergejon Duka, kiu estas la duobla, rusa-albana civitano, kaj ties albanan amikinson Lori Morava, kaj kiaj rilatoj ligas min kun ili.

Unuafoje, de kiam li komencis pridemandadon, li rigardis en miajn okulojn. Li diris la nomojn de Sergej kaj Lori. Mi divenis, ke la okazaĵo ial koncernas ilin. Sed ĝis kiam li havas mian pasporton, la aferoj tute ne prezentiĝas bone.

Li ridetis, kaj mi ĝuste komprenis tiun signifoplenan rideton. Certe li scias multe pli ol mi pensis. Sundube li eksciis, kiel mi pasigis la nokton en la hotelĉambro. Kaj ankaŭ ĉiujn sekretojn, kiujn mi diris al Raisa, kiam ni trinkis vodkon kun biero. Pro subita konfesemo la ebria knabino rakontis pri sia vivo: tre juna ŝi edziniĝis, poste ŝi divorcis kaj havas okjaran filinon. Kiam ŝi demandis, pri kio mi okupiĝas, ankaŭ mi konfesis sincere, ke mi estas kvazaŭ verkisto, mi havas kvar eldonitajn librojn. Kaj ankaŭ scenaristo - kun dek du filmoj laŭ miaj scenaroj. Por diri la veron, ili estas fuŝaj, mi scias bone, nek miaj libroj, nek la scenaroj valoras eĉ groŝon. Tamen la knabino raviĝis. Eble ŝi komprenis malbone la vortojn „kvazaŭ” kaj „groŝo”. Unuafoje mi havas la okazon kuŝi kun verkisto kaj scenaristo en la sama persono. Kaj denove ni fikis.

Tamen la policisto diris la nomojn de Sergej kaj Lori. Estis sufiĉe, ke mi cerbumu pri tio, kion li ankoraŭ scias? Certe al ili okazis io malbona? Sed vane mi provis ekscii. Kaj li respondis nenion. Li aŭdigis sian lastan demandon, ĉu mi memoras, kun kiu ili renkontiĝis dum tiu nokto en Zuriko. Mi diris, ke dum tiu nokto mi ne forlasis la zurikan flughavenon. Kion li povas facile kontroli, ĉar en mia pasporto ne troviĝas la svisa vizo. Li ekridis. Leviĝis, redonis al mi la pasporton. Kaj diris: „Bonan vojaĝon, sinjoro Dupek!”

Ili lasis min tie, de kie ili forprenis min, ĉe la ponto super Nevo kaj antaŭ la monumento kun Apolono. Estis la kvara posttagmeze kaj denove ekpluvis. Mi iris tra la ponto. Mi apogis min al la malseka balustrado kaj komencis gapi al pluvogutoj sur la akvo de la rivero. Antaŭ la okuloj mi havis la vizaĝon de Lori. Kaj tiam rompiĝis miaj nervoj: mi ekploris. Kaj eble la pluva kurteno falis sur la vidaĵon. Mi volis salti super la balustrado kaj ĵetegi min kun la kapo malsupren, en profundon, kaj fini ĉion. Sed mi ekiris antaŭen. Mi trenis la piedojn sur Nevskij Prospekt, ankoraŭ malkapabla kolekti pensojn. Ho, kiaj ravaj fasadoj! Kial ĝis nun mi ne vidis, kiel mirinda estas Sankt-Peterburgo: aristokrato en malnova frako, vaganta tra stratoj.

Denove antaŭ la okuloj mi havis la vizaĝon de Lori. Mi demandis min, kio vere okazis al ili? Mi ektimegis. La piedoj kondukis min rekte al la vendejo, kie hieraŭ mi aĉetis botelon kun tri kvaronlitroj da *Smirnoff*. Mi ne memoras, ĉu mi fortrinkis kun Raisa la tutan vodkon. Mi ne pasigos sen vodko tiujn horojn ĝis mia forveturo. Mi ne povis kviete pensi, nek klarigi la situacion, en kiu mi estas. Nek decidi, kion mi faru, sola en ĉi tiu urbo kvazaŭ el sonĝo. Do, mi aĉetis novan botelon, sed kiam mi revenis vespere al la ĉambro, mi vidis, ke en la hieraŭa botelo restis iom da vodko - je du-tri fingroj.

Mi verŝis la restaĵon en la glason kaj ekpensis, ke mi devos morgaŭ alveni la flughavenon akurate. Mi eĉ ne memoras la horon de mia flugo. Mi trovis la biletan. Mia aviadilo estos matene, kvaronon post la sepa. Kun la bileto en la mano mi forlasis la ĉambro kaj ekiris al la akceptejo sur la etaĝo. Se Raisa estus tie sidanta, mi konsiliĝus kun ŝi kaj petus, ke ŝi akompanu min vespere. Mi bezonegis ŝian akompanion kaj ne gravas la sumo, kiun mi pagu al la koleĝino deĵoranta anstataŭ ŝi. Tamen Raisa ne sidis tie, ŝi havis liberan tagon. Mi demandis novulinon en la akceptejo. Ŝi diris, ke mi devos per taksio forveturi de la hotelo plej malfrue je la kvina. Ili promesis aranĝi la taksion kaj vekti min tiam, kiam mi deziros. Mi petis, ke ŝi veku min duonhoron antaŭ la kvina. Dum mi estis iranta al la ĉambro, mi ekpensis, ke hodiaŭ vespere mi devos meti ĉion en la valizon, kaj matene mi havos tempon por razi min kaj duŝi.

Funebraj sonoj de trumpeto denove turmentis min vespere. Kiel mortinto mi kuŝis rigida en la lito, klopodante endormiĝi - estis la sola maniero por forgesi. Certe mi povus ekdormi, sed ne forgesi. Antaŭ la okuloj mi havis la vizaĝon de Lori. Turmentis min la kulposento, mi riproĉis al mi, ke mi gardis ŝin malbone, kaj mi eĉ ne scias, kie ŝi estas nun. Mi malfermis la okulojn en la momento, kiam mi aŭdis ŝin voki, ke mi helpu al ŝi, ĉar oni malliberigis ŝin en la Vilao de la Ogrinoj - kaj mi vekiĝis malseka de ŝvito.

Noktomeze mi jam fortrinkis preskaŭ duonon de la vodko el tiu nova botelo. La trumpeto daŭrigis sian funebran kanton ie en la anguletoj de mia cerbo. Mi ŝaltis la televidilon kaj serĉegis per zapilo tiun programon kun pornofilmoj. La funebraj sonoj miksiĝantaj kun volupta fikado malbridis en mi la sopiron je virina akompano. Ĉar sola mi frezeziĝos. Savon mi trovis per la telefono. Mi levis aŭskultilon, diskis la numeron 09 kaj aŭdis „halo”. Tuj mi diris klare la kvarcifera numeron de mia ĉambro kaj ankaŭ per la klara voĉo mi petis, ke ili sendu al mi knabinon. Ĉe la alia flanko oni remetis la aŭskultilon. Mi bedaŭris tion, kion mi faris, tuj poste, kiam la konekto estis rompita. Mi foriris de la telefono esperante, ke post la dua nokte ili rekonos ĉi peton kiel malbonan ŝercon de ebrulo.

Dek kvin minutojn poste, kiam mi estis certa, ke oni akceptis mian peton kiel malbonan ŝercon, mi aŭdis frapadon. Mi starigis la glason sur la tablon kaj iris malfermi la pordon. Sursojle mi ekvidis blondulinon similan al tiuj knabinoj el la lifto. Mi volis diri, ke estas miskompreno, kaj pardonpeti, ke mi ĝenas ŝin. Tamen ŝi ekparolis kiel la unua. Ŝi rigardis en miajn okulojn kaj demandis, ĉu mi akceptos ŝin. Vortoj baraktis en mia gorĝo. Se mi ne akceptos la knabinon, ŝi ekpensos, ke ŝi ne plaĉas kiel virino al mi, kaj mi tuj bedaŭris ŝin. Krome ŝi estis juna, havis ne pli ol dudek, dudek du jarojn, kio ankoraŭ plifortigis mian bedaŭron. Rapide mi respondis, ke ŝi eniru. Ŝi klinis la kapon kaj diris, ke baldaŭ ŝi revenos.

Denove mi aŭdis frapadon post dek minutoj. Ĉifoje la knabino ne estis sola. Akompanis ŝin ulo fortekega kiel atleto, kun mallonge pritonditaj haroj. Li salutis min kaj haste diris: kvindek dolarojn por du horoj. Mi rememoris, ke ĝuste tiom volis Raisa kiel pagon al la deĵoranta koleginino - kvindek dolarojn por du horoj. Mi elpoŝigis la monon kaj donis al li. Tiam mi ekvidis, ke la knabino havas sur la ŝultroj pelerinon longan ĝis la planko, kaj en la mano tenas saketon. Mi preterlasis ŝin en la koridoreto. Mi eniris post ŝi la ĉambron. En la televidilo kiel kutime estis pornofilmo. Ŝi demandis, ĉu ŝi povus fini la filmon. Sen atendi mian respondon, ŝi proksimiĝis al la televidilo kaj elŝaltis ĝin. Mi estas Katja, ŝi diris. Mi estas Krist, mi respondis. Ŝi ridetis kaj deŝovis la pelerinon.

Ŝi havis nur mamujon kaj kalsoneton. En nigra koloro. Kviete kaj senemocie ŝi demetis la mamujon, kaj poste la kalsoneton. Ŝi ĵetis ĉion sur la seĝon, kie antaŭ momento ŝi metis la pelerinon, ŝi iris al mi kaj kun rutina rideto ŝi volis disbutoni la ĉemizon, apogante sin al mi. Mi kaptis ŝian manon. Knabino, mi volis ŝin konvinki, vi estos devigita al nenio. Mi invitis vin nur por akompano. Se al vi malplaĉas tio, vestiĝu kaj foriru. Ŝi rigardis mirigite kaj impresis tiel, kvazaŭ ŝi komprenus nenion, kion mi diris. Kaj pli ĝuste tion, kion mi volis diri. Mi eraris. Kiu scias, kion ŝi ekpensos? Ŝi montris kompaton. Ŝi diris, ke ŝi kompatas min, kaj tute senĝene, kvazaŭ mi ne estus ĉi tie, ŝi tuj surmetis la kalsoneton, la mamujon, kaj poste ĵetis la pelerinon sur la ŝultrojn. Kaj ŝi aldonis, ke tiujn du horojn ŝi pasigos kun mi, ŝi ne volas eliri la ĉambron, ĉar ŝi devos renkontiĝi kun alia viro, kaj ŝi ne emas. Mi proponis glaseton da vodko. Ŝi rifuzis kaj diris, ke neniam ŝi trinkas vodkon. Ŝi demandis, ĉu ŝi povas ŝalti la televidilon. Jes, mi respondis, ŝi faru laŭplaĉe. Per la zapilo ŝi trovis programon kun ĉina filmo pri iu okazaĵo el la mezepoko kaj kun batalscenoj kiel ĉe Kurosawa.

Je la unua nokto mi trinkis vodkon senĉese. Kaj ŝi estis kuŝanta en la lito kaj rigardis la ĉinan filmon. Restis nenio, pri kio ni interparolu. Ŝi montris malgrandan notaĵkajeron kun vortoj kaj parolturnoj en dek kvar lingvoj, al kiuj ŝi aldonis la dekkvinan kun la albana frazo: „Vi estas bela knabino”. Mi eksciis, ke hodiaŭ mi estas ŝia kvara viro, ĉar si renkontiĝas ĉiutage kun ses klientoj kaj ricevas tridek procentojn de la pagita mono. Kiam finiĝis la interparolo, mi aŭdis denove funebrajn sonojn de trumpeto, poste la knabino rigardis la ĉinan filmon, kaj mi trinkis vodkon. Mi leviĝis de la tablo kaj eksidis apude sur la lito. Forte mi kunpremis la tempiojn per ambaŭ manoj. La knabino maltrankviliĝis. Ŝi demandis, ĉu mi fartas bone. Ŝi tuŝis mian kapon per fingroj tie, kie mi kunpremis forte la tempiojn, kun sincera kompatemo. Tio sidas en mi interne, ŝi diris.

Verŝajne ŝi havis fortan devosenton. Ankoraŭfoje ŝi klopodis plenumi la taskon kontraŭ miaj kvindek dolaroj, el kiuj ŝi ricevos tridek procentojn. Mi estis la kvara tridekprocentulo. Kaj ŝi decidis honeste gajni sian parton, ĉar poste, kiam ŝi finis glatigi miajn harojn per mano, ŝi provis disbutoni la ĉemizon. Ĉifoje mi ne malcedis. Ŝi kuraĝis. Ŝi ekstaris, pendigis la pelerinon sur la apogilo de la seĝo, ankoraŭfoje ŝi deŝovis la mamujon kaj la kalsoneton, poste ŝi atente metis ilin sur la seĝon, elprenis kondomon el la saketo kaj enlitiĝis. Ŝi lerte surtiris la kondomon sur mian kacon, same kiel Raisa. Post la fiko - same kiel Raisa - ŝi demetis ĝin kaj tenante per etenditaj fingroj iris kun ĝi al la banejo. Mi restis kuŝanta en la lito, plena je tiu abomeno, kiu ekregas min ĉiufoje, kiam mi melkis la kacon, kaj plej volonte mi mortigus min. La knabino eliris la banejon, kvazaŭ nenio estus okazinta. Ŝi vestis sin, kombis harojn kaj ordigis sian aspekton. Ŝi eksidis apude, sur la randon de la lito, en kiu mi estis kuŝanta kun fermitaj okuloj. Subite aŭdiĝis frapado sur la pordon. Indiferente mi ekpensis, ke jam estas la dua nokte kaj venis ŝia gardisto - la ulo fortikega kiel atleto, kun mallonge pritonditaj haroj.

Kiam ŝi foriris, mi leviĝis de la lito kaj ŝlosis la pordon. Poste en mia kapo bolis pensoj. Ĉu ankaŭ Raisa estis putino? Kaj mi diris al mi, ke ne. Ŝi kisis min kaj permesis, ke mi kisu ŝin reciproke. Katja estis alia. Ŝi malpermesis al mi kisi la buŝon. Ŝi diris, ke ŝi povas fari ĉion, kion mi postulos, sed ne kidadon.

Mi falis en la liton. Mi havis la impreson, ke mi estas sur la ŝipo, kiu veturas tra maro kun altaj ondoj. La litofino leviĝis kaj falis, mia stomako premis la gorĝon, mi kuregis al la banejo kaj vomis. Kiam restis eĉ ne iomete da vomajo, ŝanceliĝante mi trenis la piedojn en la ĉambron. Kaj mi ekvidis, ke mi ne estas sola. La ĉambron plenigis multe da homoj. Dek kvin viroj en nigraj jakoj kun du butonvicoj atendis solene ĉe la muro, kaj kun ili doktoro N. T. , pri kiu mi scias bone, sed ankaŭ li scias, ke li ne estas doktoro N. T. Mi ekpensis, ke aliaj, kiuj ne havas maskojn, la ĉefrolantoj el la filmoj laŭ miaj scenaroj, venis al la entombigo, kio ŝajnis al mi stranga, ĉar mia entombigo ne okazos ĉi tie. Do, mi volis interparoli, demandi, kion ili faras en Sankt-Peterburgo, al kiu mi venis kun la speciala misio, kaj ne tiucele, ke ili entombigu min. Sed ilia gvidanto tuj interrompis miajn vortojn. Ili ne volas komenci interparolon kun mi. Ili estas miaj viktimoj kaj aperis nur por juĝi min. Ili decidis fari juĝon kontraŭ mi ĉie ajn, kien mi venos, kun ia ajn misio, ĉu humana aŭ krima, estas ja klarege kiel la suno, li diris, ni vidos, kia estis via misio, kaj finfine vi estos tio, kio vi estis kaj estas - hunda haŭto.

Li malamis min. Mi ne memoras en la vivo iun, kiu malamus min tiel fortege. Kaj kiam mi aŭdis lin paroli, dum momento mi havis la impreson, ke li estas konata por mi. Nu, demetu, vian maskon, mi diris. Vi estas flegisto. Vehap aŭ Vehip. Estas sence kaŝiĝi. Se vi ofendiĝis, ke mi fikis kun Faika, kaj ŝi neniam rigardis vin, ke poste mi fikis kun Delina, kaj ŝi eĉ ne kroĉis rigardon al vi en tiu mizerega filmo *Nebulo*, estas al mi malagrabla, sed ne mi kulpas. Tamen mi petas vian pardonon, same kiel mi pardonpetas ĉiujn. Vi devus esti indulgemaj, vi devus kompreni, ke mi ne havis alian elekton. Tiuj, kiuj elektis alion, tradukis *Inferon* de Dante, kaj mia organismo, kiel vi scias, ne estas kreita por la traduklaboro super *La Dia Komedio*. Dostojevskij ankaŭ lasis siajn heroojn kun zorgoj, do povas okazi tiel.

Li ekridegis. Nu, aŭskultu, homoj, kiajn fabelojn li rakontas ĉi tie, aŭskultu! La aĉulo kuraĝas sin kompari al Dostojevskij. Kaj kiam la aliaj ridegis same, li demetis la maskon. Mi ne estas Vehip, li diris moke, nek Vehap. Vidu, kiu mi estas!

Mi ekvidis la vizaĝon, kiu estis tre bone konata. Mi rigardis miregante. Kaj mi balbutis: ho, Dio! ho, mia Dio! La vizaĝo kun enkaviĝintaj vangoj kaj nerazita mentono teruris min. Tio okazis en la tempo, kiam mi suferegis pro la amo al Verdaj Okuloj. Kiam mi volis prezenti min - se eble - plej bone antaŭ ŝiaj okuloj, mi deziris, ke ŝi vidu en mi la noblan estaĵon, kies haŭton mi volis surmeti. Vane. Mi ne fariĝis pli nobla, mi ne havis majestan aspekton, kian serĉegis Verdaj Okuloj.

Kaj ekpensi, ke ĉiuj ĉi knabinoj ekamis min, kaj ne vin. li daŭrigis kun la sama malestimo, kaj vi utiligis, alproprigis al vi miajn sukcesojn, ĉi, hunda haŭto, vi produktis nur tiujn kompatindajn figurojn, tiujn kriplajn homojn, kiuj ariĝis ĉirkaŭ mi, serĉante la savon, kaj mi ne povas helpi al ili. Eĉ se mi volus nun ŝanĝi ilin, krei tiajn, kiajn ili deziras esti, tio ne havus sencon kaj estus neebla. Vi kondukas kiel struto, vi kaŝas la kapon en sablon kaj pensas, ke la aliaj ne vidas vin, sed ili vidas, precipe ili - tiuj eternaj atestantoj de via malkapablo.

Ĉiuj viroj skuis la kapojn aprobe. For la hundan haŭton, ili vokis sovaĝe kaj ekiris kontraŭ mi. Tiam mi saltleviĝis. Apenaŭ mi elkuregis en la koridoron, sed tie la piedoj ne obeis al mi. Mi ekpanikis, ĉar mi ne povis

fugi. En tiu momento mi aŭdis sonoron. Ju pli alproksimiĝis la fiuloj, des pli tondre muĝis en miaj oreloj. Angorante mi malfermis la okulojn: sonoris la telefono. Dum longa momento mi estis kuŝanta kun haltigita spiro. Pro la timo, ke mi ne ekdormu denove, mi leviĝis de la lito. Mi ne havis tempon por razi min, nek por duŝi. Mia valizo estis malplena. Do, mi enĵetis ĉion senorde. Ankaŭ la botelon kun restaĵo de la vodko *Smirnoff*. Dum la vojaĝo hejmen mi dormis. En la taksio veturanta de la hotelo al la flughaveno. En la aviadilo fluganta de Sankt-Peterburgo al Zuriko. Mi dormis en Zuriko, sidante sur la fotelo kaj atendante la sekvan aviadilon, kaj poste dum la tuta flugo al Tirana. Kaj mi ekdormegis kiel ŝtono tuj poste, kiam mi eniris hejmen.



Fatos Kongoli

Konferencoj

Sarajevo novembro 2010

(Raporto 2)

Estis envere bela surprizo kaj novaĵo partopreni en Ronda Tablo en Sarajevo, aranĝita de Esperantista Ligo de Bosnio-Herecegovino. La temo de la Tablo pritraktis la aferon de la lingvoj en Eŭropa Unio. Mi akceptis plezure la invitilon ofertante mian prelegon “Kion alportos albanoj al EU”. Mi prikonsideris ĉefe tri kozojn: la albanan lingvon kiel apartan grupon en la lingvofamilio hindoeŭropa, la interreligian harmonion ĉe albanoj, la gastamon kaj aliajn tradiciajn virtojn de ili.

Sarajevo estas laŭ Vikipedio unu el 10 plej interesaj urboj, ankaŭ pro ĝia novtempa historio.

Mi rememoras ke bosnianoj estis plej ardaj protektantoj de Jugoslavio, ŝajne ĉar ili havis en ties kadro sian propran ŝtaton, same kiel makedonoj. Tial, ĉefa strato en la urbo portas la nomon “Marŝal Tito”. Sed mi bone rememoras ankaŭ ke en Sarajevo okazis la plej grandaj demonstracioj kontraŭ la volo de albanoj de Kosovo por sendependeco sub la slogano “Ni ne cedas la Sudon” dum la jaroj 1989-1990. Eksterdubas ke tiuj demonstracioj estis organizitaj de fanatikaj serboj.

Aliflanke dum la milito de la jaroj 1992-1995 estis miloj da albanoj loĝantaj tie envicigitaj kontraŭ la agreso de la serba armeo al la popolo de Sarajevo.

Mia patro studinta en Skopje kaj Zagrebo antaŭ la Unua Mondmilito, skribis al mi ke li vizitis Sarajevo okazante de Olimpiaj ludoj ĉirkaŭ la 1930 jaro ĝuste tie. Aliaj amikoj estis priskribintaj la urbon tre prospera, gastama ĉu por diversaj religiuloj ĉu por ceteraj turistoj. Certe, estas io alie kiam vi tuŝas kaj vidas ĝin propre.

La registaroj de ambaŭ niaj landoj estis forigintaj la enirvizojn por ties civitanoj. Kiel ajn mi kunportis ankaŭ la invitilon oficialan liverite afable de Esperantista Ligo de Bosnio.

Mi vojaĝis per aerlinio aŭstria posttagmezon de 28a de oktobro.

En Vieno mi atendis kvar horojn.

Mi provis eliri de aeroporta domo dum kelkaj minutoj sed ekstere estis malvarme kaj ventegis, tiel revenis enen. En Sarajevon mi venis malfrue vespere. Tie atendis min amiko Fetah Zvirac kun sia aŭto per kiu ni iris, ene de kvaronhoro, en la hotelon "Terme" en la termobaneja kvartalo Ilidza. Tuj apude estis monto de kie fontis la rivero Bosna enfluante en la riveron Ĵeleznica. Ĉirkaŭ estis granda verda parko. La urbocentro troviĝis je 10 km fore. Tien vi povus iri ankaŭ per tramo tra larĝa vojo.

Mi dividis la ĉambron kun amiko Boĵidar el Karlovo de Bulgario kiun mi konas ekde 12 jaroj. Morgaŭan matenon ni kune esploris la kvartalon belan, la bazon kaj banis en la hotela baseno. Same ni frandis bongustajn kaj sanajn manĝaĵojn tradiciajn en la hotela restoracio.

La unua sesio de la konferenco malfermiĝis posttagmeze. Estis alvenintaj prelegantoj el 15 landoj de Balkanio kaj pli vaste, parte konataj persone de mi, kiel Fabrizio el Torino, Nikola el Kroatio, Istvan el Hungario, Zlatko el Slovenio, Barbara el Pollando, Maria el Rumanio, Boĵidar el Bulgario.

La prezidanto de la Esperantista Ligo de Bosnio-Hercegovinio, Senad Colic salutparolis la partoprenantojn kaj prezentis la tagordon. Tie mi eksciis ke tiu Ligo aĝanta jam cent jarojn, reprezentis plej fortan Ligon en eksa Jugoslavio kun 100 filioj enlande. Kromalie, nun ili estis certigintaj apartan monon de registaro por sponsori la Rondan Tablon, kiu multekostas. , io ne imagebla por ni en Albanio ankoraŭ, kie ekde ĉefministro plejmulto de ŝatistoj gapas al la Angla.

Ankoraŭ oni ne komprenas kian grandan profiton ekhavas ĉiuj se oni adoptus Esperanton kiel komuniklingvo internacia, ĉar per ĝi ĉiu homo sin sentas dignulo, sin esprimas flue kaj libere kaj elspezas malmulte da tempo por ellerni ĝin.

Kompreneble ankaŭ en ĉi tiu esperantista kunveno mankis la interpretistoj ĉar ĉiuj interkompreniĝis sufiĉe bone unu al la alia kvazaŭ en granda familio.



Tio ne okazas se oni uzas alian nacian lingvon kiel komunikilon, kiam ĉiuj sin ŝajnigas kvazaŭ komprenas kaj apenaŭ scipozas sin esprimi libere kaj precize. Tio eksplicitas per la fakto ke la naciaj lingvoj estas relative malfacile lerneblaj, des pli kiam tio okazas ne en la landoj kie ili parolatas denaske. Tamen estas ridindaj ĉiam pli la kazoj kiam en TV, ĵurnaloj, Radio, paroladoj, konferencoj multaj intelektuloj uzas fremdajn terminojn, komencante de la nomoj kaj titoloj de ili, ekz en Albanio Top Channel, Top Show, Tirana Observer, Ora news, ABA news, News 24, Albanians got talent, Aldomorning Show, Zef Deda Show, ktp. , kio estas simple simiaĵoj kaj abomenindaj humilaĵoj. Dum Esperanto strebas teni puraj la naciajn lingvojn same, tiujn de minoritatoj portantaj la riĉan kulturon respektivan.

Dum la unua sesio parolis prof Michel Duc Goninaz el Francio. Li montris la faktan lingvan malegalecon ene de EU, kvankam laŭ ties konstitucio ĉiuj 23 lingvoj naciaj estas tutegalaj.

Katalunano Oscar Puig substrekis la klopodojn farataj en 11 miliona Katalunio de Hispanio (ĉefcentre Barcelonon) por memstareco, kio savus la kulturon de tiu vasta regiono de Hispanio. Estas jam ne akceptebla ke oni malpermesas paroli sialingve la deputitojn katalunajn en la tutlanda Parlamento.

Prof. Maria Butan el Rumanio priskribis la staton de la lingvoj en Banato, granda kampara regiono dividita aktuale inter Serbio kaj Rumanio, kie loĝas multaj naciecoj (hungaroj, serboj, rumanoj,

romanoj, germanoj, albanoj ka) . Ŝi menciis la solvon proponita de konata rumana profesoro Buchort pri la lingva problemo en Eŭropo: la angla pluuzatu en interreto kaj tekniko kaj teknologio, dum Esperanto por la amasa komunikado kaj beletro.

La dua sesio, morgaŭon, komenciĝis per la prelego de prof. Fabrizio A. Pennacchietti (Italio) rilate la lingvan hegemonion pro prestiĝo de certa lingvo. Ĉirilate, li menciis ke la itala ĝis la jaro 1861 parolatis de nur 2. 5 % de italoj, sed poste ĝi enkondukiĝis tra deviga lerneja sistemo pro ties beletra prestiĝo. Tiel okazis ankaŭ pratempe kun la aramea, sed ankaŭ kun la greka (laŭ mi-B. S.) ..

Zlatko Tišljar el Slovenio pritraktis la aferon de la eŭropa identeco rilate la lingvon. La ĉefa signo de la identeco estas la lingvo-diris li- kiu havas ankaŭ la rolon de komunikilo. EU bezonas Esperanton por difini sian identecon kiel ia superŝtato, ĉar ĝi apenaŭ povas akcepti unu el la naciaj lingvoj aŭ unu el la mortintaj lingvoj.

Djordje Dragojloviĉ el Serbio parolis pri akulturado subkomprenante per tio la reciprokan influon kaj intertrudadon de la diversaj kulturoj unu al la alia. Samkiel Eŭropo estas donacinte al la ceteraj kulturoj, samtiel ĝi estas ricevinta el la kulturoj de la popoloj de Azio, Afriko kaj Amerikoj, daŭrigis li. Poste Dragojlubiĉ tuŝis ankaŭ la aferon de proksimeco de la slavaj lingvoj de eksa Jugoslavio. Ĉirkaŭ 85 % de la vortoj en la serba, kroata aŭ slovena, konfirmis li, estas preskaŭ la samaj. Tio konstruistaris al la asertoj de la aliaj slavaj kolegoj argumentintaj ke ekz. la kroata estas tute memstara lingvo, same la slovena, aŭ makedona.

Dum la tria sesio, Istvan Ertl el Hungario interesiĝis pri la minoritataj lingvoj de Eŭropo. Laŭ li la egaleco en la Eŭropa konstitucio estas proklamita por tutaj 23 lingvoj naciaj oficialaj sed nenia protekto ne garantiatas por lingvoj minoritataj, kiuj plimultas. Antaŭecon havas ja la ŝtatoj sed ne la lingvaj grupoj, kio ne justas.

La lingvo de la romanoj, eldiris en sia prelego Nikola Raŝic el Kroatio estas verŝajne la plej eŭropeca, ĉar ties portantoj vivas dise kie ajn sur ĝi. Sed ekestas problemoj: ne ĉiuj romanoj parolas la romaan, mem la lingvo estas draste dialektiĝinta kaj ankoraŭ ne posedas ian standardan formon. Li laŭdis la laboron farita en Albanio kaj aliloke de profesoro de la universitato de Sorbono. Marcel Cortiade, studinta romanojn tie. (Marcel estas esperantisto kaj li ege kontribuis en la fondiĝo de la Albana Esperanto-Ligo- B. S.)

Eduart Kuster el Belgio kie oni parolas tri oficialajn lingvojn (la francan, la flandran kaj la germanan) en respektivaj regionoj, montris ekzemplojn je kiamaniere oni solvas la lingvan problemon “laŭbelge”, subkomprenante bonkomprenemon.

En mia prelego mi klarigis ke albanoj estiĝonte EU civitanoj alportos unuavice ilian lingvon pratempan kun la riĉa popola kulturo esprimata de ĝi; krome modelon de ekzempleca kunvivado interreligia, ankaŭ valoregajn moralajn tradiciajn virtojn.

Nikola Raŝic el Kroatio rimarkigis ke ankoraŭ restas malfermita la problemo de la ilira deveno de la Albana. Mi prezentis argumentojn favore al la ilira tezo, komencante kun la fondinto de la kompara lingvistiko, Leibnitz-o kaj daŭrigante kun vico de fremdaj kaj albanaj albanologoj. Mem la nomo Bardhyl, praa pli ol 2400 jara, konsistas el du puraj albanaj vortoj Bardh= blanka kaj yll =stelo.

La kvara sesio malfermiĝis per la prelego de s-ino Barbara Pietrzak el Pollando, kiu parolis pri la unueco en diverseco kiel defio por EU, unueco apogenda se oni adoptos Esperanton kiel tuteŭropa lingva komunikilo.

Dum la sesio oni legis referaĵon pretigita de la hungaro Lazlo Gados kie oni klarigas kial do EU ne povas adopti almenaŭ nun por nun Esperanton kiel sian lingvon: mem la EU Konstitucio malpermesas la uzadon de ununura lingvo.

Boĵidar Leonov el Bulgario argumentadis ke la lingvo ludas grandan rolon en la aferoj de patentoj kaj tiuj tekniko-sciencaj.

En la solena kunveno okaze de 100 jariĝo de Bosnia-Hercegovina Ligo, Senad Colic rakontis pri la longa vojo trairita de la asocio kaj pri la strategio sekvata de ĝi por disvastiĝo de Esperato enlande altirante la atenton de la ŝtato. Li kritikis la politikon de UEA kiu dediĉas pli da energio al la eroj de konferencoj kaj kongresoj ol al la laboro kun ŝtataj institucioj kaj pli bona organizado de la landaj asocioj. Antaŭ kelke da tagoj 10 esperantistoj el Sarajevo estis aĉetintaj apartmenton disponata al la bezonoj de la Ligo, prikonsiderante ke tion oni ne povas realigi per la kotizoj de la membroj. Tio okazis en la tempo kiam landaj asocioj pli grandaj kiel Italio estis vendintaj sian sidejon ĉar ili apenaŭ povas pluteni ilin.

La vespermanĝo estis impresiga. Tion partoprenis dekoj de lokaj esperantistoj, ĉiuj entuziasmaj, junaj kaj maljunaj.

Ni havis la plezuron viziti ankaŭ la urbon de Sarajevo, konatiĝante kun tri ties aspektoj: malnovaj kvartaloj ekde la otomana tempo post XVjĉ; tiuj konstruitaj dum la Austro-hungara imperio; kaj laste plej novaj konstruitaj post la unua Mondmilito, aparte post 1990 jaro. La urbocentro troviĝis ne en la centro mem, sed ie je rande. Ĝi nomiĝis Baŝ Ĉarŝi kaj entenis metiejojn, kafejojn, moskeojn, banejojn, belegajn stratetojn kun karakterizaj domoj.

Interalie, ni vidis ankaŭ la ponton kie okazis la mortatenco kontraŭ la heredanta princo de Austrohungario, kiu servis kiel pretekston por startigi la Unuan Mondmiliton.

Ni pasis sur la modernaj stratoj je austra stilo kie troviĝis multe da preĝejoj kaj belaj domoj, same la aŭtra merkato; vidis ankaŭ lokojn ĉe fruktomerkatoj kie okazis masakroj dum la milito fare de serbaj kanonoj kiuj pafis ekde la montetoj ankoraŭ loĝataj, kronigantaj la urbon. Inter la gravuritaj nomoj konstateblis ankaŭ serbaj, eĉ albanaj, ĉar ĉi lastaj multas ankaŭ en Sarajevo.

Oni montris nin straton kie iam loĝis serboj kiuj ne volis forlasi la urbon ĉar ili havis bonajn rilatojn kun muslimoj tie. Sed serba armeo venĝe bombardis ankaŭ ties domojn, eĉ la ortodoksan preĝejon, kiu estis grave damaĝite sed nun en rekonstruado.

Ankoraŭ vidiĝis la spuroj de la projektiloj kaj kugloj sur la fasadoj de la domegoj. Pli grandaj truoj estis plenigitaj per brikoj dum la malgrandaj plurestis kiel signo de la tragika milito okazinta tie. Ni vidis ankaŭ ĉieskrapulojn konstruitaj post 1990 jaro.

La stratoj de Sarajevo zumis de homoj, la kafejoj kaj restoracioj plenplenis. Okulfrapis multaj virinoj kun vualoj, jen surstrate jen en la vendejoj kaj oficejoj, sed ili estis afablaj kaj komunikiĝemaj dum ili deĵoris aŭ servis. En la granda moskeo de Husen Bego ni vidis multajn virojn kaj virinojn eĉ junajn preĝante tagmeze. Viglis ankaŭ la katolikaj, ortodoksaj eĉ hebreaj (sinagogo) preĝejoj. En la urbo vivas mozaiko de naciecoj, religioj, tuto en harmonio.

Malnova kvartalo laŭlonge de ĉefa avenuo kun pluretaĝaj domoj portis la nomon de iu paŝao. Mi vidis ankaŭ arabojn en la urbo.

Ĝenerale la popolo impresigis nin per sia digneco malgraŭ la suferadoj de la milito de 1992-1995 jaroj, aparte la gejunuloj altstaturaj kaj fieraj, lertaj kaj ĝentilaj.

Mi forlasis la hotelon frumateno de 1a de novembro per la sama aerlinio kun belegaj memoraĵoj pri amika lando kaj popolo.

Bardhyl Selimi

Notoj el la Ronda Tablo en Sarajevo

(protokolo ne oficiala de Bardhyl)

La malfermo

29an de oktobro 2010-11-20 postagmeze

Senad Colić

EU estas komuna ento, sen baroj ks, sed ĝi bezonas komunan lingvon

Mankas al EU jam kultura kaj lingva dimensio.

Ronda tablo kunigas homojn el la landoj kiuj fondis EU, el la landoj kiuj aliĝis al ĝi pli poste kaj al landoj kiuj estos kandidatoj por membriĝi al EU.

Ŝefik Rizvanović,

delegito de Direktorejo pri Homaj Rajtoj de la ministerio pri homaj rajtoj, rifuĝintoj kaj naciaj minoritatoj.

Bosniso-Hercegovino estas jam ratifikinta la eŭropan ĉarton de regionaj kaj minoritataj lingvoj.

Barbara Pietrzak

Salutas je la nomo de UEA

Zlatko Tišljär

Ni devas aktivigi en nian organizon (Eŭropa Esperanto Unio) ankaŭ landojn ekstereŭropajn. EU ne naskiĝis subite, ĝi evoluis malrapide, tiel okazis al ties ŝanĝoj en la konstitucio ktp.

Kulturaj kaj lingvaj aferoj ne estas en la kompetenteco de EU sed en tiuj de la membro ŝtatoj mem.

Oficialaj lingvoj de EU estas tiuj oficialaj lingvoj de membro ŝtatoj.

Oni stimulas ene de EU la multlingvecon.. Ĉiu eŭropano devas paroli almenaŭ tri lingvojn : propran patrecan, iun grandan, iun najbaran.

Lingva politiko estas ja merkata politiko.

En EU estas 23 oficialaj lingvoj, ĉiu rajtas alskribi al EU institucioj en sia propra lingvo kaj ricevi same respondon en sia propra lingvo.

Kio rilate la laborlingvon de EU komisionoj?

Tio dependas de la mono disponebla por pagi la tradukontojn, povas esti 1, 2, 3, aŭ pli da laborlingvoj. Sed unu el 5 devas esti la angla...

La angla estas la strebo de ĉiuj por sin distingi en de EU... Do ĝi estas neskribite politika lingvo de EU.

En Strasburgio oni uzas kvin lingvojn, oni tie ne rajtas uzi la propran lingvon, do se vi estas anglo, paradoksece vi ne rajtas paroli en la anglan...

En la eksa Jugoslavio okazis simile. Oficialaj estis ĉiuj lingvoj de la ŝtato sed oni preferis la serba-kroatan.

Slovenoj lernis la serban sed ne inverse, same kroatoj..

La simila stato estis en la eksa Sovetunio.

Unua sesio

Prezidas s-ro Fabrizioo Pennacchietti

Parolas **Michel Duc Goninez** (Francio)

Kiuj lingvoj por kiu Eŭropo?

Eŭropo naskiĝis post la disfalo de la Romia Imperio.

Lingva mozaiko en ĝi iomete kovriĝis de slavoj.

La portugala, nederlanda iam malfrue fariĝis fortaj kaj subpremaj.

La bulgara lingvo subpremis minoritatajn lingvojn.

Svislando, Norvegio, Islando ne apartenas al EU dum Turkio estas kandidato.

Ekestiĝis ia lingva oligarkio, monarĥio: angla, franca, germana, tamen eĉ inter ili estas batalo, strebas la angla.

La 23 oficialaj lingvoj bezonas 515 kombinaĵoj por tradukiĝi.

La egaleco de la lingvoj estas ja senhonta mensogo!

Du emoj: dulingveco (ŝtata lingvo kaj la angla) kaj plurlingveco

2 bilionoj da eŭroj elspezas britoj por lerni la francan sed inverse 8 bilionoj!

25 bilionoj por la tuta EU inkluzive Brition.

En la dungiĝo oni preferas angloparolantojn.

Granda defio: esperanto kiel lingva identigilo por EU.

Oscar Puig (Katalunio)

La homoj komprenas la vortojn depende de la lando kaj loko de kie ili venas.

La kataluna estas tute ignorata en EU (ĝi okupas la dekunan lokon en la listo de plej parolataj lingvoj ene de EU) .

Lingvo estas dialekto kun armeo sur ties ŝultroj

Ŝtato estas ento agnoskata de la ceteruloj. La kazo de Kosovo: laŭ jura decido de Internacia Juĝejo ĝi estas demokrate deklarita ŝtato de popolo mem.

Nacio estas homa komunumo en lando kie delonge ĝi interkomunikiĝas en certa lingvo.

Ne gravas ĉu tio estas pli aŭ malpli granda.

La landlimoj ŝanĝis eksterordinare post la fino de la Dua Mondmilito (kontraŭ la opinio kaj decido de grandpotencoj por konservi la tiaman staton en la mapo de Eŭropo) .

La nuna situacio en Katalunio ne plu estas eltenebla por pluaj jaroj.

Antaŭ 30 jaroj oni kritikis nin, katalunanojn kiam ni portis nian nacian standardon.

Ili ja deziras ke la propra kulturo, lingvo pluvivu. (lingvo de 11 milionoj da homoj) .

Lingvo estas homa trezoro.

Imediate nia ĉefa objektivo estas fariĝi memstara ŝtato.

Maria Butan (Rumanio)

Eŭropo estas ujo de multkultureco kaj multlingveco.

En Banato estas pluraj etnoj (rumanoj, serboj, hungaroj, germanoj, bulgaroj, romaoj, italoj, francoj, aŭstroj, tie ludas rolon “paĉbanata”: toleremo, kompreno, indulgo.

Antaŭe ĉe ni studis la rusan- la lingvon de la granda frato..

La intereso pri la franca aŭ la angla konsideriĝis kiel ia amo por la burĝaro..

Bukureŝto konsideriĝis malgranda Parizo.

Rumaniop eta Francio.

La angla estis la lasthora invadado.

La minoritataj lingvoj neglektataj: la kataluna, la sarda, la bretona, la okcitana...

La enkonduko de la angla en elementan lernejon signifas koloniisman politikon.

Rumana profesoro Ignat Buchort proponas ke la angla estas nek evitebla, nek entrudebla lingvo perforte.

Por informado kaj scienco taŭgus la angla, dum por la ekonomio, turismo, sociaj rilatoj devas esti neutrala lingvo kiel Esperanto.

Esperanto ne apartenas al iu popolo aŭ ŝtato, do ĝi ne povas fariĝi rimedo por subpremi, koloniigi.

En situacio de la lingva genocido oni devas levi la voĉon por Esperanto, amasa plurlingva edukado, lingvo por kulturo.

Debato:

Zlatko Tišljarić

Lingvistoj ne scias kio estas lingvo, dum nelingvistoj jes..

La itala estas ja artefarita lingvo el la toskana, la bolonja, la sicilana.

Jure agnoskata lingvo estas la oficiala lingvo.

Mi laciĝis prui al la serboj ke la kroata estas aparta lingvo kaj al la kroatoj ke ĝi estas serba...

Grandaj nacioj- iam estis Burgundio antaŭ la nederlanda, je 2000 jaroj. Nun estas nenio el ĝi, tamen ĝi influis la nederlandan.

Dalmatio estas la lulilo de la kroata. En Slavonio oni parolas lingvon kroatan..

Nikola Rašić

Oni nunajn landlimojn projekcias en la pasinteco.

Islando unu nacio sen minoritatoj, unu teritorio.

Bosnio- ŝafido kun tri kapoj..

Mia identeco- parte de tiu kulturo. Naskiĝis en Bosnio, kreskiĝis en Zagrebo, loĝas ekde 22 jaroj en Nederlando

Kial havi eŭskan ŝtaton se ne ekzistas limoj. Ni kreis la ŝtaton (Kroatian) en ne oportuna tempo, kiam Eŭropo strebas al unuiĝo.

Pli bone batali por la homaj rajtoj.

Zlatko

Nacio estas historia kategorio. Nacio estas unu el novaj multaj identecoj.

Edukado kreas kulturon. Nun mi senats min sloveno (24 jarojn mi loĝas en Slovenio) . Mi estas reedukita tie.

Esperanto devas krei sian eŭropan identecon.

Istvan Ertl

Mia avo naskiĝis en Banato

Nacio- etno- popolo

En Islando iris ankaŭ fremduloj, ekz. Nikola Ruggiero, itala esperantisto..

Alia diskutado

La lingvo influas la identecon, la senton de aparteneco.

Oscar Puig

Kastilia alproprigas la nomon hispania (Andaluzio, Eŭskio, Kataluno- ceteraj regionoj) .

Mi ne estas naciisto. Mi estas sendependisto, internaciisto, esperantisto.

Se la koncepto nacia estas eksmoda, kial ĝi funkcias por landoj kiuj havas sian propran ŝtaton?

Djordĵe Deagojoviĉ (Serbio)

Ekzistas serbaj katolikoj, sed malmultaj.

85 % de la vortoj en la serba, kroata, montenegra, bosnia samas.

Estas debato al kiu apartenas Banato. Inter du mondmilitoj ĉiuj dokumentoj tie devis skribiĝi en la serba (cirillitera)

Subotice- edukita parto de la loĝantaro parolis serban, hungaran, germanan. Post dua Mondmilito tio ĉesis.

Aktuale oni parolas hungarlingve.

Pli ol dekono de infanoj parolas serban. , laŭvole ankaŭ hungaran.

Naciaj ŝtatoj estas historiaj..

Laŭ iu dokumento la nacio menciitas en la naŭa jarcento. Dum Mezepoko tio havis nunan sencon

Demando: kiom da lernantoj en Serbio kiuj ne rekonas Kosovon lernas la albanan lingvon?

La serboj en Mezepoko ne konis sin kiel serboj!

Dua sesio, 30 okt.

Prof Fabrizio

Lingva hegemonio [pro kultura prestiĝo

Mi estas el Piemonto. Tie parolatas kelkaj lingvaj dialektoj..

Lingvo estas ja iama dialekto en kies ŝultroj staris armeoj (difino)

La aramea lingvo ne apartenis al iu ŝtato, ĝi parolatis en Norda Sirio (IX-XVIII antaŭ Kristo)

Asiroj- Sirio, estis lingvo skribita per alfabeto.

Ĝi estis komuna lingvo por la persa imperio.

Interna Mongolio uzas la aramean alfabeton.

La novpersa lingvo ekestis dum X-XVII jc post Kristo, ĝi estis internacia lingvo.

Kelkaj vortoj el ĝi:

Ĝangalo= arbaro (persa vorto)

Band = ligilo

Kamer= talio

Dum XVI okazis okupacio de Francio

Ĝis la jaro 1861, nur 2. 5 % de italoj estis kapablaj skribi la italan (600 000 el 25 000 000) .

Ekde tiam oni enkondukis lernejan sistemon kaj la itala estis devigata lingvo.

Danke al la prestiĝo la itala fariĝis tutnacia, do kiel iam la aramea.

Zlatko

Eŭropa identeco kaj la lingvo

La homo povas akiri novan identecon sen perdi la malnovan, sed se li translokiĝas tre juna kaj neniam revenas patrien li povas perdi eĉ ĝin.

Tabuo naciisma: unu ies nacio estas grava, la ceteraj ne.

Ĉu povas esti eŭropano sentante sin ankaŭ germano? Ja jes!

Fanoj de iu klubo militas kontraŭ fanoj de la alia klubo enlande, sed solidaras kiam tiu teamo ludas kontraŭ fremda klubo..

Valora estas tio kio kreas sian identecon.

Lingvo estas baza identigilo, simbolo por homa identeco, krom aliaj identigiloj.

La etaj diferencoj rekonigas la apartenon, faras la lingvon alian.

Ekstrema naciismo, estas racia stultaĵo.

Kiam ekestas nova grupo ĝi bezonas novan identigilon.

Ĉiu eta diferenco sufiĉas por ke oni nomu ĝin nova lingvo.

Por Eŭropo bezonatas neŭtrala lingvo (sed kio, ĉu european nacian lingvon, ĉu malnovan lingvon, ĉu novlastan, Esperanton) .

Djordje Dragojlić

EU Sento de identeco en fono de akulturado

Eŭropo devas danki al aliaj kulturoj almenaŭ en la kuirarto..

Kafo, teo, devenas de Ekstereŭropo

Kapsiko (de hungaroj) , terpomo (de germanoj) , kakao (de belgoj) , maizo ks devenas same

Ekzistas ĉirkaŭ 50 000 kulturoj enmonde

640 specifaj kulturoj (inklude de gastronomio)

Serbio ne havas sian kuirarton, tio estas pruntita de la aliaj nacioj..

Nur 80 000 serboj sin deklaris jugoslavo.

Virinoj en Grekio 1000 jarojn antaŭ araboj kovris sian vizaĝon ĉar ili konsideriĝis propraĵo de iliaj edzoj..

Akulturado estas renkontiĝo de kulturoj, civilizacioj, lingvoj..

Istan Ertl

Lingvaj minoritatoj en EU

Nur 50-60% de la loĝantaro en Luksenburgio estas lokanoj. Tie parolatas la franca kaj la germana.

Laŭ Daniele Vitali en EU devas enkondukiĝi ankaŭ la minoritataj lingvoj. (kimra, gaela, euska, kataluna, aragona ks)

La limoj en EU fariĝas aeraj.

Estas homoj kiuj ŝanĝis etnecon trifoje..

Ili rajtas havi lernejojn en sia lingvo.

Debato

Jovan el Belgrado

Ne veras ke en la serba lingvo oni enkondukis malnovajn vortojn.

Aparteneco al socia grupo estas subjektiva

Mia patro estas el Kosovo, dum patrino el Vojvodino

Do unue mi sentas min jugoslavo, due serbo

Zlatko

Mi estas kaj kroato kaj sloveno, mi ne estas plu jugoslavo, ĉar ne plu ekzistas Jugoslavio

Identeco venas de la edukado.

Nikola

Nacieco kaj religieco estas samrajte

Bardhyl

Nacieco estas eco ne forviŝebla. Estas albanoj kiuj sin deklaras grekoj nun por profiti pensiojn (400 euroj) anstataŭ 100 euroj enlande. Tamen la nova censo postulas memdeklaron pri nacieco.

Barbara

EU estas politika organismo

Miriana Kiviĉ (el Banja Luka)

Kiu scias Esperanton havas interreton en poŝeto

Senad Coliĉ

La bona lingvo estas bazo

Tria sesio

Nikola Raŝiĉ (Kroatio-Nederlando)

Romaa la plej eŭropa lingvo

Ekde la XI jc ni havas novaĵojn pri ili

XIV jc ili venas en Serbion, Dubrovnikon, Zagrebon.

Praktike ili ne iris al ĉiuj eŭropaj landoj. En orienta Eŭropon, en Ĉinio (Ujgurio) , Mezan Orienton, en Usonon..

Novhinda lingvo

Mi estas la aŭtoro de la kroata –romaa vortaro.

Ekzistas amaso da romaaj dialektoj.

Romaoj en Makedonio povas kompreni la romaojn en Slovakio.

Estas du-tri aŭ kvar grupoj da dialektoj tiaj.

Distingo: vizaĝo, akcepteco, emo al muziko, feristeco.

Romaa kaj la sanksrita..

La etna difino: Kiu estas romao, tiu kiu sentas sin tia!

Kio estas aŝkalia? Ili parolas albane sed ne deklaras sin albanoj ĉar albanoj ne akceptas ilin tiaj..

Romaa kiel lingva grupo reprezentanta tre malgrandan grupon je 1-12 milionoj da parolantoj...

Norma lingvo

Marcel Cortiade portanto de Legio Francese, estas granda aŭtoritato, profesoro en Sorbono. Li studis romaojn.

Vlahaj romaoj estas influitaj de la rumana

Estas verkisto de 48 libretoj el Fushe Kosove (Kosovo) kiu kontribuis notinde al la romaa studado.

Ne ekzistas lernejoj, ne ekzistas romaaj lingvaj klasoj (ne estas lernolibroj pri ties geografio, historio..)

Necesas tempo por ke oni formu standardan lingvon romaan.

Por la romaoj la lingva problemo ne estas nun por nun la plej grava, ĉar ĉe ili ekzistas multaj aliaj ekonomiaj problemoj.

Eduart Kuster (Belgio)

La belga kompromiso

Kunvivante ekestas konfliktoj, diversaj manieroj por solvi ilin. Per la forto, per la.

Je IV jc la romia imperio malfortiĝis, la lando dividiĝis en du partoj, germaninflua kaj latininflua.

Lingvo donas forton

Kristoforo- Kristo forta

Pensionoj la plej malaltaj en Eŭropo

Kvara sesio

Barbara Pietrazak (Pollando)

Unuiĝintaj en diverseco- Esperanto por verkonformigi tiun devizon

Esti eŭropano estas senti ligiĝon al Eŭropo.

Eventoj en Pollando 1956, 1980 montris kontraŭtariĝon al Sovetunio.

Marŝal plano, Eŭropa Komuna merkato.

EU entrepreis rimedojn por helpi la malpli evoluintajn membroŝtatojn.

EU ampleksas ankaŭ komunumon de tradicioj kaj lingvoj diversaj.

27 ŝtatoj estas komplika mozaiko de tradicioj kaj landoj.

Ne ekzistas unueco sen diverseco

Se eŭropanoj parolas unu lingvon tiam ili sentos apartenon al unu ento.

La pola estas rimedo por krei polecon.

Ŝanĝante lingvon oni sammaniere ŝanĝas identecon. Ĝi ligiĝis kun emocioj.

Nikola

En la nderlanda ne ekzistas la esprimo” mi amas vin”.

Barbara daŭrigante

Oni ne sentas same kiam diras “mi amas vin “ en la pola kaj en la angla..

Du polinoj vizitas la francinon por ekzerci la anglan, same faras la francinoj en pollando.

Konkurso Eŭrokanzono- la kanzonoj nur en la angla lingvo..

Elsendo Eurovizion en la Pola Radio postulas la kanzonojn en la angla lingvo.

En EU komisionon pri lingvoj partoprenas 40 deputitoj el 800 entute. El ĉi tiuj nur unu subtenas Esperanton. - diras Istvan Ertl

Lazlo Gados

Kial EU ne povas oficiale havi komunan lingvon?

Manko de pozitivaj leĝoj en EU rilate la komunan lingvon.

1991 manifestacioj surstrate de esperantistoj postulantaj enkonduki Esperanton en EU.

EU decidis ke la civitanoj eklerni 2-3 lingvojn.

Haste kaj desupre trudi Esperanton al la popolo ne eblas nun por nun

La fonduso Hans Sehlen subtenas kampanjon favore al esperanto.

Preskribaĵoj de la Traktato de EU ekskludas la enkondukon de Esperanto en ĝi.

Devas komprenigi al la homoj la neceson de Esperanto.

Kreskis la nombro de deputitoj informitaj ĉe EU.

En la jaro 1991 ili nombris 21, kaj en la jaro 2001 estis 108.

Nuntempe ne vidiĝas rektaj ŝancoj ankoraŭ..

Egalrajteco de membroŝtatoj pro la lingvo

Tio estas afero de individuaj membroŝtatoj.

Zlatko

EU mencias ke ĉiu povu lerni ŝtatan lingvon propran, lokan, minoritatan sed kial ne Esperanton?

Plurlingeco- estas ŝlosilo por EU??!!

La angla ne sufiĉas, diras la komisiono, ne plu.

Por ŝanĝi la leĝon de EU mankas ankoraŭ la subteno de amasa leĝantaro.

Boĵidar Ivanov (Bulgario)

Informadiko en la patentoafera agado

Bibliografioj, reĝistrado, terminaroj, komputado

Informfontoj: fakaj revuoj, referatĵurnaloj, prospektoj de firmaoj, katalogoj, raportoj de oficojojaĝoj, patentaj dokumentoj,

Inventaĵo- nova teknika solvo por iu teknika problemo

Daŭre de unu jaro oni esploras ĉu ankaŭ aliaj landoj aperigis tiun inventaĵon.

Validiteco dependas de landoj

Patento devas esti nacilingve

Debato

Zlatko

La diverseco estas per si mem io negativa, provokas timon, malakcepton, diverseco aŭ multvarieco...

Ekster ni oni ne komprenas ke Esperanto faros komunikon en Eŭropo pli bela, bona ol nun. Fakte komunikado ekzistas (servas la angla)

Subsidiareco- interŝtata agordo ankaŭ pri komunikproblemoj.

Eduart

La celo de Esperanto estas komuniki.

Rado, arabaj ciferoj, trafik simboloj estis ĉiuj rimedoj, iloj kiuj uzatu ne pro forto.

Oni devas substreki la praktikan valoron de esperanto

Fabrizio

Kial seniluziiĝo en Pollando?

Michel

Ne estas afero de bezono sed aferode deziro tiu de apliko de Esperanto

Sen premo sufiĉe granda la politikistoj ne interesiĝas pri la lingvo..

Se granda nombro de civitanoj ekkonscias pri la graveco de Esperanto tiam oni povas ekpekti rezultatojn, intervenon de politikistoj.

Laŭ mi ne estas fiasko de niaj klopodoj por Esperanto, estas antaŭvidebla ankaŭ ĉi tiu opcio.

Fervojo ekfunkciis ĉar oni komprenis fine la ties utilecon.

Lingvo ne estas nur komunikilo.. pro tio ĝi estas rifuzita.

Maria

Leonard Orban, rumano estas partopreninta la komisionon pri multlingveco. Ni esperis je li, kiu bonvoleme informi la ceterajn membrojn. Sed finfine li direktiĝis al dokumentoj oficialaj de EU.

Senad

S-ro Gados kontribuis notinde. Esperanto movado ne komprenas politikon. 99 % de la homoj ne komprenas la aferon mem.

Ni devas koni la temon, la proceduron se ni volos solvi la problemon de la komuna lingvo.

Nia strategio devas direktiĝi al pragmatismo.

Ni praktike funkciigu la movadon.

UEA ne scias fari politikon..

Ĝi okupiĝu per tiu propaganda agado. Kiom multe da oficejoj, delegatoj..

Ni flegu la lingvon por ke ĝi estu preta, utila..

Nikola

Jes ni devas disvastigi reton. En Bosnio iam estis 100 filioj!

Ronda familio- la esperanto ronda.

Ne anstataŭ konkeri la mondon, ĝi restas ene de ĝi.

Esperantistoj kontentas pri si mem- tio estas plej malbona rezultato.

Ni devas krei kadrojn lertajn, trejnistojn por kiu ajn strukturo.

Lingvo- komunumo- movado jen la ĉeno devas klare distingiĝi.

Pri lingvo- fakuloj, lingvistoj bonaj, ne la komunumo

Komunumo devas esti en funkcio de la celo

Movado kampanjistoj.. Informiĝi, politikoj, konsilantoj, ne nur esperantistoj sed fakuloj.

Momente esperantistoj sabotas sian aferon.

Barbara

UEA neutrala organizaĵo. La politikon ĝi lasas al la landaj organizaĵoj.

Estas ĉi lastaj kiuj devas rekoni la situacion proponi Esperanton.

Hodler establis UEA por praktikaj celoj aŭ politikaj celoj?

Zlatko

Dum UK mi venigis kroatan ambasadoron sed neniu atento estis dediĉita al li fare de UEA aŭtoritatoj..

Barbara

UK ne celas tion, sed la lokan problemon, la programerojn.

Sen komuna lingvo nia komunikado ne estos plena.

Senad

Ĉiuj lingvaj problemoj havas politikajn flankojn.

Nikola

Oni devas ŝanĝi UEA por ke ĝi pli bone funkciu.

Zlatko
Informas pri Eŭropunia Organizaĵo.

Politiko estas arto de la eblo

Unu membro en la Eŭropa Parlamento estas el nia organizaĵo jam

Ljudmila Novak: mi scias ke mi ne sukcesas ĉar inter 40 membroj de la prilingva komisiono neniuj interesigas pri esperanto, tamen mi lanĉos la problemojn.

Nia strategio baziĝas sur propedeŭtiko.

Ferma sesio

Fabrizio

La referaĵoj estis enhavaj, ili tuŝis diversajn aspektojn sufiĉe profundajn kaj kaŭzis verajn reagojn. Ne nur en la kampo specifa lingva sed ankaŭ pri aspektoj de mondo nekonata, pulsado movado. Bona, malavara akcepto de bosnianoj al ni.

Michel

Mirinde bone organizita aranĝo. Ĉiuj donis multajn informojn kaj instigis pensadojn kun reagoj interesaj. Estus bone se oni publikigu aktojn de ĉi tiu Ronda tablo

Nikola

Emocioj kaj impresoj multaj.

Atentigis min longa raporto de Senad pri centjariĝo de lia organizaĵo.

Simbola lingvaĵo, esperanto movado de Bosnio similas al fenikso reviviĝanta por nia tuta E- movado.

La aferoj iel kristaliĝas, venas novaj ideoj kaj eksplikoj pri gravaj temoj.

Identeco pri ni esperantistoj, ĉu lingvanoj, ĉu idealistoj, ĉu aliaj.

Subtenas la proponon por publikigi la aktojn..

Eble pripensi iun rezolucion el ĉi tiu Ronda tablo

Dankas pro la jubilea gastamo koncerto.

Senad

Dankis kaj ricevis donace librojn el Zlatko, Oscar ka.

Tujaj reagaj rimarkoj (de Andy Kunzli el Svisio)

(leginte la protokolon)

Post la unua traflugo de tiu "protokolo", en dua pli atenta legado mi rimarkis amason da dubindaj asertoj, kiujn oni ne povas lasi senkomentitaj (ĉar sufiĉe multaj homoj ricevis tiun "protokolon") :

Jen rimarkoj pri kelkaj punktoj en tiu "protokolo":

1. "La angla estas la strebo de ĉiuj por sin distingi ene de EU... Do ĝi estas nesribite politika lingvo de EU. "

Ion similan eble diris foje Piron kaj Tonkin. Sed tio estas pure polemika aserto de certaj e-istoj, kiuj fanatike flegas la "Feindbild" angla lingvo. En EU mem oni vidas tion alimaniere. Cetere la kontrauanga kaj

kontrauusona sinteno en EU estas sufiche forta.

Chi tiun tutan temon necesus nove konkludi pere de novaj empiriraj studoj kaj enketoj rilate tiun demandon - lau mi multon pri tio oni povas legi ekzemple. en la libro de Filippson. Do, antau ol aserti ion ajn, oni eble referencu al tiaj verkoj, same al kelkaj studoj de Grin. Sed tiujn nomojn oni tute ne renkontas en via "protokolo", kiu reflektas pure subjektivan esperantistan vidpunkton, sed bedaurinde lau ne tro inteligenta maniero.

Tiom longe ke la e-istoj polemikas kontrau la angla, ili procedas malscience kaj neniu konsideras iliajn vidpunktojn seriozaj.

2. "En Strasburgio oni uzas kvin lingvojn, oni tie ne rajtas uzi la propran lingvon, do se vi estas anglo, paradoksece vi ne rajtas paroli en la anglan... "
???????

3. En la eksa Jugoslavio okazis simile. Oficialaj estis ĉiuj lingvoj de la ŝtato sed oni preferis la serba-kroatan.

Kion signifas "preferis"? Necesus klarigi KIAL oni "preferis". Same en Sovetunio.

4. "La egaleco de la lingvoj estas ja senhonta mensogo!"

Lau mia scio neniu serioza diskutpartnero en EU asertas, ke ekzistas lingva egaleco. Tio eble estas propagandajho, sed pli kaj pli oni distancighas de tio. Necesus mencii konkretajn kazojn kaj fontojn. Se oni invitus homon el Svislando, li eble povus diri iom konkretan pri lingva egaleco.

5. "Ekestiĝis ia lingva oligarkio, monarĥio"

Tiaj nocioj en la (moderna) lingvoscienco lau mi ne ekzistas.

6. "Granda defio: esperanto kiel lingva identigilo por EU"

Antau la e-istoj certe venus la latinistoj kaj asertus la samon pri la latina (kiu cetere daure ghuas grandan disvastighon en la gimnazia instruado) .

Cetere la angla lingvo estas lau ties konsisteco sufiche, ech treege reprezenta europeca lingvo - do estus ege malfacile kontraustarigi al ghi alian lingvon, despl Esperanton, kiu en EU kaj Europo ghuas nenian statuson au agnoskon, ech apenau simpation.

Prefere oni demandu sin memkritike: kial Esperanto en Europo ludas nenian rolon kiel lingva identigilo.

7. "La kataluna estas tute ignorata en EU. "

Tio shajnas al mi malghusta. En la lingva hierarkio la kataluna trovighas sur la tria ebena de la lingva piramido de EU (post la unua ebena - cheflingvoj angla/franca - kaj dua ebena - aliaj shtataj lingvoj de la EU-membroj) . Kaj vershajne tute prave, char la kataluna estas nur regiona lingvo (kiel la frisa au soraba au retororomanĥa) , kvankam ja granda launombre de parolantoj. Se la kataluna okupas la dekonuan lokon, tio signifas, ke ghi ne nur ne estas ignorata, sed ke ghi vershajne trovighas sur la ghusta pozicio inter la lingvaro de Europo lau nombro de parolantoj. La katalunaj naciistoj eble foje pli objektive rigardu siajn problemojn kaj ne konstante ludu la rolon de la ofenditoj, kverelulo kaj grumblulo, kiuj chiam kulpigu aliajn. Alikaze ili perdos la simpation en Europo, same kiel la albanoj, serboj kaj aliaj etnoj, kiuj totale supertaksas sian signifon. Se Katalunio estus sendependa shtato (kiel Hispanio) , la kataluna lingvo estus sur la unua ebena de la lingva piramido en EU, sed tion vi ja mem scias.

Chi tiaj prelegoj estus pli objektivaj: <http://www.andorrasite.com/pdfs/Die%20Katalanische%20Sprache%20heute.pdf> au <http://www.ccc-iberoamerica.eu/L05-VorwortK.pdf>

Tamen lau tiu chi listo http://de.wikipedia.org/wiki/Amtssprachen_der_Europ%C3%A4ischen_Union la kataluna trovighas sur pozicio 14. Cetere estas okulfrape, ke la kataluna sekvas sur tiu pozicio tuj post la lingvoj, kiuj estas la oficialaj lingvoj en EU. Do, kiel katalunoj oni ne povas tro plendi.

Mi sugestas al la katalunoj pli aktive partopreni en la eurolingvistika debato (kiun cetere partoprenas ankau

interlingvistoj kaj e-istoj) .

Cetere, se iu lingvo estas ignorata - tiam estas la svisalemanaj dialektoj (au Schweizerdeutsch) , kiu (j) estas parolata (j) de kelkaj milionoj en Svislando same kiel la kataluna en Katalunio, kun la diferenco ke la svisalemana ghuas nenian oficialan statuson, ne estas norma skriblingvo (sed ja iomete literature uzata) kaj ke ghi estas alkalkulata al la germana lingvo. Vere tre speciala kazo, pri kiu neniu parolas. Kaj neniu plendas, ke oni ignoras ghin.

8. "Lingvo estas dialekto kun armeo sur ties ŝultroj"
??????????????

9. "Por informado kaj scienco taŭgus la angla, dum por la ekonomio, turismo, sociaj rilatoj devas esti neutrala lingvo kiel Esperanto. "
Kompleta stultajho.

10. "Lingvistoj ne scias kio estas lingvo, dum nelingvistoj jes. "
Kompleta stultajho.

11. "La itala estas ja artefarita lingvo el la toskana, la bolonja, la sicilana"
Malghuste. La itala "unueca" lingvo estis kreita surbaze de la florenca dialekto.

12. "Mi laciĝis prui al la serboj ke la kroata estas aparta lingvo kaj al la kroatoj ke ĝi estas serba. "

Chu serboj kaj kroatoj interesighas pri tio, ke Pajo lacighis rilate al tiu demando ? :-)
Mi dirus, ke la diferencoj inter la kroata kaj serba estas proksimume tiom grandaj kiel inter la austra kaj bavara. Inter la serba kaj kroata ekzistas nur fonetikaj, leksikaj kaj ortografiaj diferencoj, kaj nature lau la skribmaniero (latina/cirila) . Prefere necesus distingi inter ŝtokava, ĉakava, kajkava kaj ene de la ŝtokava inter la ekava, ijekava kaj ikava variantoj, por lingvistike gvidi racian diskuton.

Sed sendube Pajo scias chion tion tre glate, alikaze mankus al li slavistike scienca klereco rilate al tiu demando, kion mi ne esperas.

Sed principe mi trovighas en la sama situacio kiel Pajo: Mi simple lacighis klarigi chiam la samon - ekde 30 jaroj, kaj devas konstati, ke neniu shangho okazas. Pro tio mi eksighis el chiu Eo-organizajhoj (krom UEA) .

13. "85 % de la vortoj en la serba, kroata, montenegra, bosnia samas. "

Bone, eble ech pli, depende de la kazo (organizovati-organizirati ktp. , en Zagreb oni diras kolodvor, en Beograd stanica, ktp.) . Necesus klarigi la ceteron, ekzemple kial iuj bosnianoj insistas pri tio, ke ilia lingvo nomighu bosnia, au che la montenegranoj montenegra. La alian flankon de la medalo oni ne mencias - tio estas la nova shovinismo de kroatoj kaj serboj, kiuj elsarkis "serbismojn" kaj "kroatismojn" en siaj respektivaj lingvoj (lingva purigo) . Bosnianoj akcentas "turkismojn", sed lige kun la europa inklino mi dubas, chu ili tiom fieras pri tiuj. Simple sekvu la esencajn diskutojn de kompetentaj slavistoj (sed ne de kroataj, serbaj kaj bosniaj shovinistoj kaj propagandistoj) kaj vi povas ekscii la veron pli pri tiu temo.

14. Zlatko: "Edukado kreas kulturon. Nun mi senats min sloveno (24 jarojn mi loĝas en Slovenio) . Mi estas reedukita tie. "

Tio estas interesa kaj bela konstato lige kun la kroata-slovena antagonismo. Sed nenio speciala ekzemple por svisoj. Ekzistas miloj da eksaj jugoslavo au turkoj, kiuj sentas sin svisoj (en la dua au tria generacio) .

15. "Interna Mongolio uzas la aramean alfabeton"

Necesus diri, ke unuavice ghi bazighas sur la ujugura shrifto.

16. "Nur 50-60% de la loĝantaro en Luksemburgio estas lokanoj. Tie parolatas la franca kaj la germana. "

Supozeble Ertl ne forgesis mencii la letzebuergan, iom analogan identigilon kiel la alemanaj dialektoj en CH.

17. "Laŭ Daniele Vitali en EU devas enkondukiĝi ankaŭ la minoritataj lingvoj. (kimra, gaela, euska, kataluna, aragona ks) "

Kion signifas "enkondukiĝi" ? Tiuj lingvoj jam okupas sian adekvatan pozicion en Europo lau siaj signifo kaj rolo en la lingva piramido. Estas ja grave helpi al tiuj lingvoj pluvivi, kaj tio ja estas la tasko i. a. de la etnistoj kaj homrajtaj organizajhoj en la unuopaj membroshtatoj. Vershajne oni volis diri, ke tiuj lingvoj volus ricevi la saman statuson kiel la oficialaj lingvoj de la membroshtatoj de EU. Au chu la kimran au euskan oni instruu en Albanio au Portugalio, au Katalunio ?

18. "La limoj en EU fariĝas aeraj. "

Ne la limoj farighis aero, sed la limaj leghoj kaj la limkontrolistoj. Limoj chiam restos en Europo, kaj limaj leghoj kaj limkontrolistoj povos reaperi en ajna momento, kiam la shtatoj konsideras tion necesa kaj oportuna. Malgrau Ŝengeno, limkontrolistoj kontrolas "malantau" la iamaj limoj, kaj sufiche rigore.

19. "Albanio restis 50 jarojn plej izolite pro la komunisma ferkurteno kaj post 1990 jaro same izolite pro Eŭropa ferkurteno. "

Oni povas kompreni la frustrighon de albanoj rilate vojaghadon en EU ktp. , sed tia komparo ne estas akceptebla, kaj ne necesas klarigi kial ghi ne estas akceptebla. Iuj albanoj eble ancorau ne komprenis, ke EU ghuste celas forigi limojn, tiel ke oni povu vojaghi, aute au aviadile, ekzemple de Portugalio al Estonio kaj Finnlando kaj inverse sen ajna pasporta kontrolo. Lau mia scio ankau al Albanio oni povas nun sufiche facile veturi, kio dum 50 jaroj tute ne estis la kazo. Do, oni estu kontenta pri tiuj atingoj. Albanio, la civiliize plej postrestinta nacio de Europo, simple devas ancorau iom atenti kaj pacienci.

Cetere, antau nelonge BiH-anoj ricevis la okazon libere (provcele) vojaghi en la ŝengena spaco - tiu eble plej grava novajho por BiH-anoj ne aperas en via "protokolo".

Cetere la eterne daura gurdpropagando el la tempoj de Enver Hoxha estas jam teda kaj osceda. La ilirico de la albanoj, precipe de la lingvo, estas en la scienco kontestanta. La moderna albana lingvo estas forte influita de la latina lingvo kaj de kaj slavaj elementoj. Char pri la iliria lingvo ekzistas treege malmultaj lingvaj restajhoj (preskau neniuj) , tiel ghis nun ne eblis dedukti la albanan lingvon al la iliria substrato. Tiu dubinda aserto pri la iliria deveno de la albana lingvo kaj ke la albana estas la plej praa lingvo en Europo do estas nura propagando de la albana politiko kaj parte sukcese defendita nur de albanoj plus iuj simpatiantoj.

20. "Esperantistoj similas al ciganoj, ili formas diasporon sed kapablas skribi kaj parolas ununuran lingvon. "

Dankon pro la komplimento. Supozeble temas pri sherco, char mi ne volus esti komparata kun cigano.

21. "Manko de pozitivaj leĝoj en EU rilate la komunan lingvon. "

??????????

22. "Momente esperantistoj sabotas sian aferon. "

Chu mi ghuste legis ? Bv. liveri la koncernan prelegon pri tiu temo.

23. Kian politikon oni atendu de UEA?

Jes kian ?

24. Tiaj frazoj estas tro banalaj: "Ekstrema naciismo, estas racia stultaĵo", "EU estas politika organismo", "Esti eŭropano estas senti ligiĝon al Eŭropo", "La pola estas rimedo por krei polecon. ", "La celo de Esperanto estas komuniki. ",

Mi tute ne celas elpashi kiel Besserwissero au de Oberstuda Konsilisto, sed nur atentigi pri iuj dubindaj punktoj en tiu protokolo de asertoj, kiuj okulfrapis min kaj kiujn oni devus atenti - kaj se necese ghustigi - en estonta libroeldono. Mi sugestas, ke en tia libro aperu nur centprocente fidindaj raportoj, dum la Stammtiŝo-babiladon oni povus aperigi en interreto kiel diskutkontribuon. Se aperas protokoloj kun strangaj eldiroj, ekzistas la danghero, ke oni konsideras la e-istojn kiel nekvalifikitajn kaj neplibonigeblajn strangulojn, reakciulojn kaj sektemulojn. Tian reputacion la Eo-movado bedaurinde jam parte havas, kaj estus utile, se oni povus plibonigi tiun reputacion, ne pere de stulta propagando kaj fanfaronado kaj manipulado kaj falsado de informoj, sed per serioza laboro, al kiu apartenas ankaŭ seeble plej ghusta esprimmaniero.

Dankon pro la konsidero. aK

Fine kelkaj balkanaj kantoj, unu montenegra, albana, bosnia kaj makedona, kiuj aparte plachas al mi
<http://www.youtube.com/watch?v=Jd8RyrqaHTs>
http://www.youtube.com/watch?v=L_r0SS0FVqE&feature=related
<http://www.youtube.com/watch?v=HNDYobtvgh4&feature=related>
http://www.youtube.com/watch?v=E_s68XUbAQo&NR=1

Prelego

Bardhyl Selimi (Albanio)

Kion alportos albanoj al EU?

Resumo

En Suda Italio estas la urbo de Lecce kiu pli malproksimas al la alia suditala urbo, Bari ol al Vlora, suda albana marborda urbo. Sed italoj tie scias malpli pri albanoj ol pri kalifornianoj!

Demandite pri Albanio la fama brazila futbalisto Pelle deklaris: mi neniam vizitis Albanion sed mi aŭdis pri fama dramaktoro Aleksander Moisiu, pri fama verkisto Ismail Kadare kaj pri fama humanisto Patrino Tereza, ĉiuj estis albanoj, tio sufiĉas por mi konkludi ke temas pri granda popolo.

Albanio restis 50 jarojn plej izolite pro la komunisma ferkurteno kaj post 1990 jaro same izolite pro Eŭropa ferkurteno..

Spomenka Ŝtimec en sia libro "Geografio de miaj memoroj" priskribas bele tiun situacion rilate ŝiajn klopodojn por renkonti albanajn esperantistojn.. Same Mari Luiz el Francio..

Albanio kuŝis inter la greka civilizacio kaj tiu romia.

Grekoj, iliroj, trakoj kaj makedonoj estis la popoloj de la Okcidenta Balkanio. La patrino de Aleksandro la Granda estis ilira

Skanderbeg kun albanoj siatempe enirigis sin en la eŭropam novan historion defendante kristanismon kontraŭ otomanoj.

Iliroj donacis 9 imperiestrojn al la Romia Imperio, albanoj 45 vezirojn al otomana imperio. Mehmet Ali Paŝao iniciis dinastion 130 jaran en Egiptio moderna. La sendependeco de Grekio ege dediĉitas al la heroismo de albanoj.

Kie loĝas nun albanoj En pluraj ŝtatoj en siaj propraj teritorioj kaj konsistigas almenaŭ 8 milionoj...

Ĉefaj urboj...

Kion alportos albanoj: la lingvon praan, plej malnovan en Eŭropo, la interreligian solidarecon, la tradiciojn kulturajn originalajn, unikajn, virtojn..

Albanio estas plenuminta jam antaŭkondiĉojn por eniri EU.

Demandoj:

Samir :ĉu ankoraŭ Albanio certigas al si petrolon komplete

Nikola:la rilato de la albana al la ilira ankoraŭ malfermita problemo, ekz. Mara terminologio...

Bardhyl: Leibnitz la fondinto de la kompara lingvistiko estas konfirmita la iliran devenon de la albana, mem mia nomo Bardhyl konsistas el bardh= blanka kaj yll= stelo

La nomoj de grekaj diinoj eksplicatas nur per la albana
Epitafoj en Mediterana baseno eksplicatas nur per la albana...

Tezoj de la prelego “Kion alportos albanoj al EU”

1. Kion reprezentas albanoj, kie ili loĝas

Albanoj reprezentas apartan popolon de Eŭropo, je historio almenaŭ tiom praa, kiel latinoj kaj grekoj kun originala lingvo kaj kulturo, inter ambaŭ jam menciitaj.



La albana nacia flago



Sudokcidenta Balkanio



Regiono de Ĉamerio en Grekio

Ili loĝas en propraj teritorioj en la sudokcidenta parto de la Balkana Duoninsulo aktuale en kelkaj ŝtatoj:

-en Respubliko de Albanio, je surfaco ĉirkaŭ 28 000 km² kaj loĝantaro je 4. 5 milionoj.

- La ĉefurbo Tirana je pli ol 700 000 loĝantoj, aliaj gravaj urboj estas Durrës, Vlora, Elbasan, Shkoder, Korĉa, Berat, Gjirokaster, Fier ka.

-



Tirana 2005 Durrës Shkodër



Urbo de Korça, orienta Albanio Berat, muzea urbo, heredaĵo de UNESCO

- en Respubliko de Kosovo, je surfaco ĉirkaŭ 11 000 km², je loĝantaro ĉirkaŭ 2. 2 milionoj. La ĉefaj urboj jenas: Prishtina (ĉirkaŭ 600 000 loĝantoj) , Prizeren, Gjakove, Peje, Mitrovice, Gilan, Ferizaj ka.



Bulvaro en Prishtina Karakteriza domo de Gjakova

- En Makedonio je surfaco ĉirkaŭ 30 000 km² kaj loĝantaro pli ol 2 milionoj. En la ĉefurbo Shkup (Skopje) loĝas 200 000 albanoj. La ceteraj estas en Tetove, Gostivar, Kercove, Struge, Ohrid, Diber (Debar) , au laŭlonge la okcidenta parto de tiu lando.



Strato "Marŝal Tito" en Skopje Kvartalo en Ohrid Manastir (Bitolje)

- en Montenegro je surfaco ĉirkaŭ 14 000 km² kaj loĝantaro 700 000. Albanoj loĝas ĉefe en suda parto en la urboj Ulqin, Tivar, Tuz ka laŭlonge la landlimo kun Albanio kaj Kosovo.

-en Grekio, je surfaco ĉirkaŭ 132 000 km² kaj loĝantaro 11. 5 milionoj. Albanoj loĝas en nordokcidenta paro laŭlonge de Jonia maro apud la albana landlimo (regiono nomata Ĉamerio) .

- en la suda Serbio laŭlonge la landlimo kun Kosovo kaj Makedonio (regiono de Presheva, Kushumlia ka) .

Same, albanoj loĝas en Italio (Kalabrio kaj Sicilio) kie ili migris antaŭ ses jarcentoj, en Turkio (kelkmilionoj) kie ili migris dum la Otomana periodo, en aliaj balkanaj landoj (Bosnio kaj

Hercegovinio, Kroatio, Slovenio, Bulgario, Rumanio. Multaj albanoj loĝas ankoraŭ en Egiptio, Sirio kaj aliaj arabaj landoj.

Post la dua mondmilito albanoj fuĝis amase ankaŭ en la landojn de Okcidenta Eŭropo (Germanio, Svisio, Britio, Belgio ka) , en Amerikon (Usono, Kanadio ka) , en Australion.



Do, Albanoj konsistigas apartan etnon kaj popolon plejmulte loĝanta en Balkanio sur sia teritorio en respublikoj de Albanio, Kosovo, Makedonio, Montenegro, Serbio kaj Grekio.

La diasporo loĝas plejmulte en Turkio, Grekio, Italio, Germanio kaj alilande, alikontinente.

Laŭ proksimuma censo, la unuaj konsistigas popolon je 8 milionoj, do ne tro malpli ol kelkaj aliaj popoloj en nia duoninsulo.

Laŭ la esploristo Vinçenco Skorsa (je unua duono de XIX jc) :

“Estas jam pruvite danke al la lingvo de albanoj ke ili (iliaj prapatroj) loĝas en Eŭropo almenaŭ ekde tempo de grekoj kaj keltoj” (Malte Brun, Universala Geografio, p. 118) ..

Same estas konata fakto ke la invadoj ne sukcesis detrui la pratempan rason, nek krei novan el la invadintaj popoloj, nek novan lingvon, nek novan religion, nek novajn morojn.

Tio estis fama epoko, kiu devus vekti la atenton de historiistoj kaj hodiaŭ rakontiĝu kiel eksterordinara fakto sur la longa vojo de popoloj, ĉar nur eksterordinara oni povus nomi la entutan detruiĝon de popolo tiom granda, tiom etendiĝinta kaj enradikiĝinta de jarcentoj sur la loĝata de ili teritorio. Sed bedaŭrinde historio apenaŭ parolas pri tiuj okazintaĵoj.... ”

2. De kie ili devenas?

Laŭ diversaj sciencaj dokumentoj ĉerpitaj de argeologiaj elfosaĵoj, lingvistikaj esploroj, antropologio, etnografio, genetiko, kaj similaj, albanoj devenas rekte de iliroj, granda popolo loĝiginta la tutan Okcidentan Balkanion ekde suda Bavario ĝis la Golfo de Ambrakio kaj ekde Danubo ĝis Adriatika kaj Jonia maroj.



La etendiĝo de iliroj Popola albana danco

Shqipëria (Albanio) -lando de agloj

Vico da argumentoj estas jam konvinkinta la lingvistojn ke la albana popolo kaj ties lingvo devenas de praaj iliroj. (Menciindas la esploristoj: **Gotfrid Vilhelm Lejbnitz** (1646-1717) ; **Hans Erich Thunmann** (1746- 1778) ; **Johan Georg fon Hahn** (1811- 1869) ; **Franz Bopp** (1791- 1867) ;



Karakteriza domo en la urbo Shkoder (Norda Albanio) Kastelo 2400 jara de Shkoder

La fundamentaj indikoj de ĉiu kultura tuteco aŭ etna tuteco estas kiel jene:

- 1) ĝia socia-ekonomia organiziveco, en nia kazo la familioj, klanoj aŭ plilarĝiĝintaj gentoj en montetaj urboj, fortifikitaj per muroj je ŝtonoj grandaj ne gravuritaj.
- 2) La ritoj de entombigo, la kadavro bruliĝinta aŭ enterigita en kavaĵoj ĉirkaŭita per ŝtonoj, atestanta pri la adoro de la suno kaj altamaso da ŝtonoj aŭ tero nomita tumo.
- 3) Ceramiko, kiu aperas en la tuta lando per la samaj formoj kaj labormajstreco.

Tiuj tri faktoroj pruvas la kulturen unuecon de la tuta ilira spaco. Same, arkeologoj alportas atestaĵojn de la kultura kontinueco de la balkana loĝantaro ekde la tempo de Neolito ĝis tiu de Bronzo kaj Fero, kiam unuafoje ekhelpas nin la manuskriptoj plej praaĵ pri pelazgoj kaj iliroj.

3. La albana lingvo

La lingvo agnoskiĝas kiel unu el la fundamentaj karakterizaĵoj de etna komunumo aŭ de popolo. La historia studo de la lingvo, la proceso de evoluo dum jaroj kaj la kompara studo kiu evidencigas la similaĵojn kaj diferencojn rilate al la aliaj lingvoj, povas kompletigi la arkeologion en siaj klopodoj por lumigi iun prahistorian kulturon. Sed samkiel la rumana kaj lituana, ankaŭ la albana estas pli malfrue kultivita ol la aliaj lingvoj indoeŭropaj.

Multaj fremdaj esploristoj estis interesitaj pri ĝia deveno. La fondinto de la kompara filologio, (Leibnitz), estas skribinta en la letero XV adresita al Mathurin Veyssiere de la Croze, (1661-1739) :

“Vi estas donacinta min multe da plezuro sendante libron kaj vortaron de la albana lingvo, el kiuj mi scias kia estis ja la lingvo de la praaĵ iliroj”. Cetere Leibnitz instigis siajn amikojn kompari la armenan lingvon kun tiu kopta kaj albana, kun Teutona kaj Latina.

- **Herodoto** diris ke pluraj nomoj de la grekaj dioj estis pelazgaj (antaŭiliraj), kiuj nun povas eksplicite per la albana lingvo. Ekz **Jea** - la diino de mondo en la albana estas **Jet-a**- vivo, mondo

Ere - diino de vento, en la albana estas **era**- vento.

Teti - diino de maro, en la albana **Deti**- maro

Deo dio de rikoltoj kaj tero, en la albana Dhe- tero

Athina – diino de scio, en la albana **E thena**- diritaĵo, parolo.

Saturno, vokita same **Habir**, , la manĝinto de siaj filoj, en la albana signifas la samon **Ha**= manĝi, **bir** = filo.

Delio estis la kromnomo de Apolono (dio de Suno) . Lia insulo nomiĝis Delo, dum Efesti estis dio de fajro. En la albana **Diell**= suno, dum **i-desti**= objekto enflamiĝinta.

Zeuso estis nutrita de kaprino, pro tio oni adoris lin je formo de virŝafo. En la albana **Dhi** = kaprino

Afrodito – en la albana **Afer dita**= apud la tago,

Atlaso, - en la albana **at**-patro **las**- lashte- =praa

Kirono- dio de medicina arto- en la albana **sheron**- kuracas

Nemeso- dio de la venĝo- en la albana **nem**= malbeni

Erebo- dio de la mallumo- en la albana **erret** = mallumo

Kaos- aro de konfuzita materio- en la albana **ka**= virbovo, fakte mem la koncepto reprezentigis en la formo de virbovo (rememoru en la latina Taurum Dei, la vorto Kaukazo- monto de virbovo) .



Albanoj dum geedziĝfesto Mezepoka bazaro en Kruja Popola danco

La studoj montras ke **la albana** estas evoluinta el la ilira kiel **memstaran lingvon** iam inter IV kaj VI jc post Kristo. Tial la grekaj kaj la latinaj luĵoj ne devas esti penetrinta rekte al la albana, sed antaŭe en la iliran kaj de tie al la albana. La iliraj toponimoj, la malnovaj iliraj nomumoj de la urboj, riveroj kaj montoj estas konservitaj en la nuntempa albana lingvo kaj nur en la albana. Estas jam trovitaj pli ol **300** tiaj nomoj kiel **Shkodra, Drini, Tomorri** menciataj de pratempaj grekaj kaj romiaj geografoj kaj historiistoj. La reguloj de la historia fonetiko eksplikas la transirojn de **Scupi al Shkupi, Scodra al Shkodra, Lissus al Lezha, Durrachium al Durrës, Drinus al Drin, Mathis al Mat**.

La propraj iliraj nomoj daŭre uzatas en la nuntempa albana, kiel ekz. **Agron, Teuta, Bardhyl, Gent**. Prof. **Mahir Domi** estas identiginta **800** tiajn nomojn. La diversaj terminoj por la faŭno en la albana lingvo atestas ke tiu ĉi popolo estas vivinta laŭlonge de la marbordo en la samaj regionoj samkiel la iamaj iliroj.



Kulturaj monumentoj en Albanio Kastelo de Gjirokaster

Albanoj dividiĝas je lingva vidpunkto en gegoj kaj toskoj. Tiu disbranĉiĝo de la lingvo laŭ la lingvistiko ne estas malnova. La suda Toska de la finiĝo de Mezepoko, kiel ĝi aperas en la idiomo de niaj kolonioj en Grekio kaj en Italio, proksimiĝas al la norda Gega de XVI kaj XVII jarcentoj.

Kiel ajn ni volus ekspliki tion ĉi, ŝajnas ke la unueco de la lingvo, la komuna malnova albana, estas vivinta ĝis la Supra Mezepoko, en ĝiaj ĉefaj formoj pli longe ol la komuna rumana. Gegoj kaj toskoj dividiĝas siaflanke en gentoj kaj subdialektoj.

La eksteraj kaj internaj transpasoj okazas ĉi tie kiel kie ajn laŭgrade. La grandaj diferencoj kiuj evidentiĝas en tiuj regionoj je vidpunkto de loĝmaniero aŭ kostumoj, mildiĝas per mezaj formoj, kiuj entenas ion el la ambaŭ flankaj polusoj.

4. *Religio ĉe albanoj kaj ties interharmonieco.*

En Albanio la kristanismo estas apostoleca, ĉar ĝi estas enkondukita ĉe arberoj rekte per la buŝo de apostuloj de Jezu Kristo kaj ekdisvastiĝis en Ilirion ekde unua jarcento post Kristo kiel neleĝa religio. Apostulo Paŭlo skribas en la jaro 57 ke *“de Jeruzalemo kaj ĉirkaŭe ĝis Ilirio mi estas servinta por la reviviĝo de Kristo, klopodante evangelizi tie, kie la nomo de Kristo ne estis konata”*.



Ortodoksa preĝejo en urbo de Korĉa Gjergj Kastrioti- Skanderbeg Mauzeleo

Albanio estis transformiĝinta en sanktan landon dum la tempo de Skanderbeg ĉar tiu ĉi estis protektanta kristanismo (en XV jc) , tiam kiam Papo de Romo kaj Patriarĥo de Bizanco kvereliĝis inter si.

Tiutempe la sola lando kristana kiu ne pagis tributon al Sultano estis Arbëria. (Albanio) . Gjergj Kastrioti-Skanderbeg, filo de princo de Kruja, estis alinomita « Protektanto kaj atleto de Kristanismo » kaj frakasis dum 25 jaroj la osmanajn armeojn entuziamigante tiel per siaj faroj kaj akirante la dankemon de la tuta kristana mondo kie ajn ĝi troviĝis. Skanderbeg kaj papo kreis fortajn interrilatojn cele al la defendo kaj kaj altiĝo de sankta preĝejo. Tio koincidis al la ideoj de Skanderbeg kaj ties nobeluloj pri la sorto de sia reĝlando en Balkanio kaj Eŭropo.

Post la morto de Skanderbeg Sultano entreprenis kampanjon de konvertiĝo de albanoj al islamo pere de privilegiaĵoj kaj impostdevigoj (ekz. Defŝirmeja aŭ dangoimposto, kie ĉiu familio devus doni filon kiel jeniĉero. Tiu imposto ofte devigis tutan vilaĝon elmigri aliloken. Parto konvertiĝis ŝanĝante nur la nomon, sed daŭrigante siajn krisnajn ritojn. Estas konataj kazoj kiam la viro estis islamano dum la virino kristanino aŭ inverse. (Frang Bardhi, 1637)

Tamen, kiel kristanismo, tiel ankaŭ islamismo ne fanatizigis la albanan nacion kiu ĉiam prikonsideris la nacion unue ol la religiecon. Sekve albanoj estas karakterizataj dum jarcentoj de elstara religia solidareco, kio tenis ilin unuiĝinta kontraŭ asimilajn kaj ruinigajn agadojn de fremdaj potencoj en Balkanio. En Albanio ne okazis tio kio okazis ja en Grekio post la jaro 1821 aŭ en iu alia lando, kie la religia fanatismo kreis ŝtaton ortodoksan fundamentisman aŭ islamisman.



Simpozioj pri interreligia solidareco enlande

5. Etnopsikologiaj karakterizaĵoj de albanoj

Kvankam Albanio estis lokiĝinta inter Oriento kaj okcidento, ties popolo konsistigis etnan, geografian, historian, kulturan kaj etnopsikan unuon (vivmaniero, domekpaĵoj, fortikaĵoj, folklore, melodioj, homnomoj kc) .

Albanoj reprezentas komunan tipon etnopsikan kaj antropologian. Ekz. la antropologia konstruo estas la sama, precipe de kranio, (Adriatika raso, de Svisio ĝis suda Albanio, la sama brakicefala tipo) . Cetere, malnoveco de kunvivo en Eŭropo, disponebleco por komuna kunvivo, rezistado (kontraŭ diversaj okupantoj) , sendependemo kaj malsubigitemo.

Dominanta psikologio ĉe albanoj, laŭ pluraj esploristoj, rilate la sintenon al la ceteraj etnaj malplimultoj enlande estis toleremo, bonkomprenemo, kunlaboremo kaj reciproka respekto al la ties religio kajnacieco.

La sento de libereco ĉe albanoj estas io interna, tre profunda kaj neŝanceliĝebla. Tio esprimiĝas en proverboj kiel:

La nacia sento estas dominanta ĉe albanoj. Kiam oni demandas ilin kio estas? La respondo tuj venas: Mi estas albano!

Aliflanke, la psikologio de milito kaj malamo ne estas aparteco de albanoj. Ili estas soifaj por klerigado kaj kulturiĝo.

Ili malestimas la primitivismon, subiĝeblon, ekstreman toleremon, rompitan volon, demagogion, arogantecon, trompecon, avidecon.

Jen kelkaj moralaj kaj naciaj valoroj:

Honoro al la flago, alvoko al milito, graveco de Beso, honoro al la virino, al la decidoj de maljunuloj, respekto al pano, gasto ks.

Beso, donita parolo, plenumenda eĉ per via sangoverŝo, estas estimate pli ol la riĉeco, saĝeco kaj scio.

Tion kion en la civilizitaj landoj certigis la polico, ĉe albanoj realigis la Beso. Ĝi konsideriĝas kiel idealo antaŭ kiu eĉ la plej sovaĝa individuo subiĝeblas, fariĝas pli humaneca, pli sociema, komuniĝema. La albano akceptas amike kaj varme eĉ la malamikojn kiam li eniras sian hejmon. (Ĉar laŭ ili “la hejmo de albano estas por Dio kaj por Gasto”) . La perfideco estas malvirto rare trovebla ĉe albanoj- skribis Hobbhouse, kunvojaĝanto de Lordo Bajrono. Albanoj ne mortigas nek enprizonigas la malamikon dum la milito. Tia nobla tradicio verŝajne ankoraŭ konserviĝas nur ĉe albanoj..

LITERATURO

- 1 Hivzi Islami, “Shqiptarët në Jugosllavi” (Albanoj en Jugoslavio)
- 2 Historia e Popullit Shqiptar-tekst mësivor, Tiranë, botim 2000 (Historio de la Albana Popolo, lernolibro por mezlernejanoj, Tirana, eldono de la jaro 2000)
- 3 Albania-a patrimony of European values- Edition of the Ministry of Tourism, Tirana 2001 (Albanio heredejo de Eŭropaj valoroj, eldono de Ministrejo pri Kulturo kaj Turismo, Tirana 2001)
- 4 Aldo Bumçi : “Maqedonia dhe shqiptarët”. (Makedonio kaj albanoj)
- 5 Blerim Çela : “Shqiptarët në shekuj” (Albanoj dum jarcentoj)
- 6 Cristina Maesutoviç : “Elena Gjika dhe shqiptarët e Rumanisë” (Elena Gjika kaj albanoj de Rumanio)
- 7 Diaspora shqiptare e Bukureshtit, Flaka, 14-16 prill 2001 f 10 (Albana diasporo de Buĥaresto, ĵurnalo “Flaka”, 14-16 aprilo 2001 p. 10)
- 8 Edith Durham : Brenga e Ballkanit (La maltrankvilo de Balkanio)
- 9 Edwin Jacques, Shqiptarët, historia e popullit shqiptar nga lashtësia deri në ditët tona, botim Tiranë 2003 (Albanoj, historio de la albana popolo ekde pratempo ĝis nuntempo, eldono Tirane 2003)
- 10 Eqerem Çabej : Shqiptarët midis Lindjes dhe Përëndimit (Albanoj inter Oriento kaj Okcidento)
- 11 Fejzulla Shehu : Shqiptarët e Maqedonisë (Albanoj de Makedonio)
- 12 Frrok Zefiç : “Shqiptarët kelmendas në Hitkocv dhe Nikshiç” (Albanoj el Kelmendo en Hitkocv kaj Nikŝiĉ)
- 13 Gazeta “Bashkimi” 20 korrik 1996 “Në Kroaci flitet edhe shqip” Ĵurnalo “Bashkimi” 20 julio 1996, “En Kroatio oni parolas ankaŭ albane”
- 14 George F. Williams : Shqiptarët (Albanoj)

- 15 Jerak Karaiskaj, Shqipëria e vjetër, studim gjeografik, etnografik, historik (La malnova Albanio, geografia, etnografia kaj historia studo)
- 16 Grup autorësh nga Prishtina, “Pellazgët, ilirët etnikë” (Grupo de aŭtoroj el Prištino, “Pelazgoj, la etnaj iliroj”)
- 17 Hamit Kokalari, Kosova-djepi i shqiptarizmit, Tiranë 1944 (Kosovo = lulilo de albanismo, Tirane 1944)
- 18 Hysen Çobani : Arqipelagu i diasporës shqiptare i parë nga Zvicra (Arhipelago de la Albana Diasporo rigardata de Svisio)
- 19 Ismail Kadare: “Shqiptarët në kërkim të një fati të ri” (Albanoj serçante novan sorton)

- 20 Jugosllavia dhe shqiptaret, Atdheu, 4 korrik 1995, f 7 (Jugoslavo kaj albanoj, ĵurnalo “Atdheu” 4 julio 1995, p. 7)
- 21 Lekë Previzi, Luan Doda, Shqipëria –vështrim historik nga origjina në ditët tona (Albanio-historia trarigardo ekde origino ĝis nuntempo)
- 22 Lutfi Dervishi : “Shqiptarët në Ballkan” (Albanoj en Balkanio)

- 23 Muhedin Ahmeti : “Rreth përhapjes së Islamit te shqiptarët” (Ĉirkaŭ la disvastiĝo de Islamo inter albanoj)
- 24 Ne, shqiptaret e Greqise, Klan, 27 korrik 1997, f. 23-25 (Ni, albanoj de Grekio, revuo “Klan” 27 julio 1997, p. 22-25)
- 25 Nesip Kaçi : Shqiptarët në Perandorinë Osmane (Albanoj en Osmana Imperio)
- 26 Nje shekull per Shqiperine dhe shqiptaret ne SHBA, “55”, 13 tetor 2001, f 14 (Jarcento por Albanio kaj albanoj en Usono, ĵurnalo “55” 13 oktobro 2001 p. 14)
- 27 Raport për zhvillimin njerëzor në Shqipëri, 2000, buletin informativ (Raporto pri la homa evoluo en Albanio, 2000, informa bulteno)
- 28 Revista “URA” - 2000-2003 (Revuo “Ponto” 2000-2003)
- 29 Rexhep Qosja “Realitet i shperfillur” (Neglektita realo)
- 30 Rexhep Zllatku : Takim me shqiptarët e Italisë dhe Greqisë (Renkontiĝo kun albanoj de Italio kaj Grekio)
- 31 Robert d’ Angely: “Enigma”, Paris 1990, Tiranë 2001 (La Enigmo, Parizo 1990, Tirana 2001)
- 32 Rumania.. , Shekulli 29 qershor 2000, f 11 (Rumanio, ĵurnalo “Shekulli” 29 junio 2000, p. 11)
- 33 Sabit Uka : Gjurmime mbi shqiptarët e Sanxhakut e Nishit (Esploroj pri albanoj de la Sandĵako de Nish)
- 34 Shqipëria në shifra, botim i Institutit të Statistikës. (Albanio en ciferoj, eldono de Instituto pri Statistikoj)
- 35 Shqiptaret, ilegale e perjetshem te tokes helene, Koha Jone, 29 qershor 1997, f. 6 (Albanoj la eternaj malleĝuloj de la helena tero, ĵurnalo “Koha Jone” 29. 6. 1997. p. 6)
- 36 Shqiptaret arbereshe ne Itali, Liria, 29 nentor 1995, f 6 (Albanoj arbreŝoj en Italio, ĵurnalo “Liria” 29. novembro 1995, p. 6)
- 37 Shqiptaret e Bukureshtit, Ballkan, 3 tetor 2001, f 14-15 (Albanoj de Buĥaresto, ĵurnalo “Balkanio” 3 oktobro 2001 p. 14-15)
- 38 Shqiptaret e Italise, “55”, nr 3, 7 janar 2000 f 8 (Albanoj de Italio, ĵurnalo “55” nr 3, 7 januaro 2000 p. 8)
- 39 Shqiptaret e Maqedonise, “Rilindja”, 8 janar 1997 f. 9 (Albanoj de Makedonio, ĵurnalo “Rilindja” 8. 1. 1997 p. 9)
- 40 Shqiptaret e Maqedonise, Liria, 5 shtator 1996, f. 5, 7 Albanoj de Makedonio, ĵurnalo “Liria” 5 septembro 1996, p. 5, 7
- 41 Shqiptaret e Velezhit dje, sot, neser, Flaka, 25-30 prill 1-4 maj 2000, (Albanoj de Velez hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, ĵurnalo “Flaka” 25-30 aprilo, 1-4 majo 2000)
- 42 Shqiptaret jane shumicë ne Maqedoni, Tema, 1-2 prill 2001, f 13 (Albanoj estas plimulto en Makedonio, ĵurnalo “Tema” 1-2 aprilo 2001, p. 13)
- 43 Shqiptaret myslimane te Ballkanit, “55”, 24-25 mars 1999, f 13 (Islamaj albanoj de Balkanio, ĵurnalo “55” 24-25 marto 1999, p. 13)

- 44 Shqiptaret ne Amerike, emigrantet e pare, Kolonja 1, 7 mars 1999, f 8 (Albanoj en Usono, la unuaj elmigrantoj, ĵurnalo "Kolonja" 1, 7 marto 1999, p. 8)
- 45 Shqiptaret ne Ballkan dhe ne Evrope, Zeri i Popullit, 11 shkurt 2001, f 18-19 Albanoj en Balkanio kaj Eŭropo, ĵurnalo "Zeri i Popullit" 11 februaro 2001, p. 18-19)
- 46 Shqiptaret ne Greqi (historia e tyre), Balli i Kombit, 25 qershor 2000, f 7 (Albanoj en Grekio (ilia historia), ĵurnalo "Balli i Kombit", 25 junio 2000 p. 7)
- 47 Shqiptaret ne Itali, Zarë, Srem, Bullgari, Rumani, Bross, Turqi, Egjipt, SHBA, Itali te mesme dhe Napoli, Kosova nr 2, korrik 1996 f. 8 (Albanoj en Italio, Zara, Srem, Bulgario, Rumanio, Bross, Turkio, Egipcio, Usono, Meza Italio kaj Napolo. Ĵurnalo "Kosovo" Nr 2 julio 1996 p. 8)
- 48 Shqiptaret ne Mal te Zi, Rilindja, 24 janar 1999, f 11 (Albanoj en Montenegro, ĵurnalo "Rilindja", 24 januaro 1999, p. 11)
- 49 Shqiptaret ne Maqedoni nuk jane grup etnik, Rilindja 29 maj 1997, f 6 (Albanoj en Makedonio ne estas etneca grupo, ĵurnalo "Rilindja" 29. 5. 1997 p. 6)
- 50 Shqiptaret ne Maqedoni nuk jane minoritet, Rilindja Demokratike, 12 korrik 1997, f 1 (Albanoj en Makedonio ne estas minoritato, ĵurnalo "Rilindja Demokratike" 12. julio 1997 p. 1)
- 51 Shqiptaret neper shekuj, Flaka, 4-8 janar 2001, f 6-7 (Albanoj dum jarcentoj, ĵurnalo "Flaka" 4-8 januaro 2001, p. 6-7)
- 52 Si mund te zgjidhet çeshtja e shqiptareve ne Greqi- Shqiptaret etnike ne Greqi, Tema, 19 maj 2001, f 18 (Kiel povas solviĝi la afero de albanoj en Grekio- Etnaj albanoj en Grekio, ĵurnalo "Tema" 19 majo 2001, p. 18)
- 53 Skënder Rizaj : Shqiptarët- një popull i ndarë (Albanoj-popolo disdividita)
- 54 Udhëtim i gjate per te shqiptaret e Ukraines, Gazeta Shqiptare 11 shkurt 1997, f 10 (Longa vojaĝo al la albanoj de Ukrainio, ĵurnalo "Gazeta Shqiptare" 11. 2. 1997)
- 55 Veli Veliu: Shqiptarët sipas udhëtarëve francezë (Albanoj laŭ francaj vojaĝintoj)
- 56 Zana K. Lito : "Shqiptarët në Greqi" (Albanoj en Grekio)

Aldona vendebla literaturo albane kaj fremdlingve

- 1 Robert Carver
La eldonejo John Murray (publishers), 1998. titolo "Accursed Mountains" (La Malbenita Altmontaro". Reeldono de la eldonejo Flamingo 1999).
- 2 Aristidh P. Kola:
Arvanitasit dhe prejardhja e grekëve, vështrim historik-folklorik-politik-gjuhësor, (Arvanitoj kaj la deveno de grekoj, historia-folkloro-politika-lingva trarigardo), Tiranë 2002
- 3 Prof. H. H. Robert d'Angely
Enigma...e prejardhjes së racës dhe të gjuhës së pellazgëve, Ariasve, Hititëve, Helenëve, Etruskëve, Grekëve ose Shqiptarëve etj...është zgjidhur
(Enigmo de la deveno de raso kaj lingvi de pelazgoj, ariaso, hititoj, helenoj, etruskoj, grekoj aŭ albanoj ka estas jam solvita) Tiranë, shtëpia botuese (eldonejo) "Toena", 1998
- 4 Ismail Kadare
Eskili- ky humbës i madh (ESKILO-tiu granda perdinto)
- 5 Jacques Bourcart
(Jaro 1921) Viti 1921
Udhëtim nëpër Shqipërinë e vjetër (Vojaĝo al malnova Albanio)
- 6 Stephen Schwartz: Kosovo, background to a WAR"
- 8 Miranda Vickers, James Pettifer, "Albania- from anarchy to a Balkan Identity", 4500 L
- 9 Dr. Oakley- Hill, "An Englishmen in Albania",
- 10 Harry Hodgkinson, "Skanderbeg",
- 11 Paulin Kola, "The search of Greter Albania", 12 Stephanie Seli Wandner- Sievers, Fischer edition, "Myth and hystory",
- 13 Edith Durham, "High Albania- a victorian traveller's Balkan Odyssey", 3000 L

- 14 Bernd I. Fischer, "Albania at war 1939-1945",
 15 Edith Durham, "Albania and the albanians- selected articles and letters 1903-1942",
 16 "Albania- a patrimony of european values", (guide of albanian history and cultural heritage) ,
 17 "Icons of Butrint",
 18 "Albania through art",
 19 "Ikonat bizantine dhe pas bizantine në Shqipëri", (Bizancaj kaj postbizancaj ikonoj en
 Albanio) ,
 20 "Albania folk costumes", vol I-II-III,
 21 "Vendbanime dhe banesa popullore shqiptare" (Loçlokoj kaj loçejoj albanaj" Tirana 2000,
 22 "Albania"- guide,
 23 "Welcome to Albania",
 24 "Albania- guide to it's material treasures",
 25 "Albania- the Bradt travel guide",
 26 "Il Kanun"- Le basi morali e giuridichi della societa albanese",
 27 "Le Kanun de Lekë Dukagjin",
 28 "Der Kanun",
 29 "Gjuha shqipe për të huajt dhe shqiptarët jashtë atdheut", (La Albana lingvo por fremduloj kaj
 albanoj ekster la patrio) ,
 30 Mihallaq Shuti, "Proverba krahasuese, Proverbi comparati, Comparative proverbs,
 31 "Shqipëria arkeologjike", (Arkeologia Albanio) ,
 32 Ferid Hudhri, "Shqipëria nëpërmjet arkitekturës" (Albania tra arkitekturo) ,
 33 Greg Campbell, "The road to Kosovo- a Balkan Diary", 3200 L

Libraria (Librovendejo) "Adrion" books@adrionltd.com tel ++355 4 240 018

(La kurzo de albana valuto Lek estas 1 euro= 139 L)

Miranda Vickers, James Pettifer, "Albania- from anarchy to a Balkan Identity", 4500 L

Dr. Oakley- Hill, "An Englishmen in Albania", 4000 L

Harry Hodgkinson, "Skanderbeg", 3300 L

Paulin Kola, "The search of Greater Albania", 3200 L

Stephanie Seli Wandner- Sievers, Fischer edition, "Myth and hystory", 3200 L

Edith Durham, "High Albania- a victorian traveller's Balkan odyssey", 3000 L

Bernd I. Fischer, "Albania at war 1939-1945", 5000 L

Edith Durham, "Albania and the albanians- selected articles and letters 1903-1942", 3200 L

"Albania- a patrimony of european values", (guide of albanian history and cultural heritage) , 20 \$

"Icons of Butrint", 4800 L

"Albania through art", 4900 L

"Ikonat bizantine dhe pas bizantine në Shqipëri", (Bizancaj kaj postbizancaj ikonoj en Albanio) , 3400

L"Albania folk costumes", vol I-II-III, 3 X 4500 L

"Vendbanime dhe banesa popullore shqiptare" (Loçlokoj kaj loçejoj albanaj" Tirana 2000, 800 L

"Albania"- guide, 2500 L

"Welcome to Albania", 1000 L

"Albania- guide to it's material treasures", 2000 L

"Albania- the Bradt travel guide", 4000 L

"Il Kanun"- Le basi morali e giuridichi della societa albanese", 2300 L

"Le Kanun de Lekë Dukagjin", 1800 L

"Der Kanun", 1800 L

"Gjuha shqipe për të huajt dhe shqiptarët jashtë atdheut", (La Albana lingvo por fremduloj kaj albanoj
 ekster la patrio) , 1500 L

Mihallaq Shuti, "Proverba krahasuese, Proverbi comparati, Comparative proverbs, 15 euros

“Shqipëria arkeologjike”, (Arkeologia Albanio), 3500 L

Ferid Hudhri, “Shqipëria nëpërmjet arkitekturës” (Albania tra arkitekturo), 3900 L

Greg Campbell, “The road to Kosovo- a Balkan Diary”, 3200 L

Beletraĵoj

KUJTIM AGALLIU

Albana Fabelo

La konsilo de la patro

Iam, en iu fora vilaĝo, vivis maljuna viro. Li estis tre riĉa, sed soleca kvankam li havis filon.

Sed la filo estis petolema kaj mallaborema. Kreskite sen patrino, la filo apenaŭ konis povrecon, nek suferojn. La vivo por li estis tute senĝena.

Pasis jaroj. Iun malvarmegan kaj glacian tagon la viro malsaniĝis kaj enlitiĝis. La sanstato peziĝis kaj neniu esperigis lin je vivo. Konvinkite ke lia vivo pendis de fadeno li vokis sian filon ĉe la liton. Li volis eldiri lin sian lastan vorton, antaŭ la morto:

- Mia filo! — balbutis la maljunulo je pala mieno. — Mia vivo estas rompiĝanta. Post iom da tempo mia animo elkorpiĝos. La menso ne plu funkcios kaj mian korpon oni enterigos.

La filo plorante, gapadis kaj aŭskultadis sian patron, ne perdante iun vorton.

- Mi volis doni vin konsilon, - daŭrigis li. — La riĉaĵon kiun mi postlasos vin, mi estas akirinta per penoj kaj ŝvitoj tutan mian vivon. Mi ne volas ke vi elspezu ĝin por bagatelaĵoj, tuj post mia forpaso. Bonvolu elspezu ĝin prudente kaj eĉ duobligu laŭeble. Ne permesu al fiuloj formanĝi ĝin envane.

Se vi ne agos laŭ mia parolo kaj iutage vin vi trovos senmone, estus pli bone morti ol pluvivi!

- Enorde, patro!

- En la gastoĉambro, sur la meza trabo mi estas liginta ŝnuron. Nu, vi nur laĉigu ĝin kaj pendiĝu per ĝi-daŭrigis mallaŭte la oldulo.

- Jes patro, mi agos laŭ via konsilo!

Tiom diris la patro kaj li ne plu kapablis paroli. Fermis la okulojn por ĉiam.

La morgaŭon la tuta vilaĝo ĉeestis lian entombiĝon, plore kaj dolore. Mortinte la oldulo, la tuta riĉaĵo restis en la manoj de la filo, kiu tuj komencis elspezi ĝin per manplenoj. La heredita mono akirita senŝvite estas ja tre facile elspezebla.

La junulo ekfrekventis la drinkejon de la vilaĝo kie restis ĝis malfruaj horoj de la nokto. Lia kompanaro estis jam homoj fiinteresemaj kaj impertinentaj. Eĉ ankaŭ tiuj kiuj ĝis tiam, apenaŭ salutis lin surstrate, certe nur por profiti de lia naiveco.

Kelkaj petis lumonon eĉ por bagatelaĵoj. La junulo respondis donante multe da mono sen mantremante. Kompreneble, temis ja pri la patra mono!

Finfine, iutage, li restis senmone, la riĉaĵo elĉerpiĝis. Nuntempe, kiam enpoŝe apenaŭ restis monero kaj ĉiuj amikoj forlasis lin, li rememoris pri la patra konsilo. Sed tro malfrue. La riĉaĵo foriris porĉiam! Li ne plu havis iamajn amikojn kun kiuj pasigis longajn horojn en la drinkejo. Neniu lumonigis lin, ankaŭ la ceteruloj kiuj lumonis de li, ne pensis pri la ŝuldoredono.

La vivo nigriĝis antaŭ liaj okuloj. La junulo pripensiĝis kaj pripensiĝis, du diurnojn ne trovante ian solvon por eliri el tiu stato. Laboro ne imageblis ĉar li ne kapablis fari ion. Li nur ĵuris kaj sonĝis pri nova ŝanco por reprovi sin, por sekvi la konsilon de la patro. Finfine, li decidis pendigi sin. Eniris la gastoĉambrom, laĉigis la ŝnuron, surgrimpis seĝeton, ĉirkaŭmetis la ŝnuron en lian kolon kaj forigis la sieĝeton.. sed kia miro!

Pro la korpopezo, la trabo rompiĝis kaj li trovis sin sur la planko. Tuj poste el la plafono ekenverŝiĝis flukso da oraj moneroj, flavaj, blindigaj. La junulo restis konfuzita pro okazintaĵo.

Post kiam li rekonsciigis li enmetis rapide la orojn en novan fortan poton. Tiumomente li denove rememoris la patran konsilon.. Eklarmiĝis. Ĝuste nun li komprenis la veron de la patra konsilo. Ĉu povus iu patro konsili sian unusolan filon pendigi sin?!

- Dankon, patro!- murmuris la pentita knabo. - Vi ja donis min saĝan lecionon. Per ĉi tiu mono mi pluvivos kaj ĵuros ke mi eĉ triobligos ilin per mia laboro. Post kelkaj monatoj li edziĝis kaj feliĉe vivis ĝis maljuniĝis. Li postlasis genepojn, al kiuj ĉiamtempe li rakontis la konsilon de lia saĝa patro. Enesperantigis B. S.

Prelego

Nikola Uzunov

TRADUKADO DE ESPERANTO EN LA BULGARAN LINGVON

Tradukado de Esperanto en nacian lingvo estas relative malofta fenomeno. Ĝenerale ne abundas tradukitaj verkoj de Esperanto en ajnan nacian lingvon. *William Auld* tradukis iujn esperantajn poemojn en la anglan. *Wilhelm Verloren van Themaat* tradukis en la nederlandan kaj publikigis en 1981 antologion de poezio el Esperanto. En 1982 *William Auld* tradukis sian poemon **La Infana Raso** en la anglan. En 1987 en Budapeŝto aperis en la hungara antologio de esperanta literaturo, titolita **Mi Vizitis Mian Farmon**. En 1981 en *Novjorko* aperis libro kun poemoj de *Julius Balbin* en Esperanto kaj paralela traduko en la anglan kun titolo **Strangled Cries**.

Jen estas preskaŭ ĉio, kion mi sukcesis ekscii pri tradukoj de esperantaj verkoj en naciajn lingvojn. Eble estas ankoraŭ, sed la fakto estas, ke ili ne abundas.

Kiel statas la afero en Bulgario?

Antaŭ pli ol okdek jaroj *Ivan Dobrev* tradukis la poemojn **La Vojo**, **La Espero** kaj **Ho, mia kor'** de *L. L. Zamenhof*. En 1932 estis eldonita en Sofio la biografia libro de *Edmond Privat* **La Vivo de Zamenhof** en la bulgaran fare de *Dimitro Simeonov*. Antaŭ tio en 1924 la sama aŭtoro aperigis en la bulgaran la kongresajn paroladojn de *L. L. Zamenhof*.

Ĉi tie menciindas ankaŭ la libro de *E. Ajsberg* **Nun mi jam komprenas la radion!** Ĝi estas popularscienca verko pri radiotekniko, originale verkita en *Esperanto*. Ĝi estis verkita en 1935 kaj tuj post ĝia apero la libro estis tradukita en kelkdek lingvojn, inter kiuj ankaŭ en la bulgaran.

En 1992 aperis en la bulgara la libro de *Ivo Lapenna* **Retoriko** en traduko de *Nikola Stranĝanski*.

Estas konataj ankaŭ tradukoj de iuj libroj de *Julio Baghy*, *Jean Forge*, *Tibor Szekely*, *Istvan Nemere* kaj aliaj aŭtoroj, kies verkoj estas tradukitaj en plurajn naciajn lingvojn.

Do, dum pli ol cent dudek jaroj la bulgaraj esperantistoj prezentis al la neesperantista publiko tre malmulte el la originala esperanta literaturo. Tiu fakto pruvas, ke ni ne donas ankoraŭ al ni precizan imagon pri la grandega signifo de similaj tradukoj. Kiumaniere, se ne per tradukoj de belarta literaturo ni montros al la neesperantistaro en Bulgario, ke Esperanto ne estas lingvo senspirita, artefarita, malviva, sed lingvo vivanta, kapabla transdoni eĉ la plej subtilajn kaj komplikajn sentojn kaj pensojn de homoj.

Ĉu estas intereso al la Esperantaj tradukitaj verkoj, flanke de la neesperantistaro en nia lando.

Al tiu demando respondas en sia libro **Tradukarto** *Venelin Mitev*, konata bulgara esperantisto, ĵurnalisto, poeto kaj tradukisto. En 1988 li estante redaktoro de la bulgarlingva revuo **Pamorama-Esperanto** komencis traduki kaj publikigi surb ĝiaj paĝoj poemojn de *L. L. Zamenhof*, *Marjorie Boulton*, *William Auld*, *Tibor Szekely*, *Baldur Ragnarson*, *Edwin de Kock*, *Eli Urbanova*, *Mauro Nervi* kaj aliaj esperantaj aŭtoroj. Li ricevis multajn dankleterojn el diversaj regionoj de la lando, kio pruvas, ke tiaj tradukoj estas utilaj kaj li promesis daŭrigi tiun ĉi tradicion.

Kion postulas tradukado de prozo kaj poezio de Esperanto en nacian lingvon? Ĉu ĝi diferencas de la tradukado en Esperanton?

Oni povus respondi, ke tradukado de Esperanto postulas tion, kion postulas tradukado de nacia lingvo en Esperanton – bonegan posedon de ambaŭ lingvoj kaj krome talenton de tradukisto.

La majstreco de la tradukado konsistas en tio, ke la frazoj kaj la vortoj de la originalo estu transdonitaj en la traduko tiel, ke la leganto ne nur komprenu la sencon de la teksto, sed li ankaŭ eksentu la stilon, la emocian efikon, la bildecon kaj la melodiecon de la originalo.

Do por fari bonan tradukon, estas necese:

1. Koni perfekte la du lingvojn;
2. Havi talenton de tradukisto;
3. Posedi bonan propran stilon en la tradukata lingvo.

La tradukado de Esperanto en naciajn lingvon tamen havas ankaŭ iujn kromajn specifaĵojn. En Esperanto ekzistas multaj vortoj, al kiuj estas malfacile trovi ekvivalentojn en la naciaj lingvoj. Tiaj estas multaj verboj, kunmetitaj de prepozicio kaj substantive kaj multaj vortoj formitaj per afikoj, ekzemple:

<i>surtabligi</i>	<i>ecaro</i>
<i>albordiĝi</i>	<i>ulo</i>
<i>elpoŝigi</i>	<i>ujo</i>
<i>ilaro</i>	<i>esperantistaro</i> kaj multaj aliaj.

Kiel ni traduku por neesperantistoj la esperantajjn vortojn:

aliĝi kaj *aliĝilo*?

Ordinare oni ne tradukas, sed transdonas rekte ilin, elzemple en la bulgaran, kaj tio kaŭzas plejparte ridindaĵon aŭ simple nekomprenon, kio tamen montras la malriĉan lingvaĵon de la tradukanto. Bona tradukisto ne devus al si permesi tion. Oni ĉiam devas serĉi la plej konvenan kaj trafan esprimon en la nacia lingvo.

Ni scias, ke la bulgara lingvo estas tre riĉa je verbotempoj, dum en Esperanto oni uzas ordinare preskaŭ ĉiam nur la simplajn verbotempojn: *preteriton*, *prezencon* kaj *futuron*. Eĉ en la *literatura Esperanto* malsimplajn verbotempojn oni uzas tre malofte.

En sia *Fundamento de Esperanto* L. L. Zamenhof tute ne parolas pri malsimplaj verbotempoj, ĉar dank' al afikoj, prepozicioj kaj la tri fundamentaj verbotempoj, li povis esprimi ĉiujn kompleksajn verbotempojn. Tial la tradukisto devas atente konsideri la prepoziciojn kaj transdoni en la bulgaran ĉiujn nuancojn:

<i>mi legis</i>	<i>mi satlegis</i>
<i>mi tralegis</i>	<i>mi antaŭlegis</i>
<i>mi finlegis</i>	<i>mi relegis</i> ktp.

Aktivajn kaj *pasivajn participojn*, *participojn -adjektivojn*, *participojn-substantivojn* kaj *participojn-adverbojn* oni ofte tradukas per verboj, sed ne per participaj formoj, ekzemple:

<i>dormanta – който сну</i>	<i>skribata – който се пише</i>
<i>dorminta – който снесше</i>	<i>skribita – който се пишеше</i>
<i>dormonta – който ще сну</i>	<i>skribota – който ще се пише</i> ktp.

Jen estas kelkaj ekzemploj:

<i>Ŝia hararo estis brilanta sub la suno kiel oro.</i>	<i>Косата ѝ блестеше на слънцето като злато.</i>
--	--

<i>Ne al glavo sangon soifanta</i> (Zamenhof)	<i>Не към меча, що за кръв жадува</i> (Ĥristo Bâĉvarov-1923)
--	---

<i>La sidanta homo ekstaris.</i>	<i>Човекът, който седеше, стана.</i>
----------------------------------	--------------------------------------

<i>Marŝante li kantis.</i>	<i>Той вървеше и пееше.</i>
----------------------------	-----------------------------

<i>Lerninte la lecionon ŝi eliris.</i>	<i>Като си научи урока тя излезе.</i>
--	---------------------------------------

<i>Veturonte al la Kongreso ŝi rapidis prepari la valizon.</i>	<i>Понеже щеше да пътува за конгреса, тя бързаше да приготви куфара.</i>
--	--

Ofte oni tradukas la verbajn substantivojn en Esperanto per bulgara verbaj substantivoj, sed mi ĉiam preferas traduki ilin per verboj, ĉar laŭ mi ili sonas pli nature en la bulgara moderna lingvo:

*Ĉe mia forveturo ŝi estis
tre malĝoja.*

*Когато си заминавах, тя беше
много тъжна.*

*Antaŭ mortigo de urso
ne vendu ĝian felon.*

*Преди да си убил мечката,
не продавай кожата ѝ.*

En Esperanto oni ofte ne uzas artikolon en proverboj, difinoj, sentencoj, sed en la bulgara ĝi devas nepre esti, ekzemple:

*Leĝo pasintaĵon ne tuŝas. /Z/ Законът не засяга минали работи. Malriĉeco ne estas
malvirto. /Z/ Бедността не е порок.*

En Esperanto al ĉiu kvalita adjektivo respondas alia kun kontraŭa signifo farita per la sufikso mal-:

*juna – maljuna
bela – malbela
nova – malnova* ktp.

Ni ne devas nepre traduki ilin per vorto kun la sama radiko. Ja, en la bulgara estas tiel multaj sinonimoj. Ni devas serĉi sinonimon depende de la kunteksto. Ekzemple: *maljuna* ni povus traduki per kelkaj aliaj sinonimoj bulgaraj:

Maljuna: възрастен, състарен, остарял, дърт, застарял, преминал години, престарял, на възраст, старичък, възстар, дядо, старец, ветеран, вехт, увяхнал, извехтял, взел-дал, влязъл в архивата, отколеиен, някогаиен, отдавнаиен, допотопен, отишъл в пенсия ktp.

Kiam ni tradukas de Esperanto en la bulgaran ni devas ĉiam memori, ke nia lingvo, dank' al sia muljarcenta historia disvolviĝo, fariĝis treege riĉa kaj esprimplena. Do tradukante, ni devas ĉiam serĉi konvenajn sinonimojn kaj viglajn dialogajn formojn, ekzemple:

*“Dum la tuta tempo mi estis
tre maltrankvila”.*

*През цялото време бях
много неспокоен.*

*/През цялото време седях
като на тръни/.*

Estu tre singardema!

Бъди много предпазлив.

/Отваряй си очите/.

*Li estas homo de nia
kategorio.*

Той е човек от нашата категория.

/Той е човек от нашата черга/.

*Ili treege konvenas unu al
la alia.*

Те много си подхождат един

друг. /Те са си лика прилика/.

Tradukado de prozo. Tradukado de poezio altiras la atenton de relative malmultaj esperantistoj, dum en la okuloj de multaj tradukado de prozo ne estas tiel malfacila laboro. Ja, en ĝi mankas rimoj, diversaj verspiedoj, strikta ritmo.

Tio estas plena trompiĝo. Tute ne sufiĉas posedi bone, eĉ perfekte Esperanton, por okupiĝi pri tradukado de prozaĵoj.

Unu el la kriterioj pri sukceso estas tralegi la tradukon voĉe. Ĉiu bone tradukita teksto estas facile legebla.

La prozo havas sian ritmon kaj neniu devas ĝin ignori. Sen sento pri ritmo de la frazo eĉ la plej grandaj penoj de la tradukanto ne helpas al li transdoni perfekte la stilon de la aŭtoro, nek permesos al li transdoni la veran sencon de la vorto kaj de la prozaĵo. Fojfoje oni trovas la ĝustan vorton nur en kelkaj sekundoj, sed en iuj okazoj la

serĉado de konvena vorto aŭ esprimo, de ĝusta tono, povas forpreni kelksemajnan, eĉ plurmonatan laboron.

Oni devas forĵeti la opinion, ke tradukado de prozo estas pli facila afero ol tradukado de poezio. En la prozo estas pli komplike kapti la ritmon, kiu plejparte estas ĉefa portanto de ideoj. Oni devas emfazi ĉiun vorton kun substrekita senco. Tradukante prozaĵon ni tute ne rajtas agi ruze. Tie ĉi ni ne povus eviti malfacile kompreneblajn vortojn aŭ frazojn, ni ne povas rerakonti ilin, ni ne sukcesos pravigi la deviojn per serĉado de adekvataj verspiedoj kaj rimoj, kiel estas dum tradukado de poezio. Fine la traduko de la prozaĵo devas aspekti kiel la originalo, se la aŭtoro verkus ĝin en la bulgaran.

Mi volus ilustrii miajn vortojn per iuj tradukoj de prozaĵoj de esperantaj aŭtoroj en la bulgaran lingvon.

Jen estas fragmento de la biografia libro de *Edmond Privat Vivo de Zamenhof*, kiun faris en la bulgaran *Dimitro Simeonov* en 1932:

“Kiam residis Zamenhof, denove akklamata senfine, multaj okuloj estis malsekaj. Tre simple, tre sincere pasis horo, malfacile rakontebla. Io flugis en la aero, ia blovo eterniga. Ĉiufoje, kiam ĉeestinto rememoras tiun horon, larmo brilas en rigardo lia. Nova tempo ja naskiĝis tiam. Eĉ ne mondmilito povis ĝin detrui.

Ho, kara naiveco de l' Bulonja tempo!... ”

„Kogato Zamenhof sedna, otново безкрайно акламиран, много очи бяха мокри. Съвсем просто, съвсем искрено мина час, който мъчно може да се опише. Нещо трептеше във въздуха, някакъв дъх на вечността. Винаги, когато онзи, който е присъствал, си спомни за този час, сълза блесва в погледа му. Ново време се роди тогава. Дори и световната война не може да го унищожжи.

О, скъпа наивност на Булон!“

Jen ankoraŭ unu traduko de Esperanto el la libro de *Julio Baghy Koloroj*, fragmento el la rakonto *Kancero de animo*:

“Akra terurkrio puŝiĝis el al lipoj de la virino kaj samtempe averte delikate poziĝis mano sur la ŝultron de la kapitano. La mano de la kuracistmajoro.

Dum la longminuta silento la mieno de la kapitano disciplinite rigidiĝis. Li ekregis sian emociion, klinis sin super la notojn de la protokolo. La virino duonlaŭte ekploris; kvazaŭ rompita en ŝiaj tuta korpo kaj animo, ŝi ekparolis lace, rezigne, inerte...”

„Остър вик на ужас се изтръгна от устните на жената и в същото време предупредително нежно на рамото на капитана легна ръка. Ръката на майора-лекар.

През дългата минута млчание изражението на капитана дисциплинирано остана непроницаемо. Той овладя вълнението си, наведе се над бележките от протокола. Жената едва чуто заплака; сякаш прекършено в цялото ѝ тяло и душа, тя заговори уморено, покорно, инертно... “

Tradukado de poezio. Ĝi subiĝas al la samaj ĝeneralaj postuloj pri fideleco al la originalo, kiel ĉe tradukado de prozo. Tamen ĝi havas iujn specifajojn, ĉar la poezio diferencas de la beletro per *severa komponiĝo, ritmo, rimoj, plikomplektita enhavo, aparta bildoriĉeco, metaforoj.* Kaj ĉiuj ĉi elementoj devas esti nepre konsiderataj de la tradukisto kaj maksimume ĝuste reproduktitaj en la bulgaran.

Ni ne devas forgesi, ke tradukado de rimita poezio estas nur alproksimiĝo al la originalo, kaj kiel proksime al la originalo staros la tradukaĵo, dependas de la talento de la tradukanto.

Oni ne povus tuj diri kio estas la plej grava el la supre menciitaj postuloj, ĉar ĉio dependas de la konkreta strofo. Foje maksimume ĝuste devas esti tradukita iu grava penso, eĉ se la rimo iom lamos. Aliffoje ĝuste tiuj du aŭ tri vortoj devas resti en rima pozicio, eĉ se la senco iom ŝanĝiĝus.

Plej grave por la tradukanto de poezio estas, ke li imitu ĉiam la muzikon de la originalo. Tio signifas, ke li povas eĉ ne koni la nomon de la marŝmaniero de la verso – ĉu ĝi estas *jambo*, *trokeo*, *anapesto*... Li devas tralegi malrapide la esperanta originalo, kvazaŭ kantante ĝin kaj poste ordigi tiamaniere la vortojn en la tradukita teksto, ke ili imitu plene la muzikon de la originalo.

Por montri diversajn tradukstilojn de bulgaraj esperantistoj, mi prezentos tri tradukvariantojn de la unuaj du strofoj de *La Espero* de L. L. Zamenhof:

*“En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.*

*Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la human tiras familion;
Al la mond’ eterne militant
Ĝi promesas sanktan harmonion. ”*

Jen kiel tradukis tiun poemon *Ĥristo Bâcvarov* en 1923:

*„Чувство ново дойде на земята,
Повик силен днес света оглася,
На зефира леки на крилата
От место на място се разнася.*

*Не към меча, що за кръв жадува,
Не към разпри тика то човека;
На света, безспирно що воюва,
сговор обещава то до века!“*

Jen kiel tradukis la saman poemon *Ivan Dobrev*, same en 1923:

*„У човека ново чувство трепна,
Мощен зов се носи над земята;
На зефира нежен със крилата
Нек лети той – вредом вси да сепне!*

*Не към кръвожадни меч ни вика,
Не зове ни той на бой отчаян;
На света, де кръв безспирно блика,
Мир свещен и братство той вещае!“*

Kaj jen ankaŭ la lasta konata al mi traduko de *Venelin Mitev*, nia konata tradukisto kaj poeto, kiun li faris en 1988:

*„Ново чувство бликна над земята,
Над земята мощен зов отеква,
И на нежен вятър със крилата
Днес от град на град лети, не секва.*

*Не към меч жадуващ кръв неспирно,
Той подтиква днес рода човешки;
На света от памтивек размирен,
Обещава сговор свят и вечен. “*

La fama bela versaĵo de *Zamenhof* **Ho, mia kor'** same estis tradukita de kelkaj bulgaraj esperantistoj. Mi prezentos ĉi tie du tradukojn. Jen la originalo:

*Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!*

*Ho, mia kor', post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'!
Sufiĉe! Trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!*

Unue jen estas la traduko de *Ivan Dobrev* de 1932:

*Не бий, сърце, не бий така тревожно,
В гърди ми ти недей се мята все!
Главата ми се люшка изнеможено –
Стихни, сърце!*

*Кажи, кажи след дълъг труд, о, Боже,
Ще победа ли с млади си ръце?
Смири се! Спри туптежа си тревожен!
Стихни, сърце!*

Kaj jen estas la lasta konata al mi traduko de la poemo, farita de *Venelin Mitev* en 1988:

*Не бий, сърце, не бий така тревожно,
Не блъскай лудо в моите гърди!
Не, не издържам повече, не мога!
Смири се ти!*

*Кажи, сърце, дали в часа заветен,
След дълъг труд ще победа, кажи?
О, стига! И туптежа си най-сетне
Смири и ти!*

De tiuj tri tradukoj kaj de aliaj malnovaj kaj pli novaj tradukoj, oni povas konstati, ke ankaŭ la tradukoj maljuniĝas. La leĝoj de la tempo estas senkompromisaj en la sfero de la tradukarto. Pro la senĉesa evoluo de la lingvoj, pro la plialtiĝanta nivelo de la kulturo, pro la novaj, pli grandaj kaj pli precizaj postuloj de la legantoj, la tradukoj maljuniĝas. La daŭro de la vivo de ĉiu aparta traduko estas malsama. Ekzemple la tradukoj de *Ivan Dobrev*, faritaj antaŭ pli ol okdek jaroj, ankaŭ nun sonas freŝe kaj efikas sur nian poezian senton.

Nun mi volas al vi prezenti alian originalan poemon en Esperanto **Fabelo pri bulgara knabino**, verkita de *Venelin Mitev* en 1964:

Fabelo pri bulgara knabino

*Mi longe vojaĝis,
veturis kaj naĝis,
mi longe vin serĉis
ĝis nun;*

*tra dudek montaroj,
kaj multe da maroj,
sub vento, kaj suno,
kaj lun'!*

Revante pri via
talio gracia,
banata de l' suna
leviĝ',
pri via rigardo
brilanta kun ardo,
soifa al
vivofeliĉ',

mi kreis fabelon –
palacan kastelon,
kun lago kaj ora
ŝtupar',
kun ombra ĝardeno,
de kie matene
vin vekos per kantoj
birdar'.

Tra dudek montaroj
kaj multe da maroj,
sub vento, kaj suno
kaj lun',
Mi kredis, ke iam
vi venos kaj tiam
vi restos en mia
hejmland';

Mi staris kaj miris,
vin ĝue admiris
kun plena, serena
anim',
ĉar vin, mia bela
feino fabela,
mi trovis en mia
proksim'!

mi longe vojaĝis,
veturis kaj naĝis,
kaj longe vin serĉis
ĝis nun.

Kaj jam lacigita
de l' iro kun miro
mi haltis subite –
al mi
belega knabino,
samkiel feino,
kun svelta gracia
tali',

kun ĝoja rigardo,
brilanta kun ardo,
soifa al
vivofeliĉ'
alpaŝis tremkore
kaj floro-odore
ŝi flustris: "Ĉu estas
ja, vi?"

ĝi staras gastame
kaj baldaŭ aklame
akceptos vin, kara
vagant'!"

Mi longe vojaĝis,
veturis kaj naĝis,
por fine kompreni,
ke pli
ravantaj knabinoj
en ĉiuj terlimoj
ne estas, ol estas
ĉe ni!

Nun mi prezentos mian tradukon du tiu bela poemo, kiun mi faris en 1986:

Приказка за българското момиче

Аз дълго пътувах, плувах	и стихове леех, окъпани в топли	За тебе копнеех лъчи,	И скитах, и И търсих те в чужда
Страна, През девет морета, полета,		за твоите блестящи и чудно искрящи	Реки и
Под слънце, и дъжд, луна.		от щастие сини очи!	И

*Създавах за тебе
Дворец най-вълшебен,
Със езеро синьо
Отвън,
С зелени дървета
Край него, отдето
Теб славей да буди
От сън!*

*През девет морета,
Реки и полета,
Под слънце, и дъжд,
И луна,
Аз дълго пътувах,
И скитах, и плувах,
И търсих те в чужда
Страна.*

*Когато умора
От път и от хора
Ме върна тук в мойта
Страна –
Прекрасно момиче
към мене изтича,
прично на горска
сърна,*

*със чудно блестящи
и нежно искрящи
от щастие сини
очи,*

*с усмивка в лицето
и с трепет в сърцето
пошепна ми: „Върна
се ти!*

*Аз дълго те чаках,
И вярвах, и плаках –
Ще дойдеш ти в родния
Град,
За радостна среща
В прегръдка гореща
Завърна се, пътничко
Млад!“*

*Това беше чудо,
Сърцето ми лудо
Ликуваше, бях
Окрилен!
Стоях и немеех –
Таз приказна фея
Открих аз тъй близо
До мен!*

*Аз дълго пътувах,
И скитах, и плувах,
И все пак разбрах аз
Накрай –
Такива, любима,
Момичета има
Единствено в родния
Край!*

Analizante la laboron de iuj konataj al mi trdukistoj, oni povus kompari la bonan tradukiston kun la bona aktoro. La tradukisto, same kiel la aktoro, ripetas malproprajn vortojn kaj frazojn, sed en la momento, kiam ili faras tion, la frazoj fariĝas iliaj. Ili akcentas, faras paŭzojn laŭ sama maniero, altigas kaj malaltigas sian voĉon, revivigas la skribitan tekston kaj emocias la publikon.

Se ekzistas spirita ligo inter la tradukisto kaj la aŭtoro, lia teksto sonos konvinke. Sed se mankas tiu ligo, la spektanto aŭ la leganto sentos odoron de ŝvito, li perceptos la vanan penon, la falson... Ve al tiu aktoro, ve aŭ tiu tradukinto!

Fakte la tradukado similas al verkado de originala literaturo kaj eĉ pli. Dum la aŭtoro, kies verko estas tradukata, tute ne devas koni la lingvon, en kiun oni tradukas lian originalan verkon, la tradukisto devas perfekte koni ambaŭ lingvojn. Oni fakte postulas, ke la tradukisto estu samtempe kaj Napoleono, kaj lia plej proksima intendanto – li havu la aglan rigardon de la unua, kaj la manian bagatelemon de la dua.

La tradukisto devas regi ne nur la du lingvojn, sed ankaŭ ĉion starantan malantaŭ tiuj ĉi lingvoj. Li devas aneksi tiun mondon al alia, tute diversa mondo, transportante ĉiun nuancon, aludon, tonalecon. Kaj fine li devas fari tiun ĉi penigan, preskaŭ nelaŭpovan, sed malgraŭ ĉio tre interesan, allogan operacion, sen meti sin en antaŭan lokon, sen surrajdi la ĉevalon. Li restas ĉiam en ombro. Li devas konsideri por sia plej granda triumfo la fakton, ke la leganto eĉ ne rimarkus lin.

En Bulgario ne estas multaj tiuj, kiuj povus permesi al si la plezuron okupiĝi kaj sin vivteni nur per tradukado de belarta literaturo. Kion povus diri esperanta tradukisto, se eĉ tradukistoj de la angla en la bulgaran, kiuj dum pli ol tridek jaroj okupiĝas pri tradukado de verkoj de usonaj kaj anglaj aŭtoroj, ofte plendas: “Mi ne estas tiel riĉa por okupiĝi nur pri tradukado!”

Estas vero, ke la honorarioj en Bulgario estas tiel mizeraj, ke oni ne povus vivteni sin per tradukado, eĉ de grandaj lingvoj. Tial praktike la tradukado en Bulgario ne estas profesio, sed kromokupo, ĉar eĉ la plej bonaj tradukistoj praktikas aliajn profesiojn. Ekzemple *Asen Grigorov* kaj *Ivan Dobrev* estis oficistoj, *Atanas Lakov* kaj *Venelin Mitev* – redaktoroj, *Nikola Aleksiev*, *Violin Oljanov*, *Kunĉo Válev* kaj *Donĉo Ĥitrov* – ĵurnalistoj ktp.

Mi volus fini mian prelegon pri tradukado de Esperanto en la bulgaran kun la espero, ke bonaj tradukoj de Esperanto en la bulgaran lingvon multiĝos. Nur tiel ni povus pruvi al neesperantistoj, ke Esperanto estas riĉa kaj esprimplena lingvo, ke ĝi jam posedas sufiĉe riĉan kaj ĉiuspecan belartan literaturon.

Tiel ni altiros al niaj vicoj novajn adeptojn kaj samideanojn, malgraŭ la nuna malfacilaĵoj.

Junio 2010, Haskovo

Nikola UZUNOV

Miaj memoraĵoj pri Esperanto

Tiranë, 22 janar 2011

Aŭtune 1962, mi estis lernanto ĉe la Konstruteknika Mezlernejo en Tirana kaj tiutempe mi partoprenis en la amatora cirklo de junaj verkistoj ĉe la Palaco de Kulturo “Ali Kelmendi”. Tie oni aperis afiŝon pri la malfermo de la lernokurso de la lingvo Esperanto. Kune kun mia amiko Bardhyl Mezini (Selimi) ni decidis aliĝi al tiu kurso.

La kurso okazis unufoje semajne kaj ampleksis grupon el 20-30 personoj. Instruis la inĝeniero Ĉefo (Ĉefo) Fico kiu certigis al ni broŝuron pri la lingvo E, same poŝlibreton pri la gramatiko kaj minimumo vortaro de Esperanto, albana vesio de similaj eldonaĵoj pri E. cirkulantaj en diversaj lingvoj. Kiam mankis inĝeniero Fico, lin anstataŭis inĝeniero Vasil Pistoli, kiu cetere surprizinde instruis al mi en la mezlernejo pri la konstrucia arto. Kompreneble tio ege ĝojigis min vidante lin ankaŭ kiel Esperanto - instuisto. Mi traktis lin simpatie ĉar ankaŭ dum la lecionoj en la mezlernejo li uzis la nordan akĉenton-dialekton de la albana (mi devenis ja el Nordo) .

Je la fino de la kurso inĝeniero Fico disdonis nin kelkajn adresojn de la esperantistaj asocioj en la landoj de la eksa Socialisma Tendaro, same tiun de UEA.

Ekde komenco mi ekkorespondis kun esperantistoj el la eksaj socialismaj landoj kun kiuj mi interŝanĝis leterojn, bildkartojn kaj poŝtmarkojn, same mi ricevis de ili kelkajn revuojn kaj librojn en la lingvo Esperanto. Tiam estis la lasta periodo de la amikaj rilatoj de Albanio kun orienteŭropaj socialismaj landoj kaj mi abonis la ĉinan revuon “El Popola Ĉinio”. Post kelke da korespondaĵoj kun ties redakcio, oni aperigis ankaŭ mian adreson en la revuo (jaro 1965) , prezentante min kiel aktivulon de Espeanto - movado en Albanio.

Tuj post la publikiĝo de mia adreso, mi konstatis grandan ondon de leteroj alvenantaj de diversaj esperantistoj el diversaj landoj ege interesataj ekcii pli multe pri Albanio kaj tiea movado per interŝanĝo de leteroj, bildkartoj, poŝtmarkoj. Tio kaŭzis grandan suspekton ĉe la organoj de la Ŝtata Sekureco tiutempe kiuj alvokis min en siaj oficejoj por enketado. Ili demandis min de kie venas tiuj leteroj tiom abunde el multaj landoj kaj devigis min finfine ne plu respondi al ili.

Kvankam mi obeis kaj ne plu respondis, miaj korespondantoj alskribis min de fojo al fojo.

Mi ne plu min okupis per Esperanto. Mi neniigis kaj forĵetis multajn leterojn, bildkartojn, revuojn kaj librojn en la lingvo Esperanto.

Aprile 1991, post la falo de la totalisma komunisma reĝimo, Gafur Muço, konata aktivulo de Esperanto sciigis min ke li jam fondis la Albanan Esperanistan Asocion, agnoskite de Ministerio pri Kulturo kaj Turismo. Li eĉ sendis min kopion de la agnoska decido, la statuton kaj la stampon de la asocio kaj petis min starigi ankaŭ en mia urbo Kukes la filion de la asocio. Mi faris tion kunlabore kun samideanoj Nehat Sokoli kaj Mimoza Bunjaku.

Kune kun ili ni komencis nian laboron por diskonigi kaj lernigi Esperanton en nia urbo. Unue en la urba gimnazio,

Samtempe mi revigligis mian korespondon kun esperantistoj el aliaj landoj. Ili certigis min literaturon diversan inkluzive de libroj, revuoj, gazetoj ks. Ankaŭ Gafur Muço liveris min kelkajn valorajn revuojn kaj librojn, el kiuj plej gravaj estis "Plena ilustrita vortaro de Esperanto".

En la jaro 1992, nederlanda esperantistino sponsoris mian vojaĝon por partopreni la 77an universalan kongreson en Vieno, sed mi ne sukcesis akiri la aŭstran vizon kaj tiel ĉio envanis.

Novembre 1993, mi ricevis invitilon por partopreni la unuan eŭropan kongreson de Esperanto en Pollando. Mia korespondanto el Ŝĉitno, Edmund Glebocki sendis garantiilon. Li eĉ atendis min en aeroporto de Varsovio kaj gastigis min en sia hejmo dum kelkaj tagoj. Tiel mi ĉeestis la sesiojn de tiu grava kongreso ekde 17-19 a de novembro 1993 en la urbo Piotekov Tribunalski de Pollando.

Kvankam mi loĝis kaj laboris en Kukes, mi daŭrigis miajn kontaktojn kun la aliaj albanaj esperantistoj, Bardhyl Mezeni, Vasil Pistoli, Rita Permeti kaj Gafur Muço, ĉiam pli oftece kaj pliiĝis niajn klopodojn por lernigi kaj diskonigi Esperanton en nia lando.

Ankaŭ la kontaktoj kun fremduloj pliiĝis. Dum miaj vojaĝoj eksterlande mi havis la okazon renkontiĝi kun pluraj esperantistoj el diversaj landoj, kiel en Bulgario, Rumanio, Germanio, Nederlando, Italio, Usono ka.

Dum la periodo marto-junio 1999, kiam okazis la amasa eliro de la popolo de Kosovo el siaj teroj pro teroro de la serba armeo mi ricevis plurajn leterojn el esperantistoj solidareciĝintaj kun tiun popolon kaj strebantaj plifaciligi la ties suferadojn, unuigante familiojn disdividitajn pro la perforta forlaso de siaj teroj.

Ekde la jaro 2011, post kiam mi instaliĝis en ĉefurbo, mi estas akceptinta multajn esperantistojn el diversaj landoj, kiel Hungario, Ĉeĥio, Pollando, Belgio, Letonio ks kiuj gastis en mia hejmo longajn tagojn.

Shaban Hasani

Esperanto en la faka agado

Ĉu vi spertis ke kiam vi parolas pri temoj interesaj al certaj homoj, ĉi lastaj aŭskultuas vin volonte, eĉ respondas kaj diskutas kun vi. Se la instruisto mencias en siaj lecionojn faktojn aŭ kozojn kiuj interesas al gejunuloj, ĉi lastaj pli atentis lin, eĉ kiam temas pri matematiko...

Tiel ankaŭ pluraj revuoj en nia Esperantio, inkluzive de Internacia Pedagogia Revuo, Juna Amiko ks estus pli interesaj, sekve pli amasaboneblaj se oni legus en ili pri temoj interesaj ne nur je vidpunkto de lingva instruado, sed ankaŭ pri sociaj, sciencaj, ĉiutagaj problemoj de la vivo. Vidu ekz. la revuojn MONATO, La Gazeto, La Ondo de Esperanto, aŭ eĉ iama Bazaro modesta de Julia Simond kaj similaj kiuj estas vaste lagataj ĉe ni.

Tial multaj samideanoj- fakuloj estis allogitaj de tiaj esperanto organizaĵoj kiel OSIEK, kiu pritraktas almenaŭ unu fojon jare en speciala unusemajna kunveno sciencajn temojn enkadre de iu ĉeftemo elektita. Krome oni

aranĝas dum tiu semajno riĉan kulturalan programon. Ankaŭ la privata universitato en Karlovo (Bulgario) estrata de samideano Boĵidar Leonov allogas ĉiujare en kelktaga konferenco junie plurajn profesorojn kaj aliajn klerulojn el diversaj fakoj kaj landoj por prelegi kaj diskuti ankaŭ por viziti turismejojn kaj kulturejojn lokajn.

En la UK kongresoj bonŝance oni aranĝas ĉiutage prelegsesiojn kiujn partoprenas eminentaj fakuloj kaj kie oni povas akiri poentojn por la bakalaŭriĝo kaj magistriĝo enkadre de AIS. Ĉi lasta mem organizas BUS kaj SUS sesiojn en diversaj landoj kie la studentoj povas sekvi diversajn necesajn lernokursojn.

Mi mem estas spertinta profitdone la sciencajn kaj fakajn kunvenojn de OSIEK (respektive en Trieste kaj Timișoara) , kunvenojn en Karlovo (junie 2009, junie 2010) , universitaton enkadre de UK (Florenco kaj Roterdamo) kaj laste Rondan Tablon en Sarajevo (oktobre 2010) .

Tiaj aranĝoj estis ne nur tre instruaj sed ankaŭ instigaj en mia esplorkonferencoj kaj verkado.

Tiel Esperanto servas ankaŭ kiel sukcesa laborlingvo kaj kiel informfonto tre utila. Tio kuraĝigas min kaj milojn da aliaj samideanoj en nia longdaŭra baraktado por la sekura estonto de nia kara bona lingvo.

Bardhyl Selimi

Prelego

Fatbardha Demi

La albana – lingva orminejo

Multaj el la simboloj de la pelazgaj diinoj estis broditaj vole senvole ĝis hodiaŭ majstrece en la vestoj de Granda Montaro de Albanio²⁵, en montaro de Dukaĝin, en montaro de Gjakove²⁶, en Rugovo²⁷ kaj en aliaj regionoj albanaj, ĝis ĉe Arbereŝoj²⁸ de Italio.

La nigra xhubleta (dĵubleta) de virinoj en la Granda Montaro kaj Dukaĝino²⁹, per sia ondigita formo de sia fundo estas tutsama al la vesto 4000 jaraĝa de la figuroj pentritaj sur vazoj de Mikeno, en la insulo de Krito. La kulturo trovita en Mikeno konsideriĝas ja plej praa ĝis nun de la mediteranea civilizo.³⁰



²⁵ Alpoj situantaj en la sudorienta parto de la nuna Albanio

²⁶ Urbo en Kosovo, najbare al Albanio

²⁷ Montara regiono en Kosovo, najbare al Montenegro

²⁸ Albana granda komunumo loĝanta ekde pluraj jarcentoj en Suda Italio (Kalabrio, Sicilio)

²⁹ Altebenaĵo apartenanta parte al Albanio kaj parte al Kosovo

³⁰ Mem la vorto Mikena eksplicitas per la albana vorto “mik”= amiko, tio estas aliancita urbo de Argos en la milito de Trojo.

Ĉiuj albanaj esploristoj, same la fremdaj akceptas ke la nacia tipo de la xhubleta en la norda Albanio estas la sama al tiu de statuo de Ateno trovita en minoika Krito, konata kiel “diino kun serpentoj” adorita ekde la tempo de Knososis

La albana xhubleta, malkovrita en Bushat de Shkodër³¹, je 1984 j. en la tombo de virino-dentisto³² estis 2000 jaraĝa. Sed la figuroj daŭre ornamantaj la veston de la Montaro, estas ja pri praaj. En ili, je stiligita formo reprezentigas la diino de la defendo kaj de la scio, Ateno, per okuloj de noktuo, samkiel en la trovitaĵoj de la germana arkeologo Ŝliman en la fama Trojo de Homero.



Malmankas la figuro de serpento (simbolo de saĝeco, nasko kaj fekundeco) kaj de la mara meduzo, akompanantaj tiun diinon en ĉiu statuo el la pratempo, kies nomon portas ankaŭ la Helena ĉefurbo.

En la albanaj vestoj, malmankas la rompita kruco (simbolo de Suno kaj de Zeuso), egipta kruco (de la vivo), trovita sur la dorso de Mirdita³³ xhokë (dĵoko), la stelo kun ok pintoj de Aleksandro la Granda, stiligitaĵoj de la figuro de la drako kaj de la aglo (unu el tri emblemoj de Zeuso), de skorpio, stelo kun kvin pintoj, de la magia lotuso.

En la broditaj figuroj sur la Montara xhoko oni distingas la kverkan folion, reprezentanta Dodono-n, la plej praan religian centron de la mondo Pelazga, malkovrita en Tesprotio³⁴ en la jaro 1878..

³¹ Ĉefurbo de Norda Albanio

³² Oni trovis ilaron servinta tiuprofesie.

³³ Regiono montara en la centra Albanio

³⁴ Regiono apartenanta ambaŭ al Albanio kaj Grekio



La fama vesto de la Montaro estas nekomparebla al kiu ajn alia vesto enmonde, ĉar ĉe xhubleta, zono, ŝtrumpoj kaj aliaj ties partoj, ĝi plenumas sian funkcion kovran kaj protektan kontraŭ la klimato, sed ankaŭ indikas per broditaj figuroj sur ĝi, pri tiu diina mondo, priskribita de Homero (je 850 jarojn antaŭ Kristo) en liaj du verkoj “Iliado” kaj “Odiseo”, konsiderataj la unuaj beletraj verkoj de la homa historio.

La arbereŝa esploristo Dhimitër Kamarda en sia libro “Eseo pri la kompara gramatiko rilate la albanan lingvon” (1864) , komparante la vortradikojn en la sanskrita (pralingvo hindia) , en la persa, latina, klasika greka kaj albana, konkludis ke “la lingvo de la albana popolo estis unu el la plej malnovaj en Eŭropo”. Tion konfirmis ankaŭ la franca esploristo Eduard Snaider, danaj lingvistoj Holger Petersen, Kristian Sandfel Jensen, ka.

Alia arbereŝa esploristo, Giuseppe Krispi³⁵, asertas ke “ spurante pri la origino de la greka lingvo, estas bele ekvidi kiel ĝi returniĝas en ties plejparto al la albana, la lingvo parolata dum jarcentoj antaŭ Homero.. La albana estis unu el la unuaj arbobranĉoj, de kie elfontis poste tiu diina lingvo de helenoj”

³⁵ La onklo de la unua ĉefministro de la Italio unuigita



La esploristo J. Thomopulos rakontas ke “la etruskaj³⁶ vortoj havis la samajn radikojn kiel ties korespondantoj en la albana”.

Ankaŭ la albanologo Otto Blau rimarkigas ke “la pratempaj surskriboj sur ŝtonaj platoj, malkovritaj en la jaroj 1897-1899 en Krito kaj Lemnos delonge ne konataj, estas jam dekodigitaj per la albana lingvo”.

Laŭ Arif Mati “la albana estas aŭtoktona lingvo kies spuroj iras pli frue ol Neolito”. Bopp asertas ke “la albana ne havas devenan ligon kun neniu alia lingvo”.

Estas vera surprizo ke ĝi ancoraxu konserviĝas netuŝebla dum 30 jarcentoj en la malnovaj montaroj de Eŭropo kaj unuavice en Dinarikaj³⁷ albanaj montoj”

Albanio kaj la regionoj najbare al ĝi, reprezentas unikan kazon en Eŭropo, unu popolon loĝanta en siaj praavaj teroj, almenaŭ ekde Neolito.

Nekontesteblaj koincidoj kaj lingvaj similecoj troviĝas samtempe en la etruska, ilira kaj albana. La etruska gramatiko, iom malpli evoluite, retroviĝas en la gramatikon de la albana.

La lingvistoj de 19a kaj 20a jarcentoj por studi la praaajn lingvojn baziĝis sur la Sanskrita, Greka kaj Latina, sed ne sur la albana, konsistiginta la ŝlosilon por tiu celo. Pro tio ili ne scipovis tralegi la pratempajn surskribojn de mediteraneaj popoloj.

La esploristo Nermin Vlora rimarkigas ke la vorton „yj“ (yj- yjnor – hyjneron) ŝi apenaŭ trovis en iu ajn alia lingvo, escepte de la albana...kvankam ĝi trovebliĝas vaste sur ĉiu surskriboj el la Pratempe ekde Egeo ĝis Adriatiko.

En la Arkeologia muzeo de Ateno troviĝas pratempa kolono kun surskribo bustofedika skribite per la pelazga alfabeto kaj enhavo lamenta, malkovrite en la insulo de Lemnos, kio ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne estas dekodigita per aliaj lingvoj, inkluzive la grekan. La esprimformo estas primitiva, tamen, estas mirinde ke ĝi sukcesis dekodigiĝi danke al la albana lingvo.

³⁶ Pelazga popolo en la Apenina duoninsulo.

³⁷ Montaro laŭborde de Adriatika maro.

La nomoj de du herooj de Iliada kaj Odiseo ne povas eksplikati per la greka, sed ĝuste per la albana. : Achilleus (en la greka - „sen lipoj“) en la albana „aq i lehtë“= tiom rapida (ashtëshpejt-ashte i shpejte= estas rapidulo) tiel kiel lin citas mem Homero. Akilo la rapidulo, poste Ulikso (Ulixes) „vundita en la femuro“ laŭ la greka. Alie nomata „Odhyseus“ en la greka „frenezulo“, dumtempe en la albana signifas „Udhësi“ do „vojaĝanto“.

« Pella» en pratempa Makedonio, kie naskiĝis Aleksandro la Granda, (kiu nomiĝis ankaŭ « pelleas ») , signifas en la albana «pelë- ĉevalino»...Pella estis la ĉefcentro de la makedona reĝlando.

La albana lingvo sukcesas ekspliki grandan nombron de la vortoj etruskaj, latinaj, baskaj, armenaj, keltaj, rumanaj ka.

Estas nekredeble, sed la albana ĉeestas ankaŭ en la praa Egipto.

La elstara franca filologo Šampolion, scipovanta preskaŭ ĉiujn modernajn kaj prajn lingvojn, dekodinta unuafoje la hieroglifojn, tamen ne sukcesis ekspliki kial do certa desegnaĵo ĉe hieroglifoj, en la egiptaj piramidoj, apartenis al certa litero (komencinta litero de la figuro de la hieroglifo) . Tiel la figuro de la mano reprezentis la literon “D”. La fremdaj esploristoj apenaŭ komprenis tiun rilaton inter la litero kaj figuro. Sed Giuseppe Catapano eksplikis ĝin per la nomo “dora” uzata de arbereŝoj kaj albanoj. Tiamaniere li konjektis ankaŭ aliajn hieroglifojn egiptajn, baziĝinte sur la nomumoj de la figuroj en la albana lingvo.

Ankaŭ la nomoj de egiptaj diinoj ne povis eksplicati per neniuj lingvo. La nomo de la diino ATEM, reprezentinta la nomon de Suno-Dio, tradukiĝas en la albana AT kaj Mëmë (Patro kaj patrino) .

Pasante apud Sfinkso je la direkto de la ĉefenirejo al la piramido de Ramses la Dua, troviĝas la mumiigita korpo de THOT, kvalifikita en la Egipto de faraonoj kiel “la Sciulo de la sciuloj”, ĉar li inventis la skribon, artojn kaj sciencojn de la pratempo.

THOT (en la albana = Diranto) ĉeestis dum la “pezado de la koro” en la Juĝsalono, apud la diino de la vero MAT (en la albana = Mezuras) .



Fakte la praa Egipto enhavis multe da albanaj vortoj. Mem la nomo Faraono, reprezentas la homon apartenanta al la raso de sia popolo (en la albana de nia “Farë”= semo) .

La lingvo de THOT, de Etruskoj, Trojanoj kaj Diinoj de Olimpo, la lingvo de ĉiuj blankaj Pelazgoj, filozofoj, poetoj, historiistoj de la pratempo, la lingvo de Homero de Iliado kaj Odiseo, estis ja la albana-pelazga lingvo, kiu en hodiaŭaj tagoj ankoraŭ parolatas freŝe kaj pure de albanoj de Albanio, Kosovo, Montenegro, Makedonio, Ĉamerio, Kalabrio kaj kie ajn ili loĝas enmonde.

Spuroj de tiu lingvo, pli malpli vidiĝas en ĉiuj eŭropaj lingvoj modernaj kaj kie ajn Pelazgoj vojaĝadis, militadis kaj konkeradis.

Estas ja 25 radikvortoj difinitaj de lingvistoj kiu servas kiel bazo por la eŭropa lingvosistemo, kaj ĉiuj ili troviĝas en la albana lingvo. Tiel la vortoj: **bie, sjell, pi, therr, ndan, shteg, shoh, njoh, mal, gur** kaj multaj aliaj, renkontiĝantaj en preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj, troviĝas en la albana kiel radikoj, vortformigaj, kio ne okazas en la ceteraj lingvoj.

En la albana estas tutsamaj certaj vortoj kiel en la sanskrita, hitita, persa, avesana kaj aliaj malnovaj lingvoj.... Eĉ la albana estas pli praa ol la sanskrita, pli perfekta kaj pli silabeca (enhavas pli da unusilabaj vortoj) , kio montras ĝian praecon.

Esploristoj kiel Z. Mayani, R. d'Angely, F. Cordignano, J. G. Hahn, E. Hamp, N. Jokli, H. Krahe, A. Mayer, A. Trombetti, kaj multaj aliaj estas enamiĝintaj al la albana lingvo ĝuste pro ties riĉeco kaj praeco. Laŭ Arif Mati la albana estasa vera lingva orminejo!

Enesperantigis Bardhyl Selimi

Nia propagando

Kial la angla ne taŭgas por roli kiel unuaranga mondlingvo?

Proksimume dekono de la monda loĝantaro, ĉirkaŭ 500 milionoj da homoj, scipovas la anglan je diversaj niveloj.

Koncerne disvastigecon, antaŭas ĝin la ĉina lingvo, parolata de pli ol miliardo da homoj; sed la ŝtatoj, kies oficiala lingvo estas la angla, apartenas al la plej riĉaj **◆** unuavice Usono, niatage la gvidanta mondpotenco el politika, armea kaj ekonomia vidpunkto. Ĝi posedas variajn rimedojn por progresigo de la angla lingvo per eldono de lernolibroj, malmultekostaj poŝlibroj, kino- kaj televidfilmoj, stipendioj ktp.

De post la fino de la dua mondmilito, la statuso de la angla eĉ firmiĝis. Dise en la mondo ĝi estas studata en la lernejoj kiel unuaranga fremdlingvo. En internaciaj institutoj kiel UNO, ĝi rolas kiel la unua inter egaluloj, kaj simile en la Eŭropa Unuiĝo. Sed tiu statuso vekas plurajn demandosignojn; ni preterlasu aspektojn ligitajn kun reputacio, sentoj de malsupereco vekiĝantaj ĉe denaskaj parolantoj en aliaj ol la angla, kaj ni koncentriĝu en la malfacilaĵoj radikiĝantaj en la konstruo de la angla.

Verdire, grandmezure prave la angla gramatiko {morfologio} povas esti rigardata relative facila, se komparata kun lingvoj posedantaj komplikajn konjugacion, deklinaciojn, genrojn, ktp. Kontraste al tio, la sintakso tute ne distingiĝas per facileco. Okulfrapa trajto estas la granda diferenco inter la skribita formo kaj la prononco **◆** jen konsiderinda malhelpo por ĉiu studanto; la faktoj estas vaste konataj, superfluas do ilin detaligi. La seneraran komprenon malfaciligas ankaŭ la fakto, ke la denaskaj angle-parolantoj emas **◆**filtri**◆** la vortojn tra la dentoj {britoj} aŭ ruladi ilin en la buŝo-kavo {usonanoj}.

Apartan ĉapitron konsistigas la eltordema prononcmalmaniero de la vaste konataj internaciaj vortoj en la plimulto de la eŭropdevenaj lingvoj: la nomo de la konata rabobesto {tigro} prononciĝas: **◆**tajga**◆**; kulturo = **◆**kalĉa**◆**; naturo = **◆**nejĉa**◆**; dinamito = **◆**dajnemajt**◆**; tio validas ankaŭ por personaj nomoj: kiu, krom

anglalingvano, povus diveni, ke malantaŭ nomoj ◆Juklajd' aŭ ◆Siserou◆ kaŝiĝas la bone konataj Eŭklides kaj Cicero? La oreloj ŝokiĝas pro la kakofonio ◆

Ni limigu nin per mencio de kelkaj strangaĵoj, kiujn alilingva lernanto alfrontas kaj pene prosperas al li ◆digesti◆ eĉ post plurjara praktikado. Mi kontentiĝu per kelkaj el sennombraj ekzemploj:

1. Tre konsiderinda estas la kvanto de verboj egale transitivaj kaj netransitivaj. Change, dress, dry, end ◆ signifas ŝanĝi, vesti, sekigi, fini, sed ankaŭ ŝanĝiĝi, sekigi, finiĝi. ◆Return◆ povas esti reveni kaj redoni. Ne ĝuste modelo de akurateco ◆
2. Sufice strange, ne estas distingebla ◆koni◆ disde ◆scii◆; ambaŭ esprimiĝas per ◆to know◆. Nenia diferenco inter ◆malnova◆ kaj ◆maljuna◆ {old}.
3. Preskaŭ nekredeble: ne ekzistas vorto ekvivalenta por ◆homo◆ {germane ◆Mensch◆, france ◆homme◆, ruse ◆ĉolovejk◆, hispane ◆hombre◆}. ◆MAN◆ ja signifas viron; la vortoj ◆human being◆ {homa estaĵo} kaj ◆person◆ ja havas iom alian sencon, ne tute samsignifan.
4. ◆Teacher' {instruist/in/o} povas roli maskle kaj ine, sed klare distingiĝas ◆actor◆ disde ◆actress◆, kaj ◆murderer◆ ◆murderess◆ {aktorino, murdist/in/o} Ĉu pli grave?
5. Amaso da verboj posedas la saman formon en prezenco, preterito kaj participo {put, cut, broadcast◆}; nur la kunteksto klarigas {se entute} la agotempon.
6. Tute kontraŭe ◆stranga, harfenda akurateco: en ĉiu ◆normala◆ lingvo oni diras: ◆mi vivas ĉi tie de 10 jaroj◆; anstataŭ la simpla prezenca formo ◆viva◆ la angla uzas tute ekstravagance kompleksan formon: ◆I have been living◆.
7. Rigida nefleksebla vortordo en la frazo, laŭ striktaj reguloj, ĉefe pro manko de akuzativo. Ekzemple: la propozicioj ◆mi vidas vin◆ kaj ◆vin mi vidas◆ estas preskaŭ samsencaj; diferencigas ilin nur la emfazo; en la angla, inversigo tute ne eblas; ne ◆You I see◆, sed multe pli komplike: ◆It is you whom I see◆. Sciindas, ke la sama pronomo ◆you◆ {=vi} validas por nominativo kaj akuzativo.
8. Sufiĉe strange, en la angla ne ekzistas ◆malalta homo◆, nur ◆mallonga homo◆ {short man}; tamen treege ◆gravas◆ {tute senlogike} distingi inter ◆alta homo◆ {tall man} kaj ◆alta arbo' {high tree} ◆
9. Apartan ĉapitron meritas la ĥaosa uzo de prepozicioj, kaj ofte ties malesto, kiam laŭlogike ĝi estus bezonata. Jen tipa ekzemplo pri apliko de akuzativo {rekta objekto} ĉe la verbo ◆to give◆ {doni} anstataŭ dativo {kazo kun atribua senco}, kiun la pura logiko postulus, kaj kiu estas praktikata en aliaj lingvoj: ĉiu persono studinta la latinon scias, ke la vorto ◆dativus◆ devenas de la verbo do-dare-deditatum (doni), kaj la tipa ekzemplo estas ĝuste la verbo DONI [ion al iu]. En la angla, la stranga propozicio ◆The boy gave the girl the book◆, signifanta ◆la knabo donis al la knabino la libron◆ sonas kvazaŭ ni dirus: ◆la knabo donis la knabino la libro◆. Aliflanke, se ◆give me◆ signifas ◆donu al mi◆ ◆kiel ni devus esprimi ◆donu min◆ [ĉu mi estas ies propraĵo?]
10. Ekzemploj pri manko de prepozicioj, kiel miaj sentemaj oreloj perceptis, troveblas en jenaj vortkombinoj: ◆This way, please!◆ [Bonvolu en tiu ĉi direkto [=tiudirekte]]; laŭ gusto de alilingvanoj

◆ ankas ĉi tie prepozicio ekvivalenta al ◆en◆ aŭ ◆laŭ◆. Jen alia: ◆Three times a day◆ {=tri fojojn tage; laŭvorte ◆ kvazaŭ ni dirus; {tri fojoj tago}. Evidente mankas prepozicio ◆in◆= en.

11. Ege komplikita uz-maniero de la verboformoj post la kondiĉmontra subjunkcio ◆if' (se) .
12. Granda kvanto da homonimoj, t. e. vortoj, ĉe kiuj la prononco samas, sed la ortografio kaj la senco diferencas, kaj fine amasego da vortoj kun la sama skribmaniero kaj prononco, sed diverssencaj inter si: letter {letero, litero}; article [artiklo, artikolo]; stick [glui, bastono]; stamp [stampilo, poŝtmarko]; general [generalo, ĝenerala]; Pole[(Polo, poluso); experience [eksperimento, travivaĵo] kaj multegaj aliaj.
13. Malsame al E-o, mankas direkto-montra signo; up {=supre, supren}; here, there (ĉi tie ◆ ĉi tien; tie ◆ tien)

Per ĉio supre dirita mi volis demonstri la plej okulfrapajn mankojn de la angla lingvo. Mi artikolo ne pretendas esti sistema kaj science bazita verketo; mi plukis la ekzemplojn tute hazardmaniere, laŭ legado kaj aŭ◆do. Mia aliro dekomence estis kritika, do tendenca. Sen ajna dubo, la graveco de la angla lingvo ne estas pridisputebla; ĝi ne necesigas pruvojn, i. a. dank' al senmortaj verkoj, kiuj skribiĝis en ĝi. Aliflanke ◆ ankaŭ en aliaj lingvoj [franca, rusa, germana, hispana, itala k. a.] verkiĝis eternvaloraj romanoj, poemoj, teatraĵoj; ĉu tiu fakto donas al la parolantoj de la nomitaj lingvoj la rajton arogi por si statuson se unuaranga unuversala lingvo deviga por la tuta homaro? Aŭ ◆ “el “alia “elirpunkto: “ĉu “la “scipovo “de “la “angla “faciligas “la “aliron “al “aliaj “fremdlingvoj? “Al “tiu “ĉi “demando “la “respondo “estas “kategorie “nea. “Tiun “ĉi “funkcion “povas “plenumi “sukcese “nur “la “Internacia “Lingvo “Esperanto, “havanta “klaran “superecon “kompare “al “la “angla “aŭ ““iu “ajn “alia “lingvo, “por “plenumi “la “rolon “de “tutmondampleksa “komunika “ili; “per “sia “akurateco “[se “ne “mencii “aliajn “gravajn “ eminentajn “kvalitojn] “ĝi “grandskale “superas “la “plimulton “de “la “naciaj “lingvoj. “

Moderna “epoko “vokas “por “moderna “lingvo; “tiun “mision “povos “sukcese “kaj “senmanke “plenumi “nia “neŭtrala “Lingvo “Internacia. “

Teddy “Löwenkopf“

Israelo “



La “deveno “de “la “homaj “lingvoj

(Komento “de “la “akademiko “Ali “Eltari)

La “esploristo “Korotkov “ (Monato “januara “numero “2011) “klopodis “penetri “en “diversaj “lingvogrupoj, “por “ke “trovu “la “ŝlosilon, “per “kiu “li “eksplikus “la “devenon “de “la “homaj “lingvoj. “Laŭ “li, “oni

“estas “kreintaj “diversajn “lingvojn “samtempe. “Li “klopodas “malkovri “similajn “vortojn “en “tiuj “lingvoj, “kiujn “li “nomas ““universalaj”.”

- Tiel agis ĉiuj diktatoroj. Kaj ĉu vi scias kial? Ĉar ilin havas saman radikon; kunigas ilin la eskremismo aŭ ekstrema nacionalismo. La eskremismo estas same danĝera, ĉu maldekstema, ĉu dekstema; faŝisma, komunisma, nacional-socialista, ktp. Ĉiuj ili gravediĝas kaj naskas diktaturojn. Kaj ĉiu diktaturo supreniras al la ŝtatpotenco piedpremane la kadavrojn..
- Tamen, mi diras ke komunistoj, estis pli ekstremistaj, eĉ malhumanaj..
- Mi ne kredas. Almenaŭ la historio..
- Jen.. la historio. Vi scias do ke oni mortigis Musolini-n ĉi tie, en ĉirkaŭaĵoj de Milano. Mi iradas ankoraŭ tie. Vi scias ke oni pendigis lin. Sed kiam? Post kiam oni mortigis lin. Rigardu, diru min, kial oni devas pendigi kadavron? Nek la militleĝoj akceptas tion. Jen tio estas malhumana. Kaj mi kredas ke vi scias ke tion ja faris komunistoj...
- Ne, mi ne scias ĉu tion ja faris komunistoj. Sed la komparo kaj la fakto ĉiam ĝeneraligas. Musolini estis aparta kazo, estis la teruro kaj pesto de la tuta milito, de la monda hombuĉado.

- Miloj da junuloj mortiĝis ne sciante la kialon kaj la mortiginton. Milionoj da homoj tagiĝis kun la angora kaj teruro de la morto. Kaj ĉio ĉi tiu malfeliĉaĵo kaj katastrofo portis nur unu nomon: Duce, ĉu ne? Por ke malŝarĝu kaj savu la homojn de kelkaj nacioj de ĉi tiu terurego kaj angoro, ne sufiĉus la vorto “estis kaptite” aŭ “estis motigite”. La homoj traŭmatigite kaj ŝokite pro tiu nomo, ne plu kredis al la paroloj. Ili devus vidi propraokule, eĉ kelkfoje. Nur tiel ili povus konvinkiĝi ke la malbono jam pasis..

La ĉefo tuŝigis la glason kun la mian, eltrinkis ĝin silente kaj ekokupis kun la fiŝodorso surplate. Li sentis ke la konversacio iel profundiĝis kaj se oni daŭre kondukus ĝin tiamaniere, ne sufiĉus la tuta vespermanĝo. Aŭ li ja komprenis ke niaj tranĉeoj troviĝis sufiĉe for unu disde la alia. ... Tamen ne estiĝis iu ajn malplezuraĵo, nek iu ajn nervozeco.. Dume li signalis al kelnero ke li portu fruktojn..

- Mi esploris ĉu mi estis koleriginte lin, tial ridetante mi aldonis: kiel ajn la homoj havas siajn opiniojn. Tial ni ĝojas pro multkoloro de la vivo. La homo agas laŭvole kaj laŭ propra juĝo.
- - Certe, laŭvole sed ankaŭ laŭscie- diris Ĝanluka, ĉiam trankvila kaj plenride, ĝentila maksimume. Tiel, naturece, li ŝanĝis la konversacion parolante pri la aferismo kaj la domo kiun li posedis en la montaro, kie la familio ripozis dum semajnofinoj.
- Poste ni babilis longe pri Albanio kaj albanoj. Li estis kreskite en la marbordo de Puglia kaj diradis al la knaboj tie ke ili estis naĝintaj en la sama maro, sed vi en la transa bordo, ni en ĉi tiea bordo.

Kaj levante la glason aldonis pripensite:

- Jen, tiom proksime kaj tiom malproksime estas niaj bordoj? Ĉu ne?

.. Fakte la bordoj daŭre kuŝis tie, sed estis niaj antaŭuloj kaj regantoj kiuj jen proksimigis jen malproksimigis ilin, laŭkaze kiam ili kverelis aŭ ne inter si. Nuntempe oni estas proksimigante la bordojn, ĉu ne? Jen ni ĉi tie kune, knaboj, iliaj kamaradoj. Ĝojon al vi!

Kaj ni eltrinkis la vinglason.

Tirane 1998-2008

Versaĵoj de Luljeta Lleshanaku

(estas jam plene tradukita uta kolekto de tiaj versaĵoj far la polo Tomasz Chmielik)

Meditoj dum razado

Kiucele razi sin post laboro?

Antaŭ jaroj

Mia patro

Razis sin je tioma horo antaŭ la spegulo krevinta

Same kiel griaĵo sen larderoj.

La razoklingo glitis de supre malsupren

Kaj de la tempio al la mentono

Malkovris padon liberan

Kiel vortoj de apostolo. La lango kunvolvita limake

Forlasis unu kaj ŝtopis la alian vangon.

Kaj vortoj forsaltis de la vitro:

“Mia filo, la vira forto estas mezurata per tio, kion li ne faras.

Pasiojn oni kaŝas pli profunde ol planto sian radikon!”

Estis kiel rompo de l’principo, preskaŭ sakrilego,

Kiam post jaroj,

Ektage, antaŭ la matenaj okupoj

Lanugon sur la vizaĝo

Mi forprenis kaŝe per la razoklingo de mia patro.

Kiam tremis la mano, mi parolis al Dio.

Ne estis malfacile. Kiel serĉado de frizisto en la kvartalo.

Kiun oni konas kiel sian poŝon.

Dio ne kutimas demandi: “Kion mi povas fari por vi, knabo?”

La kuco pli aĝas ol la homo.

Jen mi, sen grateto,

Kun la nuko, kiun prilumas interna lampo.

“Glate razita”- kiel diradis mia patro.

Kiam venis la morto

Por forpreni lian vizaĝon kun mult-tagaj haretoj

Kiel armeo da formikoj rulantaj tritik-grajnon,

Liaj okuloj kunpremĝis

Kiel papertuketo en la infana pugneto de l'infano,

Kiam malsata li devas leviĝi

De la tablo.

Traduk eksperimenteto de Iaj Fantom

Antaŭ nelonge sinjoro Fantom proponis tradukeksperimenteton: li elektis sufiĉe longan politikenhavan tekston en la angla, enesperantigis ĝin mem kaj tradukis permaŝine ambaŭ tekstojn en la albana. Tiel oni povus kompari la kvaliton de du albanaj tekstoj. Mi faras tion nur por parteto de la teksto envorte. Jen ĝi. Vi povas mem fari la distingon. Ambaŭ tradukoj ne estas precizaj, sed evidentiĝas ke tiu deveninta el la Esperanto teksto estas pli regula..

Komparo de tradukoj

Angla teksto- ĝia albana traduko,

Esperanto teksto-albana traduko-

La preciza albana traduko

1

Angle

How is money created, where does
it come from? Who benefits? And what purpose

Albane per maŝino

Transmetues: Si është krijuar para, ku bën ardhur nga ajo? Kush përfiton? Dhe çfarë qëllimi

Esperanto

Kiel kreiĝas mono? De kie ĝi venas? Kiu profitas?

Albane per maŝino

Krijuar si para? Prej nga vjen? Kush përfiton?

Albane precize

Si krijohet paraja? Nga vjen ajo? Kush përfiton?

2

Angle

does it serve?

Albane per maŝino

i shërben?

Esperanto

Kian rolon ĝi havas?

Albane per maŝino

Çfarë roli kanë?

Albane precize

Çfarë roli ka ajo?

3

Angle

SHOUTING: Back off you f***ing Nazi!

Albane per maŝino

Duke thirrur: Back off ju f*** ing nazist!

Esperanto

KRIO: Foriru vi feka nazio!

Albane per maŝino

Qaj: Largohuni ju Feka Nazi!

Albane precize

Britmë: Shporru! Bajgë naziste!

4

Angle

What is the money system? What is the money behind the money system?

Albane per maŝino

Çka është sistemi i para? Çfarë është e para prapa sistemin e parave?

Esperanto

Kio estas la monsisistemo? Kio estas la mono malantaŭ la monsisistemo?

Albane per maŝino

Çfarë është monedhë? Çfarë është e para pas monedhe?

Albane precize

Çfarë është sistemi monetar? Çfarë është paraja prapa sistemit monetar?

5

Angle

NARRATOR: For centuries the mechanics of the money system have remained hidden from the

Albane per maŝino

Transmetuesi: Për shekuj me mekanikë e sistemi i parave kanë mbetur të fshehura nga

Esperanto

RAKONTANTO: Dum jarcentoj la meĥaniko de la monsisistemo restis kaŝita de la

Albane per maŝino

Transmetuesi: Për shekuj me radhë mekanika e monedhës u fshehur nga

Albane precize

Gjatë shekujve mekanika e sistemit monetar ka mbetur e fshehur nga

Albanstila divorco

La bulgara reĝisorino Adela Peeva estas produktinta 66 minutan dokumentaran filmon pri “albanstila” divorco (Divorce Albanian Style) . (www.youtube.com/watch?v=O7E7V5sdqy8) . S-ino Adela estas jam famiĝinta pro lia filmo “Kies estas ĉi tiu kanzono” premiita en la internacia filmo en Kelno (Germanio, 2006) .

Temas pri la devigaj divorcoj dramecaj de familioj kun fremdaj novedzinoj, precipe rusinoj, bulgarinoj, polinoj kaj aliaj el la iama socialisma tendaro.

Tiu fenomeno plej draste kaj terure karakterizis Albanion. En la dokumentara filmo oni prezentas la historiojn de nur tri tiaj miksaĵaj familioj, sed envere tio okazis al kelkdekoj. Post la jaro 1961, kiam la diplomaciaj interrilatoj de la lando kun Sovetunio interrompiĝis, oni postulis de albanaj edzoj divorciĝi kun iliaj edzinoj. Kelkaj el ĉi tiuj lastaj forlasis Albanion, kelkfoje kun siaj gefilojn, dum la ceteraj kiuj decidis pluvivi enlande travivis longan kalvaron, en plej malbona kazo, ili estis enprizonigitaj (ĝis la jaro 1987) akuzite kiel spioninoj, interniĝis aŭ traktiĝis suspekteme kaj diskriminaciete.

Ing. Vasil el la urbo Korĉa pasigis 18 jarojn en la plej fifama prizono de Spaĉ, dum lia edzino pola mistraktite per drogoj, tute mense detruita, dum pli ol du jarojn en la prizono, sukcesis reveni Pollandon danke al la persista interveno far la pola registaro. Alia rusa edzino spertis 9 jarojn en la prizono, dum la edzo reedziĝis kaj ne permesis al la du gefiloj komunikiĝi kun la patrino. La tria geparo enfalis en prizanon duope longajn jarojn kaj post 1991 revizitis ĝin kun profunda tristo.

Dume, intervjuite de filmistoj, la eksaj komunismaj prokuratoroj apenaŭ petis pardonon pro iliaj maljustaj kondamnoj al tiuj senkulpaj homoj.

La filmo estas spektigita jam en pluraj landoj eŭropaj kaj amerikaj, gajninte la internacian premion Anna Politkovskaja kaj sepfoje nomumate por Oskaro. La dialogoj estas en la albana, pola kaj rusoj kun subtitoloj en la angla.

Bardhyl Selimi

Albanaj rakontoj

Xhaferr Martini

Ĉemizo de la feliĉulo

La reĝo de Burxull opiniis ke li regas juste. La korteganoj, ministroj kaj proksimuloj, **pri tio** konfesis ĉiutage **ke** la reĝo **sentas** sin fiera, **ĉar** kvankam li ekzercis absolutan potencan **regadon**, **tamen** la homoj **estas** feliĉaj. Parolante pri la ceteraj reĝoj **loĝantaj al tiu loko** proksime aŭ malproksime, li diradis:

“Neniu regas **pli juste ol mi**. En kiu ajn alia reĝlando **oni** apenaŭ povas trovi feliĉulon, **aŭ** kontentulon”.

Ministroj kaj korteganoj, rigardante sian reĝon tiom bonfartan daŭre laŭdis lin.

Dume en la palaco ekzistis oficejo, ekde tempo de sia patro, kie oni akceptis petojn, sugestojn kaj plendojn de la civitanoj. La oficejo funkciadis enorde, ĉar la iama reĝo, la veron dirante, konsideris **la dirindaĵojn, ekaŭdis la voĉon** de la popolo, kvankam kiel **de ĉiu reĝo ankaŭ** liaj oreloj estis iom **malbone aŭdantaj**.

Sed **laŭ la** juna nova reĝo tiu oficejo ŝajnis neutila kaj sekve nebezonata.

La ministro pri informado, **konante deziron** de la reĝo por glorigi sian regadon kiel justa kaj senmakula, estis ordoninta la sekretarion de la oficejo **kaŝi** la plendojn de la popolo por ke **tiu** ne maltrankviligu la reĝon.

En la kunveno de la registaro mem la ministro estis kiu deklaris, ke tiu oficejo, kie oni apenaŭ ricevas **iun** plendon ne devas **ekzisti plu**. **Krome**, aldonis li, **ke li jam milfoje deklaris la fakton evidenta** ke la reĝo regas juste. La ceteraj ministroj ne nur tuj aprobis ĉi tiun eldiron de ilia kolego, sed ankaŭ longe aplaŭdis lin.

La aferoj en la reĝlando de Burxull glatis, sed okazis io ne **atendita**: la reĝo grave malsaniĝis. Lin vizitis la plej bonaj kuracistoj de la lando, sed ili nenion povis fari, ĉar la **kaŭzo** estis nekonata.

Iutage, preterpasis la palacon maljunulo kiu pretendis ke li kapablas resanigi la reĝon. Kvankam la reĝo ne fidis al la vagabondoj, li ordonis la gardistojn **permesu ili enveni tiun**. Sed la reĝo mem ne volis babilu kun li senpere. Tiel li petis la ministron **por akiri informon per babilado de** la maljunulo. Poste oni eksciis ke la maljunulo mem ne povos kuraci la reĝon, sed li diris ke tio **estos ebla**, se la reĝo **survestos** ĉemizon de **iu** feliĉulo en lia regno.

La korteganoj, ministroj kaj proksimumoj de la reĝo ne povis esti feliĉaj, **ĝis kiam ilia** moŝto malsanas. La ĉemizo de la feliĉulo devus **esti serĉata en profundo** de la regno, ĉe tiuj kiuj ankoraŭ **nenion** sciis pri la reĝa malsano. **Por ne perdi** tempon, ekveturis tri junaj rajdistoj, estrataj de la komandanto de la reĝa gvardio. Ili ĉirkaŭrajdis la tutan regnon tre rapide por serĉi feliĉulojn. **Ili vizitis** la riĉulojn, **ĉe** kiuj mankis nenio. Sed kia miro! **Neniu** el ili estis feliĉa. Ili estis riĉaj, potencaj, plenaj de sano, sed nenimaniere feliĉaj. **Tion tiuj mem** konfesis proprabuŝe, do **ili** ne bezonis demandi **tiujn** pri la kialo de malfeliĉeco. Do, ne **estis senco ke ili** prenu ties ĉemizojn por resanigi la reĝon.

La komandanto de la reĝa gvardio bone sciis ke oni lin **atendas** senpacience en la palaco, sed neniu **tie povis** imagi pri la malfacilaĵoj renkontitaj de **rajdistoj**.

Tiel serĉante kaj serĉante, feliĉuloj ne troviĝis en la tuta regno. Ili denove **faris enketojn** laŭvice unu post la alia, sed sen **sukceso**.

Oni demandis ankaŭ Myqerem **bejon**, - posedante la regionojn de Drinas, Transdrinas, Breglumas, - kiu estis juna kaj forta, riĉa senfine, kun tre ĉarma edzino, kun 40 **miloj** da ŝafoj, kun **du** salejoj **portantaj ili** multe da enspezoj, sed surprizige li respondis, ke fakte li **estas la** plej malfeliĉa homo.

- Hundaĉo - senprudente diris al li la komandanto de la reĝa gvardio. - Kial do vi ne estas feliĉa? Ĉu vi deziras ke **Lia** moŝto ne resaniĝu? La reĝo jam donis al vi ĉiujn, ĉi tiujn bonaĵojn **kaj tamen vi estas sendanka?**
- Ne hastu Sefedin **agao** - respondis Myqerem **bejo** malfacile **retenante** sin. - Vi ne **scieblas** kial mi ne estas feliĉa.
- Kial, vi ido de hundaĉo, ĉu vi deziras ekhavi nian tutan regnon?
- Ne tion, ne tion, - mallaŭte diris Myqerem **bejo** kaj montris per **mansignoj** ke li ne povas paroli **antaŭ okuloj** de la gvardiaj rajdistoj.
- Iru bravuloj kaj manĝu kelkajn ĉerizojn en la ĝardeno - petis li ilin kaj post kiam **li** restis sola kun Sefedin **agao**, stariĝis de la sidloko, kaptis permane **la** komandanton de la gvardio, kondukis lin al la fenestro de kie vidiĝis la granda ĝardeno, kie laboris viro kun densharara brusto, kiel urso, kun malgrandaj okuloj, griziĝinta **sed** preskaŭ sen okulharoj kaj sen brovoj.
- Ĉu vi vidas tiun viron Sefedin **agao** kiu tranĉetas la arbojn?- **demandis lin** Myqerem-**bejo**.
- Jes, mi vidas lin.
- Li estas la edzo de mia edzino, tiu ĉarmulino pri kiu vi jam aŭdis eĉ en la reĝa kortego.
“Tiu ĉi nia regno estas ja malbonodora”, volis eldiri la komandanto de la reĝa gvardio, sed li subigis sian deziron kaj dentopremis por ke ne malfermu la buŝon **al ofendo**.
- Mi ne plu povas kontentigi virinon - konfesis Myqerem **bejo** – ĉar mi estas **impotenta, nekoitiva**. Mi edziĝis **por ne postlasi** la **riĉaĵojn miapartajn al** miaj fratoj. Dume la virino apenaŭ povas **ekzisti** sen viro kaj **ĉiun** nokton ŝi dormas **samlite** kun tiu urso, ne kun mi. Kiel mi povus esti feliĉa?
- Unuvorte, en nia regno - diris Sefedin **agao** - ĉiu **havas** en sia anuso **palison**, sed la via estas **la** plej dika.

Poste li alvokis la **rajdistojn** kaj ordonis ilin pretiĝi por **reiri** esperon **perdinte**.

Kiam ili preterpasis vilaĝan strateton, aŭdis iun **kanti**. La voĉo ne estis tiel agrabla: fakte ĝi estis iom dika, malmola, sed la kanzono, mem, allogis ilin, kvankam ne melodie. Maldekstre estis la rivero, kun kampetoj ĉeborde, semitaj per maizo. Ili ekveturis **frujnie**, kiam la **maizplantoj** jam pretis por **senherbaĉiĝi** kaj nun la **maizspadikoj jam** estis preskaŭ maturaj. Ili ekiris orgojluloj, vestintaj **en** uniformojn brilaj kaj nun revenas malpuraj, malglataj kaj esperperdintaj. Dume ili ekflaris bonan odoron de la **freŝaj maizspadikoj bakitaj surfajre**, kvankam alta heĝo el arbetoj baris la **elvidon**. Kiam la heĝo finiĝis, ili rimarkis ĉe la fajrejo kie bakiĝis la **maizspadikoj** ĉe rivera bordo, viron kantantan, ĉirkaŭ kvindekjara.

- **Venu!** - ordonis la komandanto.
- Kien ni iru?- demandis unu el **la rajdistoj**.

Ili estis jam tro **lacaj** kaj **enuiĝintaj**, tial **ne** alparolis **aliulojn respekte** kun la mano surkore kiel la unuan tagon de ilia serĉado de feliĉulo.

- Li kantas, do li devas esti feliĉa - **diris** Sefedin **agao**.
- Ĉu ne kantas multaj homoj same?- rimarkis unu el la akompanantoj, tamen ili estis irantaj al tiu kantanto.
- La buŝo povas kanti, sed la koro povas plori. Tiu ĉi viro estas ĉifonulo. Kiel eblas ke li estas feliĉulo?!- aldonis la alia akompananto.

Sefedin **agao** salutis la viron bakinta **maizspadikojn**. Li havis **mienon** de **hunda** ido kiu estis **enkotuminta** por trovi **nutraĵon**. Sed li estis sana, kun okuloj **mirantaj**, dikaj lipoj kaj kapharoj glataj kvazaŭ lin estis ĵus lekuminta la bovino. Ekvidinte la kvaropon de viroj, li interrompis la kantadon, ne montrante sin timigita.

- Vi kantis, ĉu?- demandis lin la komandanto.
- Jes, mi kantis - respondis li.
- Vi devas esti feliĉa ĉar vi kantas, ĉu ne? Aŭ **ĉu** vi faras tion **ne pro tio?**
- Feliĉa mi estas, **efektive** feliĉa - konfirmis la viro kaj **vere** ŝajnis tia, almenaŭ tiel, kiel li komprenis la **feliĉon**.

- Kial vi estas feliĉa?
- Mi ne scias tion.
La komandanto sciigis lin pri la celo de ilia alveno kaj vagado dum tri monatoj tra la regno.
- Donu al ni vian ĉemizon por ke ni alportu ĝin al la reĝo. **Ni pagos anstataŭ ĝi oron.**
- Mi bedaŭras sinjoroj, sed mi ne havas ĉemizon - respondis la viro bakanta la maiz**spadikojn**.

Poste li malfermis la mantelaĉon per kiu li **envolvis sin**: aperis la malkovrita brusto. **Ververe** li ne havis ĉemizon. La komandanto de la reĝa gvardio foriris galope kaj la akompanantoj postsekvis lin.

Esperantigis: Bardhyl Selimi.

Albanio – lando de kontrastoj



Televida programo pri Esperanto (Fotis Stanisław Mandrak)

Serĉante en mia arkivo iujn informojn mi hazarde trovis la artikolon kun intervjuo farita en 2003 de loka ĵurnalistino. Ŝi demandis min, interalie, pri nerealigitaj revoj. "Viziti Albanion", – estis la respondo. Mi naskiĝis en malgranda urbeto en la Malsupra Silezio. Ĝin ekloĝis diversaj familioj, kiuj pro ŝanĝo de limoj post la 2a Mondmilito serĉis novajn eblecojn por vivi en paco: eĉ grekoj kaj albanoj kaj ŝajnas al mi, ke precipe infanoj vivis tiam en harmonio partoprenante la saman bazan lernejon.

En 2012 Tomasz Chmielik tradukis al Esperanto la libron *Hunda haŭto* de la nuntempa albana verkisto Fatos Kongoli, kaj per komunaj fortoj de sponsoroj, i. a. de la alzasano Edmond Ludvig kaj de la Podlaĥia Libraro, ĝi estis eldonita en Bjalistoko. Tiu ĉi evento naskis la ideon vojaĝi al Albanio kaj renkontiĝi kun la aŭtoro. Poloj, latvino kaj svedo interkonsentis rete la renkontiĝon en Tirano la 14an de aprilo.

En la flughaveno noktomeze atendis nin profesoro Bardhyl Selimi – loka organizanto de nia restado. Dua grupeto venis de Krakovo tra Kroatio per buseto. Nia celo estis ne nur konatiĝi kun la lando, sed ankaŭ promocii Esperanton montrante, ke en diversaj landoj ĝi povas esti uzata dum internaciaj renkontiĝoj. 50-minuta televida intervjuo pri Esperanto farita kun ni estis spektebla en la tuta Albanio. Okazis ankaŭ renkontiĝo en la Akademio de Sciencoj kaj en la Ministerio pri Kulturo, Sporto kaj Junularo, prelego en la Tirana Universitato por studentoj de fremdlingvoj. Jola Kieres el Nowy Sącz instruis amuze gestudentojn Esperanton uzante la metodon de Cseh, Bardhyl tuj kaptis okazon por skribi sur la tabulo la kontaktadresojn por venontaj kursanoj.



Universitataj studentoj en Tirano atente aŭskultas prelegon pri Esperanto (Fotis Stanisław Mandrak)

La plej grava momento de nia restado estis la renkontiĝo kun la aŭtoro de la libro. Supozante, ke ĝi temas iomete pri la biografio de li mi atendis renkontiĝon kun iu frustrita donĵuano, tamen ne... Modesta, ĉarma en interhomaj rilatoj, parolata mallaŭte kaj ege kortuŝe, li multe impresis nin.

Okaze de la prezento de lia libro ĉe la Akademio de Sciencoj renkontiĝis politikistoj, akademianoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, diplomatoj, esperantistoj kaj pluraj ĵurnalistoj. Mi admiris la facilecon, kun kiu Bardhyl Selimi tradukis simultane la paroladojn de Tomasz, de Fatos kaj de aliaj parolantoj. Aplaudon vekis la informo, ke danke al la universala lingvo *Hunda haŭto* atingis Pollandon, Luksemburgion, Usonon, kaj eĉ Madagaskaron. Tomasz havis okazon rakonti pri aliaj libroj de albanaj aŭtoroj tradukataj al Esperanto.

Kion devus fari Esperantistoj en via urbo por allogi reprezentantojn de sep televidstacioj, minimume 10 ĵurnalistojn el lokaj kaj landaj gazetoj, reprezentantojn de radiostacioj? Ĉi-foje sufiĉis, ke oni antaŭinformis pri renkontiĝo de la fama verkisto, kies verko estis eldonita en lingvo rara kaj ekzotika, tamen parolata en 120 landoj. La vorto "Esperanto" estis unusola, kiun ni komprenis provante legi la venontan tagon la gazetojn. Ni alportis 50 ekzemplerojn de "Hunda haŭto" en Esperanto por ricevi aŭtografajn de la aŭtoro. Bondezirojn por la Podlaĥia Libraro skribis ankaŭ la iama ambasadoro de Albanio en Pollando.

Al ĉiuj eminentuloj ni enmanigis salutmesaĝon de la direktoro de la Podlaĥia Libraro en Esperanto en la formo de privata letero kaj po du libroj eldonitaj esperantlingve en Bjalistoko. Ili ĉiuj tuj provis legi!

Albanio estas por mi mirinda lando de kontrastoj. Alia lingvo, alia mentaleco. Mi supozis vidi rusan provincon kaj ŝokis min supermodernaj domoj situantaj apud ruinigitaj dometoj. La malnova urbocentro de Tirano fakte ne ekzistas. Survoje al provinco tristigis nin skeletoj de iamaj fabrikoj, kiuj produktis uzante la rusan aŭ la ĉinan teknologiojn kaj nun estas fermitaj pro manko de mendoj. En modernaj vendejoj nur la lingvo de prezslipoj montras en kiu lando vi estas, ĉar produktoj estas vere internaciaj. Ĉu vi povas imagi 1000 parojn da uzitaj ŝuoj pendantaj sur la palisetaro uzata kiel ekspozicio? Eĉ tian vendejon mi vidis en Tirano. Sciante, ke en Albanio 25% de la landa produktado donas agrokulturo mi esperis viziti subĉielajn bazarojn plenajn de nutraĵoj kaj orientaj dolĉaĵoj. Bedaŭrinde, oni vendis tie nur uzitajn aŭ ĉinajn vestaĵojn.

Shaban Hasani – nia gvidanto dum turismaj ekskursoj – rakontis, ke multaj albanaj familioj havas eksterlande sian reprezentanton, kiu pli frue fuĝis aŭ lastatempe leĝe forveturis por malleĝe labori kaj sendi monon al la patrujo. Pri la terura tempo de regado de Enver Hoxha rakontas ekspozicio en la Historia Muzeo de Tirano. Tio jam pasis, kaj albanoj denove vekiĝas sen timo. De la 7a horo matene kafejoj jam estas plenaj de viroj, kiuj

trinkante ege fortan kafon pritraktas aferojn. Promenante laŭlonge de la plaĝo en Durres oni admiras modernajn ripozdomojn kaj bluajn basenojn kun kristala akvo por malgrandaj infanoj. Apude estis videbla truo de iu konduktubaro, per kiu ripozdomo (?) elfluigas malpuraĵojn la maron. Sur multaj tegmentoj de altaj kaj malaltaj domoj estis instalitaj grandegaj ujoj por kolekti akvon, ĉar en diversaj kvartaloj de Tirano kaj en aliaj urboj ĝi estas porciumata.



Tirano, la ĉefurbo de Albanio (Fotis Stanisław Mandrak)

Ĉe la Universitato mi vidis ordeman, bone vestitan junularon sed surstrate videblaj estis modestaj homoj: nek elegantuloj, nek mizeruloj. Plaĉis al mi, ke viroj ĉiam ŝajnas esti freŝrazitaj kaj havas kurte tonditajn harojn. Ĉiuj aspektis pacemaj kaj paciencaj: alridadis kiam ni provis interkompreniĝi. Laŭ mi ili ne havas kompleksojn. Generalaj impresoj estas tre pozitivaj kaj mi esperas reveni Albanion post kelkaj jaroj por vidi tion, kion mi ne sukcesis vidi dum mia kelktaga restado. Espereble nia alveno helpis al lokaj esperantistoj varbi por Esperanto junularon kion ni el la tuta koro deziris al niaj ĉarmaj gastigantoj adiaŭante ilin.

Elżbieta Karczewska

Ĉi tiu artikolo aperos en la junia kajero de *La Ondo de Esperanto* (2012) .
Ĉe represo bonvolu nepre indiki la fonton paperan (se en presaĵo) aŭ retan (se en retejo) :
Papere: *La Ondo de Esperanto*, 2012, N°6.
Rete: *La Balta Ondo* <http://sezonoj.ru/2012/05/212albanio/>

Spirita vivo en Albanio

Enkonduko

Hodiaŭ Albanio estas ŝtato sen oficiala religio kaj kun kredliberecoj garantiitaj per konstitucio el la jaro 1998. Du semitaj eklezioj (islamismo kaj kristanismo) kun siaj kvar sektoj (bektaŝismo, sunitismo, ortodoksismo kaj katolikismo) havas difinitajn religiajn festotagojn. En la publika klerigado estas laika kaj oni ne permesas religian propagandon en la publikaj lernejoj.

Nun en la lando ekzistas 14 privataj religiaj lernejoj kun 2600 gelernantoj.

En la jaro 2002 ekzistis 32 religiaj asocioj reprezentantaj 45 diversajn organizaĵojn kaj 17 asocioj kaj islamaj grupiĝoj.

Pro lontempa vakuo spirita kaj ekstrema izoliĝo de la lando dum 46 jaroj, eniris Albanion ankaŭ multaj misiistoj.

Pli ol 500 sendependaj misiistoj el diversaj religioj ekzercas sian agadon ĉi tie. Inter ili estas ankaŭ reprezentantoj de radikalaj sektoj kiuj allogas aparte junularon per diversaj manieroj.

Ekde la jaro 1993 en Albanio agadas du danĝeraj asimilaj frakcioj, tiu grekortodoksa kaj tiu sudarabia islama. Ĉi lasta en Kosovo kaj Makedonio estas eĉ ekstremista - vehabista. Profitante de malriĉeco en certaj regionoj, oni konstruis senprincipe ortodoksajn preĝejojn kaj sunitajn moskeojn ankaŭ en lokoj kie apenaŭ ekzistas kredantoj kaj frekventuloj.

Okazis ankaŭ incidentoj kontraŭ bektaŝioj far nealbanaj kredantoj.

Dum longa tempo, ekde la jaro 1930, oni legis ke ĉirkaŭ 70 % de kredantoj apartenas al islamo; 20 % al ortodoksismo kaj 10 % al katolikismo, konsiderante la tutan loĝantaron religiema kio estas tute dubinda.

Tamen, hodiaŭ la situacio religia enlande notinde ŝanĝiĝis.

Antaŭ kelkaj jaroj la prestiĝa enketadkompanio GALLUP, malkovris ke inter albanoj nur 39 % estas kredemaj, inkludinte tiel la landon inter 14 malplej kredemaj enmondo.

Alia enketadkompanio (2008, Albanian WB Data & Statistics) donis jenajn faktojn pri kredemo ĉe albanoj hodiaŭ:

Al la demando:

Ĉu vi kredas al Dio?

Respondis

Jes: ĉirkaŭ 30 % de la enketitoj,

Mi ne scias: ĉirkaŭ 16 %;

Kaj ne: ĉirkaŭ 54 %

Al la demando:

Ĉu vi frekventas kultolokon?

Respondis:

Ofte: 5.4%,

Iomfoje: 13.6%;

Ne: 81%

Al la demando:

Al kiu religio vi apartenas?

Respondis:

Al neniu: 70%;

Al katolika: 8 %;

Al ortodoksa: 10 %;

Al sunita: 10 %;

Al bektaŝia: 2 %

Rolo de religio pasintece

Religio estas ludinta unuarangan rolon por la travivo de la albana nacio samgrade kiel tio estis por kelkaj aliaj popoloj antikvaj kiel armenoj kaj hebreoj.

Ĝuste la kristanismo donis al ĝi fortan identecon dum la tempo de barbaraj kaj osmanaj invadoj, transforminte Albanion en sanktan landon dum la tempo de Skanderbeg⁴³, kiu defendis la kristanismon (XV jc) tiam kiam Papo kaj Patriko interkverlegis. Poste estis la islama religio kiu distingis albanojn disde slav - kaj helen asimila politiko de siaj najbaroj strebintaj la alproprigon kaj konkeron de la albanaj teritorioj.

La komuna morala flamo por la albana eklezio de ĉiuj kredoj estis la apostoleca diligenteco antikva interplektita per arda patriotismo.

Kristanismo

La apostolo Paŭlo en la jaro 57 vizitis mem Ilirion kaj disvastigis la novan religion. Krom li, tie predikadis multaj aliaj sanktuloj. Laŭ dokumentoj, en la urbo de Durrës en la jaro 58 ekzistis 60 kristanaj familioj. Ekde la jaro 70 oni mencias la episkopon Cezar aganda en Ilirio, poste Sankta Astino-n, (en la jaro 98) kiu estis mortkondamnita de imperiestro Trajan kaj la loka reganto Agrikoli.

La unuaj religiaj centroj dum I-IV jarcentoj ekzistis en [Durrës](#), [Butrinti](#), [Onhezmi](#) ([Saranda](#)) , [Jeriko](#) ([Orikumi](#)) , [Vlora](#), [Apolonia](#), [Amantia](#), [Bylisi](#) ([Ballshi](#), [Antipatrea](#) ([Berati](#)) , [Skampis](#) ([Elbasan](#)) , [Scodra](#) ([Scutari](#), [Shkodra](#)) , [Albanopolis](#), [Lyhnidi](#) ([Ohri](#)) , ktp.

Oni konstatas sur mozaikaĵoj kaj malnovaj preĝejruinaĵoj en [Shën Koll de Kurjan](#) en [Fier](#), en la [baziliko de Ballsh](#), k. a. paleokristanajn enigmajn simbolojn (de malnova kristanismo) kiel: foliarboj je formo de koro, krucbildoj, fiŝbildoj, kaj similaj.

Estis ilirdevena⁴⁴ imperiestro Kostandino la Granda kiu dekretigis Kristanismon kiel oficialan ŝtatan religion en IV jc, poste ĝi estis kodifikite en Biblio kaj subtenite de institucioj kiel preĝejoj kaj monaĥejoj kaj ties ĥierarkio (episkopoj, ĉefepiskopoj, abatoj kaj diokezoj centre en Romo) .

⁴³ Gjergj Kastrioti-Skanderbeg- nacia hero de albanoj, 1403-1468

La kompleta konvertiĝo al kristanismo en la teritorioj kie hodiaŭ loĝas albanoj plenumiĝis dum V-VI jc.

Sankta Jeronimo ([Hieronymus](#)) de Ilirio estis la unua kiu tradukis latinlingven Biblion (La Vulgata) meze de IV jc.

Sankta Niketa de Dardanio ([Remesianes](#)) , nun teritorio de Kosovo, estas verkinto de la ĉefpreĝo (plej alta preĝo) de kristanismo [TE DEUM LAUDAMUS](#) (Ni laŭdas vin Dio) .

Preĝejoj je tipo kreita de Kostandino la Granda troviĝis jam ankaŭ en Albanio: en Butrint, Bylis, Antigone, Tepe, en Elbasan kaj aliloke.

La elbarkigoj de normanoj en la jaro 1081 kaj 1105 kaj la unua krucmilitiro en 1095 balancigis Bizancon. La konkero de ĉi lasta en 1204 far la kvara Krucmilitiro kaj plutenado dum postaj 60 jaroj venigis ankaŭ la benediktajn monaĥojn en nian landon en 1230, komence en [Shirgj](#) ĉe la rivero Buna kaj pli poste en Durrës kaj Shkodër sub la protektado de Karlo Anĵuo.

Samtempe estis instalite la Ordeno de Franceskanoj pliprofundante tiel la revenon de la kristanaj albanoj al la malnova centro, Romo. La iama princo albana, Dhimitër, atestas tion en sia korepondo kun Papo Inocento III, al kiu li petis helpon por libera ekzercado de la kristana kredo, kiun malhelpis la ormanaj turkoj konkerintaj la urbon de Ohrid en la jaro 1408, tiun de Tivar en la jaro 1571 kaj mem Kostandinopojon en la jaro 1453 ruinigante kaj subigante Patriarĥejon.

Tamen oni sukcesis akiri traktaton per kiu konserviĝis la preĝejoj, geedziĝsolenaĵoj kaj funebraĵoj en ili kaj la festado de Paskoj. Tiutempe la unusola lando kristana nesubigita kaj ne paginta impostojn al Sultano estis Albanio. Gjergj Kastrioti- Skanderbeg, princo de Kruja alinomate “Defendanto” kaj “Atleto” de Kristanismo rezistis dum 25 jaroj al osmanaj armeoj entuziasmigante la tutan kristanan mondon per siaj faroj kaj akirinte ilian dankemon.

Skanderbeg kaj Papo havis regulajn rilatojn strebante kontraŭstarigi la komunan malamikon. Post la morto de Skanderbeg, Sultano entreprenis grandan konvertigan kampanjon al islamo en albanaj teritorioj.

Plej grava estis ĉikadre “[Defŝirmeja](#)” (sanga imposto) laŭ kiu al ĉiu hejmo oni forprenis filon kiu neniam revenus hejmen kaj fariĝus janiĉaro. Tiu imposto devigis eĉ tutajn vilaĝoj elmigri. Parto el loĝantaro konvertiĝis ŝanĝante nur la nomon sed daŭrigante la ekzercadon malkaŝe de kristanaj ritoj. Oni konas kazojn kiel tio dokumentiĝas de Frang Bardhi⁴⁵ en la jaro 1637 kiam ene de familio (fratoj aŭ geedzoj) personoj apartenis al diversaj religioj nur por saviĝi de impostoj aŭ por profiti privilegiaĵojn.

⁴⁴ Ilroj estis antaŭuloj de albanoj, loĝantaj en la tuta Okcidenta Balkanio kaj parto de Italio

⁴⁵ Katolika pastor albana (1606-1643)

La religia rezistado postlasis fortajn spurojn dum la konvertiĝado al Islamo, kiel tion atestas la regiono de Shpat de Elbasan, per afreskoj pentritaj de Onufri⁴⁶, en Neokastra (Elbasan) dum jaroj 1556 en la preĝejo de Shën Koll kaj Shën Premte.

La episkopo Pal Engjelli (eksa sekretario de Skanderbeg) la unua verkis albane la baptoformulon (1462) . *“Un te paghesont premenit Atit et birit et spertit senit”* (Mi baptas vin je la nomo de Patro, Filo kaj Sankta Spirito) en la latina alfabeto.

Pli poste, Pjeter Budi⁴⁷ tradukis *“Doktrina e Krishterë* (La Kristana Doktrino) en la jaro 1618, *“Pasqyra e të rrëfyerit”* (La Spegulo de la Konfesado) en 1621 kaj *“Rituali Roman”* (Romia ritario) en 1621.

Post kiam la Sankta Sidejo subtenis la uzadon de la albana en la preĝejoj, en la jaro 1634 ĝi decidis ke franceskanoj instaliĝu porĉiame en la regiono de Shkodër, Zadrime kaj Lezha por bremsi la islamismon norden.

Islamo

La unuaj kontaktoj de albanoj kun islamismo estas iom pli malfruaj ol tiuj de la ceteraj eŭropaj landoj. (kie tio okazis dum la IX-X jc) . Hispanio estis plej influite de la arabo-islama kulturo ĉiukampe (medicino, fiziko, astronomio, filozofio kc) . De tie komenciĝis la antaŭenmarŝo de islamismo al Eŭropo.

Historie la interreligiaj kontaktoj de kristanaj albanoj kaj disvastigantoj de islamismo okazis dum XIII- XIV jc.

Sed post la invado osmana la konvertiĝo al islamismo ricevis amasaj dimensiojn. La plejparto de la loĝantaro albana konvertiĝis al islamismo samkiel tio okazis en Bosnio.

Dum XV- XVI jc oni konstruis moskeojn en ĉefaj urboj. Plejmulte islamismo disvastiĝis en la Meza Albanio kaj en teritorioj limigitaj al slavaj teritorioj. Tio floriĝis aparte dum XVIII-XIX jc: komenciĝis albana literaturo per araba alfabeto, konata kiel “bejtekanta beletro”⁴⁸ komparata kun la beletro “alhamiado” disvolviĝinta antaŭe en Hispanio.

⁴⁶ Fama ikona pentristo albana en XVI jc

⁴⁷ Albana katolika pastro, 1566-1622

⁴⁸ El la turka vorto “bejte= versaĵo”, XVIII jc

Islamo eniris en la mora vivo de albanoj per kelkaj normoj de Sheriatio, sed tiu ĉi lasta neniam fariĝis la reganta morkodo de albanoj. La akcepto de islamo far albanoj povas kompreniĝi ankaŭ per rolo kion ĝi ludontus en la diferencigo de albanoj disde slavoj (regiono de Kosovo) kaj grekoj (regiono de Ĉamerio⁴⁹) kie aparte post XVIII jc, ekzistis la danĝero de asimilado.

Plejmulto de islamanoj en Albanio apartenas al la sekto Sunita, kaj malplimulto al sekto Bektashia.

En la jaro 1923 la sunita albana komunumo dividiĝis de Kalifato de Istanbul. Ĝin karakterizas reformemo ĉar oni decidis malpermesi poligamion, demeti la vualon, traduki albanlingven Koranon, eldoni la revuon “Zani i Naltë” (Alta Voĉo) kie speguliĝis fortaj patriotaj kaj reformemaj sentoj. Ekde la jaro 1929 oni decidis la ekskluzivan uzadon de la albana lingvo, la unueciĝon de sistemo de medresoj (mezlernejoj islamaj) .

En la konstitucio de la reĝlando albana oni notis per neno 16 la dividon de Eklezio disde la ŝtato. La ĉefepiskopo, episkopoj, iliaj lokaj anstataŭantoj, la Granda Ikonomo Mitroforo, la ĝenerala sekretario de Sinodo samkiel la helpantoj kaj anstataŭantoj ekleziaj de ĉefepiskopo kaj episkopoj devas havi albandevenon sange kaj lingve.

La reĝo Zog la Unua sekvis neutralan politikon al eklezio, apogante la sendependecon de la ortodoksa eklezio kaj preferante albanojn en ties estraro. Dum tri jaroj li konfliktiĝis al la katolikaj lernejoj enlande, ferminte kaj poste denove malferminte ilin enkadre de la kleriga reformo. (1933-1936) . Tion li faris ankaŭ por limigi la tutflankan italan ekspansion en Albanion.

Bektaŝismo

Bektaŝismo originas de mistika doktrino de turkmenaj patroj el XI-XII jc ĉirkaŭ Kaspika Maro kaj fondiĝis de Hadĵi Bektashi. Estis same la influo de persa mistikulo Ahmnet Jasevi, ligite al la janiĉara korpuso deveninta el kristanaj religiuloj.

Bektaŝismo adoras Alio-n tiom kiom Muhameto-n. Pro siaj kontraŭdiroj al islamismo, ĝi montris ian toleremon al kristanismo, kaj havis kontaktpunktoj en la religia vivo. Ili predikis la egalecon inter viro kaj virino, drinkis alkoholon kaj faris aliajn kozojn ne ŝateblaj de islamo. Pro tio kaj pro fakto ke ĝi adoris patriotismon, Bektaŝismo trovis fekundan teron en Albanio. Nia nacia poeto Naim Frasheri⁵⁰ estis adepto de Bektaŝismo, same multaj aliaj renesanculoj.

⁴⁹ Albanloĝate teritorio, hodiaŭ en nordokcidenta Grekio ĉe la landlimo kun Albanio

⁵⁰ Renesanculo, albana nacia poeto albana 1846-1900

En nia lando Bektaŝismo aperis je la fino de XII jc kaj komenciĝo de XIII jc.

En la jaro 1925 Kemal Ataturk⁵¹, fondinta de modernan Turkio,, entreprenis severajn reformojn por laikigi kaj modernigi sian ŝtaton. Li forpelis la ĉefsidejon de bektaŝioj el Turkio. Tiel la tutmonda centro de bektaŝioj instaliĝis en Albanio ekde tiam. Ĝi ne translokiĝis ankaŭ dum la periodo kiam la komunista reĝimo malpermesis komplete religian praktikadon enlande (1967-1990) . La bektaŝia komunumo de Albanio sin deklaris sendependa en la jaro 1921.

Multaj tekeoj de bektaŝioj transformiĝis dum la Dua Mondmilito en rezistadaj centroj kontraŭ faŝistoj. Oni kalkulis ĉirkaŭ 6000 membrojn organizitajn dum la milito.

La Evangelia Protestanta Eklezio

La historio komenciĝis en la jaro 1873, oktobre, kiam tri fremdaj misiistoj alvenis en la urbo de Manastir⁵² (hodiaŭ Bitolje, Makenonio) . Inter la unuaj membroj estis ankaŭ patrioto Gjerasim Qiriaz⁵³, malferminta la unuan albanlingvan lernejon.

Krom li, en la “Evangelia Frataro” fondita en 1892 partoprenis ankaŭ Gjergj Qiriaz, Sevastia, Grigor Cilka, Herakli Bogdani, V. Pasko Pogradeci, Fanka Evthimi kaj eble P. N. Luarasi, ĉiuj eminentaj patriotoj.

Tiu organizaĵo eldonis la ĵurnalon “Letero de frataro”.

La religiaj kredoj dum 1944-1991

La komunisma reĝimo kontraŭstaris severe aparte la katolikan eklezion konsiderante ĝin neston de fremdaj agentoj. Pro tio oni postulis de ĝi dekomence deklari sian sendependecon disde Vatikano. Ambaŭ episkopoj Gasper Thaçi kaj Vinçenc Prendushi rifuzis decideme fari tion. Tial oni arestis ilin kaj la juĝejo kondamnis la duan al 20 jaroj da enprizoniĝo, kie li finfine mortis kaj la unuan al mortkondamno.

⁵¹ Mustafa Kemal Ataturk, 1881-1938, naskite en Tesaloniki, de albana patrino

⁵² Manastir, iama ĉefurbo de unu el kvar albanaj vilajetoj (provincoj) en Balkanio

⁵³ Gjerasim Qiriaz, albana edukistyo kaj predikanto de protestanismo, 1858-1894

Oni arestis ankaŭ 30 franceskanajn pastrojn, 15 jezuitajn pastrojn kaj multajn seminarianojn. Kelkaj el ili estis mortkondamnitaj, aliaj pereis en prizonoj kaj lagroj farante devigan pezan laboron. En la jaro 1945 estis mortpafitaj Dom [Ndre Zadeja](#), poeto kaj patrioto; [Frano Gjini](#), Gj. Volaj, patro [Ciprian Nika](#). En la jaro 1946 estis mortkondamnita [Nikoll Gazulli](#), ka.

Ili lastaj vortoj estis “Vivu Kristo-reĝo! Vivu Albanio ankaŭ sen ni!

La fremdaj ekleziuloj katolikaj estis forpelitaj en la jaro 1946. Kvankam la ŝtato estis devigite ne malpermesi la funkciadon de religiaj eklezioj almenaŭ ĝis la jaro 1967, la ĉefepiskopo Bernardin Shllaku elektite en la jaro 1950 deĵoris en teruraj kondiĉoj.

Post la totala malpermeso de religiaj institucioj kaj praktiko en la jaro 1967 (daŭrinta ĝis 1990) ŝtato entreprenis pliajn paŝojn. En la jaro 1967 estis mortpafite Zef Bici, estis enprizonigite ĉefepiskopo Ernest Ĉoba kondamnite je 24 jaroj, kiu poste mortis. Estis enprizonigite Mikel Koliqi, kiu en la jaro 1992 fariĝis la unua albana kardinalo, mortonte en la jaro 1997.

Ĉiuj tiuj estis martiroj de la katolika eklezio en XX jc.

Dume la Tria Sinodo de la aŭtokefala ortodoksa albana eklezio finiĝis en la jaro 1949, kiam rezignis de sia posteno la ĉefepiskopo Kristofor Kisi

La posteuloj de Kisi (de Kvara Sinodo) ligis la ortodoksan eklezion kun tiu de komunista Rusio pro politikaj kialoj kaj tiel daŭre funkciadis ĝis la jaro 1967.

Ekde tiam, la plejmulto de preĝejoj estis detruitaj aŭ transformitaj en deponejoj, kulturcentroj aŭ sportejoj. Entute detruigis 2169 preĝejoj, moskeoj kaj tekeoj. Enprizoniĝis 217 ekleziuloj, el kiuj multaj ekzekutiĝis aŭ mortis en teruraj kondiĉoj.

La Penala Kodo en la jaro 1976 kondamnis la religian propagandon kaj disvastiĝon de liturgio.

La katolika eklezio de Albanio donacinta al la patrio dekojn da intelektuloj, esploristoj, poetoj kaj verkistoj, kiel [Shtjefën Gjeçovi](#)⁵⁴, [Preng Doçi](#), patro [Gjergj Fishta](#)⁵⁵, Dom [Ndre Mjeda](#)⁵⁶, patro Donat Kurti ka estis jam trafita de la plej fortaj batoj en la tuta sia historio.

La proklamiĝo de Albanio kiel Ateista Ŝtato laŭ konstitucio de 1976, mirigis tutan mondon. Vatikano senĉese apogis ekleziulojn ĉi tie per diversaj formoj kunfrontiĝante al komunista diktatoro Enver Hoxha⁵⁷, pli severa ol mem Trajano,.

Post renversiĝo de la politika sistemo en la jaro 1991, estis malfermitaj, konstruitaj kaj rekonstruitaj multaj preĝejoj, moskeoj kaj tekeoj. Unue revigliĝis la religia vivo en institucioj sub la gvido de tiuj eksaj ekleziuloj suferintaj kaj travivintaj en la komunismaj prizonoj.

Dom Simon Jubani⁵⁸ en Shkodër ĵus elprizoniĝinte post 26 jaroj, kaj Karlo A. Sevilla, forpelita de Albanio ekde 1946, unuafoje, post la jaro 1967, aranĝis meson por vivuloj kaj mortintoj en la malgranda kapelo ĉe la tombejo en Shkodër. Samtempe en la Plomba Moskeo eminenta mulao, Sabri Hafiz Koçi, same elprizoniĝinta, arigis 60 000 muslimojn.

La religia toleremo

Albanoj sin distingis dum jarcentoj pro sia toleremo koncerne religion. Ili neniam sangoverŝis pro religia kialoj. La eksa ĉefministro de Montenegro Mark Milan, skribis ke “kiomfoje ni provis instigi katolikojn kontraŭ muslimoj en Shkodër, ni ne sukcesis ĉar ĉe albanoj la nacia sento superis tiun religion”.

Ekde la fino de Mezepoko, albana spaco estis ia ekvilibra areo inter plej potencaj imperioj tiutempaj, Austrohungara kaj Otomana. Ambaŭ ĉi tiuj imperioj estis subskribintaj traktatojn nomataj “kapitulacioj” laŭ kiuj austrohungaroj zorgis pri kristanoj tra doktrino “cultus protectorati” (protektado de eklezio) .

⁵⁴ Shtjefen Gjeçovi, (Mehill Kostandin Gjeçi- Kryeziu) 1873-1929, katolika pastor, etnologo kaj folkloristo

⁵⁵ Gjergj Fishta, franceskana pastor, verkisto eminent 1871-1940, konsiderita Homero de Albanio

⁵⁶ Dom Ndre Mjeda, jezuita pastor, poeto, 1866-1937

⁵⁷ Enver Hoxha, 1908-1985

⁵⁸ Katolika pastro, 1927-2011

Nia nacia heroo Skandebeg naskiĝis en ortodoksa familio, fariĝis islamano en la kortego de Sultano, poste bektaŝio (antaŭkondiĉo por janiĉaroj) , revenis patrien kaj reakceptis la religion de patro (ortodoksismo) kaj mortinte petis ke lin entombigu en katolika katedralo en Lezha. Unu el liaj fratoj, kontraŭe, petis ke lin entombigu en monaĥejoj de Athos, unu el la plej sanktaj lokoj de ortodoksismo.

Unu el kolosoj de albana literaturo, Pjeter Bogdani⁵⁹ citadas samtempe jen Kalvino-n jen Avicena-n en sia verko “Çeta e Profetënve” (“Bando de profetoj”, latine: Cuneus Prophetarium) . La unua tradukisto de Korano en la albana, Mitko Qafezezi, estis ortodoksulo.

La albanaj muslimoj festas “Sankta Georgon” (albane: Shën Gjergj) , alia parto festas “Sankta Nikolao-n” (albane: Shën Nikolla) kaj Kristnaskon, dum kristanoj vizitadas amike muslimojn okaze de iliaj karakterizaj festoj (Kurban - Bajramo) .

Okazis ne malofte ke la pastro devus laŭbezone ekzerci la musliman praktikon por honorigi mortintojn ĉar mulao kaj moskeo esti tro fore de la hejmo de ĉi lasta aŭ pro malbonega vetero.

En urbo de Shkodër, kie la loĝantaro estas religie miksa (muslimoj, katolikoj, ortodoksoj) , dum Ramadano ankaŭ nemuslimaj buĉistoj ne vendas porkaĵon.

Same en Shkodër estis muslimoj kiuj protektis la rekonstruadon de la katolika katedralo en la maloportuna jaro 1967 por albanoj, kiam dumnokte kelkaj fanatikuloj provis malhelpi tion. “Neniu tuŝu ĝin ĉar estas ja nia fundamento- laŭtvoĉe diradis ili”.

La religiaj festoj en Albanio, jen kristanaj, jen islamaj konservas spurojn el la periodo mitologia politeista. La albanaj katolikuloj norde la “Tagon de Buzmi” festas ĝuste dum Kristnasko sed submetante ĝin al “Tago de Kristnasko” kaj “Kulto de Fajro”. La “Sankta Maria” de muslimoj (albane: Shën Mëria) koincidas al la ”Tago de Zana” (Diano ĉe latinoj) je 23-an de aŭgusto.

⁵⁹ Pjeter Bogdani, katolika pastor, 1630-1689

Bektaŝioj havas kulton de “Patro Tomorr⁶⁰” (Baba Tomorri) simila al tiu mitologia greka de Olimpo. Kristana poeto Andon Zako titolis sian ĉefpoemaron ĝuste “Baba Tomorri” (Patro Tomorr) .

Tio montras ke albanoj havas kulton de naturo, festas tagon de la monto aŭ montaro (albane: Bjeshka) , tenas ankoraŭ la serpenton kaj kapron kiel totemon (protektanta dio) , havas kulton de fajro, ŝtono, akvo kaj pano, vojo por la gasto, tero kaj ĉielo.

Referaĵoj

<http://www.gallup.com/poll/128210/Gallup-Global-Reports.aspx%7C> Gallup Global Reports

- De la Rocca “Religion and Nation in Albania”, 1989, Romë.
- Dh Qiriazhi “Kristianity in Albania”, 2000.
- Mark Milan “Albanian life and Customs”, Kurti, Sirdani.
- “On the contribution of the catholics in Albania”, 2000.

Redaktis: **Bardhyl Selimi**

Meditado pri la raporto scienco-arto

Prof. Aleko Minga


Honora akademiano, profesoro en Tirana ŝtata universitato

⁶⁰ Tomorr, pli alta ol 2400 m monto en suda Albanio dominant tutan ebenaĵon



Prof. Aleko Minga meze, okaze de ricevo de la titolo “Honora Akademiano”

En la fino de la jaroj 50 estis publikigita en Anglio la eseo “Du kulturoj” de Charles Pency Snow⁶¹. Ĝi tuŝis la akran aferon de la profunda fendo inter du komponantoj de la homa kulturo, sciencoj matematikaj - naturaj kaj teknikaj unuflanke kaj arto, beletro kaj humanistiko aliflanke, fendo transformiĝinte en timega abismo, laŭ aŭtoro, rompinta la komunik-kanalajn inter ili. Ambaŭ kulturoj staris malproksime kiel kontraŭaj polusoj ĝis tiu grado ke oni povus paroli pri du kulturoj preskaŭ alergiĝintaj unu al la alia.



⁶¹ Fizikisto kaj novelisto angla, 1905-1980

Charles Percy Snow

Tio rapide kaŭzis tujan reagon en la intelektulaj rondoj.

Charles Snow estis eminentulo en sia tempo, ne nur kiel fizikisto kaj ŝtata altrangulo sed ankaŭ kiel aŭtoro de la romano “Morto en la ŝipo”.

Krome, tio okazis post sufiĉe ampleksa enketado inter 40 mil sciencistoj (ĉirkaŭ kvarono de tiuj en Britio) kaj 80 mil inĝenieroj.

Simile okazis en Sovetunio en la jaroj 60, kie oni aranĝis disputon “Fiziki i liriki” (Fizikistoj kaj lirikistoj) kio notinde pliigis la eldonkvanton de la revuo “Literaturnaja Gazeto”.

Al la jam malnoviĝinta disputo aldoniĝis lastatempe artikolo publikigite en Usono je titolo “Matematiko kaj poezio, kiom profunda estas la elfosaĵo inter ili”.

Mi persone konsideras kulturon kiel tuto de ĉiuj ties aspektoj multvariaj kaj diferenciigitaj.

Mallonga historia ekskurso

Pitagorianoj, la unuaj, klopodis trovi bazon por la unueco de la kulturo. Laŭ ili, la mondo estus ia ĥaoso kaj multeco da kontraŭaĵoj se ĉio ne estis kunigite harmonie en la kosmo, kio estas ja diina kaj stariĝas sur certaj numeraj raportoj. Ĉi tiuj raportoj estas eternaj, dum kio ajn alia malaperas.

Pitagorianoj insistis ke nia intelekto devus serĉadi ĉi tiujn raportojn en ĉiuj manifestaĵoj de la homa agado.

La pitagoriana devizo “ĉio estas nombro”, igis la nombron bazon de la kultura unueco.

Nature, la kulto de nombroj estis ne simple hazarda elpensado. Dum iliaj konkretaj serĉadoj pitagorianoj profunde impresiĝis ke fenomenoj kvalite diversaj posedis samajn matematikajn karakterizaĵojn. Tio instigis ilin ekpensi ke la nombro estas ne nur sekura kaj firma ekiro sed ankaŭ kondiĉo por klare kompreni la fenomenojn, ĉar la esenco de ĉi lastaj esprimiĝas ja per numeraj raportoj.

Pitagorianoj malkovris la numerajn raportojn kuŝantaj surbaze de la harmoniaj agordoj en muziko, de la strukturo de la muzika skalo ktp.

Danke al pitagorianoj, muziko fariĝis esenca parto de matematiko, kiu krome ampleksis ankaŭ aritmetikon, geometrion kaj astronomion, kaj ĉi tiu kvaropo aŭ la fama “kuadriviumo” estis nepre lernenda de kiu ajn kulturema homo.

Mi ne mencias ĉi tie aliajn numerajn raportojn, kies apliko fariĝis akceptita normo en arkitektonikaj konstruaĵoj por akiri eksterordinaran belecon kaj ĉarmon, sed almenaŭ mi diru ke en Panteono oni uzadis ankaŭ tre fajnajn raportojn inter partoj de la arkitektura strukturo por korekti ankaŭ optikajn iluziojn karakterizaj por la homa vidado.

Tiaj raportoj ekzistas ankaŭ en nia korpo, pro tio la skulptistoj prikonsideris ilin dum la kreado de la neripeteblaj iliaj verkoj.

Eĉ la nuntempa praktiko en la beleckonkursoj por decidi pri la premio, oni ekiras de certaj raportoj de la junulina korpo, daŭrigante la grekan intereson pri ideala figuro.

Aristoklo esprimas interesan ideon kion mi prezentas iel koncize: la celo de la naturo kaj ties leĝoj enradikiĝintaj profunde, strebas al multvariaj aspektoj manifestiĝantaj al unu aŭ alia formo de la beleco.

Tial, grekoj ne hezitis konsideri aritmetikon, geometrion kaj astronomion kiel muzikon de la spirito kaj arton de la menso.

La scienco kaj arto greka estas produktaĵo de la sama civilizo. En la grekaj verkoj, jen sciencaj aŭ artismaj, speguliĝas la fakto ke ili rigardas la universon sub “specie aeternitas” (je la prismo kaj beleco de eterneco) . Al ili interesas la universala kaj eterna kaj ne individua kaj portempa.

Estas la ecoj de ideala cirklo tiuj kiuj estas interesaj kaj ne la “ephemera nature”, ni diru, la cirkloj, formiĝantaj sur akva surfaco de iu baseno kiam ni ĵetas en ĝin ŝtoneton.

Samtiel, la greka arto el la klasika periodo provas eĥigi kaj priskribi ne la ecojn de apartaj homoj, sed de la homo ĝenerale.

La perfekta estas, laŭ sia nature, eterna, tial nur la perfekta stato indus rigardati. Laŭ ĉi tiu vidpunkto, la bela estas tiom emocia sperto kiom intelekta.

La influo de la scienco al arto

Oni rimarkas interesajn influojn de la scienca kulturo en la beletra-literatura kulturo.

Estas sciite ke la eŭklida geometrio estas statika. Oni ne esploras en ĝi la ecojn de la ŝanĝiĝantaj figuroj.

La tre kvieta etoso ĉe la grekaj temploj speguligas tion. La menso kaj la animo tie estas enpace. Ankaŭ en la greka skulpturo la figuroj estas statikaj, prudentaj, psikologie trankvilaj.

La diskoĵetisto de Miron, farante eksterordinaran klopodon, estas trankvila kaj neĝenita, “kvazaŭ anglo trinkanta teon”, diras Morris Kline⁶². Ankaŭ la statika karaktero de la greka dramo atestas tion. Tie estas malmulte aŭ nenia ago.

Ekde la komenciĝo de la dramo, oni donas kompletan sciigon pri la antaŭaj okazintaĵoj starigantaj problemon aŭ malfacilan kaj malagrablan situacion por la personaĝoj koncernitaj kaj mem dramo temas pri mensaj bataloj kaj malgrandaj faritaĵoj okazantaj enkadre de konkludo preskaŭ antaŭvidita.

Ligite al la statika karaktero de la greka dramo estas ankaŭ alia distingilo troviĝanta ankaŭ en la eŭklida geometrio.

La grekaj tragedioj akcentas la mekanismon de la fortuno aŭ de destino. La personaĝoj en dramo ŝajne ne posedas la volon kaj forton por entrepreni decidojn, sed direktiĝas de kaŝaj, misteraj fortoj. Tiel Edipo tentas malkompateme al incesto kaj patromortigo. La ago de la fortuno rilatis al la esenca devigo por uzadi deduktivan rezonadon, kiu ne lasas libera matematikiston elekti la konkludojn elĉerpiĝendaj de premisoj, sed devigas lin akcepti la necesajn sekvaĵojn.

⁶² **Morris Kline**, 1908 – 1992) profesoro de matematiko, verkisto pri historio, filozofio kaj instruado de matematiko, populariganto de matematiko.

Kulminan punkton kaj tre fruktodonan en la plektiĝo de arto kaj kulturo humanisma kun la scienco notas la Eŭropa Renesanco. La nova stilo, ellaborita de arkitekturo kaj figurativaj artoj postulis renoviĝon de la pentroarta tekniko, de desegnado, kaj tio estis kialo por ke eminentaj artistoj eksentu la bezonon de matematiko kaj interesiĝu pri ĝi.

La renesanca artisto turniĝis al matematiko ne por reprodukti naturon, sed influita de la reviglita greka filozofio. Li nutriĝis per la doktrino laŭ kiu matematiko estis ja la esenco de la reala mondo kaj la universo estas regula kaj eksplikebla racimaniere per geometrio.

La artisto kredis ke por penetri en la kaŝitan signifon, do en la realon de la temo kiun li klopodis elvolvi sur tolaĵo, li devis venigi ĝin en ties matematikan enhavon.

Tre interesa atestaĵo de la klopodoj de artisto por malkovri la matematikan esencon de la subjekto troviĝas en unu el la studoj de Leonardo da Vinĉi rilate la proporciojn. En ĝi li klopodas konvenigi la strukturon de ideala homo al la idealaj figuroj, kvadrato kaj cirklo.

Ĉirkaŭ la fino de XIII jc, pentristoj konsciiĝis ke la mezepoka pentroarto estis senviva kaj nereala. Tiam ili klopodis modifi ĝin. La ekspektata ŝanĝiĝo kaj la vera turniĝo alvenis nur tiam kiam oni komprenis ke la problemo de perspektivo devus traktiĝi sciencmaniere kaj ke la ŝlosilo por tio estis geometrio.

Brunelleschi⁶³, granda arkitekto tiuperiode ellaboris la sistemon de perspektivo. Arton oni aspiris rigardi kiel formo de sciado kaj scienco, dume oni ekspektis kaj esperis ke geometrio helpu ĝin por firmiĝu.

⁶³ Arkitekto kaj inĝeniero de itala Renesanco, 1377-1446



Filippo Brunelleschi

En la studaĵo “Della Pittura” (1435) Leon Batista Albert, ⁶⁴ unu el la plej universalaj mensoj de la humanisma kulturo, oni akcentas ke la unua postulo plenumenda de pentristo estas la kono pri geometrio. Artojn oni lernas rezonade kaj laŭmetode, dum ili posedatas per praktiko.

Ankaŭ Leonardo Da Vinĉi malŝatis tiujn pensantaj ke ili povus neglegtu teorion kaj produkti arton danke al praktiko. “Pentroarto estas ja scienco- diradis li- tial ties ekzercado ĉiam devas baziĝi sur sana teorio”.

Piero della Francesca⁶⁵, konsiderata kiel teoristo de la nova perspektivo, en sia traktaĵo “De Prospettiva pingendi”, ne nur pliĉigis la kontribuon de Albert, sed ankaŭ traesploris diversajn aferojn de ĉi tiu fako de geometrio je larĝeco kaj profundeco enviinda, pro tio oni estimis lin kiel unu el plej bonaj matematikistoj de XV jc.

Li planis matematike ĉiujn siajn verkojn ĝis plej eta detalo. La lokiĝo de ĉiu figuro elkakkuliĝis korekte rilate al la ceteraj kaj al la organiziĝo de la pentraĵo entute.

Albrecht Durer⁶⁶, granda tiutempa germana pentristo verkis libron pri geometrio cele diskonigi ĝin inter artistoj.

⁶⁴ **Leon Battista Alberti**^[1] 1404 –1472) itala aŭtoro, artisto, arkitekto, poeto, pastro, lingvisto, filozofo, kriptografisto.

⁶⁵ **Piero della Francesca** 1415^[1] –1492) pentristo de frua Renesanco

⁶⁶ **Albrecht Dürer** (1471 –1528), germana pentristo, matematikisto kaj teoristo

Brila ekzemplo de la perfekta perspektivo estas “la lasta vespermanĝo” de Leonardo. Ĝi estas desegnita por ke donu precize la impreson al la okulo en la reala vivo.



“La lasta vespermanĝo”

La rigardanto sentas sin kvazaŭ en tiu ĉambro. La forirantaj linioj en murojn, plankon kaj plafonon ne nur donas klare la profundecon, sed ankaŭ konvergas en elektitan punkton por ke ĝi lokiĝu sur la kapo de Kristo kaj la nia atento koncentriĝu al li. La figuro de Kristo formas egallateran triangulon. Ĉi tiu elemento de la desegnaĵo celis esprimi la ekvilibron de la sento, racio kaj korpo. Samtiel, “La Skolo de Ateno” de Raffaello, estas ĝusta lokiĝo arkitektura kie la harmonia ordiĝo, majstreco de perspektivo, precizeco de proporcioj enkarniĝas la idealan perfektecon de la akceptitaj standardoj.



La skolo de Ateno

Ĉiuj renesancaj pentristoj bone konis la klasikan geometrion. Sed la bezono instigis ilin pluri antaŭen, eniri kampon de esploradoj specifaj, kio koncernas hodiaŭ la deskriptivan geometrion. Nature ili apenaŭ atingus ĝis la sistemeca vizio de ĉi tiu fako (ellaboriĝonta poste de Gaspard Monge⁶⁷, fine de XVIII jc) sed ili forkaptus kelkajn fundamentajn ties konceptojn kaj kelkajn karakterizajn metodojn, kiujn ili uzadis tre lerte.

La pentritaj bildoj aŭ arkitektonikaj verkoj desegnitaj plene kontentigis la novan guston de la epoko. Ilia pasio por la geometria pureco, enkarniĝinte en la precizeco de proporcioj kaj en la harmonia ekvilibro de la partoj ene de la tuto, estis ja evidenta atestaĵo ke la artisma konceptiĝo kaj scienca konceptiĝo interplektiĝis perfekte unu kun la alia sen ia ajn traŭmo. Ĉi tiu interplektiĝo estis instiga gisto en la kulturo de la jaro 1500.

Ĝi havis alian sekvaĵon. Komence la humanistoj estis alergiemaj al la geometria rigoreco, sanktigita kaj glaciiginta en ties leĝoj. Sed pentroarto kaj arkitekturo rompis tiun tabuon.

Aliflanke, nun matematiko ne estis plu esprimaĵo de la diina harmonio laŭ filozofoj, sed potenca rimedo por estigi plej belajn ideojn de homoj.

⁶⁷ **Gaspard Monge, Comte de Péluse** (1746^l–1818) franca matematikisto, revoluciulo kaj inventisto de deskriptiva geometrio.

Mem la pentroarto kvitiĝis kun geometrio disvolvante la sistemon de perspektivo dum XVII jc enkondukante novajn ideojn geometriajn (projektiva geometrio) , “la scienccon naskite de arto”.

Kompare al la aliaj sciokampoj, mekaniko, danke al uzado de matematiko, ŝajnis pli perfekta, ĉu pro ties strukturo logika kaj argumentadforto, ĉu pro kapableco por racia eksplikado de la fenomenoj de ĝia sfero kaj antaŭvidoj precizaj, ĉu pro certeco de praktika vereco de principoj kaj leĝoj, kio pruviĝis dum multnombraj aplikoj en tiutempa tekniko.

La mirinda sukceso transformis la matematikajn kaj sciencajn verkaĵojn en modelon imitenda de ĉiuj. La plej grandaj literaturaj figuroj de XVII-XVIII jc ne hezitis konfesi ke iliaj skribaĵoj estis sufiĉe malproksime kompare al nivelo de la sciencaj laboraĵoj kaj la prozo kaj poezio povus pliboniĝu sekvante ĉi tiujn bonajn ekzemplojn.

Oni komencis per klopodoj por standardizado de la lingvo. Imitante matematikon, en la ordinara legado oni komencis uzadi tro da abstraktaj konceptoj. La lingvo komencis senvestiĝi de konkretaj vortoj belaj, kolor- kaj-sukoplenaj. Laŭ reformistoj, la ideala lingvo devus simili al algebro, la ideoj devus prezentiĝi per simboloj samkiel la nombroj prezentiĝas per literoj. La misorientigaj kaj trompigaj metaforoj devus likvidiĝi. La ideoj devus akompanati per plej eble malgranda nombro da sintaksaj interrilatoj. Ĉi tiun situacion estas satiriginte majstre Jonathan Swift en sia verko:

La lingva reformo en si mem estis nur malgranda influo de matematiko al la literaturo. Okazis ŝanĝiĝoj envere radikalaj en la stilo de prozo kaj poezio. Multaj verkistoj kredis ke la sukceso de matematiko dediĉitus nur al ties stilo senvestita, sen bagatelaĵoj, sen mankoj, tial ili celis uzadi precizajn esprimajn metodojn, tranĉitajn frazojn kun klaraj sencoj, reveni al la pureco kaj fonta kurteco, kion priskribis tiel La reĝa Asocio:

“Ĉio reduktiĝu plej eble al matematika simpleco”.

Oni forĵetis sekve de tio, la impetajn flugojn de la imagopovo, forlasis la potenciajn esprimaĵojn kun emocia ŝarĝo, detranĉis la flugilojn de la revigo poetika, malvarmiĝis la entuziasmo, oni rezignis de eĥigaj kaj sugestivaj frazoj. La tasko de verkisto- diris Pope⁶⁸- estas:

⁶⁸ **Alexander Pope** (1688 –1744) angla poeto, plej konate pro liaj versaĵoj kaj traduko de Homero

Direkton donu al la muzo, galopon ne instigu
Por la impeton bremsilo ĝi estu, ne sprono por forkuro.

Verkistoj devus komuniki la faktojn per stilo konforme al la altaj standardoj de la logika pensado. Prozo fariĝis abstinema, preciza kaj epigrama.



Alexander Pope

La forlaso de emocioj kaj fortaj pasioj inspirantaj la grandan poezion nepre sekigus la lirikon. Ankaŭ tragedioj fariĝis viktimoj de la nova literatura etoso, de autoritata regado de racia rezonado. La sintezo inter penso kaj emocio fatale disrompiĝis.

Arto sufokiĝis ĝis tiu skalo ke ĝin oni konsideris eta distraĵo. Kelkaj poetoj opiniis ke la funkcio de poezio devas esti didaktismo, rezonado kaj rima argumentado. Wordsworth tiel priskribis la situacion:

La homo tenas la bremsilojn
Gvidas nun tie kie tremiĝis pro adstringita debuleco
Per gigantulaj paŝoj la scienco antaŭenmarŝas
Sed ĉu ni estas pli karaj, ĉu pli bonanimaj?

Ne nur literaturo influĝis de matematika animo de la njutona epoko. Pentroarto, arkitekturo, ĝardenarto, eĉ desegnado de mebloj fariĝis subjekto de severaj konvekcioj kaj starigitaj standardoj. Oni postulis por pentraĵoj fidelecon al la pentrata objekto, subiĝon de ĉio, eĉ de koloro al la ideo, oferon de la detaloj de la plano ĝenerala kaj ege strikta.

Al pentristo oni postulis ke li turniĝu al la menso, ne al la okulo. En arkitekturo kaj en minoraj artoj, la ordo, balancigo, kongrua rigoro kun simplaj formoj bone konataj geometriaj kiuj ĉie regis.

Arto reduktiĝis tiel en sistemon de reguloj kaj la beleco skiziĝis ege malriĉiĝinta kaj povra en vico de karakterizaj formuloj.

Sed la poetoj reagis forte, ili rekonfirmis la gravecon de la sentoj, de la travivaĵoj, de homa konscio. La naturo-diradis ili-devas travivi, ne forkapti ĝin per malvarmaj matematikaj raportoj, ĝi devas ĝojigi nin sen ia ajn perforto aŭ altrudo per raciistaj orgioj.

Kiel ajn, matematiko kaj aliaj sciencoj estas kontribuintaj pozitive al arto kaj literaturo.

Sufiĉas du ekzemploj.

Dum XIX jc Joseph Fourier⁶⁹ montris ke ĉiuj sonoj, voĉaj kaj muzikilaj, simplaj kaj kompleksaj, estas plene priskribeblaj per matematikaj rimedoj. En la jaro 1807 Fourier prezenti en Akademio de Sciencoj mirindan teoremon laŭ kiu ĉiu muzika sono prezentiĝas per sumo de termoj je formo $a \sin bx$.

⁶⁹ Joseph Fourier, 1768-1830, franca fizikisto kaj matematikisto



Joseph Fourier

Tio helpis notinde interalie ankaŭ en plibonigado de piano- produktado. Simile okazis en produktado de organoj ka. La ekvacioj de Maxwell⁷⁰ inkluzivitaj en la kvinopo de “ekvacioj ŝanĝigintaj la vizaĝon de la mondo” antaŭvertis kuraĝe la fizikan realon de elektromagnetaj ondoj, kiuj tiutempe apenaŭ povus dedektiĝi per eksperimento.



⁷⁰ **James Clerk Maxwell** of [Glenlair](#) (1831 –1879) skota fizikisto kaj matematikisto

Maxwell

Hertz⁷¹ kiu igis tuŝebla ĉi realon 23 jarojn poste kaj dek jarojn post la morto de Maxwell, notis la unuan paŝon de nova teknika revolucio. Sufiĉus menciis nur radion kaj televidon, riĉaĵo ĝuata ne nur de elito se ankaŭ de amaso da homoj, miloj kaj dekmiloj kilometroj for de grandaj loĝcentroj.

La influo de arto kaj beleto al la scienco

Kelkaj diras ke la unueco inter du kulturoj pasintempe estis simple eksplicite per la fakto ke multaj protagonistoj tiam posedis universalan menson kaj mem kulturoj ne estis diferencigitaj.

Do, kiel eblas ke arto kaj beleto sugestu al la scienco ideojn, impulsojn, instigojn?!

Nu, ĉu ankoraŭ la mondo de beletra-artisma kulturo influas al agado de sciencaj esploristoj?

Unue, estas dirende ke la unueco inter ambaŭ kulturoj ne estas historia kategorio. Ĝia bazo estas eterna, ĉar tia estas ilia komuna fonto: ambaŭ ili estas homaj kreitaĵoj. Estas ja produktoj de intelekta streĉeco.

Descartes diris ke ĉiuj scioj estas nur homa prudento, kiu plurestas la sama en ĉiuj ties aspektoj, ke kiom ajn multvariaj estu la objektoj kie ĝi aplikiĝas, tio ne gravas por ĝi tiel, samkiel ne gravas por la suno la multvarieco de objektoj lumigitaj de ĝi mem”.

Hermann Weyl⁷² substrekas ke la pensado estas io tre homogenaj kaj universala. “Gvidite de interna lumo, ĝi ne reduktiĝas en aro da reguloj aplikataj mekanike kaj neniel haltas en “sektoroj” kun nepenetreblaj muroj (matematika, filozofia, estetika, historia ka) ”

⁷¹ Hertz Heinrich Rudolph (1857-1894)

⁷² Hermann Klaus Hugo Weyl(1885 –1955) germane matematikisto kaj teorigo de fiziko



Hermann Weyl

Kompreneble, la meĥanismoj dominantaj en la scienca esplorado kaj en la proceso de artisma kreado estas diversaj, sed ĉu ili interferas unu al la alia, ĉu malhelpas?

Plej elstaraj personecoj en la scienca kampo estas parolinte pri la neanstataŭebla stimuleco de tiaj faktoroj kiel fantazio, imagopovo kaj precipe la meĥanismoj de artisma perceptado.

Weyl skribis” Okupiĝi per matematiko tutsimilas al kreado de mitoj, beletro aŭ muziko”

La libro de Douglas Hofstadter⁷³ havas titolon“Gödel, Escher, Bach“, “ora kaj eterna kordono”, kurte GEB. Kio ligas ĉi tiujn personecojn, matematikiston kaj logikiston aŭstran Kurt Gödel, kies laboraĵoj komence de jaroj 30 notis neatingeblan kulminon en matematika logiko kaj montris neeblecon por plene formalizi la homan pensadon; nederlandan pentriston Maurits Cornelius Escher, majstron de prezentado de kompleksaj interrilatoj de la formoj kaj figuroj en la spaco, realigintan de tiom multe da mirindaj optikaj iluzioj; genian germanan komponiston kaj profundan esploriston de muziko Johan Sebastian Bach?

⁷³ **Douglas Richard Hofstadter** (naskite 1945) usona akademiano



Douglas Hofstadter

Ĝuste interesaj koincidoj en la strukturo de ties pensado, iluminado de ideoj kiujn je sintezita formo Hofstadter uzadis por prilumigi la plej lastajn atingojn en la komputila scienco.

Cassirer⁷⁴, klopodante pli profunde analizi la leĝojn de la kultura agado de homo kaj ties kreitaĵo: lingvo, mitoj, religio, arto, scienco ktp, opinias ke komuna apartaĵo karakterizanta ĉiujn estas la simbolo.

“La homo- akcentis Cassirer- delonge ne vivas nur en la fizika mondo, sed ankaŭ en ia simbola mondo.

Tri grandaj patriarĥoj de la scienco, Poincare, Bohr kaj Einstein, ne hazarde substrekas ke la “specifaj” meĥanismoj sciencaj kaj artismaj estas tutsame gravaj komponantoj, interplektitaj de la kreiva proceso.

⁷⁴ **Ernst Cassirer** (1874 –1945) germana filozofo



Henri Poincare

Miller⁷⁵, preciza konanto de la agado de ĉi tiuj kolosoj, diras ke tio okazas ĉar en iliaj studoj “la limoj inter disciplinoj forviŝiĝis kaj malaperis ofte kaj ili tiam antaŭŝatis nek la logikajn dedukciojn, nek empiriajn observadojn induktivajn, sed la pensadon estetikan kaj desegnitajn”.

“Nature- skribis Poincare- mi intencas ne tiun belecon okulfrapanta, la belecon de la kvalitoj kaj ecoj evidentaj, sed la plej profundan belecon kiu kaŝiĝas en la harmonio de la partoj kaj forkaptiĝas nur per la travidebla racio”.

Li envicigas kiel fundamenta kriterio en matematiko kaj scienco ĝenerale “kriterion de eleganteco” kiu estas ja estetika kriterio.

La evoluo de moderna matematiko montris tiom multe da perspektivoj malfermitaj danke al tiu “estetika” kriterio.

Einstein aldonas ke la scienco teorio devas plenumi du kriteriojn:

“ekstera pravigo” kaj “interna perfekteco”.

⁷⁵ David Philip Miller sociala historiisto de la scienco, Australio



Albert Ajnshtajn

Do la teorio devas esti malkontraŭdira al la spertaj donitaĵoj kaj al la premisoj (konceptoj kaj fundamentaj rilacioj) devas esti logike simplaj kaj naturaj.

Bertrand Russell esprimiĝas tiel:

“Matematiko posedas ne nur verecon sed ankaŭ superan belecon, subliman purecon, kapabla por pliperfektigo. La aŭtenta esenco de la plezuro, reviglo, travivaĵo de la sento por ke estu pli ol homo, troviĝas en matematiko samgrade kiel en poezio”.



Bertrand Russell


Sauty⁷⁶ deklaras: “La naturo, kiam ĝi devas elekti inter la malbela kaj bela, ĉiam elektas la ĉi lastan”.

Ankaŭ scienco sekvas ĉi regulon, tial ĝi estas fonto de eterna mirado por tiuj kiuj ekzercas ĝin. Weyl eksplikas: “*En mia laboro mi klopodas kunigi la veron kun la belon, kaj kiam mi devas elekti unu inter ili, mi elektas la belon*”.

Kiel sciite, la hipotezo de Riemann⁷⁷, laŭ kiu nuloj de Zeta- funkcio lokiĝas ĉiuj sur la rekto $x = 1/2$ ankoraŭ ne estas pruvita kvankam konfirme en kolosala nombro da kazoj.

⁷⁶ **Marcus Peter Francis du Sauty** OBE (naskite 1965) profesoro de matematiko

⁷⁷ **Georg Friedrich Bernhard Riemann** (1826 –1866) germana matematikisto



Reela parto (ruĝa) kaj imaginara parto (blua) de funkcio Zeta de Riemann laŭlonge de la kritika linio $\text{Re}(s) = 1/2$. La unuaj nulo ne trivialaj povas vidiĝi ĉe $\text{Im}(s) = \pm 14.135, \pm 21.022$ kaj ± 25.011 .

Kial do matematikisto kredas je tiu hipotezo? Simple pro estimo al la beleco. Nulo ekster la streko estus “ia makulo” en majesta pejzaĝo, unu disonanco en mirinda sinfonio” (Enrico Bombieri⁷⁸).



Enrico Bombieri

⁷⁸ **Enrico Bombieri** (naskite 1940) matematikisto en Princeton, New Jersey

Aŭtune 1988, usona revuo “*Mathematical Intelligencer*” invitis siajn legantojn envicigi, laŭ poentosistemo, la plej belajn figurojn matematikajn. Konklude, la revuo publikigis 15 plej belajn formulojn.

Ĉekape de la listo staris la Eulera formulo $e^{i\pi} = -1$, kiu ligas surprizige tri famajn nombrojn je longa historio: π , la konstantan raporton de perimetro al diametro de ĉiu cirklo, kies naturo defiis la antikvan grekan pensadon, ĉar estis dramece interplektite kun la problemo de kvadratiĝo de cirklo; e , bazon de Neperaj logaritmoj, grava matematika instrumento kaj la imaginaran unuon i ($i^2 = -1$), uzata por kreiĝo de tuta nova nombra aro, nomata aro de kompleksaj nombroj.

La Eulera formulo havas mirindan simplecon.



Leonhard Euler

La saman lakonecon kaj perfektecon de formoj havas la ekvacioj de Maxwell, ampleksantaj tutan teorion de fenomeno de elektromagnetismo.

Ankaŭ la periodika leĝo de elementoj de Mendelejev mantras ke tre komplikaj fenomenoj povas prezentiĝi per relative simpla eleganta formulo aŭ sistemo.

Einstein parolis pri nia “religia sento kosma”. Post paganismo aŭ religio de timo, post kristanismo aŭ religio de moralo, ĉi tio estus “religio de scio, leviĝo kaj nobliĝo de la animo en la strebado por forkapti ties diinan lumon”.

“Ĉi tiun animtremon- substrekis Einstein- malfacile povas ekspliki al la homoj kiuj tion ne travivis. Sen la interna lumo estas neeble por la homo la kreado kiel manifestaĵo de ties esenco. Se ĝi limiĝus nur per unu aspekto, ekzemple logiko-matematika, tio tutsimilus al la lumo de la steloj, bela, klara, sed malvarma kaj eksterhoma”.

Scienco estas ĉiam ia kombinaĵo de logiko kun intuĵo. Logiko sen intuĵo ne kreas novan informacion, sed nur evidentigas informacion enhavata en la inicaj premisoj

Logiko sankcias la akirojn de intuĵo, estas ia higieno por teni sanaj kaj fortaj la intuitivajn ideojn. Sed sen intuĵo ne ekzistas kreado, dum la logikaj skemoj, laŭ Aristotlo en si mem ne havas ontologian valoron..

Ni ilustru tion per la modelo de atomo de Bohr en la fruaj jaroj de XX jc. Tiu modelo konstruiĝis surbaze de fragmentecaj, disigitaj faktoj.



Niels Bohr

Bohr sukcesis trovi, danke al eksterordinara intuĵo kaj fajna flaro la leĝojn de la spektralaj linioj kaj elektronikaj envolvajoj komprenante ties gravecon por ĥemio.

Einstein diris ke la inica intuïto estas tre proksima al tiu momento de la muzika kreado, pri kiu parolis Mozart. Ĉi lasta rememoris travivaĵon, kiam momente oni aŭdas la tutan simfonion de dedukcioj, elkalkulaĵoj kaj eksperimentoj, ĝi eĉ sugestas la plej mallongan vojon por empiria efika kontrolo.

Nenia scienca malkovro estiĝis per logika deduktado aŭ per plifortiĝo de la observa bazo. Necesa kondiĉo por la kreitiveco estas lasi la menson vagadi senbare ekster la konvenciajn regulojn.

Multaj homoj aŭdis pri la fama eldiraĵo de Einstein: “Mi estas profitinta pli el la verkoj de Dostojevski ol el la laboraĵoj de Gauss”.

Tio estas vera! La alia kulturo influas al la scienco kulturo notinde.

Sed Einstein dedektis en la beletra literaturo ne elementojn de la scienca mondkoncepto, sed impulsojn por esplorado.

Fakte, la radikoj psikologiaj kaj la psikologia efiko de teorio de relativeco estas unue ligitaj kun la nediskutebla pruvado de paradokseco de la estado. Tiu teorio profunde impresigis sciencistojn kaj ŝanĝis la karakteron de la scienca pensado de la epoko ĝuste ĉar ĝi montris la aŭtentikecon de paradokso. Dostojevski estis ja artisto de aŭtentika paradokso.

La kreitiveco de Dostojevski estas tragika serĉado de harmonio. Li komprenas ke la monda harmonio ne povas esti simpla, “eŭklida”, se ni uzas la esprimiĵojn de Ivan Karamazov, dum lia interparolo kun Aljoŝa. Ivan Karamazov parolas pri universala harmonio de “euklida estaĵo”.

“Mi estas konvinkita ekde mia infanaĝo ke la suferaj vundoj estus sekiĝontaj kaj malaperontaj, ke la tuta humiliga komikismo de la homaj kontraŭdiroj pereus kiel mizera imaĝo, kiel malpura elpenaĵo de malfortulo, kiel atomo de la homa euklida menso, kiu finfine, en monda finalo, en momento de plej alta harmonio estiĝos kaj aperos io, tiom valora, kiom ĝi sufiĉus por ĉiuj koroj, por mildigi ĉiujn kolerojn, por lavi ĉiujn homajn krimojn, tutan sangon enverŝita de ili”.

Alian paŝon ege kuraĝan je direkto al tiu harmonio faris Einstein. Eble fiziko transpasos de neeuklida Riemana geometrio de la mondo al pli ĝenerala kaj pli paradokseca geometrio, por kiu parencas la Dostojevskia strebo al senfina

paradokseca harmonio de la estaĵo, eĥanta ne nur en la paroloj de la repliko de Ivan Karamazov, sed trapenetranta kiel ĉeesta fadeno la tutan verkon de Dostojevski.



Fjodor Dostojevski

La diferenciĝo de kulturo estas proceso tiom neevitebla kiom necesa. Ni devas malkaŝi kaj kultivi ĝuste tiujn emojn intergrajn kiuj akompanas la diferenciĝon. Hodiaŭ tion realigas la tiel nomataj sciencoj ĉe la limzono de du kulturoj.

Esperantigis Bardhyl Selimi,
majo 2012

Ismail Kadare

Fragmentoj el intervjuo por la serba revuo NIN⁷⁹

Ne ekzistas misiistaj popoloj en Balkanio

⁷⁹ La subtitoloj estas miaj- B.S.)

Ni estas malfacile disigitaj de kelkaj frenezaj sonĝoj, kelkaj ridindaj misiismoj. Estas same malfacile por ni kompreni ke ne ekzistas misiistaj popoloj en Balkanio kaj mi ne kredas ke tiaj troviĝus ie ajn alie. Ke la greka misiismo sonĝanta por la liberigo de Kostandinopolo estas tiom ridinda kiom la serba misiismo celanta la distancon Belgrado-Tokio kaj tiom, eĉ pli ridinda ol ambaŭ ĉi tiuj estis iam la albana misiismo defende al marksismo-leninismo je planeda skalo

Tri balkanaj popoloj

Balkanio estas kontraŭita iomete ĉar Slovenio kaj Kroatio estas retiriĝinta, same Rumanio ŝajne ne sentas sin en Balkanio.

Do, plurestas albanoj, grekoj kaj slavo. Ili estas krom popoloj kaj civilizoj diversaj, ankaŭ tri kulturoj, tri malsamaj lingvoj (eĉ ĉiu el li kun propra alfabeto: latina, cirilika kaj greka) . Balkanion oni apenaŭ povas imagi sen iun el ĉi tiuj konsistigantoj.

Fiksitaĵoj de jarcentoj en ĉi tiu regiono de Eŭropo, la ekzisto de neniu el ili povas kondiĉiĝi de la alies. Enkaze de komplikaj, vole nevole, ni estas devigitaj interkonsentiĝi.

Hodiaŭ, en la kondiĉoj de Eŭropa Unio, akceptita mentoro de ĉiuj el ni, tia ekvilibro estas multoble certigita.

Neniun el ĉi tiuj popoloj oni povas elradikigi disde balkana duoninsulo. i

Ankoraŭ ne kondamnita doktrino

Estas doktrino en Balkanio, ia draŭto el la jaro 1938, postulanta malferme la forpelon de unu el ĉi tiuj popoloj el la duoninsulo. Tiu draŭto estas skribite de unu el konataj akademianoj je nomo Vasa Ĉubriloviĉ kaj je titolito “La forpelo de albanoj”.

En ĉi tiu programo, kune kun la ideo ke la vivo de serba nacio estus por ĉiam malsekura najbare al albanoj en Balkanio, la sola solvo estus la forpelo de ĉi lastaj. Tio devus komenciĝi kun albanoj de Kosovo.

Mi legis tiun draŭton ekde pluraj jaroj. Mi ne scias alian kazon ke ĝi estis kondamnita en Jugoslavio kaj poste en eksa Jugoslavio. Krimeca projekto nekondamnita estas pli danĝera ol kaŝita terorisma organizaĵo.

En la jaro 1999, do 60 jaroj poste, tuta mondo vidis la aplikon de ĉi tiu projekto: “la faman forpelon” de albanoj, kio estis ankaŭ la kaŭzo ke Jugoslavio estis punita.

La kondamno de la radikoj de la malbono estas deviga por ĉiuj. Se oni malkovrus similan doktrinon en mia lando, en Albanio, mi akceptus publike ne nur la honton pro ties malkondamno, sed ankaŭ la honton pro malfruiĝo de la kondamno.

Albana Kosovo

Kosovo estas lando loĝata plimulte de albanoj. Estas sciite ke en nia planedo, la teroj, agroj, urboj ne difiniĝas pro la arboj, nek pro la cervoj, ne pro alia signo trovata sur ili, sed pro la homoj. Kurte, la tero kaj la homoj sur ĝi iras kune.

Kosovo loĝatas de albana plimulto, sekve, en ĉiuj sencoj ĝi konsideriĝas unue albana. Dume ekzistas alia vizio kontraŭstaranta ĉi tion. Laŭ ĝi Kosovo estas serba, sendepende ke la homoj sur ĝi estas albanoj.

Ĉio fontas el tiu malkoincido. Bonŝance, por unu flanko kaj malfeliĉe por la alia, la malkoincido estas neriparebla.

Estis tempo kiam tio permesatis, sed tiam estis tempo de kolonioj. Kiel sciite, tiu tempo estas pasinta por ĉiam. Kosovo estis kolonio, lasta absurdaĵo en Eŭropo. Pro tio, Eŭropo intervenis malfrue, sed brutalece, por normaligi la staton, kies tempo jam pasis.

Ni revenu al la malkoincido tero-homoj. Por pravigi tion, estas elspenzite multe da energio, por kio balkananoj estas majstroj.

Tio komenciĝas el la radikoj, pli precize el la fakto kiu alvenis la unua en Balkanion kaj kiu poste. (alivorte, la unua alveninto konsideriĝas la legitima posedanto de la tero, la dua iru kien ajn li volu!)

Nur por argumento, ĉi tiuj estis la aferoj de Kosovo kiel lulilo de Serbio kaj memoraĵo el la milito de Kosovo en 1389. Ambaŭ ili rilatis kune, sed por la ceteruloj ili ne estis tiom konvinkaj.

La tero kie okazis batalo, eĉ fatala por unu popolo, ne povas difini, eĉ parte ties “lulilon”.

Se ni rememoru pri historio de Eŭropo, la plej grandaj bataloj okazis kutime en fremdaj teroj, bataloj de Cezaro ekzemple, aŭ Waterloo, ne menciante mongolojn, kiuj tie kie vesperiĝis, ne tagiĝis.

En tia kazo, la mondo kaj precipe nia Eŭropo ekhavis tiom da luliloj kiom fariĝus tute kaosa.

Krome, la fama batalo de Kosovo, ne estas tiel instruata en parto de la lernejoj de Balkanio. Estis transformiĝinte ĝia esenco, partoprenintoj en aliancoj, kiu militis kontraŭ kiu, kio estas la milita rezultato kaj tiel plu.

La motivo de la forpelo de kelkiu popolo, delonge projektite, neniam kondamnite, aperis nude, apogite skandalece ankaŭ sur tiu milito, dum devus okazi la kontraŭo: la milito de 1389 povus esti la bazo de historia amikeco.

Ĉu estis justa la bombardado de Serbio?

Mi estas dirinte jes por la bombardado de Serbio. Kial do?

Antaŭ ni estis ekzercata envere io tre sovaĝa, bombardado el aero, sed ĉi tiu ekstrema sovaĝa ago, estis plenumata por haltigi ion pli ekstreman kaj pli sovaĝan: masakron. Tiel, oni juĝis tion okazanta en Kosovo. Pro kelkaj tragikaj ĉirkonstancoj, tio estis la sola maniero por haltigi la malbonon.

La historio de la homaro rare, tre rare, estas rekoninte neeviteblan bombardon, necesan. Sed la historio de la homaro apenaŭ rekonis necesan masakron. Tial, pro manko de alia solvo, tre dolorige oni permesus la uzadon de bomboj. Tia estis mia rezonado.

Ĉu la politikaj elitoj elĉerpis lecionon de tio?

Mi ne kredas. Ekzemple ili ne kuraĝas pli paroli pri “etna purigado” sed diradas tamen ke “ni ne forlasas Kosovon!”. Kia diferenco esenca ekzistas inter la esprimaĵo “forpelo de albanoj” disde “ni ne forlasos Kosovon”?

Tiu ĉi esprimaĵo signifas ke “ni ne akceptas ke preter ni vivu alia popolo”.

Ĉi tiuj deklaraĵoj ne estas la samaj al tiuj en la lagobordo Wansee en la jaro 1942, sed okazas meze de hodiaŭa Europo, eĉ sojle de diskutado por akcepti Serbion en EU. Mi ne scias ĉu la altranguloj eŭropaj, baronino Aŝton ekzemple, menciante nur unu nomon, havas sciojn pri tia patetismo.

La demando stariĝas hodiaŭ antaŭ balkana lando (ĉi kaze Serbio) : ĉu ĝi agnoskas sian albanan najbaron?

Se ĝi agnoskas ĝin, faru tion tuje. Se ne agnoskas, ĝi elvolu ĝian solvon.

Serba Kosovo? Sed Kosovo, kiel mi jam diris, estas loĝata de albanoj plimulte. Pro memoraĵoj serbo-albanaj.

La demando stariĝas tute simple: Kio okazos al albanoj laŭ la serba solvo? Ĉu ili konvertiĝu al serboj? Ĉu ili foriru? Ĉu ili forpeliĝu? Jen, do, ni turniĝis al la komenciĝo per bomboj.

Serbio devas agnoski Kosovon

Eksterdube estus pozitive la senhezita agnosko de Kosovo. Des pli, estus pli bone ke Serbio, la unua, fariĝu tion ekde komenco.

Vi povas ekridi, sed mi parolas serioze. Kelkaj jaroj antaŭe, okazis evento, ne tiom komentite, sed rara en la historio de la monda moraleco. Portugalio, eksa reginto de malgranda lando, Orienta Timoro, estis disigite kun ĝi malagrabla. Tamen, post sendependiĝo de Timoro, kiam ĝi havis internan dramecan problemon, Portugalio la unua kaj la sola, inter la monda neglegtado, ekalarmigis.

Pli ol semajnon, la ŝtato, parlamento, tuta portugala socio, frapis al la kampanoj por ke la mondo helpu sian eksan kolonion. Portugalio faris tion sentante ŝuldon moralan por la lando iam regite de ĝi.

La komparoj kutime estas malĝustaj. Du balkanaj landoj, Serbio kaj la nova, Kosovo pli facile povas interkompreniĝi, eĉ pro la kialo ke dum Portugalio estis miloj da kilometroj for Timoro, Serbio estas nur kelkaj paŝoj apud Kosovo. Krome, ambaŭ ili apartenas al eŭropa kontinento.

La krimoj de ambaŭ flankoj

La investigado kaj kondamnado de krimoj de albanoj (2004, forbruligo de la serbaj preĝejoj, la trafikorganoj dummilite) ne povas okazi ekster la plena vizio de la dramo. La mondo terurigita pro 800 beboj albanaj malpli ol 5 jaraĝaj, buĉitaj dum la konflikto. La donitaĵoj estas publikigitaj en la angla kaj franca presoj ne far iu albano sed far serba ĵurnalisto Miroslav Filipoviĉ. Mi ne tro longigus kun miloj de perfortoj, kaj aliaj teruraĵoj.

La proceso devas okazi kontraŭ kiu ajn, pri ĉio en siaj veraj proporcioj.

Esperantigis Bardhyl Selimi

La tempo, kiam mi pentis pro mia verkisteco

(Intervjuo kun la verkisto Fatos Kongoli) (de Kozeta Zylo)

Kozeta: Vi ricevis de prezidento Sarkozy la plej altan ordenon “Kavaliro de la Honorlegio”..

Fatos: Miaj rilatoj kun la franca lingvo, kun la kulturo kaj civilizo franca, kun Franclingvio komenciĝis antaŭ duonjarcento, ekde la benkoj de la mezlernejo, kiam ni lernis la francan kiel duan fremdan lingvon (krom la rusa) .

Komence tio estis nur hobbio, sed dum la tempo, dum la obskuraj jardekoj de la diktaturo, la franca lingvo, la kulturo kaj civilizo francaj, fariĝis miaj spacoj de forfuĝo, miaj spacoj de libero. En ĉi tiuj spacoj, dum tiuj jaroj mi konatiĝis kun la granda franca beletro, konatiĝis kun la mondo, iamaniere fariĝis verkisto, tiu kiu estas mi hodiaŭ.

Kozeta: Ĉu via iam pensis, ke vi fariĝos verkisto tiom vaste tradukita en multaj jaroj?

Fatos: La veron dirante, mi apenaŭ pensis pri tio. Dum la tempo de diktaturo mi verkis kaj publikigis malmulte. La plejparton de la tempo mi legis, aparte franclingve la grandajn majstrojn, kiuj reprezentas la verajn skolojn de la beletro, ne sciante ke tiamaniere mi investas por la estonteco. Feliĉe alvenis la tagoj, kiam la diktaturo disfalis kaj mi ne plu perdis tempon, sed ekverkadis libera, tiel kiel mi aspiris kaj tiel kiel mi neniam verkis antaŭe. Mi estis bonŝanca, miaj romanoj publikiĝis kaj ŝatiĝis en Albanio kaj en aliaj landoj.

Kozeta: Vi estas studinta pri matematiko, kio do estis la plej forta incito kaj motivigo via por verki romanojn je tiom alta nivelo artisma?

Fatos: Tiun demandon faris al mi multaj personoj. Fakte mi ekstudis pri matematiko instigate de mia patro kaj ĉe nia generacio la ordono de la patro estis sankta. Mi studis parte en Ĉinio (1961-1964), parte en Albanio (1964-1967). Sed mia talento ekde infanaĝo, kiam mi verkis poeziajn malkaŝe, estis la beletro. Post kiam mi okupiĝis pri matematiko dum jardeko, inkluzive la studojn en universitato, mi rezignis je beletro, mi do pentis denove, ĉar la beletro al kiu mi inklinis, nomata “beletro de la homa doloro”, apenaŭ povintus estiĝi en la tiama Albanio. Kompreninte tion tre malfrue, mi ne povis reveni retroen. Tamen mi ankoraŭ konfesas, ke mi ne tro eraris, kiam mi rezignis je matematiko!

Kozeta: Kiom influis la vivo de instruisto en via verkado kaj kion vi apartigus kiel interesan pri viaj eksaj gelernantoj?

Fatos: Tio multe influis min. Ne nur ĉar en tia izoliteco en la profunda vilaĝo, kie oni enpostenigis min unuafoje post la finstudado (la vilaĝo Bene en la ĉirkaŭaĵo de Shmil de Elbasano) mi ekverkis miajn unuajn prozaĵojn, sed ankaŭ ĉar la medio de la vilaĝo okupis lokon en miaj rakontoj kaj noveloj, poste romanoj. Rilate al gelernantoj, la povruloj estis ege obeemaj, sed malfeliĉe plenaj je pedikoj. Estis ja vilaĝo de bonaj homoj, sed terure malriĉaj. Mi memoras, ke dum unu jaro de mia restado tie, mi pleniĝis je pedikoj, tri-kvar fojojn.

Kozeta: En viaj romanoj oni sentas, ke vi priskribis ankaŭ vian personan mondon, kiel konkretan?

Fatos: Sendube, en ĉiuj miaj libroj enestas elementoj de mia vivo. En la plejparto de ili la rakontado estiĝas en la unua persono kaj oni demandis min, ĉu ne temas pri autobiografiaj romanoj. Ni prenu kiel ekzemplon la romanon La Eburaj Drako. La ĉefa persono en ĝi, dum sia junaĝo, same kiel mi, estas studinta en Ĉinio. Krome, tie enestas multaj eventoj, diversaj personoj k. a. , entute detaloj, kiujn miaj konatoj konas bone kiel elementojn de mia biografio. Tamen, ne estas tiel. El ĉi tiu vidpunkto mi dirus, ke en kelkaj miaj romanoj ili estas kaj ne estas autobiografiaj elementoj, ĉar la beletro ne povas resti ĉe la fakto, ĉe la “historio”, ĝi iras pluen.

Kozeta: Oni diras, ke verkisto estas filo de Eroso. Kiom da loko okupas erotiko en via prozo?

Fatos: La legintoj de miaj libroj povas konstati klare, ke erotiko okupas sufiĉe multe da spaco en ili. Tio estas natura, erotiko estas ja parto de la vivo. En mia verkado, tio determiniĝas unue pro la imago mia pri beletro. Tion mi jam esprimis pere de la ĉefa persono en la romano La Hunda haŭto, ia alternativa ego mia. Por li, la beletro estas ino kaj la ino estas beletro. En lia imago, la beletro estas bela ino, post kiu li kuris tutan vivon, tamen ne atinginte kaj ekposedinte ŝin. Vidate per ĉi tiu okulo, erotiko en miaj libroj ne estas celo en si mem. Tio estas en kunteksto pli komplika de la vivo kaj en la konduto de personoj en certaj kondiĉoj. Kurte, mia beletro ne estas erotika beletro, pri kio mi apenaŭ havas ian antaŭjuĝon.

Kozeta: Inter la romanoj kun titolo signifoplena, nin impresis La Hunda Haŭto. Kial vi elektis tiun titolon?

Fatos: Tiu titolo aperis mem, entrudiĝis kiel esenco de la ĉefa persono, kiu la tutan tempon ironiigas sin. Mia forpasinta patrino- pri la malfeliĉaj edzinoj kun siaj edzoj plenaj je malvirtoj- kutimis uzi la esprimon: ŝi estas “foririnta kiel la butero en la hunda haŭto”. Laŭ mia patrino oni povas surmeti al peco de hunda haŭto kiom ajn da butero, tamen ĝi ne povas kuirigi. Alia ekspliko por tiu esprimo, kiu ŝajnas al mi pli ĝusta, estis tiu de iu paŝtisto konata de mi. Laŭ li, iam, en la laktejoj en la monto, la paŝtistoj “konservis” la buteron en ŝafida felo. Tie la butero konserviĝas, ne difektiĝas, dum en hunda haŭto, la butero apenaŭ povas konserviĝi, ĝi eĉ difektiĝas. El tio venas la esprimo por la virinoj perdiĝintaj ĉe la malvirtaj viroj, kiel ankaŭ la ĉefa persono de la libro por sia edzino, pentinta pro ŝia forpaso. Li sin nomas “hunda haŭto”, kaj tio estas la gvidmotivo de la tuta romano.

Kozeta: Ĉu vi sentas vin en krizo, kiam vi ekverkas?

Fatos: Mi trapasas “krizan” periodon ĉiam, post kiam mi estas verkinta romanon. Tio estas doloro, kiu jen longas, jen mallongas. Min kaptas angoro, ŝajnas al mi ke apenaŭ mi povas plu skribi. Poste, feliĉe, liberigite de la antaŭenirinta romano, pli precize, post kiam ĝi estas elirinte komplete el mi, alvenas nova romano. Mi eskapas el la “krizo”, el la doloro.

Kozeta: Kiom favora estas la beletra klimato en Albanio kaj kiuj estas la baroj?

Fatos: La beletra kliomato hodiaŭ en Albanio similas al la beletra klimato en kiu ajn alia libera lando, malfermita, normala, kun kontaktoj kaj nuntempaj evoluoj, en Eŭropo kaj pli vaste. Tio estas esenca por beletro, la libereco kaj la kontaktoj kun la mondo. Tio ne plu mankas al albanaj verkistoj. Mi mem delonge pasigas vivon iom izolan, pro mia aĝo

ankoraŭ pli multe. Laŭ mia scio, aparte la junaj aŭtoroj ne facile povas publikigi siajn verkojn kaj tial oni devas serĉi manierojn, por ke la talentulojn helpu. Sed tio ne tiom facilas, unue pro financaj kialoj.

Kozeta: En Francio oni estas tradukinte kelkajn el viaj verkoj. Kiom influis la pluraj artikoloj en la plej prestiĝaj ĵurnaloj de Francio por pli vasta konatiĝo de vi kiel verkisto?

Fatos: En Francio estas eldonita la plejparto de miaj romanoj, ĝis hodiaŭ 7 el ili kaj la oka, la romano “Bolero en la vilao de maljunuloj” estas jam tradukite. Mi memoras, ke kiam mi publikigis tie mian unuan romanon en la franca, La Perdinto, en la jaro 1997, la eĥo estis vere granda kaj eksterordinara por mi. La ĵurnalo Le Monde dediĉis al ĝi longan artikolon, tutan paĝon kaj unu grandan foton mian je titolo “La alia K-o” [Aludo al Ismail Kadare- noto mia- B. S.]. Dume mi troviĝis en Tirana kaj malfrue vespere Jusuf Vrioni telefonis al mi el Parizo kaj gratulis min. “Vi ja apenaŭ povas kompreni, kion signifas tio por vi”- diris li. Mi vere ne komprenis. Post tiu altapreca artikolo en Le Monde, oni tuj proponis al mi eldoni tiun libron en aliaj eldonejoj, en diversaj landoj de Eŭropo. Do, la rolo de la gazetaro estas ne anstataŭebla.

Kozeta: Dum viaj verkaĵoj estas tiom kvalitaj, kiom da tempo dediĉas Kongoli al sia familio?

Fatos: Tiu demando ege embarasigas min. Sciatas, ke verkistoj estas “malfacilaj”, ofte memamemaj, ktp. Mi ne estas escepto kaj povas bedaŭrinde konfesi ke mi ne ĉiam dediĉis la necesan atenton al mia familio. Tial, mi bone scias, ke mi tre malfacile sukcesintus verki tiujn librojn, se ne estintus la bonkomprenemo de mia edzino Lili, kiu oferdonis multon el sia memo, eĉ por la edukado de miaj gefiloj, ankaŭ hodiaŭ por kreo de kondiĉoj optimumaj por labori.

(intervjuo publikigita en la ĵurnalo “Illyria” en Nov-Jorko; esperantigis Bardhyl Selimi)



Fatos Kongoli (la tria de dekstre) kun la Esperanto tradukisto de Hunda Haŭto Tomasz Chmielik post la promocio de sia libro en Akademio de Sciencoj de Albanio, aprile 2012



Fatos Kongoli, Tomasz Chmielik, Bardhyl Selimi



Fatos Kongoli inter gekolegoj universitataj, la 26-an de majo, okaze de 45 -jariĝo de finstudoj.

Kondolencoj: Jacques Tuinder forpasis



- Karaj, je 18-an de junio forpasis nia komuna samideano Jacques Tuinder. Kiel vi certe konas lin, Jacques reprezentis modelon de humanisto, senlaca kaj sindonema esperantisto kaj bonfaranto. Li kontribuis notinde por ĉiuj blinduloj kaj malfortuloj en la landoj kie sia fondacio EVIDENTE estis malferminte filiojn, helpe al bezonantoj je okulvitroj, loĝado, nutrado, psikoterapiado ks. Tion li faris metodike, sistemece ĝis la lasta spiro.

Ne hazardas ke lia koro ĉesis funkcii nur kelkajn tagojn post la lasta misio en la varmega Tanzanio. Ni perdis samideanon, amikon, kamaradon kaj instruiston.



Kun Jacques en la blindulejo de Tirana, junio 2006

En Albanio Jacques estas komencinta helpi ekde la jaro 1996. Mi konatiĝis kun li unu jaron poste, okaze de vizito al la familio de unu el la albanaj Mandeloj, s-ro Osman Kazazi. Amiko Jacques estis vizitinta antaŭe ankaŭ nian elstaran esperantiston Zef Luigj Mjeda, loĝinta en la urbo de Shkoder. La geedzoj Zef kaj Anjeza spertis inter la unuaj la fratecan helpon de Jacques, kiu invitis ilin al Nederlando okaze de operacio farenda por elemini katarakton ĉe Anjeza.

Poste ankaŭ Osman Kazazi vojaĝus al Nederlando subtenate ĉiaspekte de Jacques kaj ties fondacio EVIDENTE.

Ekde tiam Jacques kun kolegoj entreprenis vastan esplorkampanjon kaj helpadon al kelkaj optikaj klinikoj en nia lando. Aparte ili kontribuis al la blindueljo de Tirana. Entute estas elspezitaj ĉirkaŭ 500 000 euroj, granda monsumo por la malgranda Albanio.



Dekoriĝo de Jacques en Albanio, junio 2006

Li instigis min gvidi Esperanto-kurson en la blindulejo, rezulte kelkdekoj da gelernatoj tie akiris la diplomon pri la elementa nivelo de Esperanto. Li eĉ sponsoris la trejniĝon de laborantoj de la blindulejo en Nederlando por eldoni librojn en Brajlo, ankaŭ la partoprenadon en internaciaj E-aranĝoj.

Nia asocio entreprenis en printempo 2006 kampanjon ĉe la landa prezidentejo por honorigi Jacques per Medalo de Dankemo, kio rezultiĝis sukcese. Tiel junio 2006 la ministro pri edukado Genc Pollo liveris persone al Jacques tiun altan medalon pro kio ĉi lasta estis ege feliĉa.



Ministro pri edukado de Albanio parolas pri dekoriĝo de Jacques, junio 2006

Mi havis densan kaj fruktodonan korespondon kaj kunlaboron kun Jacques, kiun mi konsideris kiel mian pliaĝan fraton.

Kvankam li jam forpasis, la spuroj de lia agado ĉi tie estas ankoraŭ fortaj kaj rimarkeblaj. La nove konstruita lernejo de la blindulejo nur unu jaron antaŭe estas plej viva signifoplena ekzemplo. Ankaŭ la busto de la jam forpasinta Osman Kazazi apud la centro de Tirana montras tion. Same la domo por la mortontoj en Barbullush nordokcidente, la okulistika fako de la ĉefa poliklino de ĉefurbo ka.



Kun amiko Jacques en la monteto apud Tirana, junio 2006

Bv akcepti ankaŭ miajn elkorajn kondolencojn al ĉiuj vi, kiujn mi despli aprezas kaj estimas pro karmemoro de amiko Jacques.

Via Bardhyl Selimi, Tirana Albanio

- Honorinda sinjorino Vera, honorindaj filoj de Jacques, tre karaj amikoj kaj gefamilianoj, ni ricevis tristece la maldolĉan novaĵon pri la forpaso de la patro, edzo, via kaj nia amiko. Inter tiuj kiuj travivis pli dolorige ĝin estas ankaŭ ni albanoj, aparte la kolektivo de la Tirana blindulejo, kiu krom la amego kaj eksterordinara prizorgado kion Jacques estas al ni dediĉinta ekde la jaro 1996, lia fondacio estas elspezinte ĉirkaŭ 500 miloj da USD laŭlonge. La lasta donaco estis la rekonstruiĝo de la lernejo kio estis inaŭgurita septembre 2010. Li estis planinta daŭrigi la investaĵojn ankaŭ ĉi jare por la infrastrukturo de la blindulejo kaj por aĉeti buseton por la gelernantoj. Grandan helpon li donis al ni ankaŭ pere de aliaj amikaj nederlandaj fondacioj kiel ekzemple estis la sukcesa organizado de la internacia regiona konferenco du taga pri tiflopedagogio, fine de 2010.



Karaj, permesu al mi konduki ankaŭ niajn sincerajn kondolencojn por la granda amiko de albanoj kiun prave nia prezidentejo estas honoriginta per la Medalo de Dankemo junio 2006.

Bardhyl Selimi

JACQUES TUINDER – LA BONFARANTO KAJ LA ESPERANTISTO

Kun Jacques Tuinder mi konatiĝis en 1999 j. dank’ al Ivan Tanev. Tiam tiu mondfama nederlanda esperantisto estis lia gasto. Por multaj el la legantoj de “Esperanta fajrero” estas sciatE, ke Jacques Tuinder estas honora membro de LIBE.

Kun sia edzino Vera, ankaŭ sindonema esperantistino, Jacques Tuinder antaŭ 14 jarojn fondis fondaĵon “Evidente”, kiu tuj komencis helpi al homoj kun diversaj handikapo, liverante al ILI helpilojn, precipe dua uzo. La konata al vi longjara aktiva esperantisto Danĉo Danĉev en

1998 j. laŭ peto de jam menciita Ivan Tanev skribas leteron al la geedzoj – esperantistoj, petante arde ilin liveri komputeron al tiu plovdiva samideano, restinta sen vidpovon kaj sen la ambaŭ siaj manoj dum sia soldata servo. Do, se mi devas esti tute preciza – nur kun unu ununura fingro de sia maldekstra mano. Kaj ankoraŭ en la somero de la sekvanta 1999 jaro Jacques alvenas en Plovdiv kune kun la tiama redaktoro de “Esperanta ligilo” Jean Verheule kaj alportas al Ivan komputeron dua uzo. La feliĉa Ivan komencas uzi la donacon por skribado kaj legado de libroj, kvankam ke li jam estas tre for de la lerneja aĝo - tute baldaŭ li plenumis 63 jarojn. Por liaj nekredeblaj komputeraĵoj egajn meritojn havas la instruistino pri komputilaj povoj en Nacia blindulrekapabla centro Stefka Stojĉeva, ankaŭ fidela adepto de Esperanto.

Antaŭ tiu fondaĵo Ivan Tanev, Danco Danĉev kaj mi rekomendis por ricevado de komputeroj Rosica Taneva kaj Veliĉka Guŝeva. Nature, post Ivan Tanev komputeron ricevis ankaŭ Danĉo Danĉev. Sed la unua bulgaro, ricevinta helpon de” familio Tuinder fariĝas esperantisto – veterano Ivan Ŝiŝkov el urbo Gabrovo, kiu kuracas siajn okulojn en Nedelando dum la fora 1991 jaro. Kun li Jacques faras volonte kontakton kaj proponas al li sian helpon pri la kolektado de mono por la pagado de la multkosta kuraco de nia samlandano. Post jaroj la familioj de Jacques Tuinder kaj Ivan Ŝiŝkov amikiĝas, kaj kiam Jacques vizitas Bulgarion, sola aŭ kun sia edzino Vera, li ĉiam trovas tempon por renkonti sian bonan amikon kaj samideanon. S-ro Ŝiŝkov ŝajne estas la unua bulgaro, kiu ricevas de vera la malgajan informon pri la surpriza morto de la nelagiĝebla bonfaranto.

Seriozan helpon ricevis de fondaĵo “Evidente” la Asocio de nevidantaj esperantistoj en Bulgario, la Unio de la blinduloj en Bulgario, Nacia asocio de surdblinduloj en Bulgario kaj la Nacia blindulrekapabligcentro. Tiuj bulgaraj organizaĵoj ricevas de niaj nederlandaj amikoj monon, fermatajn televidojn, komputerojn kaj aliajn blindulhelpilojn. Dank’ al la forta rekomendo de fondaĵo “Evidente” la Nacia blindulrekapabligcentro ricevis de nederlanda fondaĵo “Sovaĝaj anseroj” 25 mil eŭrojn, kiujn la dotita institucio uzis por fundamenta riparo de ĉiuj banejoj de ĝia internato. La esperantista fondaĵo liveris al Nacia asocio de bulgaraj surdblinduloj fermatajn televidojn, komputerojn, brajla printilon, 32 aŭdpovajn aparatojn kaj abundan kvanton da okulvitroj. La fermataj televidoj kaj aŭdpovaj aparatoj eĉ kaj nun estas uzataj senprobleme.

La fondaĵo de la ambaŭ esperantistoj realigis bonfarajn projektojn sur tri kontinentoj en Albanio, Bulgario, Rumanio, Malta, Moldavio, Taĝikio, Ŝirilanko, Eritreo, Kongo, Tanzanio, Kenio k. a. Miloj da handikapitoj ricevis rektan kaj nerektan subtenon de altnobla agado de la institucio, fondita kaj gvidata de la bonkoraj verdostelaj nederlandanoj.

Jen ĝuste nur antaŭ unu jaro nevidantaj bulgaraj esperantistoj Marinka Spasova kaj Vladimir Ĵelev ankaŭ ricevis financan helpon de la sama fondaĵo, dank’ al kiu ili havis eblecon partopreni je la pasintjara LIBE-kongreso. Eĉ mi mem ricevadis de fondaĵo “Evidente” centoj da sonkasedoj, kiujn mi uzadis je eldonado de la parolanta revuo “Literatura revuo”. Same por tiu revuo Jacques kaj Vera liveris al mi dekojn da plastaj kovertoj por multfoja uzado, per kiuj nia skipo dissendadis la revuon al ĝiaj legantoj kaj disvastigantoj.

Jacques Tuinder estas naskita je la 10-an de januaro 1933 jaro en Hago. Li estas la dua el la dek infanoj de siaj gepatroj. Post sia lerneja edukado, multajn jarojn li estis sociala laboristo en sia loĝurbo Heemskerk, kio ŝajne ankaŭ influas lian inklinecon al bonfarado, al lia preteco helpi handikapulojn. Sendube grava faktoro eble estas same lia pieco.

Deksesjara Jacques komencas lerni kaj uzi esperanton. La akuŝistino de lia patrino esperantistigas lin, montrante al li libreton kun titolo “Esperanto”. La nederlanda samideano renkontas sian geedzan duonon Vera, ankaŭ esperantistino, en Varsovio, kie okazas internacia esperantista forumo. Jacques estis tre fervora esperantisto kaj ĉiam insistis, ke oni uzu prioritare esperanton en la renkontoj kaj en la korespondado. Multaj nevidantaj geesperantistoj el Europo, Azio kaj Afriko komunikadas kun li per brajlo aŭ per elektronikaj mesaĝoj. Ĉirkaŭ dekkvin gebulgaroj ankaŭ korespondadas kun esperanta familio Tuinder letere aŭ telephone. Samideanoj Tuinder neniam forgesadis saluti nin okaze de la nasko de Jezuo Kristo kaj la Novjaro, sendante siajn salutkartojn ordinare 10-15 tagoj pli frue ol niaj.

La malavara bonfaranto kaj nia fidela amiko Jacques forlasis tiun pecan mondon je la 18 de junio en Heemskerk ŝajne tute subite, nur post kelkaj tagoj kiam li revenis el Afriko, kie li havis laborviziton. Ni, liaj bulgaraj samideanoj kaj amikoj, ankaŭ la dotitoj de fondaĵo “Evidente”, ege tristas pro lia surpriza kaj frua forpaso. Estu tro hela la memoro pri Jacques Tuinder!

Angel Sotirov

JACQUES TUINDER 10 jan. 1933 – 18 jun. 2011-06-20

Neanstataŭebla (laŭ mia najbaro)

Jacobus Antonius Tuinder naskiĝis antaŭ 78 jaroj en Hago. Profesie li fariĝis “sociala laboranto”, praktike akompananto de socimarĝenuloj (en prizono, poste en psikiatriejo) . Sian edzinon li renkontis en la jubilea Universala Kongreso en Varsovio, 1959. Naskiĝis tri filoj, Flip, Jef kaj Bart. Ĉi lasta ne eltenis la vivon, kio afliktis la gepatrojn. Unu el la nepoj ricevis lian nomon. Evidente pro respekto.

En la movado li konatiĝis ĉefe inter kristanoj kaj pro sia empatia laboregado por vidhandikapitoj. Humanan helpon li donis ekz. al la blinda Nora Reinders-Bartels, kiu post la perdo de sia sola filo restis sencela. Kune kun Paul van den Berg, la prezidanto de Nosobe, li persvadis ŝin instrui ilin pri Esperanto. Tio jam savis unu vivon. Pli simple: vizitanto ofte trovis lin sindediĉe enpakanta brajlan paperon, kaŝdonacojn, eĉ tutajn aparatojn por la plej senhavaj samideanoj, interalie en Albanio, Rumanio, (eks) Sovetio. Kaj neniam li eĉ pensis pri la eblo malakcepti gaston. Lia varma voĉo invitis – malgraŭ la laboro multhora - “Bonvolu enveni!”

Preskaŭ 45 jarojn, ekde novembro 1966 Jacques Tuinder provis mildigi la sorton de vidhandikapitoj vivantaj en la plej mizeraj cirkonstancoj. Komence lin alarmis informo, ke milionoj da afrikanoj, t. e. tri el kvar blinduloj, suferas nenecese, interalie pro la rivermalsano kaŭzata de ĉeĉeoj. Ĉar Zamenhof po unu tago semajne sin dediĉis al nepagipovaj vidhandikapuloj, Jacques varbis precipe inter “nia diligenta kolegaro”:

“Esperantistoj, esperigu esperantojn!” (agado E3) . Konservigis la triobla E en la ĝisnuna fondaĵo “Evidente”/“Zienderogen”, sed lastatempe restis nur 23 sponsoroj inter la samideanoj (ne mankas bonaj celoj en la movado) . Jam delonge necesis kunlabori kun aliaj instancoj: De komence Prof. Weve-fondaĵo, poste Memiso, “Sovaĝaj anseroj”, krome apogadis la Heemskerck-aj recikliga butiko (en kiu li volontulis kaj el kiu li alportadis kasedojn por la kaseda servo de Nosobe) , komunumo kaj “Kritika Komuno IJmond” (KGIJ, en kiu li aktivadis) .

Komence rezultis du veturantaj okulklinikoj (“Zamenhof” kaj “Esperanto”) en Kenjo kaj Malavio, plus okulhospitalo en Kameruno. Aldoniĝis kampanjoj en Azio: A-vitamin-projekto por vjetnamaj infanoj, blindullernejo en Srilanko, li mem aliris Duŝanbe, la ĉefurbon de Taĝikio, kie blinda samideanino lin kontaktigis kun la malriĉega blindulejo. Ĝenerale Jacques estis invitata de la instancoj pere de lokaj esperantistoj, oftakaze mem blindaj. Kaj tion li substrekis en siaj raportoj al “sponsoroj” kaj lokaj gazetoj. Li ankaŭ artikolis en Esperantaj revuoj: siatempe li eĉ prezidis IKUE (1966-71, dum Stefan Maul redaktis ĝian “Espero Katolika”. La instancoj ne eltenis ilian praekumenismon kaj maldekstremon. Poste li prezidis KELI (protestant-kristanan: 2000-2004) . Rekono venis nur poste: Honora Membreco de LIBE, danke por lia sponsorado de kongresanoj (kiom tiuj lin dankis!) ; Esperanto Nederland aljuĝis la Verloren-van-Themaat-premion en 2007, kaj ankaŭ al ŝia reĝina moŝto plaĉis lin honori per kavalerigo en la Ordeno de Oranje Nassau.

En Eŭropo ne malpli mizeras vidhandikapitoj en Albanio, Moldavio, Rumanio, Ukrainio kaj Rusio. Por ne konkurenci kontraŭ lokaj optikistoj, li ĉie okupiĝis ekskluzive pri la plej malriĉaj vidhandikapitaj, interalie en prizonoj (Rusio) : en Rumanio inter ciganoj vivantaj sur rubmontoj, el kiuj ili serĉas ankoraŭ utiligeblajn materialojn. Sed ankaŭ blindullernejojn li provizis per la plej esencaj materialoj (brajla presilo, papero, brajlomaŝinoj ktp.)

Pensiite, Jacques plu deĵoris en la monaĥejo de Bergen (N. -H) , kie li antaŭe helpis rifuĝintojn fari kandelojn. Poste kiel unu/dutaga pedelo li trovis tempon por ampleksa brajla korespondado. En la Nosobe-semajnfinoj la partoprenantoj de lia dimanĉmatena meditado ricevis eĉ la tutan tekston bele brajlita, por povi viclegi mozaikoj. Helpadis tie, samkiel hejme, ankaŭ lia edzino Vera. Kvankam li mem pagis ĉiujn kostojn, li komencis pli vojaĝi, eĉ al Afriko. Rezultis “adoptado” (regula subtenado) de pluraj vidhandikapitaj infanoj: 11 en Kongo, po 2 en Maroko kaj Rumanio, 3 en Maŭritanio, “kaj multaj ankoraŭ atendas”, li skribis en unu el siaj lastaj raportoj kun evidenta bedaŭro ke ne eblas forigi la tiean mizeron.

Legantoj de “Dia regno” riĉiĝis per pliaj liaj artikoloj, en “Monato li lastfoje pledis por Amnestio Internacia kaj sia “Evidente”; ankaŭ niajn klubojn li vizitis: antaŭ nelonge la Harleman. Post kiam Joke Hoobroeckx revigligis la klubeton en Heemskerck, Jacques ŝoforis du membrojn tien reen. Siatempe ĝin animis la instruisto Ton Verwoerd, kiu kasistis en “Evidente” sed kiun, post lia transloĝiĝo al “Heemswijk”, regule plu vizitis Jacques, respektive al liaj meritoj.

Jacques jam antaŭ jardekoj signalis, ke iu transprenu lian agadon, ĉar li sopiris havi pli da tempo por legi. Neniu pretis. Ĉi-jare li – eble ankaŭ pro grava malsano pasintjara (post kiu li tamen plu vizitis Kongon!) – lasis la organizadon al siaj same entuziasmaj optikistoj. Sola bedaŭro:

ili regas nek brajlon nek Esperanton. Do fone Jacques restis okupita. Nun li laca revenis el Tanzanio, kaj lia koro ĉesis bati en la vendreda nokto, la 18-an de junio. Tre ĉagrene li ne longe povis ĝui la pli ol merititan “duan pension por legi plu”.

La funebra karto alvokis rezigni pri floroj kaj kontribui al ... Evidente! (ĝirkonto 10 20 100, nome de Stichting Zienderogen, Heemskerk.)

La funebran diservon kaj la kremacian solenon ĉeestis po 250 aŭ pli. Parolis reprezentanto de “Evidente”, S-ino Hoobroeckx (ankaŭ por KGIJ) , psikologo-kolegino de Jacques, kaj nome de Esperanto Nederland la prezidanto Gerrit Berveling. Unu el la filoj rakontis, ke la infanoj antaŭdorme avidis liajn rakontojn, sed devis helpi malglui poŝmarkojn kaj cedi ion el sia malmulta poŝmono. Kaj kompreneble ili lernis Esperanton. La patro ĉiam pretis aŭskulti siajn infanojn. Sed ankaŭ reprezentanto de Nosobe persone ĉe la ĉerko kun emocio dankis la forpasinton pro la pacienca aŭskultado kaj konsilado. Nosobe mem donacis mil eŭrojn al “Evidente” kaj Vera Tuinder diris al mi ke ŝin surprizis la monokolekta rezulto. Tre religie motivitan “humaniston”, kiel li nomis sin mem, ni perdis. Sed ne el la memoro.

Rob Moerbeek.

Biografio

Jacques Tuinder

Jacques TUINDER (laŭ plena nomo **Jacobus Antonius TUINDER**) naskiĝis la [10-an de januaro 1933](#) en [Hago](#), [Nederlando](#) kaj estas iama prezidanto de la [kristanaj Esperanto-asocioj IKUE](#) kaj [KELI](#). Li mortis la [18-an de junio 2011](#).

Li eklernis Esperanton aŭtodidakte en [1951](#) kaj redaktis de [1959](#) ĝis [1960](#) la gazeton *Birdo* de la junulargrupo de IKUE. De [1966](#) ĝis [1971](#) li estis prezidanto de [Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista](#) (IKUE) . Li ĉiam fervore engaĝiĝis por [ekumenismo](#) kaj entuziasme organizis (kune kun [Stefan Maul](#), la tiama redaktoro de [Espero Katolika](#), kaj [Adolf Burkhardt](#), la tiama prezidanto de KELI) , la unuan [Ekumenan Esperanto-Kongreson](#) en [1968](#) en [Limburg](#) ([Germanio](#)) . Kiel progresema katoliko, kiu ĉiam sentis sin unuavice kristano kaj ne ano de iu specifa [konfesio](#), li pretis transpreni la prezidantecon de la ĉefe [protestanta](#) asocio [Kristana Esperantista Ligo Internacia](#) (KELI) de [2000](#) ĝis [2004](#).



Laŭ profesio, li estis sociala helpisto. Li multe okupiĝis pri bonfaraj agadoj kaj klopodis ligi tian agadon kun Esperanto kiel iniciatinto de projekto kontraŭ nenecesa vidhandikapo. Ĉi tiu projekto komenciĝis en [1966](#) sub la nomo *Agado E3 - Esperantistoj esperigas Esperantojn*, kaj li daŭrigis ĝin sub la nomo *E-vid-ente* ĝis sia morto.

























- **Albanoj ŝokitaj**

La senprecedencaj krimigoj en Norvegio en la lasta semajno de julio ŝokis ankaŭ albanojn, interalie ankaŭ pro tio, ke la 1500-paĝa manifesto de la krimulo mencias kelkdekojn da fojoj ankaŭ albanojn. Li defendas serbojn ekde la printempo 1999, kiam NATO komencis siajn bombardojn por devigi la faŝistan reĝimon de Miloŝević ĉesigi la amasan deportadon kaj genocidon de miliono da etnaj albanoj en Kosovo. Li subtenas grekojn, kiuj deportadis 25 000 etnajn islamajn albanojn el la regiono de Ĉamerio. junio 1944. Li malamas albanojn loĝantajn en siaj propraj teroj en Albanio, Kosovo, Makedonio, pro la fakto ke la plimulto el ili estas islamaj. Sed li ne akceptas la fakton, ke albanoj estas popolo ne fanatikema, ke ili amas kaj subtenas la aliĝon al EU eĉ pli ol mem norvegoj. **(B. S)**

(Ĉerpita el Monato)

Muslimoj kiel hebreoj

Teruraj novaĵoj alvenis je 22-an de julio el Oslo (Norvegio) . Krimulo 32 jara masakris kelkdekojn da gejunuloj, precipe muslimoj kiuj aliĝis al somerumada tendaro sponsorizite de registaro. Inter ili estis ankaŭ unu albana knabino 17 jara, Lejla Selaci, kiu posedis la norvegan ŝtatanecon. Ŝxan korpo la polico sukcesis trovi nur post semajno en la akvoj de la insuleto.



Breivik, la krimulo, estis ordinara homo, ne frenezulo, sed konsciiĝinta ekstremisto fundamentisto kristana. Pli bone diri ne vera kristanulo, ĉar kristanismo naskiĝis kiel ideologio de paco kaj predikas ĉiam pacon kaj toleremon. Li deklaras sin kontraŭ marksismo same kiel Hitler siatempe estis kontraŭ bolŝevismo, kiu siaflanke estis same terorisma ideologio.

Breivik apartenas al miloj tiuj homoj organizitaj aŭ ne organizitaj kiuj hodiaŭ kontraŭstarigas la kunvivadon kun muslimaj landoj en Eŭropo (Turkio, Albanio, Kosovo, Bosnio, parte Makedonio) kiuj aspiras aliĝi al EU.

Nenio malbona okazis al la ceteraj landoj de malnova kontinento far tiuj “muslimaj” landoj, krom notinda ekonomia kontribuado per gastlaborista laboro. Tamen Breivik malamas ilin kaj ties anojn. En sia manifesto 1500 paĝa publikigite sur intereto li mencias 143 fojojn Kosovon, 341 fojojn Serbion, 343 fojojn Bosnion, 208 fojojn Albanion. Neniam li mencias Srebrenicon, la amasan tombejon de pli ol 8 mil homoj muslimaj, mortigitaj kruise de la serbaj novaj faŝistoj.

Li laŭdas la nacian heroon de albanoj, Gjergj Kastrioti Skanderbeg pro fakto ke li gvidis kvaronjarcentan rezistadon kontraŭ la otomanoj (1443-1468) , sed li ne diras ke albanoj same estus kontraŭstariginte ĉiujn fremdajn invadintojn, inkluzive de kristanoj.

Li humiligas la hodiaŭjn albanojn kiel antieŭropanojn, sed ne diras ke ĝuste albanoj estas la plej fortaj subtenantoj de la ideo de EU-aliĝo, eĉ pli ol norvegoj mem.

Li laŭdas serbojn kiuj depordadis unu milionon da albanoj el siaj propraj teroj en Kosovo dum la jaroj 1998-1999 kaj grekojn kiuj depordadis 25 000 albanajn muslimojn de Ĉamerio (norda Grekio) junio 1944.

Nun estas tute klare al kiu servas Breivik. Certe li ne povas reprezenti la norvegan pacaman popolon, sed nur etan ties procenton kaj ĉiujn aliajn fanatikulojn politikajn en Eŭropo.

La norvegaj aŭtoritatoj respondecas ankaŭ pri tiu tragedio granda kaj devas reflekti rapide. Ŝajnas ke oni faras la kontraŭon, tagon post tago oni klopodas plimildigi la bildon tragediecan, raportante far polico ke ne estis 92 mortintoj sed malpli, 60 aŭ morgaŭ diros des malpli, kaj simile. Oni devas kondamni senkompate la krimulon Breivik kiel lia patro mem jam deklaris kaj malkovri ĉiujn liajn kunlaborantojn, aresti ilin kaj kondamni same. Nur tiel la norvega ŝtato kaj popolo povas savi sian bonan imagon ĝisnun!

La senprecedenta krimego en Oslo je la lasta semajno de julio ŝokigis ankaŭ albanojn. Des pli, ili sciiĝis pri la 1500 paĝa manifesto de la krimulo 32 jara Breivik, aperinta sur reto kie li mencias kelkdekojn da fojoj ankaŭ albanojn.

Li defendas serbojn ekde la printempo 1999 kiam NATO komencis siajn bombardojn por devigi la faŝistan reĝimon de Miloŝeviĉ ĉesigi la amasan depordadon, raprezaliojn kaj genocidon de miliono da etnaj albanoj en Kosovo. Li subtenas grekojn kiuj deportadis 25 000 etnajn muslimajn albanojn el regiono de Ĉameria junio 1944. Li malamas albanojn loĝantaj en siaj propraj teroj en Albanio, Kosovo, Makedonio ka pro fakto ke la plimulto el ili estas muslimoj. Li laŭdas kiel “atleto de Kristanismo” nian nacian heroon-Gjergj Kastrioti-Skanderbeg pro fakto ke li gvidis rezistadon kontraŭ otomanoj dum kvaronjarcento (1443-1468) . Sed li ne akceptas la fakton ke albanoj estas popolo ne fanatikema, ke ili amas kaj subtenas la aliĝon al EU pli multe ol mem norvegoj, ke Skanderbeg volonte kaj senhezite militus por defendi sian landon ankaŭ kontraŭ kiu ajn alia popolo agresema, ne nur otomana, ke pasis jam la tempo kiam nazioj kaj komunistoj povus ataki kaj sklavigi la ceterajn popolojn. Kiel prave skribis al mi amiko el Norvegio, Jardar Eggesbø Abrahamsen,

“La atakinto estas **viro** kiu tro kredas je mitoj, kaj decidis propramane “solvi la aferon”. Dum naŭ jaroj li zorge planis sian atakon. Li bedaurinde ne estas frenezulo. Li ŝajnas esti tute ordinara viro kun kriplitaj ideoj. Li pli ol iu ajn alia norvego dum la postmilita periodo ilustris ke antaŭjuĝoj estas malsano”.

Bardhyl Selimi

Pri la nacieco de la albanoj (Fatbardha Demi)

Ĉu ankaŭ albanoj formis sian naciecon komence de la 20-a jarcento?⁸⁰ Ĉu la nacieco egalvaloras al la ŝtateco?

Oni diras ke la nacioj en Eŭropo konstruiĝis komence de la 18-a jarcento, kiam la ŝtatoj ekhavis naciojn kaj ties simbolojn. Simile estas okazinta ankaŭ ĉe albanoj.

Unue, ni devas distingi inter la nacio kaj la ŝtato:

- Ŝtateco estas administra komunumo, dum la nacieco ne.
- En la ŝtatoj povas ŝanĝiĝi la simboloj, la lingvo, la kulturo heredita. Ĉe la nacio, se tio okazus, ĝi ne plu ekzistus, sed aliiĝus.
- La ŝtato fondiĝas dum tempolimo tre kurta, dum la nacio bezonas periodon kelcentjaran.
- La ŝtato ne ampleksas geografie kiel la nacio, ĝi posedas terajn landlimojn. La nacio apenaŭ povas difiniĝi per administraj limoj kaj ties anoj atestas sian ekziston ankaŭ ekster ties ŝtato (kiel nacia malplimulto).
- La ŝtato ne bezonas la kondiĉojn kiuj difinas la naciecon kiel estas: komunaj antaŭenintoj, la lingvo kreita historie far la popolo, la tradicio kondukita dum jarcentoj, la simboloj de la antaŭenintoj, ktp.
- Historie, sed ankaŭ nuntempe (Vatikano, San Marino, Monako ka) estas havinte ŝtatojn-urbojn. Por la nacieco tio maleblas.

Sekve, en la dokumentoj uzataj de la diversaj ŝtatoj, oni notas nur la ŝtatecon kaj ne la naciecon, ĉar ĉi tiuj du nocioj ne kongruas, krom en tre esceptaj kazoj, pro la historiaj eventoj, kiel okazis ĉe albanoj. La formiĝo de la albana nacio, ne rilatas al la formiĝo de la ties ŝtato en la jaro 1912, kaj ne samas al la trairita vojo de “konstruiĝo de nacioj” de la eŭropaj landoj dum la 18-a jarcento.

En la albana lingvo, por difini “kiu estas ni” respondecas la termino “Nacieco” (termino de modernaj tempoj) kiu subkomprenas niajn komunajn antaŭenintojn aŭ “de la sama sango”, “de la sama gento”, “de la sama trunko”, “de la sama ĝenro”, “de la sama semo”, je unu lingvo, samaj moroj kaj kutimoj, sama kulturo, samaj simboloj, komuna historio kaj komunaj klopodoj dum la jarcentoj. Kaj laŭ la donitaĵoj de la nuntempaj sciencoj: je komunaj antropologiaj ecoj kaj simila strukturo de la sango.

Tia ampleksa difino de la “nacieco” de albanoj baziĝas sur ilia historio kaj deveno de pelzago-iliroj, pri kiuj ankoraŭ la sciencistoj ne tro atentis.

En la 18-a jarcento oni klopodis prikonsideri nur la religiecon por difini la naciecon (far Pjetro la Granda en la jaro 1711 kaj la Ordodoksa Eklezio) aŭ la grekan lingvon, post kiam fondiĝis la helena ŝtato (1830). Sed tio koncernis nur la ŝtatajn strebojn por aliigi la naciecon de la loĝantaro aŭ por krei “artefaritajn” naciojn kiuj ne estas historiaj produktaĵoj.

⁸⁰ La nuntempa sendependa ŝtato proklamiĝis la 28-an de novembro 1912)

Tiel, ekzemple, oni inventis la nacion de makedonoj aŭ tiun de bulgaroj: “Estas elspezite multe da mono, nur por igi bulgarojn. Sed ĉi monsumoj, estus bezonataj je tioma facileco ankaŭ por igi ilin serboj. Unuavice ili ne havis patrion, ĉar kunvivi en komuna patrio estas unu el la karakterizaĵoj de la nacieco.

Pashko Vasa, aktiva partoprenanto de la eventoj en Balkanio dum la 19-a jarcento atestas ke “Ĉiuj rasoj kaj popoloj, ne albanaj, apenaŭ rekonis la senton de la devo, la senton de la defendo de la komuna patrio”. (paĝo 44 V. P)

La religio neniam komprenitis de albanoj kiel difina elemento de la aparteneco, ĉar ekde pratempo okazis militoj, inter la pelazgaj gentoj aŭ inter ili kaj fremdaj gentoj pro diversaj dioj aŭ ŝanĝiĝitaj dioj, al kiuj ili sin dediĉis. La tuta historio de la homa socio estas atestinta tiun ĉi fenomenon, tial la arbroj, kvankam ili kredis je Dio, ne konsideris tion kiel firman elementon por sin reprezentigi.

Tia sinteno al la religio evidentiĝas ankaŭ en la sciencaj esploraĵoj. “estas aparta kazo ke la popolkantoj de albanoj apenaŭ enhavas motivon koncernanta la religion”. (paĝo 278, V. S) .

La koncepto de la nacio ne estas aĉaĵo de la 18-a jarcento, ĝi devenas el la pratempo, sed je la termino “Gento” aŭ “Semo”. Herodoto, Plutarko kaj Straboni estas atestintaj ke la pratempaj makedonoj estis je sama semo (nacieco) al la Epiranoj⁸¹ pro la lingvo, moroj, kredo, eĉ pro la vesto kaj harartondo. Ankaŭ romianoj bone konis la ĝenran apartenecon de la popoloj. “Cezaro alvokis al la naciaj sentoj (al Galoj, samtrunka gento pelazga al romianoj- mia noto F. D) . certigante tiamaniere ankaŭ la subtenon de druidoj, kiuj donis al la milito plian religian apogon” (paĝo 220 I. M.)

Do, samkiel la koncepto de “nacieco” ankaŭ tiu de “ŝtateco” ne apartenas la la 18-a jarcento. Ambaŭ ili devenas el pratempo kaj estas kompletigitaj aŭ adaptitaj al la historiaj kondiĉoj de ilia vojo jarcenta ĝis nuntempe.

En la 3-a jarcento antaŭ Kristo, post pluraj militoj por teritoria ekposedado kaj politika kaj militista gvidado, estis plifirmiĝinta la ŝtatpotenco de Romo, je formo de sklaveca respubliko de la aristokratio. En la romia ŝtato, samkiel tio okazas hodiaŭ en multaj diversaj ŝtatoj, vivis plurnacia loĝantaro: $\frac{3}{4}$ estis liberigitaj sklavo, ne latinaj” (paĝo 255 I. M) .

Sed longe antaŭ ĝi en la Pelazga Duoninsulo (Balkanio) , ekde la 8-a jarcento antaŭ Kristo, ekzistis la ŝtato de Sparto je formo de aristokrata respubliko, gvidata de la Konsilio de Maljunuloj kaj la reĝo kiu kunfrontiĝis al urbo-ŝtatoj siatempe kiel Argos, Ateno kaj Korinto. Ĉi tiuj ŝtatoj (kvankam konstruitaj surbaze de sklaveca socio) fariĝis modeloj por la demokratio de la gvidanta ŝtatpotenco, por la idealistoj de la 18-a jarcento kaj de la pli postaj jarcentoj.

⁸¹ Epiro vasta regiono en Suda Albanio kaj en Norda Grekiuo, la patrio de la fama Pirro-generalo

Tiutempe, ne ĉiuj loĝantoj akiris la ŝtatecon, kiel okazis en la 18-a jarcento, sed nur la plej privilegiita parto de la loĝantaro. Do, ankaŭ la termino “civitaneco-ŝtateco” estas tiom praa kiom tiu de la “ŝtato”

En la 18-a jarcento, oni donis pli ampleksan sencon al la koncepto de “ŝtato”, ĉar oni konsciis pri la bezono de grupiĝo, ne nur laŭadministra sed ankaŭ laŭspirita de la loĝantoj, diversaj pro la lingvo, heredita popola kulturo kaj historio. La celo estis pliigi ilian sindediĉecon al la iniciatoj de la reĝo reprezentanta la ŝtaton, je ekonomia, politika kaj militista naturoj. Tiu movado iniciita desupre (intelektularo kune kun riĉaj socitavoloj) komence kontraŭstaris la globalisman francan kaj greko-roman kulturon, kaj ĝenerale tiun de la fremdaj regantaj klasoj en certaj landoj.

Por realigi la taskon de la spirita ampleksiĝo (por krei la Nacion) , estis bezonata la fiero pro antaŭenintoj, la inspiro de la “herooj” de pratempo, nekonataj ĝis tiam de la popolo. La ĵusfonditaj akademioj kaj reprezentantoj de la riĉaj kaj intelektulaj socitavoloj, ekkonkuris kiu atestus la unua pri la praeco de sia ŝtato. Tiel inaŭguriĝis la Kelta Franca Akademio (30. 03. 1805) strebanta “reformi la nacian praekon kaj serĉi la keltan lingvon” “La tuta procezo de formiĝado de la identeco, konsistis en la difinado de la riĉeco de ĉiu nacio kaj ne la diskonatiĝado de ties kulto. La unua etapo de ĉi tiu procezo ne estis facila: la serĉado pri la ebleco de trovado de la komunaj antaŭenintoj hipotetikaj por Overnaroj kaj Normanoj (por Suaboj kaj por Saksoj, por Sicilianoj kaj Piometanoj) .

Por ĉeestigi la mondon de la nacioj ne sufiĉis la inventarizado de iliaj heredaĵoj, pli facile estus ke oni inventu ĝin. Kiel do? Granda eksperimentada laborejo malfermiĝis en Eŭropo de la 18-a jarcento kiu konis sian plej altan produktivecon dum la sekvanta jarcento (19-a) (Paĝo 11A. M. Th.)

La unuaj estis la skotoj. “Al (James) Macpherson oni komisiis fariĝi rapsodo t. e. ekkudru kune la popolajn kantojn kolektitajn, plenigi la vakuon kaj en la jaro 1761 aperis la eldonaĵo “Fingal”, pratempa epika poemo en 6 volumoj verkita de Ossian, filo de Fingal tradukite el la gala lingvo far James Macpherson”. Liaj epopeoj havis multajn kontraŭantojn, “ili, danke al filologiaj argumentoj, opiniis ke Macpherson apenaŭ sukcesis eltrovi la epopeon el la 3-a jarcento en sia imago. Macphersoni devus inventi kelkajn praaĵajn bardajn manuskriptojn. Li promesis publikigi ilin, sed ĝis lia morto (1797) tion li ne faris. ” (paĝo26-29 A. M. Th.)

Tiuperiode estis laŭmode ke la poetoj kaj romanistoj “sin konfesi” antaŭ la legantoj, ke ilia verko baziĝis sur dokumentoj de la pasintaj jarcentoj, kiujn ili “hazarde” estis malkovrintaj. Kvankam ĉi tiun “konfeson” oni povus pardoni al la verkistoj, certe estis ne pardonebla ke tio estu uzata kiel historia fakto, tial tion oni kondamnis aparte deflanke de tiutempaj lingvistoj.

“En la jaro 1795, grafo Puŝkin (konfesis en la enkonduko de sia libro- mia noto F. D.) ke li estas malkovrinte manuskripton de anonima aŭtoro, enhavanta epopeon koncerne la militon de rusoj en la 12-a jarcento kontraŭ nomada popolo de Polovcoj. La libro eldoniĝis en la jaro 1800 sub la titolo “La kanzono de la trupo de Igorj” kaj estas taksita kiel egalvalora kaj samkvalita al la epopeo de Ossian (de Macpperson- mia noto, F. D.) kaj oni uzis ĝin kiel pruvajon ke ankaŭ slavo posedas sian Homeron. “La kanzono de la trupo de Igorj” eniris la rusan

heredaĵon, kiel kultura monumento kaj aparte kiel historia dokumento, ĝuste tiam kiam kelkaj lingvistoj ripetade asertis ke temas ja pri teksto el la 18-a jarcento” (paĝo 53, 54 A. M. Th.) .

La produkto de la epopeo kelta franca, baziĝas same sur netrovebla manuskripto. Tiu ĉi metodo, fariĝis infekta malsano en multaj eŭropaj landoj. Tiel Václav Hanka, poeto el Bohemio (1817) post kiam sciigas ke li estas trovinta kelkajn manuskriptojn el la 13-a jarcento, kiujn oni neniam vidis, publikigas kolekcion de lirikaj kantoj “Kralové Dvur”. “Ili portas la pruvajon ke la ĉeĥa nacio povas fieri pro sia praeco tiom mirinda kio tiu de angloj aŭ germanoj” (paĝo 129, 130 A. M. Th)

La inventisto de la manuskriptoj, Václav Hanka, sanktiĝas kiel nacia heroo. Por ke oni igu ilin egalaj al la homeraj epopeoj “Iliado” kaj “Odiseo”, la epopeoj el la 18-a-19-a jarcentoj strebis esti des pli longaj kaj praviĝu kiel naciaj simboloj.

La 28-a de februaro 1863, tago de la apero de la unua eldonaĵo de la “Kalevala”, je 20 000 versoj, fariĝus la nacia festo de Finnlando kaj en la jaro 1857 aperis la estona epopeo “Kalevipoeg” je 19 000 versoj.

En ĉi tiuj klopodoj, al grekoj kiuj eniris la konkuron iom malfrue, ne bezonis “malkovri hazarde” iun dokumenton, ĉar ene de la lando ekzistis sufiĉe multe da materialo de la buŝa verkado. Sed “en la jaro 1830 la aŭstra historiisto Jakob Philipp Fallmerayer konfesas ke la modernaj grekoj ne estas la posteuloj de la pratempaj helenoj”, sekve “La ĉefa problemo de la greka nacio (estis mia noto- F. D) estis la bezono por stabiligi, plifirmigi sian identecon” (paĝo 114 A. M. Th)

Ĉi tiu tasko entrepreniĝis de la franca lingvisto, Claude Furiel, kiu publikigis en Parizo “La popolajn kanzonojn de la moderna Grekio”. En la enkonduko li esprimiĝas ke “la greka nacio posedas sufiĉe ĉion kio en la jaro 1823 estis konsiderita kiel nepra heredaĵo de la nacio digna por tiu nomo” (paĝo 108 A. M. Th.) . Fauriel rimarkas ke en ĉi tiuj kanzonoj konserviĝas kelkaj mitologiaj kredoj kaj moroj de la antaŭenintoj, ke ili kantiĝas de bardoj (vagantaj rapsodoj el la jaro 1821- mia noto F. D.) akompanantaj la popolajn dancojn. Ke ili estis plejmulte kanzonoj de kleftoj.

“La kleftaj kanzonoj estas fragmentoj de sia nova Iliado. Tie oni ekvidos ke estas ĉiam pli da rifuĝintoj en la montoj de Grekio, digna filino de la malnova Grekio” (paĝo 110, 111A. M. Th)

Historie oni sciis ke en la montoj vivis ĉefe la arbura (albana) loĝantaro kaj kleftoj, ĝenerale albanajn militantoj (ortodoksoj) kiuj militis kontraŭ la Otomana imperio (1821) . La arvanita (albana) esploristo Aristidh Kola, en sia verko “Arvanitoj” atestas ke la tuta popola verkado de la arbroj de Grekio, estas tradukita en la grekan kaj dum paso de la tempo estas forgesita aŭ kaŝita la aŭtoreco.

“Ankaŭ dum pratempo, la epopeo de la pelazgaj gentoj, dum la milito de Troja, spegulita ĉe “La venĝo de Akilo” (Iliado) konatiĝas kiel greka verkaĵo, kiam multas la atestoj ke ĝi estas tradukaĵo en la grekan. “La poemoj de Homero envere estis transkriptitaj (tradukitaj el la

pelazga- mia noto- F. D.) de lolografoj nur en la epoko de “Pissistrati” en la 6-a jarcento kaj estis kopiitaj en ilia nuntempa formo nur en la epoko “aleksandrina”, ĉirkaŭ la jarcentoj 3 kaj 2 antaŭ Kristo (paĝo 499 A. M.) .

Malgraŭ trovita arkeologia riĉaĵo, problemo por la ĵus proklamita helena ŝtato estis la parolata lingvo, pro fakto ke la plimulto de la loĝantaro parolis la albanan, dum la greka uzatis ĝenerale kiel lingvo de administrantaro, eklezio kaj kulturo.

Por enterigi ĉi tiun historian veron, daŭras de jarcentoj la milito por pereigi la lingvoin de la albana nacio. Post kiam oni konstruis “ la nacian grekan lingvon” ĝi fariĝis deviga en la administracio kaj edukado.

La pelazga arkeologia riĉaĵo, la riĉa buŝa verkado de la arbroj, preter la albana sango enverŝita por liberigo disde turka okupanto, servis al la helena ŝtato por konvinki eŭropianojn ke ekzistis “ia greka nacio”.

Albanoj ne bezonis krei la nacion, ĉar ĉe ili ĝi ekzistis ĉiam en ilia konscio kun ĉiuj siaj elementoj. “Albano estis albano, anataŭ ol fariĝi kristano aŭ muslimo, li ne konsideras fratoj tiujn kiujn li havas en sia religio, sed nur tiujn kiun li havas en sian nacion” (paĝo 87 S. F.)
Arbroj bone sciis de kiuj gentoj ili devenis kaj la sangan rilaton inter si. Ili konis kaj kantis al siaj herooj, ne bezonante ilin inventi kiel imagitajn, ĉar ĉe albano “la gento sekvas la radikojn ĝis la komuna deveno” (paĝo 119 R. L) .

Jen kanzono de la areo Pilur- Vuno⁸² (1932) :

”Kiu ja estis ĉiam bravulo

Aleksandro la granda plenalora

Pirro kun aliaj kamaradoj

Sed el ĉiu pli kapabla

Estas Skanderbeg Kastrioti”⁸³

Neniu albana poeto aŭ lingvisto, estis fabrikinta heroojn por prezenti ilin kiel historiaj dokumentoj, sed nur estas kolektinta legendojn kaj historiajn okazintaĵojn, envolvitaj per adoraj sentoj de la rapsodoj. Ne ekzistis evento, ne registrite en la “popola gazeto” kiel tion nomumis

⁸² Areo ĉe borde sudokcidente

⁸³ Gjergj Kastrioti-Skanderbeg, albana nacia hero, gvidinta dum 24 jaroj la rezistadon popolan kontraŭ la otomana imperio

Ismail Kadare, la kanzonojn de la albanoj. “En la lando de agloj la novaĵo kantiĝas, oni kantas longajn kanzonojn pri militoj kaj okazintaĵoj, malnovaj legendoj pri la viroj, kies vivoj estis portitaj per mitoj el la velkado de la jarcentoj” (paĝo 95 R. L.)

Ne longe antaŭe, la esploristo Niko Stillo en sia studo “Etruske- Toske” malkovras la homan historion el 45 000 jaroj antaŭe, de tiuj, kiuj en la tempo de Homero kaj Herodoto konsideriĝis la Dioj de Olimpo, pere de la albana lingvo (ĉama lingvaĵo) .

La historiaj faktoj atestantaj la naciecon de albanoj ekde pratempo, daŭre publikiĝas.

En la klopodoj de la eŭropaj ŝtatoj dum la jarcentoj 18-19 por konstrui “naciojn”, oni antaŭvidis kiel decidigan postulon la ekziston de iu “nacia lingvo”, kaj enkaze de ties manko, ĝi devus konstruiĝi kaj lernadi far la popolo. “Multaj estas ja la hodiaŭaj naciaj eŭropaj lingvoj kiuj apenaŭ ekzistis antaŭ la 19-a jarcento” (paĝo 86 A. M. Th)

Ne plivastiĝante pri tio kiel oni ja konstruis la lingvon, parolata en la plimulto de la eŭropaj ŝtatoj, mi doans nur unu ekzemplon ĉerpita de la franca historiistino Anne Mary Thiesse:

“La Nacia Vekiĝo” en la plimulto de la slavaj landoj estis kondukata de granda laboro de la lingva rekonstruado. En la jaro 1813, Vuk Stefanoviĉ Karadžiĉ je deveno montenegra, fuĝinta al Vieno, ekrilatas al la slavisto Bartholomaüs Kopitar, gardisto en la imperia Biblioteko kiu komisiis al li rekonstruiĝon de la naciaj serbaj monumentoj; en la jaro 1814 li kompilas la serban Gramatikon; poste li sindediĉas al la kreiĝo de komuniklingvo kaj al la kulturo de la sudaj slavo (la skribita lingvo de serboj estis ia miksaĵo de la malnova slava kaj la rusa, tre fora de la popola lingvo kaj proksima al la preĝeja slava) . Tiel Karadžiĉ fondas novan nacian lingvon sur la “stokavien” dialekto uzata de serboj, montenegranoj, islamigitaj slavo kaj parto de kroatoj kiu tiam estis difinita kiel komuna lingvo de la sudslavo, nomata “serbo-kroata”; en la jaro 1850 okazis interkonsento en Vieno pri ĉi tiu lingvo, sed ĝi fariĝis popola nur post la fondiĝo de Jugoslavio” (paĝo 102-106 A. M. Th)

Ĉi tiuj lingvoj “konstruitaj” ne estis historia natura produkto de la popoloj, tial prave la historiistino Anne Mary Thiesse rimarkas ke “Ne ekzistas envere lingvo, kiu povus havi la valoron de la nacia simbolo. Estas ja la intelektuloj influitaj de la pensado de Herder, tiuj kiuj entreprenis la konstruiĝon de la lingvoj kaj de la kulturo respondante al iu identiga alvoko” (paĝo 129 A. M. Th.)

Ĉi tiu aserto montras klare la distingon inter la klopodoj de Renesanculoj niaj por la formiĝo de la albana ŝtato kaj la konstruiĝon de la eŭropaj nacioj de la 18-a jarcento, ĉar albanoj nek “konstruis” lingvon, nek nacion, ĉi lastaj ja ekzistis kontinuece ekde pratempo. “Estas la sola lingvo en Eŭropo kiu povas supreniri ĝis la krepusko de la tempoj kaj interpreti la antikvan lingvon, eĉ tiun prahistorian de ĉi tiuj Pelazgoj. Mi nomumus “pelazgo-albana” ĉar temas pri la komenciĝo (Pelazgoj) kaj finiĝo Albanoj) de vico lingvaĵa, kies kontinueco ĝis hodiaŭaj tagoj apenaŭ estas kontraŭstarigita nek de historio, nek de geografio, nek de arkeologio, eĉ nek de antropologio” (paĝo 434 A. Mati)

Sian naciecon albanoj ne konstruis en la 18-a jarcento, sed ili estas kneditaj per tiu senteco ekde ili ekkonis sin distinge disde aliaj popoloj, kun kiuj li ne volis miksiĝi. Ĝuste tiu tradicio (por ne miksiĝi per geedziĝoj kun la fremduloj) kaj la senĉesaj militoj kontraŭ kiu ajn okupanto, ebligis la konserviĝon de nia nacio kun ĉiuj ties karakterizaĵoj.

Kiam oni parolis pri la geedziĝo de la ilira patrino de Aleksandro la Granda kun “fremda” Filipino la Dua, iu montarano sin turnis al usonanino: “Vi volas diri ke la patro estis fremda? Ĉu vi iam aŭdis ke albana reĝo edziĝis al fremda virino? Albanoj geedziĝas al albanoj. Filipino la Dua, edziĝis al virino el sia popolo, laŭtradicie. Ĉu grekoj kuraĝas diri ke Filipino estis greko? Se li estus greko, neniu el albanoj donis al li sian filinon kiel edzino”. (paĝo 138 R. L.)

La temo pri la historio de la nacioj estas tre ampleksa kaj oni povas pritrakti multajn ties aspektojn, sed unu kozo devas esti unika, la scienca traktado. Malalfabetismo en la historiaj konoj estas servinta al la tagaj politikoj, al la propagando antisienca en la stariĝo de problemoj.

Tipa ekzemplo pri tiu fenomeno estas la iniciato “por formi kosovan nacion” lanĉita en la albana media merkato de Fatos Lubonja⁸⁴ kaj de iu alia. La fundamenta problemo por ĉi tiuj “eŭropanistoj” estas kiel oni krei alian lingvon, alian tradicion, alian historion de la komunaj antaŭenintoj aŭ pratempajn heroojn, morojn, folkloron, por albanoj vivantaj en la ŝtato de Kosovo, diversa de tiu de la albana nacio? Ĉu tio ne subkomprenas ke la albana plimulto kaj neglektindaj etnaj malplimultoj en Kosovo, devas forĵeti sian naciecon por ke ĉirkaŭbraku novan ilian naciecon “kosovan”, kontraŭe al la Eŭropaj Konventoj pri La Homaj Rajtoj?

Malalfabeta ribelulo el Theth, kondukinta la delegitojn de Kosovo kaj Ahmed Zog⁸⁵ –on 16-jaran al Vlora, montris al usona amikino (Rose Lane) ke la flago starigita de Ismail Qemali⁸⁶ estis ĝuste la originalo de Skanderbeg. Pri la praeco de la albanaj simboloj, estas verkinta detale Dhimitër Pilika⁸⁷ en sia studo “Pelazgoj- nia neigita origino”.

La ŝtatoj kaj la nacioj, naskiĝintaj ekde pratempo kaj alvenintaj ĝis hodiaŭaj tagoj, adaptite al la historiaj kondiĉoj dum jarcentoj, atestas ke ili havos pluan vivlongon, sendepende la ideologiaj klopodoj de certaj socitavoloj de la homa socio pri globalisma mondo “sen limoj, sen raso, sen ŝtatoj, sendistingo inter popoloj, ties kulturoj, teritorioj, lingvoj, moroj, leĝoj, kredoj, registaroj, mono, unu maro sen limoj”, “uniforma maso” sur kiu Dio Merkato eblus navigi je absoluta facileco”. (I. M.)

La homa historio estas atestinta ke ĉi tiuj globalistaj imperioj (Pelazga, Romia, Bizanca, Osmana, Sovetunia ka) ne havis longan vivon kaj kolapsis. La plej elstara esploristo de la nacionalismo en Britio, Anthony Smith esprimiĝis ke “ La Nacio kaj Nacionalismo, plurestas

⁸⁴ Analisto politika en Albanio

⁸⁵ Reĝo de Albanio ĝis la jaro 1939

⁸⁶ La unua ĉefministro de la sendependa albana ŝtato

⁸⁷ Historiisto

neanstataŭeblaj elementoj en mondo interdependa kaj en la kulturo de amasaj komunikiloj. Ĉar la globala kulturo ŝajnas nekapabla oferti la kvalitojn de la kolektiva fido, digneco kaj espero” (paĝo 174 A. S.)

Literaturo

R. L. – Rose Lane “Majat e Shales” (La montopintoj de Shala) 2004

E. D. - Edith Durham “Brenka e ballkanaseve” (La Zorgo de Balkanio) 1998

V. P. - Vaso Pasha “E vërteta mbi Shqipërinë dhe shqiptarët” (La vero pri Albanio kaj albanoj) 2010

V. S. - Veis Sejko “Mbi elemente të përbashkëta në epikën shqiptaro-arbëreshe dhe sërbo-kroate » (Pri la komunaj elementoj en la albana-arbra epiko kaj tiu serbo-kroata) 2002

I. M. - Indro Montanelli « Historia e Romës » (Historio de Romo)

A. M. Th – Anne Marie Thiesse “Krijimi i identiteteve kombëtare” (La kreiĝo de la naciaj identecoj) Prishtinë 2004

S. F. - Sami Frashëri *Vepra II, (Verkoj) 1988*

A. M. - Arif Mati “Mikenet=Pellazget” (Mikenoj= Pelazgoj) 2008

A. Mati- Arif Mati “Shqipëria, Odisea e pabesueshme e një populli parahelen” (Albanio-nekredebla Odiseado de antaŭhelena popolo) 2007

I. M. - Ida Magli “La distrucione delle Nazioni “ (La detruo de la nacioj) www.italianiliberi.it 15. 12. 2008)

A. S. – *Anthony Smith 2008*

Ludreguloj

Tamen oni konstatis, ke pluraj balotiloj estas erare metitaj en malĝustajn kestojn. La demokrata kandidato postulis, ke estu enkalkulitaj ankaŭ tiuj voĉoj. Vane protestis la socialistoj, ke estas subite ŝanĝitaj la ludreguloj.

Du semajnojn poste deklaris la Centra Elekta Komisiono, ke, surbaze de la mislokitaj balotiloj, fakte venkis per 84 voĉoj Basha. Denove plendis la socialistoj, insistante, ke la komisiono kontrolu la voĉojn en ĉiuj 1800 balotiluloj de la ĉefurbo.

Ĉi-foje superis Basha per 93 voĉoj. Socialistoj postulis novajn elektojn, sed kortumo tion malpermesis. Tiel, dum la venontaj kvar jaroj, Lulzim Basha urbestros en Tirano. (B. S)

Ĉu nukleaj centraloj necesas?

„La okazintaĵoj de Fukushima ja pruvis, ke la nukleaj centraloj povas rezisti al iu ajn natura akcidento, do ili estas la plej sekura maniero por produkti abundon da energio. ” Tion diris Skender Koja, profesoro pri fiziko en la universitato de Tirano. Li opinias, ke nuklea energio anstataŭos la baldaŭ elĉerpotajn energifontojn surbaze de nafto kaj karbo, kaj ke ĝi estas tute pura kaj ne poluas la medion.

Landoj malsame reagas

Sub la premo de la forta verda partio, Germanio decidis fermi ĉiujn nukleajn centralojn ĝis la jaro 2022. Dume la registaroj de Usono, Ĉinio, Rusio kaj eĉ Japanio agas kontraŭe. Ili ne emas nuligi la programojn pri la disvolvado de nuklea energio. En Ĉinio ekzemple estas konstruataj pluraj elektrocentraloj.

Francio apenaŭ estas influata de la nuklea fobio. Ĝi certigas 75 ĝis 80 procentojn de sia energio per nukleaj centraloj. Ĝi krome vendas sian troon da energio al najbaraj landoj, ekzemple Italio, kiuj mem malpermesas la konstruon de novaj centraloj.

Energifontoj ne sufiĉas

La tiel nomataj renovigeblaj energifontoj (vento, suno, akvo, verdaĵoj) hodiaŭ povas kovri nur malgrandan parton de la bezonoj. Tial la homaro, vole nevole, eĉ se ĝi konfrontiĝas al nukleaj danĝeroj, estas devigata akcepti ilin. Cetere, ĉu la viktimoj pro produktado de nuklea energio ne estas malpli multaj ol tiuj pro trafiko aŭ en minejoj?

Najbaroj favoras

La albana registaro plurfoje sin deklaris preta konstruigi nukleajn centralojn ĉe la bordo de la Lago de Shkoder, najbare al Montenegro. La investon je miliardoj da eŭroj realigus la itala ENEL aŭ la rusa Alfa Group Consortium. Same faris Slovakio, Slovenio kaj Bulgario, malgrandaj landoj kun pluraj nukleaj centraloj. Ili pliriĉiĝas per la eksporto de nuklea energio kaj ignoras la enlandajn kritikantojn, kiuj dubas je la kapablo de la ŝtato por bone mastrumi tiajn komplikajn entreprenojn. (B. S)

(ĉerpite el Monato)

Fragmento el la libro “Heroo de Albanujo”

Aŭtoro Cuk Simoni, unua eldono 1921

Dekkvina ĉapitro

La kapitulacio de Kruja kaj de ceteraj fortikaĵoj- La turka-Venecia paco kaj la elmigrado de la albanoj

En la printempo de la jaro 1477, Ahmet Bego, kun armeo de 8 mil militantoj ĉirkaŭis Kruja-n ĉiuparte. La komdandanto de Kruja estis la veneciano Petro Vettori. Ahmed Bego, male al la taktiko de la sultanoj, volis perdi nek tempon nek sangon en la vanaj atakoj, ĉar la antaŭaj okazintaĵoj klare montris, ke Kruja estas perforte neakirebla. Li do blokadis ĝin kaj lasis al la malsato la efektivigon de la celo.

Venecia-albana armeo de 13 mil anoj, sub la komandanto de Shkodra, Francesco Contarini kaj Lek Dukagjini alvenis la 6-an de septembro 1477, por liberigi Kruja-n, atakis kaj venkis Ahmed Bego-n en la ebena de la Malgranda Tirana, 4 mejlojn malproskime de Kruja, akirante la kampon de la turka armeo. Anstataŭ sekvi la malamikon kaj tute neniigi lin, Contarini kaj Dukagjini lasis sian soldataron ekrabi la kampon, disiĝante dekstre kaj maldekstre. Ekvidante tiel disiĝitan la venecio-albanan armeon kaj tute senzorgan, Ahmed Bego atakis ĝin nokte, lunlume, kaj tute rompis kaj venkis ĝin. La doloriga okazintaĵo montris la gravan perdon kiun faris Albanujo per la morto de Skanderbeg! Inter la mortintoj estis ankaŭ la Venecia komandanto Contarini. Post tiu malvenko, Venecio ĉiuparte atakita de la turkoj, en Shkodra, en Dalmatio, ĉe la Isonco kaj Taljamento, laŭ financoj kaj soldataro malboniĝinta, ĝi memekpuŝigita al tombrando, lasis Kruja-n al sia sorto, kies garnizono pro la nutraĵoj kaj ceteraj aĵoj rabitaj en la batalo apud Malgranda Tirana povis daŭrigi la kontraŭstaron dum tuta vintro kaj plie.

Sole post blokado de pli ol 13 monatoj, kiam la nutraĵoj estis jam finontaj kaj nenia ekstera helpo estis esperebla, la krujanoj komencis pensi pri la kapitulacio.

Kiam alvenis la sciigo, ke la sultano Mahometo persone ĉirkaŭis Shkodra-n, ili sendis la 15-an de junio 1478, delegitojn al la ĉefcentro de la turka kampo por proponi la kapitulacion kondiĉe, ke li permesu al ili eliri libere kun propraj aĵoj. La sultano ĝoje akceptis tiun kondiĉon, sed, laŭ sia perfida kutimo, ne plenumis ĝin poste. Li lasis la krujanojn kaj la garnizonon eliri el la fortikaĵo, kiun li alproprigis, kaj poste donis ordonon mortigi senkompate la viraron, sklavigi la virinaron kaj infanaron kaj vivteni sole la Venecian komandanton kaj la riĉajn estrojn, kiuj povis certigi al li altajn monkompensojn por liberigo. Tiel sin venĝis la sultano Mahometo la 2-a de la sinsekvaj malvenkoj siaj, de sia patro kaj de siaj diversaj generaloj antaŭ la forta Kruja.

Krom la loĝantoj la turkoj volis ankaŭ forstreki la nomon al Kruja kaj rebaptis ĝin per turkaj vortoj “Ak-Hisar” (blanka fortikaĵo) .

Tiun someron kapitulaciis ankaŭ la fortikaĵoj de Leshi, Drishti kaj Zhabjaku.

La 25-an de januaro 1479, post dia ĉirkaŭigo 15-monata kaj post heroa defendo, Shkodra kapitulaciis pro malsato kun kondiĉo, ke la garnizono kune kun la loĝantaro eliru libere kun la aĵoj propraj. La sultano Mahometo ĉifoje ne povis malplenumi la promeson ĉar la Venecia komandanto, Antono de Lezze postulis kaj havigis de la sultano aron de estroj, kiel garantiaĵon de la sultana promeso. La foririntaj shkodranoj enloĝiĝis en Venecio kunhelpate de la Respubliko. Unu tagon antaŭ la kapitulacio de Shkodra, Venecio finkontraktis pacon kun Turkujo, al kiu ĝi lasis tutan Albanujon, krom Durresi.

Miloj da albanoj kiuj ne povis suferi la turkan jugon aliris eksterlanden, nome al Italujo, kie ankaŭ hodiaŭ loĝas 200 000 da ili kiuj parolas albanan lingvon kaj heredis la naciajn prapatrajn kutimojn. La Papo Paŭlo la 2-a en letero direktite al Filipo, duko de Bourgogne jene priskribas ilin: “Ne estas eble observi sen larmverŝado tiujn foririntajn ĉe la italaj havenoj, malsataj kaj senvestaj, elradikitaj de siaj fajrujoj, kiuj ekstaras laŭlonge de marbordo kaj levas al ĉielo la manojn kaj ploras kaj sin plendas en ilia lingvo al ni tute nekonata. ”

En 1481, la filo de Skanderbeg Gjon Kastriotiu, vokita de la albanoj iris de Italujo al Albanujo, akiris grandan parton de sia patra regno kunhelpite de la himariotoj (loĝantoj de la malsupra albana regiono) kaj venkis turkan armeon de 2000 soldatoj kiuj estis senditaj kontraŭ li. La revolucio etendiĝis norde kaj sude kaj malfacile la turkoj povis ĝin estingi.

Tiam komencis foriri cetera vico da albanoj, estraj kaj simplaj loĝantoj de Albanujo al Italujo. Sed ĉifoje la reĝo Ferranto de Napolo, ne permesis al Gjon Kastrioti kun siaj albanoj elŝipixgi nek en Palermo nek en Napolo, timante, ke la sultano deklaru al li militon. Gjon Kastrioti aliris do al Romo kaj genuiĝis antaŭ la Papo, kiu sukcesis en la afero igante la reĝon de Napolo doni permeson al la albanoj enloĝiĝi en Sicilio kaj Kalabrio sed disigitaj, kaj sub kondiĉo ne konstrui urbon aŭ kastelon. La reĝo de Napolo estis timema je tiuj famaj militantoj.

En 1488 Gjon Kstrioti ree penis alvenki la patran regnon kaj en 1500 ni trovas lin en Venecio, kie ĝia senato per dekreto de la 9-a aprilo 1500, voĉdonis helpi lin per armeo kaj monsumo kaj sendi lin al Albanujo.

En 1499, la turkoj perfide estis akirinta Durresi-n kaj la venecianoj, venĝe forprenis Leshi-n. Fine Turkujo kaj Venecio faris pacon la 14-an de decembro 1502, laŭ kiu tuta Albanujo restis al sultano, krom Tivari kaj Ulqini kiujn li akiris en 1571.

Tiel, en la tempo en kiu Eŭropo eliris el la Mezepoko kaj eniris en la Renesancon de la progreso, Albanujo malaperis inter la vicoj de liberaj ŝtatoj kaj iris sub senkompatan jugon de barbara potenco, sub kiu ĝi suferis por pli ol 4 jarcentoj. La lando estis tute dezertigita; la komerco ĉesis, la civilizado neniigis; kiu ajn komuniko kun eksterlando estis tranĉita.

Kasteloj kaj urboj florantaj samtempe al Skanderbeg kaj palacoj kaj monumentoj, kiel Petrella, Petralba, Stelushi, Tornaçi, Sarda, Drishti, Danja, Vulpjani kaj Sfetigradi tute malaperis. Ceteraj urboj kiel Kruja, Durresi, Shkodra, Leshi, Vlora, Kanina, Berati kaj Gjirokastra perdis tute la iaman gravecon kaj restis kiel ombroj de sia antikva majesteco.

Post la perdo de Kruja kaj Shkodra, Eŭropo vidis klare la gravecon de la militiro de Skanderbeg. En 1480, la armeo de sultano Mahometo, apenaŭ akiris tute Albanujon, transpasis al Italujo. La admiralo Ahmed Gjedik Paŝao, kun militŝiparo kaj forta armeo, trairis la Adriatikan maron de Vlora al Otranto. Li okupis tiun urbon kaj prepariĝis iri kontraŭ Romo. Tuta Italujo tremis; la Papo forkuris de Romo, kiam la 3-an de majo 1491, la sultano Mahometo, meze de preparadoj kiujn li estis farantaj por akiri tutan Eŭropon, mortis antaŭ ol realizi siajn projektojn, kiujn li estus efektivigintaj se Skanderbeg ne estus barinta al li dum daŭro de vico da jaroj la vojon.

Konkludo

Tio sufiĉus por doni al Skanderbeg en la eŭropa historio honorindan postenon en la vico de la grandaj defendantoj kiuj militis kontraŭ la Azia barbareco. Se la eŭropaj potencoj estus lin konvene helpintaj, Skanderbeg estus ludinta rolon multe pli grandan kaj eble povinta forpuŝi al Azio la turkan potencon antaŭ ol ĝi estu pliiĝinta. Sed Eŭropo ne varmigis kaj la malbona ŝanco volis, ke la Papo Pio la 2-a, sola kuraĝa eminentulo kiu taksis Skanderbego-n laŭ lia vera valoro kaj volis doni al li la taskon kiun li meritis kaj kapablis plenumi, mortis ĵus tiam kiam li prepariĝis transpasi al Albanujo ĉefe de la eŭropaj krucmilitantoj.

Pro la perfortaj kazoj Skanderbeg estis devigita stari en la defendo kaj estas ja mirinde, ke li povis kontraŭstari tiom longdaŭre kun armeo malgranda, sen kanonoj, sen mono, kun nevoj kaj kolegoj kiuj lin perfidis aŭ senĉese malhelpis, li restis neŝancela, ne malespera, nevenkebla, defendis la liberecon de Albanujo kaj tenis la ŝancon de la Balkana duoninsulo por 24 jarojn penda. Li estis ĉiam la unua en la atako, la lasta ĉe la reirado, venkis glorajn batalojn kiuj metas lin en la vicon de la unuarange tutmondaj generaloj.

La turkoj kredis lin duondio kaj honoris lin ne malpli ol la albanoj. Kiam ili akiris Leshi-n, ili malfermis lian tombon, ne por ĝin profanigi, sed por disdoni inter si liajn ostojn, kiujn ili enfermigis erope en orajn kaj arĝentajn skatoletojn por kolpendi ilin kiel relikvojn sanktajn kaj mirakligajn ĉar, ilia opinio, tiuj ostoj havis la efikon igi ilin pli kuraĝaj kaj malvundeblaj.

La beleco de lia aspekto kaj la majesteco de lia staturo kuniĝis kun superhoma forto. Lia glavo faris mirindaĵojn. Per unu frapo li tranĉis la kolon al apro kiu dezertigis la kultuajn kampojn de lia fratino Mamico. Dum la sieĝo de Kruja, por venĝi la barbaran senhaŭtigon de Moŝio kaj de la ok oficiroj, per unu frapglavo duparte disigis la fraton de Ballaban Paŝao, Jonuzo-n kaj lian filon Hajdaro-n. La turkoj kredis, ke lia glavo estis sorĉigita kaj post la paco de

la jaro 1461, la sultano Mahometo petis donace ĝin de Skanderbeg. Tiu ĉi subite sendis ĝin sed la sultano resendis dirante, ke ĝi ne estis la glavo kiun li petis, ĉar ĝi ne malsamas de la aliaj. Skanderbeg ridetante respondis al turka ambasadoro: “Mi sendis al li la bonan glavon, sed mi ne povis sendi kune mian brakon!”

La morala energio kaj la kuraĝo de Skanderbeg estis eksterordinara. Kiam la turka potenco estis jam ĉe sia plej alta punkto li aliris kun tricent kunuloj por eltiri Albanujon el jugo. Kaj en kia stato ĝi estis, kiam alvenis Skanderbeg por ĝin savi? Estis restinta, oni povas diri, sole la maljunularo ĉar la junuloj estis preskaŭ ĉiuj mortigitaj en la senĉesaj militoj kontraŭ la turkoj.⁸⁸

En 24-jara porviva milito, per kia armeo li kontraustaris la aron de grandnombraj turkaj armeoj? Per aro da malmultaj kuraĝuloj kiujn li animigis per sia heroeco. Ju pli granda estis la danĝero, des pli granda estis lia sereneco; en lia okulo antaŭe respeguliĝis la alvenko.

Multfoje Turkujo, la tiama teruro de Eŭropo oferis pacon al li. Skanderbeg repuŝis indigne kaj noble kian ajn proponon kiu ne utilis al la sendependeco de Albanujo; kaj tiel li agis en la plej kritikaj okazoj kiam lia perdo ŝajnis antaŭvidite certa. Ne sole li neniam petis pacon sed li rompis ankaŭ la unikan kiun li faris, apenaŭ li estis konvinkita, ke tiel agante estis la bono de Albanujo kaj de Eŭropo, tute ne timante la gravajn konsekvencojn al kiuj li estis kontraŭironta.

Li estis spirite kaj korpe nelacebla: ĉiam moviĝema, neniam ripozanta, li manĝadis kune kun la militistoj, dormis armita en batalejo kaj senlite en kiu ajn loko. Kvin dormhoroj al li sufiĉis en la pactempo, sole du aŭ tri horoj en la militempo. Li manĝadis kaj bevalidis multe, sed povis stari multajn tagojn senmanĝanta. Kiel Hanibalo kaj Napoleono li sin vestis senlukse, sed siajn soldatojn li deziris vestitaj per oraj kaj silkaj vestoj, bone nutritaj kaj riĉe pagataj.

En la bataloj li ŝparis pri siajn soldatojn ol si mem; li militis kaj samtempe direktis la batalon. Koncerne la mirinda rapideco kaj impeto en la atakoj estas komparebla sole kun Julio Cesaro. Kun malgrandaj armeoj li alvenkis armeojn duoble aŭ trioble pli grandajn kaj ĉiam ŝanĝis sian batalmetodon. Li estis provita strategiisto kaj militanto kuraĝa en kiu ajn ejo de batalo: en larĝa ebena, en arbaro, en fortikaĵo, kiam li atakis la malamikon, kiam li puŝis lin en iun antaŭe elektitan insidon. En la alvenko de sieĝinta armeo li eble ne havas kompareblan ulon en la tutmonda historio.

La malamiko trovis lin ĉiam armitan kaj preparitan. Apenaŭ li estis sukcese fininta batalon, li jam prepariĝis por la alia. La plej gravan batalŝarĝon prenis li mem, la ceterajn li lasis al siaj generaloj. La aĵojn kaj monsumojn kiujn li sukcesis elpreni al malamiko disdonis tuj al siaj oficiroj kaj soldatoj.

⁸⁸ Gjon Muzaka, Hopf. P.274

Impulsema kaj severa en la batalo li estis kutime tiom bonkora, ke ne sole volontuloj el ĉiuj partoj de Eŭropo sed turkoj mem alvenis de Turkujo kaj fariĝis kristanoj por militservi sub sia komando. Malgraŭ li vivis en epoko kiam la barbareco estis kutima kaj la milito senindulga, li, male, estis humana kaj neniam lasis siajn soldatojn, dum la rabigo de la malamikaj regionoj, malbontrakti la aron de inoj, maljunuloj kaj infanoj.

Li estis morala, malgraŭ sia kresikiĝo en korupta kortego, puritana malcoro (montarano) . Kiel Gustavo Adolfo de Svedujo li ne permesis al inoj, honestaj aŭ male, alproksimiĝi al milita kampo kaj severe punis kian ajn malmoralecon.

Krom la militaj raraj talentoj li estis ankaŭ sagaca diplomato. Li sukcesis altiri la simpatian de eŭropaj kortegoj kaj akcelis unuigi la albanajn malkunigemajn estrojn, organizi kaj disciplinigi iliajn armeojn por la komuna libereco.

Fallmerayer, kiu estas historiisto tre skrupula, karakterizas Skanderbego-n jene: “Georgo Kastrioti estas, kiel ĉiu scias, unu el la ĉefkomandantoj la plej perfekta, la plej ŝancoplena kaj la plej granda de ĉiu epoko”.⁸⁹ Li vivanta defendis kaj gardis la patrujan liberecon, kiun li ne povis heredigi al siaj nepoj; li neniam estis venkita sed sole la morto venkis lin.

La Papo Kalisto la 3-a pri kiu la historiistoj diras, ke li estis prudenta kaj maltroiĝema en parolado, la 11-an de septembro 1457 skribis interalie al Skanderbeg: “Certe ne troviĝas homo tiom nescianta la okazintaĵojn kiu per la plej grandaj laŭdoj ne altigu vin ĝis la ĉielo, kaj ne parolu pri via grandanimo kiel pri vera militanto kaj defendanto de kristanismo”.⁹⁰

Ni povas do konkludi per jenaj vortoj: “Sankta (li estis) kiel Sankta Ludoviko, diplomata kiel Talleyrand, kuraĝa kiel Aleksander la Granda. ”

⁸⁹ Fallmerayer, vol 8 p.732

⁹⁰ Nemo enim tantum ignarus rerum qui non summis laudibus ad coelum te extollat, et de tua nobilitate tamquam da vero Athleta et propugnatore nominis christiani non loquatur.- Rinaldi Ann Eccl. Jaro 1457 num 20 kaj 21

Vojaĝimpresoj

(Laŭ la okuloj de germanaj vizitintoj)

Karl May, poeto, neniam vizitis Albanion sed li skribis pri ĝi, surbaze de sia fantazio, konatigante germanojn, inter la unuaj, kun albanoj. En aventureskaj rakontoj, en la jaro 1892 li publikigis la volumon titolite “Durch das Land der Skipetaren”, (“Tra la tero de albanoj”).



Karl May, 1842-1912

Nea movo de la mano

“Estas jam pasinte multe da tempo ekde la murd-historioj de Kara Ben Nems kaj ties servutulo, Hadschi Halef Omar Ben Hadschi Abul abbas Imb Hadschi Darwuhel al Gossara, ekbruligis mian fantazion kaj gvidis min tra la lando de agloj. Kaj ene de malmulte da tagoj ĉiuj tiuj kiujn Karl May devus inventi pene helpe de enciklopedio, fariĝis realaĵo por mi: rokecaj montoj, muslimoj, banditoj, bazaroj. .



Karl May vestite kiel Kara ben Nems

Finfine unu el viroj antaŭ la moskeo de Tirana ekstariĝas, ion diras kaj mangestas, kvazaŭ dirus: Nu, foriru, tuj!



La moskeo Ethem Bej en Tirana

Ni haste returniĝis antaŭ ol li ripetus lian diron. Sed la muslimo postsekvas nin. Ni plirapide alpaŝas, same la posteulo de Muhamedo. Dumtempe li daŭre parolas kvazaŭ volus konvinki nin je tio ĉiam svingante la manon kion ni interpretas kiel ”forkuru, forkuru! (. . .) Tranĉilo! Li povas frapi nin de momento al momento. Subite mi sentas la ostecan manon de la muslimo sur mia ŝultro. Oh, savu mian vivon junan, mi volis kii tiumomente, sed la sekigitan vizaĝon de la maljunulo estas okupinta rideto tiom amikema, kio igas min halti kaj same rideti. Li denove gestas per dekstra mano kvazaŭ volas forpeli min, dum per la maldekstra tiras min malforte je direkto de la moskea enirejo. Poste li brakkrucumas surbruste, kliniĝas kaj gestas triumfe. (...)



La moskeo en la jaro 1943

La ridanta vizaĝo de la maljunulo igas nin malrapide diveni ke: la nea movo de la mano en Albanio signifas la kontraŭon al nia kompreno. Anstataŭ “foriru” ĝi signifas “envenu”. (. . .) Al diablo iru Karl May kun sia fanatismo kaj murdistoj per tranĉiloj!

Ĉirkaŭ la jaro 1908, Friedrich Poths-Wegner, verkis la libron “Dalmatio, Montenegro kaj Albanio”. Tiutempe la libro eldoniĝis sen la nomo de la aŭtoro, sed plej verŝajnas ke la aŭtoro estis ĝuste Friedrich Poths-Wegner, naskite en la jaro 1844.

Karl Otten (1889-1963), sukcesplena verkisto, kiu ŝatis verki historiajn modernajn romanojn same interesiĝis pri albanoj. Ĉirkaŭ la jaroj 1912-1913, Otten verkis “Vojaĝo al Albanio kaj aliaj prozaĵoj”. Li vojaĝis ankaŭ en Italio, Francio kaj Grekio. Dum la unua mondmilito lin internigis plurfoje pro liaj pacifistaj kaj anarkismaj emoj kaj pro beletraĵoj publikigitaj. Postmilito li translokiĝis en Vieno, kie kontaktiĝis kun Robert Musil, Joseph Rothin, Siegmund Freud. La libro pri la vojaĝo en Albanio en la jaro 1912 aperis en la jaro 1913 en Munkeno.

Austro Joseph Roth (1894-1939) , verkisto kaj ĵurnalisto iris al Berlino deĵorante kiel korespondanto de la fama ĵurnalo “Frankfurter Zeitung”, kie li publikigis aron da vojaĝaj reportaĝoj.



Joseph Roth

Ekde majo ĝis junio 1927 li vojaĝis al Albanio kaj Jugoslavio. Roth verkis romanojn kaj multajn rakontojn kiuj ofte speguligis la finon de la duobla monarkio dhe la krepuskon de la malnova mondo. Li priskribis kortuŝe la sorton de la malgrandaj homoj, kies suferado akiras sencon super la individuecon. La verko de Joseph Roth estis akurate malkovrite nur post lia morto. Oni reeldonis ĝin plurfoje kaj eĉ faris filmojn sur ties bazo.

En la jaro 1930 Albert Kohler, eldonis “Sunon sur Balkanio”. Temas pri vojaĝlibro en la landoj kiel Jugoslavio, Turkio, Grekio, Hungario, sed la aŭtoro estas verkinte ankaŭ pri Albanio priskribante la vojaĝon tra ĝi.

“Albanio-nekonata lando”, aperis en la jaro 1931 de Friedrich Wallisch. Krom la impresoj pri la lando estas ankaŭ 45 fotoj kaj mapo de la lando.

Richard Busch-Zantner doktoriĝis en la universitato de Erlangen per socia-historia studlaboraĵo pri la Sudokcidenta Eŭropo, esplorante aparte la tempon de turkoj. Verŝajne, surbaze de tiu studo li verkis la libron “Albanio-nova lando en la Imperio”.

“Vojaĝo tra Balkanio”, (20, 000 kilometroj per aŭto tra Hungario, Rumanio, Bulgario, Turkio, Grekio, Albanio kaj Jugoslavio) , estas la titolo de la aŭtoro Lutz Koch, el la jaro 1941, akompanata de 118 fotoj

“Renaskiĝo de Albanio” eble estis la unusola eldonaĵo de Willibald Kollegger, publikigite en la jaro 1942.

Samjare, Erich von Luckwald, publikigis en Munkeno “Albanio, lando inter la hieraŭo kaj morgaŭo”, volumo riĉigite per 88 fotoj. Onidiras ke li estis sendite laŭmisie en nian landon.

Jarojn poste, 1951, verkisto kaj ĵurnalisto Gustav Renker alportas la romanon “Aventuro en Albanio”.

Herbert Ziergiebel alia germano dediĉis sian atenton al Albanio. En la jaro 1956 li publikigis “La lasta vualo, vidaĵoj el vojaĝo en Albanio”, volumo akompanate de multaj fotoj.

Vojaĝlibro en 1958 je titolo “Albanio- la lando de la aglidoj”, estis verkite de Kurt Seliger. Ĉi lasta verkis alian libron en la jaro 1965 je titolo “ Interrilatoj de Albanio al Ĉinio”.

La lasta vojaĝlibro pri Albanio verŝajne estas tiu de Marion Gräfin Dönhoff (1909-2002) , en la jaro 2004. Ŝi estis vizitinta Albanion junaĝe. El tiu vojaĝo ŝi kolektis donitaĵojn kaj fotoĵojn, same tiutempajn dokumentojn.



Marion Gräfin Dönhoff

La fotoj estis malkovritaj post ŝia morto kaj nur tiam ili publikiĝis. La albumo venas sub la titolo “El Orienta Prusio tra Eŭropo ĝis Albanio kaj reen”.

Marion estis la plej malgranda el sep gefiloj de aristokrata familio en Orienta Prusio. Ekde la jaro 1946 ŝi deĵoris kiel ĵurnalistino en “Die Zeit”. Kelkjarojn ŝi eĉ estis ĉefredaktoro de “Die Zeit” kaj ekde la jaro 1973 samtempe kuneldonanto de la ĵurnalo. La fotoalbumo, kie inkluziviga ankaŭ nia lando, estas publikigite de ŝia nepo, Friedrich Dönhoff, al kiu, apenaŭ ŝi ekmortus, estis montrinte keston forgesitan kun originalaj negativoj el la vojaĝo tra Balkanio komence de la jaroj 1930.

Marion Gräfin Dönhoff estis vojaĝinte kun ŝia fratino Ivona de Orienta Prusio tra Eŭropo ĝis Tirana kaj reen.

Jen kelkaj citaĵoj de germanoj pri Albanio

Klaus Liebe, 1974:

“Envere, ankaŭ la moderna Albanio entute - des pli paradokseca ĝi povas ŝajni je unuavide-impresigas kiel fosilo el tiu malnova mondo, sankta kaj krepuska, kie ĉiu pretpretis sinoferi pro praveco de la justo de afero aŭ sia ideo- fosilo je inertaj kaj fanatikaj karakterizaĵoj, rilatantaj al ia malkredemo al skeptikuloj kaj fremduloj, je senkondiĉita kaj plenriska fido en tiu tero nomita Albanio”

Ziergiebel (La lasta vualo, Halle, 1956) :

“Ŝtelistoj, la rajto de plifortulo, venĝo, virinoj vualitaj, fusiloj Henry (speco de fusiloj citite en la aventureskaj libroj de Karl May) , ĉaspafilo por ursoj. –

Wehrl (‘‘Albanio: vojaĝo al eŭropa Ĉinio’’, 1971) :

“Kiam oni senvole parolas pri la “pilula-anti-baby”, la dentisto demandas: “La efiko de ĉi pilulo estas ke la virinoj pli facile gravediĝu?”- Nia miro pro lia naiveco estas granda. Post kiam ni eksplikas la celon de ĉi tiu pilulo, li respondas fiere ke “tio tute ne necesas en Albanio. Ĉar ĉi tie apenaŭ ekzistas neleĝaj infanoj, eĉ la divorcoj estas maloftaj. Ĉe ni la homoj geedziĝas ne pro amorado, volupto kaj memamo, sed ĉar ili konscias pri iliaj sociaj respondecoj. Neniu albano aŭdacus inviti al balo nekonatan junulinon en la dancejo. Tiu junulino akceptinta tian inviton tuj forpeliĝus disde la dancejo kiel senskrupula prostituino””.

Nun parolas vojaĝanto de Okcidenta Germanio: “Jes, sed finfine ankaŭ vi geedziĝas ĉi tie. Kiamaniere la gejunuloj interkonatiĝas, se la junulo ne povas inviti nekonatan junulinon al la

danco?”. La albano klarigas: “Junuloj kaj junulinoj interkonatiĝas en la laborejo, en entreprenoj. La geedziĝoj realigitaj en kazoj de diboĉaĵoj kaj fiamuziĝoj, estas malbonaj. Nur la komuna laboro formigas la karakteron de la geedzoj”.

Koch, “Vojaĝo tra Balkanio”, 1941:

“La nuntempa albano sin vestas je sama eleganteco kiel ŝia fratino en Berlino aŭ en Oslo, eĉ ŝi iel troigas per la lipŝmiro kaj talko, por ke dokumentigu ke ŝi finfine eskapis de devigo de vualiĝo kaj de tiu vivo subombre esprimita simbolece per la vualo”.

Kollegger, (“Renaskiĝo de Albanio”, Vieno, 1942:

“Albanio hodiaŭ estas lando kie oni laboras gaje kaj kie okazas impetaj transformiĝoj Multaj malnovaj kozoĵ foriras kaj fojfoje envenas novecaĵo kio penetras en la mensoj de ties loĝantoj. Ilia malvasta vidhorizonto plivastiĝas kaj la vualoj forĵetiĝas. Albanio ne plu estas la plej okcidentema avangardo de Oriento, sed estas pretpreta fariĝi ja cizadelo de la eŭropa laborado. . . . Oni ne ekspektas retroirigajn frapojn, ĉar la kontraŭuloj ene de la lando estas jam neutraligitaj, dum el ekstere neniu malamiko kuraĝos ataki la landon. (. . .) La estonto alportos al Albanio unuavice sendependecon pli fortan.

En malfrua aŭtuno de la jaro 1941 Duce, okaze de iu akcepto en la Palazzo Venezia, promesis al la delegacio el Tirana transpasigi al albanoj la memregadon. (. . .) Ĉi tiun landon je perspektivo al la estonto oni povas alsaluti per la ĉiutaga formulo de la ties enloĝantoj: T’u Ngiat jeta! (Longvivu!)

Kiel tia stagnado

(Opinio pri nia enlandfa movado)

Ekde jam longe ĉe ni oni ne plu aranĝas E-kursojn kaj la varbado de la novaj membroj ne plu progresas. Plie, nia sekcio same kiel la tutlanda asocio ne renovigis sian leĝecon ĉe la juĝejo. Tiel, ni ne povas peti helpon ĉe la edukaj kaj neregistaraj organizaĵoj ĉar ni ne havas jam leĝan statuson.

Kial tia stagnado? Unue, pro ia neglegtado far ni ĉiuj, due pro enormaj elspezoj postulataj de la juĝejo, trie, pro nia maljuniĝo, sekve falo de entuziasmo necesa, kiun kuraĝigis ankaŭ la impertenta indiferenteco far niaj edukaj ŝtataj organoj.

Certe estas neeble kaj senrezulte la aktivado de nur 1-3 personoj. Estas bezonata la partopreno de multaj samideanoj kiuj plenumas apartajn taskojn: instruado, propagando, eldonado, varbado, korespondado, ktp ĉiam laŭ kolegeca principo.

Mi mem baraktas delonge por pluteni viva nian sekcion, pretigante ĉiun duan monaton nian Bultenon, propagandante per la preso kaj radiotelevizio, respondante al la leteroj diversaj, partoprenante en eksterlandaj aktivecoj. Sed tio tute ne sufiĉas.

Kion faru do?

Unue, ni devas vekigi la malnovajn membrojn kiuj deĵoras ĉe diversaj laborejoj. Ekzemple, d-ro Saimir Beqiraj, instruas en la Fakultato de la Naturaj Sciencoj. Iam li aktivis, eĉ kompilis la vortareton albana –esperanto pri botanikaj kaj zoologiaj terminoj. La profundiĝo en la studado, la edziĝo kaj patriĝo eble tenis lin fore de la movado nia. Li povas fondi studentan esperantistan grupon, sed ankaŭ varbi inter la universitataj profesoroj.

Zamir Gjurgji, estas alia iama aktivisto, nun deĵoranta ĉe la propaganda fako de la reĝa korto en Tirana. Li edziĝis, patriĝis kaj iom maljuniĝis sed certe estas ankoraŭ tre taŭga por nia movado.

Luan Jaupi en la urbo de Durrës, iam aktivis tre forte kaj altiris al nia movado plurdekojn da junaj esperantistoj. Antaŭ unu jaro lia filo mortakcidentis kaj tio ege seniluziigis kaj malfeliĉigis lin. Tamen li pretas daŭre kunlabori.

Agim Peraj, nia iama asociestro, instruas en la urbo Shkoder. Li havas daŭre eblecojn por baki novajn esperantistojn en sia lernejo. Dume lia frato Bahri Peraj delonge laboras kaj loĝas en Grekio.

Nelaste la familio de la forpasita Zef Mjeda, la filinoj kaj nepino Klea, nun instruistino de la angla en Shkoder, povus sendube multon kontribui.

Rita Permeti, nia sekretario, kvankam ekde pluraj jaroj handikapita, estas ĉiam entuziasma kaj ŝi povas pluteni la taskon de korespondado, librotenado ktp.

Nehat Sokoli el la urbo Kukes, iam instruis en gimanzio kaj fondis tie grupon de esperantistoj. Sed delonge li deĵoras en konstruado kiel ĥemia fakulo, aktuale en Kosovo kaj ne plu kontribuas al la movado.

Estas vico de aliaj relative junaj esperantistoj (25-30 jaraĵoj) finstudintaj en Pollando kiel Uliam Binozi, Egli Brati, Gjergji Spaho, Matilda Sokoli, Fioralba Sadiku (Ceno), Dorina Sadiku, Ereid Dhimitri ka kvankam geedzigitaj kaj enpostenitaj en diversaj institucioj ne edukaj povus kontribui notinde en la pluvigliĝo de nia enlanda movado.

Estas pluraj aliaj loĝantaj eksterlande, kiel Artur Doçi, Ariel Myrazi, Elton Zaimi, ka kiuj povus same kontribui, des pli nun kiam ekzistas interreto.

Sed unue, laŭ mia opinio ni devas instigi studentojn ĉe iu fakultato por eklernu Esperanton kaj rekonstruu nian asocion kaj sekcion. Certe ili povus ankaŭ ilin leĝigi poste kaj daŭrigu la kunlaboron kun la eksterlandaj asocioj.

Ni esperu!

Bardhyl Selimi

Nova esperantisto - la kuracisto de la urbo Korçë (Korĉe)





Kelkaj donitaĵoj pri Engjëll Gusho

Engjëll Tasi Gusho naskiĝis en la urbo de Korĉa la 7an de oktobro 1944. Liaj gepatroj Tasi kaj Kostaqe Gusho, ambaŭ instruistoj klopodis lernigi ĉiuj kvar filojn sukcese. Ili finstudis en la universitato pri inĝenierio, edukado kaj medicino.

Engjëll finstudis pri medicino en la jaro 1967 kaj deĵoris 5 jarojn kiel ĝenerala kuracisto. Poste specialiĝis pri endokrinologio kaj diabetologio. Ĝis pensiĝo (2009) li laboris en la hospitalo de Korĉa. Rilate Esperanton li rakontas:

“Mi aŭdis pri ĝi hazarde en la universitato. Allogis min la simpleco de la ties gramatiko. Tuj mi ekposedis la 16 regulojn sed mankis ĉe mi tiam literaturo, beletraĵoj. Same mi devus forte studi pri mia profesio.

Sume, mia frato Gjergji Gusho, instruisto de la rusa kaj itala, estis trovinte bezonatan literaturon por praktiki Esperanton. Li memstare estis posedinta Esperanton kaj prpagandis ĝin tra siaj gelemantoj, geamikoj diskonigante. Crte tio pluinstigis min al la studado de E. Kiuamikiĝis inte si la homojn. Gjergji kompilis eĉ lernolibron pri E. Kiun li uzadis dum lalernokursoj. Krom la votareto petigite de li mem donacis min alian pli larĝan vortaron Albana-Esperanta. Tiel estante 60 jara mi eklernis E.

Nun mi legas volonte esperanajn librojn kaj revuojn kiuj estas en la biblioteko de mia frato. Same mi uzas ankaŭ diversajn materialojn trovataj sur interreto. Estante pensiulo mi nun havas pli da libera tempo por min okupi per E. , sentante ĉiam pli feliĉon ĉar ĝi unuigas kaj interkomprenigas pli facile kaj pli rapide la homojn.

Pogradec, 6. 09. 2011.

Turismado

Feriado en Saranda

Ĉiam mi preferis feriadu dumsomere ĉe marbordo, ie en Albanio, ekde Velipoja ĝis Saranda. Junaĝe mi estis ĝuinta Dhermi-n dum sinsekvaj du someroj kaj estis ravita pro la ekzoteka naturo de la Bordo. (Albana Riviera)

Veturante malsupren tra la Kolo de Llogora, mi sentis tiam la agrablan bonodoron de la lokaj floroj, kiu igas tiom bongusta la mielon. Pli malfrue mi vizitis ankaŭ Saranda-n, ĝuste en aprilo kiam ekburĝonas la oranĝofloroj. Aparte ravaj estis la vesperoj.

Post la jaro 1990 la eblecoj por vojaĝi kaj feriadi ankaŭ en marbordo pliiĝis notinde. Tiel mi veturis al Saranda kune kun mia familio plurfoje. Kaj ĉiam mi deziras reveni tien.

Mi estas vizitinta jam multajn fremdajn landojn mediteraneajn, kiel Liguria en nordokcidenta Italio, Venecion, Trieste-n, Bari-n, Ancona-n por ke ni limiĝu per Italio, sed la promenejon ĉe la marbordo nomata "Jonianoj", kie unuflanke stariĝas grandaj belegaj palmarboj kaj aliflanke pluraj hoteloj, rare mi konstatis.



La bulvaro "Jonianoj"

Lastajn dek jarojn la urbo estas travivinta ian eksplodon da konstruadoj, eble iom perfortite kaj senkontrole laŭ urbanisma vidpunkto, sed tio ebligis la loĝadon de dek miloj da lokaj kaj fremdaj turistoj kiuj trovas en ĝi ĉion: pitoreskan naturon, komforton, multvariajn servojn, plaĝojn je pura akvo, promenejojn.



Ankaŭ la prezoj estis akcepteblaj. Mi pasigis la lastan semajnon de aŭgusto en la hotelo "Republika" pagante ĉiutage 3000 Lekojn (aŭ ĉirkaŭ 22 eurojn) por dulita ĉambro kun matenmanĝo. Ekde la 1-a de septembro la prezoj eĉ duoniĝis.



En la restoracio sur la taraso de la hotelo "Republika"

Samkiel la urbo Pogradec ĉe la lago de Ohrid, ankaŭ ĉi malgranda urbo simpatia estas kreinta jam sian tradicion de bongastamo kion respektas la tuta loka loĝantaro.

Iom da historio

La moderna kaj antikva Sarando konservas en si trezoraĵojn kaj identitecon de praa kulturo kaj civilizo. La komenciĝoj la vivo kaj la unuaj spuroj de loĝlokoj datiĝas el la dua jarcento antaŭ Kristo. Sed kiel marhavenon de la apuda fama urbo Foinikia tiaj spuroj iras malprofunden en la 4-a kaj 5-a jarcentoj antaŭ Kristo.



Pozicio de Saranda sur la mapo de Albanio

Saranda etendiĝas ene de regiono je densa civilizo dum antikveco. Trovite apud Butrinto, Foinikio, Kalivosa, stacio de Xarra, Ĉuko de Aitoi ka, ĝis plurestis relative en la marĝinoj de la fokusado de esploroj, fosadoj, kvankam tiaj okazis dum la dua duono de la 20a jarcento.

Onhezmi (la antikva nomo de la urbo) naskiĝis kaj disvolviĝis en la regiono kie vivis la gento de Kaonoj. Historiistoj atestas ke la areo de Kaonio, estis el la plej loĝataj de iliroj, je notinda loĝlokdenseco kaj urbaj centroj, kion ebligis la klimataj kondiĉoj, la naturaj resursoj kaj la proksimeco al la Jonia maro.

Informaĵoj pri Onhezmo alvenas pli malfrue ol tiuj pri Butrinto, Foinikio kaj aliaj loĝlokoj. La romia konsulo Cicero atestas ke Onhezmo estis marhaveno ordinara sed tre konvena por navigadi de Epiro al la Itala duoninsulo. Li diras ke tiun navigadon ege helpis sudorienta vento, nomata de lokanoj "Onhezmites". El ĝi la urbo ricevis ja sian nomon Onhezmo.



Aliaj parolintaj pri Onhezmo estas la greka geografo Straboni, Klaud Ptolemeo, Hieroklo kaj Dioniso de Halikarnaso.

Onhezmo aŭ Anchiazmi daŭre menciatas en multaj dokumentoj dum la 5a kaj 6a jarcentoj post Kristo. La stariĝo de la preĝejo de 40 sanktuloj sur la Kolo de Gjashta ĉirkaŭ la 10 jarcento post Kristo, montras ke la loĝloko estis translokita tie. La kaŭzoj povus esti la atakoj el la maro, ĉar dum la 11a jarcento post Kristo la loĝloko denove ŝanĝiĝas, ĉifoje sur la monteto de Lëkuras, kie oni certigis pli sekuran defendadon.



La kastelo de Lëkuras

Dum la otomana juko la urbo preskaŭ ne menciigis, ĝis la 19a jarcento kiam la domoj komenciĝis konstruadi sur la antaŭaj lokoj. La urbo posedis nur marhavenon kun militista gardistaro, doganejon kaj malmultaj konstruaĵojn. Eĉ ĝis la 20a jarcento ĝi nomiĝis Skele (haveno) de la

lokanoj kvankam oni komencis uzi ankaŭ la nomon Saranda (en la greka: 40) dediĉe al 40 sanktuloj kaj ties preĝejo.

Malgraŭ manko de ia graveco, danke al siaj naturaj belecoj Saranda estis proklamita de sultano Abdul Hamido kiel lia propra posedaĵo. La albana reĝo Ahmet Zog (1928-1939) ricevis ĝin kiel donacaĵon de la tiutempa parlamento, dum Benitto Musolini (post okupado de Albanio far Italio-1939-1943) , nomis ĝin Porto Eda dediĉe al sia filino Eda.

Straboni, fama romia geografo menciis la urbon kiel graven punkton tranzita por la ligoj de Romo kun Grekio.

En la 4a jarcento la urbo ĉirkaŭiĝis per defendmuroj ĝis 2 metrojn dikaj. La muroj ĉirkaŭis surfacon je 5 ha kreinte citadelon fortifikitan per 20 defendturoj.

Ene de tiu teritorio oni malkovris postrestaĵojn de la domoj, same de iu baziliko paleokristana el la 6a jarcento kun planko ornamite per mozaikaĵoj, antaŭe uzita kiel sinagogo.



La Sinagogo

Mi povis konfirmi tion eĉ en la hotelo Republika kie mi restadis. En la subtera etaĝo de ĝi estis la ruinaĵoj de pluvakva rezervejo, kiun la proprietulo Aljosa Sulaj estis elfosinta kaj evidentinta antaŭ ol li konstruis la kvinetaĝan domon-hotelon.



La ruinaĵoj de la pluvakva rezervejo (stere)

Ĉio estiĝis kunlabore kun la Instituto de Kulturaj Monumentoj dum la jaroj 2002-2003. Li rakontis al mi ke tiaj postrestaĵoj ekzistis en ĉiuj domoj de la urbo apud la marbordo kie nun stariĝas hoteloj, sed la proprietuloj estis uzintaj ilin kiel konstrumaterialon aŭ simple estis forĵetintaj ilin en la maron. Tio estas malpardonebla!



En aliaj landoj kiel Italio, multaj hoteloj, restoracioj kaj ceteraj institucioj estas konstruitaj sur la ruinaĵoj de la amfiteatroj, kulturaj objektoj antikvaj, ne pereiginte ilin sed ebligante ilian eksponadon por la vizitantoj, kio pligrandigis ankaŭ la valoron de la novaj domoj. Kial oni ne agis tiel ankaŭ en Saranda? Krom la homoj ignorantoj ekzistas ankaŭ ŝtataj aŭtoritatoj kaj fakuloj pagataj de ili kiuj povis servi per konsiloj kaj interveno por konservi la trezoraĵojn antikvajn.

Mi vizitis ankaŭ la sinagogon kiu nuntempe altiras multajn turistojn. Dumil jaroj antaŭe romianoj estis kondukantaj grandan nombron da hebreaj sklavoj per du ŝipoj al Romo. Sed proksime de la bordoj albanaj la vetero malpliboniĝis kaj la ŝipoj estis dronontaj.. La sklavoj profitokazis kaj eskapis sin rifuĝante en la albanaj teritorioj kie ili pluvivis en sia komunumo etno-kultura.

Mi konstatis ankaŭ postrestaĵojn de iu portalo de la antikva citadelo tuj ĉe la akvolinio.



En la jaroj 415-516 la urbo citiĝas en la ekleziaj jarcirkuleroj bizancaj kiel centro de episkopejo.

En la jaro 551, 50 ŝipoj plenplene de gotoj, parto de ostrogotoj de Atila forrabis kaj forbruligis Onhezmo-n kaj Butrinto-n.

La urbo fariĝis forrabaĵo ankaŭ poste, dum longaj tricentjaroj.

En la jaro 887 forta militista ŝiparo saraĉena alveninta el Afriko ruinigis la urbon ene de malmulte da tempo.

Notindan evoluiĝon la urbo konis dum la 10a jarcento, kiam ĝi fariĝis marhaveno de la Temo de Nikeo.

En la jaro 1034 la urbo okupiĝis de bulgaroj kiuj estis devigotaj forlasi ĝin post duonjarcento al normanoj de Robert Guiskardo, alvenintaj el Sicelio. Ĉi lasta rekonstruis ankaŭ la kastelon.

Dum la jarcentoj XII-XIII en la urbo restadis ankaŭ venecianoj.

Rezulte de atakoj kaj forrabo sinsekvaj, la urbo estis devigita translokiĝi plurfoje kaj dum XVIII-XIX jc ĝi instaliĝis sur la monteto de Lëkuras, stariĝinta ĉirkaŭ 200 metrojn super la marnivelo.

Unuafoje estis William Martin Leake, vojaĝanto kaj esploristo angla dum XIX jc kiu identigis Onhezmo-n kun Saranda-n.. Estis la jaro 1803 kiam la urbo ankoraŭ konservis spurojn de sia praeco.

Osmanoĵ aperis tie en la jaro 1413 por ke foriru nur post 500 jaroj!

Je la fino de XIX jc kaj komenciĝo de XX jc Saranda havis doganejon, karantinejon, navigagentejon, gastejaĉon kaj kelkajn servejojn.

Ĝis la unua kvarono de XX jc ĝi estis malgranda haveno, malgraŭ la fakto ke la vivo plenigita per historiaĵoj estis renaskiĝante.

La sendependeco de Albanio en la jaro 1912 trovis Saranda-n kun 110 loĝantoj, dum laŭ la censo de 1927 ĝi nombris 810 loĝantojn.

Laŭ la donitaĵoj, plej grandan evoluon ĝi konis dum la regado de la reĝo Zog, en la jaroj 30 de XX jc, kiam ĝi fariĝis subprefektejo.

Tiuperiode oni notas ankaŭ la unuajn publikajn konstruaĵojn, kiel la promenejo apud la maro kaj kelkaj urbaj stratoj gravaj ene de la urbo.

Krome, stariĝis kaj ekfunkciis tri fremdaj konsulejoj: greka, itala kaj rumana.

Dum la komunisma erao, en la jaro 1957 la urbo transformiĝis en distrikcentron. Ĝuste tiam ĝi konis novan enloĝigadon kaj novan ekonomian evoluon. Oni disvolvis ĉefe la ellaborantan malpezan kaj nutraĵan industriojn.

Laŭ la censo de 1967 rezultiĝis entute 8700 loĝantoj.

En la jaro 1990 en Saranda loĝis 15700 homoj, kaj duoble (32000)) aktuale.

Ripozejo kaj la ĉirkaŭaĵoj

Etendita ĉe la Joniaj bordoj, kontraŭ la greka insulo Korfu, Saranda karakteriziĝas de mediteranea klimato, kun varmaj marakvoj.



En la plaĝo

Pro sia pozicio kaj varma vetero Saranda estas unu el la plej fascinaj turismaj urboj de la Albana Riviero. Tie kutime pasigas la mielan monaton la ĵusgeedzitoj, sed ne nur ili. Mi estas konstatinte ke nun en Saranda ripozas kaj pasigas la vintron ankaŭ nordeŭropanoj, precipe aĝulaj.

La lokiĝo laŭlonge de la maro favorigis la konstruiĝon de hoteloj kaj restoracioj ĉe la marpromenejo, ofertantaj akomodiĝon kaj nutrigajn faciligojn. Kelkaj tragetoj ligas Saranda-n ĉiutage kun Korfu.



Tragetoj

Pitoreska marmalvastejo kondukas vin al la antikva urbo de Butrinto tra pejzaĝo je olivarboj kaj aliaj plantacioj. Butrinto estas proklamita UNESCO trezoraĵo. Ĝi loĝatis komence de iliroj kaj nomiĝis tiel pro la vundoj de Buthrotos (buffalo) oferita de princo Enea de Trojo por ke li havu sekuran enireblecon al la templo de Dodono en Epiro.

Inter la arkeologiaj ruinaĵoj plej interesaj estas la malnova amfiteatro, la templo de Aeskulapius, ĝiaj mozaikaĵoj kaj la antikvaj urbomuroj. La malnova fortreso loĝiganta malgrandan muzeon, vidkaptas la tutan urbon, kiu estas unu el la lastaj naturaj antikvaj lokoj ankoraŭ ne detruitaj el la historio de Mediteraneo.



Originala aŭtilo produktita de lokanoj

Alia alloga historia loko estas la kastelo de Lëkuras trovita surpinte de la dominanta monteto super Saranda, nur 2 km for de ĝi. La kastelo de Lëkuras estas konstrite dum XVI-XV jc de Sultano Sulejmano, dum lia militista kampanjo por invado de Korfu.

El ĉiuj muroj de la kastelo la turistoj povas okulvidi libere areon je distanco ĝis 60 km.

Dume, estas rekomandinde viziti ankaŭ la magian akvofonton "Blua Okulo" (je 18 km for de la urbo) . En tiu ĉi bela loko kovrita de la ombro de altaj jarcentaj kverkoj, laŭ legendo, drako kun 12 kapoj gardis fanatike la fontoakvojn for de la vilaĝanoj. Pro tio ĉi lastaj oferigis multon inkluzive de virgulinoj junaj voluptigaj al la akvoposedanto.



La marhaveno

Laŭlonge de la marbordo norde de Saranda troviĝas vico de pitoreskaj ravigaj vilaĝoj kiel Lukovo, Piqeras kaj Borsh. Tiuj kombinas panoramajn vidaĵojn unikajn de la maro, fascinajn montojn kaj pejzaĝojn de olivarbaroj kun la ĉarmo de la vilaĝaj medioj kaj plej bela kaj drameca pejzaĝo laŭlonge de la Jonia maro.

Bardhyl Selimi

Septembro 2011

Xhelal Zejneli

La disdivido de Kosovo aŭ Serbio?!

Belgrado ekde la jaroj 1970 de XX jc ekkonsciiĝis ke Kosovo estas granda plenbuŝo por englutiĝi.

Sojle de la malkomponiĝo de Jugoslavio, en la jaro 1991, ankaŭ Kosovo kiel Slovenio kaj Kroatio eniris la vojon de memstariĝado. La naciismaj cirkloj serbaj konsciiĝis ke la disiĝo de neslava Kosovo estas pli natura ol disiĝo de aliaj sudslavaj ŝtatoj de eksa Jugoslavio.

Tial oni komencis lanĉi ideojn pri ebla disdivido de Kosovo. La unua faris tion la serba akdeamiano Dobrica Ĉosiĉ (1926) .

Ĉi tiu ideo estis fiksita en la mensoj de la serbaj naciistoj en ĉiuj renkontiĝoj kaj konferencoj pri Kosovo ekde Rambujeo ĝis hodiaŭ.

Sed serboj ne volis publikigi tion ĉar tiel ili mematestus ke Kosovo ne apartenas al Serbio.

Ili definitive konvinkiĝis ke Kosovo estas jam perdita post la interveno de NATO-o printempe 1999. Sekve, ekde tiam ili komencis eĉ paroli publike pri la disdivido de Kosovo.

La prezidento de Serbio Boris Tadiĉ ofte ripetas ke “ne estas bone ke unu flanko realigu ĉion ĝi postulis kaj la alia ne. Ne estas bone ke unu flanko ricevu ĉion kaj la alia nenion. Tio rekte aludis pri la disdivido de Kosovo.

Finfine, unu el la ministroj serbaj Ivica Daĉiĉ estas stariginte publike la postulon de Serbio pri la disdivido de Kosovo. Serboj eĉ prezentis la ideon ke la konversacioj tiucele okazu inter Serbio kaj Albanio.

Ĝis hodiaŭ, kiam temis pri Kosovo, la serbaj aŭtoritatoj prikonsideris la Konstitucion de Serbio, laŭ kiu Kosovo estas parto de Serbio.. Tion ili ne plu mencias.

La serbaj malplimulto en kelkaj el la eksaj jugoslavaj respublikoj ne estas la solaj kiuj loĝas ekster la ŝtato-patrino- Serbio.

Albanoj ekz. loĝas en ses ŝtatoj de la regiono: en Albanio, Kosovo, Makedonio, Montenegro, Grekio kaj Serbio (Presevo, Medveĝo, Bujanovc) . Se la serboj de la norda Kosovo disiĝus de Kosovo, la samon rajtis postuli ankaŭ albanoj:

- en la Orienta Kosovo (suda Serbio) ;
- en Makedonio;
- en Montenegro;
- en Grekio.

La disdivido de Kosovo incitas ankaŭ disdividon de Makedonio inter Bulgario kaj Albanio.

Tiel per disdivido de Kosovo malfermiĝis la tiel nomata “Pandora kesto” kaj estiĝus la domino-efiko en ĉiuj landoj de Balkanio, ĉar ĉie ekzistas etnaj malplimulto:

En Bulgario ekzistas turkoj; en Rumanio, Slovakio kaj Vojevodio (Serbio) ekzistas hungaroj; muslimaj bonsianoj, estas en Sanĝak (Serbio kaj Montenegro) ; etna grupo slavofona estas en Grekio; kroatoj estas en Bosnio kaj Hercegovinio, same en Vojevodio; serboj estas en Kroatio kaj en la Serba Respubliko de Bosnio kaj Hercegovinio.

En ĉiuj landoj de la regiono estas romoj, vlahoj (arumanoj, cincaroj) , hebreoj, egiptoj, la etna grupo islama parolanta en la slava (en diversaj landoj ili portas diversajn nomoj) , en Turkio, laŭ la kurda donitaĵoj estas 14 milionoj da kurdoj.

Vojevodio estas regiono dominate de Serbio. En ĝi loĝas 26 malplimulto, inkluzive de 400 miloj da hungaroj. Tuj post la Dua Mondmilito, Serbio forpelis 500 miloj da germanoj kulpigante ilin kiel kunlaborantoj de nazioj.

La areoj sub la Belgrada administrado, kiel la orienta Kosovo kaj Sanĝako loĝata de muslimoj estas tre postrestintaj kaj malevoluintaj, ĉar Belgrado nenion investis tie, krom ekspluatado, marĝinizado kaj getoizado. Tie svarmas la senlaboreco, malriĉeco, sociaj problemoj kaj elmigroj. La tiel nomataj politikaj azilpetantoj el Serbio kaj Makedonio estas fakte albanoj de Preŝevo, Bujanovco kaj Medveĝo, same el albanaj regionoj en Makedonio.

EU devas entrudi al Serbio ian Planon de Ahtisari kiu garantius la ekskluzivajn rajtojn al albanoj en la orienta Kosovo same al tiuj en Sanĝak.

Do, antaŭ ol diskuti la disdividon de Kosovo EU kaj Usono devas antaŭvidi la disdividon de mem Serbio. El Serbio devas disiĝi la Orienta Kosovo (Preŝevo, Bujanovco, Medveĝo) , Vojevodio, Sanĝako loĝata de muslimoj samkiel la areoj sudoriente de Serbio, loĝataj de bulgaroj.

Ekonomio

ALBANIO

Riĉa tero, malriĉa popolo

En la jaro 1922 la aŭstro Ernest Nowack desegnis la unuan geologian mapon de Albanio je skalo 1/200 000. Tiel li malkovris la areojn enhavantajn nafton en la regiono Vlore-Berat kaj la mineralojn en la regiono Mirdite-Puke.

Poste italaj kompanioj komencis ekspluati diversajn minejojn. Post la dua mondmilito la ŝtato kreis geologian servon kun vasta reto da laboratorioj, esplorantoj kaj institutoj kaj fondis la geologian fakultaton ĉe la tirana universitato.

Historie la unua mineralo ekspluatita en la lando estis bitumo. En Selenica troviĝas dumiljara minejo de tre bonkvalita bitumo, kiu estis uzata i. a. por pavimi la bulvarojn de eŭropaj ĉefurboj, kaj eĉ tiujn de Tokio kaj Pjongjango.

Dum la komunisma reĝimo mineraloj estis la ĉefa fonto por „trarompi la blokadon“ kaj certigi al si valuton. Tiuperiode la minejoj estis ege sed malzorge ekspluatitaj. Ekzemple estis venditaj ĉirkaŭ 33 milionoj da tunoj da kromio.

Post la jaro 1990 la stato de la minejoj estis mizera kaj preskaŭ ĉiuj fermiĝis. Nur dum la lastaj dek jaroj revekiĝis la intereso de la eksterlandaj kompanioj por ricevi minejajn koncesiojn, des pli ĉar jam ekzistas pretaj studoj pri la disvastiĝo de la mineraloj.

Elitaj mineraloj

Kromio troviĝas koncentrite en kelkaj areoj (Bulqize, Tropoje, Kukës, Lure kaj Pogradec) . Ĝi estas sufiĉe bonkvalita kaj la merkato estas certa. La transporto okazas tra la marhaveno de Durrës. Kie estas kromio troviĝas ankaŭ kupro. Koncentrite ĉefe en la nord-oriento de la lando, la kupraj rezervoj atingas 20 milionojn da tunoj. Kun la kupro estas ligita ankaŭ oro kaj arĝento, en kelkaj areoj (Gurth, Munelle, Qafe Bari) ĝis 5 gramoj je tuno.

Mineraloj por industrio kaj konstruado

Fakuloj taksas je 213 milionoj da tunoj la rezervojn de feronikelo (alojo de fero kaj nikelo) kaj je 103 milionoj da tunoj por nikelo-silikato. Post 20 jaroj da silento diversaj kompanioj (i. a. granda turka kompanio en Elbasan) ekinteresiĝas pri ĝi. Oni povas vidi la grandkvantajn stokojn de feronikelo en la eksa minejo de Prrenjas.

Aldoniĝas la kalkaj rokoj kaŝantaj bazajn konstrumaterialojn kiel kalko kaj cemento. Estas ĉirkaŭ 500 milionoj da tunoj tiaj. Tri eksterlandaj kompanioj jam ekspluatas ilin en la regiono inter Kruja kaj Laĉo. Dekoraciaj platoj kaj ŝtonoj troviĝas abunde tra la lando. Oni eĉ malkovris rarajn fosforeskajn ŝtonojn bonkvalitajn.

La karbo servas por pluraj termocentraloj konstruitaj kaj konstruataj. Aparte la karbo de Krraba kaj Memaliaj estas je kvalito ene de internaciaj normoj. Entute la aktualaj rezervoj atingas 712 milionojn da tunoj.

Granda prisana problemo

Ekestis danĝero pro radioaktiveco en kelkaj regionoj inkluzive de la ĉefurbo pro la grandaj stokoj de mineraloj kaj pro la uzado de radioaktiva fero por konstruado aĉetita malmultekoste en Ukrainio. La nivelo de la kancerofara radon-gaso du- ĝis tri-obliĝis. Rezulte pliiĝis la nombro de homoj trafitaj de kancero en Tirano, Koplík, Pogradec, Bajram Curr kaj aliaj minejaj areoj.

Likvaj resursoj

Albanio flosas sur nafto kaj dolĉa akvo. Laŭ UN-raporto, en la mondo 66 % de la akvo ekspluatiĝas por la agrikulturo, 20 % por familioj, 10 % por industrio kaj 4 % elvaporiĝas. En Albanio nur 20 % ekspluatiĝas, la cetero fluas en la maron.

Nafto troviĝas ne nur ene de la lando sed ankaŭ en la maro. Multaj kompanioj serĉas kaj ekspluatatas ĝin. La lastjara produktado estis ĉirkaŭ unu miliono da tunoj. Tio estas multe sub la plej alta cifero de 2, 1 milionoj atingita en la jaro 1974. Restas ankoraŭ rezervoj je 387 milionoj. En la suda regiono troviĝas ĉirkaŭ 320 milionoj da kubaj metroj da gaso.

Nudpiede sur ora tero

Kvankam la lando estas riĉa je mineraloj la vivnivelo estas ankoraŭ relative malalta. Ĉirkaŭ 80 % de la loĝantaro de la minejaj areoj estas malriĉaj. Pro tio plioftiĝas la protestoj kaj strikoj fare de ministoj kaj iliaj familioj. La kompanioj promesis investi pli ol 20 milionoj da eŭroj sed faris preskaŭ nenion.

En Bulqiza, kie iam agadis la itala kompanio Darfo kaj aktuale la rusa-aŭstra kompanio ACR (Albana Kromio) , pro malbonaj laborkondiĉoj estas mortakcidentitaj kelkdek ministoj. Fine de julio 2011 13 ministoj komencis malsatstriki en galerio je profundo de pli ol 1000 metroj. La loĝantoj blokadas la nacian vojon multajn horojn. Necesas la interveno de la ŝtataj organoj, sed ankaŭ ĉe altaj tieaj niveloj ekzistas notinda korupto.

Bardhyl SELIMI

Moderna vivo

KOMUNISMO

Murdoj memorigitaj

La 9an de septembro oni memorigis per solenaĵo en Tirano, Albanio, la 65an datrevenon de la kontraŭkomunista ribelo de Postriba, verŝajne la unua tia en orienta Eŭropo post la dua mondmilito.

Pro tio, ke la sekurecaj servoj anticipis la ribelon, kaj pro la interveno de la jugoslavia armeo (tiam Albanio kaj Jugoslavio estis intimaj amikoj) , la ribelo kolapsis. Mortpafitaj estis dekoj da homoj, arestitaj kaj poste kondamnitaj al longdaŭra enkarcerigo 1200 aliaj.

Kelkaj iamaj arestitoj kaj iliaj familianoj partoprenis la solenaĵon, kune kun politikistoj kaj aliaj eminentuloj.

Terorismo

Per videokonferenco parolis el Usono profesoro Sami Repishti, eksa ribelulo. Li substrekis la sangvenĝan instaliĝon de komunismo en Albanio, ties ŝtatan terorismon kaj la sekvan rezistadon flanke de patriotoj, kontraŭkomunistoj kaj intelektuloj.

La politikaj ŝanĝoj en 1990-1991 estiĝis sensange kaj senvenĝe, sed, aldonis Repishti, la ŝtatpotencon ankoraŭ posedas eksaj komunistoj kaj ties posteuloj. Ĉi-lastaj pliriĉiĝas ekonomie kaj politike plifortiĝas ĉirkaŭ maldekstraj partioj.

Estas ĝuste tiuj partioj, laŭ Repishti, kiuj jam de pluraj jaroj blokas en la albana parlamento reformojn necesajn por aligi la landon al EU.

Reĝimo

Eksaj persekutitoj kaj ties gefiloj ŝokiĝas – tiel Repishti – kiam ili renkontas en ŝtataj oficejoj, en la parlamento, siajn iamajn persekutintojn. Ekzemple la ĉefo de la socialistaj deputitoj estas eksa ministro pri internaj aferoj. Aliaj deputitoj aŭ eĉ ministroj estas gefiloj de eksaj altranguloj de la komunisma reĝimo.

Cetere la eksaj ĉefkomunistoj (ekzemple la lasta diktatoro, Ramiz Alia, kaj la vidvino de la diktatoro dum 46 jaroj, Enver Hoxha, se ne menciis centojn da aliaj) ankoraŭ ne pardonpetis pro la krimoj de la tiama reĝimo.

En Albanio, atentigis Repishti, oni ankoraŭ ne hontas pro la nomo „komunisto“, kontraste al Italio aŭ Germanio rilate „faŝisto“ aŭ „nazio“.

En la Nacia Historia Muzeo, kie okazis la solenaĵo, ekzistas ekde pluraj jaroj pavilono pri la genocido komunista. Ĝi estas ege vizitata ankaŭ de alilandaj turistoj.

Bardhyl SELIMI

La germanaj esploristoj pri la albana lingvo

Verkite de Xhelal Zeneĵi

La historio kaj la lingvo de albanoj, unu “nekonata tero” por la Okcidenta Eŭropo dum la Renesanco, fariĝis relative malfrue objekton de viva interesiĝado kaj scienca esplorado poste.

Tio komenciĝis per la studoj de filozofo kaj lingvisto germana Gotfried Leibnitz (1646-1716) kaj la sveda historiisto Hans Erich Tunmann, (1746-1778) ; profesoro en la universitato de Halle de Germanio.

Tunmann en sia verko “Esploraĵoj pri la historio de la popoloj de la Orienta Eŭropo” (1774) klopodas ekspliki la originon de albanoj kaj ties lingvon. Laŭ li, bazite sur la antikvaj greko-latinaj-bizantinaj dokumentoj, la mezepokaj albanoj estas la posteuloj aŭtoktonaj de iliroj.

Kiam la bibliotekisto de la Reĝa Biblioteko de Berlino, fondita de Akademio de Sciencoj de Prusio petis de Leibnitz sin prononci pri la deveno de la albana lingvo, Leibnitz sin egaĝis serioze pri la temo. Rezulte, laŭ tri liaj leteroj konataj nun kiel “albanaj leteroj” senditaj al la bibliotekisto, Leibnitz konsideras la albanan “lingvo de la antikvaj iliroj”. Li diras ke disponis pri libro kaj vortaro de la albana lingvo kiuj estis fakte “La Kristana Doktrino” (1618) de Pjeter Budi (albano, 1566-1622) kaj “La Vortaro Latina-albana” (“Dictionarium latino-epiroticum”) (1635) de Frang Bardhi (albano, 1606-1643) .

La granda filozofo uzadis la unua la metodojn de tiel nomata Kompara Lingvistiko.

La koncepto de la lingvofamilio indoeŭropa en ĝia embria formo lanĉiĝis unuafoje de William Jones ĉirkaŭ 80 jarojn post la leteroj de Leibnitz. Alia lingvisto germana Franz Bopp, (1791-1867) estis la unua kiu argumentigis ke la albana

membras al la indoeŭropa lingvofamilio, dum la filozofo kaj historiisto el 18a jc. Johann Gottfried Herder en sia verko "Ideoj pri la historio de la homaro", (1784-1791), parolas ankaŭ pri albanoj. "Ili estas tute ne fremdaj, sed antikva popolo de la eŭropa familio"

Laŭ Herder a) albanoj havas praan historian kaj b) albanoj devenas de iliroj.

En la jaro 1850 August Schleier pruvigis la indoeŭropan karakteron de la albana..

La albanologo Josef Ritter Xylander, (1794-1854) aŭtoras por la verko "La lingvo de albanoj" (Die Sprache der Albanesen oder Schkipëtaren, 1835). Tiutempe estis aperinta ankaŭ la ideo kiu neadis la aŭtoktonecon de albanoj, sekve ankaŭ ties iliran devenon., far la bizancaj aŭtoroj kiel Halkokondil kaj ekleziaj historiistoj Le-Quien kaj Asseman, kiuj konsideris albanojn alvenintojn dum la Mezepoko, la unua de Alba de Italio kaj la dua de Albania de Kaukazio.

La ĝenerala franca konsulo ĉe la paŝaolando de Janina, François Charles Henry Louis Pouqueville, (1770-1838), kuracisto, naturalisto, diplomato kaj historiisto, studis deapude la agadon de Ali Paŝao (albano) kaj kolektis multajn informojn pri albanoj.. Liaj libroj tiuteme estas "Vojaĝo tra Grekio" (6 volumoj, Parizo, 1820), "Historio de renaskiĝo de Grekio". Li ege admiras grekojn kaj iel denigras albanojn.

La angla reprezentanto en Janina estis William Martin Leak (1777-1860). Leak aŭtoras por la libro "Vojaĝo tra Norda Grekio" (Travels in Northern Greece, London, 1835).

Per ĉi tiuj verkoj la scienca eŭropa mondo akiris riĉan informacion pri Albanio kaj sin instigis por pluesplori tiun landon kaj ties historion.

Tra Albanio vojaĝis ankaŭ la romantika angla poeto George G. Byron, (1788-1824) kaj lia amiko John Hobhaus (1786-1869), samkiel la franca sciulo Ami Bue (1794-1881) kaj arkeologo Leon Heuzey.

En la dua kanzono de sia poemo "La elmigroj de Child Harold" (1812-1818) Byron aprecas la bravajn tradiciojn, kuraĝon, noblecon kaj bongastamon de albanoj.

Pri la problemo de la deveno de albanoj sin prononcis nur la reprezentantoj fremdaj en Janina. Pouqueville akceptas la fantastikan vidpunkton de la ekleziaj historiistoj dum Leak la kontraŭon.

Ekde la jaroj 40 de XIX jc ankaŭ Aŭstrio malfermis sian konsulejon en Janina.

En Frankfurt-sur-Mein, aperis (1935) la libro de la Bavaria lingvisto Xylander, kiu bazite sur 35 00 vortoj de la albana kontraŭis la tataran kaj kaŭkazian devenon de la albana, sin esprimante ke ĝi estas ja devene de la ilira kaj albanoj posteuloj de iliroj.

La germana albanologo Johan Georg von Hann (1811-1869) dum sia vojaĝo tra Albanio kaj Grekio, konatiĝis kun albanoj kaj arbriŝoj (albanoj elmigrintaj en Grekion

aŭ Italio) . Kiel konsulo de Aŭstrio en Janina en la jaro 1847 li havis eblecon sin dediĉi al la studado de la albana kaj albanoj. Li verkis "Albanaj studoj" (Albanesische Studien, Jena, 1954) . Pli poste li publikigis "Vojaĝo tra la regionoj de Drin kaj Vardar" (riveroj en Albanio kaj Makedonio) , (1867-1869) .

Hann skribas: "Ĉar albanoj ne estas slavoj kaj sin tute ne ligas kun kelkiu alia popolo konata, ĉar laŭ la fontoj disponeblaj ni ne konas ian enmigradon alian krom tiu slava, tiom granda por ke ĝi kreu grandan popolon, oni devas agnoski ke la hodiaŭaj albanoj estas praaj loĝantoj antaŭslavaj de ĉi tiu lando"

En la jaro 1868 Hann publikigas en Vieno sian verkon "Vojaĝo de Belgrado ĝis Selaniko", kie li reformuligas sian vidpunkton pri la aŭtoktoneco de albanoj: "Ni povas akcepti sendiskuteble ke la hodiaŭaj albanoj estas posteuloj de la pratempaj iliroj kaj epiranoj" (citita verko, p. 228) .

En la libro li priskribas la loĝatajn regionojn de albanoj en Kosovo, Makedonio kaj Serbio, agnoskas la dardan devenon de albanoj en tiuj regionoj. Tuj reagis negative en la jaro 1855 Nikokles de la universitato de Heidelberg, kiu daŭre defendis sian tezon pri la deveno de albanoj el Kaukazio.

La tezo de Nikokles ricevis sciencajn respondojn en la jaro 1857 de la germana historiisto J. Ph. Fallmerayer, kiu montris ĝian antisciencajn karakterojn. En sia verko en tri partoj "La albana elemento en Grekio, 1857", li priskribas la situacion pri la studoj ĉirkaŭ la deveno de albanoj, evidentante la dominantecon de la tezo pri ilia aŭtoktoneco rilate la aloktonecon. Falmerayer malkovras la altan vitalecon de la albana popolo, ĝian eksterordinaran rezistadon al la kultura kaj etna asimilado, konsiderante albanojn vivan ekzemplon de militema popolo survivinta eĉ spite de plej sovaĝaj stormoj de la historio.

Dum la jaroj 40 de XIX jc la albanan studis ankaŭ Franz Bopp (1791-1867) , profesoro en la universitato de Berlino kaj August Schleier (1821-1868) . En la jaro 1843 F. Bopp esploris la numeralojn kaj la pronomojn de la albana kaj deduktis el tio pri la indoeŭropa karaktero de ĝi, konfirmante la rezultaton de Xylander.

En la jaro 1850 August Schleier, konata kiel la fondinto de la geneologia arbo en la kompara indoeŭropa lingvistiko kaj rekonstruinto de la lingvo protoindoeŭropa estis pruvinta la indoeŭropan karakteron de la albana lokinte ĝin apud la greka.

Sed en la jaro 1855 Bopp faligis la vidpunkton de Schleier pri la intima ligo de la albana al la greka.

Je la mezo de XIX jc Teodor Mommsen verkis sian libron "Dialektoj de la Suda Italio" per kiu konkludis ke la mesapa ege ligiĝas al la ilira kaj la albana. En la libro "Historio de Romo", li konsideras la pratempajn epiranojn gvidataj de Pirro kiel "albanoj de pratempo".

La kulmino estis la apero de la etimologia vortaro de la albana far Gustav Meier (1850-1900) en la jaro 1891. Li malfermis la vojon al la historia fonetiko de la albana, en kies kampon kontribuis poste ankaŭ dano Holger Pedersen (1867-1953; aŭstro

Norbert Jokl (1877-1942) ; Eqrem Çabej (albano, 1908-1980) kaj hodiaŭaj esploristoj Erik Hempi, Martin Huldi, ka.

En la jaro 1877 en Germanio aperas la unua antropologia studo pri albanoj de Rudolf Virchov, (1821-1902) konata ankaŭ kiel fondinto de la ĉela patologio. Li publikigis en Berlino la laboraĵon “Pri la kraniologio de iliroj”.

La kraniojn de albanoj studitaj de li, Virhov konsideras iliraj.

Je la fino de XIX Helbig malkovris ke la homnomoj renkontitaj sur la mesapaj surskriboj en multaj kazoj estas preskaŭ tutsamaj al la iliraj antroponimoj de la orienta marbordo de Adriatiko.

Mesapoj estis neitalika gento kiuj estis elmigrintaj en la sudan Italion de Epiro kaj Ilirio. Ili estis ja branĉeto de la ilira trunko. Por deĉifri la mesapajn surskribojn, la sciuloj decidis uzadi la albanan. La germano S. Buge en la jaroj 90 de XIX jc. publikigis la laboraĵon “La Mesapa kaj la Albana” kie laŭ la fonetika evoluo ankaŭ en la leksiko, inter la lingvo de mesapoj praaj kaj hodiaŭa albana dedektas vicon de koincidoj.

Komence de XX jc. sekvis la studoj de A. fon Blumental, dum en la jaroj 60 de XX jc la studoj de O. Hass..

Paul Krechemer en sia ĉefverko “Enkonduko en la historio de la greka lingvo” (1896) , pritraktas la problemojn de la ilira en sia unueco kun la albana kaj la mesapa.

La germanaj sciencistoj similas al Prometeo kiu elitis la fajron de la vero el la mallumo, koncerne la albanajn studojn.

(Ĉi artikolo aperos sur la revuo “La Gazeto”)

Fragmento el la libro “Skanderbeg- hero de Albanujo”

Unua ĉapitro La stato de Albanujo antaŭ la apero de Skanderbeg.

Por bone kompreni la historion de Skanderbeg necesas iri je kelke da jaroj malantaŭen kaj koni la staton de Albanujo antaŭ la apero de nia heroo, t. e. kiam la turkoj subpremadis unuafoje Albanujon.

Post kiam la turkoj konkeris Makedonion kaj venkis la serbojn en la batalo apud Marica en la jaro 1362, ili komencis eniri Albanujon. Regis tiam la nordan Albanujon Balsha (Balša) la 1-a, kiu, post la morto de la serba caro, Stefan Dušan, deklaris sin sendependa kaj liberigis la supran Albanujon ĝis la rivero Drin. Poste li larĝigis la limon en Montenegro kunhelpate de siaj filoj Strazimir, Georgo kaj Balsha. Tiel la tuta norda Albanujo estis liberigita el la serba jugo.



Por havi nenian ligan kun la serboj, Balsha la 1-a kaj liaj filoj, kiuj estis ortodoksaj, fariĝis katolikoj kaj ilin sekvis multaj iliaj subuloj. Georgo la 1-a Balsha, kun helpo de siaj fratoj kaj de kelkaj princoj albanaj, finis la laboron komencitan de la maljuna Balsha: li konkeris Krujan, Duresin, Beratin, Vlora-n, Kanina-n, Gjirokastra-n kaj Kosturi-n; li larĝigis oriente sian regnon ĝis Makedonio, atingis norde Dalmation, sude Tesalonikon kaj estis la unua kaj la lasta reĝo alba kiu havis regnon kun suprediritaj limoj. Li sukcesis revivigi la ilirian regnon. Li mortis en la jaro 1370.



Albanaj princlandoj



Gjirokastra

Post la morto de Georgo la 1-a Balsha, la situacio ŝanĝiĝis kaj la albanoj estis devigataj sin defendi de ĉiuj flankoj, kontraŭ la turkoj oriente, la serboj kaj bosnianoj norde, kontraŭ la Venecianoj okcidente, la frankoj-napolanoj sude.

En 1385, kiam regis la sultano Murado la 1-a, la turka armeo de 40 000 militistoj komandita de veziro Hajredin eniris tra Makedonio Albanujon, konkeris Kosturi-n kaj Berati-n. En la kampo de Savra, proksime de Elbasan, okazis granda batalo, en kiu Balsha la 2-a, frato de Georgo la Balsha, kaj filo de Balsha la 1-a estis venkitaj kaj mortigitaj. Post kiam foriris la veziro Hajredin Pasha (Paŝa) , la princoj albanaj de Muzeqeja forpelis el Berati kaj Kosturi la turkajn garnizonojn de li lasitajn.

En 1389 Georgo la 2-a Balsha, Teodoro Muzaka, Georgo Kastrioti, la avo de Skanderbeg kaj kelkaj aliaj princoj albanaj kuniĝis kun la caro Lazaro de Serbujo, kiu organizis krucan militiron kontraŭ la sultano Murado la 1-a. La kruca armeo formata el serboj, bulgaroj, bosnianoj, albanoj, rumanoj, poloj kaj hungaroj renkontis la turkan armeon sur Kosovo polje (=Merla kampo) .



En la milita konsiliĝo, prezidita de la caro Lazaro, Georgo Kastrioti estis proponinta ataki la turkojn nokte, sed lia propono ne estis akceptita de aliaj konsilianoj opiniantaj, ke la malamiko povus sin savi de plena malvenko kaj tra la mallumo forkuri. Tiam ili atakis tage kaj estis plene venkitaj de la turkoj. Inter la mortintoj troviĝis ankaŭ la sultano Murado la 1-a, mem princo Lazaro kaj Teodoro la 2-a Muzaka.



Sultano Murado I (1362-1389)



Reĝo Lazaro Hrebreljanoviĉ (1329-1389)

Tiam komenciĝis la senĉesaj militoj inter la albanoj kaj la turkoj. La sultano Bajazid Jilderim, venĝe, atakis Albanujon ĉiufanke kaj inter la jaroj 1394-1396 konkeris ĝin tute, de Gjirokastra (Ĝirokastra) ĝis Shkodra (Ŝkodra) , de Kosturi ĝis Durrresi.



Sultano Bajazido II

Post la jaro 1402, kiam la sultano Bajazid estis venkita kaj kaptita de Timur-lenk, la albanoj ree ribeliĝis. Gjin (Ĝin) Zenevizi reprenis Gjirokastra-n; Andreo Muzaka Devolli-n kaj Myzeqeja-n; Nikit Thopia Kruja-n; la Balshoj kaj aliaj princoj forpelis la turkojn el iliaj teritorioj.



Kruja hodiaŭ

Balsha la 3-a, la lasta de tiu dinastio eminenta, post kiam li venkis Evrenos Paŝao-n en 1410, malakordiĝis kun la respubliko Venecia, kiu deklaris al li militon. Li metis sin tiel inter du fajroj kaj, post kiam li estis perdinta preskaŭ tutan regnon sian, mortis en la jaro 1422. Venecio konkeris Durrresi-n, Leshi-n, Ulqini-n, Tivari-n, Drishti-n kaj Shkodra-n. La turkoj, sub la sultano Mehmet la 1-a, okupis en 1415 Kruja-n, Vlora-n en 1417 kaj Kanina-n en 1420, kiujn li perdis ree okaze de alia ribelo.

Post kiam mortis Balsha la 3-a, malproksima kuzo lia, princo Stefano Cernoviĉi, kiu heredis parton de liaj posedaĵoj, regis Montenegro-n sen Ulqin kaj Tivar, kaj elektis sidejon en Zhabjak, proksime al la rivero Maraĉa; alia kuzo, Paŭlo Stres Balsha heredis la regionon inter Kruja kaj Leshi. Tiel, unu jaron post kiam suriris la tronon turkan sultano Murad la 2-a, estingiĝis la unua branĉo de la dinastio Balsha kune kun la regno, kiun ĝi sukcesis krei. Sed ĝia regno lasis impresojn, ne sole donante al Albanujo du grandajn liberigantojn kiel Balsha la 1-a kaj Georgo la 1-a, kiuj vekis en la koro de la nacio la sendependecan spiriton, la senton pri la forto de unueco kaj la sopiron al nacia libereco, sed ankaŭ tiu dinastio heredigis la Katolikan Eklezion, kiu kaŭzis la protektadon de la Papo kaj la kunhelpon de katolikaj fortoj de la Okcidento, en kiu metis sian esperon pli malfrue Skanderbeg komencante sian militan agadon mirindan.



Skanderbeg- portreto

Post la estingiĝo de la Balsha dinastio ŝajnis ke Albanujo estos definitive partigita inter Turkujo kaj Venecio. Tiam impreson pliiĝis la kontrakto farita inter tiuj ĉi potencoj en 1408, laŭ kiu Venecio prenis sur sin la devon pagi al Turkujo tributon pro la teritorioj albanaj, kiujn ĝi tenadis ĉe la marbordo. Al la albanoj, tiamaniere perfiditaj, restis sole akordiĝi kun Turkujo sub kondiĉoj kiom eble plej bonaj. Agnoskante la turkan suverenecon kaj pagante tributon, la albanoj estus povintaj ĝui pacon havante aŭtonomion. Estis konsilinde sekvi tion pro la tiama situacio, sed ilia karaktero fiero malpermesis al ili formeti armilojn, antaŭ ol ili estus militintaj sur honora kampo, ĝis kiam al ili estus rompita la glavo kaj elŝirita la batalforto.

La turka forto pliiĝis kaj ekatingis sian kulminon; la bizanca regno povis apenaŭ spiri; Serbujo estis lamigita; Bulgarujo estis subpremita; Makedonio kaj norda Grekujo sub turka jugo; sole la malgranda Albanujo, izolita, ne organizita, ekforirinta tiam el granda tumulto, preparis sin por forigi, paŝon post paŝo, la piedpremon de la teritorio al ĝi restinta. La turkoj, ĝis tiam aliloke okupitaj, ne havis tempon posedpreni definitive Albanujon, eble esperante, ke ili havas ĝin per la kontrakto subskribita kun Venecio. Sed inter la donaco per kontrakto kaj la konkero de la teritorio per milito estis profundegaĝo, por kies plenigo necesis pli ol sepdek jaroj kaj kiu neniam povis estis tute plenigita.

La ĝis ekstremoj furioza milito inter Albanujo kaj Turkujo komenciĝis en la jaro 1421 kiam la sultano Murad la 2-a, 18 jara, sin zonis per osmana glavo; ĝi estis ne egala milito inter netimigebla Goliato, bone nutrita kaj armita, kaj Davido malgranda sen manĝaĝo kaj sen sufiĉaj armiloj. La senespera milito estus lasita de kiu ajn kiel perdita, sed ne de la albanoj. Kiam aliaj nacioj pli fortaj, pli grandaj, pli organizitaj estis submetitaj de Turkujo kun malhonoriga facileco, la albanoj militis senĉese de 1385 ĝis 1479, preskaŭ tutan unu jarcenton, defendis la patrujan sendependecon kaj la honoron de siaj armiloj kontraŭ la sultanoj plej maltimemaj kiujn estis havinta Turkujo, kun kuraĝo kaj persisto mirinda.

Kiam la Balsha dinastio estingiĝis, ceteraj princoj albanaj akiris potencon, inter kiuj Johano Kastrioti, princo de Kruja, Mat kaj Vumenishti, en norda Albanujo, kaj en la malsupra la princo Arianit Komneni Thopija Golemi, princo de Kanina, Himara, Ĉermenika (Ĉermenika) kaj Shpati.



Kanina kastelo

La familio Kastrioti devenis el la vilaĝo nomata Kastria, kuŝanta en la regiono de Mati, aŭ, laŭ aliaj historiistoj, apud Mazreku en la monta regiono proksime de la rivero Drin. Johano Kastrioti estis edziĝinta kun Voisava, la filino de la princo Pollogu el la regiono inter Gostivari kaj Shkupi. Li havis de ŝi kvin filinojn: Mara-n, Vljaka-n, Angjelina-n, Jella-n kaj Mamica-n, kaj kvar filojn: Stanisha-n, Reposhi-n, Kostandini-n kaj Georgon, poste nomatan Skanderbeg.



La princlando de Kastriotoj, la emblemo kaj la stampilo de Skanderbeg

La kvar filinojn edzigis Johano Kastrioti kun la federitaj princoj: Mara-n kun Stefano Ĉernoviĉi, princo de Montenegro; Vljaka-n kun Gjin Muzaka; Angjelina-n kun Vladan Arianit Komnen Golemi, princo de Ĉermenika; Jella-n kun Paŭlo Stres Balsha, princo de la regiono inter Kruja kaj Leshi. Mamica edziniĝis kun Muzak Thopija, post kiam Skanderbeg revenis Albanujon. La fortikaĵoj de Johano Kastrioti estis: Kruja, la ĉefurbo de lia princlando, Petrela, proksime de Tirana, Petralba kaj Stelluzi en Mati kaj Sfetigrado en la regiono de supra Dibra.



Mamica Kastrioti

La milito inter Johano Kastrioti kaj la turkoj daŭris de 1407 ĝis 1430 kaj ŝajnas, ke Johano estis venkita almenaŭ trifoje de la turkoj kaj trifoje estis devigita paciĝi sub kondiĉoj malfacilaj; ŝajnas ankaŭ, ke li ribelis, kiam li estis akirinta iom da forto. Oni ne scias detale, kiaj estis la kondiĉoj de tiuj tri pacoj, sed ili proksimume estis jenaj:

- 1-e, Johano Kastrioti devis cedi la kvar filojn kiel garantiaĵon de sia fideleco kaj la sultano siaparte promesis, ke ili estos liberlasitaj, kiam Johano mortos, por okupi la tronon de princlando lia;
- 2-e, rezigni la tutan fortikaĵon de Sfetigrado;
- 3-e, doni la supran kaj malsupran Dibra-n, du regionojn norde de la lago de Ohri kun kelkaj privilegioj por la loĝantoj;
- 4-e, ofensiva kaj difensiva alianco, laŭ kiu Johano Kastrioti estis devigata sendi al la sultano armeon pri kia ajn milito, kiun li estus havonta kun la najbaroj;
- 5-e, agnoski la sultanon kiel ĉefsinjoron kaj pagi al li tributon.

Egalan sorton suferis la malsupra Albanujo, kie la dinastio Komnen Thopija estis devigata sin submeti al la sultano sub similaj malfacilaj kondiĉoj.

Inter la jaroj 1431- 1433 Ali Paŝao Evrenoz, uzante Kruja-n kiel bazon, dezertigis Albanujon de Shkodra ĝis Vlora. Unu jaron poste li forprenis Gjirokastra-n al princoj Zenevis. Laŭŝajne, la sorto de Albanujo estis decidita en tiu jaro, t. e. en 1434: preskaŭ la tuta Albanujo estis subpremita de la turkoj, krom kelkaj regionoj ĉe la marbordo, kiujn tenis Venecio. Laŭ la ŝajno, ĉar la realeco estis alia: la albanoj sub la ŝajna kvieteco kaŝis sian ribelspiriton kaj atendis sole la estron por ekkapti la armilojn, forpeli la fremdulojn barbarajn kaj reatingi la perditan liberecon.

La malsupra Albanujo donis signalon al la ribelo. Arianit Komneni, vokita de la siaj, kiuj sendis al li sciigon, ke la homoj estas pretaj por la ribelo, foriris el Adrianopolis, kie li estis internigita de la sultano, revenis en sian patrujon kaj igis sin ĉefo de la ribela militistaro kontraŭ Turkujo. Ali Paŝao Evrenoz estis komandanto de granda armeo turka, kiu marŝis kontraŭ la ribeluloj, sed li estis plene venkita de ili. Arianit Komneni gajnis pro tia venko grandan famon, sciigante Eŭropon, ke ekzistas kristana armeo, kiu povis venki la turkojn.

Post tiu venko la tuta malsupra Albanujo ekrevoluciiis. Ie oni sukcesis kaj malsukcesis, ĉar la diversaj princoj ne havis interakordon kaj ĉiu militis aparte. Por okazigi la unuiĝon de la fortoj, oni bezonis homon, kaj tia homo ne prokrastis aperi. Tiu estis Skanderbeg.



Skanderbeg dum la batalo- pentraĵo

Opinio pri nia movado: Kial tia Stagnado?

Ekde jam longe ĉe ni oni ne plu aranĝas E-kursojn kaj la varbado de la novaj membroj ne plu progresas. Plie, nia sekcio same kiel la tutlanda asocio ne renovigis sian leĝecon ĉe la juĝejo. Ni ne povas peti helpon ĉe la edukaj kaj neregistaraj organizaĵoj ĉar ni ne havas jam leĝan statuson.

Kial tia stagnado? Unue, pro ia neglegtado far ni ĉiuj, due pro enormaj elspezoj postulataj de la juĝejo, trie, pro nia maljuniĝo, sekve falo de entuziasmo necesita. , kiun kuraĝigis ankaŭ la impertenta indiferenteco far niaj edukaj ŝtataj organoj.

Certe estas neeble kaj senrezulte la aktivado de nur 1-3 personoj. (nome mi, Shaban Hasani kaj Gjergji Gusho) . Estas bezonata la partopreno de multaj samideanoj kiuj plenumas apartajn taskojn: instruado, propagando, eldonado, varbado, korespondado, ktp ĉiam laŭ kolegeca principo.

Mi mem baraktas delonge por pluteni viva nian sekcion, pretigante ĉiun duan monaton nian Bultenon, propagandante per la preso kaj radiotelevizio, respondante al la leteroj diversaj, partoprenante en eksterlandaj aktivecoj. Sed tio tute ne sufiĉas.

Kion faru do?

Unue, ni devas vekigi la malnovajn membrojn kiuj deĵoras ĉe diversaj laborejoj. Ekzemple, d-ro Saimir Beqiraj, instruas en la fakultato de la Naturaj Sciencoj. Iam li aktivis, eĉ kompilis la vortareton albana –esperanto pri botanikaj kaj zoologiaj terminoj. La profundigo en la studado, la edziĝo kaj patriĝo eble tenis lin fore de la movado nia. Li povas fondi studentan esperantistan grupon, sed ankaŭ varbi inter la profesoroj.

Zamir Gjurgji, estas alia iama aktivisto, nun deĵoranta ĉe la propaganda fako de la reĝa korto en Tirana. Li edziĝis, patriĝis kaj iom maljuniĝis sed certe estas ankoraŭ tre taŭga por nia movado.

Luan Jaupi en la urbo de Durrës, iam aktivis tre forte kaj altiris al nia movado plurdekojn da junaj esperantistoj. Antaŭ unu jaro lia filo mortakcidentis kaj tio ege seniluziigis lin. Tamen li pretas daŭre kunlabori.

Agim Peraj, nia iama asociestro, instruas en la urbo Shkoder. Li havas daŭre eblecojn por baki novajn esperantistojn en sia lernejo. Dume lia frato Bahri Peraj delonge laboras kaj loĝas en Grekio.

Nelaste la familio de la forpasita Zef Mjeda, la filinoj kaj nepino Klea, nun instruistino de la angla en Shkoder povus sendube multon kontribui.

Rita Permeti, nia sekretario, kvankam ekde pluraj jaroj handikapita, estas ĉiam entuziasma kaj ŝi povas pluteni la taskon de korespondado, librotenado ktp.

Nehat Sokoli el la urbo Kukes, iam instruis en gimanzio kaj fondis tie grupon de esperantistoj. Sed delonge li deĵoras en konstruado kiel ĥemia fakulo, aktuale en Kosovo kaj ne plu kontribuas al la movado.

Estas vico de aliaj relative junaj esperantistoj (25-30 jaraj) finstudintaj en Pollando kiel Uliam Binozi, Egli Brati, Gjergji Spaho, Matilda Sokoli, Fioralba Sadiku (Ceno) , Dorina Sadiku, Ereid Dhimitri ka kvankam geedzigitaj kaj enpostenitaj en diversaj institucioj ne edukaj povus kontribui notinde en la pluvigliĝo de nia enlanda movado.

Estas pluraj aliaj loĝantaj eksterlande, kiel Artur Doĉi, Ariel Myrazi, Elton Zaimi, ka kiuj povus same kontribui, des pli nun kiam ekzistas interreto.

Sed unue, laŭ mia opinio ni devas instigi studentojn ĉe iu fakultato por eklernu Esperanton kaj rekonstruu nian asocion kaj sekcion. Certe ili povus ankaŭ ilin leĝigi poste kaj daŭrigu la kunlaboron kun la eksterlandaj asocioj.

Ni esperu!

Bardhyl Selimi

“Eksplodo” de artikoloj kaj intervjuoj okaze de la eldono en Esperanto de la albana renoma romano “Hunda Haŭto” de Fatos Kongoli

(ĉerpita el Nordhungaria revio de esperantoj)

La 18an de aprilo 2012 almenaŭ 10 el la albanaj tagĵurnaloj de la ĉefurbo kaj pluraj televizioj informis pri la solenaĵo okazinta en Akademio de Sciencoj por la eldono ankaŭ en Esperanto de la verko de ties membro Fatos Kongoli.

Ĉikaze ĉeestis kaj spegulis la eventon kelkdekoj da ĵurnalistoj.

Jen kelkaj titoloj aperintaj tagon poste sur la ĉefaj tagĵurnaloj:

Kongoli kaj Kadare en la rara lingvo Esperanto

Atestoj pri Esperanto en Albanio. Dokumentoj el la jaro 1922

Tomasz Chmielik: Kadare kiel Kafka, la kialoj de mia elekto por la verko de Kadare "Palaco de la sonĝoj".

Fatos Kongoli: Miaj duboj pri Esperanto.

Bardhyl Selimi: Jarcento kun Esperanto en Albanio

Post Kongoli ankaŭ Kadare kaj Lleshanaku en la lingvo Esperanto

Fatos Kongoli: Mi surpriziĝis kiam oni proponis al mi la Esperantan Lingvon

La lingvo de Poŝtoj kaj Fervojoj

Bardhyl Selimi (Mezini) : Ni estas tradukantaj ankaŭ Kadare-n en la lingvo Esperanto



Momentoj tuj post la fino de solenaĵo. Fone vidiĝas ankaŭ Chmielik kaj Fatos Kongoli

Kaj nun pli detale unu el la intervjuoj

Ĵurnalo Panorama, 18an de aprilo, 2012

Post "Skanderbeg" en la jaro 1929, en Esperanto la romano de Kongoli.

La romano "Hunda Haŭto" estas tradukita en 7 diversajn lingvojn, sed en Esperanto?! Tamen tio okazis. Fatos Kongoli fariĝis la unua albana verkisto kiu estis tradukita en Esperanton, lingvo naskita danke al la deziro por servi kiel la komuna lingvo de la tuta mondo.

"Mi neniam imagis, ke iu el miaj verkoj tradukiĝus kaj eldoniĝus en la lingvo Esperanto. La iniciaton entreprenis la pola esperantisto Tomasz Chmielik, kiu estis leginta tion en la pola kaj helpe de albana esperantisto, Bardhyl Selimi, proponis al mi la tradukon, ĉar estis trovinta multon interesan en ĝi"- diris hieraŭ Kongoli en la renkontiĝo aranĝita okaze de prezentado de la tradukaĵo de lia romano "Hunda Haŭto", eldonita en la albana de "Toena".

Fatos Kongoli estas unu el la plej konataj eksterlande albanaj verkistoj. Liaj romanoj estas tradukitaj en multaj lingvoj. Kaj li daŭre verkas. Lastan aŭtunon li eldonis la romanon "Si-do-re-la".

Demandite ĉu li verkas novan romanon, li respondas: Romanoj ne povas eliri kiel la panbuloj el la panbakejo.



Sed nun lia plezuro plej lasta estas la eldono de la romano “Hunda Haŭto” en aparta lingvo, kiel Esperanto, kiu havas jam siajn adeptojn ankaŭ en Albanio.

La sekretario de la Albana Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Bardhyl Selimi, kontribuante en la tradukado de la romano de Kongoli, helpante la polan tradukiston Chmielik, rakontas al ni pri la nombro de esperantistoj en Albanio, pri la unua esperantisto nia, pri la klopodoj de la iama ministro de edukado Rexhep Mitrovica dum la jaroj 1920aj ks.

Kiom da esperantistoj estas en Albanio?

Ekde la jaro 1993 estas transpasintaj la lernokursojn 450 personoj. Multaj el ili estas jam studintaj eksterlande uzante Esperanton kiel laborlingvon, 20 el ili eĉ akiris bakalaŭrecon.

Ĉu tiu nombro estas tre malgranda?

Jes, tiel estas, se ni pripensas ke dum la jaroj 1920-aj la ministro de edukado, Rexhep Mitrovica, en la registaro de Xhaferr Ypi, iniciatis enkadre de kelkaj eŭropaj landoj por enkonduki Esperanton eĉ en la bazajn lernejojn, sed tiutempe la franca delegito vetois, opiniante ke la franca plu estos reganta.

Ekde la jaro 1929 estas eldonita la unua libro “Historio de Skanderbeg” originale en Esperanto de Cuk Simoni, dum en la jaro 1905 aperis la unua esperantisto Dom Lazer Shantoja.

Elstara esperantisto estis ankaŭ la unua albana kardinalo Mikel Koliqi, lia frato Vilhelm Kliqi, Mark Kakarriqi kaj Zef Kakarriqi kaj multaj aliaj personecoj, ekde la unuaj jaroj de la pasinta jarcento.

Do, se en la komenco de la lasta jarcento oni parolis pri personecoj hodiaŭ ŝajnas ke la intereso estas malpli granda, kial do?



Tio rimarkeblas ne nur en Albanio, sed ankaŭ en aliaj landoj kaj estas kompreneble pro problemoj renkotataj de esperantistoj. Plej multe temas pri la premo far grandpotencoj, aparte de tiuj angloparolantaj kaj pro konservatismo. La novaĵoj kaj nekonataĵoj malfacile alproprigas.

Ni subtenas Espeanton, ĉar ĝi estas ankaŭ helpilo por eklerni la aliajn lingvojn. Se la gelernanto lernos dum 4 monatoj Esperanton, li akiros pli rapide kaj pli firme sciojn pri aliaj fremdlingvoj, kiel la angla, germane ks.



Alia faktoro estas la estonto de Europunio. Ĝi bezonas komunan lingvon, sed ankoraŭ oni ne konsentas pri iu nacia lingvo pro naciaj ĵaluzoj, dume Esperanto estas funkcia lingvo, pretpreta kaj parolata de 2 milionoj da homoj en 120 landoj de la mondo. Kial oni ne ĉirkaŭbraku ĝin?

Sed la lingvo kaŝas post si ankaŭ kulturon aŭ tradicion, kion do Esperanto ne havas. Esperanto ne pretendas krei popolon en si mem, sed estas ia pontolingvo por helpi al homoj interkomunikiĝi kaj same protekti la naciajn lingvojn.



Kiam ni lernas fremdan lingvon, kune kun ĝi venas ankaŭ la kulturo de ties popolo al kiu ĝi apartenas. Nun multaj diversaj poploj “plendas” pro dominanteco de la angla, ĉar iliaj lingvoj estas damaĝigantaj pro misuzado de terminoj el la angla lingvo. Dum Esperanto ĝuste tion antaŭevitas.

Kie baziĝas Esperanto?



La duono de la vortoj estas jam internaciaj, tial vi komprenis multon el ili. Dum la cetera parto ne estas inventita, sed ĉerpita el apartaj lingvoj, ĝuste pli kurtaj, pli fonetikaj el la germane, slava, latina.

Certe granda parto elvenas el la latina, kiu estas la bazo de pluraj eŭropaj lingvoj, sed ĝi ne estas mem latina. Ĝi posedas tre simplan gramatikon kaj sistemon de sufiksoj kaj finaĵoj, per kiuj ĝi kreas novajn vortojn.

Do Esperanto apenaŭ estas nekonata lingvo, estas evidente kaj sen esceptoj.

Vi persone kiel kontaktiĝis kun Esperanto?



Mi kontaktiĝis kun Esperanto ekde la jaro 1961, kiam mi aĝis 16 jara. Ekzistis tiam kerno de esperantistoj en la Ministerio pri Konstruado kun konataj inĝenieroj, kiuj malfermis lernokursojn en universitato, ankaŭ en la domkulturo “Ali Kelmendi”.

Ĉu la reĝimo ne malpermesis tion?

La tiama registaro ne subtenis, sed ankaŭ ne malhelpis ĝin, ĉar ĝenerale albanoj ne havas fobion al la lingvoj. La totalisma reĝimo havis fobion al la homaj kontaktoj, fobion al la rilatoj kun la fremduloj, ĝi volis kontroli ĉiun ĉelon de la socio.

Mi sekvis lernokurson unufoje semajne, per malgranda broŝuro nomita “La Ŝlosilo de la lingvo”, dum nun estas multe de libroj kaj votaroj. Nur en interreto estas tiom da materialoj..

Ni revenu al la traduko de Kongoli, kiom malfacila estis ĝi?



Estis malfacila, sed Esperanto estas tre kapabla por trovi la ekvivalentajn vortojn, kio ne okazas en la naciaj lingvoj. La Ĉefan laboron faris Tomasz Chmielik kiu deziris kunfrontigi ĝin al la originalo en la albana kaj mi helpi lin pri tio. Ne estis simple traduki, sed pli facile ol en la aliaj lingvoj. Ĉiuj klasikaj verkoj, inkluzive la Biblion, Malnovan kaj Novan Testamon estas jam tradukitaj tre fidele en Esperanton.

Esperanto ne estas plu eksperimenta lingvo, sed funkcia.

Ĉu alvenos aliaj tradukoj?

Estas en proceso la traduko de “Palaco de sonĝoj” de Ismail Kadare KAJ same kompleta ciklo kun poeziaĵoj de Luljeta Lleshanaku kaj oni akiris permeson por traduki ankaŭ la romanon “La perdinto” de Fatos Kongoli.

(Enesperantigis Bardhyl Selimi – Pri la novaĵo informis Bardhyl Selimi, Germain Pirlot kaj Jolanta Kieres)

Rememorante amikon Jacques Tuinder

Jam ekde unu jaro (la 18-an de junio) , ne plu vivas Jacques Tuinder, elstara esperantisto, estro de bonfara vastekonata organizaĵo EVIDENTE, social laboristo kaj politika aktivisto ĉe Amnistio Internacia, ekumena militanto, bonega edzo kaj patro, modesta kaj honesta amiko de centoj kaj miloj homoj tra la mondo.

Mi ekkonatiĝis kun li en la maloportuna jaro 1997 por Albanio⁹¹, sed li estis alveninta unuafoje ĉi tie jaron antaŭe, danke al amikeco kun alia esperantisto albana el Shkoder, samideanon Zef Mjeda, eksa Honora Membro de UEA.

Li akompaniĝis de albana Mandelo, s-ro Osman Kazazi, pasiginta 45 jarojn en la prizonoj kaj largoj komunistaj. Jacques kaj ties kunlaborantoj nederlandaj eĉ trankoktadis en la hejmo de Osman, ie apud la granda bulvaro kaj urbocentro de Tirana. Kune ni vizitis en Shkoder la familion de Mjeda, kiun tiun tempon trafis apopleksio kaj apenaŭ povis leviĝi kaj babili. Zef kaj sia edzino Anjeza estis vizitinta antaŭe Nederlando (Landon de mirakloj- kiel sin esprimis Zef mem) kie, helpe de Jacques, Anjeze estis operaciiginta pro katarakto.



En la blindulejo de Tirana

La bonfara fondacio de Jacques, nomata “Evidente” (nederlande Zienderogen) helpadis longajn jarojn kromalie la Tutnacion Instituton de la Blindaj Infanoj, kie estis investite sufiĉe multe. Pro tio, en la jaro 2006 la prezidento de Respubliko honorigis lin per “Medalo de Honoro”, kio ege ĝojigis Jacques-n kaj siajn kunlaborantojn.

⁹¹ Pro tiel nomataj Ponzaj piramidoj la ŝtato kolapsis kaj oni bezonis la intervenon de 6500 fremdaj NATO-trupoj por stabiligi la situacion



Medalo de Honoro ricevita de Jacques

Inter ĉi lastaj estis ankaŭ Paul Lyef, optikisto vizitinta Albanio pli ol 30 fojojn ene de kelkaj jaroj, helpante per vizitoj kaj okulvitroj centojn da homoj ĉi tie. Estis ankaŭ sinjoro Hans Baumann kiu alportis en la Instituto envorte tutan Brajlan presejon kaj paperon per kio oni ekeldonis librojn kaj aliajn instruilojn por la blindaj gelernantoj. Estis ankaŭ inĝenieroj kiuj helpis por rekonstrui la lernejon, la dormejon, la muzikejon ka. kaj instali hejtadon kaj akvoprovizadon en la Instituto.

Du kunlaborantoj de la Instituto trejniĝis tri semajnojn en Nederlando por bontenadi la presejon. La projektoj estis pli ambiciaj: krei ene de Instituto centron de trejnado de instruistoj el la tuta lando kiuj havis en siaj klasejoj ankaŭ blindulojn.

Kune kun Jacques, pluraj eminentaj oftalmologoj kaj optikistoj vizitis la malriĉajn regionojn (en la kamparo) kaj neglektatajn instituciojn (prizonoj ks) ofertante sanhelpon al ties homoj. Ie en la nordo de la lando stariĝis ankaŭ domo por la mortontoj. Jacques alportis sanigilaron kaj necesajn ekipaĵojn ankaŭ al poliklinikoj de la urbo.

La kunlaborado daŭras ankaŭ hodiaŭ far la novaj gvidantoj de la fondacio.

Grava aspekto estis ankaŭ la subteno por la enlanda Esperanto-movado. En la Instituto mem kelkaj jaroj funkciadis la lernokurso de Esperanto. Jacques eĉ sponsoris la partoprenon de grupeto el Instituto al la UK Florencio 2006 kaj UK Roterdamo, 2008.

Mi korespondis kun Jacques kaj interŝanĝis kun li opiniojn pri diversaj temoj. Li rakontis pri sia agado en aliaj landoj kaj kontinentoj, kio ege ravigis min. Iutage, dum lia vizito ĉe mi, Jacques esprimis sian maltrankvilon pri la sorto de pluraj geknaboj jam adaptitaj de li en Maroko, Rumanio ka. Kio okazos al ili post mia morto- li diris malespere.

Iel mi komparis lin kun la nia granda virino, Patrino Tereza. Tiel sindonema, senlaca kaj persistema Jacques montris sin dum almenaŭ 45 jaroj de sia laboro surkampe de sociaj aferoj kaj fondacio Evidente.

Shaban Hasani

Intervjuoj

kun la sinjoro **Syrja Xhela,**

direktoro pri kulturo ĉe la tutmonda sidejo de Bektaŝioj en Tirana



Sinjoro Syrja Xhela en sia oficejo

Demando: Saluton, ĉu vi povas diri ion pri la historio de beктаŝismo ĝenerale kaj tiu en Albanio?

Syrja Xhela: Bektaŝismo ekaperis 800 jarojn antaŭe kiel ĉiuj ceteraj islamaj tarikatoj, aŭ sektoj, ĝi nomiĝis tiel laŭ la nomo de la ties fondinto, Haxhi (Hadĵi) Bektash Veliu. Ĉi lasta naskiĝis en Nishabur de Persio kaj ekde infanaĝo edukiĝis de grandaj iranaj mistikuloj.

La beктаŝismo bazigas sian doktrinon en misticismo aŭ tesavuf. En la islama mondo de antaŭ 800 jaroj, la misticismo tutegalis al la animpuriĝado el memoj kaj materiaj ekzistaĵoj, por ke oni proksimiĝu al la atento de Kreinto. La iamaj mistikuloj, sin bazigis en la sentenco: “ Min apenaŭ ampleksigas nek la ĉielo nek la tero. Min ampleksigas nur la koro de la obeema kredanto”.

Kvankam tiu doktrino aperis en Persio, Haxhi Bektaŝ disvolvis sian agadon religian en la provinco de Karayjyk en la azia Turkio. Hodiaŭ la loko nomiĝas Haxhi Bektaŝ ĉar tie troviĝas la muzeo kun lia tombo.

La beктаŝian kredon alportis en Albanio la derviŝoj de Haxhi Bektaŝ, ekde la 13-an jarcento.

En la jaro 1925 la parlamento de Turkio voĉdonis por la fermiĝo de tekeoj, tarikatoj kaj tyrboj. Ekde tiu tempo, la Monda Centro Bektaŝia, troviĝas en Tirana.

Demando: Kio rilate la preĝojn dumtage, monato kaj jaro?

Syrja Xhela: La bektaŝiaj kredantoj estas ege toleremaj rilate la preĝojn. Ilia doktrino baziĝas sur Kurano, sur la rekomendoj de profeto Muhamed samkiel sur la lecionoj de 12 imamoj. Ilia preĝado, plejparte okazas dufoje tage, je la tagiĝo kaj je la krepusko. Okaze de diversaj religiaj festotagoj aŭ grandaj eventoj, la nombro de la preĝoj malpligrandiĝas.

Demando: Ĉu vi disponas pri lernejoj, seminariejoj?

Syrja Xhelaj: Ni ne disponas nunpordun pri lernejoj kaj seminariejoj. Tamen por la klerikuloj funkciadas diversaj kvalifikigaj kursoj sur religia kampo, laŭ iu interna regularo. La bektaŝia literaturo disponas pri riĉa fonduso. Kvankam en la jaroj 1967- 1990 la religia praktiko estis laŭleĝe malpermesita kaj multaj raraj libroj kaj tutaj bibliotekoj bruliĝis, aŭ misuziĝis, postrestis miloj da ties ekzempleroj konservitaj en la arkivoj de la albana ŝtato. Plimulto el ili estas skribite en la persa, araba aŭ osmana, tial ili apenaŭ interesigas la hodiaŭan generacion de la kredantoj.

Demando: Ĉu vi starigis asociojn de volontuloj, de bonfarantoj, spitalojn?

Syrja Xhelaj: Ni ne disponas pri tiaj asocioj. Sed mem la maniero de organizado kaj funkciado de tekeoj sugestas al vi pri tia spirito. Dum la jarcentoj la tekeoj estas starigitaj en la montaro, for de la urbaj centroj. Ne nur la bektaŝiaj kredantoj sed ankaŭ gastoj el la ceteraj kredoj, estas trovintaj en tiuj tekeoj, je ĉeesto de bektaŝia patraro, panon, hejton kaj spiritan trankvilon. Laŭ la tradiciaj reguloj, en la tekeoj neniam kaj de neniu oni postulas rekompencan por la servo al la tranoktontoj.

Demando: Ĉu oni organizas pilgrimojn en sanktajn lokojn?

Syrja Xhela: Ĉiu bektaŝia tekeo, havas difinitan propran tagon, laŭ kalendaro de la Sankta Sidejo. Ĝenerale tie venadas la kredantoj loĝantaj pli proksime aŭ je familiaj aŭ spiritaj rilatoj al tiu tekeo.

Estas cetere konataj la pilgrimadoj en la tekeon de Sari Salltek en Kruja; en la tekeon de Frashër kaj Bubës, en Përmet; en la tekeon de Zall de Gjirokastër; en la tekeon “Reshat Dede Baba” en Saranda; en la tekeon de Kuzum Baba en Vlora; en la tekeon de Bllaca en Dibra; en la tekeon de Gjakova, ka.



Tekeo en Tirana

Se ni prikonsideras amasan pilgrimadon, ni devas mencii nepre la pilgrimadon en la monton de Tomorr, en la tombon kenotafa de Abaz Aliu. (la alteco de tiu montopino super la marnivelo atingas ĝis 2417 metrojn) .

La tago de tiu pilgrimado varias de 20-25-an de aŭgusto kaj la nombro de pilgrimantoj atingas ĝis 120 000. Ili venadas ne nur el Albanio mem, sed ankaŭ el Montenegro, Kosovo, Makedonio kaj aliaj landoj kie ekzistas albana diasporo.

Demando: Kia estas la hierarkio de via komunumo?

Syrja Xhela: La bektaŝia religia komunumo estas organizita surbaze de tekeo. La praktikantoj de tiu eklezio, partoprenas en ĉiu solenaĵo religia kaj diversaj festotagoj. Se la bektaŝia kredanto transferiĝas, li sin aligas al la plej proksima tekeo de la nova loĝloko.

La religia hierarkio havas jenan skemon: En Tirana troviĝas la Sankta Sidejo. Laŭstatute, ĝi estas ankaŭ la sidejo de la Monda Ĉefavo Bektaŝia.



La sidejo de la Ĉefavejo beктаšia en Tirana

Post la Sankta Sidejo laŭŝtupe sekvas la avejoj bekataŝiaj, ĉekape unu beктаšia avo kaj post ili sekvas la patrejoj, kie povas ekzisti Patro aŭ beктаشيا derviŝo.

Kiuj ajn rilato inter la patrejoj kaj avejoj estas regulita konforme al la statuto aprobite de la Monda Bektaŝia Kunveno.

Demando: Ĉu ekzistas aparta organiziĝo por la virinoj beктаŝiaj?

Syrja Xhela: La virinoj ĉe ni ĝuas la samajn religiajn rajtojn kiel la viroj. Neniam ili kovris sin per kaptuko aŭ vualo kaj historie, ili ĉeestis preter iliaj edzoj dum ĉiuj specoj de ekzercado de la religiaj ritoj.. Ankaŭ infanoj fariĝas parto de la diversaj aktivecoj en la tekeoj, sed ili ekzercas siajn rajtojn en religia partoprenado, nur post kiam ili atingas la 16-jariĝon.

Dankon!

Syrja Xhela: Ne dankinde, vi estas ĉiam bonvena!

Nehat Sokoli

Intervjuo de Bardhyl Selimi

kun sinjoro Agron Hoxha,

direktoro por rilatoj kun publiko ĉe Komitato de la Turalbana Islama Komunumo⁹²

⁹² En Albanio agadas ĉefe kvar religiaj komunumoj: Islama (sunita) komunumo, Bektaŝia komunumo, Katolika Komunumo kaj Ortodoksa komunumo



S-ro Agron Hoxha, direktoro pri rilatoj kun la publiko

Demando: Saluton, ĉu vi povas diri ion pri la historio de organiziĝo de la Albana Islama Komunumo?

Agron Hoxha: 100 jarojn antaŭe, okaze de Proklamiĝo de Sendependeco de Albanio la 28-an novembron 1912, salutparolis ankaŭ la unua ĉefmuftio de nia lando, sinjoro H. Vehbi Dibra (Agolli) organizonta nian Musliman Komunumon maje 1913.

En la jaro 1916 oni konstituigis La Altan Juĝejon (Konsilion) de Ŝeriato kaj lanĉis sian Statuton el 43 nenoj, komplete formiĝonta en la jaro 1923, en la Unua Muslima enlanda Kongreso.

En la jaro 1924 fondiĝis la unua Alta Medreseo en Tirana.

Postmilite, komunistoj klopodis per ĉiuj siaj fortoj limigi kaj definitive haltigi kiun ajn religian aktivecon. Tiel el la jaro 1967 ĝis la jaro 1990 ĉiuj moskeoj kaj la ceteraj muslimaj institucioj fermiĝis, detruigis aŭ alicelle uziĝis.

La 16-a de novembro 1990 notis la reviviĝon de la islama religio enlande kiam ĉe la Plomba Moskeo (kultura monumento, la sola el 36 moskeoj de Shkoder postrestinta) ariĝis miloj de kredantoj kiuj partoprenis la Alvokon de Ezano kaj Vendredan Preĝadon.



La Plomba Moskeo

Samtage, tie refondiĝis la Albana Islama Komunumo centre en Shkoder. En la jaro 1991 en Tirana oni okazigis la Islaman Kunvenon, aprobonta la statuton kaj elektonta koncernajn gvidantajn organojn.

Demando: Kiel oni aranĝas la preĝojn dum la semajno, monato kaj jaro?

Agron Hoxha: Krom individue hejme en la kvartalaj moskeoj aparte vendrede ĉirkaŭ la 13 venadas kreduloj por preĝi. Ili povas veni tie ankaŭ dum la semajno, ĉar la moskeoj estas malfermitaj longajn horojn.

Du monatoj antaŭ Ramadanano⁹³ kaj aparte dum Ramadanano la preĝoj estas pli intensaj kaj kolektivaj en la moskeoj, kie oni ĉi kaze prelegas pri diversaj temoj je intereso religia. Menciindas la preĝoj okaze de du grandaj festotagoj: Granda Bajramo kaj Kurban Bajramo.

Demando: Kio rilate la seminarioj, lernejoj kaj bibliotekoj?

Agron Hoxha: Ĉe Albana Islama Komunumo en Tirana oni aranĝas de fojo al fojo seminariojn du-tritagajn kie estas invititaj imamoj kaj muftioj el diversaj distriktoj por pritrakti kun ili certajn temojn. Ekzemple pri iliaj rilatoj al la publiko, pri la parolmaniero dum la predikado ks. Ĉi kaze oni utiligas la servojn de spertuloj el diversaj universitatoj enlandaj kaj fremdaj.

En la lando ekzistas jam 9 mezlernejoj el kiuj tri inkludas ankaŭ la elementan lernejojn, ĉiuj funkcias laŭ ŝtataj programoj kaj estas licenciitaj de ministerio pri edukado. Entute estas en ili 3000 gestudentoj.

⁹³ Ramadanano estas nomata la monato kiam oni fastas de frumateno ĝis vespero, inkluzive la akvotrinkon.



La domo de la sidejo de la Albana Islama Komunumo

La lernejoj administrigatas de direktorejo pri edukado ĉe Albana Islama Komunumo kaj havas ankaŭ studentan domon.

La instruproceso estiĝas en la albana lingvo kaj en kelkaj lernejoj ankaŭ en la angla. Preter la sciencaj kaj religiaj studobjektoj, oni instruas ankaŭ la araban kaj la turkan. Ĉirkaŭ 98 % de la abiturientoj plustudas en la altaj lernejoj.

En la akademia jaro 2011-2012 komencis sian vivon la unua islama universitato en Tirana nomata "Beder" licenciita de la ŝtato, kies diplomoj estas ekvivalentaj al la ceteraj licenciitaj de ŝtato universitatoj. Krom teologia fakultato tie oni studas ankaŭ pri juro, komunikado, fremdlingvoj ka. La universitato posedas ankaŭ kelkajn esplorcentrojn kiel tiun pri la Interreligia Dialogo, tiun pri Bektaŝiaj Studoj, tiun pri la Albana Lingvo kaj Beletro ka.



La domo de universitata Nova Luno Beder

Plej granda biblioteko estas je la dispono de tiu universitato, ekspektante ke ĝis la jarfino 2012 la nombro de la libroj atingu 100 000.

Ĉiuj aliaj mezlernejoj disponas pri siaj bibliotekoj modestaj, same en la centra oficejo de Islama Komunumo kaj parte ĉe la moskeoj mem.

Nia komunumo kunlaboras kun la neregistara Instituto de la Pensado kaj Civilizo Islama en Tirana kiu vaste agadas surkampe de teologio, edukado, eldonado kaj konferencoj je diversaj temaro. Ĝi disponas ankaŭ grandan bibliotekon.

Demando: Ĉu vi gvidas spitalojn, volontulajn asociojn, bonfarajn fondusojn?

Agron Hoxha: Ne, ni ankoraŭ ne kapablas starigi spitalojn. Sed okaze de naturaj katastrofoj kiel tertremoj, inundoj, troneĝado ktp ni helpas notinde. Ekzemple lastan severan vintron tutaj regionoj norde de la lando izoliĝis pro la neĝo. Ni kolektis varojn je valoro 200 000 eŭrojn kaj disdonis tiujn al la suferintaj familioj tie. Same antaŭ du jaroj okaze de fortaj inundoj en la regiono de Shkoder. Ni kunlaboras kun fremdaj bonfaraj fondusoj kiel estas tiuj de Qatar aganta delonge enlande por provizi la povrajn familiojn per nutrado, por certigi stipendiojn al orfoj ktp.

Demando: Kia estas la religia geografio, ĉu ekzistas sanktaj lokoj enlande, ĉu oni praktikas pilgrimojn?

Agron Hoxha: Laŭ la tutlanda censo antaŭ kelkaj monatoj rezultiĝas ke daŭre la muslimoj plimultas en Albanio. Ekz. en la distrikto de Diber nordoriente 92 % de la mem deklaritoj rezultiĝis muslimoj. Simile okazis en aliaj distriktoj, de nordoriento, meza kaj suda Albanio. Sude ekzistas notinda nombro da ŝiitoj (bektaŝioj) . Ni organizas karavanojn de pilgrimintoj al Makao.

Por ni, sunitoj, la sola sankta loko estas Makao. Do, enlande ne ekzistas alia sankta loko. Por bektaŝioj jes.

Demando: Kiel estas organizita via religia komunumo, kia estas ties hierarkio?

Agron Hoxha: Preskaŭ ĉiuj urbokvartaloj kaj vilaĝoj havas sian moskeon (entute 660 moskeoj) estrata de imamo. Ekzistas 6 regionoj en la lando – muftiejoj-estrataj de muftioj kiuj administras en sia regiono tutajn tieajn moskeojn.

La Albana Islama Komunumo elektas sian Ĝeneralan Konsilion kun tri estroj (pri Edukado, Kontrolo kaj Alvokoj) kiu siaflanke elektas la Plenumkomitaton kun la prezidanto, du vicprezidantoj kaj kancelieron. Ene de komitato estas kelkaj direktorejoj: pri edukado, posedaĵoj, kulturo, pres-medio, homfontoj, akvokoj, financoj, fremdaj rilatoj. Komitato sin ligas kun muftioj kaj ties muftiejoj.



Dr. Selim Muça, prezidanto de la albana myslima komunumo

Menciindas ke en ĉi komitato ekzistas la oficejo pri interreligia dialogo, unika por religiaj institucioj de Albanio.

Demando: Ĉu ekzistas ia organiziteco por virinoj?

Agron Hoxha: En la komitata sidejo estas aparta oficejo por la islama virino. Ĝi organizas diversaj aktivecojn religiajn, kulturajn kaj artismajn je utilo kaj intereso de virinoj.

Oni okazigas religiajn prelegojn por virinoj kaj knabinoj, strebantaj vigligi la kulturan vivon kaj plivastigi iliajn religiajn sciojn.

Same kunlabore kun la aliaj religiaj kaj ŝtataj institucioj aŭ neprofitdonaj organizaĵoj enlandaj kaj fremdaj oni disvolvas projektojn kaj agadojn fokusiĝantaj en la rolo kaj influo de la virinoj en familio kaj socio.

Demando: Kiel organiziĝas la infanoj, ĉu ekzistas por ili someraj tendaroj?

Agron Hoxha: Ni estas starigintaj intensajn kursojn ĉe moskeoj aŭ niaj kulturcentroj. La kursejoj administriĝas de muftinejoj koncernaj. Tie oni instruas Koranon, ties komentadon, la araban, kredon ka.

La kursoj estas periodikaj kaj aparte dum la someraj ferioj, por ĉiuj aĝogrupoj.

Dum la ferioj oni starigas ankaŭ tendarojn en diversaj urboj kunlabore kun la islamaj fondacioj agantaj delonge en lande sur la kultura kaj humanitara kampo.

Ĉiam oni strebas la nacian kaj religian edukiĝon de infanoj.

Dankon!

Agron Hoxha: ne dankinde. Estis plezuro por mi!

Rita Permeti

La polino

En nia ambasadejo en Varsovio alvenis pola civitanino. Komence, mi ne komprenis kial nia ŝoforo, tre laborema polo, kiu faris ankaŭ la taskon de gardisto, ankaŭ tiun de ĝardenisto, petis tion al mi, dum ŝin povus akcepti aliulo. Sed momente mi rememoris ke tiun tagon estis neniu el sekretarioj. Sekve mi devus akcepti ŝin. Certe la polino petus turisman vizon. Tiel diris al mi la ŝoforo, kiam mi demandis pri la kialo prezentita de lia kuncivitanino.

Mi malsupreniris en la salonon. Sinjorino je gaja kaj bela vizaĝo, ekstaris el la fotelo, kie ŝi atendis min kaj etendis sian manon salutante min albane. Tio vere surprizigis min, sed momente ekpensis ke eble ŝi estas lerninte nur kelkajn salutvortojn, kiel faras multaj homoj en tiaj kazoj, por respekti la akceptonton, aŭ por krei varman etoson por la rendevuo.

La polino estis blondulino kun okuloj samkoloraj al la ĉielo. Sed la bluo de ŝiaj okuloj havis ion apartan. Kvazaŭ kelkiu estis skribinta sur tiuj okuloj iun mesaĝon je bela griza koloro. Ŝi havis sveltan staturon kaj aspektis malpli ol kvindekjara. Mi mem apenaŭ eklernis la polan kaj malfacile klopodis peti ŝin en kiu lingvo ni interbabilus.

-Albane ni parolos- milde respondis ŝi ridetante sincerplene.

Tio mirigis min sed samtempe ege ĝojigis.

-Ĉu vi estas polino?- petis min por certiĝi.

-Jes- diris ŝi, ne forviŝante la rideton el la norda blanka vizaĝo.

-Mi scivolemas aŭdi en kiuj cirkonstancoj vi estas lerninta mian lingvon- aldonis mi.

-Mi estis ja “nuse” (junedzino) en Albanio- respondis ŝi dum ŝia rideto estis estingiĝinte kvazaŭ io forprenis tion perforte.

Mi riproĉis sin ke ne cerbumis antaŭe pri tio, sciante ke dum la epoko de florado de la socialisma tendaro, granda parto de la albanaj junuloj finstudintaj en la eksaj “frataj” komunismaj demokratioj, revenis hejmen edziĝintaj kun lokaj junulinoj, kiuj envere enamiĝis al ili. Eble trompis min ŝia vizaĝo kiu ŝajnigis ne aparteninta al tiu tempo. La perdo de la rideto, tiel neatendite, iel maltrankviligis min, sed la uzado de la albana termino, tiom albana “nuse”, iel varmigis kaj kuraĝigis min por daŭrigi pli libere la konversacion.

-Kaj nun vi loĝas ĉi tie?- petis mi duondubeme, sciinte ke la plimulto de tiuj geedziĝoj estis fininiĝintaj malbone aŭ tragike post kiam nia lando malamikiĝis kun la eksaj komunismaj membroj de socialisma tendaro kaj memizoliĝis. Tamen plurestis raraj geparoj savitaj al de tiu pesto kaj nun povus vivi ie ajn laŭvole.

-Mi rakontos- diris ŝi- Sed unue mi petus vin turisman vizon por mia filino, kiu estas ja la celo de mia vizito.

-Certe mi donos ĝin al vi- diris mi kaj demandis:-Mi petas, krom la kafo, kiel en la albanaj hejmoj, kion vi pludezirus?

-Kion ajn- diris ŝi, same kiel tion kutimas diri la albanaj gastoj.

Mi mendis kafon kaj trinkaĵojn. Poste mi elpoŝigis la cigaredojn kaj ofertis al ŝi unu. Ŝi prenis kaj diris ke ekfumus kiam alvenos la kafo. La kafo alvenis kaj mi ekbruligis la cigaredon al ŝi kaj por si. Ŝi enspiris la fumon iel soife kaj ekrakontis sian historion kiel jene.

Vera, tiun posttagmezon ekiris al la Publika Biblioteko troviĝanta en Palaco de Kulturo kaj Scienco en la placo Defilad. Tiu palaco estas plej granda kultura komplekso de la lando, donacite de Sovetia Rusio. Estis envere plezuro pasigi la liberan tempon tie.

La komenciĝo de majo en Varsovio estas kvazaŭ la sama de aprilo por iu mediteraneano. Do tio estas prokrastita printempo. Tamen la varmo komenciĝis kaj la homoj sin vestis malpeze, precipe la junuloj. Vera, tiun posttagmezon, estis vestinte blankan robon kun ruĝaj rozoj kaj malpezaj sandaloj ruĝaj. La maldikan zonon premis iomete larĝa strio, ankaŭ tiu ruĝa, el fajna ŝelo. Ŝi studis en la lasta jaro de la mezlernejo. Venontan semajnon, ŝi devus prelegi pri “La floroj de la pomo” de John Goldswarth. Traleginte unuspire la novelon kaj plorinte pro la sorto de Migena, ŝi bezonis aldonan materialon pri tiu skuiga dramo. Ŝi trovis tekston kun komentoj pri la okcidenta beletro kie oni parolis ankaŭ pri Goldswarth. Eksidis en libera loko kaj trafolumis la libron interese. Post iome, kelkiu eksidis ĉe ŝia maldekstra brako. Droninte en la legado, ŝi ne dediĉis intereson al la najbaro. Sed li mem, post duonhoro, eklevis la kapon el sia libro kaj turnis ĝin proksimiĝante al la knabino. Vera aŭdis ke kelkiu parolis al ŝi, preskaŭ murmurante (tio estis antaŭpostulo en publikaj bibliotekoj) per fremda pollingvo sed agrabla elparolo kaj diris:

- Pardonu min, mi petas. Mi stumblis ĉe iu esprimaĵo. Ĉu vi povas helpi min?

Vera kunfrapigis sian longajn okulharojn pro surprizeco kaj tuje kaptuniĝis al la direkto de la voĉo.

Pro proksimeco de la alies vizaĝo ŝiaj lipoj kvazaŭ tuŝis ĝin. Tio sentigis ŝin pli varma kaj la blanka membrano de ŝiaj facoj koloriĝis al purpuro. Tio kion ŝi ekvidis momente estis la bruna vizaĝo de la junulo kun nigraj okuloj kaj brovoj, rareco por sia blonda raso. Dume ŝi konsciiĝis, ridetis sincere kaj ekrigardis per belaj okuloj la libropaĝon, ĉe la loko kie la junulo fingromontris. Legis la

frazon, turnis sian rigardon baraktantan al li kaj eksplikis. La junulo tutan tempon gapante al ŝi, dankis kaj denove pardonpetis. Ŝi diris ke tute ne estis ĝenata kaj pretis denove helpi lin, se bezonote. Poste ŝi turniĝis al sia libro, sed ne plu kapabla koncentriĝi. Certe li estas fremdulo. De kie li estu? Kion li studas? Kaj pliaj aliaj demandoj naskiĝis ĉe ŝi. Sed ankaŭ la junulo ne plu estis trankvila. Tion oni povus konstati pro vanaj kaj nervozaj movoj liaj sur la libropagoj. Vera bruliĝis pro arda deziro, ke la fremda junulo denove petu ŝin. Kaj li petis ree, sed ne por vortoj kaj esprimoj nekonataj.

- Mi estas legante ion pri arkitekturo. Kaj vi?

Ŝi respondis pri kio ŝi estis legante. Ĉiam la paroloj estis mallaŭtaj kaj kun vizaĝoj proksimiĝintaj.

-Kiel vin nomas?- demandis li.

-Veronika- jam la ruĝo ne plu aperis en ŝia vizaĝo, dum la rideto pluestis.

-En mia lando tiu ĉi nomo diratas kurte Vera kaj signifas la duan sezonon de la jaro, do en la pola "lato"- diris li malpeze ridante.

-Tio plaĉas al mi. De kie vi estas?- demandis unuafoje ŝi, ĉar la kuraĝeco de la junulo estis transdonita ankaŭ al ŝi.

-Mi venas el Albanio kaj mia nomo estas Fatmir, aŭ kurte Miri. Mi studas en la antaŭlasta jaro de fakultato pri arkitekturo. Sed.. - li ion volis pludiri, kiam iu aĝulino petis ilin por silento. Ambaŭ gejunuloj pardonpetis, sed nevole, estis pretaj eksplodi pro juneca gajo, malfacile tenata. Devigite kaj pro silenta interkonsento ili ekstaris samtempe. Ŝi antaŭe, li post ŝi, ili iris por revenigi la librojn. Malsupreniris la ŝtuparon ne ĉesigante la ridon. Ŝajnis ke ili konis unu la alian delonge kaj ridadis pro feliĉeco. Eliris eksteren. La nokto estis freŝa kaj la urbo svarmis.

-Kie ni lasis?- demandis Fatmir.

- Kion?- petis Vera kaj denove ne eltenis la ridon

- La konversacion- diris li

Ŝi ŝultrogestis "mi ne scias" kaj metis la manplaton ĉe la lipoj kvazaŭ haltigu la neĉesantan gajecon.

-Oh, jes. Unue mi deziras ke ni parolu per "ci". Ĝenas ja tiu etiketo. Ĉu vi konsentas?

-Jes, mi konsentas.

- En kiu jaro ci studas, Vera?

-En la lasta jaro de gimnazio.

-Kion vi scias pri Albanio?

-Mi scias ke ĝi estas malgranda mediteranea lando kaj.. Ĉu bela?- subite pludemandis ŝi.

-Jes, tre bela- respondis Fatmir kaj tuj demandis- Kie estas via hejmo?

- En la kvartalo Zoliborz. N e fore de ĉi tie.

-Ĉu mi akompanu cin?

-Jes, ja.

-Ĉar ĝi estas proksime, ĉu ni piediru?

-Bone. Ni piediru- akceptis Vera tutvole.

Vera ne povis kompreni kial ŝi sentis sin tiel sekura kun tiu nekonato. Ili eliris en la straton Marŝalovska kaj ekiris. Dumvoje ŝi longe parolis. Faris multajn demandojn pri Albanio. Respondante, Fatmir, deziris ke la vojo neniam finiĝu. Sed diable, ili finfine alvenis en la strato Adam Mickieviĉ, sur kiu troviĝis la ties domo. Ili haltis. Malfacilaj silentaj momentoj.

Ĉu ni renkontiĝu morgaŭ?- pli ol demando tio estis peto far Fatmir.

-Bone- respondis per interna ĝojo ŝi.

-Do, samloke, samhore. Ĉu bone?

-Bone- respondis ridetante Vera.

Fatmir manpremis al ŝi kaj diris bonan nokton. Ne kisis ŝin. Disiĝis. Li atendis ĝis ŝi eniris kaj poste ekiris.

Morgaŭon, ambaŭ ili iris antaŭtempe al la loko. Sidis tie iel embarasite, nur unu horon. Ili ne povis studi pli. Tiel ankaŭ la postan tagon. La trian tagon ili ne iris al la palaco. Difinis rendezvuon en Centrum. Ĉe kafejo "Internacional".

Ili renkontiĝis ĝoje, kvazaŭ estis pasintaj multaj tagoj nevidante unu la alian.. Eniris en la kafejo kaj eksidis. Parolis pri la beletro, pri modo, pri filmoj kaj pri unu la alian. La glaciaĵoj degelis apenaŭ manĝitajn. Fatmir gapis al la ŝia vizaĝo kaj dum Vera rakontis, li haste interrompis ŝin:

- Atendu. Ĉu ci jam spektis la filmon "Grafo Monte Kristo"?

-Certe, mi spektis kaj plaĉis al mi. Kial?

-Tiel estas viaj lipoj- lia rigardo delonge kisis ŝiajn lipojn.

-Kiel? Mi ne komprenas cin- ekridis Vera, vidante lin mire, kvazaŭ li estis subite freneziĝinta.

-Kiel de Lia Amando, do, tio estas de Mercedes

Vera ridis tutanime kaj kaptis lian manon je signo de plezuro kaj amo.

Ili ekiris al la hejmo de Vera. Kiel ĉiam surpiede. Dumvoje Fatmir kaptis ŝian manon kaj neniam lasis ĝin. Kiam Vera, tutgaje kaj ne eltenante la ridadon, estis rakontante pri la fuŝaĵo farite tiutage de profesoro de matematiko, Fatmir, neatendite, iris antaŭen, kaptis ŝin milde ĉe ŝultroj kaj ekrigardis ŝin kvazaŭ li volus engluti, forkaptita de neeltenebla impeto je sopiro kaj amo. Ŝia kapo enfalis tuj sur lia kolo. Fatmir eksentis la kolon malsekiĝi pro varmaj larmoj. Kaptis permane tiun belan kapon plene transdonite, levis ĝin fronte al sia vizaĝo kaj kisis la larmojn. Kaj sentis ke ili ne estis ja larmoj. Estis perloj de feliĉeco. Tiam li ne plu eltenis sin. Liaj lipoj trovis ŝiajn lipojn brogantajn kaj kisis ilin.

Vera forte enamiĝis. Estis ia “coup de foundre”, kiel diras francoj. Granda amo, vera amo kiu frapis ŝin neatendite. La tuta mondo ŝia skuiĝis kaj ŝanĝiĝis, kiel ŝanĝiĝas la reliefo de iu tera surfaco, frapita de forta tertremo. Fatmir por ŝi ne estis ja la blua princo de fabeloj. Ŝi apenaŭ memoris sonĝi tiajn revojn. Li estis sufiĉe pli. Estis la tuta sia virga mondo. Mem sia feliĉeco. Nun ĉion ŝi faris facile kaj plezure. La patrino tuj komprenis tion okazinta al sia filino kaj demandis. Ŝi rakontis. Kiam la patrino kisis ŝin, Vera ekploris pro ĝojo kaj feliĉeco.

Fatmir fariĝis kara knabo de la hejmo. Tagon de lia ekveturado al Albanio por pasigi la somerajn feriojn, lin kondukis ĝis la stacidomo la tuta familio. Vera ploris kiel infano. Kelkfoje ili interparolis per telefono kaj interŝanĝis leterojn. Vera eklernis la albanan kaj atendis senpacience la revenon de Fatmir, sed ankaŭ la librojn kunportotaj de li pri tiu kara lingvo. Malgraŭ ke post monato pasigite familie ĉe Balta marbordo, ŝi pensis ke la ferioj tro longis.

La reveno de Fatmir feliĉigis tutan Varsovion. Tiel diris al li Vera karesante liajn nigrajn buklojn.

Vera aliĝis al Fakultato de Filologio kaj Beletro. Ili apenaŭ sentis kiel pasis tiu lernejar-jaro. Alvenis junio. Alvenis la ekzamenoj. Fatmir kvitiĝis kun ĉiuj ekzamenoj kaj sentis sin kvazaŭ li estis konkerinta la tutan mondon. Vera estis fininte pli frue kaj atendis tutangore. Kion ŝi ekspektis? Foriru al Albanio. La patrino iom hezitis. Kio okazos al ŝiaj studoj? Ankaŭ en Albanio estas tia altlernejo, dirintis la patro. Kaj decidite.

La disiĝo kun la proksimuloj kaŭzis dolorojn. Tamen la malĝojo apenaŭ sentiĝis en la dolĉa maro de la feliĉo.

Tiujn somerajn noktojn, dum la vojaĝo perŝipe, ili dormis malmulte. Ili staris surkaje kaj iliaj babiladoj neniam finiĝis. Vera, emociiĝinte, uzadis tutan fantazion por imagi la landon kien ŝi veturantas, kiu fariĝus ŝia dua patrio kaj de ŝiaj gefiloj.

lun nokton, kiam ĵus krepuskiĝis, Fatmir montris al ŝi du stelojn okcidente. Unu estis pli granda kaj la alia malpli granda. La distanco inter ili egaligis al unu brakendiĝo.

-Rigardu atente – diris Fatmir. Ili ĉiunokte proksimiĝas malrapide unu al la alia. Tiom malrapide, kvazaŭ oni ne povas dedekti ilian moviĝon. Kvazaŭ ili iras al kaŝita loko. Lun nokton ili renkontiĝas Nur ununokte. Poste denove disiĝas kaj malproksimiĝas tiel malrapide kaj tiel ne rimarkite, kiel ili proksimiĝis. Do, ĉiu el ili daŭrigas sian vojon.

Vera sentis tremon. Ŝi sekvis atenteme tiujn stelojn dum la vojaĝnoktoj. Envere tiel okazis. Sin kunpremante al Fatmir, ŝi diris malfortvoĉe:

-Kiom trista. Kial okazi tiel?

- Estas nur legendo. Ĉu ci volas ke mi rakontu?- diris Fatmir ĉirkaŭbrakante kaj kicante la liprandojn, kvazaŭ volis trankviligi aŭ protekti ŝin de io malbona.
- Ne, mi ne volas- diris Vera kaj sentis sin debile pro tiu nerakontita dramo.

Estis frumatene, kiam la ŝipo alproksimiĝis al Dures. La horizonto antaŭe estis arde oranĝkolora. Kvazaŭ la ŝipo ekdronus en flamenco. Kaj poste, kio okazus? Ŝajnis tio kiel fabela vojaĝo.

Jen, videbliĝis la montetoj kaj poste la urbo dronita en la maldika membrano de la aŭrora nebulo.

Vera estis konkerita de ia angora ĝojo. Estis enirante novan mondon. Novan vivon. Krom Fatmir, ĉio cetera estis nekonata por ŝi. La centro de ĉi tiu mondo por ŝi estis Fatmir. Kaj ŝi ne disiĝus de li. Alie estus perdinta.

-Jen la patrino kun la frato- diris Fatmir fingromontrante.

Avertite, ili venis atendadi.

Fatmir estis parolinte multe al ŝi pri siaj homoj, precipe pri patrino, debila punkto por li. La patro mankis. Li estis mortinta, kiam Fatmir estis ankoraŭ etulo. Li estis rakontinta same pri la familiaj moroj en Albanio kaj pri tiuj en lia hejmo.

-Kie estas la patrino? Demandis senpacience Vera.

-Jen ŝi, tiu altstatura virino, vestite per nigra kostumo. Ĉu ci vidas? Apude estas la frato. Tiu kun blua ĉemizo. Li ne similas al mi. Jen nun li kaplevis.

-Jes. Nun mi vidas ilin- diris emociplene Vera kaj levis la manon por saluti ilin. Vera, ne forlasis la brakon de Fatmir, kiu kun du pezaj valizoj enmane kaj kun okuloj direktitaj al la proksimuloj, antaŭenpaŝis tra la homamaso.

Alvenis antaŭ ilin kaj haltis dum konfuza momento krucigante la soifajn kaj sopirajn rigardojn.

-Ĉu la junedzino? Oh, mia trezoro!- kaj panjo Dilja kisis Vera-n kaj kunpremis al sia brusto kvazaŭ ŝi estus sia filino, kiun ekde jaroj ne estis vidinta. Poste, ne ellasante ŝin, foriĝis iomete malantaŭen kaj rigardante scivoleme kaj amece, kun okuloj larmoplenaj pro la ĝojo, ĉirkaŭbrakis kaj denove kisis ŝin. Karesante la orajn harojn de Vera, ŝi alparolis Fatmir:

-Miri, mia filo, kie vi trovis ĉi tiun belegan feinon? Ŝi estas envere tia, ĉu ne?

Vera komprenetis albane, sed en tiaj situacioj kaj rilatoj la homoj interkonsentiĝas tre bone. Pro la varmaj vortoj de ĉi tiu albana patrino kaj precipe pro la libera kaj sincera konduto ŝia, la fremda knabino tute liberiĝis kvazaŭ per ia sorĉo disde tiu ŝarĝo da konfuzigaj sentoj kio estas normala en tiaj kazoj. Ŝi tuj sin sentiĝis en la sino de konataj kaj karaj homoj.

La familio de Fatmir vivis en urbeto profunde de la lando. Tio kio ravigis Vera-n dum la vojaĝo al tiu urbeto, estis la krutaj montoj kaj impeta rivero kiu jen malsupreniris bruege kaj jen daŭrigis la vojon trankvile, murmurante nekonatan melodion por ŝi. La nova domo estis surtera kun kvar ejoj kaj korto. Estis ĝi modesta, sed oni rimarkis ke la homoj zorgis pri ties bontenado. Tiun nokton la domo pleniĝis je ĝojo kiel rarfoje. Panjo Dilja sidigis la junedzinon ĉe la tablokapo, kion ŝi meritis kiel alveninto de fora lando, klarigis ŝi kaj mem eksidis apude. La du etaj filinoj de la frato de Fatmir komence kondukis timemaj kaj hontis alproksimiĝi al la juna virino. Vera alparolis ilin per la albana nekonata al ili kaj petis ĉirkaŭbraki. Ili ruĝiĝis kaj ekridis tutnaive, poste alproksimiĝis kaj ĉirkaŭbrakis ŝin kaj ne plu volis disiĝi de ŝi.

-Aŭskultu vi ambaŭ- eldiris iom poste panjo Dilja, sin turnante al Vera kaj Fatmir. -Ni estas decidinte okazigi nuptofeston. Ni jam pretigis nin kaj okazigos ĝin venontan dimanĉon. Estos ankoraŭ semajno antaŭe por ke plenumi ion ajn vin bezonatan.

Fatmir rigardis al Vera kaj plena je seriozeco diris:

- Nu, kion ci dirus? Ĉu ci vidus albanan nuptofeston?

Vera malfermis la okulojn kaj kvazaŭ oni parolus pri alies nuptofesto, ĝojplena respondis:

- Jes!

Ĉiuj ekridis malmallice. Panjo Dilja kisis la frunton de Vera kaj diris:

-Longvivu, mia filino kaj herediĝu!

Nekompreninte ion el tiu bonaŭguro, ŝi ruĝiĝis kaj turniĝis al Fatmir, kuntirante la ŝultrojn. Por Fatmir estis iom malfacile traduki la terminon” “vi herediĝu” kaj klarigis ĝin per tuta frazo.

Estis aŭtenta albana nuptofesto. Mankis nur la junedzinaj proksimuloj. Vera vestite per blanka robo de junedzineco kaj kun vualo kaj krono surkape, sin rigardis en la spegulo kaj ne povis kredi al siaj okuloj.

-Laŭ nia moro, ci devas tristiĝi kaj plori- incitis ŝin Fatmir.

- Lasu la junedzinon ĝojiĝi. Ne plu estas la malnovaj tempoj- admonis lin panjo Dilja.

-Aŭskultu- daŭrigis Fatmir- Estas io serioza. Eĉ por ploradi oni uzas apartan terminon. Tio nomiĝas “katarim”.

-Mi ne povas- diradis Vera sincerplene kaj ridadis tutanime.

-Ridu, mia trezoro, estas ja via ĝojo unuavice.

La centra figuro de la nuptofesto estis la junedzino. Kanzonoj, dancoj kaj aŭguroj estis ĝuste por ŝi.

Fatmir devis tutan tempon traduki aŭ ekspliki al Vera la bonaŭgurojn kiu ne ĉesis kaj estis je diversaj formoj. La granda riĉeco de la albana en ĉi tiu kampo ege impresigis ŝin kiel studentinon de la filologio, same la facileco per kiu alparolintoj faris tion. Dum Fatmir kiel ĉiamfoje, ŝercante diris:

-Ne forgesu, ke tiel facile oni bonaŭguras kiel ankaŭ malbenas.

-El lingva vidpunkto tio ŝajnas al mi mirinda- diris ŝi serioze.

La nuptofesto plurestus en la feliĉa ĉielo de Vera unu el la plej kulminaj punktoj.

En la marborda urbo kie Fatmir estis enpostenigita kiel konstruinĝeniero, Vera eklaboris kiel instruistino de la rusa en elementa lernejo, ĉar ŝi posedis sufiĉe bone tiun lingvon. Ili instaligis en nova apartamento, kun du ĉambroj kaj unu kuirejo, preskaŭ en la urbocentro. Konfortiĝinte, ambaŭ decidis unuanime invite por kunloĝi panjon Dilja.

Ĉi lasta, kvankam estis forte ligita al sia hejmo, akceptis la proponon ĉar ege ŝatis la junedzinon. Cetere la loko ne estis tro fore, kiam ŝi sopirus pri propra hejmo povus iri tien kaj resti kiam da tempo ŝi volus, -klarigis ŝin Fatmir.

Ili sekvis normalan vivon. Sed plej bona estis la harmonio familia. Panjo Dila ege zorgema kaj amema klopodis ke la junedzino ne tro sentu la malĉeeston de siaj proksimuloj kaj sopiron por ili. Kiam ŝi eklernis ke la junedzino gravediĝis, ŝi ne plu lasis Vera-n okupiĝi pri familiaj aferoj kaj konsilis ŝin pri ĉio.

En la lernejo Vera amikiĝis kun Liliana, instruistino de biokemio. Ambaŭ ili trovis ĉe unu la alia multon komunan. Ili loĝis en la sama kvartalo kaj la vojon pasigis kune. Ĉiam surpiede. La lernejo ne estis for.

Iutage Vera, fininte la lecionojn, ekiris al la hejmo. Liliana mankis tiun tagon, ĉar ŝia filo havis febron. Vera transpasis la lernejan pordegon kaj eliris surstrate. Nur 20 metrojn poste, haltis apud ŝi unu “Gaz” veturilo. Ĉirkaŭ kvardekjara viro

elaŭtigiĝis kaj salutis ŝin ĝentile. Poste ridetante kvazaŭ ili konatiĝis delonge li demandis:

-Vi estas profesorino Veronika?

-Jes- respondis ŝi surprizite, sed pensante post momento ke li povus esti patro de iu lernanto, kaj ridetis bonvole aldonante- Mi estas- kaj atendis kion pludirus la nekonato.

Li estis bone vestite. Portis ruĝan kravaton kaj blankan ĉemizon. La hararo duongriza estis falinta kreante du golfetojn en ambaŭ fruntaj flankoj. Havis fortan, preskaŭ esplorigan rigardon. Tio igis Vera-n demeti tuj sian sinceran rigardon al li.

Li etendis la manon kaj diris:

-Ni prezentiĝu. Mi estas la patro de Vladimir. Kapo Alushi estas mia nomo.

Vera, ĉar ne memoris la lernanton menciitan, demandis:

-Pardonu min, en kiu klaso estas via filo?

-En la sesa-B- respondis li, ne lasante ankoraŭ la etan manon de Vera kiu nun estis komencanta ŝviti pro embarasiĝo.

-Mi ne instruas en tiu klaso. La instruisto de via filo estas Agim- diris ŝi, ĉiam ridetante kaj per ina instinkto flaris ian masklan severecon ĉe aliulo.

-Oh, pardonon profesorino- lasis la manon kaj amikece kaj mildece kaptis la brakon, kvazaŭ ege pentita, kaj diris:-Pro la eraro farite de mi mi estas devigita konduki vin ĝis la hejmo.

Vera tentis konstruistariĝi, sed li, ne lasante tempon al ŝi ekparoli, malfermis la aŭtilan pordon kaj parolante ruse diris tre ĝentile:

-Mi petas, ne maljesu. Mi sentas min kulpa. Eniru, mi petas.

Vera, nevole, subiĝis kaj eniris aŭtilon. Ankaŭ li eniris malantaŭe kun ŝi kaj pravigante ĉi tiun lastan agon, denove alparolis ŝin ruse:

-Mi ne scias, sed mi ne povas sidi orgojlece antaŭe, kiam malantaŭe estas kelkiu respektinda.

La nemotivita enaŭtiliĝo, troa insist de nekonato kaj precipe kunsido kun li apenaŭ tuŝebla, igis ŝin penti kaj senti sin iom maltrankvila. Ŝi malbenis sin pro enaŭtiliĝo kaj senpacience atendis elaŭtiliĝi. Dume ŝi rimarkis ke la ŝoforo veturigis tre malrapide.

-Certe, vi estas fremdulino. El kiu fratina respubliko?- demandis la mastro de la aŭtilo.

-El Pollando- kurte kaj senplezure respondis Vera albane.

- Malfeliĉe, mi ne havis la okazon vojaĝi iamfoje en via patrio. En Sovetunio jes. Tie mi finstudis. Sincere mi deziras gratuli vin pro via prefero paroli en mia lingvo. - lastan frazon li eldiris albane.

-Mi estas albana junedzino kaj volas paroli albane- diris intence Vera.

-Ĉu plaĉas al vi Albanio?- la alia klopodis varmigi iel la klimaton inter ili.

-Jes. Alie mi ne alvenus en Albanio- respondis ŝi, daŭrigante per neamika tonuso.

Eble pro tio, la babilado momente stagnis. Vera pentite pro sia neĝentila konduto, tentis korekti ĝin kaj demandis per pli milda tonuso:

- Kion vi finstudis?
- Mi finstudis Militistan Akademion- respondis li kaj ricevante impeton ĉar la babilado ekiras oportune, paŝis antaŭen. - Vi, certe finstudis pri filologio.
- Mi estis studante pri filologio, sed ne finis- respondis ŝi kaj senvole returniĝis ŝia karakteriza rideto. -De kie vi scias tion?
- Ĉar kelkiun, krom talento, devas helpi ankaŭ la profesio por asimili ene de malgranda tempo, malfacilan lingvon kiel albana. Ankoraŭfoje mi gratulas vin, profesorino Veronika- finis li.
- Dankon- diris Vera kaj ekrigardis antaŭen por vidi kie ili troviĝis. Post iome, ŝi fingromontris kaj diris ke ili troviĝas antaŭ ŝia domo - Haltigu ĉi tie- ordonis li la ŝoforon.

Kaj la aŭtilo haltis ĉirkaŭ 50 m antaŭ la domo. Li elaŭtiliĝis kaj diris al la ŝoforo malfermi la pordon al instruistino. Iris ĉe tiun flankon ankaŭ mem, manpremis kun Vera kaj ridetante diris ruse:

-Ankoraŭfoje mi petas vian pardonon sincere, se mi ĝenis vin. Mi sentas ke ankoraŭ estas devigita al vi. Tial, kiam ni renkontiĝos aliffoje, mi petas ekde nun ke vi ne koleriĝu kun mi. Same ne malhelpu min oferti mian servon por kiu ajn zorgo havote de vi. Ne forgesu mian nomon: Kapo Alushi.

Estis tio evidenta mesaĝo ke ĉi homo estis kelkiu en tiu urbo. Vera ree sentis ian konfuziĝon kaj debilecon antaŭ li.

Ŝi supreniris la ŝtuparon haste kaj samtiel eniris apartmenton. Salutis la bopatrinojn, metante la aĵojn kunportatajn en siajn lokojn. Panjo Dilja rimarkis la maltrankvilon ŝian malgraŭ ke Vera eniris kun rideto en la hejmo.

-E, filino mia, kiel pasigis la tagon hodiaŭ? Mi vidas vin iom malĝojan. Ĉu okazis io malagrable"- demandis la bopatrino tutzorge.

-Ne patrino, nenio okazis al mi. Nur mi estas iom laca hodiaŭ. La laboro kun gelernantoj.. - kaj Vera klopodis eskapi al tiu konversacio.

- Ne cerbumu tro multe kara filino. La infanoj tiel estas. Ili ne scias la zorgojn de la plenkreskuloj.

Panjo Dilja, parolante, surtavoligis la manĝotablon.

-Kion vi estas kuirinta hodiaŭ panjo?- demandis Vera, malrapide malŝargate de la lastaj impresoj de tiu tago.

-Hodiaŭ mi kuiris bakilon kun jogurto. Estas albana specialaĵo. Mi ne scias ĉu tio plaĉos al vi- kaj okulrigardis la junedzinon adome.

-Panjo, al mi plaĉas ĉiuj manĝaĵoj kuiritaj de vi. Sed kiam temas pri albana specialaĵo, certe tio pli multe plaĉas- diris Vera tutsincere helpante la bopatrino.

Post la tagmanĝo Vera diris al bopatrino ke ŝi devus iri al Liliana por demandi ŝin pri la malsano de ties filo.

-Iru, filino. Salutu ŝin je mia nomo kaj bonaŭguru resaniĝosn de filo baldaŭe.

Liliana ĝojiĝis, kiam alvenis Vera. Tutan tagon sola. La filo estis pliboniĝanta. Post kiam ili parolis pri multaj kozo, Vera ne povis elteni sin kaj rakontis kio okazis al ŝi tiun tagmezon. Nature, ŝi ne diris multajn detalojn. Tio kio interesis al ŝi estis ekscii ion plu pri tiu tipo. Liliana, aŭdinte pri kiu oni parolis, kuntiriĝis kaj diris:

-Estas la ĉefo de la Departemento de Internaj Aferoj- enspiris kaj aldonis- Atentu, Vera!

La lastan frazon "Atentu, Vera" ŝi kvazaŭ akcentigis aliel. Vera sentis la mallumon de io nekonata en tiu frazo.

-Kio estas la Departemento de Internaj Aferoj?- demandis ŝi insiste.

Liliana, malgraŭ estis iom malfacile por klarigi tion, diris kelkajn kozojn ĝenerale. La familio de la onklo de Liliana estis persekvita pro politikaj kaŭzoj. Ŝi povus ne esti eĉ instruistino pro tio, sed la familio de la patro kaj de la edzo estis kun "bona biografio" (bona politika konduto) . Tio estis la termino uzata por la homoj, kiujn la ŝtato, nunpurnun, konideris siajn, t. e, lojalajn kaj sekve tenis ilin apude.

-Mi konsilas al vi ne diru ion al Fatmir. Ĉar tiel la kozo pli komplikiĝas. Dume evitu tiun homon- tiel finis la babilon Liliana.

Vera ĉiam iris kaj revenis kun Liliana.

lutage ambaŭ ili eliris el magazeno kaj direktiĝis al la busstacio por reveni hejmen. Dume alproksimiĝis iu "Gaz" kiu haltis apud ili. La ŝoforo eligis sian kapon tra fenestro kaj ridetante alparolis ilin:

-Profesorinoj, vi povas enaŭtiliĝu. Mi kondukos kien ajn vi volas. Mi estas je via dispono.

-Multan dankon, sed ni atendas niajn amikinojn- tujrespondis Liliana.

La tonuso de Liliana estis tre klara kaj "Gaz" foriris.

-Ĉu vi vidis kiu estis?-demandis Liliana al Vera.

-Ŝajnis al mi la ŝoforo de tiu- diris iom konfuze Vera

-Jes, li estis- diris Liliana.

Alvenis la buso. Ili enbusiĝis kaj ne plu parolis pri tiu temo kvazaŭ ĝi estis ia tabuo. Ankaŭ la babilado pri aliaj kozoj estis iom pala.

La edzo de Liliana estis ordinara militisto. Post monato lin translokigis en iun urbon en la nordo, iom plialtigante la postenon. Foriris ankaŭ Liliana, disiĝante okullarme kun Vera. Vera ĉiam suspektis ke estis ŝi la kialo de ilia translokiĝo.

Nun Vera sin sentis soleca kaj neprotektita. Konsiderante la averton de Liliana, ŝi ne plu diris al Fatmir. La entrepreno, kie li laboris kiel konstruinĝeniero, estis konstruante cigaredfabrikon. La fabriko devus transdonati okaze de datreveno de proklamiĝo de sendependeco, tiel la laboro por ties konstruiĝo daŭris dek ses horoj tage. Fatmir eliris el la hejmo je la sepa matene kaj revenis je la oka vespere, eĉ pli malfrue. Li estis tiom okupita kaj lacigita, kiom ne restis tempo libera por pasigi tion kun Vera. Jen, ĵus ni finos la konstruiĝon de la fabriko kaj restos kune pli longe- diradis li.

Estis semajnokomenco kiam la lernejestro alvokis ŝin matene en sia oficejo kaj ridante kiel kutime diris:

-Vera, estas bona novaĵo por vi.

-Kio?- demandis ŝi mirmiene kaj plezure samtempe.

-Vi instruos ruslingvan kurson dufoje semajne, posttagmeze en iu grava institucio.

-Kie?

- En Departemento de Internaj Aferoj- respondis direktoro sincere ĝoja- Estas grupeto de oficiroj dezirantaj eklerni la rusan.

Subite, al Vera foriris la rido el la vizaĝo kaj pripensinte momente, diris:

-Direktoro, pli bone iru tie Agim. Mi sentas min laca. Vi ja konas ke mi estas graveda...

-Kion vi diras Vera? Tiu honoro estas por vi. Ne nur pro la graveco de institucio, sed ankaŭ pro pago. Oni pagos vin kromhorajn. Poste, Agim ne havas vian nivelon por instrui la rusan tie. Ne, ne, ne diskutu tion. Mi decidis por vi kaj transdonis vian nomon. Mi petas, ne embarasigu min- kaj la direktoro ne plu retiriĝis, nek volis argumentadi, se Vera ne interrompus lin, dirante:

-Bone, konsentite.

Definitive, Vera komprenis ke la homo je la nomo Kapo Alushi ne disiĝus de ŝi, tial, neatendite, ŝi decidis konvinkite. Okazu kio devus okazu, ŝi alfrontiĝus mem al ĉio. Ekbatulus. La bopatrino, en diversaj konversacioj pri la vivo, estis rakontinte al ŝi interesajn ekzemplojn de albanaj virinoj por la transpaso de malfacilaĵoj, por gardi la honoron kaj teni la donitan parolon iliaflanke. Komence ŝi malfacile komprenis profunde la terminojn "nder" (honor) kaj "besa" (donita parole) , ilian apartan signifon ĉe albanoj. Sed ŝi klariĝis pri ili dum la konversacioj kun Fatmir kaj Liliana.

Ŝi informis simple la edzon ke instruos lernokurson de la rusa dufoje semajne postagmeze. Li demandis kie, kaj ricevinte respondon diris:

- Tre bone, Vera. Tiel vi pasigas ankaŭ la tempon. Ĉu tio envere plaĉas vin?- rimarkante ke ŝi aspektis enpensiĝinta.
- -Ne, ne. Mi iros- respondis Vera ridetante sen plezuro.

La unua semajno de la kurso pasis bone. Entute estis ok personoj, el kiuj du inoj. La kurso okazadis mardojn kaj vendredojn, de la kvara horo ĝis la sesa postagmeze. Ĉiam venis kaj prenis ŝin iu "Gaz" por veturigi la kursejon. La samo venis por revenigi ŝin hejmen.

Ne estis "Gaz" de la ĉefo.

Iun vendredon, la duan vendredon ekde la komenciĝo de la kurso, fininte la lecionon, oficiro diris al ŝi prezentiĝi ĉe la ĉefo en la oficejo. Ŝi atendis tion kaj

ne tiom ŝokiĝis. La sama oficiro kondukis ŝin ĝis la oficejo en la dua etaĝo. Frapinte timeme sur la pordon la oficiro atendis iomete, poste malfermis la pordon kaj eniris. Honorigis sian superulon kaj tre ĝentile mansignis al Vera eniru. Vera eniris. La oficiro denove honorigis kaj eliris fermante la pordon. La ĉefo ekstartiĝis antaŭ ol eniri Vera. Kiam ŝi eniris, li gaja, eliris el sia sidloko kaj sin turnis al ŝi, etendis la manon varme kaj diris:

-Bonvenon, profesorino! Eksidu, mi petas- kaj manmotris fotelon.

Mem li eksidis en alia fotelo, simila, kontraŭ ŝi. Meze estis tableto, malalta. Vera sentis sin kiel en dornoj, sed ege klopodis por sin trankviligi kaj kuraĝigi.

- Ni povas alparoli unu al la alia per nomo kaj nin turnu per "ci"- la ĉefo ne demandis sed sugestis kun certa tonuso.
- -Vi jes- respondis Vera, kiu estis jam trankviliginte sin. - Dum mi ne povas fari tion. Mi ne povas alparoli al aŭtoritatulo kiel vi per "ci".

En siaj vortoj ne estis ia ironieco. Nur seriozeco.

-Nu bone. Kiel vi volas Vera. Sed mi pensas ke vi iutage faros tion ankaŭ vi, kiel mi jam faras nun. Bezonatas nur kuraĝo.

Vera komprenis klare en liaj paroloj la komenciĝon de neevitebla atako. Ne parolis. Serĉis nur kuraĝon en si.

-Kiel iras la kurso? Aŭ pli bone, kiel iras la kursanoj?- demandis li denove dume li premis butonon, instalite ĉe la rando de la tablo.

-Bone- respondis kurte Vera kaj dumtempe klopodis eviti la estingiĝon de malfacila rideto el sia vizaĝo.

La pordo malfermiĝis kaj eniris unu servantino kun pleto, kiun ŝi lasis surtable kaj poste retiriĝis kaj eliris senvorte. Sur la pleto estis du kafoglasetoj vaporantaj kaj du akvoglasoj. La estro, senvorte kaj ĝentile, servis al Vera. Poste prenis sian kafon kaj antaŭ ol ensorbi ĝin diris:

- Ĝojon, Vera! Dolĉan panon! Tiel bonaŭguras nun por diri ke ni pasigu bone kune.
- Ĝojon!- diris Vera kaj eksentis ke tiu masklo estis kapabla altrudi aliulojn.

Post glacia silento la ĉefo ensorbis ankoraŭfoje la kafon kaj tuj ekatakis:

-Vera, ni alpaŝu rekte. Ĉu vi scias kial ci estas ĉi tie?

Vera levis la ŝultrojn por vidi, sed ne povis elteni lian penetran rigardon. Rigardis sian glaseton kaj ŝajnigante sin trankvila diris:

- Por instrui la rusan al viaj subuloj.
- Kvankam mi estas certa ke ci scias, mi diras: tio estas la fasado. Ci estas ĉi tie por mi. Por esti sincera, ne estas mia kulpo. Mi ne sukcesis rezisti al via beleco. Ekde mi ekvidis cin, mia anĝelo diris ke niaj sortoj kruciĝos.

Dum li diris tiel, gapis per okuloj Vera-n, kiu kvankam pretigita por tio, eksentis timon penetri forte en tutan sian eston. Momente pripensiĝis kaj ne kuraĝante rigardi lin rekte al okuloj diris:

- Mi ne scias por vi, sed mi estas edzinigita kun edzo kiun mi ege amas.
- Tio tute ne gravas. Kontraŭe.. -diris li ne fininte la frazon.

Por Vera tio “kontraŭe” estis evidenta mesaĝo, estis tranĉilo kun du klingoj. Ŝi konsciiĝis kaj kun okuloj koncentritaj sur sia manhorloĝo diris: -Jam estas tro malfrue por mi. Mi petas ke ni fermu ĉi tie nian konversacion ĉi vespere.

Ĉe la ĉefo fiksiĝis ŝia lasta vorto “ĉi vespere” kaj je venkoĝojo ekstariĝis kaj diris “jes”. Ekstariĝis ankaŭ ŝi kaj tentis tentis iri al la pordo. Li kaptis ŝin permane, kaj ne atendente, tentis kisi ŝin. Vera ne reagis, sed ne turnis la kapon al li. Li eltiris malpeze ĉe sin kaj tentis kisi ŝin sur lipoj. Ŝi evitis tion. Tiam li kisis la vangon kaj la antaŭkolon tre volupte.

Vera retiriĝis, turniĝis al li, rigardis al okuloj kaj diris:

- Vi estas masklo, potenca kaj vi kapablas perforti min. Sed sciu ke vi atingis nenion.

Tiam li lasis ŝin kaj premis alian butonon ie. Eniris subite oficiro, kiun la ĉefo ordonis konduki la instruistaron hejmen kaj diris al ŝi bonan nokton. -Bonan nokton- diris interdente Vera kaj postsekvis la oficiron.

La novjaran feston oni celebris ĉe la frato de Fatmir. Al Vera ege impresis la granda graveco por tiu festo kaj la bona familia organiziĝo dediĉite al tio. La festo daŭris du-tri tagojn kun familiaj vizitoj ĉe najbaroj kaj ĉe parenkaro. Denove tiuj karakterizaj bonaĝuroj. Ĉi tiujn ŝi notis en kajero, simple pro lingva intereso. Kvankam oni ne volis okupigi ŝin per hejmaj taskoj pro ŝia gravedeco, Vera ekkuiradis. Ŝi scivolemigis pri flano,

pri kaĉo kaj precipe pri baklava. Neniam ŝi ne bongustis tian meleagron kiel ĉi tie.

La trian tagon Fatmir foriris. Vera restis por pasigi la januarajn lerneajn feriojn kune kun panjo Dilja, la bofratino kaj du etaj nevinoj.

La du semajnoj de feriado jam flugis, malgraŭ ke Vera ne volis tion. Kiom foje ŝi memoris pri la lernejo, ekstristiĝis.

Sed la lecionoj rekomenciĝis. Ankaŭ la lernokurso de la rusa. Kiel ekspektite, ŝin alvokis denove al la oficejo de la ĉefo.

- Vera mi havis grandan sopiron pri vi. Apenaŭ mi atendis ke vi revenudiris Kapo Alushi kaj ĉirkaŭbrakis kaj kisis ŝin volupte.

Poste li demandis ŝin kiel pasigis la feriojn, ĉu ŝi jam ripozis sufiĉe ktp. Vera respondis kurte, sed dume ĝentile, aŭ iel konfuzite pro tiu malfacila situacio, ankaŭ ŝi demandis lin kiel pasigis la Novjaran feston. Tiun ioman babilon ŝi koncentrigis ĉe la majesteco de ĉi tiu familia festo en Albanio kaj multvarieco de bonaŭguroj kiuj envere impresis ŝin multe. Kiel ajn la renkontiĝo notis varmajn momentojn por Kapo Alushi.

- -Vera, mi pensas ke ni renkontiĝu ĉisemajne. Ĉio aranĝitos kiel eble plej bone- eliris li tie kie al li dolorigis, frotante la manon de Vera.

Vera, neatendite, ekstartiĝis, malfermis la grandan surtuton kaj montris al li sian ventron.

Nun rimarkis Kapo Alushi ke ŝi envere havis kreskintan ventron. Eble la dikaj vintraj vestoj estis kaŝintaj tion ĉe Vera.

-Vidu kiel mi estas- diris ŝi- havu paciencon ĝis mi naskos bebon kaj...poste.. Mi petas.

Kapo Alushi, senluziigite pri kio li estis pretigite, sed ankaŭ konvinkite ke li atingis ja sian celon, pravigis ŝin, kisis kaj poste ili disiĝis.

La naskigo de Vera ŝanĝis la monotonan fluon en la familia vivo. Ne estis sciite kiu estis pli ĝoja. Panjo Dilja ĝojiĝis same kiel tagon de la alveno de Vera. Al Vera turniĝis la perdita feliĉo. Ŝi estis enteninta en sia ventronaŭ monatojn tiun kiu nun estis jam ekster ŝi. Rigardis tiun malfortikan kreitaĵon amece sed ankaŭ mire kvazaŭ ŝi ne kredus ke mem estis la ties kreinto. Ĉu vere mi estas nun patrino?

La lastan monaton de la gravedperiodo Vera pasigis la tempon kune kun Fatmir, kiu estis liberigita de troa ŝarĝo de la laboraĵoj. Nun Fatmir iris

kaj revenis, kvazaŭ flugis, de hospitalo al la hejmo. Ofte lin akompanis la patrino. Vera volis filinon kaj tiel naskiĝis. La etulino havis la brunan koloron de Fatmir. Samtiel ankaŭ la hararo similis. La okuloj estis kiel tiuj de Vera, sed iom pli bluaj.

Elhospitaliĝinte, la bopatrino venigis ŝin hejmen per taksio. Fatmir pretigis la lulilo-liton, kelkajn vestojn kaj malsupreniris por atendi. Alveninte ĉe la pordosojlo, panjo Dilja haltigis ilin. Malfermis la pordon, sed ne eniris. Eniros la unua la nova gasto, tiom ekspektita kaj prenis la etulinon, tenante ŝin enmane atenteme, tuŝigis ties piedojn surteren kaj diris:

-Eniru. Venu, estu bonŝanca kaj alportu filon!

-E, ĉu mi ne diris vin ke vi faru filon por la panjo?!- diris Fatmir al Vera okulumante.

Poste turnis sin al la patrino kaj diris:- Panjo, mia edzino ne obeis min, sed ne zorgu, alian fojon mi decidus. Post jaro vi karesos ankaŭ filon.

-La veron dirante mi ege dezirus filon, tamen la junedzino alportis ĉi tiun belegan knabinon kaj mi ne scias kion diri. - kaj panjo Dilja daŭrigis luli la bebon ĉe sin, kantante belan lulkanton.

--Atendu- diris Vera al Fatmir. - Mi volas aŭskulti kiel kantas la panjo. Mi neniam aŭdis tiel mirindan kozon.

-Pripensu la nomon- diris panjo Dilja.

Panjo, mi fakte estas pensinta tion ekde kiam mi estis en la dua monato de gravedperiodo- diris Vera kaj aldonis- Se tio ne plaĉos al vi, trovu alian nomon.

-Diru- senpaevience insistis panjo Dilja.

-Besa⁹⁴- diris unubuŝe ambaŭ Fatmir kaj Vera.

-Oh, miaj trezoroj. Vi ege kontentigis min. Mi supozis ke temus pri unu el la novaj nomoj elpensataj hodiaŭ. Ne estas problemo ke mi malŝatas ilin, sed kelkaj el ili malfacile prononciĝas.

Vera telefonis al gepatroj en Varsovio. Ankaŭ ili ege ĝojiĝis fariĝante geavoj unuafoje. Kiam ili ekvidus sian nepinon? Estis fruaprilo. Ili diskutis pri la ebleco de vojaĝo tiun someron, sed estis iom danĝera vojaĝi kun

⁹⁴ Besa estas specifa albana vorto pri la donita parolo

freŝbebo. Kaj konsentiĝis por la venonta jaro. Ni pacienkos, kion faru alie, diris la patrino de Vera.

Julie Fatmir ricevis la jaran ripozpermeson. Ili iradis al plaĝo. Panjo Dilja restis hejme kun la eta Besa. Sed ofte ili venigis ankaŭ panjon kun bebo. Ambaŭ ili restis subombre kaj rare eniris maron. Estis plezuro kiam Besa eniris maron. Ŝi kunfrapigis sian piedetojn kaj manetojn kaj ellasis kelkajn mirindajn sonojn per kiuj certe esprimis sian kontenton. Jen, ankoraŭ iomete, ŝi komencos kanti kiel turtulino- diris panjo Dilja.

Fatmir, promene tra la plaĝo, renkontis hazarde Hodo Mati-n. Ili estis iam najbaroj longajn jarojn. Panjo Dilja konsideris fratino la patrino de Hodo. Ĉi lasta estis dek jarojn pli aĝa ol Fatmir. Lastan jaron de la milito, estante apenaŭ 14 jaraĝa, li iĝis partizano. Laboris en la kompartia komitato de sia distrikto, kaj poste oni sendis lin eksterlanden por studado. Nun li deĵoris en la Ministerio de Internaj Aferoj. Lia posteno estis altranga tie. Ankaŭ li ripozis familie en la Ripozdomo de Ministerio. Fatmir invitis lin por viziti en sia hejmo. Nepre ni venos-diris li- ĉar ege mi sopiras por panjo Dilja. Ili venis kaj panjo Dilja akceptis lin kvazaŭ sian filon kaj junedzinon. Ili restis ĝis malfrue vespere, varme babilante. Ankaŭ Vera kiu ne konis ilin, estis ĝoja pro tiu vizito.

Alvenis la septembro kaj Vera rekomencis sian laboron. Same rekomenciĝis la lernokurso de la rusa. Ofte Vera malbenis tiun lingvon kaj sin ke ŝi estis lerninta ĝin.

Alvenis ankaŭ la momento de renkontiĝo. Renkontiĝo, kiun longajn monatojn, kiomfoje ŝi rememoris tiomfoje tremiĝis. Ne estis tio nigra makulo en nova vivo ĵus komencita, estis ja nigra abismo kiu volus engluti ŝin. Nun ŝi havis ankaŭ infanon, anĝelon, pro kiu ŝi pretis oferi ĉion. Ĉu ŝi transdoniĝu?

Kapo Alushi, ĝoja ke finfine alvenis la tiom dezirata momento, ĉirkaŭbrakis ŝin kaj post kiam demandis pri la infano kaj ripozoj, diris ke la nasko igis ŝin ankoraŭ pli bela. Post kiam demandis ankaŭ pri aliaj vanaj aferoj, diris:

-Ĉu ni pretpretas?

-Jes- respondis vundvoĉe Vera.

-Nu, dimanĉon je la deka antaŭtagmeze vi iros ĉi tien- diris li enmanigante paperpecon kie estis notite la adreso.

Li klarigis la pozicion de la domo kaj manieron por iri tien. Estis domego ankoraŭ ne finkonstruite kaj neloĝite.

En la dua etaĝo ĉe iu el enirejoj estis jam finite kaj meblita apartamento. Kompreneble, ĝi estis je la dispono de la Departemento. La ĉefo, post kiam Vera klarigis pri la loko kaj sin esprimis preta iri tien, enmanigis ŝlosilon kaj ripetis ankoraŭfoje ke ŝi iru tien je la deka matene kaj atendu lin. Li ne malfruiĝus pli ol dek minutojn. Ili restus tie ĝis la dekdua aŭ maksimume ĝis la dektria.

-Kion mi diru al mia edzo?- demandis duonvoĉe Vera.

-Via edzo ne estos diamnĉe ĉi tie. Li iros kun sia direktoro en la urbo B por iu problemo de la entrepreno. Ne zorgu, ĉio estas jam aranĝite. Al la bopatrino diru ke vi havas lernokurson kun tiuj de la Departemento, ĉar marde tio ne okazos, pro ties okupiteco. Konsentite?

-Konsentite- diris maldolĉe Vera ne vidante lin al la okuloj.

Li kisis malpeze ĉe la liporando kaj disiĝis.

Sabate vespere Fatmir diris ke morgaŭon li foriros en la urbo B. Vera demandis pri la kialo kaj li klarigis. Dimanĉe, ekde la sesa matene alvenis la direktoro de la entrepreno per aŭtilo kaj ili forveturis. Je la naŭa, post kiam diris al bopatrino ke ŝi devus iri al la lernokurso, Vera eliris la hejmon. Enbusiĝis kaj veturis ĝis la loko antaŭsciite. Elbusiĝis kaj paŝis iom da vojo. Je kvin minutoj antaŭ la deka ŝi troviĝis antaŭ la domo enirejo. Supreniris la ŝtuparon ĝis la dua etaĝo, malfermis la pordon de apartamento, eniris ĝin kaj fermis la pordon per ŝlosilo. Ĝi estis apartamento kun du ejoj (dormoĉambro kaj sidĉambro) , banejo kaj malgranda koridoro. La dormoĉambro havis duoblan liton ekipite per ĉio bezonata por dormi. Vera eksidis sur seĝo en la sidĉambro kaj atendis. Ĉe la spegulo de la glasoŝranko, kontraŭe, nevole ŝi vidis sian vizaĝon. Preskaŭ timiĝis. Estis tio nekonata vizaĝo kun kelkaj senvivaj koloroj. Ekstariĝis kaj moviĝis tra la ĉambro kapklinite kvazaŭ serĉadis insiste ion nepre bezonatan.

Je la deka kaj kvin minutoj oni frapis sur la pordo. Vera malfermis ĝin kaj Kapo Alushi eniris haste kaj tre kontente. Ĉirkaŭbrakis Vera-n. Demandis kiel ŝi sentis sin kaj se ŝi dezirus ion por trinki. Ŝi diris ke sentis sin bone kaj deziris nenion. Tiam li, senpacienca transpasis la manon ĉirkaŭ ŝia zono kaj kisante ŝian antaŭkolon enirigis ŝin en la dormoĉambron.

Komence Vera staris kiel kadavro, ne reagante kaj ne movante ion el sia korpo. Sed kiam li tentis malvesti ŝin, ŝi retiriĝis kvazaŭ estis mordita de serpento kaj severtonuse diris:

-Atendu!

Kapo Alushi mirigite kaj preta koleriĝi rigardis ŝin rekte al la okuloj kaj diris:

-Kion vi havas?

-Ne—diris kurte ŝi.

-Kiel ne? Venu nun, lasu dorlotaĵojn.

-Neniam- diris denove decideme Vera.

-U, kial vi venigis min ĉi tie?-kaj Kapo Alushi estis preta ĵetu ŝin al la lito perforte kolerigite.

-Mi aranĝis kaptilon por vi- diris Vera kaj rigardis lin al la okuloj kuraĝe.

Kapo Alushi, ŝanĝiĝis subite kaj komplete. Retiriĝis kvazaŭ sin defendus de iu abrupta frapo, sed momente konsciiĝis.

-Ci mensogas- kvazaŭ kriante rigardadis ŝin, tre koncentrite, klopodante eklegi la veron en ŝiaj okuloj.

-Mi ne mensogas- diris decideme ŝi kaj daŭrigis- Hodo Mati scias jam ĉion. Kune ni estas aranĝintaj la kaptilon. Liaj homoj estas alvenantaj.

Kapo Alushi ĵus aŭdinte tiun nomon, tuj eksidis surlite kvazaŭ kelkiu estis frapinta lin malantaŭ la kapo. Iom enpenŝiĝis kaj demandis:

-Ĉar ci estas aranĝinta la kaptilon, kial do diras pri tio al mi?- kaj denove estis rigardante ŝin al la okuloj suspekteme kaj atendis senpacience respondon.

-Eĉ mi ne scias kial. Eble mi ne kapablas fari malbonon al kelkiu, kvankam vi meritas tion. Sed mi estas certa ke vin suferigos kelkiu alia.

-Mi ne kredas cin- provokis li.

-Tiam restu por ke provu- diris Vera kiu nun sentis sin tute venkinta. -Ene de kvaronhoro ili estos ĉi tie. Ili posedas ankaŭ ŝlosilkopion- tiom diris ŝi kaj rigardis la manhorloĝon.

-Kion ci diros al ili, kiam alvenos?- demandis maltrankvile nun la ĉefo de departemento.

- Se mi estos sola, mi diros ke vi pentis kaj ne alvenis.

- Dankon- diris Kapo Alushi kaj ekstaris haste kaj eliris. Sed haltis ĉe la pordo, revenis, rigardis Vera-n humile kaj diris- Ĉu ci ĝisfinos ĉi tion por mi?

-Kion?- demandis Vera.

-La protekton. Kion ci diros pri la ŝlosilo?

- Mi maljesigos. Mi fermos ĉi aferon. Neniu volas embarasojn. Estu trankvila.

-Dankon- rediris li kaj foriris kiel batita hundo.

Vera vidis lin el la fenestro forirante kaŝe kaj haste.

Ŝi sentis sin elĉerpita kaj eksidis sur seĝo. Ŝin konkeris la malĝojo kaj la larmoj fluadis spontane. Ne estis ĝojaj larmoj pro la venko kontraŭ potenca kaj danĝera homo. Estis ja doloraj larmoj. Dolorigis al ŝi la vundego kaŭzita tiel neatendite kaj tiel rapide en ŝia nova vivo tiom dezirata. Eble ĉi tiu vundo resaniĝus, sed certe ĝi postlasus profundan stigmaton, kiun kiomfoje ŝi vidus, la animo revundiĝus. Jes, eble ankaŭ infektigis kaj malbonigis. Kiu scias?

Ŝi fermis tiun fatalan pordon kaj eliris eksteren. Forĵetis forte la ŝlosilon, viŝis sian manon kvazaŭ ĝi estis teninte ion abomenindan, enspiris profunde kaj ekiris al la hejmo.

Tiun aprilan posttagmezon la ĉielo, peziĝinte pro plombaj nuboj, enverŝis maldikan kaj serenon pluvon kiel dolorlarmojn dum silenta morto. Vera eliris el la lerneja pordo, malfermis la ruĝan ombrelon kaj ekiris al la hejmo. Besa fariĝis unu jara kaj ŝi hastis por pretigi la vespermanĝon okaze de la unua datreneo de sia anĝelo. Apenaŭ ŝi paŝis dudek metrojn, ĉe la siaj piedoj bremsis severe iu "Gaz". Timegita pro plorblekado de la gumoj kaj strataj akvoj kiuj disspruciĝis ĉi kaze, ŝi ellasis teruran krion kaj la ombrelo forflugis disde la mano. El "Gaz" eliris subite du viroj kiuj ĵetis sin sur ŝin kriante: "Je la nomo de la popolo, vi estas arestita".

Dume Vera svenis, tamen ili surmetis katenojn kaj bestiece ĵetis ŝin ĉe la fotelon malantaŭe. Poste ankaŭ ili enaŭtiliĝis, metante meze la virinon svenitan. "Gaz" ekveturis antaŭen freneze, surpremigus per radoj la ombrelon kuŝinta surtere, tute disrompante ĝin kaj rapidege dronis en la

griza kaj humida kurteno de tiu malhela tago. Sur la nigra asfalto postrestis kiel sangomakulo la detruita ombrelo de Vera.

Alveninte ĉe la Departementa pordo, unu el la oficiroj forte manfrapis Vera-n survizaĝen kaj ŝi konsciiĝis. Du policistoj prenis n trenante, malsuprenirigis tra kelkaj ŝtupoj kaj demetinte la katenojn, forĵetis ŝin en etan, malhelan ĉambron.

En tiaj kazoj eĉ al fizike forta kaj vivosperta viro povas okazi ke lin trafu koratako, aŭ apopleksio kaj mortu. Aŭ povus okazi al normala homo, pro tiu abrupta fatalo, freneziĝu. Mirinde, al Vera, debila ino, nenio simila okazis. Hazardo aŭ natura kapricio? Aŭ ion estis jam antaŭsentinta Vera?

Antaŭ du monatoj Albanio estis malamikiĝinte kun Sovetunio kaj la albana registaro deklaris sensacie sian disiĝon de “reviziisma” tendaro, kiel ĝi komencis nomi nun la socialisman tendaron. La interrilatoj estis ĉiam pli glaciigintaj. Tiu glacio estis kondukante ĝis malsupre ĉe ordinaraĵoj homoj. Tion eksentis tuj Vera. La direktoro ne plu ridetis al ŝi kiel antaŭe. Iu kolego, surmetante kontraŭreviziisman sloganon sur la lerneja muro diris: kamarado Enver igos ĉi tiujn paroli kun si mem.

Vera preterpasanta, timegis, kvazaŭ la vortoj direktiĝis al ŝi. Enhejme oni parolis nenion pri tiu afero. Tamen, Fatmir kvazaŭ estis perdinta ion el sia karakteriza humuro. Ne pro malvarmiĝo kun Vera. Kontraŭe li karesis ŝin plie. Sed estis pli enpenŝiginta, pli silentema. Al Vera ŝajnis ankaŭ kiel timigita.

Tio kio neniel ŝanĝiĝis, estis panjo Dilja. Iutage, revenante hejmen, preterpasis ŝin iu “Gaz” kaj kelkiu de ene, tutvenĝeme, mallaŭdis: fihundino. Malĝojiĝinte, ŝi rigardis al la aŭtilo forveturanta kaj rekonis la ciferplaton de la aŭtilo de la ĉefo de Departemento. Subite ŝin okupis timo kiu neniam disiĝis tutajn tagojn. Al Fatmir nenion diris.

.. Kioma estus la horo? Ŝi volis vidi, sed la manhorloĝo ne plu estis. Oni estis demetinte ĝin. Tuj la menso flugis al la hejmo. Tie ŝin atendas maltrankvilaj siaj hejmuloj. Besa kun bluaj okuloj kaj eta fingro direktite al la pordo diras la unuan vorton lernitan: Mami (patrino) . Ĉi momente

ŝi ne plu povis sin elteni. Apogis la kapon sur la manplatoj kaj plorsvenis. “Doloraĵo mia, estas ja via unua datreveno. Datreveno perfortita. Etulino mia, kiu kreskigos vin? La larmoj enfalis en manplatojn kaj glitadis malsupren ĝis la kubutoj. La plorego malŝargis sian grandan venenon iomete. Poste ŝi kaplevis kaj diris al si:

-Filino mia, mi volas ne morti por ke vin kreskigu..

-Nomo?

-Veronika

-Familia nomo?

-Lijevski.

-Albana familia nomo, de la edzo?

-Toto.

Poste la enketisto demandis ĉu ŝi akceptis ke estis agento de la sekreta servo pola kun grado leŭtenanto. Vera malfermis la okulojn, restis momente surprizita kaj diris ne. La enketisto daŭrigis demandi ŝin pri la rilatoj kiujn ŝi havis kiel agenton en nia lando, pri la taskoj komisiitaj de la centro ktp ktp. Vera ege konfuziĝis kaj ne plu respondis. Oni kondukis ŝin al la ĉelo. Ĉar ŝi estis endormiĝinta pro la elĉerpiga lacigo psikologia, oni vekis kaj ree kondukis al enketejo. Estis alia enketisto. Sub la forta kaj turmentiga lumo de projekciilo ĵetita al la vizaĝo, la samaj demandoj alikonstruite. Poste alia akuzo: tento por implikigi kaj malkredigi funkciulojn de la albana ŝtato kiel kamaradoj Hodo Mati kaj Kapo Alushi. Danĝera malamikino, supersperta agentino, stinka spionino, maskita sabotaĝistino, fivirino, licensita prostituino, fikulino, graveda fihundino, merda prostituino, ruzulino, suprenpiedeulino, vaginfendulino..

Kion alian oni ne menciis tiujn ses monatojn de antaŭprizoniĝo. Policisto kiomfoje sendis al ŝi manĝaĵetaĉon, diradis: E, fivirino, ĉu vi malsatas?

Tie, Vera havis la okazon koni tiun parton nelavitan de la albana leksiko kiun neniam ŝi eklernus aliloke. La frapoj per manplatoj kaj murdminacoj aŭ minacoj por malfacila morto, psikologia teruro, malsaturmentado, soifado kaj nedormado, ofendoj, moko, mispersonecigo, estis ĉiutaga kaj ĉiunokta porcio por Vera.

Kiel do eltenis tiun fatalon tiu juna virino, kreskita kaj edukita en tute alia medio? Kiel alfrontigis tiu delikata mondo, tiu sentema koro, tiu fajna animo tutan kruelan perforton, barbaran traktiĝon, tiun grotbestian konduton? Ŝin ligis kun tiu ĉi mondo kaj kuraĝigis la plej belaj memoraĵoj, plej karaj homoj: la eta Besa, Fatmir, gepatroj, panjo Dilja. En la plej nigraj momentoj ŝi fermis la okulojn kaj vokis ilin. Kaj ili troviĝis ĉe ŝi. Kvietigis frapdolorojn, resanigis animvundojn, levis alten la dignecon piedpremitan, revigligis, revivigis.

Tamen iutage ŝi ricevus plej teruran frapon kiu faligus surteren kaj kaŭzus plej grandan vundon. , eterne nesaniĝebla. Oni alportis deklaraĵon far Fatmir, sia idolo, por kiu ŝi forlasis la patrimon, patrinan lingvon, gepatrojn, ĉion liganta ŝin kun la infanaĝo, juneco, kun plej bela kaj plej kara vivoparto. En la deklaraĵo oni diris ke li divorciĝas de ŝi, ĉar ŝi estis ja malamikino de lia lando ktp, ktp. Ŝi rekonis lian signon. Sed ne povis kredi. Nepre devus esti ia ruzaĵo de la Ŝtata Sekureco. Oni diris ke estus kunfrontiĝo en la juĝejsalono, se ŝi ne signus ekde ĉi tie la deklaraĵon por divorciĝi. Estas provoko. Jes. En la juĝejo, diris ŝi. Oni kondukis ŝin al la juĝejo.

Ŝi vidis Fatmir-on. Ege sopiris pri li. Strangolis ŝin ĉi tiu broganta sento kaj ekploris. Ŝi fordonus eĉ la vivon, nur por renkonti lin kaj Besa-n. Fatmir ne estis vidante ŝin. Miri, trezoro, jen kie mi estas. Kiel fartas Besa? Por vi mi estas ankoraŭ viva. Sed Fatmir tenis la kapon klinite. Kiam la juĝisto demandis lin ĉu li deziras divorciĝi kun la akuzitino...li preskaŭ senvoĉe kaj ne vidante al ŝi, diris: jes.

Dio mia! Ŝi deziregus ululi pro la doloro. Kio rilate la amrenkontiĝojn, ardajn konversaciojn, sendormajn noktojn, projektojn por la estonto teksitajn tutpasio, la gajan albanan nuptofeston, belajn songojn por la estonteco de Besa? Ĉiuj piedpremiĝis tiom facile? Kial do? Kiel tio eblas? Ĉu tio estas la donita parolo? Ĉu tio estas la albana "besa"? Ĉu ekzistas pli alta perfido ol ĉi tiu?

Ŝin plene lasis la fortoj kaj sin kuŝigis surteren. La koro haltis kaj flaviĝis kiel balaila herbo.

Kun la tremanta mano, ŝi apenaŭ sukcesis signi la divorcan dokumenton.

Oni kondamnis ŝin al 20 jaroj da enprizoniĝo. Kondukis en la virina prizono, apud urbeto kun malbonodoro pro sulfuro kaj gaso. Tie ŝi trovis alian polinon kondamnite pro la sama akuzo. Povrulino, ne kapablis rezisti al la suferkalvaro kaj frenezigiĝis. Vera ne sciante eĉ mem kiel kaj kial, daŭrigis travivi. Ŝi faris mekanikece kiun ajn laboron postulate de komandejo. Endormiĝis kun arda deziro revidi filinon en la sonĝo. Tiun nokton Besa fariĝis dujara, ŝi festis tion. Kiel ŝi festis? Estis amikino, albana prizonulino, al kiu ŝi estis rakontinta multon. Albanino estis konservinta ion el la nutraĵoj alportitaj de familio. Ŝi plenigis du aluminajn platojn kun akvo kaj sukero, donis unu al Vera kaj diris: Ĝojon, ankaŭ aliaj 100 jaroj al Besa! Vera enlarmiĝis pro tiu surprizo. Ĉirkaŭbrakis amikino kaj kisis ŝin amece. Poste ili dividis kelkajn sekajn figojn, po kvin nuksoj da migdaloj kaj po kvin biskvitoj. Fine trinkis kafon. Ĉi tiu vespermanĝo, en la komunista prizono, estis vera bankedo.

Tiu fruaŭtuno alvenis kun pluvoj, sed tiu tago estis alia. Varma kaj suna. Estis antaŭtagmeze kaj la prizonulinoj estis ĉerpintaj kaj kolektintaj terpomojn en la kamparo. De fore, sur kverka branĉo, kiu neniel volis demeti la verdan mantelon, kantadis truto. Eble tio estis ĝia lasta kanzono antaŭ ol forlasi ĉi tiun landon. Poste la truto ĉesigis la kanzonon, kunfrapis la flugilojn kaj forflugis kiu scias kien. Kien tiel o antaŭkolo-brodita?

Alvenis gardisto el la prizona dormejo, renkontis la taĉmentkomandanton gardanta la prizonulinojn dum la laboro kaj ion diris kaj enmanigis leteron. Ĉi lasta, fajfis kaj la prizonulinoj tuj forlasis la laboron kaj atendis pretstare.

-La prizonulino je numero 908, prezentiĝu ĉi tie- kriis ĉefgardisto kaj aldonis:- la aliaj daŭrigu la laboron.

Vera skuis la koton el la manoj, viŝis ilin per la prizona uniformo kaj ekiris. Kion ili faros plu al mi, demandis sin. Atinginte tie, estis kondukate de la veninta gardisto kiu ordonis ŝin paŝi antauen. Alvenis en la prizono. La gardisto transdonis ŝin al alia gardisto kaj ĉi lasta kondukis ŝin al la komandejo. Oficirino enirigis ŝin en iun anguleton, kie estis instalite primitiva duŝejo, donis pakaĵon da vestaĵoj civilaj kaj ordonis ke ŝi laviĝu kaj ŝanĝu la vestojn. Mem ŝi staris surpiede ĉe la pordo duonmalfermite.

Vera malfermis la pakajon kaj restis mirigite. Estis ja siaj vestoj kiuj portis kiam oni arestis ŝin. Ekokupiĝis de potenca sopirsento por tiu fora vivo perdita porĉiame. Kaptis tiujn vestojn el tiu kara tempo kaj kisis ilin. Jen ankaŭ la manhorloĝo. Ŝi streĉiĝis ĝin kaj la manhorloĝo ekfunkciis. Kiom da tempo pasis ne mezurante? Kiel ĉio, ankaŭ la tempo, havis nenian valoron en la prizono.

-Hastu ĉar ne estas plu tempo, - diris la oficirino, sed mirinde ne plu per sia severa tonuso.

Ellaviĝis. Poste kun la manoj apenaŭ moviĝemaj, ŝi vestis siajn karajn vestaĵojn. La oficirino enirigis ŝin en iun oficejon, kie alia oficiro transdonis dokumenton por signi. Ŝi signis ĝin ne leginte. Estis al kutimiĝinta jam kun tia praktiko kaj apenaŭ volis pluscii. Poste oni enaŭtiligis en la prizona aŭtilo. Ĉi lasta ekveturis. Kien oni veturigos ŝin? Kion faros kun ŝi? Tio nun malmulte interesis al ŝi. Ne plu kredis ke ekzistas io pli malbona ol jam okazinta al ŝi. Ankaŭ se ekzistus, ŝi estis jam tanita.. Tamen tio estis ia ŝanĝiĝo kiom neatendita tiom agrabla. Sed pli multe similis al io enigma.

La aŭtilo haltis kaj ili elaŭtiĝis. Estis en granda urbo. Ŝi ne povis orientiĝi. Rigardis la horloĝon. Estis la tria posttagmeze. Ili ekveturis je la dekdua. Tri horoj. La prizona oficiro transdonis ŝin al du civiluloj. Ili enautiligis en bona aŭtilo. Ŝi rimarkis ke la aŭtilo havis la ciferplaton de Tirana. Haltis apud bela domo je tipo vilao kaj elaŭtiĝis. El la pordo kun feraj kradoj tuj eliris alia civilulo. Ŝajne li atendadis. Oni interŝangis paperojn kaj signojn. Ankoraŭ la enigmo ne solviĝis. La persono elirinta el la pordo aspektis kiel nordulo. Du civiluloj kondukintaj, senvorte, enaŭtiliĝis kaj foriris. La nordulo turnis sin al Vera, ridetante, salutis ŝin per bonvenaj vortoj en la pola lingvo kaj tutedukite kaj ĝentile, invitis ŝin eniri.

Mirigite, ŝi rigardis ĉirkaŭe. Vidis la blankruĝan standardon. Certe mi sonĝas. Skuis la kapon kaj ekpinĉis sin. Ankoraŭ ne kapablis moviĝi. La akceptanto denove parolis pole:

-Sinjorino Lijevski, eniru mi petas. Ni troviĝas en la pola ambasadejo. Vi estas jam libera. Mi estas la ambasadeja sekretario. Min nomas Andrzej Bieleki.

Vera kun la piedoj tremantaj alpaŝis antaŭen. Ĉu ĉi tie estis la enigmofino? Aŭ la miraklo pludaŭrus?

Ŝi konsciiĝis kaj memoris ke tie ŝi estis ankaŭ alifoje. Estis alveninta tiun tempon.. (Oh, mia Dio, kian nomon povus havi tiu tempo?) por dokumentoj, stampoj kaj signoj.

La malmultaj deĵorantoj en la ambasadejo, inkluzive la ambasadoron, akceptis kaj traktis ŝin zorgeme kaj amece. Tie oni estis venigintaj ankaŭ la alian polinon de la prizono kaj poste de la hospitalo. Estis venigintaj ankaŭ du etajn filinojn ŝiajn.

Oni diris denove al Vera ke ĉi tie finiĝis ŝiaj suferoj kaj ekde nun ŝi estis libera. Sed la kulmino de la miraklo kaj feliĉo (ĉu plurestis ankoraŭ feliĉo por ŝi? Oh- estis kiam oni diris ke ene de horo oni atendis ke oni venigu ankaŭ Besa-n, la filinon, kaj morgaŭon ili ekveturos kune al Pollando.

Vera ĉiam dubis pri la ekzisto de Dio. Sed nun ŝi diris al si: Kiu povas fari miraklon tian krom Dio?

La koro batis kaj la menso laboris por la estonteco de filino. Ĉu vere oni venigus ŝin? Kiel aspektus ŝi? Kiom kreskus? Kiu venigos?

Kaj oni venigis Besa-n. Venigis ŝin nekonataj homoj ĉe la pordo de la ambasadejo kaj foriris, post kiam interŝanĝis dokumentojn kaj signojn. Ne priskribeblas tiu renkontiĝo. Tutan nokton Vera ne povis dormi. Sidis kaj rigardis la filinon dormantan. Rigardis ŝiajn nigrajn buklojn, maldikajn brovojn kaj longajn nigrajn okulharojn. Rigardis la frunton kaj glatajn vangojn je bela helbronza koloro, poste prenis la etan manon kaj kisis ĝin ne satiĝante.

Ĉi tie finis sian rakonton la polino. Kaplevis, rigardis min en la okuloj kaj diris:

-Kaj jen kie mi estas.

En ŝiaj belaj okuloj estis ariĝinte larmoj. Mi lasis ŝin kvietiĝi iomete sed ne povis sidi sen demandante pri la vera aŭtoro de tiu miraklo.

-La pola registaro-diris ŝi- Ekde la aresto de la polaj civitanoj, ĝi protestis, sed la albana registaro neglegtadis. Post iom da tempo, eble monaton antaŭ nia liberiĝo, varŝipo albana alvenis en Gdansk por alporti kaj reporti varojn laŭ komerca kontrakto inter ambaŭ landoj. La pola registaro lasis la ŝipon malŝarĝiĝi kaj ŝarĝiĝi, poste blokigis ĝin, tenis kiel

ostaĝojn tutajn maristojn kaj sendis ultimatumon al la albana registaro por ke ĉi lasta transdonu en la polan ambasadejon por venigi en Pollandon la polajn civitaninojn enprizonigitajn kune kun iliaj gefiloj naskitajn en Albanio, interŝanĝe al la varŝipo kaj ties maristoj. Kaj la albana diktatoro, pri kiu en Albanio diris ke terurigas tutan imperialistan kaj revizionistan mondon, kaŝe kaj urĝe, faris tion kion postulis la pola registaro.

Nun Besa estas pli ol tridek jara, edzinigita, havas du gefilojn. La filino nomiĝas Dile, honore al mia bopatrino kiun mi amis multe kaj memoras ĉiam respekte. Por Besa mi volas la vizon. Ŝi iros viziti la patron kune kun siaj gefiloj..

Varsovio, junio 1995.

Ali Podrimja (1942-)

A L V O K O J

**Al Lili, mia frato malaperinta
en la milita ciklono
Kolomb' mia, kiu vin direktis,
kolomb' mia
lertflugila kun ĉi-vorto?
Vi - kolombo plej bela,
kolomb' mia
-plej rapida en ĉi-mondo!**

**De kie sur mia fruntbranĉo,
kolomb' mia
-kien ekflugas?**

**Vi – kolombo plej bela,
kolomb' mia
-rompitaj aloj por ĉi-vort'!**

**Ho ve, mi okulbrulas,
kolomb' mia
-Lili, kiel mi rigardos?**

**Kiu donos al li mian lastan skribon,
kolomb' mia
ĉagrenita?**

2.

Mi vidas homojn svarmantajn
sur la vivpadoj –
foras vizaĝ' via!

Sojle mi atendas hirundojn
kiuj printempojn alvokas –
forestas ŝultroj viaj!

Sunfrunto al mi o
buklojn varmigas –
foras voĉo via!

Lili, forfalĉita prato de la forgeso!

3.

Freneze mi ekkriis – en mi mem,
kaj vi nenie ekrespondas!

Forbrulis vi sur vojoj de l' vivo
kun krusto pana kaj sala en kunpremitaj infanmanoj!

Cikonio tegmente per beko ĉielon traboris
kaj sangajn flugilojn alportis pro serĉado.

Sed vi nenie... Vin mi ne plu vidas, frato...
Ve, sur monto nia forbrulis la verdaĵo.

4.

Nokt'. Dormas urb' mia.
La stratoj postpaŝas min. Mi vin delonge alvokas,
vagas – sed kie vi estas, Lili?

Nek la domhundo bojas,
nek aĝa drinkulo strate insultas –
kvazaŭ ĉiuj homoj tute kunfandiĝis en min
- en sonĝojn kaj dezirojn!

+

Mi sonĝis min. Solsola mi eliris pr\omeni.
Kaj vi – tiom proksime – kun etenditaj manoj vi
min ja ravige vokas
en vivon per viaj grandaj okuloj, via kolomba koro...
Kiel vi malproksimas al mi en ĉi-nokto alvenbrulanta!
Lili, kiam mi estus – vi, kaj vi – mi,
neniam ni suferus unu je l' alia
- neniam ni formortus!

+

Ĉi-urb' estas mia kun prarakontoj

kiujn ni ellernis kiel kanton, peton je la vivo.
Laŭdire tio estas multvizaĝa solvo,
kie ĉiu retrovas sin.
Tie ĉies sortvojo estas signita per plej nova naskiĝo
neniam resendanta al antaŭmort'.
Ĉi-urb' esas mia
- kanto de ĉiu!

+

Vi estas tiu flugiranta ĉiunokte mian frunton
kaj malaperanta kiel dolĉa aŭrorsonĝo.
Tiu kiu min per okuloj mezuras kaj en si filtras.
Tiu kiu ĉiunokte forlasas min kun la bruliĝintaj lipoj
kaj perdas min en la memoro.
Vi estas tiu min viviganta
por morgaŭo de la forgeso!

+

Reiru, Lili, reen!
Revenu eĉ postkiam vivo penetros vin
restigante kun la tempo neforgeseblajn postsignojn,
revenu – ĉar mi ankaŭ tiam amos vin, Lili!

... Nun mi vin ne vokus se mi ne suferus pro vi,
se vi ne alvenus – mi neniam sonĝus min en la urbo de homoj!
Neniam, Lili!

+

Malproksime rompiĝas ridoj de l' aŭroro.
Urb' mia vekigigas kaj domhundo bojas.
-He, al kiu mi kantu kanton lastsonĝan?
Al kiu mi koron malkovru se ne al vi, al mi?
Kiun mi voku per via nomo malantaŭ tiom da jaroj
- Lili, se vi neniam revenos?

Esperantigis
Boris'a Milic'evic'

Ne estas facile vivi eksterlande

(”Provoko por /soci/ekonomistino kun fido al estonteco.”)

Barakti, barakti, barakti --- ne kuŝiĝi por plori. Rozana estas al kutimiĝinta pene klopodi, kaj nun ŝi, kiel ekonomikistino, alfrontas la malfacilan taskon trovi laboron. -Mia celo estas havi dungon ĉe la ŝtata (nacia) banko. Nenio estas neebla, se oni havas ĝustan (veran) volon, ŝi diras.

Rozana devenas de mezklasa familio en Albanio. La patro estis oficiro, la patrino estis instruistino. Rozana havas fraton kaj fratinnon.

-Albanio estas malriĉa lando, sed al ni ne mankis la plej gravaj. Mi tamen ne povis havi ĉion, kion mi volis. Mi povis aĉeti paron da novaj pantalonoj kaj paron da ŝuoj ĉiujare. Kelkfoje mi aĉetis malnovajn (uzitajn) vestojn, rakontis Rozana.

Ŝi tamen estis kontenta, bone fartis, havis normalan kaj trankvilan junaĝon, ŝi sukcese trapasis la lernejojn kaj havis altajn atestojn.

Kiel oficiro la patro devis adaptiĝi al novaj forkomandoj. La familio ŝanĝis loĝejojn kvinfoje dum la junaĝo de Rozana de urbeto en la nordorienta parto kaj por la tempo venis al la ĉefurbo Tirana, kiam ŝi havis 16 jarojn.

Rozana memoras, ke estis penige veni al novaj kaj pli grandaj urboj. La postuloj en la lernejoj estis pli altaj, kaj ŝi devis lerni (energie) laboradi kaj ne rezigni.

-En Tirana miaj geavoj loĝis kune kun ni, kaj ni estis sep personoj en propra domo. Mi studis (prepariĝis) por ekonomikista kariero ĉe la universitato. Mi tre ŝatas ciferojn kaj volonte legas tion, kion mi bezonas por trapasi ekzamenojn.

Prefere ŝi volis labori ene en la ŝtata administrado en Albanio. Sed tio montriĝis preskaŭ nebla sen subaĉeti, kaj tio ŝi ne emis fari. Koruptado estas disvastigita en la lando. Bonaj kontaktoj kaj mono malfermas pordojn, precipe al ŝtataj oficoj. Povas kosti jarsalajron ekvivalentan al 30000-40000 kronoj (3000-4000 Eŭroj) por ricevi oficon.

Oni alvokis ŝin al intervjuoj, ŝi faris testojn sed la laborojn ĉiam ricevis alia persono.

-Mi sentis min malplivalorigita. Miaj studkamaradoj, kiuj ne faris same bonajn rezultojn kiel mi ĉe la universitato, ricevis laboron.

Rozana laboris dum jaro en (hazard?) ludkompanio. Iom post iom ŝi havis pli grandan respondecon por administraj taskoj.

La someron 2007 ĉio ŝanĝiĝis. Si renkontis Muj-on, kiu havis svedan restadpermeson. Li loĝis en Lidköping kaj estis en sia malnova

hejmlando, Albanio, pro ferioj. La paro fianĉiĝis en septembro saman jaron.

Ŝia estonta edzo multe parolis pri Svedio, pri siaj geamikoj, pri lando de eblecoj, kie ĉiuj povas realigi siajn revojn, pri alta vivnivelo, rajtoj por ĉiuj, belaj urboj kaj lagoj.

Muj memoras, ke komence Rozana ne interesiĝis pri tio.

-Mi tre baraktis por mia edukado kaj ne volis forlasi mian familion, sed la amo igis min fari la paŝon, diras Rozana.

Ŝi ricevis permeson veni al Svedio, kaj ŝi alvenis en majo 2008. Estis ŝia unua vojaĝo eksterlanden.

-Lidköping estas io alia ol mi atendis. Mi pensis, ke la domoj estas pli altaj, ke la homoj estas pli multaj. Mi vidis malplenajn stratojn. Mi sentis min sola sen familio kaj geamikoj. Ĉi tie estas granda distanco, malvarmo inter homoj. Mi, kiu estas kutimigita al deproksima kontakto, kisoj kaj brakumoj. Ankoraŭ mi ne kontentiĝis per tio.

Ŝi baldaŭ trovis, ke homoj en ludomoj povas loĝi muron ĉe muro kaj nur kapsigni por saluti. En Albanio tio estas neimagebla. Najbaroj interrilatas, kafumas kaj babilas.

Sveda pano estas tro sukergusta. Pro tio ŝi mem bakas. Ŝi manĝas svedajn viandbuletojn sed ne haringojn.

Post kvar tagoj en Lidköping ŝi komencis studi la svedan lingvon.

-Mi vizitis lernejojn dum 16 jaroj sed mi devis rekomenci de nulo. Mi cerbumis pri tio, kion mi faris kun mia vivo. Mi devis lukti, mi ne povis enlitiĝi por plori.

Pri la valideco de mia edukado al ekonomikisto de Albanio la svedaj aŭtoritatoj jam konfirmis.

Rozana dum ses monatoj faris preparan edukadon por ekzamenitoj de universitatoj, kaj ŝi i. a. studis komputoran teknikon, civitanan edukadon kaj la svedan lingvon.

Ŝi faris staĝon ĉe revizora agentejo dum tri monatoj, studis kalkula raportadon pri salajroj, vendadon, aĉetakiron, dumtempe studis la

svedan kun bona rezulto dum du semestroj anstataŭ kutime kvar. Kaj dum la kvar jaroj en Lidköping ŝi naskis du geinfanojn.

Nun ŝi havas staĝokupon ĝis septembro. Ŝi ne scias, kio estos poste. Ŝi substrekas, ke ŝi sentas sin forta kaj trankvila kun la edukado, kiun ŝi akiris. Krome ŝi volonte plustudos ĝis masternivelo (magistra (?) nivelo) .

-Mi volas labori kaj ricevi salajron kaj senti, ke mi havas valoron. Sed kiam mi serĉas oficojn kaj sendas mian CV (liston de meritoj) , la dungantoj rigardas mian familian nomon kaj tuj formetas la paperojn. Mi serĉis oficon en Lidköping, Gotenburgo kaj Malmo kaj oni eĉ ne invitis min al intervjuo, ŝi konstatas kaj daŭrigas: La dungistoj ne kredas, ke mi scipovas la svedan kaj ke mi estas ne socia (?) . Mi sentas min diskriminaciita en la labormerkato, kaj tio estas ege ĉagrena.

Ŝi havas geamikojn, kiuj ŝanĝis siajn familiajn nomojn por altigi laborŝancojn.

-Tion mi ne intencas fari, diras Rozana.

Oni akceptis ŝin por kurso al ekonomikisto de kalkulraportado en Lidköping. 106 serĉis, 32 estis akceptitaj.

-Se mi ĝis septembro ne ricevos laboron, kie mi nun staĝas aŭ en alia kompanio, mi komencas studi.

Rozana substrekas, ke oni traktas ŝin bone en Lidköping. Kiel privata persono (individuo) ŝi ne sentas sin aparte aŭ maljuste traktata. Ŝi havas i. a. multajn geamikojn en la pentekosta preĝejo en Lidköping.

Enesperantigis el la sveda s-ino Birgitta Anevik

Eseo

Centjariĝo

Nur du jaroj antaŭ la komenciĝo de la Unua Mondmilito naskiĝis en Balkanio la nova sendependa ŝtato de Albanio. Ĝi estis la lasta el la iama Otomana Imperio en la Duoninsulo kiu akiris sian memstarecon. Sed tio estis entrepreno ege doloriga kaj drameca.

La “malsanulo” de Bosforo obstine klopodis pluteni en siaj manoj la okcidentan ekstreman provincon, el kiu ĝi estis devigite plurfoje donaci al la jam ekzistantaj suverenaj ŝtatoj najbaraj (Montenegro, Serbio kaj Bulgario) ,

diversajn grasajn pecojn dum XIX jarcento, kiel ekzemple tio okazis post la ruso-turka milito de la jaro 1878.

Tial albanoj ribeliĝis plurfoje en la jaroj 1910, 1911 kaj 1912, precipe en Kosovo-regiono. Ili sukcesis eĉ okupi urbojn de Priština kaj Skopje.



Balkanio antaŭ la Unua Mondmilito

Dume la registaroj de Serbio, Montenegro, Bulgario kaj Grekio decidis alianciĝi kontraŭ Otomana Imperio por ke, post la venko, ili disŝiru el ĝi pliajn teritoriojn, plejmulte el la albanaj vilajetoj (Ŝkoder, Kosovo, Manastir, Janina) . Ilin forte subtenis Rusio, kiu intencis krei tiel en Balkanio iun fortan baron kontraŭ Aŭstrohungario. Ĉi lasta kontraŭe pludeziris ke oni konservu la aktualan politikan staton.

Sed la 7-an de oktobro 1912 Montenegro deklaris militon al Turkio, sekvata la 17-an kaj 18-an de oktobro de la ceteraj ŝtatoj. 286 000 serbaj soldatoj eniris albanajn teritoriojn en Kosovo, Makedonio kaj Albanio, frakasante la turkan armeon en pluraj frontoj. Ili dezertigis centojn da vilaĝoj kaj mortigis dekmilojn da albanaj civilulojn, strebante “etnopurigi” la okupitaj teritoriojn. Same agis 20 000 montenegranaj soldatoj, centmiloj da grekoj kaj bulgaroj.

Albanoj alarmiĝis kaj tuj organizis sian fortan rezistadon. Multaj iliaj gvidantoj kunvenis urĝe kaj decidis fari plejebulon por konservi tion kio estis savebla el siaj teroj. Delegacio estrata de Ismail Qemali vojaĝis al eŭropaj centroj (Vieno, Londono, Romo, Budapeŝto k. a.) por peti la kunsenton de ties registaroj. Subtenita de Aŭstrohungario kaj Italio, ĝi alvenis en la urbo de Vlora, ĉe Adriatika marbordo ankoraŭ libera kaj kunvokis ĝeneralan kunvenon de reprezentantoj el tutaj albanaj teritorioj. Tiel, la 28-an de novembro 1912, tagmeze, oni sukcesis unuanime deklari antaŭ la popolo arigita ekstere la sendependecon de Albanio.



La deklaro de sendependeco en Vlora

Kvarcent volontuloj el la jam okupita Kosovo, gviditaj de Isa Boletini alvenis tagon poste por subteni la novan unuan albanan registaron, estrata de Ismail Qemali, kiu siaflanke alvokis al la registaroj eŭropaj agnoski la sendependecon de la lando.



La alveno de 400 kosovaj volontuloj

Dume la ceteraj partoj de la lando suferis la sovaĝan kaj sanguman okupadon fare de armeoj de la najbaraj ŝovinismaj landoj. Ŝkoder kaj Janina daŭre estis sieĝataj de serbo-montenegranoj kaj grekoj.

La grandaj potencoj maltrankviliĝis pro la nova statuso politika en Duoninsulo. Ili kunvenis en Londono por decidi pri la novaj landlimoj. Rusio deziris ke Albanio estu nur ŝtateto ampleksinta la mezan Albanion, dum Aŭstrohungario celis pli larĝan landon, ampleksinta krom Albanio ankaŭ certajn teritoriojn albanaj en Kosovo, Grekio, Makedonio kaj Montenegro.

Rezulte, oni decidis pri la aktualaj landlimoj de Albanio, t. e. amputita lando kaj nacio, ekster kiu etendiĝis pli ol duono.

Kiel ajn, albanaj gvidantoj konsideris tion ian gravan akiraĵon, ĉar la nova sendependa ŝtato fariĝus forta subteno por ĉiuj albanoj en la Duoninsulo. La vivo de la unua registaro de Ismail Qemali estis mallonga ĉar Eŭropon trafis somerofine de 1914 tragika milito. Albanion denove eniris la armeoj de ambaŭ intermilitantaj aliancoj, foje aŭstroj kaj bulgaroj, foje francoj, serboj, grekoj, italoj kaj aliaj. La lando pludezertiĝis ĝis la fino de tiu fifama mondmilito. Granda danĝero stariĝis denove dum la Packonferenco de Versajo, ĉar la ŝovinismaj registaroj najbaraj faris plejblon por elŝiri pliajn partojn el teritorio de la restinta sendependa Albanio. Sed tion malhelpis notinde ne nur la forta volo popola albana, esprimita en la Kongreso de Luŝnja januare 1920, sed ankaŭ la subteno fare la deklaro de usona prezidento Uilson favore al la memdecidemo de popoloj. Finfine oni akordiĝis lasi Albanion trankvila en sia memstareco, eĉ invitis ĝin al la Ligo de Nacioj en la jaro 1921. La jaroj 1921-1924 notas interesan periodon de parlamentarismo nekonata antaŭe ĉe albanoj, kiu konkludiĝis per registaro de Ahmet Zog, elektita prezidento en 1925 kaj poste reĝo en 1928. Ĉi lasta invitis fremdajn kompetentulojn por organizi modernan administracion, armeon kaj policon kaj entreprenis diversajn centralizigajn reformojn.



Ahmet Zog La Unua

La okupiĝo de la lando far faŝisma Italio la 7-an de aprilo 1939 kaj mem la dua mondmilito notis alian malfacilan periodon por albanoj, sed ankaŭ novan statuson de ties landlimoj. Ekde aprilo 1941, nazioj aneksis al Albanio multajn teritoriojn okupitaj de Jugoslavio en Kosovo, Makedonio kaj Montenegro. Ĉi kaze tie ekfloris unuafoje albanlingvaj lernejoj kaj administracioj.



Albanio en la jaroj 1941-1944

En la jaro 1945, fino de la dua Mondmilito, Jugoslavio rekaptis Kosovon kaj Makedonion. Plue, stariĝis nova danĝero en la Packonferenco de Parizo, ĉar Grekio pretendis tutan sudan parton de la tiel nomata “Londona” Albanio, t. e. sudan Albanion. Bonŝance, la komunisma reĝimo instalita enlande akiris fortan subtenon fare de tiama Sovetunio kaj Jugoslavio komunismaj.



La komunisma diktatoro Enver Hoxha

46 jarojn, la lando plurestis sub totalitarismo komunisma kaj post 1961 jaro, eĉ des pli, post 1978 jaro, en tuta izoliteco, ĝis en la jaro 1991 la sistemo politika kolapsis.

Ekde tiam albanoj aliĝis la la eŭropa granda familio kies parto natura ili jam estis ekde jarcentoj. La ekonomia nivelo pliboniĝis notinde (la enspezoj averaĝaj pokape altiĝis de 300 USD ĝis 4500 USD) kvankam ankoraŭ la lando konsideriĝas la plej malriĉa en la malnova kontinento.

Ekde la jaro 1999, albanoj havas duan sian ŝtaton kiu sendependiĝis en 2008. Tio estas Kosovo. Kunlaborante en ĉiuj kampoj ambaŭ ili sin pretigas aliĝi estonte al EU.

Bardhyl Selimi

Por kiuj ni verkas?!

Ali Podrimja⁹⁵



Ali Podrimja

En urbo de Bavario, hazarde falis en mia mano ĵurnalo de Zagrebo. Trafoliumante ĝin mi rimarkis tekston de mia amiko, Mirko Kovaĉ. Plezure mi eklegis.

La daŭrigo estis drameca, plene de teruraĵoj. Tion kio diritis de honorinda verkisto, mi tute ne volis ke ĝi estu vera. Ĉar temis pri io monstreca. Ie en Bosnio, en urbo Foĉa, loĝate ĉefe de muslimoj, la vivo jam iris malsupren. La malraco regis la racion.

Mi komprenis la ribelemon de mia amiko, sed mi apenaŭ povus diveni ke la homo estas transformita en bagatelaĵo, ke je la fino de XX jc la interetna malamo fariĝis instinkto kaj Eŭropo estis transformita en teatro de absurdo.

Laŭ la honorinda verkisto, iu Vojislavo, serba profesoro de universitato de Sarajevo, laŭlonge de la stratoj de Foĉa estis vidite futbal-ludante kun la kapoj de la masakritaj muslimoj. El tiuj viktimoj, eble kelkaj povintus esti eĉ siaj studentoj, kiuj tie, ĉe borde de pitoreska Milacka kondukis liajn prelegojn pri la belo en la arto.

⁹⁵ Elstara verkisto-poeto el Kosovo forpasinta lastatempe

Vojislavo forgesintis ke li estis universitata profesoro kaj okupiĝis fojfoje ankaŭ per verkado. Li estis transformiĝinta en fantomon kaj per grado de militista majoro partoprenis en multaj murdadoj kaj etnaj purigadoj. La ruiniĝo de Vukovar, Mostar, Dubrovnik, Sarajevo kaj multaj vilaĝoj kaj urboj aliaj malpli konataj atestis konvinke ke ne temis nur pri psiko-etiko de individuo.

Paranojo, de tago al tago, malkovris sian vizaĝon malbelan ne nur en bulevardeskaj skribaĵoj, sed ankaŭ en etnoso, ideologio kaj filozofio de popolo alproksimiĝanta al katastrofo. Ĉekape de tiu malbono, staris verkistoj, duonverkistoj, intelektuloj, kvazaŭintelektuloj, dubindaj politikistoj kaj rekonaj krimuloj kiujn serĉadis ankaŭ la internacia polico.

Per naciismaj programoj kaj faĉistoidaj ellaboraĵoj pleniĝis la bibliotekoj aŭ kreiĝis novaj laŭ la scenaroj.

Kaj kiun do ne maltrankviligas tio? En la konscienco de la verkisto estis okazinta terura eklipso, ne plu ekzistas la humaneco kaj dignece. Laŭ la naciismaj kapoj iu “ĉiela popolo” ne povas erari. Oni permesas al ĝi eĉ la krimojn.

Oni deklaris serbaj teroj ene de nokto eĉ tiujn lokojn, kie blindulo aŭ lamulo de sia gento estis iufoje preterpasinta. La kondamn-ekspedicioj hastis forviĉi iun ajn spuraĵon el la kultura heredaĵo kaj identeco de aliuloj en la perforte okupitaj teroj.

El primitiva filozofio apenaŭ povus naskiĝi io humana, escepte de kreitaĵo kiĉo, senvaloraĵo, malĝojigaĵo, kun profunda spirita mizeraĵo. Naciismo estas ia kiĉo, diradis Danilo Kiĉ. Naciismo fariĝis spirita nutraĵo por mezuloj pliiĝantaj ĉirkaŭ la nacia tablo.

Tiuj malmultaj verkistoj, posedantaj intelektulan kuraĝon por kontraŭtarigi al tiu kolektiva paranojo, deklariĝis perfiduloj de la naciaj interesoj, la eldonistoj fermis al ili la pordon aŭ ili estis devigitaj ekziliĝi. La kuraĝo de Mirko Kovaĉ rememorigis la sorton de serba poeto kiu, spektante surekrane televizia kio okazadis kun la albanaj infanoj, dum la pacaj demonstracioj, kie la serba polico masakris la junulojn postulantaj tion kion estis postulinte antaŭe ankaŭ siaj gepatroj. La poeto estis plorinte, pro la honto kaj mizereco de sia popolo.

Post kelkaj tagoj, mi trovis poezion de tiu verkisto pri la albanaj infanoj, kiuj falis pro la pafado de dumdumaj kugloj, kiun li estis verkinta tiun malfeliĉegan nokton: “Vi povas publikigi ĝin. Mi estos dankema dum la

tuta vivo se vi helpos min elspruĉi salivon al la vizaĝo de naciismo de mia popolo”, eldiris li pertelefone al mi.

Sed la letero estis vojaĝinta duonjare. Tio dirite de poeto estis ia kunfrontiĝo al la totalisma reĝimo. La poezio por la albanaj infanoj, ankaŭ lia venĝemo apenaŭ estis ia gestaĵo. Li kredis en la valoroj kaj libereco de la homoj. Antaŭ ĉio, li defendis la etikon de la verkisto dum malica tempo kiam la naciisma eŭforio, metaforo de la malbono, estas ekstazo pli forta ol lia vorto kiel humanisto.

La malvaloriĝon spiritan de la verkisto, kiu penigis ne nur Mirko Kovaĉon, akcentigis pli grave la disidenton kaj bardon montenegrana, Jevrem Berkoviĉ, dum iu kunveno en la urbo Bled.

Sed la teruro kaj agreseco de la naciisma diktaturo ne estis io neatendita por albanoj. La murdojn, elirojn, persekutojn kaj blankan teruron ni estis travivintaj dekfojojn dum nia historio. Ĉu Eŭropo ne rememoras la tragedion de Ĉamerio⁹⁶, pli frue tiun de Toplico⁹⁷: se Eŭropo sin fermis en sia hipokriteco eĉ post la murdoj kaj eliroj grandaj de la jaroj 50, 60, 80 kaj 90 de la lasta jarcento.

Konstatante nur ke tie en Balkanio okazas io terura, nia memoro apenaŭ povas forviĉi la lamentojn kaj kriegojn pro la murditaj kaj masakritaj infanoj. Sufiĉas relegi la libron “La militoj de Toplico” de Dimitrije Petroviĉ kaj vi estos konvinkitaj en kia Golgoto estas pasinta nia popolo, estos vidinta kie estis ĝiaj teroj, aŭ trafoliumos la sekretajn dokumentojn de la ekstrema ortodoksismo en relacio Belgrado-Ateno..

Ni revenu al la estanteco, kio fariĝis komuna maltrankvilaĵo. Komence de la jaroj 80 en Belgrado kunvenis unue kaj lastfoje verkistoj serbaj kaj albanaj. Inter la najbaroj oni serĉadis padojn por bonkompreniĝado kaj digneco. Sed kio okazis! La serbaj verkistoj, anstataŭ subteni la raciajn postulojn de albanoj por pliprofundigi la kunekzistadon en ĉi tiu maltrankvila parto de Balkanio, kontraŭe deklaris militon kaj mirigite, tion ili hastis fari antaŭ Ĉeĉelo⁹⁸, Arkano⁹⁹, polico kaj serba armeo.

Mi apenaŭ volas ofendi la kreivan serban geniulon, sed mi ne povas akcepti lin kiel fondinto de naciisma ideologio.

⁹⁶ Albana teritorio en Grekio najbare al Albanio

⁹⁷ Eksaj albanaj teritorioj en suda Serbio apud Nisx

⁹⁸ Serba ekstremisto juxata en Hago

⁹⁹ Serba krimulo sercxata de internacia polico

La nomojn menciitaj de Berkoviĉ mi bedaŭrinde jam konis. Ili estis verkistoj kies interna fajro diableca estis venkinta. Nun ili troviĝis ĉekape de murdistaj ekspedicioj, etnaj purigadoj kaj genocidaj.

La krima vojo estis jam preparita dum jaroj, kontinuece: el patetiko de viktimo kiel subpremita popolo, persekvita, malbone traktita kaj murdita de aliuloj ĝis mistigado de ia folkloreca patoso. Se iu nobelisto, kiel Ivo Andriĉ, aŭ iu serba akademiano kiel Vaso Cubriloviĉ, unu el la pafistoj-atencantoj de Sarajevo en la jaro 1914, sekvita de eksplodo de la Unua Mondmilito, kuraĝis vidalvide al Eŭropo, kompili bizarajn ellaboraĵojn de la jaroj 1937-1939 je stilo de Gebelso por pereigado de la nacia estado de la popolo kaj ĉtato albana for de terfaco, kial ne agu tiamaniere ankaŭ iliaj posteuloj mezulaj por kiu virto estis la mensogo kaj kiuj sian nacian filozofion starigis super ĝi.

Aŭ kiel diras la ĉefarkitekto de la naciisma serba ideologio, Dobrica Ĉosiĉ: : Ni mensogas kreativece...antaŭpensinte”. Kaj tio ne estis kaŭzitaĵoj pro ekzistado, kiel opinias Ĉosiĉ, sed por kaŭzi la perforton, krimojn kaj timon pro kulpeco. Dume, por digneca popolo la murdoj, ruinadoj kaj rabadoj ne estas ecoj de digneco.

Kaŭzo por ĉi tiu granda defalo, antaŭ ĉio estas la naciisma eŭforio kiu havis fortan brakon sian pseŭdosceincon tutslavisman ene kaj ekster la lingva region slava, klopodas per ĉia rimedo neila aŭtoktonecon de aliuloj, do ankaŭ de albanoj. Kaj tio igas nin pensi ke la serba popolo eksentas ian inferiorecon al la aliaj.

La mondo estas jam klara pri fakto ke la aŭtoktona popolo apenaŭ povas konsideriĝi alveninta. La vero pri albanoj kiel posteuloj de iliroj¹⁰⁰ kaj aŭtoktonaj en siaj teroj, de tago al tago plifortiĝas per novaj atestaĵoj kaj verkoj ne nur de la albanaj sciencistoj.

La partopreno de verkistoj en la naciisma eŭforio, subkompreniĝas kiel ia malfeliĉaĵo por la arto kaj libereco de la homo.

En la libroj de la verkistoj menciitaj de Berkoviĉ enestas profunda maltrankvilo, en la vortoj kaj simboloj iliaj vagadis la malbono, akumulita dum jaroj kaj envolvita per nigra sango. Estis ja tiuj malhelaj imaĝoj kaj mortaj enhavoj.

¹⁰⁰ Granda popolo logxiginta tutan Okcidentan Balkanion kaj partojn de Italio

En ili, apenaŭ oni dedektis ia verkistan manon. La troa kaj aroganta akcentado de la orgojleco kaj nacia sento sukcesis nenigi iun ajn eblan distingon inter naciismo kaj patriotismo.

Estis somerofrue en Bavario kiam mi kolektis la flavajn pecojn de la ĵurnajoj alvenintaj el la restinta Jugoslavio kaj en la rando de la ĝardeno ilin mi forbruligis. Unu kaj porĉiam mi deziris min liberigi de terura angoro kiu estis humuliginta la homon tie en la tragika Balkanio. Mi rezignis plulegi la flavan preson kaj pli rare spektis TV.

En mia familia biblioteko mi komencis pasigi la tempon pli longe legante verkojn de la antikvaj aŭtoroj. Penigis min la vortoj: sango, eliro, lamento, pano. La jarcentofinon mi vidis enirante en mian korton ege laca kaj ĉikanita. Mi klopodis dialogi kun la humana, bela kaj viva kiu ankoraŭ enspiris ĉe mi.

La mondo daŭre rondiradis ĉirkaŭ mi laŭ la leĝo de perforto aŭ kiel mi ĉokece nomis kun miaj amikoj: kvazaŭ la serba demokratio plene floris. La homo valoris eĉ ne kvin asprojn.

Mi estis revenante hejmen, kiam en iu montrofenestro por libroj, tie kie antaŭ kelkaj jaroj oni mortopafis infanon dum iu paca demonstracio de albanoj, atentigis min karakteriza fotoĵo ekpaliĝinta pli multe pro honto. Estis serba batalanto, revenanta “venkoplene” el iu batalkampo en Kroatio, “donacante” al la mondo rideton karakterizan per vico de homaj fingroj, kiu pendis ĉirkaŭ lia kolo mallonga kaj dika.

La foto parolis pli ol kiu ajn libro pri teruro. Tiu batalanto, per tiu karakteriza pozo de venkinto, pensinta ke tiu fingroj de homoj ĉirkaŭ sia premita kolo estis kvazaŭ pimentoj rikoltitaj en iu ĝardeno de Ĉumadio aŭ Vojevodio, atestanta pri granda malordo en Balkanio. Tio estis tutcerte prototipo antaŭanoncite el sia studio de la konata verkisto Oruelo.

La tagoj maloportunis. La fingroj de la homoj ĉirkaŭ la kolo kaj tiu karakteriza pozo de la mizera batalanto okulfrapis al mi kaj precipe min terurigis la glacia silento de Eŭropo al kiu apenaŭ moviĝis eĉ la okulharo kiam oni sendis al ĝi kiel donacon la dehakitajn homkapojn. Sur mia aĵoj ĵus komencis etendiĝi la mortoombro, mi skribis al mia plumamiko: “Mi petas, diru al mi, por kiun ni verku?”

Lia respondo estis rapida kaj senekuivoka:

“Pri Balkanio mi jam scias kie troviĝas, sed Serbio probable ne troviĝas en Eŭropo.. ”

Li estis intelektulo en iu metropolo.

Dum la legado de la libro “Reĝlando de Osmanoj” de bone konata turkologo aŭstra Joseph von Hamer, de ĉapitro al la ĉapitro, mi malkovris grandajn mistikaĵojn en multaj verkaĵoj legitaj de mi antaŭe, pri kies vereco kaj valoroj mi estis dubinta. La perdita tempo doloris al mi kaj penigis min la homa kaj kreiva mizero de aŭtoroj venenigintaj generaciojn da legantoj kaj disigintaj popolojn.

Ĉikaze oni devas mencii, antaŭ ĉio, la Miton pri Batalo de Kosovo – kampo (Dardanio) , ties naskiĝon sur la spiritaj ruinaĵoj kaj ege traktatan en la historiografio de ambaŭ jarcentaj najbaroj- serboj kaj albanoj. Dum serboj deklaras la Batalon de Kosovo-kampo kiel sian justan, albanoj konsideras ĝin milito de la balkana koalicio kie unuafoje estiĝis unuiĝo pro granda malbono trafinta ilin.

Dum serboj la Miton pri Kosovo starigis kiel aferon ekzistanteca de serbismo kaj arde volas atesti sian aŭtoktonecon en fremda tero, albanoj ne suferas pro tia komplekso. Per la Mito pri Kosovo albanoj rememoras la malfeliĉojn kiuj kiomfoje trafis la popolojn de ĉi tiu regiono, ĉi lastaj forgesis la malamikaĵojn inter ili.

Ĉe albanoj la Mito kondukas al bonkompreniĝado, kunekzistado kaj paco. Tion ne akceptas la serba flanko pro hegemoniaj celoj.

“La Reĝlando de osmanoj”, ora ĉlosilo, malfermis al mi la pezan pordon de la malhela vilajeto kaj instigis min relegi multajn verkojn kiujn mi estis forĵetinta en la angulon de mia familia biblioteko. Mi malbenis la balkanajn verkistojn ĉar ili estis preterlasintaj vivecan ĉancon por plifortigi la kunekziistadon en la regiono.

Nia elstara verkisto monde konata, Ismail Kadare¹⁰¹ aliris al la pasinteco per nova sentemeco kaj historia vereco, respektante kaj aprecante ankaŭ la klopodojn de aliuloj dum la migrado disde la malproksima lumo de la malhela vilajeto.

Simile estis aginte ankaŭ la honorinda aŭtra historiisto Joseph von Hamer. Dudek jarojn li pasigis en la arĥivoj de osmanoj, serĉante la veron pri kio okazinta en Balkanio en la pasintaj tempoj.

¹⁰¹ Eminenta albana verkisto plurfoje kandidato por la Nobelpremio

Malgraŭ la klopodoj de la verkistoj kaj intelektuloj albanaj por starigi pacan dialogon kun la serbaj verkistoj, la kultura kaj fizika genocido al la albana etno en la restinta Jugoslavio daŭre ricevis katastrofecajn dimensiojn eĉ por la tuta regiono. Ĝis kie estis atinginte la paranojo kaj radikalismo de iu mezepoka serba politiko bone estas ilustrite per la jena anekdoto cirkulinta:

“Kion faras serbo kiam malhavas monon? Li iras al Kosovo, mortigas iun albanon kaj atendas Ĉeĉelon por ke ĉi tiu lasta sendu al li 50 DM por la murdita albano!”

Tiu maldolĉa vero, pli tragika pro mem la serba ĉtata politiko, rememorigas bizaran konsilon dum la tempo de Paĉiĉ¹⁰²:

“Nasku tiom da infanoj kiom da albanoj vi mortigas!”

Ne estas komento por tiu homa frenezaĵo. La perforto kaj krimeco disvolviĝis kontinue, antaŭpensite.

Kaŭzo po tiu tensiiĝinta stato, ne nur en la albana spaco, antaŭ ĉio estas la ellaboraĵoj kaj memorandumoj de la serbaj verkistoj, kiuj instigis la perforton kaj bibliajn elirojn. Terura estas ĉi tio, kiam la silent de Eŭropo estis falsa.

Oni devas ami la popolon kaj kulturon sian kaj mi eĉ ne kontraŭas ilin kompilantaj naciajn programojn. Sed mi tute kontraŭas tiujn ruinigantaj la homan trankvilon. Mia popolo ne akceptis la perforton kiel rimedo por solvi la konfliktojn.

Oni starigas la demandon:

Ĉu eblas eskapi de tiu probabla katastrofo kaj reveniĝi la paco en niaj teroj? Aŭ antaŭ tio ni devas skuegi la demonojn, Kapojn kaj vortojn. Nia plej sekura patrio estas la Homo.

Tradukis Bardhyl Selimi

Beletraĵoj

(Enesperantigitaj de Tomasz Ĉmielik enkadre de serio “Albana Literaturo”)

Ylljet Aliĉka

Sekreta interkonsento

(-Marrëveshje e fshehtë-)

¹⁰² Ĉxefministro serba en la regxa Jugoslavio

Kiam mi havis dek unu jarojn, mi streĉegis mian atenton, por ekscii, kie malapersas la kudrilo, per kiu Dina - sidante kun siaj koleginoj en la korto – brodadis tolon sur la ringo.

Ŝi ĵus finis dudek kvin jarojn kaj havis eksterleĝe unujaran infanon kun iu orgojla futbalisto.

Dina tiris fadenon – foje de malsupre, alfoje de supre, kaj ĉar ŝi tenis la kudrilon ĉe la kokso, mi timis, ke ŝi pikos sin.

Ĉi tiu kudrilo malaperadis sub la jupo, inter ŝiaj femuroj kaj tute nekomprenebla por mi estis la mekanismo, kiu elpuŝis ĝin supren.

Iun tagon ŝi preskaŭ tordiĝis de rido, kiam ŝi vidis, ke serĉante la kudrilon mi kliniĝis kaj rigardis sub la jupon el blua kretono.

Mi kliniĝis pli malalte, sed mi ne ekvidis, kie sin kaŝas la kudrilo, sed ion alian.

Dina ruĝiĝis kaj ekkriis kolere:

- Kion vi faras? Ĉu vi estas freneza! Kion vi serĉas tie, ci malgranda vagabondo?

- Vian kudrilon – mi respondis hontigite.

La mokrido de la koleginoj obtuzigis mian respondon.

Mi ne havos tiom da kuraĝo, por ankoraŭfoje rigardi, kie sin kaŝas la kudrilo sub la brodringo.

Iun pluvan tagon Dina sekrete vokis min al la pordego de sia domo,

Ŝi glatumis malsekajn harojn sur mia kapo kaj demandis:

- Kara knabo, ĉu vi farus ion por mi?

Ŝi estis pala, kaj ĉirkaŭ ŝia vizaĝo tordiĝis peĉnigraj buketoj

- Kion?

- Vi portos leteron al la domo de tiu futbalisto ĉe la najbara strato. Vi scias, kie?

- Kompreneble.

La sportisto estis konata en la tuta lando kaj ni, infanoj, fieregis, ke ni loĝas en la sama kvaertalo.

- Redonu la leteron nur al li – ordonis Dina. – Se li ne estos hejme, reportu ĝin al mi.

Kaj ankoraŭfoje ŝi tuŝetis miajn harojn per la mano. Mi estis en la sepa ĉielo.

- Kaj ĉu li scias, ke mi venos? – mi demandis forirante.

- Li scias, jes, li scias, ĉagreniĝu pri nenio, li akceptos vin tre bone, vi mem vidos.

La futbalisto loĝis en la belega vilao sur la korto kun pordego, kiu estis fermita, ĉar la hejmanoj timis, ke iu povas ŝteli al ili figojn, sed ni, infanoj, supersaltadis la altan barilon kun vitropecoj supre kaj forprenadis fruktojn, mordetante ilin pli frue. Ni devis mordeti multajn figojn, antaŭ ol ni trovis maturajn. La malmolajn ni forĵetadis, ĉar ili estis tiel agacaj kaj acidaj, ke ni tusokraĉegis.

Mi iris en pluvo, Mi ne povis rezisti al la tento por tralegi ĉi leteron. Kaŝita en iu pordego, atenteme mi elprenis paperfolion el la koverto kaj komencis legi kun timo,

La letero estis skribita mallerte, kiel per la mano de iu, kiu ne finis eĉ sep klasojn. Dina skribis:

Landi, mi pardonpetas, ke ankoraŭfoje mi afliktas vin. Pli longe mi ne povas zorgadi pri mi kaj la fileto. Li kreskas, bezonas manĝaĵon kaj vestojn. Mi ne havas monon, nur tiom, kiom de tempo al tempo mi ricevas por brodado. Vi scias bone, ke kiam mi iros al la tribunalo, vi devos pagadi al mi ĝis li finos dek kvin jarojn. Sed mi ne decidiĝos por tio, vi ankaŭ havas infanon kaj la tutan familion por vivteno. Mi volas, ke vi pagadu al mi negrandajn sumojn ĝis la knabeto finos tri, kvar jarojn.

Mi petas vin kiel homon, ĉar mi scias, ke pri la amo eĉ ne estas parolinde. Ne sufiĉas, ke ĉiuj moke rigardas min, sed mi ne scias, per kio mi vivtenu la fileton... vian... nian. Li similas vin kiel unu akvoguto al la alia, tio signifas li havas viajn grandajn okulojn.

Land, bonvolu kompreni min, ĉar alie... mi ne scias, kio plu okazos.

Furioza mi ekiris al la domo de tiu aĉa sportisto kaj pugnobatis la pordegon.

El la profundo aŭdiĝis voĉo:

- Kiu?

- Mi – mi kriis ekscitita.

- Kiu „mi”? Kiel vi nomiĝas?

Mia infana voĉo kolerigis lin.

- Mi – mi respondis tremvoĉe – mi havas leteron por vi.

- De kiu? – la voĉo iom mildiĝis.

Mi ne estis preta al tio. Do. , mi silentis. Mi ne povis ja diri, kiu donis al mi la leteron.

- De kiu vi ricevis ĝin?

- De ŝi – mi elbalbutis – ŝi petis, ke mi ne diru ŝian nomon.

Ŝajne tio estis konvinka, ĉar li malfermis la pordegon. Sed li ne plu fidis min.

- Nu, kion vi volas? – li kriis malŝate.

„Kaculo” - mi diris en la animo kaj fierege donis al li la leteron.

Li malfermis ĝin kaj eklegis. Kontente mi rigardis, kiel ĉi tiu idolo de la stadionoj ĝibiĝas, ju pli longe li legas dramajn versojn.

Li finis kaj diris nenion. Nur lia piedo nerve frapfrapis.

- Ĉu vi legis ĉi leteron - li demandis frakasita.

- Ne – mi mensogis.

Li suspiris profunde, ĉirkaŭrigardis kaj diris mallaŭte:

- Bone, atendu momenton ĉi tie, mi revenos post du minutoj – kaj li eniris la domon ŝanceliĝante kiel ebriulo.

Li revenis kaj donis al mi rulaĵon da monbiletoj per la tremanta mano. Li glatumis miajn harojn kaj diris:

- Tri miloj estas por Dina, kaj dudek lekoj por vi. Aĉetu kukon. Redonu al ŝi la monon, kaj nur poste revenu hejmen, ĉu bone, knabo?

- Bone – mi diris kaj volis foriri.

- Atendu... restu ĉi tie... Mi donos al vi iom da figoj – li proksimiĝis al la arbo.

- La maturajn – mi postulis.

- Bone, sed mi ne spertas pri tio – li ŝajnis iom afliktita.

- Sed mi scias, kiel elekti – mi alproksimiĝis kaj per la okuloj de spertulo komencis serĉi fruktojn sur la arbo.

La futbalisto videble perdis sian paciencon, kaj mi dume elektis malrapide, tuŝis, mordetis ĝis mi trovis dolĉajn figojn.

- Mi havas! – mi kriis.

- Tre bone – li diris kaj rapide kondukis min al la pordego.

Mi foriris kontenta post la farita tasko..

Mi kuris al Dina, kiu demandis min pri ĉio. Mi rakontis al ŝi precize, ankaŭ pri la figoj, sed tio apenaŭ interesis ŝin. Ŝi volis ekscii, ĉu mi havas leteron por ŝi, kaj kiam mi respondis, ke mi ne alportis ĝin, ŝi suspiris:

- Ruzulo, li lasis nenion skribita, sed ĉu estas pli grava pruvo ol la fileto.

Poste ŝi rememoris min, varme kisis mian vangon kaj antaŭ ol foriri, ŝi serĉis ion en la poŝo. Ŝi elprenis dek lekojn kaj diris:

- Aĉetu por vi kukon.

- Mi ne volas – mi respondis brave – mi ne faris tion por mono.

- Do, kial?

Mi silentis.

La sekvan tagon denove mi eksidis antaŭ Dina, kiam ŝi brodis. Dum ŝi babilis kun siaj koleginoj, mi kliniĝis, tremante, por vidi... kie malaperas la kudrilo.

Dina rigardis min, sed nenion diris. Ŝi ŝajnigis, ke ŝi ne vidas min,

Du tagojn poste, kiam mi denove kliniĝis, ŝi kroĉis al mi sian malŝatan rigardon kaj diris malrapide:

- Kion vi serĉas tie? Sufiĉas!!

Mi foriris hontigita.

Post monato Dina vokis min denove „kara knabo” kaj petis, ke mi portu ŝian leteron al la futbalisto. Mi konsentis tuj, sen pliaj klarigoj.

Kompreneble mi tralegis dumvoje tiun leteron, kiu grandparte ne ŝanĝiĝis, sed ĝia tono estis pli senespera kaj urĝiga.

Ĉi-foje la futbalisto tuj rekonis mon laŭvoĉe kaj kuris al la pordego.

Mi donis la leteron kaj atendis. Li volis montri sin kvieta. Sed denove li ne povis ekregi tremadon de la piedo.

- Serĉu figojn por vi.

Baldaŭ li alkuris kun mono, penspirante. Li donis al mi dudek lekojn kaj ne sciante kion diri, li demandis”

- Nu, ĉu vi trovis?

Li foriris, sen atendi mian respondon.

Mi redonis la monon al Dina. Ŝi kalkulis, murmuris ion subnaze, glatumis miajn harojn kaj foriris.

La sekvan tagon ŝi permesis al mi denove rigardi, kie malaperas la kudrilo. Kvazaŭ ŝi ne estus vidinta min.

Mi provis ankoraŭfoje post du tagoj, sed kiam mi rigardis sub la jupon, ŝi ekblekis kolere:

- Kion vi faras? Ĉu vi frenzeiĝis?

Mi foriris. Ŝiajn koleginojn tio amuzis denove, sed poste ili forgesis pri mi.

Mi jam sciis, ke ni interkonsentis sekrete pri tio, ke post ĉiu letero al la futbalisto mi povis nur unufoje rigardi tien, kie malalperas la kudrilo.

Pli-malpli post monato, kiam mi ricevis la trian leteron, Dina estis tre malagraba kaj malgaja. Ankoraŭ pli orgojla estis la sportisto, kiu ne kaŝis sian koleregon, kiam li nur ekvidis min.

- Atendu momenton – li diris malamike – serĉu figojn por vi.

Post momento li alkuris, rigardante dekstren kaj maldekstren, donis al mi la monon kaj neatendite eksplodis:

- Diru al ŝi, ke ŝi estu prudenta! Mi havas la familion, ĉu ŝi imagas, ke... - kaj li flustrigis sian voĉon.

Ŝajne li forgesis, al kiu li parolas, ĉar post momento li diris:

- Poste mi povos iel ordigi tion kaj kompreneble memoros pri mia filo kaj pri ŝi...

Estis malagrade rigardi lin. Li parolis al mi, kaj mi havis antaŭ la okuloj tiujn maĉojn, dum kiuj li ardigis homojn en la stadiono, tuj poste, kiam li tuŝis pilkon.

Sed rapide li ekregis sin:

- Diru ĉion al Dina aŭ onklino Dina, kiel vi nomas ŝin... Kaj bonan nokton ! – li mallaŭtigis la voĉon kaj foriris tra mallumo.

Sed post momento li alkuris denove.

- Mi forgesus... dudek lekojn.

- Ne, dankon, ne estas necese – ĉi-foje mi obstiniĝis.

Mi klopodis rakonti al Dina, kion mi aŭdis, kaj ŝi postulis, ke mi ripetu vorton post vorto, ŝi deziris eĉ koni la tonon de lia voĉo. Kelkfoje ŝi ordonis al mi ripeti la frazon: „Kompreneble mi memoros pri mia filo kaj pri ŝi”. Finfine ŝi diris kun amaro:

- Kanajlo, ĉu li tute forgesis, kio okazis inter ni!

- Pri tio li ne parolis – mi provis kreskigi en ŝi la malamon, sed miaj klopodoj ŝajne ne impresis ŝin, ĉar enpenŝinte ŝi demandis:

- Hm, kion li ankoraŭ diris?

- Nenion – mi respondis kun ia kulposento.

Ŝi glatumis miajn harojn kaj foriris.

La sekvan tagon denove mi serĉis la kudrilon malaperantan sub la brodringo. Sed Dina estis kolerega, rigardis min kun malŝato, kaj post momento kunpremis la femurojn.

La transdono de ŝia kvara letero okazis en silento. La futbalisto klarigis al mi, ke jam estas la lasta fojo, ke mi ne provu ankoraŭfoje, ĉar alie... Li ne permesis al mi preni eĉ unu figon.

Kiam mi redonis la monon al Dina kaj ripetis, kion diris la futbalisto, mi komprenis, ke tio signifas la finon de nia interkonsento. Kaj kulpas tiu fama sportisto

- Li nur parolas tiel – mi klopodis trankviligi Dinan – sed helpi vin li ja devos... Ne povas okazi alie, li timas. Kaj li tremegas ĉiufoje, kiam li vidas min.

Sed Dina ne volis ekkoni miajn argumentojn. Ni disiĝis malvarme, ŝi eĉ ne glatumis miajn harojn.

Neniam plu ŝi vokis min.

Kelkfoje mi sidiĝis antaŭ ŝi, kaj ŝi traktis min kiel aeron kaj obstine enbatis sian kudrilon en la tolon. Ŝi brodis kaj ploris.

Do, ĉio finiĝis inter ni.

Poste Dina malaperis dum kelka tempo kaj revenis sola, sen la fileto. Ŝi estis malfortiĝinta kaj pli silentema. Ŝi brodadis pli kaj pli longe, kaj li ŝotadis pli kaj pli multe da goloj. Kaj kiam li promenis kun sia belega edzino brak-ĉe-brake en nia strato, li ŝajnis, ke li ne konas nin. Kiomfoje ili preteriris, mi rigardis okulangle Dinan kaj volis krei:

„Ĉu vi donos al mi iun leteron por li aŭ ne? Rigardu ĉi kanajlon, kiel li fieregas pri sia edzino. Kvazaŭ nenio estus iam okazinta. Ne estas mia afero, nek tio interesas min, sed oni ne povas pardoni al li. Kio li estas? Granda heroo? Mi scias, kiel tremas lia piedo, kiam mi donas vian leteron al li”.

Sed Dina brodadis silente. De tempo al tempo ŝi ploris kaj ne ĉesigis la brodadon.

Luljeta Lleshanaku

La sekva atestanto

(Njĉe tjeter dĉshmitar)

Ho, kiel sence! Ĉu oni povas atendi, ke io fariĝos el nenio,

ke la infana ploro mem naskos sin

inter lavitaj kaj gladitaj litotukoj,

asepsaj iloj, en la malfermita glutejo de la korbo por miaj biologiaj vokaloj

kaj kun kuracisto el la nokta Deboro, kiu dormetas sur la tabureto

kiel mastrino atendanta la revenon de sia edzo post ĉasado?!

Duono de mia korpo, turnita kiel katapulto al la muro desinfektita per lisolo,
Ne obeos al la ordono de ekstere, por vekti malkontenton ĉe tri generacioj
sidantaj en mi
kiel unusola motivo de kontinuo.
Tio estos same malfacila kiel al birdo-krio ruligi lavangon.

Krakas la fenestro, ĝardenoj kun semita tabako
kliniĝas estimoplene antaŭ la Sinjoro, kiu kreis doloron. Sekvas ploro.
Ni rigardu, kiu el miaj avinjoj aŭ praavinjoj falis en ĉi tiun kaptilon,
kiu ateste elektis la korpon de mia filino,
por rakonti: kion ŝi vidis, kion ŝi aŭdis, kion ŝi tuŝis,
sed neniam kion ŝi pensas - la atestanto ne rajtas pensi
tuj poste, kiam li ĵuros al la malplena kovrilo sur la vero
per la mano de la analfabetino.

Ci estas unu el ni

(Ti je njëra nga ne)

El sep semajno-tagoj ok paliĝas
Sub la brakoj kaj sur la brusto kiel trelika vesto.
Vi estas unu el ni.

El sep virinoj ok havas varikojn,
Kaj la renoj kovritajn per lana zono.
Vi estas unu el ni.

La plej juna imitadis doloron de la patrino –
kun manoj sur la talio ŝi iras pli mallongan ĉirkaŭvojon al la vero.
Vi estas unu el ni.

Kun buŝo plena de ovoj ili rakontis sonĝojn
kaj sufokis per ŝtonoj kiel fajrojn bruligitajn de infanoj.
Vi estas unu el ni.

Aŭ vi malestimos ilin, aŭ ili malestimos vin,
se vi estas semo, kiu ne ellasas radiketojn.
Kaj kiam mi elpoŝigis malestimon kiel tranĉilon,
ili mallonge interrompis:
„Atentu, ĉar vi vundos vin. Remetu ĝin en la poŝon!”
Vi estas unu el ni.

Niaj homonimaj vivoj. La mia ne estis ia escepto.
Teksis ĝin mizero – tiu malnova skribmaŝino
sen akcentoj.
Vi estas unu el ni.

Mi, unu el ili,
kvankam mi troviĝis en du lokoj samtempe,

portadis malkaran antaŭsenton
pri alia vivo. Alternativa.

Kelkaj spasmoj de l' diafragmo

(Ca ulje e ngritje diafragme)

La urbo etendiĝis. Inter la sola buso-stacio kaj la tombejo estas kelkaj spasmoj de l' diafragmo.

Vidvino sidas sur la benko. Atendas. Kunpremas per fingroj monerojn por bileto.

Dum la unua duonjaro ŝi aĉetadis bileton monatan.

Kiam ŝi revenos hejmen, ŝi desinfektos sin per rakijo ĝis la ŝultroj, kvankam sur la korpo ŝi havas eĉ ne grataĵon.

Alia vidvino eliras el buso, turnas la kapon por memori ĝian numeron kiu estas sama kiel la numero de la morto-atesto.

Ŝiaj floroj kaj mamoj velkis.

Falas pluveto – kiel apostrofo

ĝi mallongigas la ponton inter du mondoj.

Vintre en la haltejo estas neniuj,

pro alkutumiĝo la ŝoforo atendas kun bruanta motoro.

kaj cigaredstumpo algluita al la buŝo.

Post momento la pordo mem fermiĝas, risortoj okupas sian lokon

Kiel frazoj en aserto.

Oni ne scias, kiu invitis kiel la unua al la danco:

Cu la urbo la tombejon aŭ la tombejo la urbon.

En la freneza tango la brakoj forpuŝas unu la alian, la koksoj altiras sin reciproke

kiel fluoj en la neŭtrala maro-zono.

En la loko sen nomo

(Në vendin pa emër)

Oni ne devas respondi skribe demandaron
nek lasi kun abomeno fingro-depremaĵojn.

Neniu fremdulo detruos ion
tie, kie ĉion konstruis fantomoj,
kaj ŝtonegojn por temploj oni posttiris kilometre
por ĝuadi la geometrion de ombroj.

Ne estas ŝlosiltruoj, ĉar kion oni povus ŝteli
en la urbo-ŝtato de mortintaj poetoj?
Leterkestoj defalas kiel malsekaj plastroj
de la brovohaŭto krevinta dum junulaj interbatiĝoj.

La urboj sen neonlampoj, sen belaj virinoj,
kun rideto *natural anti-cavity*,
kun stratoj kurantaj al la periferio, ĝis la kono-limoj,
kie diktatore regadas herbero.

Mi salutas. Respondas neniu.
Kian sencon havas feliĉo-deziroj al iu,
kiu naskiĝis kaj mortis samtage aŭ je la sama horo?

Jen, kie estas ĉiuj sur mia skribotablo –
sur la kovriloj de libroj la malgrandaj fotoj
kun la Edena ĝardeno en la fono,
algluitaj kiel kvitanco-folioj al la vestoj en la kemia lavejo.

Por sproni atenton

(Për pak vëmendje)

Mia filino ridas,
ke mi vestiĝas kiel infano,
ke ĉiam mi enŝovas pinglon en miajn harojn
kiel malgranda knabino kun blankaj ŝtrumpetoj
sur la balancilo, atendanta senpacienco
ĝis iu
puŝos ĝin unuafoje.
Aliaj ridas pri tio, kiel mi paŝas,
kiel mi manĝas per unu mano aŭ dormas sur la ventro.
Mi ankaŭ ridis pri mia patrino,
kiam ŝi iris al la kunveno de la gepatroj en la lernejo
kun haroj ankoraŭ malsekaj post la bano, kun kafo-restaĵo en la buŝanguletoj,
en nekonvena vesto, kun dikaj ŝtrumpetoj,
kun medaliono sur la brusto, flaviĝinta pro la suno kaj metita en la kadrojn
de la eksmoda kolumeto

Jen, ni estas nun kiel du planoj de la sama korto –
unu antaŭ, kaj la alia post la domo.
Ĉiu volas sproni atenton siamaniere:
ŝi enbatas kiel derviŝo pinglojn sub la haŭton,
kaj mi kunpremas ĉokoladajn arĝentfoliojn en buletojn.

Forpasis sinjoro Vasil Pistoli



La 28-an de oktobro 2012, alvenis el Nov Jorko la malĝojiga novaĵo pri la forpaso de sinjoro Vasil Pistoli, eminenta albana esperantisto, notinde kontribuante en la disvastiĝado de internacia lingvo en nia lando.

Lia familio venis el la albana urbo Struga (nun en Makedonio) , kiu poste instaligis en Shkodër. La patro estis panbakisto. Dum la Dua Mondmilito ĝi aktiviĝis kontraŭ la faŝista jugo, pro tio oni internigis patron kaj Vasil en la koncentrejo nazia en Prishtina (Kosovo) . Post liberiĝo, Vasil studis en Bulgario pri konstruinĝenierio, longan tempon deĵoris en Ministrejo pri Konstruado kaj poste instruis en Universitato de Tirana. Li kontribuis, kromalie, per siaj studoj en la kampo de konstrumaterialoj. Pensiiginte, li ne ĉesis la studadon kaj agadon surkampe de la inĝenieriaj sciencoj.

En la Ministrejo de Konstruado Vasil Pistoli subtenis sian kolegon Ĉefo Fico por starigi virtualan Esperanto-klubon kiu anstataŭus tiutempe esperantistan asocion enlande, en la kondiĉoj de totalisma reĝimo kiu ne permesis “nedekretitajn”, ne “kompartiemajn” asociojn. Tiel Esperanto komencis disvastiĝadi dank’ al sia agado kaj kunklubanoj nedeklaritaj tiaj... en la universitato kaj ekster ĝi per la kursoj senpagaj kaj broŝuroj simplaj.

Mi estis lia intima kunlaboranto en tiu agado ekde pli ol 50 jaroj. Komence mi estis ano de lia lernokurso malfermita de li aŭtune 1961 kune kun ing. Ĉefo Fico ĉe la eksa kulturdomo “Ali Kelmendi” en Tirana. Mi daŭrigis la kunlaboron pluen, aparte post la jaro 1990, kiam la neregistaraj organizaĵoj akiris la rajton de civitaneco ankaŭ en Albanio. Kvankam ĉirkaŭ 20 jaroj pli juna ol li, mi sentis min ĉe profesoro kiel kamaradon kaj amikon. Mi estas aprecinta, unuavice la modestecon, due lian riĉan kaj multflankan kulturon, neestingeblan soifon por scioj sur ĉiuj homaj kampoj, ne nur en sia malvasta specialeco, sed ankaŭ en filozofio, religio, historio, internaciaj rilatoj, kio estas klare esprimita en lia kontribuo kaj laboro por disvastiĝo de Esperanto.



Prof. Vasil Pistoli, maldekstre kun esperantistoj, inter ili la forpasinta izraelano Jozef Ŝemer

Tiu lasta, kiel sciite, estas tre nobla agado, ĉar ĝi strebas la bonkomprenemon inter la diversaj popoloj sur demokrataj bazoj, sen kiu ajn nacia diskriminacio kaj malegaleco, kiu konservas la naciajn lingvojn kaj kulturojn.

Ĉekape de la Albana Esperantista Ligo dum kelkaj jaroj kaj poste direktoro de la Albana Esperanto-Instituto, profesoro Pistoli sin montris tre aktiva en la kursogvdiado, lernolibra kaj metodika kompilado por albanoj, en tradukado de verkoj kaj libroj el Esperanto al la Albana kaj el la Albana al Esperanto, en propagando de la esperantista movado mem per la gazetaro kaj elektronika medio, en renkontiĝoj kun fremdaj esperantistoj. Li estas esplorinta ankaŭ la spurojn de la esperantista movado en Albanio komenciĝinta en Shkoder almenaŭ ekde la jaro 1907, de Lazër Shantoja, Cuk Simoni, fratoj Wilhelm kaj Mikel Koliqi, Mark Kakariqi ka, sed renkontitaj ankaŭ en la aliaj regionoj, kiel en Gjirokaster kun Ĉefo Fico, en Marbordo kun Janko Pali, en Tiranë kun dr. Hamdi Sulçebe kaj alie.

La jaro 1993 notis la stariĝon de la amasaj lernokursoj de Esperanto, komence en universitato, en Fakultato de Historio kaj Filologio, kie je la finiĝo de la lernokurso, ekzameniĝis 22 gestudentoj, poste en la Tutnacia Mezlernejo de Fremdlingvoj kaj Pedagogia Mezlernejo en Tirana, en aliaj mezlernejoj kaj elementaj lernejoj en Tirana kaj en la distriktoj.

Estas jam ĉirkaŭ 500 gestudentoj kiuj ekzameniĝintaj kaj ricevintaj la konfirmon de profesoro Vasil Pistoli per signo sur iliaj certigiloj akiritaj pri la elementa nivelo de Esperanto.



Prof. Vasil Pistoli maldekstre kaj mi kun fremdaj esperantistoj dum la vizito tra Tirana

Mi memoras emociplene tiujn tagojn, pluve kaj sune kiam profesoro, tiam 70 jara, nelaciĝema, alvenis piede kaj ĝustatempe en la halojn de la Fremdlingva Fakultato en Tirana aŭ de la Mezlernejo por lekci pri Esperanto. En la Fremdlingva Fakultato li eĉ okazigis disputon pri la antaŭecoj de Esperanto kompare al la aliaj tiel nomataj “grandaj lingvoj”, kiuj hodiaŭ prezentiĝas kiel “internaciaj”, sed envere ili ne ludas tiun rolon. Kontraŭe, ili nur domaĝas la naciajn kulturojn aparte de la malgrandaj popoloj, forrabas al centmilionoj da homoj, aparte al gejunuloj, multjaran tempoperiodon tre valoran por ilin asimili fuŝfuŝe, anstataŭ ke oni utiligu tiun tempon por ke profundiĝu en siaj studataj specialecoj. Tiel “la grandaj lingvoj” kreas privilegiaĵojn por kelkcent procentoj de la monda loĝantaro malfavore al la cetera plimulto, kaj kio estas malplejbona, ne solvas la problemon de la libera, facila kaj demokratia internacia komunikiĝado.

Lastajn jarojn, profesoro Vasil estis laborante por finkompili la grandan vortaron albana-esperanta, kiu pliriĉigos la fonduson de la vortaroj enmonde kaj helpas notinde al la enlanda Esperantista movado.

Profesoro Vasil estas helpinte sufiĉe multe ankaŭ por kvalifikiĝo kaj trejniĝo de novaj kadroj por instruado de Esperanto. Tiel, post la jaro 1997, Instituto, gvidata de sinjoro li, entreprenis grandan projekton: venigon de dekoj da albanaj gestudentoj al Internacia Studumo en Bydgoszcz, Pollando, pri Turismo kaj Internacia Kulturo, uzanta kiel laborlingvon ankaŭ Esperanton. Nun pli ol 20 el ili estas jam bakalaŭriĝintaj kaj eĉ du ankaŭ magistrataj de Internacia Akademio de Sciencoj de San Marino kun kiu tiu Studumo kaj nia Instituto kunlaboras. Sendube, tiuj ĉi bakalaŭriĝintaj studentoj estos la venontaj aktivuloj de la esperantista movado en Albanio, certe sur pli alta kultura nivelo, ol tiu de la maljuna generacio kiu tamen aŭdacis kaj sakrificis elspezante sian libertempon por tiel nobla idealo kia ja estas la esperantista idealo.

Bardhyl Selimi,

sekretario de la Albana Esperanto Instituto

La forpaso de prof. Vasil Pistoli estas granda perdo por ĉiuj ni.



Vasil Pistoli estis ankaŭ violinisto ĉe la ĥoro de universitato (la unua maldekstre de la diriĝento)



El la solenaĵo en Akademio de Sciencoj okaze de 80 jariĝo de Vasil, 2003



El la solenaĵo, dekstre s-ro Bardhyl Selimi



Vasil Pistoli en internacia renkontiĝo de esperantistoj



Vasil Pistoli en esperantista internacia renkontiĝo



Vasil Pistoli inter sia kolegaro de Ministrejo pri Konstruado



Vasil Pistoli antaŭ la dombloko desegnita de li



Vasil Pistoli en Usono



Vasil Pistoli en Novjorko, apud la hejmo de sia filo

Poeziaĵo el Kosovo



Agim Vinca¹⁰³

Kampano surkole!

(Rekviemo por si kaj miaj amikoj)

Estis sabato. La plej bela sezono,

Kiam mi ricevis bileton stampitan kaj signitan!

Nun mi estas libera, plene libera, karaj amikoj!

Havas mi surdorse sesdek kaj kvin vintrojn kaj somerojn

Kaj sepdekkvin eŭroj enpoŝe!¹⁰⁴

Mi povas fari kion ajn mi volas. Jes, mi ĵuras!

Skribi memoraĵojn pri si kaj la ceteruloj.

Lamenti mi por la revoj kaj iluzioj junulecaj..

¹⁰³ Eminentia nuntempa poeto el Kosovo

¹⁰⁴ Tioma estas la pensio akatuale en Kosovo

Povas mi eliri en Gërmi-n¹⁰⁵ ĉiun matenon.

Trinki kafon en vilao LIRA

kontraŭ nur kvindek centonoj;

Plenigi la polmojn per aero kaj klorofilo

Aŭ memveneniĝi per fumo kaj nikotino.

Mi povas vekiĝi antaŭ tagiĝo.

Dormi laŭvole ĝis tagmezo

aŭ vagadi dumnokte kiel somnambulo.

Mi povas protesti, lanĉi sloganojn, ĵeti ŝtonojn;

Kunfrontiĝi al la polico kaj eniri prizonon kiel iame.. Envane!

“Novaj regantoj rulas en Olimpo;

Jovi reĝas laŭ sia plaĉo...”¹⁰⁶

Kion ajn alian mi ne povus fari! Kion ajn!

Mi povas ĉirkaŭiri tra la stratoj tagnokte

Kun manoj profunde en la poŝoj aŭ en la tenujoj. Kial ne?

Ankaŭ tiuj traserĉantaj la rubujojn estas ja homoj, mi garantias vin.

Homoj. Kun granda “H”

Kiel nin diris iam niaj plej bonaj instruistoj

Kaj ni post ili niajn lernantojn..

¹⁰⁵ Gërmi- granda parko ĉerande de Prishtina.

¹⁰⁶ Versoj el La Ligita Prometeo de Eskilo

Estu feliĉa, oni diras al mi. Kaj mi estas. Kial ne estu?

Migjeni¹⁰⁷ ne ĝuis tian ŝancon. Por li tio estis ja fora revo..

Temas pri la aĝo.

Nek Naim¹⁰⁸. Ambaŭ ili forpasis frue pro tuberkulozo.

Luigji-n¹⁰⁹ mortigis la kuglo. Bilalo-n¹¹⁰ la tranĉilo,

Jusufo-n¹¹¹ la embusko en Untergruppenbah, trio

Enigmo de triobla murdo!

Nek la ruso Majakovski, kun kromnomo Volodja;

Nek la andaluziano Garsia Lorca, nek la turko Nazim Hikmet;

Nek la granda pelegriano George Gordon Byron,

Kiu eĉ la pavimŝtonojn instruis ribeliĝi kontraŭ tiranion,

Ne atendis ĉi tagon..

Kaj kiom multaj aliaj. Artistoj, poetoj.

Forpasis pli junaj ol mi, ankaŭ miaj amikoj.

La Aĝulo de Maki¹¹², nia De Rada¹¹³ jes ja.

¹⁰⁷ Granda albana poeto inter ambaŭ mondmilitoj

¹⁰⁸ Nacia renesanca albana poeto dum dua duono de XIX jarcento

¹⁰⁹ Poeto kaj politikisto en la komenco de XX jarcento

¹¹⁰ Opozicia poeto albana, mortigite en Usono far Sekurecservo komunisma.

¹¹¹ Jusuf Gervalla, poeto el Kosovo, murdite kun du aliaj en Germanio far Sekurecservo jugoslava

¹¹² Urbeto en Kalabrio, Italio, kie loĝas arbeŝoj, albandevenaj.

¹¹³ Granda albana renesanca poeto ĉe arbeŝoj en Italio

Forpasis kun unu gasterosteo enpoŝe sojle de sia naŭdekjariĝo.

Kiu kantantis: Alvenis la tago de Arbri¹¹⁴!”

Ĉu alvenis envere tiu tago?

Mi vidas la admonon en viaj okuloj:

“Ĉu vi konscias, amiko mia!

Ne iĝu lamentaĉulo, herezulo...

Ne decas al vi en ĉi tiu aĝo!”

Vi pravas. Mi akceptas.

Nun mi estas plene libera!

Mi povas reveni kien mi ekiris,

Hokkapti la oran fiŝon en la lagoakvoj,

Forkaptiĝu en reto kaj engluti mem la logilon..

Mi povas malaperi kaj foriri kien ajn mi deziru,

En Eŭropon, Usonon, eĉ pli fore.

Mi povas aĉeti novan ŝnuron, kiel Klosi¹¹⁵

Kaj surmeti tirŝnuron engorge sur ĉambreto

Tie subtegmente

¹¹⁴ Alia nomo por albanoj

¹¹⁵ Verkisto, publicisto kaj tradukisto albana, memmortiginte per ŝnuro printempe 2012

En Tirana, plene de etaj kaj egaj tiranoj.

Mi povas tuŝiĝi subite al kelkiu veturilo iutage,

Preterpasante la straton “Eqrem Çabej”

Kaj premiĝu al la varmega asfalto..

Kiom multe da eblecoj estas tiucele, karaj amikoj.

Ĉu tio ne estas enviinda?

Mi povas skribi testamenton kiel Dhimiter Pasko¹¹⁶

Kaj postlasu ordonojn al edzino kaj gefiloj:

“La patrio estas ja patrio, ankaŭ kiam ĝi mortigas vin!”

Pardonu, kiam ĝi pensiigas vin!

Kun sepdekkvin eŭroj ĉiumonate

Panon, akvon, lakton, medikamentojn, mortveston kaj ĉapelon...

Kaj la eĥigan titolon Profesoro Doktoro

Pendinte kiel kampano surkole!

Kiel kampano surkole!

Kampano surkole!

Surkole!

Ah!

¹¹⁶ Eminenta albana verkisto kaj ekonomisto meze de XX jarcento

Fragmento el la romano albana¹¹⁷

Kapllan Resuli¹¹⁸

La vidvino de la maristo¹¹⁹


¹¹⁷ Provlegita de sinjoroj Sen Rodin kaj Edmond Ludwig

¹¹⁸ Kapllan Resuli, kun patrino albana kaj patro bosnia, naskiĝis en Ulqin (Ulcinj), urbo kompakte kaj plimulte albane loĝata nuntempe en Montenegro (ekde la jaro 1878). Kapllan sin distingis kiel talento en la beletro per rakontoj pri la vivo de maristoj, ekde l'infanaĝo. Li studis en la universitato de Skopje (Makedonio), kie oni arestis lin pro politikaj vidpunktoj kaj kondamnis al du jaroj da enprizonigo. Poste li revenis al Ulqin, de kie li fuĝis al Albanio. Lia romano "La perfido" rikoltis furoran sukceson kaj la reĝimo komunisma albana subtenis lin forte. Temis pri la partizana milito en Kosovo kaj perfideco de albanoj far serbaj komunistoj. Sed en la 70-aj jaroj oni arestis lin pro politikaj vidpunktoj. Fakte li lanĉis kelkajn tezojn pri la origino de albanoj. Laŭ li, albanoj ne estas posteuloj de iliuroj, sed popolo turano-mongola alveninta ĉi tien de Azio kune kun bulgaroj en la IX-a jarcento, do post la slavo, kio koincidas kun la serbaj tezoj. La reĝimo komunisma kondamnis lin al 49 jaroj da enprizonigo. Li liberiĝis nur en la 90-a jaro kaj tiam li fuĝis al Genevo (Svisio). Tie li daŭrigis sian studadon pri albanoj kaj pliprofondiĝis en siaj antaŭaj tezoj. Pro tio, Akademio de Sciencoj de Serbio kaj Makedonio akceptis lin kiel sian membron kaj aljuĝis al li la titolon de doktoro-profesoro.

Lia reputacio ĉe albanoj estas tre malbona ĝuste pro liaj kontraŭalbanaj vidpunktoj. Sed lia beletraĵaro estas ja interesa. Je kelkaj aspektoj, tio rememorigas al mi la noveliston Ivo Andriĉ, cetere same kontraŭalbana intelektulo.

¹¹⁹ Unuafoje, tiu novelo publikiĝis en Prishtina en la revuo "Jeta e Re" (La Nova Vivo) en la jaro 1957. La aŭtoro reviziis kaj republikigis ĝin en la jaro 2003

La historio apartenas al la komenco de XX-a jarcento. La ĉefrolanto, Dĵanfize, (albane Xhanfize) estis analfabeta albana knabino. Ŝi enamiĝis, ekde sia dektrijariĝo, al bela knabo deksejara montenegrana, Ivano. Ŝi renkontiĝis kaŝe kun Ivano en ties hejmo dank' al amikeco kun Darinka, fratino de Ivano. Sed la patro de Dĵanfize edzinigis sian filinon al junulo en Ulqin. La duonpatro de la junulo, ege seksumema, donis al la junulo narkotaĵon ĝuste tiom kiam li estis eniranta en la ĉambron la unuan nokton de la geedziĝo. Tiel, anstataŭ la novedzo, en la malhela ĉambro, laŭkutime, la knabinon malvirgis la duonpatro. La morgaŭon, la junulo iris al navigado kiel maristo. Post kelkaj tagoj, alvenis la novaĵo de lia droniĝo aŭ malapero en la maro. Dume, la duonpatro, Shaban Shkozeti, daŭre seksumis kun la novedzino eĉ dum la ĉeesto de sia edzino. Li eĉ gravedigis ŝin. Post kelka tempo, informite de sia filino pri la okazintaĵoj, la patro de Dĵanfize nuligis la geedziĝon kaj akceptis ŝin denove en la hejmo. Li reedzinigis ŝin al la vidvo Sadik Ficka, mezaĝulo, kiu havis kelkajn infanojn. Pasis kelkaj jaroj kaj subite oni eksciis pri la murdo de Sadik. Plejverŝajne, lin murdis mem Shaban, samkiel eble estis okazinta ankaŭ al unua edzo. Ĉi lasta venis al la hejmo de Dĵanfize por seksumi kun ŝi sed sensukcese. Dume, ŝin subtenis per nutraĵoj kaj aliaj bezonaĵoj la filo de Sadik, Dĵela Ficka, viro kun forta karaktero, same maristo. Konvinkite, ke la murdisto de sia patro estis Shaban, Dĵela murdis iunokte ĉi lastan. Dĵanfize



Mi eklegis. La intrigo estas vere interesa, komparebla kun "The Wuthering Heights" de Emily Bronte, kiun mi kelkfoje trastudis kun miaj kolegoj. La traduko tamen postulas zorgan redaktadon...
Valdas Banaitis, Litovio

Titolo en la originalo albana: *Vejusha e detarit*
Eldonejo "Milosao", Saranda, Julie, 2003

Ĉapitro XII

Atendante Ivano-n, Dĵanfize ekpensis ke ankaŭ li aranĝos trompilon kiel Dĵela. La vivo estis instruinta, streĉinta ŝin, per malfeliĉaĵoj. Kion ajn ŝi estis entrepreninta en la vivo, maloportunis. Maloportuna estis la unua geedziĝo, la rilatiĝo al Shaban Shkozeti, eĉ ankaŭ la dua geedziĝo. Maloportune rezultiĝis ankaŭ la klopodo por ekrilatiĝi al Dĵela. Ŝi estis konvinkita ke, eĉ se ŝi apogos sin al la verda cedro, ĉi lasta ekŝrumpo en siaj manoj.

Malakurate iris ĉio. Blankan tagon ŝi apenaŭ vidis. Ne ĝuis eĉ unu ĝojon. Dume, aliaj virinoj - vidvinoj, pli aĝaj ol ŝi, eĉ tute malbelaj, estis ĝuantaj la vivon. Ili trovis amantojn, jen ene de la familia rondo, jen ene de la loĝkvartalo, kaj kontentiĝis kaj konsoliĝis, unuvorte vivadis. Dum al ŝi nenio iris bonorde. Ĉu tiel ŝi pasigos la vivon?! Ĉiam tiel finiĝos la deziroj kaj entreprenoj, klopodoj, revadoj?! Tiel ŝi krepuskiĝos la vivon?! Ĉu neniam, neniam frapos la sorto al ŝia pordo?! Neniam ŝi ne ĝuos la veran amon, masklon, veran viron?! Jen, ankaŭ Ivano, tiu kiu iam amis ŝin tiom arde, tiu kiu ankaŭ hieraŭ vespere, tie en Rena, kaj hodiaŭ dumtage, kiam lin renkontis surstrate revenante de la patrino, promesis kaj certigis ke ĉivespere alvenos, nepre alvenos, tiel ja diris,

kun ses infanoj ekamis Dĵela-n, sed ĉi tiu ne respondis al ŝiaj deziroj, kvankam ege lin allogis la beleco de sia bopatrino. Iutage, Ivano, kiu fariĝis same maristo, alvenis en la hejmon de Dĵanfize kun Dĵela, sia ŝipkamarado, sed ankaŭ samideano je ideologio socialista. Ambaŭ eksaj amantoj decidis rekomenci sian rilaton. Ŝi eĉ naskis sepan, bebon, ĉifoje de Ivano kaj definitive kuniĝis kun li por pasigi la restantan vivon feliĉe.

sed ne alvenas. Kial li ne alvenas?! Kial li malfruiĝas?! Li devas esti kompreninta jam ke ŝia animo bruladis por Ivano ekde sia infanaĝo, des pli brulas nun, kiam ree vekiĝis la animaj sentoj, iamaj revoj kaj deziroj. Li ne sciis, nek sentis, nek komprenis ke al ŝi minuto ŝajnis horo. Kun oreloj direktitaj tie, al la kortopordo kaj kun streĉita animo, ŝi atendis senpacience Ivanon, kiu tute hazarde estis enirinta en sian vivon, ekde kiam ŝi estis tute etulino, dekdujaraĝa, kaj denove li hazarde ŝin renkontis.

Pro pezaj malfacilaĵoj, ŝi preskaŭ forgesis lin kaj eĉ ne supozis ke renkontos lin iutage.

- Ĉu vere hazarde li alvenis?!- sin demandis Dĵanfize. Ĉu ne venigis lin Hazreto Hizro¹²⁰?!”

Pensante tiel, la kortopordo krakis “krc!”.

Ŝi eksaltis kaj eliris. Tiumomente Ivano riglis la pordon kaj turnis la vizaĝon al Dĵanfize, kiu kurante sin ĵetis al li. Ankaŭ Ivano plilongigis la paŝon kaj, meze de la korto, ĉe la puto, ambaŭ sin ĉirkaubrakis per la forto de nostalgio pro tiom da jaroj, dum kiuj ili ne vidis unu la alian, pro nostalgio de la unua amo. La lipoj de Dĵanfize, post kiam ili ŝoviĝis sur lian vizaĝon, sur liajn frunton kaj okulojn, serĉis ankaŭ liajn lipojn, kaj ĵus trovinte algluiĝis al ili kiel sangosuĉiloj, kisis ilin pasie kaj suĉis, ĝuste tiel, kiel ŝi kisis kaj suĉis estinte knabino, malesperigita, ĉar oni fianĉigis ŝin al viro, kiun neniam antaŭe ŝi estis koninta nek vidinta.

-Venu enen!- ŝi diris kaj tiris lin per brako, kvankam tio ne estis bezonata ĉar Ivano estis alveninta tiucele.

Ŝi malbutonumis lian palton, demetis kaj pendigis ĝin sur najlon, malantaŭ la pordo, poste diris:

- Sidiĝu sur kanapo, apud la fajrujo, varmigu vin!

Ĉar Ivano, antaŭ ol sidiĝi, proksimigis siajn manojn al la fajro kaj frotis ilin pro malvarmo, eĉ blovis al ili, ŝi diris:

- Ĉu ci volas ke mi plenigu ankaŭ la karbardaĵujon¹²¹ per ardaĵoj?
- Ne estas bezonate, Dĵana. Ĉi tie varmas, jen, mi jam varmiĝis.
- Jes, ĉi tie varmas, Vano. Mi gardis la fajron brulanta por ci, ĉar la etuloj ne estas hejme.
- Kie ili estas?- demandis li.
- Ĉe mia patrino!
- Ĉu pro tio hodiaŭ ci estas tie ĉi?!
- Ne, mi venis por ci. Mia koro sentis kaj deziris vidi cin. Mi ne povis atendi ĝis noktiĝo por ke venu ĉi momento. Hodiaŭ la tutan tagon mi estis tiom maltrankvila. Kaj ju pli multe proksimiĝis la momento de nia renkontiĝo, des pli multe mi maltrankviliĝis. Ci ne povas supozi kiom mi atendis!

¹²⁰ Hazreto Hizro- sanktulo en la islama mitologio
¹²¹ Hejtigilo uzata kutime en Oriento

- Ci ĉiam maltrankviliĝis kiam ni renkontiĝis. Tute ne ŝanĝiĝis. Nur, eble ŝajnas al mi, sed ci fariĝis pli bela..
 - Eh, ci! - diris ŝi, frapante malpeze permane al lia vizaĝo - ĉiam nur mian belecon ci rigardis!
 - Cia beleco estas la unua kozo kiu okulfrapis min, sed mi rigardis kaj ŝatis ankaŭ la belecon de cia animo, Dĵana! Pro tio mi eĉ ne edziĝis. Mi vivis kun la memoro pri ci kaj la espero ke, kiu scias, verŝajne la sorto permesos nin renkontiĝi ankoraŭfoje en la vivo. Mi ege bedaŭris pro la droniĝo de via unua edzo, sed tiom multe mi ekĝojis, ĉefe ke ci ne havis infanon kun li. Espero vekiĝis ĉe mi por kuniĝi denove, sed subite mi ekscis ke oni denove edzinigis cin al alia maristo, kaj ke vi naskis infanojn. Tiam mi perdis ĉiun esperon. Mi pensis ke mi perdis cin definitive.. Malgraŭ tio, mi neniam fianĉiĝis al alia virino, des malpli edziniĝis. Neniam mi amaris kun alia virino..
 - Ŝajnas tio al mi nekredebla!- interrompis lin Dĵanfize sincere.
 - Ci povas kredi min, povas ne kredi, sed cia Ivano estas virga. Ne nur ĉar ankoraŭ mi ne amaris kun alia virino kiel indas, sed post ci, mi eĉ apenaŭ tuŝis alian virinon permane.
 - Nekredeble!-diris denove Dĵanfize.
 - Ni, maskloj, ne posedas himenon, sed eĉ se ni havus, ci tuj konvinkiĝus ke Ivano estas virga.
 - Ĉu vere?!
 - Vere!
 - Nu, ĉivespere mi forrabas de vi la virgecon!- diris Dĵanfize, ridetante dolĉe kaj eksidante sur ties genuoj.
- Iliaj lipoj denove kuniĝis kaj longan tempon ili ne disiĝis.
- Ĉu ni, unue, manĝu iom da pano?- petis ŝi lasante liajn lipojn.
 - Kiel ci volas, Dĵana! Ĉivespere, mi estas je via dispono. Faru kun mi kion ajn ci volas. Nur ne cirkumcidu min!
 - Ha-ha-ha!- ekridis Dĵanfize, ĉar rememoris ke iutage ŝi estis eniginta lian prepucion en tondilon, dirante - Mi cirkumcidos cin!
- Kaj li, timante ke ŝi vere fortranĉos tion, kiel oni kutime agas kun ĉiuj muslimaj knaboj, tuj retiriĝis de ŝiaj manoj, kriante:
- Ĉu ci estas freneza Dĵana? Kiamaniere mi povos fiki cin, se vi tranĉos ĝin?!
- Dĵanfize ekstaris kaj alportis la manĝotableton, metis antaŭ Ivano virŝafan kapon, tason da prunkomposto, lignan kuleron, tason da jogurto, poste ankaŭ botelon da brando, kiun tiutage ŝi aĉetis ĝuste por li, certa ke li alvenos.
- Ĉu ci drinkas brandon?!- demandis Ivano, mirigite.
 - Ĝis hodiaŭ, mi ne drinkis, sed ĉivespere ni drinkos kune, ĉar mi bone scias ke tio plaĉas al ci!- diris ŝi kaj malŝtopis la botelon.

Unuafoje, la brando eniris tiun domon. Tiutempe en la muslimaj familioj oni ne enkondukis brandon eĉ kiel medikamenton por desinfekti la vundojn, ĉar tion oni

konsideris peko. Tamen, estis ankaŭ muslimaj viroj kiuj drinkis kaj ebriiĝis, sed ne virinoj. Eĉ tiaj muslimaj viroj estis raraj. En la tuta urbo oni povis nombri ilin per la fingroj de unu mano. Se la nombrado pasis al la alia mano, tuj oni rimarkis, ke iu el ili mortus, aŭ lin trafus apopleksio kaj paralizigiĝus.

Dĵanfize ekprovis brandon unua- kaj lasta-foje en la domo de Ivano. Ŝi estis lekinta la brandoglaseton por montri al li kiom arde ŝi amas, kaj ĉar ŝi estis pekinta kun li, kiel amorante kun kristano aŭ ŝkjao¹²², ŝi volis montri ke, ĉirkaŭbrakante lin, ŝi ne plu neglektos iun ajn alian pekon.

Ivano, siaflanke, ekdrinkis brandon je dekkvarjara aĝo. La brandon produktis la avo per ĝardenaj prunoj. Nepre, li drinkis kaŝe kaj po iome. Dĵanfize sciis tion ĉar ĉiufoje kiam ŝi renkontiĝis kun li, Ivano nepre drinkus unu glaseton, ne pro animdeziro, sed por iĝi iel pli vireca kaj kuraĝa, iom pli aŭdaca kontraŭ ŝi, kiu permesis al li kisi kaj karesi, sed ne seksumi.

Ĉar nun mankis la brandoglasetoj, Dĵanfize plenigis du kafoglasetojn. Ŝi tostis kun Ivano kaj trinkis gluteton. Momente ŝiaj okuloj ekbrilis, malfermiĝis kaj pleniĝis de larmoj.

- Nu, ne nur larmojn, sed eĉ la okulglobojn ci eltiru, ĉar ĉi-nokte mi tamen drinkos - ŝi diris al la brando, kaj denove trinkis alian gluteton eksidante apud Ivano.

Ankaŭ li levis la brandoglaseton. Poste enigis la manojn kaj la kuleron en la virŝafan kapon, eltiris ties cerbon kaj ekmanĝis plezure. Li eĉ laŭdis Dĵanfize ĉar ŝi estis boliginta ĝin bone, enkondukante ankaŭ spicaĵojn, menton, petroselon kaj nigran pipron. Li ege ĝuadis tion, tiom multe, ke li eĉ lekis ankaŭ la ostojn.

La fajro unuflanke, la brando kaj virŝafa cerbo aliflanke, kaj precipe Dĵanfize, kiu de tempo al tempo brakumis kaj kisis lian kolon, ege varmigis lin. Ivano demetis la jakon, ŝuojn, dum Dĵanfize same varmiĝis, ĉar Ivano estis malkovrinta ne nur ŝiajn genuojn sed ankaŭ la koksojn kaj tuŝis inter ili; tial ŝi malbutonumis sian robon, alportitan de Dĵela antaŭ kvar noktoj. Rigardante la cicojn preskaŭ nudigitajn, Ivano enigis sian kapon inter ilin kaj kisis arde, tiel kiel li kutimis fari antaŭ ŝia edziniĝo. Tiam, ankaŭ Dĵanfize enigis sian manon inter liajn femurojn kaj kaptis tiun aĵon tiel, kiel ŝi faris tiam. La penis de Ivano estis erektita kaj Dĵanfize apenaŭ paciencis plu.

- La cicoj- li diris kisantempe ilin – iom grandiĝis kaj ŝveliĝis, ili ne plu estas etaj kiel tiam!

¹²²

Ŝkjao- tiel nomis albanoj la slavokristanojn.

- Kompreneble, Vani - ŝi tuj respondis. - Ili mamnutris ses infanojn, ĉiu dum

du-tri jaroj, ĉar ankaŭ kiam mi naskis alian infanon, du antaŭaj plusuĉis.

Malgraŭ tio, la cicoj apenaŭ pendas. Vidu kiel ili staras eĉ sen mamzono.

Ŝi ekstaris, demetis la robon kaj ankaŭ la mamingon kaj montris la cicojn, kiuj vere ne pendis.

Ekstaris ankaŭ Ivano kaj ĉirkaŭbrakis ŝin kisante kaj mordante la cicojn, sed malpeze, por ne postlasi signojn.

- Ili estas ja mirindaj, Dĵana!- li diris. - Pli belaj ĉinokte ol kiam ci estis knabino!

- Jes, ja, mi tion diris! La cicoj fariĝis pli belaj!.. Kial ci kvazaŭmordas ilin?!

Mordu, kiom ci deziras kaj volas! Nun ili estas ciaj! Mi ne iros al la edzo, do ci ne devas savi ilin aŭ timi postlasi signojn, kiel iame! Mordu do! Mordu Vani!

Mordu por nun kaj por tiom da fojoj, kiam mi ne permesis tion al ci!

Kaj Ivano mordis, sed denove ne tiom forte.

- Pli forte, Vani! Pli forte!

- Ivano mordis ankoraŭ pli forte, rigardante al la okuloj kaj atendante ke ŝi ekkriu pro la doloro. Sed ŝi ne kriis. Male ŝi ree diris:

- Ankoraŭ pli forte!

Tiam Ivano enfiksis siajn dentojn per la tuta makzela forto. La cico krakis enbuŝe kaj al li ŝajnis ke li estis forŝirinta ĝin. Je lia plej granda miro, Dĵanfize ree ne sentiĝis. Nek "oh!" ŝi eligis.

Li delasis la cicon kaj vidis kion li faris. La cica peco estis enloke, sed kun sangumita ringeto, kun la dentosignaj liaj. Ivano kisis ĝin kaj diris:

- Pardonu Dĵana! Mi postlasis signojn!

- Ne gravas, ne gravas! Mi mem volis ke ci faru tiel. Nun ĝi aspektas pli bela!- diris ŝi.

- Ankaŭ ci fariĝis pli bela, kaj ne nur la cicoj! Vidu ĉi tiujn koksojn, Dĵana!- kaj karesis la koksojn sur tiuj blankaj silkaj kalsonetoj alportitaj de Dĵela.

- Vidu ĉi zonon kaj ĉi femurojn kaj koksojn! Ci fariĝis multe-multe pli bela ol ci estis, mia Dĵana!

Li enigis fingrojn en la ŝelkon de la kalsonetoj. Li volis malsuprenigi ĝin, sed ŝi ne lasis, tenante la manon.

-Atendu ĝis ni finmanĝos! Ankoraŭ vi ne frandis la prunkomposton. Mi pretigis ĝin bone. Frandu, frandu! - diris ŝi, tirante lin eksidi.

Ivano eksidis denove ĉe la manĝotableto kaj plu manĝis kaj drinkis, sed nur per unu mano, la maldekstra, dum la dekstran li metis inter la femurojn de Dĵanfize. Ankaŭ Dĵanfize manĝis nur per unu mano, ĉar la maldekstran ankaŭ ŝi tenis tie, inter liaj femuroj. Ĉar Ivano enigis la fingrojn ankaŭ sub la kalsoneton, Dĵanfize respondis per la sama ago: enigis la manon sub la pantalonon. Kaptinte lian penison, mire ŝi diris: - Bu, bu, bu, kiom ĝi grandiĝis! Kiam ni amoris, ci ne havis ĝin tiom granda!

Ŝi eligis la penison el la pantalono por pli bone rigardi kaj tuj mallevis siajn lipojn sur ties kapon, kisis kaj frotis, samkiel ŝi estis frotinta ĝin, kiam Vani estis dekkvin- deksesjarulo, dum ŝi estis dektri-jarulino. Kisante denove la penisokapon, ŝi ankaŭ lekis ĝin perlange, kvazaŭ sukerkanon, enbuŝigis kaj elsuĉis ĝin.

- Sufiĉas Dĵana, sufiĉas!- diris li, forigante ŝian kapon. - Sufiĉas, alie elverŝiĝos la salepo¹²³!

Rigardante mire al liaj okuloj, Dĵanfize diris:

- Ci ne forgesis eĉ la salepon?

Tiutempe Dĵanfize nomis "salepo" la spermon, kiun Ivano verŝis sur ŝiajn koksojn, post kiam ŝi finekscitis lin frotante permane.

- Nenion mi forgesis, Dĵana, nenion! La tutan vivon mi pasigis nur kun la memoro pri ci, nur sub cia ombro, eĉ kiam mi fermis la okulojn por dormi, ci aperadis ensonĝe!

Dĵanfize ĵetis siajn manojn sur ties kolon, kisis kaj demandis:

- Ĉu vere ci amas min, Vani?!

- Mi amas cin, Dĵana!

- Tiel, kiel ci amis min iame?

- Tiel, eĉ pli multe!

- Ĉu ci ne bedaŭras ke mi ne plu estas virga kaj pura, netuŝita de maskla mano, kiel mi estis, kiam ni kune amoradis?!

- Mi ne povas diri ke ne bedaŭras. Sed la amo ne postulas virgecon, nek purecon. Krome, ci ne estas ĉiesulino. Kion ajn ci faris, ĝin faris kun cia edzo, tiel kiel agas ĉiuj virinoj, tiel kiel agas ankaŭ miaj fratinoj, tiel kiel agis ankaŭ mia patrino kun mia patro. Io ne malbona por la fratinoj, por la patrino, ne povas estis malbona por la ceteraj virinoj, nek por ci.

- Tiel estas, Vani, - diris ŝi. - Nur ke cia patrino, cial fratinoj, ne ŝanĝis siajn edzojn, dum mi...mi estas ŝanĝinta du virojn...Ĉinokte ci fariĝos la tria!

¹²³

Viskoza trinkaĵo

- Tia estis ja cia sorto kaj la mia! Se ni estintus pli bonŝancaj, samkiel nun ci estas la unua virino en mia vivo, tiel ankaŭ mi estus la unua viro en cia vivo. Ni ne povas kontraŭstari la sorton! Tia estis nia sorto! Ĝis kiam ni havos alian sorton, pli bonan, pli belan kaj pli dignan, ni devos akcepti ĉi tiun kaj ordigi niajn vivojn tiel, kiel eblas!

Li ĉirkaŭbrakis Dĵanfize-n je la kolo kaj lipkisis ŝin. Disiĝinte de liaj lipoj, Dĵanfize diris ekscitite, kun voĉo malfortiĝinta:

- Mi ne povas plu pacienci, Vani! Prenu min en viajn brakojn! Prenu, mi petas tuj kaj ĉirkaŭbraku ... premu kaj...Vani, ne plu mi povas pacienci. Mi brulas, Vani, mi brulas!

Ivano turnigis ŝin sub sin, tie sur la kanapo, enmetis la fingrojn sub la ŝelkon de la kalsonetoj, malsuprenigis ĝin malrapide, rigardante la umbilikon, la ventron kaj la pubon, nerazitan de post la tempo kiam ŝi estis seksuminta kun la edzo. Poste li enmetis inter la koksoj la manon, dum Dĵanfize, skuinte la genuojn por ke ili glitu malsupren, malfermis iom la gambojn, por ke li povu trapasigi libere lian manon kaj tuŝi laŭdezire.

La mano de Ivano pasis malpeze meze de la ŝiaj koksoj. Tuŝante dolĉe nur la enirejon, kiel tiam, antaŭ multaj jaroj, kiam li timis malvirgi ŝin, li demandis:

- Kaj ĉi tiu, ĉu plibeliĝis?!
- Tion mi, povrulino, ja ne scias! Jen, rigardu mem!- diris Dĵanfize kaj malfermis la gambojn komplete, por ke li rigardu ankaŭ tie, ĉar varmegis ŝia animo. Sentis ŝi bezonegon ke liaj okuloj rigardu ĉiun parton de la korpo, ke liaj manoj tuŝu, karesu kaj frotu ĉiun parteton.

Ivano sin ĵetis sur ŝin tuje, frotante permane kaj perfingre, sed denove nur la vulvon, dum Dĵanfize atendis ke li enigu tien ne nur la fingrojn. Ne plu estis kiel iame, kiam ŝi diradis timeme:

- Atentu, ne malfaru min, ĉar la virgecon mi volas donaci al mia edzo! Ĉifoje ŝi ne nur ne diris tion, male senpacience ŝi atendis ke li enigu la tutan penison enen. Sed la kanapo estis malvasta kaj ŝi ne sentis sin komforte tie. Tial, ŝi diris:

- Atendu, atendu! Mi kunportos matracon, ĉar ĉi tie, surkanape, ni ne estas komforte.

Kaj ŝi ekstaris kaj iris rekte al la pordo de la dormoĉambro, svingante, balancante kaj fleksiĝante karese kaj afekte, ĉefe per la koksoj kiuj luliĝis dekstren- maldekstren.

La moviĝado de ŝiaj skapoloj rememorigis al Ivano ka kanzonon pri Emineo, furora tiutempe, multe kantata en Ulqin, en kafej-drinkejoj, surstrate kaj hejme. Tiuj erotikaj versoj diris ke kiam Emineo promenas kaj moviĝas per siaj skapoloj, mirindaj por ĉiuj maskloj kun vaganta menso, multaj eĉ svenis rigardante ŝin, kaj la malfeliĉulojn eĉ la paroloj de la mulao ne povis kuraci kaj

rekonsciigi. Ankaŭ Ivano estis tiel allogita post kiam li perdis Dĵanfize-n kaj havis nenion por fari krom sin okupi kaj plezurigi per kanzonoj kaj brandoglaseto. Nun, tia Emineo, viva kaj vera, kiun li revis dum la tuta vivo, estis tie, antaŭ liaj okuloj.

Rigardante Dĵanfize-n, kiu svingis la koksojn kaj skuis la skapolojn, liaj okuloj malheliĝis, kaj Ivano ne plu povis pacienci. Li eksaltis surpiede kaj sin lanĉis post ŝi kure, kaptis ŝin de malantaŭe je ŝiaj plenaj rondaj koksoj, envolvis ŝin per siaj brakoj kaj pasie levis ŝin alten tiel, kiel ŝi estis leviĝinta ankaŭ lia tuta animo pro nostalgio kaj amo, kaj turnis ŝin ĉirkaŭ si.

- Kion ci faras, Vani, kion?! Ellasu min, mi pezas! Ne plu mi estas malpeza kiel iame! Ellasu min!

Sed Ivano ne aŭdis nek lasis ŝin. Li plu turnis ŝin tra la kuirejo per siaj fortaj maristaj brakoj, premante kaj kisante ŝin ĝis laciĝo. Poste denove li demetis ŝin sur la kanapon kie ili estis antaŭe kaj, mallevinte siajn pantalonon kaj kalsoneton, li eniĝis inter ŝiajn koksojn blankebrilantajn kaj vibrantajn pro pasio kaj eksciteco. Li premis sin al tiuj koksoj, al tiu korpo, al la ventro kaj cicoj, kisante la antaŭkolon kaj ĉion, malsata, avidema, nostalgiema, dezirema, ardigita pro tiom longa atendado de ĉi tiu momento, de ĉi tiu feliĉo.

Dĵanfize prenis lian penison permane kaj proksimigis ĝin al sia vagino. Frotis ties kapon al la pordoklapoj, kiel ŝi faris tiomfoje kiam ŝi estis knabino, kaj poste, malrapide, ĝuante la plezuron kiun neniam antaŭe ŝi spertis, ŝi enigis la kapon internen, enigis ankaŭ parton de la penisokorpo kaj subite ellasis ĝin, retiris la manon kaj sin premis forte al Ivano ne nur korpe, sed ankaŭ anime, kun sia tuta estaĵo deziranta kaj ardanta, ne nur pro bezono de malstreĉiĝo kaj seksa kontentiĝo, sed ankaŭ pro Ivano, kiun ŝi tiom multe amis kaj amas. Kiam ŝi sentis la penison ene je ĝia tuta longo, al ŝi ŝajnis, ke ĝi atingis ŝian koron kaj pro plezurego eldiris:

– O-o-ooj !

Estis ja voko, krio de ŝia unua kontentiĝo en la vivo, neniam provita, tiu aparta plezuro neniam antaŭe spertita, neniam antaŭe sentita kun iu ajn el la forpasintaj siaj edzoj. Estis krio de sia preskaŭ dudekjara revo, kiu finfine plenumiĝis.

Pro pasio, kiu forkaptis ŝin tutece, Dĵanfize, ĵus sentinte ke Ivano estis kunigita kun ŝi, ke ili fariĝis unu memo, ekstremis kaj tremetis, kvazaŭ trafis ŝin epilepsio.

Ivano levis pli alten ŝiajn krurojn kiel du fostojn de la ŝipo, surmetis ilin super siajn ŝultrojn, pasigante siaj brakojn sub ŝiajn skapolojn kaj apogante sur ties ŝultrojn, envolvis ŝin tiel, kiel neniam estis farinta tion Shaban Shkozeti, nek Sadik Ficka.

Glebiĝante sub li, kiel bulo kaj flano, ŝi nur ĝemadis tiom pro plezuro, tiom pro la pezo kaj premo de liaj fortaj brakoj. Momente ŝajnis ke Ivano rompus la ostojn, deŝirus ŝin laŭzone.. Pro eksciteco, kiu forkaptis ŝin ĉiam pli profunde, ŝi volis moviĝi per koksoj kaj per la tuta korpo, volis ankaŭ ululi, sed apenaŭ permesis tion la brakoj de Ivano, liaj lipoj. Alkroĉita kiel en la premilo, kaj certe ankaŭ pro eksciteco, ŝi apenaŭ povis enspiri. Ekavidis spiron.

Sed pli multe ol ŝi, estis avidanta spiron Ivano. Li enspiris profunde kaj eligis malfacile spiron, ronkis kvazaŭ kelkiu estis alkroĉinta lin engorĝe, kvazaŭ li estus mortanta.

Ambaŭ estis en la kulmino de la pasio, kiam oni sentas ke la ostoj estas kvazaŭ solvataj, Dĵanfize ekgapis tiom multe, ke Ivano ekpensis, ke ŝi estis mortanta, svenanta. Ŝi estis rigidigita sub li per malfermaj okuloj kaj buŝo, surprizite de tio sentata, tio spertata.

Ankaŭ al Dĵanfize ŝajnis ke Ivano estis mortanta, ke lia koro baldaŭ ĉesus funkcii, ĉar ankaŭ li estis rigidigita super ŝi kaj estis rigardanta kvazaŭ li formangus ŝin.

- O-0-0h, Ivan, mia animo! Ivano- animo! Ivano, o vivo!- eldiris ŝi sin alkroĉante al li, premante la kapon sur la cicojn tiom forte kiom kapablis la brakoj, kicante kaj enspirante plorsingulte.
- Dĵa- dĵa- dĵana-a-a! Mia Dĵana-a-a! Mia Dĵana-a-a!- eldiris Ivano enspirante profunde, kvazaŭ estis kaptita je gorgo, kiel la droninto meze de la maro.

Kaj ŝi sin malstreĉiĝis. Li sentis ke, ne nur la salepo, sed la tuta animo sia, tuta sia estaĵo, estis eliranta el la korpo, estis enverŝita tie, en la sino de la korpo de la kara kaj dezirata Dĵanfize. Ŝajnis kvazaŭ li estis mortanta.

Dĵanfize sentis ke li estis solvata kun ŝi, sentis kiel lia estaĵo estis penetranta en ĉiu fibro kaj haŭttrueto de ŝia korpo, tiel kiel penetras la pluvo en la teron kaj la spiro en la polmon. Estis unuafoje en sia vivo, la unua okazo kiun Dĵanfize spertis, sentis la seksan kontentiĝon, ĝuadis tiom komplete kaj inde. Ne nur al Shaban Shkozeti, sed ankaŭ al Sadik Ficka, ŝi estis nur sindoninta la korpon por kontentigi ilin, per la ĉarmo kaj beleco sia, sed, por si mem, neniam kun iu el ili ŝi estis ĝuinta tian plezuron kian ŝi ĝuis nun, en la ĉirkaŭbrako de Ivano.

Kaj kiam ŝi estis knabino, danke al la frotadoj faritaj de Ivano, jen perfingre kaj jen per penisokapo, ŝi neniam estis kontentigita. Estis sentinta ian ekscitiĝon kaj plezuron, sed neniam ankaŭ la seksan eksplodon, malstreĉiĝon, tiun refreŝecon tiom dolĉan, tiom magian kaj konfuzigan.

Kun Ivano okazis alie. Ĉiufoje kiam ili renkontiĝis tie, en lia hejmo, dum Darinka, fratino de Ivano, eliris antaŭ la domo kaj gardadis, ili senvestiĝis nude por ke ili interkisiĝu kaj interkaresiĝu. Tiam ŝi prenis la penison permane, frotiĝis per ĝi kaj kiam, pro la fortiĝo kaj varmiĝo de la penis, ŝi ekkomprenis ke ĝi estis ekscitita, tuj forigis la kapon disde la vagino kaj

daŭrigis frotadi la penisokorpon permane, jen malpeze-malpeze kaj jen impete, ĝis kiam ĝi enverŝiĝis inter la femuroj, kion ŝi rigardis scivoleme, ĉar tio ŝajnis interesa kaj amuziga. Tiel li kontentiĝis por si, ĉar malŝarĝiĝis kaj travivis la seksan akton ĝisfine, dum ŝi ridadis kun li kaj diris:

- La salepo estas enverŝita jam!

Nun, unuafoje en la vivo, ili sentis ambaŭ kaj samtempe en la tuta sia profundeco kaj dolĉeco la seksan akton, ĉar ankaŭ la salepon ĉifoje li enverŝis enen, kion ŝi komprenis kaj ekĝuis tuje, sentante apartan plezuron kaj ĝojon, ne spertita ĝis tiu momento. Ĵus fininte, Ivano ellasis la krurojn kaj brakojn, kiujn ŝi mallevis malrapide kaj, per fermitaj okuloj, restis kvazaŭ svenita, senviva, laca kaj deprimita, sed ankaŭ kontenta, feliĉa tiom, kiom ne povus esti pli bone.

Feliĉa estis ankaŭ Ivano, kiu sin ĵetis sur ŝin kaj samtiel kuŝis kvazaŭmorta, senmova kaj kun fermitaj okuloj.

En la kameno krakis la brulligno flambrilante. Krom la fajro, sub tiu tegmento, nenia vivaĵo sentiĝis. Estis infestinta silento kaj kvieto, monotoneco gravedita per iaj strangaj sentoj, per ĝojo kaj plezuro, kiu kvazaŭ elfontis el la profundo de iliaj animoj, disvastiĝadis tra la korpo kaj levis ilin alten. Ili sentis sin en la ĉirkaŭbrako de unu la alia, kvazaŭ ili ne plu estus surtere, kvazaŭ ili estus leviĝintaj en la ĉielon kaj flugis.

Malrapide, post kiam ili ripozis iome, ili komencis denove interkisiĝi, babilante kaj rememorante la adoleskantecon, iliajn unuajn kisojn, la unuajn karesojn, la unuajn frotiĝojn.

Dĵanfize ekstaris kaj alportis el la ĉambro la matracon kaj ili ekkuŝis tie oportune, kun la piedoj je la direkto de la kameno kaj fajro, malstreĉitaj, trankvilaj kaj certaj, kvankam nun Darinka ne gardis ilin.

-Ni geedziĝu, Dĵana!- diris Ivano subite, restante sur ŝi, apogite sur siaj manoj kaj moviĝante per la malsupra korp parto.

Ĵus li enigis la penison en la vaginon, tuj eligis ĝin, por ke li ĝin denove enigu kaj faru tiun frotadon kaj tiun varmigadon, nun malrapidan, malhastan, ĉar la unuan koleron li estis elspirinta tie sur la kanapo.

- Ĉu vi konscias, Vani?!- pretrespondis Dĵanfize surprizita, ĉar apenaŭ ŝi intencis pri geedziĝo.

Ŝi moviĝis per koksoj, turnigante kaj miksante kun ili, fojfoje ankaŭ premiĝante al Ivano kun krampfo. Ŝia korpo tordiĝis kiel angilo sur gruzo, dum per la kara mano skrapis kaj frotis malpeze-malpeze la ŝvelitajn testikolojn kaj okulrigardis, kvazaŭ ŝi volus ilin formanĝi.

- Dĵana, kio okazis al vi tiel?!- daŭrigis Ivano sincere mirigita. - Kiam ni estis etuloj, mi volis seksumi kun ci, kaj ci ne volis, ĉar la virgecon intencis donaci al la edzo. Nun ci estas ŝanĝiĝinta tute. Kvazaŭ ne plu ci estas tiu mia iama Dĵana! Ci petis tuj kaj senpacience sekse kontaktiĝi. Eĉ per cia mano vi enigis mian penison enen de ci. Ci, Dĵana, iam volis edziniĝi kun

mi, petegis min ke la tagon de la geedziĝo mi venu kaj forkapti cin, dum mi ne volis. Mi estis certa, ĉar tion nepre ne permesus mia patrino, ĉar ci estas muslimino kaj mi, -- preskaŭ li pretis diri ridete "mi estas dinsez"¹²⁴, sed ŝanĝis la menson kaj diris tiel, kiel estis envere, - mi estis kristano, ortodoksulo. Cia hejmularo iradis al la moskeo kaj la miaj iradis al la preĝejo. Nun mi volas edziĝi al vi, kaj ci ne volas. Kial, Dĵana?!

- Kiel mi edziniĝu al vi, Vani?! Mi havas ses infanojn! Ci estas ankoraŭ juna. Ci devas edziĝi al kelkiu junulino, virgulino, kiu naskos infanojn kaj fondos familion.
- Infanojn povas naski ankaŭ ci!
- -Jes, mi povas, mi povas, sed mi havas jam ses kun unu edzo!
- Ne gravas, ci naskos ankoraŭ ses aliajn por mi!
- Kion ci diras, Vani?! Ĉu ci konscias?!
- - Kial ne, Dĵana? Ankaŭ mia patrino estas naskinta dekdu infanojn!

Dĵanfize pensis ke Ivano ŝokis, sed lia patrino envere estis naskinta dekdu infanojn. Ses estis mortintaj kaj ses ankoraŭ vivis: du filoj kaj kvar filinoj. Ivano estis malpliagha filo. La pliagha filo estis oficiro en Cetinje. Tri filinoj estis edzinigitaj, unu en Podgorica kaj du en Danilovgrado. Darinka-n, la malplej aĝan, oni edzinigis en Bar. Ĵus estis naskita la lasta infano, Darinka, oni mortigis la edzon de Nada, patrino de Ivano. Poste mortis, laŭvice, la bopatro kaj la bopatrino kaj nun ŝi vivis tute sola, escepte de tiuj tagoj, kiam Ivanomaristo, revenis hejmen el la navigado. Sed Ivano tute ne akceptis edziĝi. Fojfoje, venadis por vidi ŝin ankaŭ la filo- oficiro, samkiel la filinoj, aparte Darinka, kiu loĝis pli proksime.

- La avo, restu li en paco, kiu estis la ĉefa obstaklo por nia geedziĝo, estas jam mortinta. La patrino ne plu kontraŭstaros al mi, ĉar ŝi pensas ke pli bone la filo edziĝu al muslimino, ol pluresti tiel, needzigita.
- Ne, ne!- diris Dĵanfize- Tio estas neebbla farotaĵo, Vano! Cia patrino povas fermi la okulojn kaj beni cin, sed ŝi apenaŭ povas kunvivi kun mi. Kaj mi ne volas disigi cin disde la patrino! Krome..
- Kion alian ci volas diri ?
- Mi estas ankaŭ iel maloportuna, Vani! Mi misfamigis jam ke mi formanĝas virojn. Miaj edzoj dronas en la maro. Mi ne volas ke ankaŭ ci dronu !
- Kial tiaj superstiĉoj, Dĵana?! Ĉu ci kredas ilin envere?!
- Ĉu mi kredas aŭ ĉu mi ne kredas, tiel mi misfamigis jam!
- Venu Dĵana, ĉar mi nuligos tiun misfamon!
- Ne, ne! insistis ŝi. - Ni estos pli feliĉaj tiel, kaŝe. La amo estas pli dolĉa tiel, sen krono kaj sen beno. Jen, ĉu mankas io al ni?! Mi estas tute cia

¹²⁴

kaj ci estas tute mia. Se ni geedziĝos, ĉu ni akiros pli. Nur zorgojn ni ekhavos. Tiel ni ne havas zorgojn. Ci en cia hejmo, mi en mia hejmo. Ci kun cia konto, mi kun mia konto. Ci kun cial zorgoj, mi kun miaj zorgoj. Plaĉas al ni, ni renkontiĝu, amuziĝu, kundormu. Ni ne bezonas, ke tion eksciu la ceteruloj kaj ne estas kaŭzo ke tion sciu la ceteruloj. Tio koncernas nur nin, apartenas nur al ni kaj neniu rajtas enkonduki la nazon ĉi tien kaj embarasi nin.

- Kiel ci volas, Dĵana, sed al mi ne ŝajnas honesta ke mi amuziĝu kun ci, kundormu kun ci, kvazaŭ ci estas mia edzino, kaj ke mi ĉion tion kaŝu de la mondo. Fakte mi estas ŝtelanta cin! Mi ŝtelas cian amon, cian plej grandan kaj aprecatan riĉaĵon, plej karan.
- Tiom longe kiom neniu ekscios pri ĉi afero nia, ci nenion estas ŝtelinta, nenian malbonan estas farinta. Sed tiun tagon, kiam oni ekscios la aferon, tiam ci estos ŝtelinta ne nur la plej grandan kaj plej estiman riĉaĵon, sed la honoron mian, io kion oni ne povas estimi, ne povas pesi per iu ajn pesilo kaj ne povas pagi per iu ajn mono, eĉ nek per la oro de la tuta mondo.
- Mi certas ke mi tenos la sekreton, jes mi tenos, ĉar mi ne estas infano. Eĉ kiam mi estis infano, dekkvin-dekses jara, mi savis la sekreton de nia amo, des pli hodiaŭ, estante viro, pli ol tridekjara. Tamen mi ne povas eskapi de la sento de ŝtelisto. Eĉ de ŝtelisto pli fia ol tiu kiu enigis la manon en alies poŝojn kaj ŝtelas monujon. La amo estas pli kara, Dĵana!
- La amo estas kara ĝuste kiam oni ŝtelas tion kaj ne kiam oni ĝin aĉetas. Ne ŝtelita la amo ne plu estas amo. La tuta sekreto de la amo, ties tuta magieco, estas en ties ŝtelo. Nur tiel oni ĝuadas la amon kaj nur tiel la amo ja estas amo.

Aŭskultante, Ivano sin disigis de Dĵanfize, eliris el ties antaŭfemuroj kaj ekrigardis ŝin atente.

Ŝi tiris lin ree sur sin, mankaptis la penison kaj diris:

- Enigu! Enigu, enigu!.. Ni lasu tiajn babilaĵojn kaj denove amoru, ĉar por ni ambaŭ la vivo preterpasis envane ĝis hodiaŭ. Se mi havus la nunan menson, mi estus min doninta al vi ekde kiam mi estis dekdujara, ni amuziĝus kune kaj ne irintus en la manojn de tiu bestaĉo, kien kondukis min la gepatroj, -diris ŝi kaj ĉirkaŭbrakis lin forte, kisis kaj karesis malpezmalpeze kaj turnante lin sub sin.

Tiam ankaŭ Ivano forlasis la babilon kaj envolvis ŝin, kisadis, lekante la lipojn, jen la supran, jen la malsupran, kvazaŭ ili estus oranĝofiletoj gluitaj per mielo. Kisante, li turnis ŝin kaj ŝin metis denove sub sin.

- Oh, ne!- rimarkigis Dĵanfize. - Nun estas mia turno por surgrimpi vin!
- Kiel ci volas, Dĵana!- diris li kaj lasis ŝin surgrimpi.

Ŝi eksidis sur lian femuron kaj kisadis ekde la frunto ĝis la umbiliko, okulrigardis lin kaj enkondukis sian kapon inter ties antaŭfemurojn kisante. Tiel, surgrimpante, jen li Dĵanfize-n, jen ŝi Ivanon, pasis la noktomezo. La fajro ekestingiĝis kaj ili sentis tion en siaj korpoj. Dĵanfize ekstaris kaj aldonis aliajn brullignaĵojn en la kamenon. Paŝante tra la kuirejo, ŝi eksentis ion sin verŝanta tra siaj antaŭfemuroj. Ŝi malfermis la krurojn sub la flamolumo radiate de la ĵus bruligata ligno.

- Vani!- ŝi tuj ekkriis. - rapide ŝtopu tiun truon, ĉar estas enverŝata via salepo!

Tiam ankaŭ Ivano levis siajn okulojn tien.

- Vidu kio estas verŝita sur miajn antaŭfemurojn! Kiom multe da tio ci estas enverŝinta enen?! Kie ci akumulis ĉion tion ?!
- Nu, ekde la tempo kiam ci eneverŝis ĝin manfrotante, mi nenie estas plu enveŝinta- diris Ivano. - Longajn jarojn ĝi estas akumulita kaj ĉinokte eksplodis kiel fontano.

Dĵanfize prenis siajn kalsonetojn kaj sin viŝis.

- Ekstaru, Vani!- vokis li. - Ni lavu nin! Estas varma akvo!

Ili eniris en la duŝejon.

- Dĵana, kiom da tempo pasis ekde kiam vi razis cin lastan fojon?- demandis li rigardante al inter la antaŭfemuroj.
- - Ci, Vani, devas scii ke ni, muslininoj, ne razas nin. Ni deŝiras.
- Kiel deŝiras?- demandis li mire.
- Tiel, kiel la kokinoj!
- Kaj ĉu tio ne dolorigas vin kiam vi deŝiras? Ĉu tio ne sangigas ?
- Ne, Vani. Mi anticipas ŝmiras la lokon per medikamento, nomata *sarikana*. Samkiel vi, viroj, ŝmiras vin per saĝaŭmo kaj razas vin.
- Ĉu vi uzas tranĉileton kiel ni, viroj?
- Ne, ne estas bezono por tranĉileto! Post kiam sarikano penetras la haroradikon, ĝi disiĝas disde nia korpo kaj deŝiriĝas facilmaniere, sen ia doloro.
- Kaj de kiam ci ne deŝiris la harojn?
- Ekde kiam mi dormis lastafoje kun la edzo.
- Kaj kiom da jaroj pasis ĝis nun?
- Sep aŭ ok, ankaŭ mi mem ne scias kiom da!
- Kial ci ankoraŭ ne deŝiris la harojn?
- Por ke ci komprenu, Vani, tiu sarikano malbonodorigas tiugradeo ke, deŝirante ĉi tion, ĉe la muslinaj virinoj malbonodoras ne nur la hejmo, sed la tuta loĝkvartalo. Tiel, ĉiuj ekscias ke la dommastrino estas deŝirinta sin. Kaj deŝiri ĝin signifas dormi kun la edzo. Kiam la virino estas vidvino, kun kiu edzo kundormu la povrino?!.. Jen, do, kial mi ne estas deŝirinta! Kiam mankas la edzo, ne nur ne estas kialo por sin deŝiri, sed

estas ankaŭ...

- Tamen, Dĵana, ci devas deŝiri ĝin pro pureco!- interrompis Ivano.
- Tiam malbonodorus la tuta loĝkvartalo kaj tiel oni ekscios ke la marista vidvino nun trovis amanton kaj estas skuanta la matracon!
- Aha!- diris Ivano. - La kristanaj virinoj faras ĉi laboron pli facile! Ili razas sin kaj neniu ekscias, kiam ili agas tiel.
- Multajn aferojn la kristanaj virinoj faras pli facile ol ni, musliminoj.
- Morgaŭ, vespere, mi kunportos mian tranĉileton kaj ci razos cin kiel la kristaninoj.
- Mi havas la tranĉileton de la forpasinta edzo- diris Dĵanfize.
- Kie ĝi estas? Alportu ĝin al mi kaj mi razos cin ĉinokte!
- Ŝajnas ke ci volas ankaŭ ĉi tiun muslinan aferon!- diris Dĵanfize, etendante la manon al la breto de la duŝejo, kie estis ankaŭ la tranĉileto de la eksedzo.
- Kiel la muslinoj, ankaŭ la kristaninoj havas tutsaman kutimon! - diris Ivano.
- Ĉu ci povas scii tion?!- eksaltis Dĵanfize ĵaluze. - Ci estas dirinta ke, escepte de mi, vi seksumis kun neniu ajn alia virino!
- Sed mi povas supozi, Dĵana!- diris Ivano sapŝaumante la triangulon inter la antaŭfemuroj.
- Levu la maldekstran gambon sur la seĝeton kaj tenu apude la kandelon, por ke mi pli bone vidu!- daŭrigis li, malfermante la tranĉileton.

Kaj kvazaŭ li estus profesia barbiro, per kelkaj lertaj kaj rapidaj movoj, li razis, lavis per akvo kaj kisis ŝian pubon.

- Vidu kiel bela aspektas ĝi nun!- diris li.
- Nun mi aspektas kiel junulino.

Ili komencis surĵeti unu al la alia akvon per glasego. Sin lavante kaj interkisante, frotante kaj karesante, ili denove ekscitiĝis. Dĵanfize kaptis lian penison permane, enigis en buŝon kaj komencis suĉi ĝin kiel cicumon, samkiel ŝi estis suĉinta kelkfoje estante knabinon. Ankaŭ Ivano enigis sian kapon inter ŝiajn antaŭfemurojn kaj kisis tie, enigante ankaŭ la langon, lekante.

Surpiede, apogante al la muro, ili interseksumis du aŭ tri aliajn fojojn kaj restis en la duŝejo ĝis ili finis ankaŭ la lastan varman akveron. Poste ili eliris kaj denove ekkuŝis sur la matraco, manĝis migdalojn kaj kaŝtanojn, kiujn bakis Dĵanfize en la kameno, trinkis prunlikvaĵon, drinkis alian glaseton da brando kaj ree interkroĉiĝis amorante, ĝis kiam tra la kuireja fenestro ekbrilis la matena lumo.

Tiam Ivano ekstaris, sin vestis kaj eliris. Dĵanfize sin envolvis per lantuko, kondukis lin ĝis la kortopordo, donacis kison, antaŭ ol li eliris, kaj poste surmetis riglizegon al la pordo kaj revenis en la kuirejon por pludormi. Ŝi estis laca, sed ankaŭ kontenta, feliĉa, tiom kiom neniam antaŭe en sia vivo.

“Por tia nokto- ŝi diris al si- indas donaci eĉ la vivon!”

Flarante sur kuseno la aromon de Ivano, ŝi endormiĝis tiom profunde kaj dolĉe, kiel neniam antaŭe. Neniam Dĵanfize, en sia vivo, kiun ŝi elkalkulis nur ekde la tago kiam ŝi estis koninta kaj kisinta Ivanon, ŝi apenaŭ ĝuis tian dormon. Ŝi sentis sin feliĉa, feliĉa kiel en la ĉielo, sed ankaŭ laca, laca kaj elĉerpita, kvazaŭ estus fandiĝintaj la ostoj kaj fariĝintaj ĝelo kaj... spermo. Eĉ en la dormo ŝi vidis torenton, kiu ne kunverŝis akvon, sed spermon. Subite la torento iĝis rivero kaj poste maro. Ŝi eniris ĝin kaj eknaĝis, mirigita, kiel ŝi naĝis tiel, dum ŝi apenaŭ scipovis naĝi. Tiam ŝi diris la si :

“Certe, la naĝon instruis al mi Ivano!”

Kiu scias kiom longe ŝi dormis kaj revis tiel. La suno estis transpasinta la zeniton. Ĝi proksimiĝis al la pinto de Meterizo, kiam tondris la kortopordo. Ŝi apenaŭ komprenis kio estis okazanta, kies estis tiu tondro. Malfermis ŝi la okulojn, rigardis mirigite kaj, nur kiam ŝi aŭdis la voĉon de Dĵela, ŝi konsciiĝis ke certe li estis frapanta al la pordo kaj vokis.

Tuj ŝi eksaltis surpieden kaj tiel, tute nuda, ekiris por malfermi la pordon.

Elirinte en la korton, la freŝa aero rekonsciiĝis ŝin, tial tuj ŝi returniĝis vokante:

- Atendu, atendu, mi tuj alvenos!

Ŝi vestis sin rapide per robo, prenis la matracon, lantukon kaj kusenon kaj alportis ilin en la ĉambron, levis la manĝotableton, kaj poste reiris por malfermi la pordon.

Dĵela eniris kun la azeno ŝargita per brulligno. Ŝi helpis al li malŝarĝi, poste invitis lin por trinki kafon. Kiam li eksidis en sia kutima loko, ŝi rimarkis siajn kalsonetojn meze de la kuirejo. Rapide ŝi forprenis ilin kaj malaperis en la dormoĉambron.

Reveninte, ŝi rigardis Dĵela-n en la okulojn. Ankaŭ Dĵela rigardis ŝin en la okulojn.

“Ĉu ĉi tiu estas kompreninta ion?!”- sin demandis Dĵanfize, ne sen maltrankvilo.

Ankaŭ Dĵela sin demandis:

“Kial estis tiuj kalsonetoj forprenitaj de la mato far Dĵanfize?!”

Kaj li rememoris ke li estis aĉetinta ilin.

“Kial ŝi estis ĵetinta ilin surplanken?”- denove sin demandis Dĵela.

“Certe pro kolero, ke mi ne akceptis fariĝi ŝia amanto!”

Dĵanfize surmetis en la fajron kafbolilon.

Alportinte la glaseton, Dĵela ekmiris ke, ĉifoje, ŝi ne pretigis kafon ankaŭ por si. Des pli, li miris ke ŝi ne eksidis, kiel kutime, apud li. Dĵela atendis ne nur ke ŝi eksidu, sed ankaŭ malkovru iomete sian genuon, vole aŭ nevole, silente aŭ dirante: “ Ne gravas, ci ne formanĝos ĝin!”

Kvankam liaj digno kaj konscio malpermesis tion, la okuloj kaj la animo petis tion, ĉar li amis Dĵanfize-n kaj adoris ties korpoharmonion. Ĉiam pli, li sentis por ŝi apartan amon, puran kaj sinceran, kiun li subpremis per la forto de digno kaj konscio kaj ne permesis ke tio malpuriĝu, frotaĉiĝu, kotumiĝu kaj makuliĝu.

Sed, ekde tiu punkto, kiam ili kune disdonis traktojn, kiam Dĵanfize ne petadis kaj ne haltigis lin perforte, por ke li dormu tie, li eksentis, ke io estis okazinta, io estis ŝanĝiĝinta ĉe ŝi. Des pli, li sentis tion nun, kiam ŝi ne plenigis glaseton por si, ne eksidis apud li. Li eksentis ankaŭ odoron, kvazaŭ brandan, sed tute ne povus sugesti ke oni enkondukis en tiun hejmon tutan botelon da brando, ke unu punkton antaŭe, tie en la kuirejo, ankaŭ Dĵanfize estis drinkanta brandon kaj estis amuziĝanta. **Tiun amuzon ofertitan al li, sed rifuzitan de li antaŭ du-tri punktoj. Kaj, ĉar li ne estis akceptinta, ĉar li duafoje estis transformiĝinta al Hazreti Hizri,** ŝi sin ĵetis en la ĉirkaŭbrakon de alia persono, tiel, kiel ŝi estis ĵurinta jam kaj minacinta al li.

Dĵela eltrinkis la kafon kaj ekstaris. Dĵanfize ne diris, ke li vespermanĝu kun ŝi. “Jes, jes, io estas okazinta al ŝi!” - disis li al si, elirante el la kortopordo kun la azeno antaŭ si.

Vespere, Ivano alvenis denove ĉe Dĵanfize. Dĵela alportis brulignon per la azeno kaj Dĵanfize bruligis ĝin en la kameno por varmigi la nudiĝintan korpon sian kaj tiun de Ivano.

Sed, varmiĝante per la brulligno de Dĵela, Ivano instruis al Dĵanfize ankaŭ la legadon kaj skribadon. Ekde longe antaŭe, li estis instruita al ŝi skribi mem la nomon IVAN. Nun por li ne estis malfacile instrui la skribon de la nomo XHANFIZE (Dĵanfize), ĉar tri literojn de tiu ĉi vorto ŝi jam sciis de la nomo IVAN. Ŝi malfacile distingis inter V kaj F, sed ankaŭ tion ekposedis. Post unu semajno, Dĵanfize komencis kompreni legolibron, alportita de Ivan, ĉar en sia hejmo apenaŭ estis aboco- libro nek skribpapero kaj kraĵono. Neniu el la infanoj de Dĵanfize frekventis lernejon. Pri la knabinoj oni eĉ ne parolu, ĉar estis pekaĵo ke ili iru al la lernejo de kaŭroj¹²⁵, de ŝkaoj¹²⁶, sed ankaŭ ne la knaboj. La lernejon en la urbo de Ulĵin frekventis nur la infanoj de kristanaj riĉuloj kaj malofte iu el la masklaj infanoj de la riĉaj muslimoj. La muslimaj knabinoj, eĉ de la konataj begoj¹²⁷ apenaŭ frekventis la lernejon, ĉar ankaŭ por ili estis konsiderate granda pekaĵo, nepardonebla, piedpremi la sojlon de la lernejo de kaŭroj kaj ŝkaoj. Estis la danĝero ke ili restu ne edzinigitaj.

Sed Ivano faris aliajn ŝanĝiĝojn en la vivo de Dĵanfize. Li estis mekanikisto kaj, vidinte kiel sin lavis Dĵanfize en la duŝejo, aranĝis por ŝi kaldronon kaj duŝon, por ke ŝi ne plu lavu sin per glasego. Post kelkaj tagoj li instalas ankaŭ kranon en la korton, por ke ili ne plu trinku putoakvon.

Kiam Dĵela rimarkis la kranon en la korto, li demandis mire al la Dĵanfize:

- Kiu enigis ĝin al ci?!

Dĵanfize, kiu pormomente ne kaptis la sencon de la demando de Dĵela, ĉar ŝi intencis ion alian, tuj returniĝis vizaĝe al li kaj demandis:

- Kion diras ci, Dĵela?!
- Mi demandis, kiu enigis la kranon en la korto!

¹²⁵ Nemuslimoj
¹²⁶ Slavoj
¹²⁷ Riĉaj muslimoj

- Ah, la kranon!- respondis Dĵanfize, **malpeziĝinte** pro embarasiĝo, kiu subite forkaptis ŝin aŭdante tiun vorton “enigi”.

Ne longe pripensinte, ŝi daŭrigis:

- Ivano! Alvenis iutage Ivano kun sia amiko kaj - tiu vorto “enigi” rondiradis en ŝia langopinto, sed Dĵanfize apenaŭ povis diri ĉion. Apenaŭ ŝi trovis alian vorton - traboris la muron kaj aranĝis la kranon.

Post kelkaj semajnoj, ambaŭ- Dĵela kaj Ivano- enŝipiĝis en la barko “Shpresa” (La Espero) kaj denove eknavigadis. Unuafoje, Dĵanfize iris en la havenon. Almenaŭ, li ekpensis ke ŝi eliris por konduki lin, kvankam pli longe ol kun li, ŝi staris kun Ivano. Eĉ ŝi estis malkovrinta la vualon, por ke li vidu ŝin. Dĵela aŭdis ŝin el la ŝipo voĉridante, eĉ per rido, kiu ne decidis al vidvino, sed denove li ne misintencis, ĉar li konis delonge Ivanon, estis lia intima amiko kaj havis plej bonan opinion pri li. Dĵela estis certa, ĉar li en neniu haveno, kvankam needziĝinta, apenaŭ havis amantinon kaj ne frekventis la virinojn. Kiom li sciis, Ivano ne havis amantinon ankaŭ en Ulqin. Ke Dĵanfize, la vidvino de lia patro, estis amantino de Ivano, ekde la knabineco, li neniel povintis imagi. Des pli, ke Dĵanfize nun estis amoranta kun li, danke al la rekonatiĝo tiun nokton antaŭ Kurban Bajramo¹²⁸, kiam ili estis disdonantaj traktojn en la urbo.

Konciza historio de Albana Esperanto- Asocio

(Okaze de 22 jariĝo)

La historio de Esperanto en Albanio komenciĝas ekde la jaro 1907 kiam Lazer Shantoja, pastro katolika kaj poeto inicis la disvastigadon de IL ankaŭ en nia lando.

Lin sekvis aliaj intelektuloj renomaj kiel Mark kakariqi, Mikel kaj Vilhelm Koliqi, Cuk Simoni, Janko Pali, Ĉefo Fico, Hamdi Sulĉebe. Cuk Simoni verkis originale en Esperanto la historian libron pri la nacia heroo albana Gjergj Kastrioti- Skanderbeg kiun li eldonis en la jaro 1929. Ĉefo Fico eldonis la ŝlosilon por albanoj.

Post la dua mondmilito aperis aliaj disciploj kiel Zef Mjeda, Vasil Pistoli kaj Astrit Leka. (Hodiaŭ vivas nur ĉi tiu lasta, 88 jara) . Ĉefo Fico starigis ne oficialan lernokurson kaj klubeton en ministrejo pri konstruado kie li deĵoris. Tiam sin distingis ankaŭ Gafur Muĉo, kiu fondus en la jaro 1991 neregistaran organizaĵon Albana Esperanto- Ligo, el la unuaj albanaj neregistaraj organizaĵoj enlande. Sed la komunisma reĝimo ne permesis la agadon de neregistaraj organizaĵoj kvankam ne malhelpis la starigon de lernokursoj en la tiamaj kulturdomoj de la dekretitaj sindikatoj. En tiuj lernokursoj eklernis pluraj studentoj kaj ordinaraj civitanoj, inter ili ankaŭ Shaban Hasani, Bardhyl Selimi, Gjergji Gusho, Agim Peraj, Bahri Peraj, Luan Jaupi, Tonin Cobani, Klarita

¹²⁸

Islama granda festotago

Agasi, Rita Permeti ka. Pro cenzero severa ankaŭ tiuj kiuj lernis Esperanton timis korespondi kun eksterlandaj samideanoj kaj ricevi revuojn eldonataj tie. En la jaro 1967 aperis dokumentara filmo pri la urbo de Gjirokster kie aŭdiĝis en Esperanto ciceronado de Vasil Pistoli.

Printempe 1991 la registaro aprobis la fondiĝon de AEL kie adheris tuj la eksaj esperantistoj. Ĝi ekpublikigis paperan bultenon kaj klopodis interrilatiĝi kun alilandaj esperantistoj kaj organizaĵoj. Zef Mjeda kompilis lernolibron akompanata de vortareto, same faris Vasil Pistoli, kies vortareto estis kvinlingva. En la jaro 1993 fondiĝis la instruista filio de AEL kiun tuj agnoskis ILEI. Ĉi sekcio tuj komencis starigi kaj gvidi lernokursojn en Tirana, Durres, Lezhe, Pogradec. Ene de kelkaj jaroj en tiuj lernokursoj eniris centoj da studentoj ekde elementa lernejo ĝis universitataj fakultatoj. ILEI sekcio (alinome Albana Esperanto Instituto) liveris diplomojn por la elementa scinivelo al almenaŭ 450 gestudentoj. Inter tiuj menciinda Zamir Gjurgji, Sajmir Beqiraj, Enkela Xhamaj ka. Kunlaborante kun Internacia studumo en Bydgoszcz diplomiĝis almenaŭ 30 niaj studentoj pri turismo kaj kulturo internacia. Inter tiuj mencinda Ariel Myrazi, Ereid Dhimitri, Matilda Sokoli, Fioralba Ceno (Sadiku), Egli Brati ka. Ankaŭ en la lernokursa kvarmonata en Karlskoga (Svedio) diplomiĝis Piro Karajani kaj Mimoza Bunjaku. Dume aperis la lernolibro de Bardhyl Selimi kaj alia lernolibro de Agim Peraj. La lernolibro de Gjergji Gusho ankoraŭ ne eldoniĝis. Sekvis la tradukoj diversaj de la Albana al Esperanto kaj inverse. (Nova Realismo de Fogelman, La faŝismo de Zhelev ka).

Albanaj esperantistoj partoprenis en kelkaj UK kaj aliaj kunvenoj kaj konferencoj regionaj kaj eŭropaj. Ili propagandis per artikoloj kaj intervjuoj en ĵurnaloj kaj TV.

En la jaro 2001 la registaro ordonis ke ĉiuj neregistaraj organizaĵoj registriĝu ĉe juĝejoj. Sed ni neglektis tion longajn jarojn.

Ankaŭ la edukinstancoj ignoris ĉiujn niajn klopodojn por daŭre starigi lernokursojn en la lernejoj. Tiel ni komprenis la gravecon de la leĝiĝo de nia organizaĵo. Dume entreprenis fortan kampanjon por enkonduki Esperanton en universitato, sed sensukcese pro anglema lingva politiko de la registaro. Sed alia tento sekvis: la traduko de la elstaraj verkoj de la albana literaturo en Esperanton. La traduko de la romano Hunda Haŭto de Fatos Kongoli, aŭ “dua K” (la unua K estas la renoma internacie jam Ismail Kadare) ĝuis grandan eĥon en la gazetaro lastan jaron. Tio kuraĝigis nin por plutraduki kunlabore kun polaj esperantistoj gvidite de Tomasz Chmielik aliajn verkojn, ekz. La romanon Palaco de la Songoj de Ismail Kadare, novelojn de Ylljet Alicka, poemarojn de albanaj poetoj el Albanio, Kosovo kaj Makedonio.

Februare 2013 ni sukcesis finfine leĝigi nia asocion, espereble ke post tiu evento nia movado antaŭeniras pli certa enlande.


Agim Peraj



Sanije Gashi

Teruraj historioj 1998-1999

Fragmentoj



La kovriroj de la libro

... Vilaĝo Celin el 300 domoj kaj 3500 loĝantoj.

Selman Zeqiri, gastlaboristo en Germanio nun havas nur filon, Valon-on. La edzino, Sebahat, kun du aliaj filoj, ne plu vivas; nek la frato, Bajram, kvinope, kun la edzino kaj tri gefiloj, nek la patrino kaj kvar filoj de la onklo, unu el ili kun la edzino kaj gefiloj..

Valon rakontas:



Valon hodiaŭ

La 25-an kaj 26-an de marto 1999 la serbaj fortoj okupis la vilaĝon. Oni ekpafadis ekde la 5-a de mateno en la malantaŭa parto de Celin. En la loko nomata Pisjak, ariĝas krom la vilaĝanoj ankaŭ homamasoj el Hoqa e Vogel, Bellacerka, Nagavci, entute ĉirkaŭ 7-8 miloj.

Miftar Zeqiri, la familia kapo, petas virojn ke ankaŭ ili iru, mem restas hejme por zorgi la virinojn kaj la infanojn. Dume la serbaj fortoj eniras la hejmon, forprenas la dommaston, la virinojn kaj la infanojn, venigas ilin malantaŭen de la domo, en la apuda deklivaĵo kaj ekzekutas ĉiujn: Miftar-on (63 jara) , ties edzinon Sanije 60 jara) , la novedzinojn, Sebahat-on kun filoj Altin (10 jara) kaj Bledar (8 jara) , Myrvet-on (33 jara) kun gefiloj Alma (2 jara) , Alban (5 jara) kaj Albulena-n (10 jara) , Myrvete-n (42 jara) kun Besart (10 jara) , Burbuqe (13) , Elbasane (19 jara) , Suzana (21 jara) , Nazlije (26 jara) ..



La popolo salutas la soldatojn de NATO-o

La etulino Alma, kiun estis portante Myrvete, dum iradis en la morta vojo, pafita per kugloj, ekfalas apud la patrino, same sangumita. Ambaŭ patrino kaj filino porĉiame fermis la okulojn.

Bajram Zeqiri, kun Valon manenmane kaj kvin aliaj viroj, post kelkaj horoj revenas hejmen por vidi ĉu okazis io al siaj gefamilanoj. Sed la serbaj fortoj plurestis en ilia hejmo atendante. Ĝus ili eniris, la serboj kaptis kaj ordonis ke ili kuŝu surtere ĉe deklivaĵo kun la manoj malantaŭe. Same agas ankaŭ la 12 jara Valon.



La soldatoj de NATO-o estas bonvenaj en Kosovo

Tiumomente, iu serbo ordonas Valon-on ekstari kaj rigardu la scenon de iu ŝtono apude.

Sekvis batado de familianoj. Oni tiradis ilin per hararo, kunfrapigis la kapojn al la deklivaĵo, sangumigis, returnigis, frapis per fusilo en diversaj sentemaj korpopartoj, precipe en genitaloj, poste insultadis, kriegis, denove frapis al la sangumitaj kapoj... Estis ĉirkaŭ dek policistoj turmentantaj...

Post fizikaj turmentaĵoj kaj humiligoj, venigis ilin kelkajn metrojn pli fore kaj ekzekutis ĉiujn: onklon Bajram, Naim-on, Brahim-on, Hamet-on, Gezim-on.. Tio okazis ĉirkaŭ la 3-a posttagmeze de la 25-a marto 1999.

Krushe e Vogel kaj Krushe e Madhe

En la vilaĝo Krushe e Vogel, kiam eniris la serbaj hordoj, la homoj ankoraŭ dormis. Ili bruligis la domojn, persekvante samtempe ĉiujn.

Ĉekape de la vilaĝo vivas la familio Berisha. En la jaro 2001 tie loĝas nur tri personoj, la bopatrino, novedzino kaj nepo: Hanemshane Batusha, 70 jara kun la juna novedzino, Shemsie, 29 jara, kaj ties filo, nun 4 jara. La 26-an de marto 1999 oni mortigis kaj bruligis 8 ties familianojn: tri filojn- Zaim-on (47 jara) , Ahmet-on (43 jara) kaj Milaim-on (32 jara) kun ties filojn- Fehmi-on, Mergim-on, Behar-on, Burim-on kaj Lirim-on 14 jara! La murdistoj alvenis kun tranĉiloj enmane.



La tomboj en Krushe e Vogel

La matenon de 26-a de marto 1999 la vilaĝo sieĝiĝis de tankoj.. Komenciĝis la bruligo de domoj unu post la alia.. La vilaĝanoj hastis ariĝi ĉerande apud la domo de Batusha. Eniris mian hejmon la lokaj serboj maskite, la ceteraj senmaskite. La samaj serboj kun kiuj niaj filoj kunlaboris en la kantinoj de brando, restintaj, manĝintaj kaj drinkintaj kune. La maskitaj serboj ordonis albane ke la viroj disiĝu disde la virinoj kaj infanoj. Mia filo portis surbruste ties filon dujaran, kiu ne volis disiĝi kriante. Oni forprenis ankaŭ knabojn 13-14 jarajn.

Entute 120 masklojn oni elirigis en la straton kun manoj surnuke. Dume du serboj lokaj, Culi kaj Rade diris al virinoj: Nun iru kaj dronu en la riveron Drin aŭ foriru al Albanio! Ĉar vi mem volis tion, volis NATO-on! La virojn oni enirigis en la ĉambron po duope kaj pafmortigis. Poste ties kadavrojn portis kaj ĵetis en la riveron. La novelzino atestas ke ŝi trovis ĉe la riverbordo virajn vestoj, botojn. En la alia vilaĝo, Krushe e Madhe, oni mortigis ĉirkaŭ 250 homojn.

Jetmir Duraku rakontas:

tri unuajn tagojn post la NATO bombardoj, la serboj mortigis lian patron, Xhemal kaj onklojn Ibish, Malush, Jakup kaj Xhevat. Tio estas la kvin filojn de Muharrem Duraku. En Krushe e Madhe serboj estas uzintaj krematorion. Entute estis ekzekutitaj 241 homoj. Oni trovis poste du amastombejojn, 2 krematoriojn kaj multajn individuajn tombojn. Estas ĉirkaŭ 800 bruligitaj domoj kaj la moskeo. Pluraj homoj estas ekzekutitaj per kuglo enbuŝe!. Estas junaj novelzinoj kaj etaj knabinoj murditaj kaj bruligitaj! Restis 139 vidvinoj kaj 500 orfoj!

Esalto el la morta kamiono de la virinoj - “kadavroj”

Tagmezon de 26-a de marto 1999 la specialaj unuoj de la polico serba entreprenis tiel nomatan “teritorian kombadon” en la triangulo Suhareke-Rahovec- Prizren.

Rakontas Vjollca Berisha:



Vjollca Berisha

Shyhrete Berisha perdus la edzon, Nexhat, 46 jara kaj kvar siajn gefilojn: Majlinda- 16 jara, Herolinda- 14 jara, Altin-on 11 jara kaj Redon-on 2 jara. Ekde la 5-a horo de 25-a de marto en nian hejmon eniris perforte policistoj kaj metante sur niajn brustojn siajn aŭtomatikojn kriegis: kie estas la usonanoj, kial ili ne venas savi vin!? Poste ili postulis de ni monon. Ni estis devigitaj doni ĉiujn niajn ŝparaĵojn, kelkmilojn da germanaj markoj. Inter la policistoj estis ankaŭ Milorad Niŝaviĉ- Miŝko, ĉefo de urba UDBA. Ili revenis la morgaŭon. Ni estis ariĝinta en la hejmo de la onklo Vesel, entute 25 homoj. Malantaŭ la domo estis du tankoj. Loka serba policisto, Zoran, gvidis taĉmenton de 30 policistoj. Zoran vokis albane Bujar-on, filon de onklo Vesel ke li eliru en la korton. Ekis paniko enhejme. Ĝus Bujar eliris, oni pafis sur lin, faligante mortan. La frato de Bujar eliris por demandi pri la kialo de mortigo. Sed ankaŭ lin faligis mortan surtere.



Nëna në kolonë, në
rrugë për në Shqipëri,
30 Mars 1999

284


La albanoj marŝas piede je la direkto de la landlimo por savi siajn vivojn Poste forprenis la bofraton Nexhmedin-on, 36 jara, inĝeniero, Faton-on 29 - jaran, kaj pafmortigis ĉe la muro. Mortigis ankaŭ Lirije-n, virino 27 jaran, instruistino, naŭ monata graveda, kiu hastis savi la edzon. Restis nur virinoj aliaj. Oni ordonis ke ni ariĝu en la picejo “Kalabria” en la komerca centro kien oni irigis ankaŭ alian homamason,



Knabino perfortita kaj poste murdita de la serbaj soldatoj kaj policistoj

Tie daŭris la pafado fare de policistoj sur ĉiujn civilulojn, entute 60. Vjollca Berisha troviĝis tie kune kun siaj gefiloj Gramoz 10 jara, Drilon 14 jara kaj Dafina 16 jara. Oni ne kompatis eĉ la infanojn. La unua falis la filino de Shyhrete, Herolinda, poste mia filino Dafina. Oh Dio, mi vidis la sangon elverŝante el ŝi kaj ne povis helpi.


Oni daŭrigis per bomboĵetoj. Al Redono 2 jara tio kaŭzis la kranofendon! Ankaŭ mi, trafita de mangrenadoj, svenis. Rekonsciiĝinte mi vidis la knabon Gramoz kiun oni estis pafinta per kuglo surkape.



Difektita vizaĝopro torturoj kaj masakroj far serboj

Shyhte rakontas ke la filo Altin vokis ŝin post kiam vidis la mortan Herolindan. Sed la saman sorton havis ankaŭ li mem tuj poste. Estis mortkuŝante Sebahatja kun siaj gefiloj, Ismet 3 jara, Erion 1 jara, Shirinja 17 jara kaj Florian 16 jara. Oni estis lasinta nin mortajn longe, poste venis kaj ŝarĝis en kamiono. Dumvoje, preterpasante la vilaĝon Lutoglava, mi rekonsciiĝinte, same ankaŭ Shyhte, pensis pri la eskapo. Kaj tiel agis.

Ni tuj elsaltis kaj falis sur asfalton duonvivaj. Vilaĝanoj aliaj helpis nin akceptante en iliaj hejmoj.



Patro ŝokita pro perdo de siaj gefiloj

Teruraĵoj en Gjakove

Tiun nokton, en la urbo de Gjakove, Naser Rudi kaj Agron Nagavci vidis multajn policistojn drinkante kaj sieĝante la domojn de la kvartalo, rompante ilin kaj enirante. Unue ili eniris en la hejmo de Fehmi Lleshi kaj tuj ekzekutis lin kaj ties edzinon.




Avino klopodas trankviligi sian nepon kiu perdis la gepatrojn

Poste pasis ĉe la familio Deda, ekzekutis unue la filinon, Aferdita, kaj ties filon 7 jara kaj la gepatrojn. Poste eniris en nian hejmon kie rifuĝis multaj homoj. La edzino de la komandanto Pituliq, s-ino Lila, loĝanta apude, estis renkontinta Tringa-n, nian novedzinon. Tringa estis plendinta al ŝi pri la raprezalioj. - Ne

zorgu Tringa, estis respondinta Lila, - ni estas ja najbaroj, nenio okazos al vi. Kaj estis petinta ŝin kiom da homoj estas en la ties domo. Tiel, post la noktomezo, la policistoj rompis la kortan pordon. Tri maskloj de la domo tuj eskapis malantaŭ de la domo. 7-8 policistoj eniris en la subĉambro kie ariĝis virinoj kaj infanoj.

-Nu, eliru, eliru, ĉar mem demandis NATO-n kaj UÇK- (Naciliberigan armeon) !

Dren Caka, knabo 9 jara antaŭe, rakontas:



Dren Caka post kelkaj jaroj en Kanadio

Unue oni ekzekutis Flaka-n, la fratino de Tringa, ankoraŭ 16 jara. Kiam ŝi petis glason da akvo oni pafis al ties kapo per kuglo. Poste mortigis ŝian patrinon, Shahinder kaj la aliajn. Elirinte en la korton, pafis sur la onklo Hysen kiu estis preterpasante per ĉaro. Mi vundigixs surbrake. Mi vidis la malgrandan fratino, Rita-n, kiu sin kaŝis en la ŝranko kiun kovris jam la flamoj... Mi eskapis de la flamoj, transsaltis la muron dumetran de la korto kaj, de domo al domo alvenis en la hejmo de miaj geavoj. La morgaŭon, ili kondukis min al la hospitalo kie ankoraŭ deĵoris kelkaj albanaj kuracistoj. Ĉi tiuj kondukis min al la landlimo kie min prenis italoj per helikoptero kaj venigis en Tirana-n.



Malesperigitaj virinoj

En la ruinaĵoj de la domo restis mortaj kaj bruligitaj 20 homoj: patrino Fetije Vejsa (60 jara) , Tringa Vejsa (30 jara) , infanoj: Dorina (11 jara) , Marigona (9 jara) , Sihana (7 jara) , Arlind (5 jara) , Rita (20 monata) ; Valbona Vejsa Haxhiavdia (38 jara) kun tri gefiloj: Doruntina (8 jara) , Egzon (5 jara) , Rina (3 jara) ; Valbona Caka (34 jara) kun tri gefiloj: Dalina (13 jara), Delvina (8 jara) , Diona (2 jara) ; Shahindere Hoxha (60 jara) kun la filino Flaka (16 jara) ; Shirine Nuçi (72 jara) kun filino Mandush (52 jara) kaj onklo Hysen (52 jara) .



Masakrita infano

Shqipe, filino de la legendeca komandanto Adem Jashari, el la vilaĝo Prekaz, rakontas:



Masakro en Peja

Nia domo estas sieĝita kelkfoje. Ĝi rezistis al sieĝo de 30-a de decembro 1991 kaj sieĝo de 22-a de januaro 1998.

La tria sieĝo okazus je 5-an, 6-an kaj 7-an de marto 1998.

Post heroeca rezistado, falis 20 personoj el la familio Jashari, inter ili 12 inoj: 4 virinoj (Zahideja, Zarifja, Feridja, adilja) , kaj 8 knabinoj (Blerina 7 jara, Fatimja 9 jara, Igballja 11 jara, Liria 14 jara, Valdetja 15 jara, Afetja 17 jara,

Hidajetja 18 jara kaj Selvetja 20 jara) . Dum el la tuta larĝa familio Jashari falis 57 personoj, konsistigantaj vilaĝan kvartalon. Saviĝis nur la knabino Besarta 11 jara kaj alia knabo Bashkim.

Masakro de Reĉak

La 15-an de januaro 1999 okazis masakro kiu influis notinde en la ŝanĝo de la internacia opinio rilate la sorton de Kosovo.



La tomboj de la masakritoj en Reĉak

Serbaj krimuloj, inter ili ankaŭ najbaroj el Shtime, alvenis en Reĉak kaj mortigis 42 homojn, kelkajn el ili oni eĉ senkapigis, ĵetante en grandan kanalon ĉerande de la vilaĝo. Morgaŭon, alvenis ĵurnalistoj ĉekape la reprezentanton de OSCE observa misio William Walker. Tuj la tuta monda gazetaro kaj medio raportis pri la makabra evento.



William Walker revenas Kosovon ofte

La ekzekuto de advokato Bajram Kelmendi kaj ties du filoj

Nekibe Kelmendi, eksa ministrino pri justeco kaj vicprezidantino de la Demokratia Ligo rakontas:



Nekibe Kelmendi

Estis la unuaj horoj de 25-a de marto 1999. La policistoj forprenis perforte mian edzon kaj du filojn kaj venigis ilin de Prishtina al Fushe Kosove. Junulo preterpasanta tien post finiĝo de sia deĵorperiodo, rigardis la tutan krimscenon.



Ĉirkaŭ 1 miliono da albanoj estis devigitaj forlasi siajn hejmojn kaj terojn

Respondeculoj de la Ŝtata Sekureco, Miško Lakoviĉ, David Gajiĉ kaj tri aliaj ekzekutistoj eligis la kaptitojn el la veturilo kaj ordonas Kastriot-on, pliaĝan filon 25 jaran ke li pafu al la patro Bajram. Li maljesis. La samon faras la alia filo, 17 jara, Kushtrim. Ankaŭ Bajram mem ne plenumis la ordonon por pafi kontraŭ siajn filojn.

Tiam la ekzekutistoj pafis al Kastriot, poste al Kushtrim kaj fine al mem Bajram. Sekvis pafado kontraŭ tri korpojn kiuj ricevis de po 18 ĝis 32 kugloj.



Oni portas avinon en fera ĉareto je direkto de la landlimo

Bedaŭrinde neniam oni invitis Nekibe-n en la Juĝejo de Hago. La eksa ĝenerala prokuratorino, Carla del Ponto, prokrastigis ĉiam la kunfrontiĝon de Nekibe Kelmendi al Miloŝeviĉo.



La trajno Prishtine- Skopje plenplena de rifuĝintoj

- Kial vi ne akuzas ĉi lastan pri genocido kontraŭ albanan popolon?- kelkfoje demandis ŝin Nekibe.

–Ne ekzistas pruvoj- respondis del Ponto...

Enesperantigis **Bardhyl Selimi**

Februaro 2013

Kvinjara sendependa Kosovo

La 17-a de februaro 2008 estis por albanoj de Kosovo sankta tago, atendata de jarcentoj. Post 500 jaroj “milet-o” (turke: popolo) , 100 jaroj “narod” (serbe: popolo) , kaj dek jaroj “people” (angle: popolo) , finfine malfermiĝis la verda lumo de sendependeco!

Ĉi jare oni festis la kvinjaran datrevenon ĝoje kaj feliĉe ne nur en Kosovo, sed ankaŭ en Albanio, Makedonio, Montenegro, Serbio, kie vivas en siaj propraj teroj albanoj.

Aparte tragika estis la vivo de kosovanoj dum 100 lastaj jaroj sub la serba jugo. La jaro 1912, kiam Kosovo aneksiĝis de Serbio notis ankaŭ grandajn masakrojn kaj veran dezertigon de la lando far la serba armeo. Inter tiuj kiuj raportis pri tiaĵoj estis ankaŭ la fama Leon Trocky, rus-hebrea komunisto- gvidanto, kiu deĵoris kiel militkorespondanto de la ĵurnalo “Kievskaja Misl”. Jen kion skribis li la 23-an de decembro 1912:

“La teruraĵoj ekevidebliĝis ĵus ni transpasis la landlimon. Je kvina horo posttagmeze, alproksimiĝante al Kumanovo, la suno ekmaleviĝis kaj la mallumo komenciĝis. Ju pli multe melheliĝis, des pli multe ekbrilis la fajroflamoj, suprenirantaj al la ĉielo. Ĉio ĉirkaŭ ni bruliĝis. Ĉiuj albanaj vilaĝoj enflamiĝis.. ” Pli poste la aŭtoro rakontas ke tiaj vidaĵoj sekvis lin dum la tuta vojaĝo de Kumanovo al Skopje. En la stacidomo de la dezertigita Skopje, ebriita soldato serba, ĉetniko, kun la brando-botelo en unu mano kaj la longa tranĉilo en la alia, ludis kun albanoj forkaptitaj kiel la kato kun la muso: “Ekstaru!”, “Eksidu!” kaj devigante ilin drinki brandon. Alia soldato, neebriita, diras al la vojaĝanto pri la homoj kun kiuj mokadis lia kamarado: “ Ĉi tiuj estas arnaŭtoj. (albanoj) Nun ni buĉos kaj dispecigos ilin”.

Aliaj amasaj masakroj okazis ankaŭ en la jaroj 1944-1945 kiam en Kosovon reeniris la armeo serbo-komunista.

La 2-an de julio 1990 la tiama parlamento de Kosovo, antaŭ la pordoj de la Kunvenejo, proklamis la Deklaracion de Sendependeco enkadre de Jugoslavia Federacio, kiun la reĝimo serba ne agnoskis. La 7-an de septembro, samjare, oni aprobis en Kaĉanik la Konstitucion sed la registaro ekzilis eksterlande. En la jaro 1991 okazis tutpopola referendumo kiu proklamis oficiale Kosovon sendependan ŝtaton kaj elektis kiel prezidanton dr. Ibrahim Rugovo-n.

Tiu lasta organizis la pacan rezistadon kontraŭ la sovaĝa serba reĝimo. Dume plifortiĝis la solidareco ene de la popolo. Prof Anton Ĉeta entreprenis agadon por rekonsciliĝo, pardonado de sangovenĝoj.

Miloŝeviĉ ordonis maldungadon de ĉiuj publikaj oficistoj, ĉirkaŭ 110 000 personoj. La edukado paralizigis, la Akademio de Sciencoj, informadaj rimedoj (radio, ĵurnaloj) , sanigadaj institucioj, fermiĝis, same la universitato de Prishtina kaj ĉiuj albanlingvaj lernejoj.

Je signo de solidareco, albanoj malfermis siajn domojn por lernejoj kaj klinikoj. Multaj intelektuloj estis malbontraktitaj, enprizonigitaj, murditaj kaj pereintaj. Centoj kaj miloj personoj forlasis siajn hejmojn kaj fuĝis eksterlanden. En la ekzilo albanoj fondis humanitarajn asociojn por kolekti monon, je 3 % de iliaj

enspezoj, por vive teni la staton kaj peziĝintan ĥaoson reginta enlande. Oni sekvis sloganon “familio helpas familion” kaj la helpaĵoj venadis de ĉiuj albanaj teritorioj, el Valo de Preŝeva, Okcidenta Makedonio (Ilirida) kaj diasporo. Oni memorganiziĝis por liberigi Kosovon, akumulis financajn rimedojn por armado. Fondiĝis Naciliberiga Armeo UĈK, subtenite ankaŭ de registaro de Albanio, kie ĝi trejniĝis de militistaj spertuloj en ties teritorio kaj komenciĝis ankaŭ la unuaj militagoj. Falis ankaŭ centoj da martiroj.

UĈK aperis oficiale la 28-an de novembro 1997. La masakro de Reĉak je 15-an de januaro 1999 atestita ankaŭ de fremdaj observantoj de OSCE kaj la armita rezistado de familio de Jasharo-j en Prekaz kie falis 53 ties membroj, notis alian atestaĵon de genocido serba kontraŭ albanoj. La amasa forpelo de albanoj (ĉirkaŭ 1 000 000) al Albanio, Okcidenta Makedonio, Montenegro kaj aliaj eŭropaj landoj, murdado, bruligado kaj dezertigado de iliaj teroj, incitis NATO-n interveni per aera bombardado de militistaj bazoj de Serbio.

Dum la NATO-a kampanjo Miloŝeviĉ malfermis la pordojn de la prizonoj el kiuj eliris krimuloj por masakri albanojn kune kun antaŭmilitistaj taĉmentoj kaj mercenaroj rusaj kaj rumanaj. Pli ol 15 000 personoj mortiĝis, 5000 malaperis, 20000 knabinoj perfortiĝis.

Post 73 tagoj da bombardado, la reĝimo de Miloŝeviĉ cedis, akceptis la interkonsenton de Kumanovo laŭ kiu 40 000 soldatoj serboj, policistoj ka forlasis Kosovon. Anstataŭe eniris trupoj de NATO-o.

Kosovon ekadministris UNO tra miloj da oficistoj, policistoj kaj soldatoj. Kosovo praktike fariĝis libera ekde junio 1999 kaj la homoj turniĝis al la rekonstruado kaj demokraciiĝo. La 17-an de februaro 2008 ĝi proklamis sian sendependecon limigitan kaj fine de la jaro 2012 plenan sendependecon. Tamen la trupoj de NATO kaj EULEX plue restas tie ĝis la interrilatoj kun Serbio pliboniĝos kaj ĉi lasta agnosku la novan ŝtaton. Tiucele, ekde du jaroj okazas regule en Bruselo kontaktoj inter reprezentantoj de Kosovo kaj Serbio.

Aktuale Kosovon agnoskis pli ol 98 membro- ŝtatoj de UNO. Bedaŭrinde ĝin ankoraŭ ne agnoskis 5 membroŝtatoj de EU (Slovakio, Grekio, Kipro, Rumanio, Hispanio) la EU parlamento antaŭ nelonge alvokis ke ankaŭ tiuj ŝtatoj agnosku Kosovon kiu aspiras eniri estonte en EU.

Restas problemoj seriozaj surkampe de politika integriteco de la lando, (ekzisto de paralelaj strukturoj norde), ekonomio, senlaboreco, izoliteco. Lastatempe la ĉefministro Haŝim Taĉi kritikis respondeculojn de Bruselo rilate la prokrastiĝon de liberalizo de vizoj por civitanoj de Kosovo. Siaflanke, en la decembro 2012 dum Konferenco pri Sekureco en Munkeno la ĉefministro de Albanio, Sali Beriŝa, atentigis eŭropajn politikistojn ke albanoj loĝantaj en kvin balkanaj ŝtatoj neniel povas konsiderati diversaj nacioj. Estas nur unu nacio, tio albana aspiranta integriĝi enkadre de EU.

Bardhyl Selimi



La flago de Kosovo sur la vizaĝoj de infanoj



Kosovo festas

Shefki Ollomani

Albana poeto el Makedonio (Svedio)

Poeziaĵoj

Mia belulino

Edzino mia- hirunda,
Ne ekzistas alia tia.
Estas elkora, grandanima,
Malhelon, nokton.. ŝi lumigas.
Estas ŝi perle ĉasta,
Kaj ambre pura.

Neniam rideton ŝi ĉesigas,
Tagnokte, kristale brilas.
Ŝia voĉo- aglina,
Dolĉa, kanaria.

Laborema kaj fidela,
Montarana kaj bravema.
Sune varmas, lune brilas,
Cervine rapida, Feine belas.
Kore blanka, kastelprincino,

Himalaja neĝosimilo.

Kapreoline peza,
Papilio surpaŝteja.
Estas mia amikino, mia edzino,
De fontano al fontano feino.

Bela estas, dorlotema.
Mona Liza surfenestra.
Kolombino en sennuba ĉielo,
Fluganta en gajeco.

Kiel cigno sur la ondoj,
Lerta kiel la angilo.
Dukapa aglino,
Neniam forlasas sian neston.

La formoj de la perfideco

Iu perfidas pro devigo,
Alia pro mono,
Tria pro malhontemo!

Kelkaj perfidas pro kolero,
Aliaj pro seniluziigo,
Tria pro avideco!

Kelkiu perfidas pro tristiigo,
Alia pro timiigo,
Tria pro teruriigo!

Kelkaj perfidas pro jaluzo,
Aliaj pro stulteco,
Tria pro ignoreco!

Kelkiu perfidas pro karierismo,
Alia pro egoismo,
Tria pro nervozismo!

Kelkaj perfidas pro turmentado,
Aliaj pro perfortado,
Tria pro maltolerado!

Kelkiu perfidas pro malkuraigeco,
Alia pro maldigneco,
Alia pro skizofreneco!

Kelkaj perfidas pro disfalisimo,
Aliaj pro histerismo,
Tria pro iluzionismo!

Kelkiu perfidas pro avideco,
Alia pro debuleco,
Tria pro malfideco!

Kelkaj perfidas pro disfalo,
Aliaj pro malespero,
Tria pro trompeco.

Kelkiu perfidas pro barbareco,
Alia pro timegeco,
Tria pro krueleco!

Kelkaj perfidas pro penteco,
Aliaj pro transviveco,
Aliaj pro malekspekto!

Kelkiu perfidas pro zorgeco,
Alia pro naiveco,
Tria pro malpieco!

Kelkaj perfidas pro hipnoziigo,
Aliaj pro kondamniigo,
Tria pro maloferiigo!

Kelkiu perfidas en nigra prizono,
Alia en nova fotelo,
Tria ligita per kateno,
Kvara senkatene, en libero!

Kelkaj timas morton, inferon,
Aliaj havas porkan avidon,
Tria rompiigas pro malamika
krueleco,
Kvaraj ricevas dekoraĵojn!

Tiel la perfido dancludas,
Tiel ĝi zorgojn kreas,
Tiel ĝi masbuĉas,
Tial ni Albanion ne unuigas!

Enesperantigis: **Bardhyl Selimi**, januare 2013

Noveleto

Adonis¹²⁹

¹²⁹ Troviĝas en la libro TREGIME eldonejo Toena Tirana 2009

(---Adonisi-----)

Mia patro mortis laŭ tute ordinara maniero. En lia aĝo, kaj li havis pli ol okdek jarojn, ĉiam estos ia banala kaŭzo, por forlasi ĉi mondon. Koncerne mian patron, tio okazis pro varmego en tiu jaro. Ĝi forpasigis ankaŭ la aliajn homojn, pli junajn ol li.

Pro la varmego tiuj, kiuj venis adiaŭi la mortinton, konsilis al mi, kaj tre prave, ke la korpon de la patro mi ne tenu hejme dum la nokto antaŭ la entombigo. „Oni devas kuŝigi lin en iu malvarma loko, ĉar alie...” – ne finis sian averton malproksima kuzino. Sed tiu escepte logika konsilo tre mirigis min.

- Sed kien mi transportu lin? – mi demandis

- Nu, kien? – daŭrigis la kuzino. – Tien, kien oni transportas mortintojn, en kadavrejon.

- Bone, mia kara – alparolis ŝin mia duonpatrino – sed kiel oni povas eniri tien, kiel kuŝigi la kadavron, se ni konas nek regulojn, nek homojn.

La diskuto ne daŭris longe. Ĉar iu doktoro, kiu venis kun kondolenco, konsilis, ke mi interparolu kun la estro de la hospitala kadavrejo, Adonis.

- Kompreneble – mi respiris trankviliĝante.

Vespere ni enŝovis la ĉerkon en la aŭtomobilon, kiun mia entrepreno disponigis al mi kaj mi ekveturis. Sola.

La kadavrejo estis teretaĝa konstruaĵo, en ioma distanco al la hospitalo kaj ĉirkaŭita per herbo forbruligita de la suno, kun flavaj, makulitaj muroj kaj stukaĵo defalanta kelkloke. La fenestrojn defendis rustiĝintaj kradoj. En tiu morta pejzaĝo la sola vivanto estis Adonis.

Facile mi trovis lin. Li promenadis, tenante cigaredon per dikaj fingroj, kiujn flavigis nikotino aŭ desinfektiloj. Mi ekmiris, kiel bonege Adonis taŭgis por sia laborloko. Kun distaŭzitaj haroj, enkaviĝintaj okuloj, krispaj brovoj, dika trunko, blanka ĉemizo plena je flavaj makuloj, disbutonita kolumeto, kun butonoj de la kacujo, malrekte enŝovitaj en la truetojn.

Mi prezentis min kaj klarigis, kion mi volas. Li rigardis strabe:

- Malgraŭ la tuta estimo, kian mi havas al la doktoro, estos tre malfacile trovi lokon por la mortinto. Kio li estas?

- Mia patro.

- Mi kondolencas.

Kaj li klarigis decide:

- Do, kiel mi jam diris, ne estas facile. Dum la lastaj tagoj venis eksterordinare multaj kompatinduloj, ne nur el la hospitalo, sed ankaŭ el strato (kiel – pardonu la komparon! – via patro) .

Mi rememoris la konsilon de la doktoro kaj tuj elpoŝigis kvin milojn da lekoj. Adonis okulkaptis mian geston kaj mildiĝis:

- Nu, bone, ni vidos, kio estas farebla.

- Dankon – mi respondis.

Adonis pravis. Vere estis malfacile trovi liberan lokon. Li komencis malfermi fridujojn, elprenante kaj traŝovante mortontojn de loko al loko. Li laboris en silento, precize, kaj samtempe li parolis kviete:

- Mi estas tia, ke monon mi ne prenos sen fari ion. En alia loko homoj pagas kaj estas trompataj: oni kvazaŭ frostigas la kadavrojn, sed antaŭ ol mortinto revenos hejmen, li fandiĝas kiel glaciaĵo. Kaj mi laboras honeste. Mallonge dirite, mi frostigas la kadavrojn, kiel decas. Jen tiel!

Kaj dezirante prui la verecon de siaj vortoj, li malfermis la apudan fridujon kaj elŝovis tabulon kun la korpo de juna knabino – ŝi havis kretblankan vizaĝon (oni ne scias, ĉu pro la morto aŭ frostigo). Li ektiris la brakon de la kadavro kaj subite, kvazaŭ li kontrolus akvomelonon, ĉu ĝi estas matura, li frapis tre forte ŝian frunton per la dikfingro. La sono estis terura.

Mi ekremegis. Adonis proponis, ke ankaŭ mi frapu.

- Ŝi ja ne mordos vin!

- Ne estas necese, dankon – mi elflustris per la febla voĉo. – Sed kial ĉi tiu knabino mortis?

- Mi ne scias, verŝajne ŝi mortigis sin.

- Kial?

- De kie mi sciu? – Adonis skuis la ŝultrojn kaj reparolis pri sia plej ŝatata temo:

- Tio signifas, ni jam scias, sur kio ni staras: morgaŭ vi havos la paĉjon frostrigidan je amen, same kiel ĉi tiu knabino.

- Mi estas certa – mi volis fini la interparolon kiel eble plej rapide.

Finfine Adonis trovis liberan lokon. La rustiĝintan fridujon, kiu – estis flava - oni ne scias, ĉu nature aŭ pro malnoveco. Interne estis tri lokoj.

Ĉi tien mi metos vian paĉjon. En la fridujo kuŝas pensiulo, kiun oni lasis antaŭ semajno kaj ankoraŭ ne forprenis, kaj virino, kiun oni veturigis hodiaŭ matene.

- Bone – mi diris. Ni kuŝigis la patron. Fermante la fridujon, mi rigardis lian polmon. Kiomfoje mi kroĉis miajn okulojn al ĉi tiu polmo, kiam mi petis monon. Kaj la patro neniam rifuzis. Dum la tuta vivo li bedaŭris, ke mi kreskas sen patrino.

Surprizita per la afableco de Adonis, mi elpoŝigis la sekvajn kvin milojn da lekoj kaj donis al li senvorte.

Li rigardis min per la okuloj de iu, kiu faris historian decidon, kaj ekparolis amike:

- Knabo, ĉu vi scias, kio afliktas min? Ni ŝanĝu lokon por via paĉjo, mi kuŝigos lin en la specfridujon. Ĝi estas plena, sed ni trovos solvon. Nu?

- Kion mi diru?! Bonege.

Nur tio estas certa – diris Adonis – via paĉjo frostiĝos tiel, ke vi ne rekonos lin.

Mi dankis, kvankam mi ne estis kontenta pri tio, kion li diris.

Li malfermis la specfridujon. Ĝi estis plene ŝtopita.

- Tiun ĉi mi metos sur la malsupran breton – Adonis komencis eltiri iun mortinton. – Li fariĝis tia glacipecigo, ke en neniu forno li fandiĝos – li alparolis ĝuste sin ol min. – La alian mi kuŝigos plej malsupren - li metis la mortinton sur la plankon, respiris profunde kaj rigardis min – aŭ ne, tien mi metu agronomon, kiun oni veturigis hieraŭ, ĉar estos pli facile al

mi, kiam morgaŭ ili forprenos lin. Venu tien kaj iom helpu! Aŭ ne, pli bone mi eltiru la pensiulon: li kuŝas semajnon ĉi tie kaj neniu venis al li.

Kvin minutojn poste, sur la planko kuŝis disĵetite la kadavroj de kvar personoj. Por momento Adonis perdis orientiĝon.

- Kien ni metu lin? – li ekpensis pri la pensiulo.

- Mi ne scias – mi respondis kun ia kulposento.

- Bone, bone – li decidiĝis. – Tiun ĉi mi kuŝigos kun iu. Pli bone mi enpremu lin en fridujon ol lasu ekstere.

Tiel li faris. Ni kaptis la pensiulon kaj kuŝigis lin sur alian kadavron en la fridujo, kiu ne frostigas tro bone, kiel ŝajnis al mi.

- Aŭskultu – li decidis finfine – mi pensas, ke plej bone estos, se ni metos vian paĉjon malsupre, ĉar morgaŭ matene vi ja forprenos lin, kaj por la agronomo ili povas veni posttagmeze.

- Konsentite – mi ne protestis.

Do, ni kaptis denove la agronomon: mi – la kapon, kaj li – la piedojn, sed la kapo frostiĝis tiel, ke kiam ni levis supren la mortinton, ĝi elglitis el miaj manoj kaj malgraŭ la senespera fortostreĉo de Adonis li falegis sur betonon kun terura krakego.

Li falegis sur la vizaĝon. Unu brako elsaltis el la artikolo.

- Mi pardonpetas – mi volis senkulpigi min.

- Kial vi paliĝis tiel? – ekmiris Adonis. – Ne timu, estas nenio, ho, kiomfoje tio okazas al mi! Ĉu vi scias, kial li falis? Ĉar li glaciigis.

- Sed lia brako...? – mi eksentis naŭzon.

- La brako estas bagatelo! Dum minuto mi fiksos ĝin, kaj la rompon, kiu vidus de interne?

Adonis tuj okupiĝis pri tio, sed ne estis facile. Dum momento plenforte li apogis sian piedon sur la bruston de la agronomo, por ektiri la brakon antaŭen. Aŭdiĝis krako de ostoj de la mortinto kaj penspirado de Adonis.

- Ĉu mi helpu? – mi demandis necerte.

- Ne, vi ne devas, nur starigu vian piedon, ke li ne moviĝu. Estas nenio, okazas tiel. Ĉu vi scias kial? – denove li demandis.

- Ĉar ili glaciigis – mi konis la respondon.

- Brave! – Adonis penspiradis. – Finite! – li diris post momento kaj komencis viŝi la manojn. Por suprenlevi la agronomon, ĉi-foje li kaptis la kapon.

Ŝajnis al mi subite, ke la agronomo havas kurbigitan nazon. Adonis divenis el mia rigardo kaj kvazaŭ nenio estus okazinta, li demandis:

- Kio afliktas vin?

- Lia nazo... - mi diris hezite.

- Kiu nazo?! Li povis denaske havi ĝin tia! Ĉu estas malmulte da homoj kun kurba nazo?.

Por diri la veron, mi ne memoris, ke la nazo de la agronomo estu tiel kurbigita

Finfine ni atente kuŝigis la agronomon en la fridujon.

Mi eksentis teruran malplenon. Mi proksimiĝis al la korpo de mia patro. Sed okulangule mi vidis, ke Adonis fingrumas sur la vizaĝo de la agronomo. Ŝajne en sekreto li provis rektigi al tiu la nazon, sed kiam li rimarkis, ke mi observas, li frapetis la vizaĝon de la mortinto, kvazaŭ li volus diri: „Kiel vi fartas, dikuleto?“, kaj li kunfrotis siajn manojn.

- Nu, en ordo.

Finfine ni kuŝigis la patron sur la unuan breton de la specfridujo. Antaŭ ol brufermiĝis la pordo, mi rigardis lin ankoraŭfoje. Mi lasis la patron sola, en mallumop kaj en malvarmego, inter fremduloj, sed kiam mi ekpensis, ke ni jam disiĝas, Aonis, ne tute fermante la pordon kaj rigardante min kiel esploroficiro, trafis min per la demando:

- Kiu faris vian paĉjon?

- Nu? Mi ne komprenas

- Vian paĉjon kiu faris? – li provis klarigi ion.

Tute surprizita mi elbalbutis:

- Mia avinjo, ŝi naskis lin

- Kial vi parolas pri la avinjo? Mi demandis, kiu preparis la mortinton.

- Ha! Virinoj... Cetere mi ne scias – mi komprenis finfine.

Dum longa momento Adonis rigardis min exploreme kaj taksis per la voĉo de la fakulo:

- Ili ne faris bone. Eĉ ŝajnas al mi, ke ili tute ne faris... Nu, estas via patro, faru, kiel vi volas, mi ne devigas vin, vi donas la lastan servon al li, sed vidu, ke vi lasas vian patron nefarita.

Mi divenis, kion li intencas kaj elpoŝigis denove kvin milojn da. lekoj.

- Faru tion, sinjoro.

- Nu – li respiris kun plifaciliĝo. – Iru trinki kafon, kaj mi dume finos tion, poste revenu al mi kaj vi veturigos min hejmen per via aŭtomobilo.

Mi revenis post horo. Li pretigis mian patron kaj enfermis lkin en la fridujo.

Adonis loĝis antaŭ la urbo. Sur la unua etaĝo de la malpura kaj malzorgita domo, kiun propramane starigis loĝantoj. Li obstiniĝis, ke mi veturigu lin antaŭ la enirejon, sed li ne tuj forlasis la aŭtomobilon. Nur certiginte sin, ke la najbaroj lin vidas, li brufermis la pordeton kaj kriis laŭte: „Morgaŭ venu al mi je la sepa“. Li iris sur la ŝtuparon, akompanata per iliaj rigardoj plenaj de estimo kaj enviado.

Hejmen mi revenis malgaja. Mi ne dormis bone. Kiomfoje mi vekiĝis, mi pensis pri la patro, kiu iom post iom fariĝas glacipecego.

Kiam matene mi veturis al Adonis, mi devis kelkfoje hupi, antaŭ ol li vidiĝis en la fenestro, vestita per subĉemizo. Ĵetinte rigardon sur la tutan straton li kriis: „Ĉu vi jam estas? Atendu kelkajn minutojn, ĝis mi fortrinkos kafon“.

Malsupren li venis kun la demando: „Kiel vi dormis?“ Ĝis la kadavrejo ni interŝanĝis eĉ ne vorton. Elirante el la aŭtomobilo, li atenteme kroĉis siajn okulojn al la domo de la hospitalo. „Certe li serĉas iun mortinton“ – mi ekpensis. Li alparolis pasanton apude:

- Ĉu al mi?

- Kaj kiu vi estas? – demandis la pasanto.

- El la kadavrejo – respondis Adonis.

- Ne. Mi venis ripari muron.

- Mi pardonpetas – li malantaŭeniĝis kaj diris al mi: - Ni iru al via paĉjo.

Li malfermis la fridujon kun mieno de la homo, kiu scias, kion li parolas. La patro estis frostrigida.

Vidante mian silenton, Adonis demandis:

- Nu, kion vi diros?

- Kaj kion mi diru? – mi ekmiris.

- Nun tuŝu lin.

Mi tuŝis. Li estis malvarmega. Adonis atendis.

- Frostrigida kiel osto – mi diris.

Mi petis, ke li helpu al mi porti la patron en la aŭtomobilon. Sed tiumomente oni veturigis novan kadavron, do mi devis peti helpon de la masonisto.

Kiam ni iris kun la ĉerko sur la ŝultroj, ankoraŭfoje mi dankis al Adonis. Li respondis mallonge: „Prosperon, mia ora!”, kaj li plu klarigis al iuj venintoj sian vivo-kredon:

- Ĉiam mi perlaboras monon ŝvitante, sen trompado.

Dirinte tion, li turniĝis al la fridujo, kie kuŝis la korpo de la knabino, kiun li fingrofrapis pli frue sur la frunton.

Esperanto en Kosovo

Jaron post la fino de la milito en Kosovo, (1999), laŭ sugesto de prof. Corsetti kaj helpe de la itala esperantista federacio, ni certigis kelkdekojn da ekzemplerojn de lernokurso por albanoj, kiujn transdonis al la bibliotekoj de Prishtina, Prizren kaj Gjakova.

Ĉi jare, aprilofine, mi vizitis Prishtina-n kaj Gjakova-n kaj enmanigis, respektive, 10 ekzempleroj de la libro “Ĉu vi parolas Esperanton” al la nacia biblioteko en Prishtina kaj 5 ekzemplerojn al la urba biblioteko de Gjakova. Ilin akceptis la tieaj direktoroj, prof. Sali Bashota kaj Engjell Berisha.



Prof. Sali Bashota, maldekstre

Monumento de Patrino tereza en Gjakova

Samtage mi renkontis la dekanon kaj vicdekanon de Fakultato de Filologio kaj tiun de la Naturaj Sciencoj en Universitato de Prishtina kaj diskutis kun ili la eblecon de enkonduko de IL en ties institucioj. Ni disdonis inter la studentoj la flugfoliojn propagandantaj la gravecon de IL.



La enirejo de Filologia fakultato



La biblioteko

Tion faris ankaŭ en la klubejo-librovendejo “Dit-Nat” (Tag-Nokte), frekventata precipe de gejunuloj.



La kafejo-librovendejo Dit Nat



Studentino frekventulino

Espereble ankaŭ en Kosovo la e-movado revigliĝos baldaŭ.



Prishtina



Florvendejoj



Hotelo en Prishtina



Kun la verkisto Eqrem Basha

Baldaŭ promoviĝos kelkaj verkaĵoj de la Kosovaj aŭtoroj tradukitaj ankaŭ en Esperanto

Bardhyl Selimi

(Turismo en Albanio)



Pogradec kaj ties distrikto

Gjergji Gusho

Tushemisht/Drilon

La akvofontoj de la rivero Drilon troviĝas apud la vilaĝoj Tushemisht kaj Guras, je 4 km for Pogradec, ĉepiede de la montetoj kaj aspektas tre bele, nekompareble.

Ĉi tiu natura monumento povas vizitiĝi se onis sekvas la vojon Pogradec-Tushemisht- Doganejo.

La rivero Drilon estas larĝa akvofonto kiu daŭras pluen sian fluadon al la lago de Pogradec (aŭ Ohrid) .. La akvo elfluas de la lago de Prespa, tra la Mali i Thatë (Seka Monto) kaj eliĝas eksteren kiel larĝan akvofonton aparta je rapideco 7 kubaj metroj po sekunde. Ĝi estas ĉirkaŭita per densa herbaro kaj posedas riĉan bestan mondon.

Ĉi tiu loko estis preferata por pasigi la feriojn ankaŭ de Enver Hoxha (Hodĵa, eksa albana diktatoro komunista) .

La turistoj povas viziti la ties lastan ripozdomon kiu estas transformiĝinta al hotelo-restoracio.

La vilaĝo Lin

Lin estas malgranda duoninsulo ĉe la okcidentaj bordoj de la lago de Ohrid (Pogradec) kun bela vilaĝo samnoma. La domoj estas konstruitaj el ŝtono kaj brikoj rande de la malvastaj stratetoj kovritaj per vinberlaŭboj. Sude de la lago, apud la vilaĝo Buqezë, troviĝanta proksime de Lin, je la profundeco 2-3 m troviĝas kelkaj palafitoj¹³⁰.

Ĝi estis logloko je lageca tipo, samkiel estis ankaŭ Maliq en la distrikto de Korça.

Estas legendoj dirantaj ke la duoninsulo de Lin estis bela insulo je densa herbaro. La vivo en la duoninsulo de Lin komenciĝis en la unua periodo de la fera epoko kaj daŭrigis ĝis la praa Mezepoko.

Dum la arkeologiaj fosadoj, estas malkovrita pratempa kristana baziliko kun eksterordinaraj mozaikaĵoj sur ties planko, kiu datiĝas ekde la kvara-kvina jarcentoj post Kristo. La mozaikaĵoj havas kelkajn belajn figurojn kiel fiŝojn, birdojn ks.

La vojo “Egnatia”

En la teritorio de la distrikto de Pogradec troviĝas debranĉiĝo de la ĉefa vojo Egnatia, fama vojo ekde la tempo de romia okupado, kiu ligis Romon kun Kostandinopolo. En ĉi tiu debranĉiĝo estas kelkaj pontoj kaj fragmentoj de tiu pratempa vojo, kiuj komenciĝas de Ponto de Golik (vilaĝo Golik), Ponto de Terziu Tajloro) en la vilaĝo Proptisht, la ponto en la valo de Llëngë kaj la ponto en la vilaĝo Niçë.

La vojo sin distingas pro la grandaj ŝtonoj (ŝtona pavimo) troviĝantaj en la gorĝo de la vilaĝo Llëngë apud la bordoj de la rivero Shkumbin.

La Malsupra Selcë

Survoje al Tirana, je la fundo de Qafa e Thanës (Kolo de Thana), se vi turniĝas maldekstren kaj denove maldekstren, atingos al la vilaĝo Selca e Poshtme (Malsupra Selcë). Tie vi povas viziti la kvin monumentecajn tombojn en la loko nomata Kalaja (La kastelo), trovita en pozicio videbla la la valo de Shkumbin. Ĉi tiu kastelo (albane: kala) estas ludinta unuarangan rolon dum la iliro-romiaj kaj iliro-makedonaj militoj. Proksime de tiu kastelo, pasas debranĉiĝo de la vojo Egnatia.

Tio kio igas konata ĉi lokon, estas la kvin monumenetecaj tomboj gravuritaj sur amasa ŝtonego de la loko Gradishtë, apud la vilaĝo.

La arkeologiaj esploroj montris ke temas pri evoluinta ekonomia kaj kultura centro je granda graveco el la tria-kvara jarcentoj antaŭ Kristo.

¹³⁰ Palafitoj estis pratempe lignaj domoj starigitaj sur lignaj trunkoj kaj super la akvo.



La urbo kaj la lago



Ismail Kadare

La generacioj de Hankonatoj

Tradukis Tomasz Chmielik

Kelkaj ĉapitroj



10

Post la morto de la patro la junaj Hankonatoj eklaboris kun granda fervoro kaj komencis multobligi sian riĉaĵon. Tiun jaron estis diskonigita la nova ordono pri salvendado, kiu plialtigis la imposton de unu akĉo* por tri ledsakoj da salo ĝis unu kaj duona akĉoj. Komence ili ĉagreniĝis pri tio, eĉ intencis ĉesigi la salvendadon, sed ili memoris, kiel la patro petegis en la mortolito, ke ili ne forlasu ĉi okupon, ĉar la rado de la fortune ne ĉiam turniĝas al prospero. Do, ili obeis. Ili ankaŭ plu kulturis teron sur Kosovo Pole.

Kune kun ĉi tiu salimposto trafis ilin ankoraŭ unu sortobato: ilia fratino forlasis la edzon kaj revenis hejmen. Ili faris ĉion por devigi la familion de la edzo, ke li akceptu ŝin denove, sed tiuj ne cedis. Iuj flustradis, ke ili kverelis pri la doto, kaj multaj diris, ke estis tute alia kaŭzo. La fratoj klopodis ankoraŭfoje edzinigi sian fratinnon, rapide por savi la honoron. Sed ne estis facile. La familioj, loĝantaj de la nememorebla tempo en Gjirokastra, malfideme traktis ĉi tiujn venintojn, kiuj ĉiam rapidis. Ĉi tie la homoj ne alkutimiĝis al tia urĝo. Dio decidis, kio okazas, kaj tiuj Hankonatoj volus ŝanĝi la Dian ordon. Tio plaĉis al neniu. Ne vane la maljunaj homoj diradas: Hundino, kiu hundojn postkuras, naskas blindajn idojn.

Kiam la filino forkuris de sia edzo, tio rompis ŝian maljunan patrinon, kiu estis malsanema. Sed fine kadio Abdulkadir, sepdek-dujara vidvo, kiu iam gvidis la proceson pri Kosovo Pole, petis la manon de la malbonkondata fratino de Hankonatoj. Ili lasis ŝin al li senhezite. La kadio estis klerulo, libroj en lia domo okupis tiom da loko, kiom duono de la nutraĵprovizo ĉe Hankonatoj por vintro. Ĉiuj estis en la sepa ĉielo, krom la maljuna patrino Sabeko, ĉar ĝojo pli ol malfeliĉo difektis al ŝi la sanon. Denove, unu post la alia, esploris ŝin kuracistoj, venintaj eĉ el Alaĝa Hisar, sed ili ne faris la ĝustan diagnozon. Do, la filoj portis ŝin denove al la maljuna Kadene, bruligis haŝiŝon, manĝigis al ŝi erinacaĵon, trinkigis brogaĵon el papavkapetoj, sed la sano de la maljunulino ne pliboniĝis. En la sonĝoj ŝi vidis senĉese la botojn de Basri. Ili iras, ŝi diradis, foriras, kaj mi ne povas alkuri al ili.

* akĉo - monunuoj en la osmana ŝtato.

Iu el la kuracistoj diris, ke se tiuj botoj vere ekzistas, ili devus malaperi, por ne turmenti la malsanulinon. Oni serĉegis en ĉiuj anguloj de la granda domo, sed vane. La maljuna vidvino devis kaŝi ilin profunde.

11

Kiam komenciĝis regado de la nova valio^{*}, venis severa vintro. Ĉevronoj ĝemegis de frosto, kvazaŭ ili estus vivaj. Oni diradis, ke la antaŭa valio estis pune sendita al Kirk Kilise. Sed neniu sciis pro kio. Laŭ iuj, ke li estis tro kruela, laŭ aliaj, ke tro milda.

La nova valio ordonis ripari la vojon al Janina. Ekĝojis ĉiuj gvidantoj de la karavanoj. Hankonatoj aĉetis du pliajn mulojn por transportado de salo. Samjare la plej aĝa filo, Hatib, rompis kun siaj fratoj. Li ne starigis novan domon, sed alkonstruis korbelaĵon al la okcidenta alo, kiu eĉ sen tio estis grandega. La fratoj ne kverelis pri la divido de la havaĵo. Sed pli bona estus la malkaŝa kverelo ol la sufokata kolerego, dum monatoj pleniganta la domon, de la sterno malsupre, el kiu oni ĉerpadis akvon, ĝis la ĉambro supre, kie ĉiuj kunsidis por trinki kafon. Tio plene ruinigis la sanon de la kaduka, malfortega vidvino. Ŝi enfermis sin en sia ĉambro kaj ne eliris de tie. Eĉ kuracistojn ŝi ne enlasis. Por trankviligi ŝin, oni diris, ke la fratoj konkordiĝis denove. Sed pro ĉi tiu novaĵo ŝi fartis ankoraŭ pli malbone. Ŝi mortis en la tria tago. Oni lavis ŝin laŭ kutimo. Estis vokitaj ploristinoj, ĉar la edzinoj de la fratoj ne scipovis lamenti dece, kaj oni entombigis la maljunulinon apud la bopatrino, ŝia edzo kaj ankoraŭ unu ido de Hankonatoj, bebo de la mezaĝa frato, kiu mortis pasintvintre, eĉ ne unujara. Neĝis tiel dense, ke nefacile ili retrovis la tombojn.

Nun Hankonatoj havis kvar mortintojn sur la urba tombejo Vasilikua, al kiu la nomon donis bazilio, kreskanta laŭlonge de la fera barilo. Sed kvar tomboj ankoraŭ estis tro malmulte, por ke ili fariĝu lokanoj.

12

Post la morto de la maljuna Sabeko la fratoj disiĝis. Kune ili nur kulturadis teron sur Kosovo Pole kaj vendadis salon. Do la kverelo, kiu delonge pendis en la aero, eksplodis eĉ ne unufoje. Ilia bofrato, kaduka Abdulkadir, zorgis, ke ili aranĝu ĉion milde kaj sen kvereloj.

La domo ankoraŭ pli diskreskis. Por ambaŭ pli junaj fratoj, oni alkonstruis po du ĉambrojn al la norda alo. Nun dudeko da infanoj ofte perdiĝis en mallumaj anguloj.

Abdulkadir mortis dum gvidado de la negocoj de siaj bofratoj. Ilia fratino, Shano, fariĝis vidvino. Iu soldato volis edziĝi kun ŝi. Do, la fratoj kunvenis, pritraktis tion kaj donis ŝin kiel edzinon al li. Baldaŭ poste li formariĝis kun militistaro por sufoki ribelon en norda Albanio. Oni diradis, ke la poŝto ne funkcias tie.

13

* valio - estro de provinco, vilajeto.

El la ĉefurbo de la sangako* venis nova dekreto pri peĉo, rokoleo, salo, mezuroj da silko kaj unuoj de pezo. Oni konigis ankaŭ novajn tributojn. Kontraŭ ĉiu ŝarĝo (fruktoj, rizo, mielo, fromaĝo, butero) - du akĉojn. Kontraŭ ĉaro kun ligno - du pecojn da ligno. Kontraŭ sako kun ligno - unu pecon. Kontraŭ kvar duonoj de buĉitaj ŝafidoj - unu akĉon. Kontraŭ vendita ĉevalo - de la vendanto kaj de la aĉetanto po du akĉojn. Kontraŭ vendloko en bazaro - de virino unu akĉon, de viro du akĉojn.

En la malsupra kvartalo loĝis grandaj familioj el nordo, kiuj konfesis samtempe katolikan religion kaj islamon. Ĉiuj estis scivolaj kaj deziris tion vidi. Baldaŭ ili elreviĝis. Tiuj homoj estis kiel homoj: kun nazo kaj okuloj. Sed estis por ili malfacile imagi, kiel en unu animo povas troviĝi du religioj. Eble pro tia dueco ili ŝajnis portantoj de mistero.

Unu el la novaj venintoj aĉetis ruinigitan domon proksime al Hankonatoj. Ili nomis lin Ali Shkreli, sed oni diradis, ke ŝajne li nomiĝas Ali Sankta Karlo, ĉar post siaj preĝoj en la moskeo li iris al la meso en la katolika preĝejo. Ni vivos, ni vidos, respondus Sabeko kaj trovus ankoraŭ unu kaŭzon por ĉagreniĝi.

14

La novaĵo, ke la tria edzo de ilia fratino, Shano, pereis en la milito, venis kun distingiloj. Okazis la abunda festeno. Dum jaro Shano estis vestita funebre. En marto ŝi edziniĝis denove. Ĉi-foje kun doganisto. Du fratoj, mezaĝa kaj plej juna, ne volis konsenti. Oni ne scias kial. Shano revadis pri infanoj kaj finfine kun la kvara edzo ŝi gravediĝis unuafoje. Ŝi naskis knabino.

Tiutempe en la domo de Hankonatoj edziĝis deko da infanoj. En la saltenejo ne ŝanĝiĝis multe. Nur ke malantaŭe ili starigis fostojn kun tegmento, sub kiu oni metadis sakojn sur la mulojn.

15

En 1728 malfruiĝis la sultana dekreto pri malfermo de la salminejoj. La kaŭzoj ne estis konataj. Ĝi venis nur fine de aprilo. La laboro en la salminejoj komenciĝis tradicie la okan de majo, sed pro la malfrua dekreto la karavanoj kun salo foriris ankaŭ kun malfruo. La profitoj malkreskis duone. Hankonatoj ne kolektis eĉ duonon de la nutraĵprovizo por vintro. Pro kompletigi la malfeliĉon, je la malsano nomata „nigra erinaco”, mortis la edzino de la plej juna frato. Kaskapan. Ŝi estis la plej bela el ĉiuj kvin edzinoj de Hankonatoj. Kuracistoj faris al ŝi du operaciojn. Unue ili eltranĉis duonon de la maldekstra mammo, poste la tutan mamon, sed tio ankoraŭ pli furiozigis la „nigran erinaco”. Ĝi atakis la korpon de la kompatinda virino. Ŝi mortis fine de septembro. Post teruraj turmentoj. Oni entombigis ŝin apud la bogepatroj.

Ĉi tiu malfeliĉo kvazaŭ denove proksimigis la fratojn. Ili laboregis por akiri tion, kion ili perdis pro malfruo en la salvendado. Kosovo Pole, fekunda kiel ĉiam, donis abunde grandajn maizospadikojn. Ŝajnis, ke ĉio plej malbona jam evitis ilin, kiam okazis io neatendita: la tria frato, Bardhush, diris, ke li intencas pilgrimi al Mekko. Ili klopodis haltigi lin, sed li obstiniĝis. Hejme estis granda malespero. La edzino kaj infanoj de Bardhush ploris tage kaj nokte. Sed li ne lasis konvinki sin. Oni diris, ke iu hoĝo, kun kiu lastatempe li sidadis dum horoj, konfuzis pensojn en lia

* sangako - distrikto en la malnova turka imperio.

kapo. Do, sola kiel fingro, li ekmarŝis fine de novembro, iun ventan tagon sur la vojo al Janina.

Ylljet Alicja

Sloganoj

Tradukis Tomasz Chmielik

Dua ĉapitro

La malgranda viro¹³¹

(-Burri i vogël) -----)



Iun tagon la magreta Gjini Tosku, el la kvina klaso de la malgranda lernejo en montara vilaĝo, faris eraron, vokita al la tabulo dum la leciono de geografio *La kontinento Azio*, kaj anstataŭ diri: „Sovetunio estas reviziisma lando”, li respondis „Ĉinio estas reviziisma lando”. Tio okazis en la unua duono de la sepdekaj jaroj. Tiutempe la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio atingis sian pinton.

La instruisto de geografio, bonkora maljunulo nomiĝanta Kujti (Kujtim), rigardis la knabon mirigite, kaj la dekonujara Gjini, vestita pli malbone ol mizere, tuj korektis sian respondon: „Ne, mi petas vian pardonon, sinjoro instruisto, mi volis diri, ke Sovetunio estas reviziisma lando”. La instruisto kapjesis.

Krom ĉi tiu eraro la aliajn informojn pri Azio Gjini ripetis kvazaŭ gurde (tio signifas same kiel en la lernolibro). La instruisto donis al li la noton „tre bone”. Gjini, kontenta, revenis al sia benko, kaj kiam li iris, el la ŝuotruo elstaris la granda piedfingro.

Sekvatage, post la mallonga kunsido de la pedagoga konsilio, la sekretario de la partia organizaĵo en la lernejo, Sabafi, triumfe sin turnis al la instruisto de geografio:

kaptis ĉi hundidon de Toskuoj?

Kujtim distrite.

post la hieraŭa incidento vi rakontos al ni tion kiel la unua.

Sabafi? – demandis Kujtim serioze.

kamarado Kujtim, ke vi ludas naivulon.

instruistaro:

- Nu, Kujtim, finfine vi

- Kion vi diras? – demandis

- Nu, kion? Mi atendis, ke

- Pri kiu incidento, kamarado

- Des pli malbone por vi,

Kaj li klarigis al la surprizita

¹³¹ La fonto serĉenda

- Ĉar Kujtim povas nenion rememori, do mi rakontos, kio okazis dum la leciono de geografio en la kvina klaso. Gjini Tosku, infano el la familio de Preng Tosku, pri kiu vi bone scias, ke ĝi estas la plej malprogesema familio en la regiono – do Gjini diris publike ĉe la tabulo, ke „Ĉinio estas reviziisma lando”.

La instruistoj senspiriĝis.
Kujtim – rememorinte tiun

lecionon – ekridis kaj diris:

- Nun mi jam scias, pri kio vi parolas, kamarado Sabafi. Bedaŭrinde vi estas misinformita. Mi rememoras tiun okazaĵon aŭ incidenton (nomu ĝin kiel vi volas) – kaj ĝi sekvis el tio, ke Gjini, kiu estas unu el la plej bonaj lernantoj en la klaso kaj ĉiam bone konas ĉiujn temojn de la lecionoj, vokita al respondo kutime parolas unuŝpore kaj pro hastemo perdas vortojn. Do, anstataŭ respondi „Sovetunio estas reviziisma lando” li diris erare, ke Ĉinio. Kompreneble li tuj korektis sian respondon. Mi ankaŭ scias, ke li apartenas al la familio de elklasigitaj kulakoj, sed mi ripetas ankoraŭfoje, ke tiu faro estis nek celita, nek intenca.

- Unue – eksplodis Sabafi – povas esti, ke vi havas – kiel vi diras – dum viaj lecionoj miraaaaklajn lernantojn – (ĉi tie Sabafi plilongigis moke la sonon „aaaa”), sed dum miaj lecionoj ial mi ne vidas ilin, ĉe mi Gjini Tosku havas la notojn „tri”, ĉar li scias pli multe. Due kaj plej grave, mirigas min la maniero, laŭ kiu vi, kamarado Kujtim, simpligas la aferon. Ĉi tie, en nia lernejo, okazis io eksterordinara, pri kio mi devas tuj sciigi la Partian Komitaton en la regiono kaj la Fakon de Edukado, dume vi sidas indifere, kvankam vi devus tion prezenti kiel la unua. Pli malbone, mi vidas en vi la klopodon defendi ĉi merdulon! – En la voĉo de Sabafi aŭdiĝis minaca tono.

- Nu, kiu defendas lin ĉi tie!
– Kujtim eksentis sin ofendita. – Mi ripetas ankoraŭfoje: estis nur misdiro. La eraro, pri kiu ne estas necese politikumi. Ni povas ja iri al la klaso kaj demandi la lernantojn.

- Ni faros ankaŭ tion! – kriis Sabafi. – Sed unue ni aŭskultos, kion Gjini diros al ni. La infanoj, kiel vi scias, estas pli sinceraj ol iliaj gepatroj aŭ hipokritaj plenkreskuloj – li mokis pri la ŝokita Kujtim.

- Bone – entrudiĝis la direktoro, kiu silentis ĝis tiu momento. – Al vi, kamarado Sabafi, mi konsilus esplori ĉi aferon precize. Ne ĉar mi opinias, ke vi malpravas. Sed vi mem vidas, ke instruisto Kujtim nenion konfirmis, kaj povas fari nenian decidon sen unuanimeco, Do, unue ni preparolos la aferon de Gjini Tosku en nia rondo, kaj poste mi sciigos la Fakon de Edukado en la distrikto, ĉu bone?

- Mi apogas tion plene –
respondis obstine Sabafi.

- Ankaŭ mi konsentas – diris ĉar li imagis, kio povus
Kujtim kaj eliris teruriĝante,
okazi, se la afero estus pritraktita tiel, kiel volis Sabafi.

Ĉiuj sciis, ke Sabafi malamas Toskuojn ne nur pro la politikaj kaŭzoj, sed ankaŭ pro sia kampula furiozo. Oni diradis, ke li perfortis fratinton de Toskuoj. Poste ŝi akuzis lin antaŭ la tribunalo, sed li ne estis kondamnita pro la „manko de pruvoj”. La familion de Preng Tosku oni traktadis en la vilaĝo kiel eble plej malbone. Unu frato de Preng mortis en malliberejo, la alia forkuris eksterlanden.

Preng estis la plej silentema vilaĝano. Ofte li staradis en la vico antaŭ la vilaĝa bakejo, en kiu homoj atendadis panon dum horoj. Longe restis en la memoro lia vizaĝo sen esprimo, kiam li rigidiĝis en torentoj da

malvarma pluvo, kun akvogutoj falantaj de la okulharoj. Fine, kiam li antaŭeniĝis, kutime la vendistino – unu el la plej fervoraj kaj malicaj komunistinoj en la vilaĝo – diradis triumfe: „La pano finiĝis, Preng. Venu morgaŭ!” Kaj tiam, sen montri sian elreviĝon, silente li revenadis hejmen kun malplenaj manoj, kaj la sekvan tagon, same kviete li staradis denove en la vico sub pluvogutoj falantaj de la tegmento. Kaj kiam finfine li ricevis panbulton, lia vizaĝo esprimis nenian senton.

Preng estis dungita en la lignotenejo. (lignotenejo) Dum laboro ofte helpadis lin Gjini. Kune ili portadis trabojn kaj estis io varma kaj mirinda en tio, kiel silente kaj interkompreniĝante nur per gestoj, ili zorgadis, ke unu ne metu pli grandan pezaĵon sur la dorson de la alia.

Iun fojon, antaŭ la komenco de la malferma popol-kunsido, la partia sekretario atente rigardis en la ĉambro-fino kaj montrante per fingro la starantan tie Prengon li kriis: „Rigardu, kamaradoj, kiu honorigis per sia ĉeesto nian popol-kunsidon – Preng Tosku!”

La homoj turnis sian kapon kaj miregante rigardis la patron kaj la filon. Preng staris muta kiel roko, Gjini, al kiu brilis la okuloj, tenis la manon de la patro. Ili atendis, kio okazos. Kiel ŝajnis, Preng ne komprenis la aludon de la sekretario.

- Do, kion vi serĉas, estimata sinjoro, ĉi tie? – mokis la sekretario. – Ĉu vi ne komprenis, ke la popolo de nia vilaĝo kunsidis tiucele, por decidi, kiel ni dividos kampojn de la vilaĝaj kulakoj?!

La partia sekretario, kontenta pri tia spritaĵo, ekridis laŭte. Post momento aliĝis ĉiuj en la ĉambro. Nur nun Preng vidis klare, ke ili forpelas lin el la kunsido kaj li eliris en la pluvon, tenante sian filon je la mano.

Ĉio okazis semajnon antaŭ la kunsido de la pedagoga konsilio „pri la incidento kun Ĉinio”. Enirinte post la kunsido en la klasĉambron, Kujtim tuj rememoris pri la okazaĵo. Li rigardis kaŝe Gjinion, (Gjion) kiel li elprenas librojn el la tola sako, kaj suspiris en la animo: „Por kompletigi vian malfeliĉon, povra knabo, ankoraŭ mankis al vi Ĉinio”.

Kujtim sentis, ke li ne havos sufiĉe da forto por defendi Gjinion (Gjion) antaŭ la atakoj de Sabafi. Li komprenis, ke ĉi tiu infano distingiĝas inter la aliaj per la „malinda deveno” – du malbonaŭguraj vortoj, nekomprenblaj al la infana menso. En la profundo de la animo li sentis, ke neniu ŝatas Gjinion, (Gjion) nek lian familion, ke ĉiuj timas ilin. Do, ĝuste tial la knabo ne ludis kun siaj kolegoj sur la korto, en la lernejo li evitadis la aliajn knabojn, kaj posttagmeze li iris paŝti bovinon, kun lernolibro en la mano.

Post la leciono, irante tra la koridoro, kvazaŭ hazarde, Kujtim demandis Gjinion (Gjion) :

- Vidu, mi estas surprizita, ke en la klaslibro, vi havas tiom da malbonaj notoj ĉe sinjoro Sabafi. Nu, kial?

Rigardante infane, Gjini respondis:

- Mi klopodas, sed al mi ŝajnas, ke vane.

Kujtim. – En la aliaj lecionoj vi havas nur tre bonajn notojn. Kaj eble sinjoro Sabafi havas ion kontraŭ vi aŭ via patro, aŭ iu alia?

- Ne, sinjoro. Mi ne scias pri tio.

laŭ tiu senkulpa vizaĝeto de la knabo.

Parolante sincere, mi havas la impreson, ke sinjoro Sabafi malŝatas vin.

– respondis Gjini kviete.

longa paŭzo Sabafi informis la instruistaron pri „malgranda konfronto”. Li enkuris la direktoran ĉambron, posttirante je la mano la vakspalan Gjinion. (Gjinon)

ekpuŝis lin antaŭen, por ke li stariĝu vidalvide de la instruistoj. La timigita Gjini similis al leporeto en la grego da lupoj.

ĝojas.

ni ne kunvenis por doni al vi punon pro ia krimeto. Nur rakontu, kio okazis dum la leciono de geografio kun instruisto Kujtim, kaj poste vi iros ludi pulkon (pilkon), ĉu bone?

nenion. Senĉese li estis gardema, rigardis jen Sabafion, jen aliajn instruistojn. Li provis kompreni, pri kio li estis venigita.

ordonis al vi respondi ĉe la tabulo: „Ĉinio estas reviziisma lando”.

tion, neniu diris tion al mi hejme, nek ie.

volas fari al vi nenion malbonan, kaj mi traktas vin delikate kiel ovon, multe pli bone ol kutime, ĉu ne?

milde Sabafi – nek al vi, nek al via patro, nur diru, kiu petis vin pri tio kaj estos la fino. Vi ne estas sufiĉe aĝa, por kompreni, kiu en la mondo gvidas la socialisman politikon, kaj kiu postulas la revizion de la principoj de marksismo-leninismo.

tion, kion mi trovis en la lernolibro, kaj mi scias, ke Ĉinkio (Ĉinio) estas socialism lando.

memorigu nin pri tio, kia lando estas Ĉinio – Sabafi perdis la fridan sangon. – Nur diru al ni, kiu instruis al vi paroli tion, kion vi diris en la klasĉambro.

malgrandan knabon al la konfeso, ke iam ajn li diris tion, sed Sabafi pliseverigis la demandadon:

Kujtim konfirmas, ke vi diris tion?

Kujtimon kaj obstiniĝis tremvoĉe:

Sabafi, mi ne diris tion, mi nur diris...

povis finfine malbridi sian ĉasistan kapablon:

Kujtim povis nenion diveni

- Diru, vi ne estas malsaĝa...

- Eble, sed mi ne scias pri tio

La sekvan tagon dum la

La knabo ŝajnis tiel infaneca.

- Eniru, Gjini, eniru – Sabafi

Sabati (Sabafi) impresis, ke li

- Gjini, timu nenion, hodiaŭ

La vizaĝeto de Gjini esprimis

- Nu, diru al ni, kiu hejme

- Neniu, sinjoro. Mi ne diris

Ĉi-tage Sabafi estis pacienca.

- Gjini, vi ja vidas, ke ni

Gjini kapjesis.

- Kaj nenio okazos – daŭrigis

- Aĥ, ne, sinjoro, mi diris nur

- Ne estas necese, ke vi

Nenio povis devigi tiun

- Nu, bone, sed kial instruisto

Gjini rigardis timigite

- Ne, sinjoro instruisto

Li komencis cedi. Sabafi

- Nu, Gjini, mi vidas, ke vi jam kondutas tiel, kiel estas dece, Mi diras malkaŝe, mi havas nenion kontraŭ vi kaj via patro. Nur kontraŭ tiu, kiu instruis vian patron, ke Sovetunio estas lando socialisma, mi volis diri kapitalisma – perdiĝis Sabafi.

– interrompis afable: - Reviziisma, kamarado Sabafi.

- Jes, jes, reviziisma, estis la misdiro, dankon – respondis malmilde Sabafi, ne vidante, ke ĉio miksiĝis por la aliaj, kaj li daŭrigis: - Nu, Gjini, kiel vi pensas, kial Sovetunio estas reviziisma lando?

diris tion al mi – Gjini ploris.

nervojn, por ekkredi, ke la knabo diros, ke iu hejme instruis al li paroli: „Ĉinio estas reviziisma lando”

pro furiozo.

interflustri, sed neniu kuraĝis enstrudiĝi.

kamarado Sabafi. Vi vidas, ke li konfesis nenion kaj ni vane perdas tempon ĉi tie – diris fine la juna instruistino de angla lingvo.

Ĥiajn vortojn Sabafi. – Ni kapablas paroli ankaŭ en alia lingvo! Tiu kulaka bubaĉo jam ne mokos! – kaj furioza li atakis Gjinon (Gjinon)

Vi kaj via patro bonege scias, kiu estas Sabafi Keci kaj la Partio, kiuj eĉ el la faŭko de serpento kapablas elpreni (elpreni) la tutan veron. Aŭ vi tuj diros, kiu instruis al vi tiajn parolojn, aŭ mi turmentegos vin kaj vian familion tiel, ke ne eltenos vi, nek via patro, kiu per tiaj sloganoj venenas pensojn en via kapo. Tre bone vi scias, ke mi ne cedos. Kaj se vi ne scias, do mi scias, kiamaniere pereigi vin. Mi pensas, ke en la familio Tosku – mi volis diri (diri) : gento – estas bone konata la ĵipo de la sekurservo (sekurecservo) , kiu veturas al la vilaĝo? (.)

larmoplenaj, rigardis jen Sabafion, jen aliajn instruistojn.

finfine al Sabafi, ke en la mondo ne estas tia potenco, kiu devigus la knabon al la kulpokonfeso. Li flustris subnaze „Ankoraŭfoje ni pritraktos ĉi aferon...” kaj li turnis sin denove al Gjini:

demagogo, bonvolu konduki vian patron al la lernejo. Kaj nun jam malaperu! For de miaj okuloj! – kaj sen vorto de klarigo li eliris kiel la unua el la direktora ĉambro, kaj post li ĉiuj instruistoj.

Li iris preni sian sakon kun libroj.

klaskolego:

La direktoro – silenta ĝis nun

- Jes, jes, reviziisma, estis la

daŭrigis: - Nu, Gjini, kiel vi pensas, kial Sovetunio estas reviziisma lando?

- Ne, sinjoro instruisto, neniu

Estis necese havi ŝtalajn

nervojn, por ekkredi, ke la knabo diros, ke iu hejme instruis al li paroli: „Ĉinio estas

La manoj de Sabafi tremegis

La instruistoj komencis

- Ni jam lasu ĉi aferon,

Hola, fraŭlino – interrompis

- Gjini Tosku! Pripensu ĉion!

Gjini, kun la okuloj senĉese

La kampula instinkto diris

- Sed morgaŭ, ci reviziista

Gjini forlasis ĝin kiel la lasta.

Sur la ludejo proksimiĝis al li

- Nu, Gjini, kion ili volis?

- Aĥ, nenion gravan.

- Ĉu vere, do kial vi ploras?

- Aĥ, estas nenio, vere nenio
– kaj li foriris, plaŭdante flakojn per siaj piedoj, kun tola sako ĵetita sur la ŝultron.

Luljeta Lleshanaku **Poeziaĵoj**

Tradukis Tomasz Chmielik



Lundo en sep tagoj (E hëna në shtatë ditë)

Lundo estas kiel ŝuo el la malsama paro,
la alian mordas hundo kroĉita al ĉeno.
La sunolumo trudeme enpremiĝas tra la pordeto
kaj ŝutiĝas kiel grenŝeloj surteren.
Sur la ŝtona deklivo, la vojon nenien,
iras rektiĝintaj viroj
kun manoj surdorse,
kiel siluetoj en pafejo,
sufiĉas haltigi la spiron, por ke ili estu trafitaj.
Ilia salivo plu amaras de kafo,
sur la kolumetoj - barilo kun skvametoj de kapohaŭto
aŭ blanka flago de kapitulaco.
Dum semajnoj ne falis pluvguto. La unusola torento ŝvelas per ŝankroj.
Knabeto dekroĉiĝas de la patrino mano - li ne volas iri al la lernejo.
Naŭjara, per fingroj nigraj de verdaj juglandoj
li kalkulas, kiom da jaroj pasos, antaŭ ol li soldatservos.
Ĉe dek li perdiĝis.
Li desegnas en polvo grandan, malpuran cirkolon
kiel pecon da malsana haŭto,
el kiu oni devas eltranĉi tumoron.

II

Kiel salmoj pretaj al frajado
naĝas el maro en riveron,
same nuptogastoj retropaŝas en la historion,
kiam sekvatage ili revenas bedaŭrantaj
kaj kun mallevitaj okuloj petegas la mastrinon redoni iliajn haŭtojn:

„Mia estas neĝblanka, kun manikuro!”
„Mia estas delikata, kun marko bruligita sur la antaŭbrako per gladilo!”
„Mia odoras je salvio, neamelita kaj mankas substofoj!”
„Mia estas magia kaj reversebla!”
„Bonvolu doni ian ajn, tio ne havas signifon!”

Jen Mustafafo ebriulo...
kun la kapo iom klinika dekstren.
Lunda Sanktulo. Oni povas kuligi lin pri ĉio,
ĉar li ensorbos ĉiun sakron
kiel alkoholon tampono
antaŭ ol ĝi estos merita sur la vundon.

III

Antaŭ la dormo la mondo reperas sub la palpebroj
kiel militistoj sub la triumfarko sataj de la propra vanteco.
fine de la kolono - la predo –
ĉiunokta rito de kuniĝado,
disrompita muziko,
sufiĉanta por forgesi,
kial ni vekiĝis hodiaŭ matene,
kaj precipe kial ni devos ellitiĝi morgaŭ.

La lampo estingiĝas por la lasta fojo
kaj sango komencas sian malgrandan cirkuladon.

IV

La domo estis malplena, kiam mia avinjo venis kiel juna edzino.
Nenio krom pafiloj sur la muroj kaj bona nomo.
Ŝi devis apogi la kapon per la forto de siaj brakoj,
por konstrui urbon nur el tio.
En la komenco ŝi plantis unu abrikotarbon ĉe la domo,
kaj poste la alian. Ili estis kiel netrapesebla limo
aŭ manoj premitaj al la vizaĝo,
por varmigi ĝin per la rebatitaj spiroj.
Poste el ŝia korpo gutis infanoj
Kiel pluvo el la pajlotegmento.
Pri tiuj, kiuj falis sur la molan teron, oni forgesis.
Feliĉon havis tiuj sur la betono.
Ili postvivis.
Kaj eternigitaj sur la sepiokolora foto,
en striitaj jakoj kaj pomaditaj haroj kun disigo,
ili sentas sin fremde ĝis la nuna tago
kvazaŭ el la pruntita vivo

V

Mi havis difektitajn ludilojn:

ĉinan ĉareton de glaciaĵ-vendisto kaj mekanikan zebron –
la novjarajn donacojn de mia patro.
Kiel kremkukoj lekataj kaŝe en la kuirejo
ili havis nenian valoron,
ĝis mi difektis.
Tiam mi malfermis iliajn ventrojn,
Mi esploris radetojn kaj malgrandajn bateriojn,
ne sciante, ke mi faras la unuajn paŝojn sur la vojo
al la kompreno de libereco.

Kiam unuafoje mi ekvidis la veran bildon,
mi faris instinkte kelkajn paŝojn sur la piedfingroj malantaŭen,
por trovi ĉi tiun morto-punkton,
tra kiu mi povus enpenetri en la esencon de la aferoj.

Pri homoj okazis alie,
homojn mi mem konstruadis.
Konscie mi ne amis ilin ĝis la fino.
Neniu tuŝis per la kapo la bluan plafonon
kiel ne finkonstruita domo sub plasta tukego
antaŭ la sojlo de la pluva aŭtuno de mia kompreno.

VI

Jen la honestulo, senmakula,
kun la vizaĝo, de kiu oni forfrapis precize ĉiajn eretojn
kiel de piknika plejdo.
El tiuj, kiuj akceptas ĉiun laboron:
„Ĉu iu havas najlon por enbati ĝin
en mian bruston?”

Samaj estis mia prapraavo
Kaj la avo, kaj la patro...
Eble la samajn okupojn elektos ankaŭ lia filo,
kiu ĝuste enbatas rigardon en la malestimatan patron.
(„Pli bonas fali subteren!”
- ĝemas la patro) .

„Ĝis kio mi venos?” – demandis la filo iun tagon.
„Ĝis tio, ke vi ne perdiĝu!”
Povis esti sonĝo, ĉar lia genealogia arbo
forbrulis per fulmo,
antaŭ ol la karmelaodoro de *katsuro* penetris tra la vilaĝo.

VII

Laodoro de radikoj. Pluvoj revenas
Samtempe kiel abeloj al la ujo.
En nia familio oni distingas pluvon feliĉan
de tiu melankolia, kiu somere ruliĝas super la montetoj. Jen la tradicio.

Mi aŭskultas per unu orelo por aŭdi min pli bone.

La oĉjo petas min pri *fazzoletto*, li volas trafroti siajn okulvitrojn.
Li uzadas ĉi vorton, de kiam li revenis el Florenco,
Kiel oni kuracis lin el pulmito –
tiun tempon li rememoras
kiel mielmonaton.
Nun li tenas mian ateston,
sango pulsas en liaj tempioj - estas la afero de la vivo aŭ morto.
De ĝi dependas,
ĉu li rekonos min
kiel brikon por muro
aŭ kiel ŝtonon por garbejo.
Lia mano batpreta
estas instrukcio pri uzado, kiun oni legas nur unufoje.
Kvankam sulkoj sur lia polmo – linioj de lia sorto –
Kiel unusolaj ne postlasos sur mi spurojn.

Diablo ĉi tion prenu! Alportu *fazzoletton* por mi!

VIII

Se vi havas nigran haŭton,
via rideto estas neĝblanka.
Oni ne povas rideti duonbuŝe, nek dentobreĉe.
F. scias tion. Ŝi funebras pri la filo.
Frumatene ŝi malfermas la fenestron, bruligas oleoforneton
kaj per la peco de la ĉifita telegramo,
kiun ŝi tenas senĉese,
ŝi balaas la korton, nutras kokinojn, kuiras manĝaĵon kvazaŭ por dek viroj,
poste ŝi starigas la seĝon kaj kiel sfinkso rigidiĝas kontraŭ la pordo.
Tagon post tago, kiel akcipitro ŝi kroĉiĝas al la ordo kaj formo
kaj kiel sekretaj cirkloj en la tritiko-kampoj
tentas ĉi tiun, kiu ŝvebas en la aero senkompatate,
ne tuŝante la teron.

Ŝi reciprokas salutvortojn rigarde.
La vojo malfermiĝas antaŭ ŝi
kiel dimanĉo en la procesio de la tagoj
oferata al la preĝo kaj melankolio.

IX

Meze de la aferoj vi estos plej Sekula – diradis romanoj.
Brodita tuko meze de la tablo.
La tablo meze de la tapiŝo.
La tapiŝo meze de la ĉambro.
La ĉambro meze de la loĝejo.
La loĝejo meze de la domo.
La domo meze de la urbo.

La urbo meze de la mapo.
La mapo meze de la tabulo.
La tabulo meze de nenio.

Lola estas anĝelete. De kiam ŝi finis ok jarojn, ŝia frunto ne kreskas,
plu havas la saman gravito-mezon. Ŝi ŝatas angulojn, randojn,
kvankam ĉiam ŝi staras meze de la buso,
kiam homoj interpretiĝas antaŭ la pordo.

Miaj najbaroj neniam vizitadis lernejon,
aŭdis nenion pri estetiko
kaj mi dubas, ĉu ili legis pri la tero-akso, simetrio kaj absoluta vero.
Sed instinkte ili turnas sin al la mezo
kiel la kapo de Ŝimŝon al la sino de Dalila,
kiu ruze senigos lin je la forto,
antaŭ ol tagiĝos.

X

Preparoj al vintro ne estas kutimo,
sed instinkto. Ni liberiĝas de superflujaj timoj
kiel grundinta ŝipo de balasto.

Taedium vitae estas loka eco, tio ne koncernas nin,
post kiam nur la odoro de kuirataj fazeoloj apartigas nin de la najbaroj,
kaj de la prauloj nia sonĝo super la forno.

Inter mi kaj miaj kapabloj estas neniuj perilo,
al ĉio kaj ĉiuj la vento aŭguras nazovoĉe falsan profeton.

Jaroj transkapiĝas sur la glacikovrita deklivo,
instinkte kaŝante la kapon inter la genuoj.

La limoj velkas. Mia korpo pli kaj pli abstrakta ol iam ajn
estas patrolando sen himno,
mi tuŝas ĝin en la antaŭmorta deliro
kiel patrina buŝo la varmegan frunton de infano...

Gravas nur
postvivi.

Eqrem Basha¹³²

La domo perdita en nebulo

¹³² Eminentata verkisto el Kosovo

aŭ herbo kuracanta la okulojn trafitajn per fulmo



I

mi trapasas la sojlon kaj diras al mi
ho kiel longa vojo ĝis la lasta pordego
de tiu domo perdita en nebulo
sursojle homo en nigra vesto
klinas la kapon kaj parolas mia sinjoro ne vivas
la sinjoro ne vivas mi ripetas flustre
lia sinjoro mia sinjoro ne vivas
kaj la vojo tiom longa
ĝis la lasta pordego de tiu domo
perdita en nebulo

tiaj migrantoj kiel mi senĉese venadas
haltas por vidi la malnovan internon
la konstruaĵon de la prauloj de tiu sinjoro
mi stariĝas antaŭ homoj vestitaj nigre
kaj per la tremanta buŝo mi parolas malhaste
nia sinjoro ne vivas
ne vivas la sinjoro via sinjoro
mia sinjoro ne vivas delonge
sed ĝis la vojo kondukos al la lasta ido
de la sinjoro de tiu domo perdita en nebulo
ĝi ne havos la finon

II

en la ĝardeno iam plena de floroj
mi rigardas argilan vazon
kreskis tie mirinda herbo
oni diras ke homoj el tiu malnova domo

perdita en nebulo
kuracadis per ĝi siajn okulojn
sed de kiam trafis ilin fulmo
de kiam ĝian sukon
fortrinkis la sekega tero
la blindaj sinjoroj
ne sciis kio estas lumo

de buŝo al buŝo de gento al gento
estas transdonata legendo
pri homo kun bastono serĉanta iun
migranta tra la malplenaj kampoj de Torviolli*
oni diras ke li iradis tage kaj nokte
senĉese vokis iun per nomo
sed respondis neniu
de kiam li malaperis
dronis en nebulo super la kampoj
la homoj el la granda domo
ŝlisis la pordojn de siaj ĉambroj
kaj ne sciis kio estas lumo

III

piede de Korab* malplena domo
kaŝas propran funebbron en muĝo de Radika**
proksime al la domo ĉirkaŭvolvita per nebulo
proksime al la pordego
kie homoj nigre vestitaj nutras sin per espero
iun fojon
kun manoj sur la kapo
fuĝis la sinjoro de ĉi tiu domo
li tenis sian fezon
kontraŭ forta vento blovanta tien

same centoj da aliaj domoj
kaŝis propran funebbron en muĝo de Radika
en ĝiaj malkvietaj ondoj
kuniĝante kun aliaj funebroj

* La kampoj de Torviolli - loko de la venka batalo de Skanderberg, kreinto de la albana ŝtato en la 15a jarcento, kontraŭ turkaj trupoj.

* Korab - monto en **Albanio**, proksime al la urbo Dibër.

** Radika - makedona rivero.

ili hastis laŭ fluo kaj falis kun akvo
de tiam - oni diras -
multaj torentoj kaj la rivero
grimpis supren
ĝis ili sekiĝis iun tagon
- baldaŭ la sinjoroj de la domoj
forlasis ŝafaron

IV

nun mi vagas tra la porda labirinto
de tiu domo kovrita per skvamoj
antaŭ ĉiu pordo
homo en nigra vesto
mi haltas por saluti lin
sed mi tremas kvazaŭ febre
mi diras la sinjoro ne vivas
kaj la domo staras forlasita
- vi ne estas solaj
ni estas kun vi

poste mi trapasas ankoraŭ unu sojlon kaj vidas
ie proksime troviĝas la lasta pordego
iam mi alvenos tien estos multe da homoj
el tiu domo funebranta
kaj enfermita en la soleco de nebulo
mi klinos la kapon antaŭ ili
ili diras ke kiam malfermiĝos la pordego
ni vidos vastan ĝardenon
kaj mirindan herbon
trafitan per fulmo en la malgaja tempo

tie la sinjoroj de ĉiuj domoj
kuracos siajn okulojn

Esperantistoj sen limoj

Sukcesa prelego de Tatjana Loskutova

Mi ne konis ŝin antaŭ kelkaj monatoj. Prof. Renato Corsetti, la prizorganto de ĉiuj esperantistoj en la landoj relative malevoluintaj kaj marĝenizitaj, kie ankaŭ la e-movado estas malforta, proponis nin la starigon de e-lernokurso. La instruisto estus

Tatjana Loskutova, altlerneja profesorino el Ivanovo, Rusio. Tatjana delonge gvidis lernokursojn kaj prelegis en la landoj foraj kaj iel forgesitaj, de Eŭropo ĝis Azio.



La rendevuo Tatjana prelegas La aŭditorio

Ni ne pretis por tiu propono, ĉar temis pri la somera sezono, nome aŭgusto, kiam la homoj kaj lernejoj feridadas. Tamen ni pripensis la aferon alimaniere. Per letero, ni sugestis al la direktoro de la Nacia Biblioteko en Tirana, s-ro Aurel Plasari, aranĝi prelegesion gvidata de Tajana por la kunlaborantoj kaj legantoj de tiu biblioteko. La respondo, bonŝance, estis rapida kaj pozitiva. La direktoro komisiis sian subulon por pretigi la kunvenejon kaj la necesajn ekipaĵojn.



Tatjana fotiĝas kun kelkaj junaj partoprenantoj

Tiel, la 2-an de aŭgusto, tagon post la alveno de Tatjana en la albana ĉefurbo tra longa vojo: Ivanovo-Moskvo-Istanbulo-Skopje- Tirana, la tuto estis preta. Antaŭ la prelego, ŝi havis interesan rendevuon kun la s-ro Ylljet Aliĉka, konsilisto pri la eksteraj aferoj ĉe la Ministrejo de Kulturo. Interalie oni diskutis pri la eblecoj de la eldonoj en Rusio de la albanaj verkistoj.



Tatjana intervjuiĝas de novaĵ TV-stacio ABC news

Poste estis akcepto ĉe la oficejo de la direktorejo, fare de la vicdirektorino. Je la 11-a horo, ni eniris en la salonon plenplenan kaj Tatjana tuj komencis, stare, sian prelegon, preparitan zorgeme. Dum ĉirkaŭ 80 minutoj ŝi prezentis panoramon pri e-lingvo, ĝia naskiĝo, ĝia movado enmondo kaj en Albanio, ĝia kulturo (libroj, revuoj, muziko, filmoj) .

La sesion filmis ankaŭ la privata novaĵ-TV-stacio ABC News, kiu fine intervjuis s-inon Tatjana.

Raportas: Engjell Gusho

TV ABC NEWS komentas

Aktualaĵoj

Albanio membriĝas en la Monda Organizaĵo de Esperanto

Pliiĝas la pretendoj ke la lingvo instruiĝu en la lernejoj

02 aŭgusto 2013 19:13

Rigardu videofilmon pri tio:

http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=8NsfxU6F1dY#at=11

La teksto en la albana sekvas kiel sube:



Al nederlanda bebo oni instruas Esperanton, la plej facilan lingvon en la mondo kiu ne apartenas al iu popolo. Ekzemplo, kiun la profesorino Tatjana Loskutova elmontras ankaŭ por rilaksigi la spektantojn, post la prelego sia en la Nacia Biblioteko.

Kiel reprezentantino de la Monda Organizaĵo de Esperanto, troviĝanta en Tirana, ŝi salutas la membriĝon de la albanaj esperantistoj. Ekde la 26-a de julio Albanio estas la 71-a membro ĝia.

“Tio estas la unua paŝo grava de la albanaj esperantistoj. Mi gratulas ilin por tio kaj esperas ke ili faros aliajn paŝojn antaŭen. Kiel membro, ili profitas de la helpo far la Monda Organizaĵo kiu kreas eblecojn por venigi ĉi tien instruistojn de Esperanto. Krome la membreco alportas ankaŭ la simpliĝon de la kontaktoj de la albanaj esperantistoj kun tiuj de la ceteraj landoj de la mondo”

La albana tradicio de esperanto apartenas ĉefe al la kultura cirklo kaj klerikuloj de Shkoder. Personeco kiel Dom Lazer Shantoja estis membro de la mondaj esperantistaj organizaĵoj ekde la jaro 1905. Mark Kakarriqi kaj Mikel Koliqi estis en tiu vico. Cuk Simoni estas verkinta en esperanto historion de Skanderbeg.

La aktualaj pretendoj estas ke esperanto eniĝu en la edukaj programoj. Tatjana Loskutova venas el Ivanovo de Rusio. Ĝuste la Carista Rusio estis la naskiĝlando de esperanto, kie, en la jaro 1887 Ludwig Zamenhov, hebrea okulisto el Bjalistoko, publikigis sian projekton pri la universala lingvo. Hodiaŭ, preskaŭ 3 milionoj esperantistoj parolas tiun lingvon en la mondo.

“Esperanton mi eklernis antaŭ ol eniri universitaton kaj tio malfermis la vojon per lerni la francan kaj la germanan, ĉar ĝi estas baza lingvo, simpla kaj flua, helpanta por lerni aliajn lingvojn fremdajn. Esperanto estas la mia lingvo de la pasio ankaŭ ĉar ĝi estas parto de la tradicio nia familia. Ni estas tri generacioj esperantistaj: mia patro, mi, kaj la edzo kaj mia filino.”

Esperanto estas unu el 100 lingvoj plej uzataj enmonde, el 6800 entute parolataj lingvoj. Ĝi uzatas kiel elektita lingvo en la sociaj retoj Google, Skype, Facebook. Ankaŭ la porteblaj telefonoj hodiaŭaj kun la tuŝebla ekrano, kapablas utiligi esperanton. Ĝi instruatas oficiale en la lernejoj kaj universitatoj en 28 landoj. Loskutova donacis al la Nacia Biblioteko kelkaj librotitolojn en la lingvo esperanto kiel “Elektitaj Lirikoĵoj” de Puŝkin, pliriĉigante iel la kolekcion kun malmultaj titoloj didaktikaj kaj beletraĵaj verkoj kiel la romano “Hunda Haŭto” de Fatos Kongoli.

Beletraĵoj



Bedri Alimehmeti¹³³

Por “Kaza Rikordi”¹³⁴

¹³³ Mia samgimnaziano dum la jaroj 1961-1963

¹³⁴ Casa Ricordi, itala muzikfilmo

Nenian koleron ni havis al la angla,
 Des pli al la instruistino Afërdita,
 Anĝelulino je la hararkrono kiel Dajti¹³⁵ neĝo,
 Kiu pli blankan ol ĝi havis sian spiriton.
 Sed, la lecionhoron de la angla
 Por “Kaza Rikordi” ni forlasis.
 Kaprico de la aĝo.
 Nenion pli.

La tuta lernejo skuiĝis.
 Kvazaŭ tertremo estis fundamente ĝin svinginta.
 Urĝa kunveno.
 La Pedagogia Konsilio longe disputas.
 “Fremda aperaĵo!
 La geknaboj de la tria klaso
 Forlasas la lecionon pro filmo!”

Oni nomas ĝin striko! Oh, kia frenezaĵo!
 En mia kapo bolas la ĥoraĵo “Va pensiero!”
 El la “Nabuko” de Verdi.
 Pri kia striko temas!?
 Kiel la ondegoj de monta vento
 La furoro de la kritikoj alvenas en nia klaso.
 Severa la “batalo” kun la magiaj sonoj
 De la uverturo de “Norma” de Belini,
 Okupinta niajn animojn.

Pardonu instruistino!
 Estis tio nur adoleskanta kaprico.
 La kompartia sekretario ululas:
 “Vidu vidu, eĉ albane vi tion ne nomas “La Domo
 Rikordi”,
 Sed itale “Kaza Rikordi”!
 Tio estas la kulmino!”
 Kulminas ja kaj haŭttremas.
 La ario de Kavarados el “Toska” de Puĉini.

“La angla estas la plej disvastigita lingvo enmonde”.
 La dolĉeco de la voĉo de instruistino Afërdita,
 Mildigus ĉiujn tigrojn de la afrika ĝangalo.
 “En la angla verkis Ŝekspiro, Dikens, Bajrono...”
 Leĝera zefiro, dolĉe la klasspacon regas.
 La ario de “Luĉia di Lamermur”.
 Dankon majstro Doniceti.

Instruistino, ni ege amas vin.
 Ne havis aferon kun vi.
 Ne kun vi, nek kun la angla.
 Eĉ tute vi ne pripensu tio.
 Kial ni ne amu la lingvon de Presli,
 Sinantra, Ĉiker, Braun, Gejner, Odis Red..¹³⁶
 Kies kanzonojn ni kantas ĉiutage.

Kaprico de la aĝo tio estis.
 Nur tiome.
 Nothing.¹³⁷
 Nenion pli.
 Por ni vi estis kaj estas.
 Ni kredas ke vi scias.
 La plej bona instruistino.
 We love you and you love us”¹³⁸

¹³⁵ Monto apud Tirana

¹³⁶ Elstaraj usonaj kantistoj el la jaroj 60

¹³⁷ Angle “nenio”

¹³⁸ Angle: ni amas vin kaj vi amas nin

Renkontiĝo post 50 jaroj



En la foto mi, Bardhyl, dekstre en la dua vico, dum meze kun griziĝintaj haroj, Bedri

Bedri Alimehmeti Djevuŝka Simonova

Dum la sabataj posttagmezoj,
devege,
ni ne havas alian alternativon,
krom esti en la lernejo.
Birdoj, enfermitaj en la kaĝo.
Atendas nin la Karabino.
Kia rendevuo!

Rusa “djevuŝka”¹³⁹,
Karabino Simonova en niaj manoj.
Kia malvarma!
Siberia malvarmo.
Haŭtremigas.

Kalibro 7. 62 mm.
Minaca. Mortiga.
Tia estas la karabino,
“belulino” je naskiĝdato 1943,
Deknaŭjara,
Kreitaĵo de la inĝeniero Sergej Simonov¹⁴⁰.

Nenion komunan
Al la dolĉa Elena Bistrickaja¹⁴¹,
Des malpli al la aparta Izolta Izvickaja¹⁴²,
Kaj neniel al la stelaro
De la neatingebla Tatjana Samojlova¹⁴³,

Eh! La steloj de la rusa kinejo
Por ni jam
Estingitaj kaj degelitaj
kvazaŭ la nebulo en la stepaj profundecoj,
Kune kun la amikeco al la sovetilando...

Nun ni rusojn ne amas,
Sed, je sorta ironio,
Iliajn armilojn ankoraŭ forte premas.

“La Karabino Simonova, sekura armilo
En la manoj de la soldato de la popola armeo”.
Ripetas je kelkan fojon
Per raŭka voĉo
La oficiro-instrukciisto
de nia sabata antaŭmilitista posttagmezo.

“Ĝi estas destinita
Por pereigi la vivajn fortojn de la malamiko...”
Absoluta silento.

“Per fajro, per kolbo kaj bajoneto”,
Eĥas potence kaj samtempe nia voĉo.

Tiel, bravu ĉapajevoj!¹⁴⁴
Teda laŭdo.
Nerva agaco.

Kiam finos
Tiu antaŭmilitista posttagmezo
Kaj ĉi tiu absurda rendevuo
Kun la makabra “djevuŝka”, karabino Simonova?

Post duonhoru,
Sub la sonoj de la kanzonoj de Ĉelentano,
Modunjo, Mina, Pavone, Milva, Morandi..¹⁴⁵
En la brakoj de unu la alia
Dancante,
Sub niajn piedoj, ni havas.
Senĉese piedpremas, piedpremas ilin...

1962

¹³⁹ Ruse- knabino

¹⁴⁰ Rusa inĝeniero, la inventinto de la karabino Simonova

¹⁴¹ Rusa aktorino, ludas la rolon de Akcinja en la filmo “La Kvieta Dono”

¹⁴² Rusa aktorino ludanta Natalian en la filmo “La Kvieta Dono”

¹⁴³ Rusa aktorino famiĝinta pro la filmo “Migras la mevoj”

¹⁴⁴ Ĉapajev- neklera komandanto rusa dum la Civila Milito. “Ĉapajev” uzatis kutime kiel esprimo de la militistoj de tiu tempo.

¹⁴⁵ Elstaraj kantistoj italaj el la jaroj 60

Bedri Alimehmeti “Vidaĵo el la Ponto” en Tirana

Kiom longaj ĉi tiuj lecionhoroj!
Senfina ĉi tiu antaŭtagmezo
Kiel ĉi tiu pluvofalo,
Kiu ankoraŭ pliigas la grizecon de Tirana.
Ni tute ne komfortas sur niaj benkoj.
La okuloj algapas
Trans la malsekiĝintaj tegmentaj kulmoj.
En la kinejo “!7 novembro”
Raf Valone ludas Edi Karbone-n.
“Vidaĵo el la Ponto” de Artur Miler
Estas trovinta la mian urbon.

Haŭtremiga historio,
Okazanta sub la ombro de la giganta “Bruklin”,
Kaj la brilo de la lumoj de “Broduejo”.
Historio de elmigrintoj,
Sparkigata
De la ama trembrilo
Inter Katerina kaj Rudolfo,
Kiu vagadas ravitaj
Tra la trotuaroj de Broduejo.
Ridetas kaj interkisiĝas
Ĉe la aŭtomataj maŝinoj,
Kie post ĉiu monero ĵetita
Ili prenas enmane la dezirataĵon.
Tio igas nin streĉiĝi
Sur la veluraj sidlokoj de la loĝio,
dum aperas en nia menso;
la “dentoradoj”, “nigrakapuloj”, “kvarlekaj halvaĵoj”¹⁴⁶
Strudeloj¹⁴⁷, luksaĵo ja por ni.
Eh, niaj regaloj en la dolĉaĵejo “Peza”,
Per akumulita mono
Traserĉinte longe en la niaj poŝoj!

Entuziasmaj por tiu peco da Usono,
Por tiu peco da “Broduejo”,
Kiun hieraŭan vesperon en la sonĝo
Ŝajnis ke mi promenadis larĝlonge.
Por Raf Valone,
Simone Sinjorino, Ĵan Sorelo...
Ni hastis travivi denove
La njujorkan mondon.
Sed, la morgaŭon, en la filma celuloideo.
Bruklino ne plu ombris (!) .
Ĉe Broduejo la lumoj estis malŝaltitaj (!) .
La aŭtomatoj malaperintaj.
Mutiliĝo!

En la kotaĵo de la strateto kie ni alpaŝas,
Senfinaj spuroj.
Ĉefronte, en la riparejo
La lumo de iu sparkilo ĉiujn nin bluigas.
Kelkiu alvokas: “Ĉu kelkiu havas bileton?”
Mi emas ululi:
“This is not “A View from the Bridge”¹⁴⁸
Sed “A View from my city”.¹⁴⁹

¹⁴⁶ Malkaraj dolĉaĵoj

¹⁴⁷ Relative kara dolĉaĵo

¹⁴⁸ Tio ne estas Vidaĵo el la Ponto

¹⁴⁹ Vidaĵo el mia urbo



1963

Dritëro Agolli¹⁵⁰

Titolo en originalo: “Lypësi i kohës”

¹⁵⁰ Eksa prezidanto de la Ligo de Artistoj kaj verkistoj de Albanio

La tempoalmozulo

Tirana 1995

La eldonejo enciklopedia

La ĉevalino

La ĉevalino demandas ĉevalidon
Kaj alian virĉevalon ne havas
Graveda ĝi ne povas estiĝi
La poplon mordas per siaj dentoj.

La ĉevalino demandas ĉevalidon, sed la virĉevalo estas
kastrita

Ĝi nur ties koksojn malsekigas per flusalivoj
La ĉevalino sian voston alten levas
Kiel fontanon.

La tempoalmozulo

De li foriris ĉio: tagoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj.
Foriris tiel senkomprenite, kiel li preskaŭ ne sukcesis vidi
Estis siaj jaroj, kiam la homo ordonas, rondiriĝas kaj
kreskiĝas
Sed ili foriris kaj li restis sen tempo kaj diras “jam estis
tempo”!

Homo sen tempo, malplenigite de tempo havinte!
Esti sen tempo, pli povra ol la povuloj!
Neniu demandas vin kie iris, kie alvenis
Tiam vi fariĝas tempoalmozulo de la aliaj.

Mi nutriĝas kaj vivas, sed vivas kiel kadavron,
Dormas kaj vekigigas laŭ la instinkto kaj normo.
Tamen restis sen tempo, restis senforma estaĵo,
Se ni konsiderus la tempon formodimensian.

Ekiro kaj reveno

Kiam mi ekiras vojon
Tuto brilas kaj esperas
Reveninte mi dormon sentas
Io en mia sino ekmortas.

La amopersekvito

Mi estas via prizonulo.
Mi vivas kun la katenoj kiun vi surmetis.
Sed strange, ne la kamero sufokigas min
Nek sufokigas min ankaŭ la ŝtopita fenestro.

Kiam vi la katenojn surĵetis en mian karnon.
Mi kisis viajn manojn.
Estas senprecedenta kazo, vi sciu
Ke la ekzekutiston mi kisas kaj amas!

Via erotika persekvito,
Porĉiame mi restu via persekvito!
Erotika bona aŭ malbona,
Ĵetu viajn manojn en mian gorĝon, turmentu min!

Ĉi tiu enprizoniĝo mi ne scias kiom longos.
Sed mi ege dezirus ke ĝi estu poreterna.
Tamen vi venu kiom ofte en la kamero.
Ĉar tio ja plaĉas al via persekvito..

Mi freneziĝis, katenigu min

Mi freneziĝis, katenigu min.

Ĉe la amikino venigu min.
Ŝi ja scias kaj sorĉas.
Per la pomoj en si.

Malligu min ĉe du pomoj.
Sur la amikino kuŝigu min.
Por ke ŝi turnu min sorĉe.
El frenezulo al homo.

Kun pastro en la taverno

En iu taverno tie en Romo,
La vento forĵetis min iufoje.
Amis la pastro Cicero-n.
Drinkis li la vinon latinece.

Kaj manĝante kaj drinkante,
Petis min ĉu mi estis katolikulo.
Sed trafis min patro vere bona.
Tial mi ne volis mi montriĝi maliculo.

Turnis mi al li milde kaj trankvile-trankvile
“Ĉi tiu vino estas kiel balsamo,
Tion deziras ĉiuj religioj.
Volas ankaŭ iu muslimo.

Miaj antaŭuloj estis katolikuloj,
La pli postaj estis bektaŝioj,
Kaj mi la lasta nenireligiulo.
Mi ne kredas je spiritoj kaj kandeloj.

Ĉar enuiĝis miaj avoj multe.
Ke oni ŝanĝis la religiecojn ĉiun jaron,
Tial mi povrulo rezignis je,
Ĉiu kredo kaj ĉiu dio...

Sed la pastro parolis tre malfrue,
Kaj eble tre hazarde,
Post kiam recitis Cicero-n
Post kiam murmuris latinece.

Sur la ties okuloj ekbrilis fajrero,
Tremetis kaj ĝisfine estingiĝis,
Kaj ridis libere kiel infanon,
“Pekaĵo ke vi ne estas katolikulo!”

Momente li forĝesis pri Cicero,
Forĝesis la aliajn, certe..
La granda pastro kun Dritero.
Drinkis la vinon latinece...

Poeto kaj animoj

Poeto vekas la dormemajn animojn,
Kaj la animoj ekstariĝas surpiede.
Poste turbulite kaj varmigite.
Poeton ili disŝiras per dentoj...

La sekretoj

Mi diros ĉion kion ne diris ĝustatempe,
Kiun ne volis diri, ne eblis, nek povis,
La ŝiritan bruston surtavoligas sur la antikva tablo,
Kaj vi rigardos kion entenis li en si.
Kiel sur la antaŭmanĝa telerego por vino aŭ brando.

Nepre la okulojn vi malfermos kiel bubalojn,
Kio estas ĉi homa brusto kiel la brusto de la granda anaso
en bankedo?
Kaj mi diros ke ne eltenu kaj ne suferu plu.
“Rigardu kion mi tenis kaŝe tiom da jaroj,
Enigu la forkojn kaj frandu se vi vere amas min!”

La deziro de vulpo

Iu vulpo volis turniĝi al homo,
Por mirigi la homojn per sia ruzeco,
Tial ĝi petis opinion ĉe la vulpoj,
Tiun pli maljunan enuigis la nigra novaĵo,
Kaj la animo ne povus elteni la ĉagrenon.

-Tuj oni malakceptu ties intencon,
Ĉar la vulpo, se en homon turniĝas, ni malaperos,
Ĝi konas niajn kutimojn de ekstremo al ekstremo,
Spionas nin kien iras kaj eniras,
Kaj la homoj kaptas nin unu post la alia.

Sed al la vulpo intencanta en homon turniĝu
Ŝajnis bagatelaĵoj la paroloj de maljunulino.
Kaj diris tute malŝate kaj ironie:
- Ehuuu, kiom da vulpoj estas en la sino de
homoj, miaj fratinoj!..

Hiperbolo

Ah kiaj katoj estas en mia urbo,
Katoj pli belaj ol la virinoj!
Kiel pompaj sinjorinoj dormas tagiĝe
Lacigitaj pro la kvereloj ĉiunokte.

Kun Sankta Petro

En la pordo de la paradizo enue
Kun la bastono Sankta Petro atendos min.
- Kion vi volas ĉi tie kaj kiu vi estas.

Kun tia kuraĝo, tia fiereco kaj espero?

Kaj mi aldiros: - En la prozo kaj poezio,
Mi estas reviviginta animojn, sed ankaŭ estas infektinta
Apostolo Petro, ĝenerale
Mia pekaĵo estas tre komplika!

Sed mi estas poeto, estas alveninta al ĉi tiu sojlo,
Kun mi portas la pekojn en la tornistro,
Eklarmiĝos iome Sankta Petro maljuna
Kaj mi eniros pardonita en la Paradizon..

Nenio estas ripetebla

Nenio estas ripetebla same en la mondo.
La lastjara vintro deŝirita kun la dormema frunto,
Poluita pinĉita muŝo sur la fingropinto,
La ŝirita ŝuo dum ĝi ligitis apogate sur ŝtono,
Lacigita fabelo de la avo kaj la trenata psalmo de la pastro.

Nenio estas ripetebla same en la mondo,
La ŝvelita kverelo kun la malsana edzino en ĉambro kaj
en la lito.

La nigra invado de la malpuraj blatoj en la banejo kaj
kuirejo,
Raŭka kanzono de la virkoko sur la putrigita sterko en la
vilaĝo.
La bleko de la skabieca azeno en la korto kaj paŝtejo.

Nenio estas ripetebla same en la mondo,
La ebriiĝo dum la idiota vespero senforma, pluva kaj
venta,
Kaj la ĉielo plena je hieroglifoj sur la pratempa tero,
Nur unu kozo ripeteblas en la mondo de la grizaj zorgoj,
La morto dormanta sub vatkovrilo kune kun la homoj.

Post la ribeloj

Tiuj tondrantaj en la placoj,
Ne vesperiĝis herooj eĉ en la listoj
Tiuj subaŭskultantaj en la placoj
Tagiĝis ministroj..

Tio ja ne estas eĉ la unua miraklo,
Ne estos ĝi nek la deka miraklo,
Kion oni faru kun la povra historio.
Dancas kiel ĝi mem scias!

La lepora ponto

Leporo estis pasanta sur tabulo
Liginta bordojn sur sovaĝa torento
Dum ĝi iris komenci iom post iom alparoli
Al la restinta azeno sur la alia bordo.

- Kial ci lippendigos, frenezulo,

Mi starigis la ponton, kial ci ne pasas sur ĝi?
La azeno orependigos plorante
- Vi sinjoro leporo, estas pli azeneca ol mi!

Lepora ponto apenaŭ validas ankaŭ por la leporoj.

La espero de la poetoj

Mortos ĉiuj sanktuloj
Digelos ĉiuj profetoj
Perdiĝos ĉiuj oratoroj
Plurestos nur la poetoj
Tiel esperas la povruloj.

Mi estas koninta

Mi estas koninta centojn da mortintoj kaj milojn da
vivuloj,
Centojn da mortintoj kun libroj kaj milojn da vivuloj kun
paroloj

Centojn ku tomboj kaj ĉerkoj kaj milojn kun kavernaĉoj
kaj ĉambroj
Barbuloj kun malpuraj haroj kaj knaboj kun freŝaj vangoj

Blinduloj kun okuloj plene de verukoj, idoloj kun lipoj
plene de flusalivoj
Grasuloj kun pezaj manĝotabloj, mizeruloj dormintaj sen
vespermanĝo

Mi estas koninta ŝtoncizistojn kaj poluantojn de la vorto
Mi estas vidinta kolumbidojn kaj anseridojn

Ĉiuj estas lasintaj ion ĉe mi, maliculoj kaj bonuloj

Tial la paradiza pordo estas por mi multe malfacila.



Luljeta Lleshanaku

Maniero por alproksimiĝi

(Mēnyrē pēr t' u afruar)

Mi serĉas manieron por alproksimiĝi,
Ion, kion neniam antaŭe mi provis
Sen derompi almenaŭ spliteton de la sala skulptaĵo
Kun la vizaĝo turnita al mi.

Do, mi jam promesas nenion
Kaj ĉesis kredi
Je bela domo kun idilia nubo surkape.

Mi elektos la saman vojon, kiun mi forlasis iam,
Sekvante la spurojn de la ungegoj de urso
Sur la arbotrunkoj, kiujn ĝi ne povis grimpi.

Mi revenos, por daŭrigi la historion disrompitan
Kiel fulmo
Super la plugita tero.

Mi revenos tiel ordinare, ne donante al mi la tempon je
sana prudento,
Kiel masko senfende algluita al vizaĝo
Aŭ vintro al la tero, sufokante timon per la ventro.



La Sloganoj el Ŝtono¹⁵¹

(Parullat me gurë)

Tuj post la studoj Andreo – kiel instruisto – ricevis la ordonon de laboro en forgesita montara vilaĝo en la nordo.

La patro silente akompanis lin ĝis la fervoja stacio. En la momento de adiaŭo, bridante kun peno sian kortuŝon, li admonis la filon: „Laboru bone, zorgu vi pri kaj atentu, ĉar la vivo estas malfacila”

Andreo venis al la loko vespere. La lernejo estis malgranda. Laboris tie dek instruistoj, ses el la najbara urbo, kaj unu instruistino el Tirana.

La sekvan tagon la plej aĝa instruisto, Paŝku, decidis tuj klarigi al Andreo, „kiel labori kaj vivi, ke vi estu rigardata favore”. Li komencis per la vilaĝa hierarkio: „- Plej grava estas la partia sekretario, instruisto Sabafi, post li la estro de la kooperativo. ” Kiam li parolis pri la lernejestro, li prezentis tiun jene: „Honestulo. Lernantojn li batas tiel malofte, ke ili ne memoras pri tio. Sed kiam li batas, do ĝis sveno. Pli bone ne kontraŭstaru al li, ĉar de li dependas ĉio: la okuparo, via slogano...”

- Kiu slogano? – demandis Andreo.

- Nu, vi ne scias? – ekmiris Paŝku. – Ĉiu instruisto kun sia klaso aranĝas sloganon el ŝtonoj. Li respondecas pri ĝi dum la tuta tempo.

- Aha – murmuris Andrea.

- Ĉu vi pensas, ke estas tiel simple? – koleretis Paŝku.

- Ne, tute ne – mordetis sian langon Andrea. Laŭ liaj mirigitaj okuloj Paŝku vidis, ke li devos rakonti al li pri io, kio estas ja evidenta al ĉiu, kiel li pensis – li ne imagis, ke iu povas ne koni tion.

- Vi estas komencanto, vi staras antaŭ la kariero, do eksci: se vi volas esti bone vidata de la Partio kaj Aŭtoritatoj – suprenlevu la manikojn kaj kummetu bele vian sloganon. Por ke la slogano estu bela – daŭrigis Paŝku – vi devas esti diligenta. La sloganon ne malzorgu, almenaŭ unufoje en semajno vi devas rigardi ĝin, ĉar sufiĉas pluveto, ke perdiĝu la tuta efekto. Ŝtonoj estas traŝovataj, literojn kovras argilo kaj koto, kalkon forlavas akvo kaj aperas makuloj. Ĉu vi scias, kio okazis lastatempe?

- Ne – respondis Andrea.

- Ĉar de kie vi povus scii – diris Paŝku kaj li komencis rakonti pri la detruo de la slogano de instruisto Bafti. Jen kio okazis, laŭ Paŝku:

Bafti ĉiam estis laŭdata pro la belaj sloganoj kaj ĉiam oni sciiis, kie li troviĝas: li estas ĉe la slogano kaj ordigas literojn. Li venadis tien pli kaj pli ofte, eĉ vespere – tamen subite, antaŭ kelkaj monatoj, la slogano komencis deŝoviĝi malsupren, kaj preskaŭ ses monatojn pasis, antaŭ ol ili malkovris la veron.

Kaj okazis tiel: paŝtisto de la kooperativaj ŝafinoj (unu el tiujn, kiujn oni elkulakigis, kondukis post tagiĝo ŝafinojn sur la herbejon kaj allogis ilin al la slogano de Bafti (tiumomente en la okuloj de Bafti aperis la sekreta brilo de

¹⁵¹ Troviĝas en la libro “Tregime” eldonejo Toena Tirana 2009

la malkovrinto) . „Diable, por kio la ŝafinoj bezonu mian sloganon?” – plendis Bafti kontraŭ la malfavora sorto, treege laca pro ĉiutaga ordigado de la slogano. Ke la ŝafinojn tentis la vortoj: *La plej danĝera malamiko estas tiu malamiko, pri kiu oni forgesas*, ĉi penso eĉ ne venis al lia kapo.

Bafti multfoje petis la lernejestron, ke li ŝanĝu la sloganon, „malsorĉu” ĝin, sed li ne intencis montri sian favoron.

Fine Bafti komencis dubis pri la „senkulpeco” de la ŝafinoj. Li atente rigardis la deklivon ĉirkaŭ la slogano kaj ĉiujn suspektojn konigis al la partia sekretario. „Strange – li pruvis – multaj ŝafinaj padoj kuras malproksime de mia slogano kaj estas eĉ pli oportunaj por la bestoj. Do, kial ili elektas tiujn ĉe la slogano? Ili ja ne havas tiom da kuraĝo, kiom la kaprinoj, ili malŝatas riskon”.

Por klarigi la aferon, helpis onidiroj, ke la paŝtisto komencis lastatempe aĉetadi en la vendejo pli multe da salo ol kutime. Do, li estis ruza vulpo – plenmane li prenis salon kaj allogis la ŝafinojn al ambaŭ vortoj „malamiko”, ke ili leku.

La suspektoj montriĝis pravaj – oni ja scias: la ŝafinoj ĉiam kuras stulte al salo. Tuj estis informita la regiona fukciulo de la polico kaj fulmrapide oni mobilizis grupon da volontuloj, ke tage kaj nokte ili gardu la sloganon de Bafti. Ekpensu: kampuloj sidis inter la arbustoj kaj dum horoj atendis ĝis venos la ŝafinoj kun la paŝtisto!

Longe sako alenon ne tenos, ĝi baldaŭ elvenos. Frumatene la kooperativaj ŝafinoj, detruantaj la literojn, kiujn penege kunmetis Bafti kaj liaj lernantoj, estis kaptitaj de gardistoj ĉe la faro. La kampuloj sin ĵetis sur la paŝtiston (laŭ signo de tiu regiona funkciulo de la polico) kaj faligis lin.

La paŝtisto neadis ĉion, li kriis, ke li ne kulpas, ke nur la spuroj de la ŝafinoj estis kvazaŭ trovitaj ĉe la slogano, ke finfine la bestoj laŭleĝe havas nenian respondecon kaj similajn stultaĵojn – sed jam du, tri tagojn poste oni senmaskigis lin antaŭ la laboranta popolo kaj arestis pro malamika agado, kvankam ĝis la lasta momento li provis defendi sin.

Poste la lernejestro ŝanĝis por Bafti la sloganon kaj la monteton. Li donis unu el tiuj, kiuj enhavas la vorton „Gloron” aŭ „Vivu”. Pri tiaj sloganoj, kompreneble, ne estas multe da laboro. Cetere ili ĉiam aktualas. Krome – Paŝku mallaŭtigis sian voĉon – ne gravas la enhavo de slogano, sed ĝia longeco. En la momento, kiam li ricevas sloganon, li komencas instinkte kalkuli literojn.

Per ĉi tiu okazaĵo Paŝku finis sian paroladon pri la estonta kariero de Andreo.

Du tagojn poste la lernejestro vokis Andreon, konigis al li la devojn de edukisto, montris la okuparon kaj donis aliajn taskojn. Kiam ili venis al la slogano, li diris:

- Vi estas novulo, do vi ricevos lokon proksime al la lernejo. – Koncerne la enhavon, hmm – li malfermis sian ruĝan notlibron, hezitis dum momento kaj aldonis - vi povas elekti. Restis al mi du sloganoj: *La Partio – estas armilo de la laborista klaso* kaj *For la imperiismon*.

Andreo, jam konante la aferon, balbutis nekuraĝe:

- Mi preferus la sloganon pri la imperiismo.

- Tre bone – la direktoro ne obstiniĝis. – Ĝuste tio estos facila. Pri ĉi tiu loko okupiĝis antaŭe Forok, do ĝi estas tretita per la piedoj, sed Forok baldaŭ emeritiĝos, havas pli kaj pli malmulte da fortoj, la aĝo kadukigas lin, vi komprenas. Nu, sukceson – li finis.

Sekvatage post la lecionoj Andreo iris kun lernantoj al sia loko. Ili marŝis preskaŭ duonhoron. La tereno estis ebenigita, sed la ĝisnuna slogano prezentiĝis mizere. Sed li ankoraŭ trovis iom da loko por la nova slogano.

Kiam li dividis literojn, la infanoj kverelis laŭte. Laŭ sia propra kalkulo pri la nombro da ŝtonoj bezonataj por meti ĉiun signon, ili klopodis akiri la literon – se eble – malpleje lacigan. Unue la kaŭzo por la kvereloj estis „i”, poste „l”, „r” kaj tiel plu

Surprizita per la tumulto, Andreo demandis por esti justa: „Kaj kiel disdonadis literojn instruisto Forokj?”

- Ah, diversmaniere, unue laŭ la nomlisto, poste la pli facilajn literojn li donis al la knabinoj, kaj punktojn super „i” aŭ komojn al la malsanuloj,

- Sed ankaŭ tio okazadis laŭ ŝato – aŭdiĝis iu voĉo.

- Do, ni jam finu tiel, kiel ni komencis – diris Andreo. – Ankaŭ mi metos unu literon.

- Ne, sinjoro instruisto – oponis la lernantoj – pli bone gardu la ordon.

Poste ĉio okazis glate. Ili finis post tri horoj, trotetante inter arbustoj kaj ŝtonoj kiel malpigraj abeetoj. Finfine la lernantoj mem rekonis, ke la slogano0 estas bela.

Lacaj, ili diris ĉien, kun sakoj kaj iloj sur la ŝultroj, laŭvice kriante al Andreo: „Ĝis la revido, sinjoro instruisto!” Li sentis premon en la gorĝo, kiam li vidis ilin malsatajn, en mizera vesto, sed feliĉajn. Sendube eĉ ne unu lernanto komprenis – aŭ ne provis kompreni – la signifon de la slogano.

Andreo malrapide revenis hejmen, laca, sed kvieta, kun la sento de la bone plenumita devo. Li falis sur la liton kaj ekdormis ŝtone.

Matene li renkontis aliajn instruistojn, Neniu aludis sloganon.

Poste li vidis, kiel pigre, kun jakoj ekĵetitaj sur la ŝultroj kaj kun cigaredoj buŝangule, ili kviete pretigis sin al la foriro, parolante: „Mi ankoraŭ rigardos mian sloganon”. Tiel prezentiĝis iliaj distroj. „Ĉar, efektive, kion alian oni povus fari en ĉi truaĉo?” – pensis ofte Andreo.

Poste ankaŭ li al kutimiĝis al tio, ke almenaŭ unufoje en semajno li vizitadis la sloganon. Li purigis ĝin de folioj, polvo kaj koto, plibonigis iun literon, ripozis momenton apude kaj salutis kampulojn revenantajn post laboro.

Malpli ol kvin monatojn poste estis ŝanĝita la slogano de Andreo Kaj ĝuste oni ŝanĝis la sloganojn al plej multaj el la instruistoj.

Paŝku klarigis, ke la ŝanĝo de la sloganoj ne okazadis tiel ofte, la Partia Komitato faris tion laŭ strikte observataj kriterioj. Disponigante sloganojn ĝi konsideris multajn faktorojn, kiel la politika konsisto de la aŭtoritatoj en la distrikto, provinco aŭ regiono, la nombro da kulakoj, internigitoj, ordinaraj kaj politikaj malliberuloj, la nombro da komunistoj, la grado de la ekonomia progreso de regiono, la rikolto-kvanto da vintra greno, la nivelo de la batalo kontraŭ parazitaj en la agrokulturo, la historiaj-kulturaj tradicioj de distrikto aŭ la eksterordinara situacio en regiono. Ekzemple oni rakontis, ke kiam foje la lernejestro kaj instruistino kun dubinda biografio estis kaptitaj sen aliaj personoj en la ĉambro, la regionaj aŭtoritatoj tuj decidis ŝanĝi la sloganon: *Vivu la proleta internaciismo al Gardemo, gardemo, ĉiam gardemo kaj Plifirmigi la proletan moralon.*

Kutime la divido de la sloganoj estis la lasta punkto dum la kunsido de la pedagoga konsilio, sed la instruistoj plej ofte divenis, ĉu okazos la nova divido aŭ ne. Ĉar unu tagon pli frue sekretario Sabafi estis vokata al la Partia Komitato, kaj kiam li revenadis, plej bone estis teniĝi malproksime – li sidis rigida kaj morna kun sento de la tuta politika respondeco.

Sabafi bonege sentis la scivolon de la instruistoj, dezirantaj – kiel eble plej rapide - ekkoni la enhavon de nova slogano. Fierege li salutis ilin dekstre kaj maldekstre, kaj tiam – pli ofte ol kutime – ili invitis lin al sia domo. Multaj enviadis tion al Sabafi.

Ĉi-foje la direktoro klarigis, ke la ŝanĝo de la sloganoj okazas pro la atendata vizito de membro de la Politburoo en iu urbo norde kaj pro la veturo de lia aŭtomobilo proksime al ilia vilaĝo.

Dum la divido de la sloganoj malkaŝe sentiĝis ekscito kaj streĉo inter la instruistoj. Ĉar la longeco kaj enhavo de slogano decidis la sencon de ilia plua vivo: montris simpatian aŭ malsimpatian de la gvidorganoj.

La direktoro mallaŭte legis la nomon de instruisto, kaj poste la sloganon. En la klasĉambro fojfoje estis aŭdeblaj suspiroj de plifaciligado aŭ sufokataj krioj de teruro.

La streĉo montriĝis post la slogano de Diana, instruistino el Tirana, kiun Andreo preskaŭ ne konis. Ili renkontiĝis du aŭ tri fojojn sur la ŝoseo, atendante, post semajno da laboro en la lernejo, „okazon” por veni al la ĉefurbo. Tial ke la ŝoforoj ĉiam preferis kunpreni junajn knabinojn, Andrea kutime ankoraŭ longe staradis post la forveturo de Diana, ofte ne ĝisatendante alian kamionon. Senfervore li revenadis al la vilaĝo, kaj la sekvan tagon pasigis ĉe la slogano.

Oni ne scias kial, sed la direktoro malamis Dianan. Tio fariĝis evidenta, kiam li donis al ŝi la kilometran sloganon: *Ni turniĝu al la montaro kaj montetoj, ni faru tie fruktodonajn kampojn.* Sed ĉi-foje la slogano havis sesdek du literojn kaj estis jena: *Oni devas pensi, estas necese labori, oni devas vivi, same kiel revoluciuloj.*

Pro kolerego tremis la lipoj de Diana. Ŝi volis ekregi sin, sed ne povis. Finfine ŝi eksplodis:

- Mi sciis, dekomence mi sciis!

- Kion vi sciis, kamaradino? – senemocie demandis la direktoro.

- Mi ne deziras tion, kamarado direktoro! Kiom longe vi traktos min tiel?! Estas malhoneste turmenti min per sloganoj kaj mi ne scias, ankoraŭ per kio!

Pro furiozo rompiĝis la voĉo de Diana. Ĉiuj instruistoj sidis rigidaj. Neniu kuraĝis aŭdigi eĉ vorteton.

La direktoro – kvazaŭ nenio estus okazinta – daŭrigis sen konfuzo:

- Mi ne komprenas vin. Vere mi ne komprenas. Kie vi vidas turmentadon? Kaj eble vi havas ion kontraŭ la slogano? – li ebleklis subite. – Estas la sama slogan, kiun kamarado Enver diris en la 7a Kongreso.

La efekto estis paraliza. Sen kaŝi malaman rigardon, Diana silentiĝis, ne kuraĝante paroli. La instruistoj strabe rigardis ŝin kun kompatado.

La silenton interrompis Gjini, modestega instruisto. Balbute kaj kun tremantaj manoj li proponis la solvon, kiu povus malfortigi streĉon:

- Kamarado direktoro, ĉu mi povus interŝanĝi mian sloganon *Marsĵi kun la tempo-spirito* al la slogano de Diana?

- Ne, decide ne – malpermesis la direktoro. – Ni ne sidos ĉi tie la tutan tagon kaj interŝanĝados sloganon laŭplaĉe! La sloganaj estas politika devo, kaj se iu havas ion kontraŭ metado de la sloganaj, ni parolos alie – li finis.

Elirante post la kunsido, Andreo aŭdis, kiel Gjini flustris al Diana: „Ne ĉagreniĝu, ne koleru. Mi iros kaj faros vian sloganon, ĉu bone? Unu aŭ du fojon mi revenos hejmen pli malfrue kaj la fino! Aŭ iun posttagmezon ni iros kaj metos ĝin kune, ĉu vi volas...?”

Sed dronante en pensoj, Diana ne aŭskultis lin.

„Ho, kiel belega ŝi estas!” – pensis Andreo, vidante ŝian suferplenan vizaĝon.

Li ricevis la sloganon *Ju pli forta estas la Proleta Diktaturo, des pli fortas la Socialisma Demokratio*. Li ne terurigiĝis pro ĝia longeco. Li eĉ sentis alfluan de energio, kiam li aŭdis la opinion de la direktoro:

- Andreo, viaj sloganaj bone impresis min, bravulo!

- Dankon – ekĝojis Andreo.

Du jarojn li zorgadis pri la sama slogano. Li vizitadis ĝin ofte, kaj kiam semajnfine li ne volis sidi hejme kaj sentis la solecon, ĝi servis al li kiel la lasta savilo. „Gloron al Dio, ke mi ĝin havas! Se ne tio, kion mi povus fari en ĉi tiu dezerto?” – li pensis dum purigado kaj polurado de la ŝtonoj.

Iun aŭtunan tagon, kiam sur la malplena ludoplaco ĉe la lernejo li fumis cigaredon, li renkontiĝis kiun Diana.

- Kion vi faras? – li demandis.

- Nenion – ŝi respondis.

- Bela vetero – li rimarkis.

- Jes.

- Do, ni iru al la sloganaj.

- Kiucele? – li aŭdis. – Delonge ne pluvis.

- Kaj folioj... Folioj povis fali sur ilin?... Cetere, kiel vi volas.

- Bone – ŝi konsentis sen fervoro.

Malrapide ili iris sur la pado.

Ĉe la torrento, kiel la vojeto disbranĉiĝis, Diana prenis akvon en la polmojn, malsekigis sian vizaĝon kaj harojn, denove ŝi ĉerpis akvon kaj ŝprucigis la vizaĝon de Andreo. Li estis konfuzita. Diana ekridis kore, sed li rapide trankviliĝis kaj faris la samon. Tiam ŝi ankoraŭfoje ŝprucigis lin per akvo kaj forkuris.

Ne estis necese ludi malsaĝulon, Andreo kuraĝiĝis, ĉerpis akvon per ambaŭ polmoj, kuris post ŝi, atingis la knabinon ĉe la arbo, respiris profunde kaj ŝprucigis. De la ŝultroj de Diana la akvo fluis malsupren, la malseka robo kelkloke algluiĝis al la korpo. Nemulte pensante Andrea ĉirkaŭprenis ŝian kolon kaj alprenis ŝin forte kiel infanon.

Sed la knabino elglitis kaj siblegis:

- Ne!

- Kial ne? – li elbalbutis, kaptante spiron.

- Ĉar mi ne volas – ŝi respondis kaj foriris malrapide al sia slogano sur la monteto.

„Kial, diable, ŝi min ŝprucigis per akvo, se ŝi ne volas?” – ekĝemetis Andreo kaj ĉagrenite li trenis siajn piedojn en direkto al sia slogano. Efektive la ŝtonoj estis puraj, ili konservis eĉ la freŝan blankon de kalko, tie kaj ĉi tie kuŝis nur kelkaj sekaj folioj. Li kolektis ilin kaj ne sciante, kion plu fari, li ekiris sur la monteton de Diana.

Li ekmiris vidante, ke ŝi sidas apud la sloganon *Oni devas pensi, estas necese labori, oni devas vivi, same kiel revoluciuloj*, superŝutitan per folioj.

Ŝi estis kvazaŭ spiritforestata. La robo ankoraŭ ne sekiĝis.

Li eksidis apude kaj diris pente:

- Mi petas vian pardonon.

- Pro kio? – ŝi demandis.

- Pro tio, kio okazis.

- Aĥ, mi preskaŭ forgesis.

- Kial vi ne forprenos la foliojn? – li demandis.

- Tiel ĝi plaĉas al mi pli multe: tuta en folioj, kaj ne tia blanka, kiel en malsanulejo. Kun folioj estas pli romantike, ĉu ne? – Diana impresis, ke ŝi parolas al si. – Kvazaŭ ĝi esprimus alion kaj estus la revolucia-romantika slogano.

- Revolucia romantiko... - murmuris Andreo kaj ambaŭ ekridis. – Malgraŭ tio ni devos ordigi ĝin – li konstatis kaj komencis forbalai la foliojn.

Diana observis ĝin el sub la duone mallevitaj palpebroj. Post momento ŝi ekstaris, malrapide alproksimiĝis, forĵetis hastmove folion kaj delikate tuŝis la manon de Andreo.

Li ne reagis. Li estis laboranta kun mallevita kapo.

Tiam ŝi kunpremis lian manon, rigardis en la okulojn, kaptis la kapon per ambaŭ polmoj, turnis kaj subite kisis lin.

Ili falis sur la molan teron, inter la vortoj „kiel” kaj „revoluciuloj”. Ili ne rimarkis, ke en la vorto „revoluciuloj” ili detruis unu literon per siaj impetaj piedmovo.

Al la vilaĝo ili revenis malfrue vespere.

Sekvatage unu salutis la alian indifere, kvazaŭ nenio estus okazinta. Sed de tiam ili vizitadis pli ofte siajn sloganojn.

La monotonecon de la vilaĝa vivo interrompis la okazaĵo kun Lleshi, plej aĝa instruisto, laboranta en la malgranda, unuklasa filio de la lernejo de Andreo, en vilaĝo atingebla post du horoj da marŝado ĝis la kooperativa centro. Laŭlege la direktoro devis vizitadi ĉi lernejon du fojojn en jaro. Sed ĉar ĝi troviĝis malproksime, li venadis tien pli kaj pli malofte.

La katastrofo okazis dum la lasta kontrolo, kiam en iu forlasita ravino, proksime al la lernejo de Lleshi, la direktoro – kun mirego – trovis la sloganon *Vjetnamo venkos*.

Li staris rigida. Jam preskaŭ dek jarojn Vjetnamo estis libera! Sed – pli malbone – la slogano estis tre bone zorgata, eĉ kun videblaj freŝaj kalko-spuroj.

Komence la direktoro ne sciis, kion fari. Li ŝatis Lleshion, des pli ke ili ludadis kune ŝakon. Lleshi mem distingiĝis per granda sindonemo al la devoj kaj ne apartenis al tiuj, kiuj ŝercemas. Tamen li ne povos elturniĝi senpune. Ĉar la direktoro estus akuzita pro la manko de gardemo.

Do, en la plej baldaŭa kunsido la direktoro diris, ke al la taga ordo li aldonos la aferon de Lleshi.

En la tago de la kunsido Lleshi venis du horojn pli frue. Estis malagrabla rigardi, kiam – flava kiel vakso – li fumis cigaredon post cigaredo, devigante sin al kvieto kaj kolegeco.

En iu momento li vokis al la instruistoj sur la ludejo:

- Sinjoroj, delonge ni ne ludis – eble ni aranĝu ŝakokonkurson?

Paŝku rigardis lin kompateme kaj diris:

- Lleshi, kiu nun pensus pri la ŝakludo?

- Vi vidus, Paŝku, se ni ludos, mi venkos plene – Lleshi ridis laŭte.

Sed neniu el la instruistoj ekridis.

Dum la kunsido – ĝis la momento, kiam estos pritraktita la afero de la slogano pri Vjetnamo – ĉiuj aŭdis, kiel la piedo de Lleshi mallaŭte frapfrapas la benkon. Li havis malfacilajn momentojn. Li jam al kutimiĝis al senĉesa laŭdado, kaj hodiaŭ ne okazos same.

La direktoro prezentis la aferon mallonge. Ŝajnis, ke li volas pritrakti ĝin laŭ formala maniero. Vortavare li rakontis pri la okazaĵo, kaj poste li petis Lleshion:

- Diru, kiel tio okazis?

- Kio okazis? – Lleshi ekmiregis.

Silentiĝis. Lleshi ekstaris kaj mallerte serĉis ion en la poŝoj. La ceteraj kun atento observis liajn movojn. Finfine Lleshi elprenis ĉifitan paperfolion kaj tiam klariĝis, ke li pretigis sian parolon skribe.

Li kroĉis la okulojn al la paperfolio, sed ne povis elbuŝigi vorton. Pro aflikto li ne komprenis, ke li tenas ĝin rerturnita. Gjini, kiu sidis apude, flustris:

- Streĉu vian atenton, Lleshi, rigardu, kiel vi tenas la folion!

- Aĥ, dankon, Gjini – suspiris Lleshi kaj ĉirkaŭrigardante li komencis:

- Kamaradoj...

Li ne diris eĉ la sekvan vorton, ĉar la direktoro interrompis al li:

- Ho, neee, Lleshki, ni ja ne bezonas ĉi tie grandajn disputojn! Rakontu, kiel okazis pri tiu slogano kaj ni finos la kunsidon!

Oni devus nur kompati Lleshion. Liaj okuloj kun malhelaj ombroj sube montris, kiom longe li penigis sin, por skribi ĉi parolon. Sed ĉiuj volis – kiel eble plej rapide – fini la kunsidon, do Lleshi miksante vortojn klopodis mallonge rakonti ĉion.

Laŭ li – tro fervora partia sekretario kun la nomo Nik obstiniĝis antaŭ multaj jaroj, ke sloganoj estu metataj eĉ en la plej foraj lokoj. „Kie estas nur eble”, li diradis. „Tie, kie oni vidas ilin kaj kie ili ne estas videblaj”.

Lleshi ricevis la sloganon pri Vjetnamo kaj pretigis ĝin laŭ ĉiuj reguloj. Baldaŭ poste ĝi estis forgesita kaj neniu diris al Lleshi, ke li ĉesu okupiĝi pri la slogano, do ĉiusemajne, post la lecionoj, kun lernantoj aŭ sola, li zorgadi tiel, ke ĝi aspektu plej freŝe.

- Nu, bone, sed Vjetnamo delonge estas libera! – kriis Sabafi.

- Ili ja donis al mi tiun sloganon kaj mi ripetas: neniu diris, ke mi ĉesu zorgadi pri ĝi – malcedis Lleshi, konvinkita pri la propra senkulpeco.

La plua diskuto ne havis sencon. Oni povis riproĉi al Lleshi nur la malbonan konon de la internacia situacio.

- Kion oni povus atendi de li? – flustris Paŝku al Andreo.

Sed kiam la direktoro, fermanta la kunsidon, diris senintence, ke al Lleshi mankis „la ĝusta engaĝiĝo en observadon de la aktuala internacia situacio”, tiu respondis tuj:

- Mi ne akceptas viajn vortojn! Se mi bone scias, al Vjetnamo kroĉadis sin kaj plu kroĉiĝas la kapitalismaj landoj.

- Jes, kompreneble – murmuris la direktoro, kolera, ke li tuŝis ĉi temon. , - Rapide forigu la sloganon kaj estos la fino por la tuta afero.

La instruistoj skuadis la kapon jese al la direktoro, kolektis siajn aĵojn kaj pretigis sin al foriro, jam sentante, ke li elturniĝis senpune, ne cedis tiel facile.

- Kun via permeso, kamarado direktoro! – li leviĝis kaj daŭrigis kun interna fervoro: - Kamaradoj, mi klopodis labori honeste, gardi la sloganon kiel necese kaj...

- Ho, ne, Lleshi – la direktoro tute perdis sian paciencon – neniu dubas pri via honesteco! Forprenante la sloganon neniu punas vin, sed komprenu: ĝi estas malktuala de jaroj!

- Bone – plivigliĝis Lleshi – donu al mi unu el tiuj, pri kiuj oni diras aktualaj.

- Kion mi donu al vi?! – la direktoro muĝis de furiozo. – Kiun sloganon mi donu por tiu merda truaĉo?!

Tiam Lleshi – konvinkita, ke la direktoro volas ekscii, kiu slogano estas bezonata – deklamis:

- Nu, kiun? *Jankioj, la manojn for de Vjetnamo.*

La instruistoj elbuŝigis la kolerplenan „hooo”, kaj la direktoro – sentante, ke li havas nenian ŝancon daŭrigi la seriozan kunsidon – tuj fermis ĝin.

La instruistoj saltleviĝis, rapidante al la pordo. Lleshi eliris kiel la lasta. Silente li elprenis cigaredon, bruligis ĝin malrapide kaj profunde enspirante fumon li elflustris: „Mi jam estas perdita”

La novaĵo, ke Lleshi ne ricevis sloganon, hastis fulmrapide tra lia vilaĝo.

La edzino de Lleshi, Maria, sidis de tiam kun acida mieno kaj teniĝis malproksime de siaj koleginoj el la brigado.

Kelkajn tagojn poste amikino demandis ŝin kompateme:

- Ĉu tio, kion babilas ĉe ni homoj, estas vero?

- Pri kio vi pensas?

- Ni aŭdis, ke al via edzo, Lleshi... (mi pardonpetas, tiel ni aŭdis) – estis forprenita la slogano. Tio signifas, ke li restis sen ajna slogano.

Maria hontigite mallevis la kapon.

- Jes – ŝi respondis – tio estas vero kaj mi diros al vi sincere, ke mi ne ĉagreniĝas tiom pri ia slogano, kiom pri Lleshi. Ni perdis la tutan kvieton. Li ne dormas, nek manĝas – eĉ pri niaj infanoj li ne zorgadis tiel, kiel pri tiu slogano.

La amikino provis konsoli ŝin.

- Ne ĉagreniĝu, okazos nenio granda. Li forigu ĉi sloganon kun tiu ŝtato – (kiel ĝi nomiĝas? Tio elflugis el mia kapo) – li iom sidu hejme sen slogano, kaj kiam ĉio estos forgesita, li povos skribi peti novan sloganon.

- Vi pravas – konsentis Maria – la tuta zorgo estas en tio, ke li perdis ĉian fervoron kaj nenio l n ĝojigas. Li estas rompita per tiu ĉi afero. Li ne al kutimiĝis al kritiko.

Tiam la amikino diris ion, kio mirigis la tutan brigadon:

- Por sankta kvieto li elpensu sloganon kaj metu ĝin kaŝe, sur la propran korton – tiun kun Vjetnamo aŭ iun alian. La infanojn vi havas grandajn, ili helpos vin kaj zorgados pri via slogano.

Maria estis konsternita.

- Ĉu kaŝe? – ŝi demandis.

- Kial ne? – insistis la aliaj koleginoj.

Ĉu Lleshi obeis al iliaj konsiloj – oni ne scias. Estas nur certe, ke neniam poste li petis novan sloganon.

Du semajnojn post tiu okazaĵo la direktoro kun Sabafi vokis Andreon en la kabineton kaj diris metante la manon sur lian ŝultron.

- Nun vi ricevos ion eksterordinaran. Ĉu vi vidas la muron de la tenejo sur la monteto? Malbelan kaj tiel malplenan, ke ĝi frapas ĉies okulojn? Kune kun kamarado Sabafi mi decidis, ke oni devus tie pentri oleofarbe grandan sloganon.

Sabafi kapjesis.

- Vi devos fari tion sola, ĉar al la lernantoj oni malpermesas tian laboron. Vi ricevos eskalojn, penikojn kaj farbojn. La slogano estas jena: *Vivu la diktaturo de la proletaro*.

Andreo akceptis sian taskon kviete. Sed forironte el la kabineton, li turniĝis kaj demandis ĝentile:

- En kiu koloro estu la slogano?

La direktoro ridetis malice kaj strabante Sabafion li respondis:

- Memkompreneble, Andreo. En la ruĝa.

La tenejo estis griza, polvoplena domaĉo. El ĝiaj muroj elstaris kelkloke grandaj, dikaj kaj akraj ŝtonoj. Andreo ne veturis por dimanĉo al Tirana kaj laboris du tagojn senĉese: sabate posttagmeze li komencis mezuri la muron, kaj dimanĉe li pentris literojn per minio (la ruĝan oleofarbron li ne trovis en la magazeno). Dum li estis pentranta, la likvaĵon ensorbis fendetoj en la muro, la literoj perdiĝis sur malebenaj ŝtonoj, la malnova stukaĵo defalis post tuŝoj de la peniko. Andreo ne antaŭvidis tiajn malfacilaĵojn.

- Sukceson, instruisto Andreo – de tempo al tempo salutadis lin knaboj. – Tre bele ĝi prezentiĝas.

- Dankon! – li respondadis sur la eskalo, laboregante obstine, polvokovrita kaj farboŝmirita de la plandoj ĝis la kapo.

Marta, estrino de la brigado por maizo-kulturado, gradika belulino, konsilis:

- Atentu pri viaj manoj, instruisto Andreo! Se la farbo difektos ilin, vi ne plaĉos al la knabinoj en la ĉefurbo.

Andreo sincere ridis pro la ŝerco.

Vespere li rekonis, ke la slogano ne prezentiĝas kiel necese. Por la antaŭa slogano, sur la monteto, li povis ebenigi la teron. Ĉi tie, pri la muroj de la tenejo, nenio estis farebla.

Li finis pentri malfrue, nekontenta pri sia laboro. Li havis malbonan antaŭsenton – kaj li ne eraris.

Du tagojn poste, la direktoro kaj Sabafi alvokis lin urĝe.

- Pro kio vi fuŝis ĝin tiel, Andreo? Vi alarmis la tutan distrikton – eksplodis la direktoro (oni diradis, ke en furiozo li ne estas bridebla)

- Kial? – Andreo demandis feblavoĉe.

- Nu, „kial?!“ – La direktoro ne sciis, kiel montri sian furiozon antaŭ Sabafi. – Per kio vi skribis la sloganon, per la manoj ĉu piedoj? – li strabis al Sabafi, kvazaŭ demande: „Kion ni faros pri li?“

Sed la vizaĝo de Sabafi estis rigida. La afero prezentiĝis multe pli aĉe ol malbone.

Andreo provis ekscii, kio vere okazis. Oni diris tion al li poste: estis la kontrolo de la sekretario pri aferoj de la propagando en la distrikto kaj kiam li kontrolis ĉiujn sloganojn el ŝtonoj, lia rigardo sin kroĉis al la slogano sur la muro de la tenejo. Li alproksimiĝis, silentis kvin minutojn kaj poste – kribrante la vortojn – li demandis Sabafion: „Kiu ĝin skribis?“

- Andreo! - li rapidis kun la respondo. – La instruisto de biologio, el Tirana, kamarado sekretario.

La sekretario revenis al la oficejo de la kooperativo, parolante eĉ ne vorton. Ĉiuj, kiuj sekvis lin, pensis, ke li forgesis pri la tuta afero. Sed tuj poste, kiam li eniris la ĉambron de la partia organizaĵo, li turniĝis kaj post momento da peza silento, ekblekis: „La slogano estis skribita sen konvena engaĝiĝo!“

La aludo estis klara.

Por Andreo venis nun tagoj da plena soleco. La instruistoj interparolis kun li malvarme. Sabafi evitadis lin.

Du tagojn poste Andreo estis vokita al la partia organizaĵo. La ĉefan riproĉon faris Sabafi, kiu serĉante ĝustajn, kaj ankaŭ trafajn esprimojn, komencis la diskuton jene:

- Kamarado Andreo, la partia organizaĵo volus ekscii, kio estis la kaŭzo aŭ prefere *realaj faktoroj*, kiuj puŝis vin, inklinitis aŭ – ni tion diru klare – *instigis* al tio, por skribi aŭ – dirante pli klare: *fuŝi*, do skribaĉi *Vivu la diktaturo de proletaro*? Ni diru malkaŝe. Mi volus, ke vi klarigu al la organizaĵo honeste, *kiu staras post tio*.

Ekregis la tomba silento.

Andreo komenis paroli: kulpas ia malbona speco de ŝtonoj, malpuraĵo sur la muro de la tenejo, malnova stuko...

- Nu-nu – fulmrapide interrompis Sabafi. – Ne bona stuko, ne bona tio, ne bona alio, tiamaniere mni finos neniam!

- Do, kion, laŭ via opinio, kamarado Sabafi? – demandis Andreo miri-gite.

- Vi ekscios ĝustatempe – kribis la vortojn Sabafi. – Sed estus pli bone, ke vi mem diru tion. La partia organizaĵo ne havas tro multe da tempo, por okupiĝi pri tiaj aferoj, bona knabo. Mi pensis, ke vi malfermos antaŭ ni la koron, kaj poste vi prezentos la principan memkritikon, sed mi vidas, ke tio ne okazos. Do, kamaradoj – li ektusetis kaj per la voĉo unu tonon pli laŭta daŭrigis – estas tro malmulte dirite, ke Andreo pentris la sloganon sen engaĝiĝo kaj ne tro kontenta pri la diktaturo de la proletaro. Tun ĉi aferon ni traktu pli atente. – Nun Sabafi nallonge analizis la klasbatalon, kaj poste diris:

- La ĉefa kaŭzo estu serĉata en la biografioj de parencoj de Andreo kaj rilatoj inter liaj familianoj dum la milito: unu onklo mortigis sin, la alian oni internigis, kaj Andreo mem... Ĉu vi ne vidas, kamaradoj-komunistoj, kiel ruze la malamiko – jes, la klasa malamiko! – provas sin kaŝi antaŭ la Partio, kiu bonvoleme donis al li sian helpan manon, por eltiri lin el tiu marĉo? Kaj li ne deziris tion.

Andreo ne komprenis, kio okazas. Li estis konscia nur pri tio, ke ĉi tie decidiĝas liaj vivo kaj sorto.

- Haltu, kamarado – unu el la komunistoj-veteranoj, konata pri la sento de justeco, interrompis al Sabafi. – Ni jam ne troigu. Sendube la instruisto kulpas, sed ne tiom multe, por nomi lin klasa malamiko. Mi konsilus iom malardigi vian fervoron.

Andreo jam ne sekvis tion, kion ili parolis. Fine ili petis, ke li forlasu la kunsidon, ĉar ili devos fari decidon. Pli-malpli unu horon poste eliris la ĉambron Sabafi kaj komunikis senemocie: „La partia organizaĵo decidis, ke ankoraŭ ĉi-foje vi ne estos punita. Nur ses monatojn da reedukado en produkta brigado”.

- Mi dankas vin – diris malvarme Andreo.

Li estis sendita al laboro en la brigado de Marta. La kampuloj akceptis lin malfideme. Li laboris pene kaj poste, kiam li revenis hejmen, li falegis elĉerpita sur la liton, kiel ŝtipo.

De tempo al tempo li devis legi gazetojn por la brigadanoj.

Marta traktis lin bone. Ŝi ofte ŝercadis pri liaj manoj delikataj „kiel ĉe infano”. Iun tagon ŝi eksidis apud li, kiam li tagmanĝis solece, kaj diris:

- Posttagmeze vi laboros ĉe la maizo-rikolto sur la kampo antaŭ la monteto. Se vi bezonos helpon, mi helpos al vi.

- Dankon – koleretis Andreo. – Mi ne bezonas vian helpon.

- Hoo – ekridis Marta – vi ne volas iom labori kun mi? – Ŝiaj dikaj mamoj ŝanceliĝis.

Andreo rigardis volupte.

Posttagmeze ŝi trovis lin inter altaj kreskaĵoj, kie li deŝiris foliojn de la maizaj spadikoj. Ŝi ankaŭ komencis fari tion. Poste, sen vortoj, li ĉirkaŭprenis ŝin kaj ili falis en koton. Des pli ili malpurigis sin, ĉar ekpluvis.

Ili revenis kaŝe tra krepusko, sur la maizkampoj, ĉiu en sia direkto. De malproksime bojis hundoj. Andreo havis veston malsekan ĝis la lasta fadeno.

Post ses monatoj Andreo revenis al la lernejo. La direktoro akceptis lin bone, kvazaŭ nenio estus okazinta. Li diris al li novan sloganon kaj kiam Andreo turniĝis forironte li aldonis:

- Mi forgesus, Andreo: lastatempe kelkaj instruistoj, tiuj malpigraj, anstataŭ naturajn ŝtonojn komencis uzadi por la sloganoj blankajn brikojn. Laŭdire tio devus pligrandigi estetikajn valorojn, sed praktike nur senmoraligis lernantojn. Ili komencis ŝteladi brikojn el la konstruejo, ĉiutage oni vidis, ke ili ŝtelas kaj venas al la lernejo kun tornistro sur unu kaj kun sako da brikoj sur la alia ŝultro. Kompreneble la Distrikta Partia Komitato tuj kontraŭstariĝis, sed – parolante sincere – tio senigis la sloganojn je la naturaj originaleco kaj spontaneco, kun kiuj la nacio esprimas proprajn opiniojn uzante tiucele lokajn rimedojn aŭ – dirite per aliaj vortoj – tion, kio falos en la manojn...

Andreo kaj la direktoro rigardis unu al la alia en la okulojn.

- Vi pravas, kamarado direktoro – afable respondis Andreo. – Mi atentis pri tio.

Kaj kiam li eliris malantaŭ la pordon, li komencis kalkuli enpense literojn de sia nova slogano.

Tra Albanio kun la francaj samideanoj



Pol kaj Mirej en la albana Riviero

Mapo de Albanio

Antaŭ du jaroj mi prelegis en Alzaso pri mia lando invitate de la loka e-asocio, estrata de s-ro Edmund. Eble tio instigis la samideanan paron Pol kaj Mirej esprimi la deziron viziti ĉi tiun malgranda landon de Balkanio. Ili anticipe pluesploris pri la lando per gvidlibroj en la franca, mapoj, artikoloj.

Finfine ili alvenis la 18-an de junio 2013 kaj restis ĉi tie ĝis la 1-a de Julio 2013. Certe ili mem verkos reportaĝon pri sia vojaĝo kiu sendube estos tre interesa. Mi nun notas la turojn kaj kelkajn momentojn de ilia riĉa ekskurso, aldonante ankaŭ fotojn faritajn de Mirej mem. Eble ĉi raporto instigos ankaŭ aliajn samideanojn viziti mian patruon..



ĉe beктаŝioj en Tirana ties ĉefsidejo karakteriza domo en Tirana, ortodoksa nova granda katedralo

La paro akomodigis en Freddy's hostel, situanta nur 200 m for de la placo "Skanderbeg", la urbocentro, kaj tiome ankaŭ de mia hejmo. Kontraŭ 20 eŭroj po nokto entute por dulita ĉambro ili ĝuis duŝejon, TV, aer kondiĉilon, interreton kaj simplan matenmanĝon kun kafo.

Malgraŭ la longa vojaĝo ekde ilia hejmo al Tirana (per trajno, du aviadiloj kun tranokto apud Parizo, preskaŭ sendorme) Mirej kaj Pol aspektis tute freŝaj por tuj entrepreni la unuan konadon de la ĉefurbo, tutan posttagmezon. Post longa promenado tra la bulvaroj, ni kafopaŭzis sur la teraso de iu pluretaĝa domo en la tiel nomata "Bloko", aparta kvartalo iam loĝata ekskluzive de la altaj kompartiaj kaj ŝtataj gvidantoj komunistaj.



Rondiranta kafejo sur la pinto de pluretaĝa domo Parko en Tirana Naĝejoj
 Ni vizitis ankaŭ tri ĉefajn preĝejojn: moskeon, katedralon katolikan kaj katedralon
 ortodoksan. Vespere mi invitis ilin en mia hejmo por modesta manĝo.



En la montaro Karakterizaj domoj en Berat Artur tostas
 La morgaŭon matene ni kune vizitis la Nacian Historian Muzeon kaj la alerion de la
 pentroarto.



Muzeo La pavilono de Patrino Tereza Parko en Tirana
 Posttagmeze ni “flugis” per telfero al la monto Dajti, ĉe kies piedoj kuŝas mem Tirana.
 Estis tre agrable tie, aparte en unu el la hotelrestoracioj nomata “La Akvofonto de la
 Feino (Albane: Gurra e Perrisë) , kie oni estis konstruinta kelkajn laŭterase sinsekvajn

fiŝajn akvorezervejojn. La freŝeco de la aero, la virga kaj densa arbaro, naturaj panoramoj, forigis de ni ian ajn lacecon kaj kapdoloron.



La Akvofonto de Feino

Telfero

Kvartalo en la muzea urbo de Berat

Ĵaŭde estis antaŭplanita vizito en la Ministerio de Kulturo kie nin renkontis la s-ro Ylljet Aliĉka, eksa albana ambasadoro en Parizo, nun konsilanto pri la eksteraj rilatoj. Ylljet proponis al Pol enesperantigi sian lastan romanon “Rakontoj pri internaciuloj”, laŭ rekomendo de samideano Tomasz Chmielik el Pollando, kiu jam estas tradukinte en Esperanto “La Sloganoj-n”- rakontaron de Ylljet. Estis amika konversacio en la franca, albana kaj Esperanto.



La kastelo de Berat

La mirinda valo de Valbona

Por la posttagmezo mi proponis al la francaj amikoj viziti ankaŭ alian religian institucion unikan, la mondan ĉefsidejon (ĉefavejo) de la beктаŝioj kiu troviĝas en Tirana ekde la jaro 1929, post kiam la tiama prezidento de la reformita Turkio, Kemal Ataturk, ne plu permesis ĝin en sia lando.

Revene ni haltis por vizito ĉe la hejmo de la samideano Shaban Hasani.



Bardhyl kaj Pol en Tirana

La lago de Butrint

Arkeologiaj fosadoj en Butrint

Pol kaj Mirej vojaĝis al Kruja (albana ĉefurbo dum XV jc) kaj Durrës kun kafopaŭzo en la kasteleto de Preza. Dum la tuta periodo ilin veturigis la taksio ŝoforita de Artur, tre

lerta kaj agrabla viro, parolanta iomete la italan, la anglan kaj rakontanta amuzajn anekdotojn. Krome li bone konis la landon kaj estis ankaŭ ia ĉiĉerono je mia manko.



La amfiteatro de Durrës



La vojo al la Riviera



La marhaveno de Dures

La sabaton la amikoj dediĉis tute al la ekskurso al Berat, 2400 jaraĝa urbo sub la protekto de UNESCO.



La kastelo



Karakteriza domo en Kruja



Tra la stratoj de Gjirokaster

Dimanĉe okazis la enlandaj ĝeneralaj balotoj. Tial mi lasis miajn amikoj liberajn. Dum la posttagmezo ni kune ekskursis al la kasteleto de Petrela sude de la urbo, Ĉikaze ni “provis” ankaŭ ambaŭ tunelojn novajn de la aŭtoŝoseo al Elbasan kaj esploris la naturon ĉirkaŭe. Revene kafopaŭzis en la artisma risorto KAME ĉe la bordoj de rivereto, apud la vilaĝo IBA.



La tuneloj de Krraba



La kastelo en Elbasan



La urbo Pogradec

La unuaj tagoj estis ia preparo por la longaj turekskursoj. Lunde kaj marde Pol kaj Mirej entreprenis dutagan ekskurson al Sudo laŭ itinero:

Tirana- Durrës- Apollonia (antikva urbo kiun laŭdas ankaŭ Cicero) - Karavasta (vasta marlaguno) - Ardenica (renoma monaĥejo sur la monteto) - Vlora (grava marhaveno kaj turisma urbo) - Llogara (nacia parko je alteco pli ol 1000 metroj) - Riviera (longa roka marbordo kun mirindaj plaĝoj en la Jonia maro) - Saranda (marhaveno kaj turisma urbo, tranokto tie) - Butrint (antikva urbo sub protekto de UNESCO, fondita de Enea de Trojo) - kasteleto de Lëkuras- Gjirokastra (muzea urbo sub la protekto de UNESCO) - Tepelena- Tirana.



Ardenica



Jonia maro



Amfiteatro de Butrint

Malgraŭ ĉirkaŭ 700 km da vojaĝo denove niaj amikoj aspektis tute senlacaĵ!



Marhaveno de Durrës



Muzeo en Kruja



Ĝardeno en Elbasan

Sekvis alia dutaga ekskurso orienten laŭ la itinero:

Tirana- Elbasan- Librazhd- Prrenjas- Pogradec (ĉelaga turisma urbo, trankokto tie) - Drilon (mirinda parko ĉe la fontoj de la lago de Ohrid) - Tushemisht (vilaĝo turisma ĉe la landlimo kun Makedonio, interalie famiĝinta pro la unika fiŝo Koran kaj ties bredejoj) - Sankta Naumo (renomata monaĥejo aparteninta al Albanio antaŭ la jaro 1925, nun en Makedonio) , - Maliq- Korça- Voskopoja (nacia montara parko kaj antikva urbo) - Tirana.



Lago de Pogradec-Ohrid



Saranda



Bajram Curr

Por iom “relaksiĝi”, la 28-an de junio, vendrede, ni planis unutagan ekskurson al nordokcidento laŭ la itinero:

Tirana- Lezha (antikva urbo) - Shëngjin (marhavena turisma urbo) - Shkodër (antikva urbo- centro de la iliraj ŝtatoj antaŭ pli ol 2400 jaroj) - Shirokë (ĉelaga pitoreska turisma vilaĝo) - Tirana.



La parko de “Blua Okulo”
Butrint

Muzeo etnografia en Kruja Antikva katedralo en

Restis du tagoj por esplori la nordorientan parton kaj Kosovon. Tiel ni sekvis la itineron: Tirana- Kukës (urbo ĉe la landlima, famiĝinta dum la milito en Kosovo 1998-1999 pro la fakto ke ĝi akceptis ĉiutage 120 000 rifuĝinton albanajn forpelitaj de la polico kaj armeo serba) - Prizeren (historia urbo en Kosovo) - Gjakovë (alia urbo en Kosovo) - Bajram Curr (ekstremnorda urbo en Albanio, tranokto tie) - Valbona (mirinda montara valo ĉe la albanaj Alpoj- daŭrigo de la plej longa eŭropa montovico komenciĝanta de la Svisiaj Alpoj) - Gjakovë- Prishtina (ĉefurbo de Kosovo) - Gadime (vilaĝo kie troviĝas mirinda originala marmora groto) - Prishtina- Kukës- Tirana.



Pol kaj Mirej ĉe la akvofontoj de Valbona regiono

Mirindaj pejzaĝoj de Valbona

Ankaŭ post tiu streĉa longa ekskurso la francaj amikoj tute ne aspektis lacaj. Ili invitis min kaj mian edzinon por vespermanĝi en la “aristokrata” restoracio “Gloria”, ne fore de la ilia motelo.



La Groto de Gadime
Valbona

Antikva ŝtona ponto de tajloroj en Gjakovë La rivero

La lasta mateno, la 1-a de Julio, estis bela suna tago. Ni atingis la aeroportan ĝistempojn kaj adiaŭis unu la aliajn tre feliĉaj ĉar ĉio kroniĝis sukcese. Pol sendis salutojn kaj dankmesaĝon el Parizo tuj post sia alveno.



La aragonitaj strangaj kristaloj en Gadime Karakteriza domo en Kruja

La kastelo de Elbasan

Bardhyl Selimi; Fotoj: Mirej; julio 2013